

Gaston
WARINGHIEN

LINGVO
kaj
VIVO



**ESPERANTOLOGIAJ
ESEJOJ**

AL LA LEGANTARO DE "STAFETO",

ĉu estas necese refoje prezenti profesoron GASTON WARINGHIEN, la aŭtoron, i. a. de *Eseoj I. Beletro*? Pri li mem multaj informoj estas prezentitaj sur la faldoklapoj de tiu riĉenhava verko. (*Eseoj II. Magio, Religio, Filozofio*, nun verkata, inda daŭriganto de sia pliaĝa frato, iam aperos same ĉe STAFETO.)

Sen troigo oni povas aserti, ke la nun prezentataj *Esperantologiaj Eseoj* superas ĉion ĝisdatan de la aŭtoro. Efektive, tiu ĉi volumo impresos al ĉiu konscia homo kiel la plei eksterordinara verko publikigita en esperanto. Eksterordinara, en la strikta difino de la vorto: ekster la normoj de aliaj esperantologiaj libroj.

LINGVO KAJ VIVO estas sumo pri esperanto rigardata kiel vivanta lingvo kaj socia fenomeno. Neniam ion pli densan, pli kompletan, pli sciencan, pli filozofie sentitan oni skribis — kaj en pli harmonia flua formo — pri tiu fenomeno, kiun la entuziasmoplenaj esperantistoj nomas «sia kara lingvo». Kaj kio donas ankoraŭ pli da aŭtoritateco al tiu monumento, tio estas la fakto, ke kuniĝas plej intime kaj konvinke en nia aŭtoro samtempaj fakaj lingvistikaj konoj de profesiulo kaj plej profunda, sciencstudita kompreno de la zamenhofaj verkaro kaj spinto.

Intimuloj de STAFETO rimarkos, ke en tiu ĉi libro troviĝas ĉiuj elementoj de tezo por filologia doktoriĝo — tezo, kiun la aŭtoro ne povis siatempe prezenti pro la malfaciloj kaj obstakloj de tia eldonado en franca lingvo. Tiuj elementoj prezentas la akirojn de kvardek jaroj de vivo sin dediĉinta al tiu idealo, kiun la «intelektuloj» rigardas neseriozaĵo, dum la aŭtoro multilate, multfoje kaj multloke pruvis, kian elstaran rangon li povus okupi inter seriozuloj, se li ne estus konstruinta sian tutan vivon super racia kaj scienca fido al esperanto.

Ĉiu studema leganto povos kontroli, ke la supraj vortoj tute ne estas troigaj: preskaŭ ĉiuj iom gravaj punktoj pri la lingvo, ĝia estiĝo, ĝia disvolviĝo kaj ĝia estonto, trovas tie ĉi, en senprecedencaj tekstoj kaj esploroj, funde ellaboritan — kaj ofte surprize prezentitan — studadon, prilumigon aŭ solvon. Tiuj esploroj, pritraktitaj sen pasio, sen subjektivismo, estas aparte gravaj pro la metodo aplikita de la aŭtoro kaj kiu baziĝas ĉefe sur la lingvo de Zamenhof, analizita laŭ la plej modernaj procedoj de la lingvistiko: statistikoj, determino de la preciza valoro de ĉiu esprimo en sia loko,

LINGVO KAJ VIVO

STAFETO



MOVADO · 1

GASTON WARINGHIEN

LINGVO KAJ VIVO

ESPERANTOLOGIAJ ESEJOJ

J. RÉGULO - ELDONISTO - LA LAGUNA

MCMLIX

LINGVO KAJ VIVO
ESPERANTOLOGIAJ ESEOJ

Libro originale verkita en esperanto

Busto de Zamenhof farita de la ĉeĥa skulptisto Em. Kodet

Kovrilo de John Hartley

IMPRESA GUTENBERG.—LA LAGUNA DE TENERIFE

DEPÓSITO LEGAL: TF 112-1959

MEMORE KAJ HONORE
AL
LAZARO L. ZAMENHOF
APOSTOLO DE LA PACO
MCCMLIX-MCMXVII



PRELUDO

«La perfido de la kleruloj»... Kiel ofte tiu fama titolo de la pamfleto de Juliano Benda revenis al mi en la memoron, ĉiufoje kiam mi havis okazon konstati la nescion de eĉ eminentaj filologoj pri la elementaj faktoj de internacia lingvo, ĝenerale, kaj, aparte, de Esperanto! Perfido, ne rilate al ni — ni ne estas tiel pretendemaj, kaj ni ja komprenus, se spiritoj pli sentemaj al la forma ol al la socia aspekto de la problemo preferus aliajn solvojn ol la nian. Sed perfido rilate al ilia profesio mem, perfido al la lingvistiko.

La tasko de tiu ĉi scienco estas efektive duobla: unue priskribi la ekzistantajn lingvojn, laŭeble klasifiki ilin en pli-malpli granda nombro da familioj, kaj tiele difini la pruvojn de parenceco kaj la regulojn de transformiĝo; due, dank' al la tiel akiritaj spertoj, analizi la funkciadon de la parolo, esplori, kiel psikologia procezo envortiĝas kaj fariĝas lingvaĵo, kaj tiele ekskizi kelkajn el la leĝoj de la homa pensado. La fina celo de la lingvistiko estus malkovri la originojn de la lingvoj kaj eĉ de la parolkapablo — se tiaj objektoj ne estus tiel malproksimaj kaj nebulkovritaj, ke multaj sciencistoj opinias ilin neatingeblaj.¹

En la plenumado de la unua tasko, la lingvistoj montris sin nelacigeblaj, fojfoje eĉ heroaj. Armitaj per siaj krajonoj kaj paperfolioj, ili ŝanceliĝis nek antaŭ la densego de la afrikaj aŭ sudamerikaj arbaregoj, nek antaŭ la malhomeco de la centraziaj aŭ centraŭstraliaj dezertoj, nek antaŭ la barado de Andoj aŭ de Himalajo. Apenaŭ vojaĝanto menciis nekonatan lingvon parolatan de cent aŭ ducent sovaĝuloj en malbenita angulo de la Nova

¹ Oni scias, ke aparta paragrafo en la statutoj de la Pariza «Société de Linguistique» malpermesas ĉian diskuton pri tiu lasta temo; kaj certe ne la ĥimeraj fantaziaĵoj de Marr aŭ de Stojan povus konvinki la anojn de tiu Societo ŝanĝi sian prudentan decidon.

Kontinento, aŭ estingiĝantan dialekton balbutatan de kvar aŭ kvin gekadukuloj en perdita vilaĝo de la Malnova, tuj ili starigas ekspedicion, kun filmaparato, magnetofonoj, stenotajpiloj ktp, kaj ili multege koste kaj piazorge kolektas tiujn rubojn de la homa lingvo-historio. Kiel ne admiri kaj laŭdi tian sindonemon, tian memoferon al grandioza tasko?

Dume, ĝuste sub iliaj okuloj kaj ĉe iliaj oreloj, en iliaj loĝurboj, ĉe la pordo mem de iliaj esplorinstitutoj aŭ parolmuzeoj, estas ĉiutage parolata iu lingvo en plena disvolviĝo; en la fenestroj de iliaj librovendejoj ĉiujare sin montras pluraj dekoj da verkoj en tiu lingvo; sur la paĝoj de iliaj gazetoj aŭ revuoj ĉiujare aperas pluraj miloj da informoj pri tiu lingvo. Kaj kiam vi demandas ilin pri ĝi, ili, en la plej bona okazo, respondas, ke tio ne estas ilia specialaĵo, kaj, en la plej malbona, ili, kun ironia liptordiĝo kaj ŝultrolevo, aludas pri la «stulteco» kaj «blufo» de la esperantistoj.

De post la dua mondmilito okazis en Parizo du universalaj kongresoj: unu de S. A. T. en 1949, kun 1.325 partoprenintoj, unu de U. E. A. en 1950 kun 2.325 anoj: ĉe ambaŭ oni oficiale invitis la ĉefajn profesorojn de Sorbonne, ke ili povu informiĝi kaj kontroli mem la informojn: eĉ ne unu montris la pinton de sia nazo. En la sama ĉefurbo, inter 1949 kaj 1956, esperantista kabareto, «La Tri Koboldoj», ĉiumonate faris prezentadon de kanzonoj, anekdotoj, skeĉoj ktp, ĉio, kio atestis pri la vivanteco kaj tuj-komprenebleco de la lingvo; pli ol unu fojon, mi proponis al lingvistoj viziti la ejon, kaj proprele aŭskulti kaj proprekule observi. Eĉ ne la rebrilon de la okulvitroj de unu ni ekvidis.

Pri la dua tasko de la lingvistiko, sama situacio. Vere, ni ne povas flati al ni, ke nia lingvo donus al esplorantoj la ŝlosilon de la pensofunkciado aŭ de la parolorigino. Tamen estas fakto, ke la uzado de unu sama lingvo far' de homoj edukitaj en plej malsamaj nacilingvoj, ke la maniero, kiel Hungaro, Italo, Ĉino, Anglo aŭ Japano adaptas sin al la vortfarado kaj frazarang'o de Esperanto, ke la reagoj de tiel diversaj spiritoj al la strukturo de lingvo, kiu ne estas trudita al ili de ekstere, sed kiun ili sentas sia propra, ĉio tio povus doni utilajn lumojn por la tiel diskutata demando, ĉu ekzistas ia absoluta gramatiko, ia baza logiko komunaj al ĉiuj homoj. Estas alia fakto, ke Esperanto publikiĝis en 1887, ke ĝi tiam estis

nur kabineta projekto sur kelkaj paĝoj de broŝureto, kaj ke de tiam ĝi fariĝis vivanta lingvo de kelkcent mil anoj — alivorte, ke, por la unua fojo en la homa historio, oni povis ĉeesti la naskiĝon de nova lingvo; temas pri tute alia fenomeno, kaj ege pli grava por la scienco, ol la simpla reaktiviĝo de «mortinta» lingvo, kiel la hebrea aŭ la ebra, kiuj havis en la pasintaĵo ampleksan literaturon kaj neniam estis vere ekster uzado, eĉ se nur skriba, eĉ se nur inter pastroj aŭ erudiciuloj; temas ĉi tie pri absoluta komenciĝo — kaj eble el la pristudo de tiel unika fenomeno la specialistoj povus tiri valorajn konkludojn kaj konstrui fortikajn hipotezojn pri la socia naturo de lingvo, pri ĝia tradicia kaj afekcia karaktero, pri la vojoj, laŭ kiuj ĝi disvastiĝas ktp. Nu, tiujn du faktojn la nuntempaj lingvistoj simple ignoras — ĉar estas tamen ne verŝajne, ke ili tute nescias ilin.

Vere, tia sinteno de la flanko de scienculoj estas apenaŭ kredbla. Imagu botanikiston, kiu ekrimarkus en la parkoj de sia urbo tute novan specion de vegetaĵo, nenie ĝis nun viditan nek klasifikitan; imagu zoologon, kiu malkovrus en la akvo de sia patruja rivero multiĝon de fiŝvariaĵo ankoraŭ konata kaj priskribita de neniu el liaj kolegoj. Kaj se vi vidus ilin, post la unua rigardo, rektiĝi kun indiferenta mieno kaj serene daŭrigi sian paŝadon al «pli seriozaj aferoj», ĉu vi opinius ilin fidindaj kaj konsciencaj sciencistoj? Tia tamen estas la konstanta sinteno de niaj lingvistoj.

Kelkaj el ili, konfesinde, de tempo al tempo konsentas diri kelkajn vortojn pri la «artefaritaj lingvoj», pri la dezirindeco de internacia komunikilo — sed ili tuj aldonas, ke tiucelaj esploroj ankoraŭ ne estas komencitaj de kompetentaj personoj, ke cetere ili postulos centon da jaroj por atingi la «perfektan, idealan» solvon, taŭgan por ĉio kaj superan al ĉio, ĉar halti ĉi-flanke de la perfekteco estus krimo kontraŭ la kulturo; niaj aŭguroj¹⁵⁷ eĉ konsentas konfidi, tre modeste, ke pri tiu ideala solvo ili havas jam kelkan ideeton: la unu insistas, ke ekzistu genitivo, por konformiĝo al la angla kaj ĝermanaj lingvoj; la alia, ke devas ekzisti nek kazoj, nek nombroj, same kiel en la ĉina; la tria, ke precipe oni forigu la infinitivon, ĉar tiu modo malaperis el la novgreka kaj el la novaraba ktp. Sed agi tiel, kiel postulas la plej simpla scienca honesteco, sed funde studi la aferon antaŭ ol paroli pri ĝi, sed trakti Esperanton same kiel

ĉian alian lingvon, t. e. ne elmeti juĝon kaj konkludojn pri ĝi tiel longe, dum oni ne praktikis kaj plene mastris ĝin — jen kion, krom la honorinda escepto de Profesoro Collinder ĉe la Uppsala Universitato kaj de Profesoro Collinson el la Liverpoola, ili kredas sin rajtigataj ne fari.

Tipa ekzemplo de la malseriozeco, kun kiu konataj lingvistoj agas pri Esperanto, estas jena letero de Profesoro Aurélien Sauvageot al sro J. Roux:¹

«Kiel mi elĉerpas min ripetante tion jam de 30 jaroj, Esperanto prezentas arkaikan provon. Ĝia kreinto deiris de neniel scienca koncepto de la lingvo, sed de antikviĝinta doktrino pri la principoj de la ĝenerala gramatiko. Li ankoraŭ restis en la opinio, ke la tipo nomata «fleksia» estas la perfekta tipo de lingvo. La deirpunkto de Esperanto estis do fiasko kaj la Esperantistoj [...] povas distri sin parolaĉante (*F baragouiner!*) aŭ skribante Esperanton, ili tamen pro tio ne alportas kontentigan solvon al la problemo de la lingvo internacia. Tio evidentiĝis brilege la 28an de Julio 1948, en la lasta laborkunveno de la Internacia Kongreso de la Lingvistoj. Ili kredis povi profiti la komenciĝantan diskuton pri la rezultoj de I. A. L. A., venante fari demonstron de laŭdira propagando. Unu el ili eĉ faris paroladon, el kiu neniu en la salono kaptis unu vorton, dum la sama parolado, eldirita en Interlingue estus probable komprenita de ĉiuj. Tiu negativa rezulto estas senapelacia verdikto. Nek miaj kolegoj, nek mi mem konsentos perdi iam nian tempon por eklerni idiomon, kiu prezentas efektive tiom da malfacilaĵoj, kiom ekzemple la angla lingvo, simple por la plezuro praktiki unu artefaritan lingvon».

Estas malofta plezuro komenti tian modelan tekston, en kiu ĉiu aserto baziĝas sur science kontrolita fakto:

1° En 1919, sro A. Sauvageot estis 22-jara, kaj lia tiama opinio pri Esperanto kaj la ĝenerala lingvistiko faris tiel malmultan bruon, ke mi ne sukcesis trovi eĉ unu eĥon.

2° La kreinto de Esperanto deiris ne de teoria doktrino, sed

¹ La originalo estas en franca lingvo, sed mi disponas nur la tradukon en Occidental, publikigitan en «Cosmoglotta», Januaro 1950, pĝ 3; mi retradukis ĝin en Esperanton.

de praktikaj provoj, kiel oni konstatos ĉi-poste. Cetere oni ne miru, se la altbrovaj lingvistoj neas al li ĉian kompetentecon pri interlingvistiko: iliaj antaŭuloj samfrunte asertis al li, ke lingvo internacia estas simpla neeblaĵo. *E pur si muove...*

3° Estas nun sufiĉe diskonata afero, ke Esperanto apartenas ne al la tipo «fleksia», sed ja al la «aglutina». Kurioze, ĝuste pri la aglutinemaj lingvoj Doktoro Sauvageot specialiĝis.

4° La aludita anonimulo estis Doktoro Ivo Lapenna, tiu Profesoro pri Internacia Juro, kies parolkapablo estas tiel difekta, ke lia tiama regno elektis lin por defendi la naciajn interesojn antaŭ la Internacia Kortumo de Hago.

5° Dum la propaganda parolado de Dro Lapenna, ĉeestis en la salono almenaŭ kvin lingvistoj, kiuj — malsame ol sro Sauvageot — scipovas Esperanton: espereble, ke ili lin iomete komprenis.

6° Profesoro Lapenna finis per ia ironia demonstrado de la neeblo difini la «naturecon» de internacia vorto: tiun demonstron multaj kongresanoj akceptis per ridoj kaj eĉ aplaŭdoj. Oni povas bonintence supozi, ke ili ĝin «ekkaptis».

7° La sola nediskutebla veraĵo estas, ke sro Sauvageot persone ne komprenis. Tio estas probable la unua fojo, kiam lingvisto fieras pri sia nekapablo kompreni lingvon.

8° Vere estas, ke li estus «probable» kompreninta Occidentalon: se mi estus sur lia loko, mi ne opinius tion sufiĉa kompenso por mia memestimo. Sed *de gustibus...*

9° Kaj el la fakto, ke li ne komprenis, Profesoro Sauvageot konkludas, ke li rifuzas lerni tiun enigman lingvon. Mi konas knabeton, kiu konkludis inverse. *Ex ore infantium...*

10° Jen kial sro A. Sauvageot, Profesoro pri finno-ugriaj lingvoj ĉe la Nacia Lernejo de Orientaj Lingvoj en Parizo, estis elektita de Unesko por prezidi la komitaton de la lingvaj ekspertoj, kunvokitaj esplori la demandon pri internacia artlingvo, en 1947. De tia kvalifikita prezidanto la verdiktoj povas esti nur senapelaciaj...

Mi evidente ne havas la ambicion, kun miaj etaj fortoj kaj suprajaj scioj, rivali kun tiel eminentaj sciencistoj, kaj plenigi la lokon, kiun lasas malplena ilia sindeteno. Sed dume tempo forpasas, memorindaĵoj perdiĝadas kune kun la homoj, kiuj ilin ĉeestis,

gravaj dokumentoj riskas malaperi pro senzorgemo aŭ akcidento, kiel jam tro ofte okazis; multaj malnovaj libroj detruigis, kun sia provizo da faktoj kaj instruoj; dume nova generacio de esperantistoj eksentas la bezonon de pli kompletaj informoj pri la estiĝo, la malvolviĝo, la evoluado de la lingvo. Tiuj konsideroj estu mia senkulpigo, pri la publikigo de la sekvantaj eseoj:¹ ne ĉiujn demandojn ili respondas, eĉ kelkajn eble ili malĝuste respondas — sed mi kredas, ke ili tamen montras la irendan vojon. Aliaj, pli junaj, atingu pli malproksimen: jen mia tutkora deziro.

Choisy-le-Roi, Junio 1958.

¹ Pluraj el ili aperis, sub formo de artikolo aŭ de prelego, en diversaj gazetoj kaj en diversaj tempoj inter 1928 kaj 1957. Sed mi ilin plejofte reverkis, jen kompletigante, jen mallongigante, ke la kolekto faru harmonian tutaron kaj liveru ĝisdatigitajn informojn. Mi okaze uzis la sekvantajn mallongigojn, kutimajn en interlingvistiko: A, angla; D, germana; E, esperanta; F, franca; G, greka; H, hispana; I, itala; L, latina; P, pola; R, rusa lingvo; LI, Lingvo Internacia; kaj krome jenajn, kutimajn en esperantologio: FK, *Fundamenta Krestomatio*; OV, *Originala Verkaro* de Zamenhof; UV, *Universala Vortaro*; Z, Zamenhof.

I. NIA LINGVO

PRA-ESPERANTOJ

Estas banala aserto, ke studi lingvojn oni povas el du vidpunktoj, laŭ tio ĉu oni konsideras la staton de unu lingvo en unu difinita tempo, aŭ ĉu oni konsideras la diversajn ŝanĝojn, kiujn tiu lingvo suferis dum kelkaj jarcentoj. Oni tiel ricevas aŭ *priskriban* aŭ *historian* gramatikon de tiu lingvo. Kaj estas sufiĉe klare, ke, se por la praktika uzado oni bezonas nur la priskriban, oni devas helpi al si per la historia, tuj de kiam oni deziras klarigi la originon de vortoj aŭ la ekzistopravon de reguloj.

La afero estas ja malsama, kiam temas pri E: en ĝiaj 70 jaroj da vivo, ĝi ne prezentas, krom pri kelkaj detalaj punktoj, signojn de konsiderinda evoluo, dank' al la ekzisto de respektata *Fundamento* kaj al la disciplino, kun kiu la plej bonaj aŭtoroj imitadis la Zamenhofan stilon. Kio estas aparte oportuna ĉe lingvo internacia:

Sed E ne elŝprucis tute difinita kaj kompleta el la cerbo de sia aŭtoro: antaŭ ĝia publikiĝo, ĝi trapasis, laŭ lia konfeso mem, du aŭ tri diversajn statojn, kiuj lasis post si iajn spurojn en la *Fundamento*. Sisteme studi tiujn pratipojn de E povus do havigi al ni klarigojn pri tiu aŭ alia enigmo trajto de la nuna lingvo, kaj krome informi nin pri la maniero, kiel Zamenhof iom post iom akiris pli da sperto kaj eliminis la malĝustajn solvojn.

Por tia studo ni disponas kaj la memoraĵojn de Zamenhof, kaj la tekstojn de kelkaj liaj provoj antaŭ 1887. La memoraĵojn de Zamenhof oni trovas unue en ruslingva letero, kiun li skribis al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko en 1895, kaj kiun Vladimir Aleksandroviĉ Gernet tradukis por «Lingvo Internacia» (n-ro de Junio-Julio 1896); due en fragmento de artikolo, kiun Zamenhof verkis, ĉirkaŭ 1908, por «La Revuo», kaj kiun Carlo Bourlet rifuzis enpresii; ĝin ni konas dank' al kopio de Camille Aymonier. Ambaŭ mi republikigis en la *Leteroj de Zamenhof*.¹

¹ Vol. I, pĝ 343-354; vidu, ĉi-poste, sub *Editoraj demandoj*, la subĉapitron *La «Letero al Borovko»*.

La tekstoj (krom la 4 versoj de 1878 elmemore cititaj de Zamenhof en la letero al Borovko) estis entenataj en tri kajeroj de la jaroj 1881-1882. Certe, inter 1882 kaj 1887 Zamenhof elprovis sian lingvon per aliaj tradukoj kaj trudis al ĝi aliajn ŝanĝojn: sed ĉio malaperis, kaj nur pri la tri diritaj kajeroj ni havas atestojn. Zamenhof mem, en la ĉi-supre montrita artikolo; Edmond Privat en sia *Vivo de Zamenhof* (2a eldono, 1923, pĝ 42-47), kaj Julio Baghy en artikolo de «Literatura Mondo» (Julio-Aŭgusto 1932, pĝ 137) parolis pri du el ili, kies enhavon, laŭ iliaj ne tre precizaj informoj, ni povas hipotezi jene: la unua, verkita ekde Aŭgusto 1881, do probable dum la universitataj ferioj, entenis gramatikon, vortareton kaj kelkajn tradukojn, inter ili la fabelon de Andersen, poste titolitan *La Ombro* (Kp *Fabeloj*, Ila vol., pĝ 133) kaj la baladon de H. Heine, kiu estos poste reproduktita en FK (2^a eldono, pĝ 306). La dua, pli dika, entenis vortaron rusan-praesperantan.

La trian kajeron Kalocsay kaj mi havis la ŝancon disponi por kelkaj horoj dum la Viena Kongreso de 1936, en la Esperanto-Muzeo, al kiu Lidja Zamenhof estis donacinta ĝin en Julio 1929. Ĝi estis ordinara lerneja kajero, de 16,5 x 21,5 cm, kun 80 paĝoj, el kiu kelkaj estis detranĉitaj. La skribo estis klara, sed rapidema: unu peco estis eĉ krajone skribita. Laŭ la dato de la entenata poemo, oni povas supozi, ke Zamenhof verkis ĝin dum la ferioj de 1882. Krom tiu originala poemo, ĝi entenis nur tradukojn prozajn. Pro la tro mallonga tempo lasita al ni, ni povis kopii el ĝi nur la pecojn, kiujn oni trovos ĉi-sube, sub la n-roj 7 ĝis 15. La poemo prezentas la unuan formon de *Mia Penso*, kiu aperos en la *Unua Libro* (Vidu FK, 2a eldono, pĝ 302); la tradukoj ion malkovras de la gustoj de la juna studento: ili apartenas al nur du literaturoj, la germana kaj la hebrea. De la germana venis la peco n-ro 7 (ĝi prezentas la 1an scenon kaj parton de la 2a de la Akto I de *La Rabistoj* — Kp en la Hachette-a eldono la paĝojn 5-17) kaj la pecoj n-ro 8, 9 kaj 14 (ili prezentas tri fabelojn de Andersen, kiuj kuŝas en la Plena Kolekto de la Pariza eldono sub la titoloj *Kolumo*, *La Najtingalo* kaj *Paŝtisto de Porkoj* — respektive vol. III pĝ 6, II pĝ 24 kaj pĝ 16: oni scias, ke Zamenhof tradukis ilin el germana traduko); de la hebrea venis la pecoj n-roj 11, 12 kaj 15 (ili prezentas respektive unu ritan preĝon, la 33an ĉapitron de la

Biblia *Readmono* kaj artikolon de Kompert). La pecon n-ro 13 mi ne scias al kio religi. Pri kvara kajero, kaj la problemoj metitaj de ĝi, oni legos en la posta Noto.

Ĉiuj tiuj kajeroj estis detruitaj de la Nazioj. Tial mi opinias utila represi nun ĉiujn pecojn el tiuj gravaj dokumentoj, kiuj postrestis al ni. Por ĝuste legi ilin, oni sciu: 1° ke la literoj *ĉ, ĥ, ŝ* kaj *ž* respondis al niaj *ĉ, ĥ, ŝ*, kaj *ĵ*¹ (do: *dž = ĝ*); 2° ke la supersignitaj vokaloj portis la akcenton; 3° ke *i* antaŭ aŭ post vokalo prononciĝis kiel *j*. Vid-al-vid de tiuj tekstoj mi metis tradukon laŭliteran, por faciligi la komparon kun la originalo: oni do ne miru, se kelkaj lokoj estas ne tre bonstilaj. Kiam mi ne komprenis vorton de la originalo, mi montris ĝian lokon en la traduko per: (x). Krome, ĉar en tiu tempo la difina artikolo povis eliziĝi kaj algluiĝi al la antaŭa prepozicio, mi reproduktis tiun fenomenon per ligstreko (*il* egalas *i l(a)* kaj estas reprezentata per *en-la* ktp).

¹ Kial Zamenhof poste anstataŭigis la akutan supersignon per la cirkumflekso, oni povas nur hipotezi. Mia supozo estas, ke li volonte evitis la akutan supersignon, ĉar tiajn ja havas polaj konsonantoj, kaj la renversitan cirkumfleksan, ĉar tiajn havas ja ĉeĥaj konsonantoj. Li tiel zorgis, ke lia lingvo ne havu la eksteran aspekton de unu difinita nacia lingvo. Verŝajne la materiajn sekvojn de tiu decido, la neceson, por la estontaj esperantistoj, fandigi tute novajn tipojn, li idealisme preteratentis.

TRADUKOJ

1

LINGVO UNIVERSALA

*Malamikeco de la nacioj
Falu, falu, jam temp' estas!
La tuta homaro en familion
Kununuigi sin devas.*

5

2

*Lingvo universala t. e. gramatiko kaj vortaro
laŭ-la lasta redakcio de-la jaro 1881, Varsovio.
(Komencita en Aŭgusto de-la jaro 1881).*

3

*I. unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek;
dek unu, dek du;
dudek, dudek unu; tridek;
cent, cent unu, cent dek kvin, cent tridek sep;
ducent; mil; kvar mil okcent dek sep;
miliono, biliono, ktp.*

5

II. unuo, duo, trio . . .

III. la unua, la dua . . .

IV. unue, due . . .

10 *V. unuobla, duobla, triobla . . .*

VI. unuope, duope, triope . . .

VII. po unu, po du, po tri . . .

VIII. (unuono), duono, triono . . .

TEKSTOJ

1 (1878)

LINGWE UNIWERSALA

*Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está.
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.*

5

2 (1881)¹

*Lingvo universala f. e. grammatiko e verbio
laul trema ridakco del anno 1881, Varsovo.
(Kojpassa i Augusto del anno 1881).*

3²

*I. un, du, tri, kvar, kvin, sek, sep, ok, nau, dek;
dek-un, dek-du;
du/dek, du/dek-un; tri/dek;
cen, cen-un, cen-dek-kvin, cen-tri/dek-sep;
du/cen; mil; kvar/mil-ok/cen-dek-sep;
millio, billio, ktp.*

5

II. uno, duo, trio...

III. la una, la dua...

IV. une, due...

10 *V. unobla, duobla, triobla...*

VI. unoe, duoe, trioe...

VII. pej un, pej du, pej tri...

VIII. (unono), duono, triono...

¹ El la artikolo de Baghy. Li erare presis Kajpassa je la tria linio. Stojan, en Bibliografio de la Internacia Lingvo, sub n^o 5853, donas la saman tekston, kun kvin leg-eraroj.

² El la foto-reprodukto de Privat. En la originalo, ĉiu nombro estas akompanata de sia rusa traduko. Ĉe la vortoj millio kaj billio, fina n estis forstrekita.

LA OMBRO

*En-la varmaj landoj la suno radias alian varmegon ol ĉe ni.
La homoj fariĝas tute brunaj, kaj en-la plej varmaj landoj
ili eĉ [de varmeg bruliga] pro bruligado de-la suno*
5 *fariĝas negroj...*

*... Unu vesperon la fremdulo sidadis [ekster-la] sur sia balkono,
post li en-la ĉambro bruladis kandelo, kaj tial estadis tute nature,
ke la ombro vidiĝadis sur-la muro de-la kontraŭa balkono.
Jes, jen li tie sidadis kontraŭe inter-la floroj sur-la balkono*
10 *kaj ĉiun fojon, kiam la fremdulo sin movadis, movadis
sin la ombro ankaŭ, ĉar tiel li ĉiam faras.
«Mi pensas, mia ombro estas la sola viva,
kiun oni povas tie trovi!» parolis la instruulo.
«Rigardu do, kiel gracie li sidas inter-la floroj,*
15 *la pordo estas nur fermita, kaj nun la ombro
devus esti tiel saĝa kaj eniri kaj pririgardi ĉion ene
kaj poste revenante rakonti al mi, kion li tie vidis.
Jes, vi devus havi en-la pensoj mian avantaĝon!»
parolis li ŝerce. «Estu tiel bona kaj eniru! Nu, ne volas*
20 *vi iri?» kaj li balancis la kapon al-la ombro
kaj la ombro balancis ree. «Jes, jes, iru, sed
ne restu tro longe!» La fremdulo sin levis
kaj lia ombro sur-la kontraŭa balkono ankaŭ sin levis...*

LA UMBO

*Il kalaj guroj la ŝemmo rajiŝe alia prekalio el di no.
La homoj faktidzĉe tute buraj, e il plej kalaj guroj
po eĉ [de prek bruliga] ŝtet bruligado del ŝemmo
faktidzĉe negroj...*

*... Un sero la frindoro sidá [jal]² ba sa balko,
bi ro il ĉembro brulá ŝando, e fej está tute natura,
ŝu la umbo vididzá bal muro del bloa balko.
Si, en ro fi sidá bloe bul floroj bal balko
e ĉiul fio, kvan la frindoro sol mová, mová
sol la umbo os, kor fe ro ĉian fakté.*

*«Mo pensé, ma umbo esté la sola viva,
kvul o poté fi trovi!» pallu la stuttoro.*

*«Vittó gu, kve grace ro sidé bul floroj,
la porbo esté koj fermassa,³ e nuk la umbo
debas esti fe sadza e ialli e obvitti ĉiol ie
e beje revionente narri a mo, kvul ro fi vidu.*

*Si, to debas habi il pintoj ma vando!»
pallu ro bade. «Estó fe bona e ialló! Nu, ne volé
to alli?» e ro vugigu la kapo al umbo
e la umbo vugigu ree. «Si, si, alló, sej
ne tajmó prej longe!» La frindoro sol levu
e ra umbo bal bloa balko os sol levu...*

¹ El la artikolo de Baghy por la 4 unuaj linioj; el tiu de Zamenhof por la sekvaĵo. Je la tria linio, la vortoj inter krampoj rektaj estis forstrekitaj.

² La krampojn mi supozis, ĉar alie mi ne povis kompreni tiun vorton.

³ Aymonier skribis fermatta, verŝajne pro legeraro.

BALADO

(el HEINE)

5 *Mi belan princinon¹ en-la songo vidadis
Kun vangoj malsekaj kaj palaj,
Sub-la tilio, sub-la verda ni kune sidadis
En-la brakoj amplenaj kaj varmaj.*

10 *«La kron' de cia patro nenio por mi estas,
La ora, la reĝa lia seĝo!
La sceptron diamantoplenan, lin mi ne volas,
Cin mem nur volas mi, mia bela!»*

*«Tio ja ne estebla, ŝi parolis al mi,
Ĉar ja en la tombo kuŝas mi,
Kaj nur en la nokto venas mi al ci,
Ĉar cin tiel varmege amas mi!»*

6

1881. VORTARO RUSA-UNIVERSALA

7

LA RABISTOJ

Dramo

de

FREDERIKO SCHILLER

5 *... mia plej kara amiko, neniam mia senkulpa plumo
fariĝus tirano por ci. Mi povas de cent ciaz leteroj
konkludi, kiel sciigoj de tiu-ĉi speco devas*

¹ *La variaĵo signifas 'reĝidinon'.*

BALLADDO

(He HEINE)

5 *Mo bella [redžidaŭ] princino il sonto vidá*
Ko ŝuoj malseŝaj e palaj,
Sul dillo, sul verda no koe sidá
Il armoj amizaj e kalaj.

10 *«La kron' de ta padro fio pu mo esté,*
La ora, la redža ra sello!
La skepro diantiza — rol mo ne volé,
Tol mem koj volé mo, ma bella!»

«Fo et ne estebla, ŝo pallu a mo,
Kor et i la tombo kuŝe mo,
E koj i la nokto vioné mo a to,
Kor tol fe prekale amé mo!»

6²

1881. VERBOZO RUSSA-UNIVERSALA

7³

LA BRANDISTOJ (1881)

Dramo

de

FREDERIKO ŠILLER

5 *... ma plej kara [ami] miko, kvan ma plekulpa plumo*
faktidžas tiranno pu to. Mo poté de cen taj brivoj
kluri, ke sciigoj de [túc fuc] fu-ĉi specco debé[j]

¹ El la artikolo de Baghy; Privat faris tri legerarojn. En la unua verso, la vorto inter krampoj rektaj estis forstrekita.

² El la artikolo de Baghy.

³ Ĉi tie komenciĝis la Viena kajero; la kvin unuaj paĝoj estis deŝiritaj.

- vundi cian fratan koron; mi kvazaŭ vidas cin jam
 verŝi pro la fripono, la abomenulo . . . » (la
 10 maljuna Moor kaŝas sian vizagon). Rigardu, patro, mi legas
 al vi nur la plej moderan — «la abomenulo riverojn da
 larmoj»; ha! ili fluadis, faladis, kiel pluvego de tiu-ĉi kompatema
 vango . . . «Mi kvazaŭ vidas jam cian maljunan pian patron
 kadavropalan . . . » Ho, Dio! Vi estas tia-ĉi ankoraŭ
 15 antaŭ-ol vi scias la plej malmultan?
 La M. Moor. Plue, plue!
 Francisko. «Kadavropalan falantan sur sian seĝon kaj
 malbenantan la tagon, en kiu je-la unua fojo estis
 kontraŭbalbutita al li 'patro'. Ne ĉion¹ oni malkaŝis al mi,
 20 kaj de-la malmulta, kion mi scias, ci sciigos nur malmultan.
 Cia frato, ŝajnas, plenigis nun la mezuron de sia malgloro;
 mi almenaŭ scias nenion super tia, kion li efektive atingis,
 krom-se lia genio en tio superas mian. (x) Hieraŭ meznokte
 li decidis post kvardek mil dukatoj da ŝuldoj»
 25 — bela poŝmono, patro — «malĉastinte (x)² la filinon
 de riĉa bankiero tie-ĉi kaj morte . . .
 Moor. Ne! Mi ne volas pensi pri tio! Mi devas premi
 mian korpon per korseto kaj mian volon ŝnuri per leĝoj! »

8

LA KOLUMO (ANDERSEN)

«Mi havis timige multajn amantinojn!» rakontadis la kolumo,
 «eĉ momenton oni ne lasadis min en trankvilo.
 Mi certe estadis eleganta kavaliro
 kaj al tio ĉiam (amelita). Mi posedadis
 (bottirilon) kaj kombilon, kiujn mi neniam uzadis.
 Vi devadis tiam min vidi, kiam mi kuŝadis sur-la flanko!
 Neniam mi forgesos mian unuan amantinon, ŝi estadis
 zono, tiel delikata, tiel velurmola, tiel ĉarma! . . .
 belega

¹ Ŝajnas, ke ĉi tie Z erare uzis kvol anstataŭ ĉiol. Kp linion 22.

² Se Z erare skribis veje anstataŭ beje, tio signifus 'poste'.

- blessi tal fradral kordol; mo vel vidé tol jam
verši pro la [blenoro] vório, la blenoro ...» (la*
10 *maljuna Moor kaŝe sal vidzol). Vittó, padro, mo legé
a vo koj la plej modral — «la blenoro ŝtromojl de
larmoj»; ahl po kulá, kadá ke prepluvo de fu-ĉi pitiema
zuo ... «Mo vel vidé jam tal maljunal pial padrol
[kabre pal] kabropalal ...» Oh, Deo! Vo esté fa-ĉi es*
15 *pin vo scié la plej malmadzal?*
La M. Moor. Pelle, pelle!
*Franco. «Kabropalal kadental ba sal sellol e
malbenental la diol, i ku jel una fio estu
lobalbata a ro [la] 'padro'. Ne kvol o malkaŝu a mo*
20 *e del malmadza, kol mo scié, to sciidzuj koj malmadzal.
Ta fradro, prejé, plenigu nuk la mezol de sa malgloro;
mo paŝ scié kvol pra fa, kol ro fekke tabu,
hor ra génio i fo sobré mal. [kvas] Jur minokte
ro ĉidu bej kvardek miloj dukatoj de destoj»*
25 *— bella poŝokuno, padro — dekastage veje la filinol
de riĉa bankiro fi-ĉi e morte ...¹*
*Moor. Ne! Mo ne volé pinti pri fo! Mo debé pressi
ma korpo da gorso e ma volo ŝnuri da ledzroj!*

8²

LA KREGO (A'NDERSEN)

- «Mo habu timige madzaj amentaŭs!» narrá la krego,
«eĉ mianto o ne lassá mol i kvilo.
Mo pil está luga kabaliro
e a fo ĉian (gestärkt). Mo sobá*
5 *(štifelknecht) e penĉilo, kvujl mo fian utá.
Vo debá fan mol vidi, kvan mo kuŝá bal flanko!
Fian mo ubluj ma una amentaŭ, ŝo está
garto, fe delka, fe viuiromolla, fe janta! ...*

¹ La traduko daŭris dum la sekvantaj 31 paĝoj, kaj finiĝis ĉe la rebato de la Maljuna Moor.

² Skribita parte krajone.

10

PENSO (en Aŭgusto 1882)¹

- Belan vesperon, ekster-la urbeto
Malproksime nenio bruas,
Kaj en-la rondo unu knabineto
5 Dolĉe deklamas.
Kaj pri vivo pri detruita
Sente ŝi paroladis
Kaj mian vundon ne kovritan
Senscie incitadis.
- 10 Ho miaj pensoj, ho miaj revoj,
Ne min pereigu!
Al la gloro kaj al-la devoj
Multan oferis mi.
De mia vivo la plej kara
15 Por mi for estas:
Mia juneco sur-la altaro
Ofere forbrulas.
- Fajron mi sentas en-la koro,
Vivi mi volas, —
20 Sed ĉe-la gajaj mi maloportuna
Esti nur povas.
Ho! Plejalta! Se la sorto
Trompi min volas,
Nun kaj tuj rompu mian forton,
25 Dum mi ankoraŭ esperas!

HEMZA

¹ Ĉe versoj 3a kaj 11a, la variaĵo signifas: 'Kaj knabineto en rondeto', kaj 'Al-la ordonanta, al la devo'.

10

PINTO (i Aŭgusto 1882)

Bella sero jal urbetto

Lue fio brué

E il rondo un puettaŭ¹

5 *Dolce deklamé.*

E pri vivo pri nantassa

Sante ŝo pallá

E ma blesso ne koprassa

Plescie veksá.

10 *Oh, maj pintoj, oh maj revoj,*

Ne mol perigó!

A la gloro e al devoj²

Madza opru mo.

De ma vivo la plej kara

15 *Pu mo for³ esté:*

Ma junedo bal altaro

Opre forbrulé.

Igno mo santé il kordo,

Vivi mo volé, —

20 *Sej dil gavaj mo malporda*

Esti koj poté.

Oh! plejhota! ej la sorto

Tropi mol volé,

Nuk e tuj rompó ma forto,

25 *Dum mo es speré!*

HEMZA³

¹ *Variaĵo krajone almetita: «E puettaŭ i rondetto».*

² *Variaĵo almetita: «Al jubenta, a la devo»*

³ *Tiun pseŭdonimon Zamenhof uzis nur ĉi tie; ĉu la klarigo estus: «He M. Za.», t. e. «El M[arko] Za[menhof]» t. e. «Filo de M. Zamenhof»?*

11

LA ANTIKVA PREĜO DE-LA HEBREOJ

«Aŭskultu, Izraelo . . .

12

LA LASTA KANTO DE MOZEO

13

LA ROMA MEDICINANTO KAJ LIA FAMILIO

*La papo Inocento VIII estadis malfacile malsana.
Unu tagon oni jam kalkuladis lin mortinta
kaj voladis sciigi pri lia morto . . .*

14

LA PORKISTO

*Estadis iam princo, kiu havadis nur tre malgrandan regneton, sed
en ĉia okazo tiu-ĉi estadis ja sufiĉe granda, por edziĝi en li,
kaj edziĝi li treekstreme deziradis:*

- 5 *Estadis certe iom aroge de sia flanko,
ke li permesis al si paroli al-la filino de-la imperiestro:
«Volas ci min?» Sed li rajtis tion fari,
ĉar lia nomo estadis ĉie glora. Estadis centoj (da) princinoj,
kiuj kun ĝojo alprenus lian svatiĝon. Sed vidu ni,*
- 10 *ĉu ŝi tion faris. Jen aŭdu ni! Sur-la tombo de-la patro
de-la princo kreskadis rozujo, efektive ĉarma rozujol!
Nur unu fojon en kvin jaroj li floradis kaj ellasadis tiam
al tio nur unu solan rozon, sed tiu-ĉi aromadis tiel ĉarmige,
ke oni lin flarante forgesadis ĉiujn siajn zorgojn kaj malgajojn.*
- 15 *Li ankaŭ havadis najtingalon, kiu tiel bone sciadis kanti,
kvazaŭ ĉiuj belegaj melodioj loĝadis en lia malgranda
laringeto. Tiun-ĉi rozon kaj tiun-ĉi najtingalon
devadis ricevi la princino. Tial ili ambaŭ estis metitaj
en grandajn arĝentajn kestojn kaj forsenditaj al-la princino.*

11

LA ARĤA PREGO DEL HEBROJ

«*Ottó Izraelo . . .*

12

LA TREMA KANTO DE MOZEO

13

LA ROMA MEDENTO E RA FAMILLO

*La pappo Innocento VIII está malfale malsalva.
Un dio o jam kompá rol mortaga
e volá sciigi pri ra morto . . .¹*

14

LA ŜUISTO

- Está kan princo, kvu habá koj tre malmagna civetto, sej
i kva kajdo fu-ĉi está et satte magna, pu margidzi i ro,
e margidzi ro prestre degá.*
- 5 *Está pil kom kraze de sa kotto,
ŝu ro parmu a so palli al flaŭ del imperestro:
«Volé to mol?» Sej ro toru fol fakti,
kor ra nomo está ĉii glora. Está ceñoj princaŭs,
kvuj ko leto aprenas ra ŝanno. Sej vidó no,*
- 10 *ĉi ŝo fol faktu. En odó no! Bal tombo del patro
del princo kreská rudzio, fেকে শর্মা rudzio!
Koj un fio i kvin annoj ro florá e helassá fan
a fo koj un sola rudzo, sej fu-ĉi romá fe ŝarmige,
ŝu o rol fladente ublá ĉiujl saj suttoj e malradoj.*
- 15 *Ro os habá fiaro, kvu fe bone sciá kanti,
vel ĉiuj ĵantaj melodoj lozá i ra malmagna
laringetto. Ful-ĉi rudzo e ful-ĉi fiaro
debá kini la princaŭ. Fej po baj estu mettassaj
i magnaj ardžaj irioj e formittassaj al princaŭ.*

¹ *Póst tiu rakonto, 14 paĝoj estis detranĉitaj.*

- 20 *La imperiestro lasis ilin porti en la grandan salonon, en kiun iris la princino por ludi kun siaj korteganinoj. Pli ili ne havadis por fari. Kiam ŝi vidis la grandajn kestojn kun-la donacoj, ŝi de ĝojo ekplaŭdis per-la manoj. «Se-nur tio estus kateto!»*
- 25 *parolis ŝi; sed estis vidata la ĉarma rozo. «Ha, kiel belege li estas farital!» parolis ĉiuj korteganinoj.*
-*
- «Nu, kion li parolis?» demandis la princino. «Tion mi vere ne povas paroli!» respondis la korteganino; «tio estas terura!» — «Nu, tiel ci povas tion flustri al mi en-la orelon!»*
- 30 *Kaj ŝi flustris tion al ŝi en-la orelon. «Li ja estas sensaĝa!» parolis la princino, kaj rapide foriradis. Sed apenaŭ ŝi iris malgrandan distancon, kaj la tintiloj ekludis tiel belege:*
- «Ho, karega mia Aŭgusto,*
- 35 *For estas ĉio!»*
- «Aŭskultu!» ree komencis la princino, «demandu lin, ĉu li volas dek kisojn de miaj korteganinoj».*
- «Ho, nel!» parolis la porkisto, «dek kisojn de-la princino, aŭ mi konservos la poton!» — «Kia ĉagrena afero!» ekkriis la princino, «sed tiel*
- 40 *vi devas almenaŭ antaŭstariĝi, por-ke neniu tion povu vidi!»...*

- 20 *La imperestro lassu pol porti il magna zalo,
i kvu allu la princaŭ pu [ludi] bavi ko saj
košanaŭs. Pli po ne habá pu fakti. Kvan ŝo
vidu la magnaj irioj kol ŝenkoj, ŝo de leto
ektisku dal manoj. «At fo estas feletto!»*
- 25 *pallu ŝo; sej estu vidita la ŝarma rudzo.
«Ah, kve jante ro esté faktassa!» pallu ĉiuj košanaŭs.
.
«Nu, kvol ro pallu?» mandu la princaŭ. «Fol
mo pur ne poté palli!» pondu la košanaŭ; «fo esté
strapa!» — «Nu, fe to poté fol ŝeppi a mo il urol!»*
- 30 *E ŝo ŝeppu fol a ŝo il uro.
«Ro et esté plesadza!» pallu la princaŭ,
e ĉelle forallá. Sej kaŭ ŝo allu malmagna denco
e la tintiloj ekludu fe jante:
 «Oh prekara ma Aŭgusto,
 For esté ĉiol!»*
- 35 *«Ottó!» ree kojpu la princaŭ, «mandó rol,
ĉi ro volé dek kussoj de maj košanaŭs».
— «Oh, ne!» pallu la ŝuisto, «dek kussoj
del princaŭ, aŭ mo ŝervuj la tupol!» — «Kva
40 tergiga rio!» ekkriu la princaŭ, «sej fe
vo debé paŝ vistaridzi, dam fiu fol potó vidi»...*

1. La elvokita.

En-la nokto la mortintoj leviĝas el siaj tomboj kaj iras
 en-la sinagogon por tie preĝi. Ili elprenas la Tora-volvojn
 5 el-la sankta ŝranko, malvolvas ilin kaj komencas legi
 el tie la partaĵon de-la semajno. Tio estas muta preĝanta
 kolektiĝo, tiagrade-ke inter ili ne estas aŭdata eĉ la plej
 malgranda sono ...

- 10 2. La infano, kiu ne ricevis benon.
 3. La sin movantaj libroj.
 4. Kio tio estas respondi «amen».
 5. La mortintino en-la vepra vagejo.
 6. La infano, kiu vidis Mesion.
 7. La admcnoj de-la avo.

15 «Fiŝeĵeto,² mia kara», parolis unu fojon blinda okdekkvinjara
 maljunulo al sia nepo, «aŭskultu atente, kion mi nun
 al ci parolos. En-la nokto ci, pro Dio, ne fajfu: la
 satano povas tion aŭdi, kaj li kurbigos al ci la buŝon ...

- 20 8. La beno de Dio.
 9. Ne povi morti.

... Parolite-faritel!

¹ LEOPOLDO KOMPERT (1822-1886), aŭstria judo, ĵurnalisto kaj verkisto. Per sia libro *Aus dem Ghetto* (Lepsiko, 1848) li estis la kreinto de la ghetto-literaturo. La libro entenas 6 ĉapitrojn, el kiuj Zamenhof tradukis nur la lastan Märchen aus dem Ghetto, kaj nur parte: el la 12 fabeloj, li tradukis nur 9. Tiujn precizojn kaj kontrolon de la traduko mi ŝuldas al la granda afablo de Dro I. Lapenna, kiu bonvolis konsulti en The British Museum tiun libron, ne plu troveblan en la kontinenta Eŭropo, post la trapaso de Hitler.

² En la originalo Fischel Leben, karesa alvoko al infano.

MIRKOJ HEL GETTO (de LEOPOLDO KOMPERTO).

1. La hevuskassa.

5 *Il nokto la mortagoj lefé he saj tomboj e allé
il sengo pu fi pregi. Po heprené la taŭroviskoj
hel sankta jerko, malviské pol e kojpe legi
he fi la sedro del simo. Fo esté moa pregenta¹
kelidžo, eš bu po ne esté odita eé la pli
malmagna fuko ...*

- 10 2. La fano, kvu ne kinu beno.
 3. La sol moventaj libroj.
 4. Kvo fo esté pondi «amen».
 5. La mortagaŭ il sokka vagejo.
 6. La fano, kvu vidu Messiho.
 7. La testoj del avo.

15 *«Fiseletto, ma kara» pallu un fio linda okdekkvinanna
maljunoro a sa nepo — «ottó mattize, kvol mo nuk
a to palluj. Il nokto to, pro Deo, ne fajfó: la
satono poté fol odi, e ro kurbiguj a to la bušo ...*

- 20 8. La beno de Deo.
 9. Ne poti morti.

... Pallassa — faktassa!

¹ *Mia kopio legiĝas predenta, kion mi korektis laŭ la originala teksto betende.*

La unua teksto prezentas al ni la lingvon en ĝia plej malnova stadio; kaj malgraŭ la ega malgrandeco de la dokumento, oni povas el ĝi lerni jam multon. La tiutempa «Plena Gramatiko» aspektis probable jene:

1^o *La alfabeto similas la nunan, krom la litero v anstataŭata de w.*

2^o *La akcento ankaŭ falas sur la antaŭlastan silabon, krom ĉe la indikativo kaj imperativo de la verboj, kie ĝi falas sur la lastan.*

3^o *La substantivoj finiĝas per -e, la adjektivoj per -a; la pluralo estas montrita per aldonita -s. Ne estas kazoj. La fina vokalo de la substantivo kaj de la adjektivo povas eliziĝi.*

4^o *La personaj pronomoj finiĝas per -o.*

5^o *La verboj havas nur unu formon por ĉiuj personoj. La prezenco finiĝas per -á, la imperativo per -ó, la infinitivo per -are.*

Mi ne kaŝas al mi la multajn truojn, kiuj restas en nia scio de tiu praa dialekto, sed oni ne povas ne rekoni, ke ĝi jam baziĝas sur la tri principoj, kiuj konsistigas la esencon de la strukturo de nia lingvo: a) gramatiko kiel eble plej simpligita, laŭ la modelo de la angla; b) radikaro ĉerpita, kiom estas eble, el la stoko de la jam internaciaj vortoj; c) aglutineca vortformado kun senvariaj radikoj, sistemigita afiksaro kaj gramatikaj klasigiloj en formo de apartigeblaj finaĵoj. Eĉ en la detaloj, ni jam renkontas la esperantajn radikojn *amik, est, hom, temp*, la afiksojn *mal-* kaj *-ig-* kaj la adverbon *jam*.

La diferencoj venas ĉefe de tio, ke la juna Zamenhof aplikis la du unuajn principojn kun pli da severeco, ol li faros poste: la sperto instruos al li, ke ekzistas ankaŭ aliaj principoj, kiel la belsoneco, la klareco, la form-oportuneco, kiujn oni devas respekti; eĉ fojfoje je la kosto de la tri unuaj. Tiu tempo de fekunda kompromisado ankoraŭ ne alvenis:

A) La gramatiko estas pli simpla, ol la nia, ĉar ĝi konas nek supersignitajn konsonantojn, nek kazojn.

La montrado de la verbaj formoj per akcentitaj vokaloj estas solvo, kiu longatempe plaĉis al Zamenhof pro kaŭzoj, kiujn li analizis en artikolo rilata al la «perfektigita dialekto», kiun li proponis al la voĉdono de la Ligo Esperantista: «Maloportunaĵon tiu ĉi ŝanĝo ne prezentus, ĉar akcentitaj vokaloj ekzistas en ĉiuj presejoj de la mondo . . . , dume oportunaĵojn la dirita ŝanĝo prezentus grandajn: 1) la formoj de la verbo estus tre klare diferencigeblaj eĉ por orelo tute ne alkitimita; 2) la formoj de la verbo, renkontataj en la parolado sur ĉiu paŝo, perdus la finiĝon konsonantan kaj tiel preskaŭ ĉiuj vortoj en nia lingvo havus finiĝon per vokalo, kio altigus la bonsonecon de la lingvo; 3) ricevinte certan nombron da vortoj kun akcento en la fino, la lingvo, sen malfaciliĝo de la lernado, ricevus kelkan diversecon en la akcentado, kiu levus ankoraŭ ĝian bonsonecon; 4) por la versofarantoj la granda nombro da vortoj kun akcentita finiĝo estus tre agrabla gajno».¹

B) Ĉe la elekto de la radikoj, Zamenhof konsideris pli ofte, ol li faros poste, la latinajn formojn: li preferis *cadere* al la germana *fallen* (E *fali*), *debere* al la franca *devoir* (E *devi*); same la afikso *-et-* pli proksimiĝas al *-it(as)* ol al la itala *-ezza* (E *-ec-*); la finaĵo *-are* simple ĝeneraligas la finaĵon de la infinitivo ĉe la unua konjunktacio (*am/are*).²

¹ «La Esperantisto», Marto 1894. El tiu ĉi teksto oni vidas, ke, se Zamenhof konservis la apostrofadon de la o-vortoj en la definitiva formo de sia lingvo, tion li faris *euphoniæ gratia* (kiel li mem skribis en la angla teksto de la Fundamenta Gramatiko), t. e. pro la bonsoneco — do kun la klara deziro, ke oni uzu tiun eblon plibeligi la lingvon: des pli ke, *nenie* li limigis al la poezio la uzadon de la apostrofo, eĉ ĉe la artikolo. Per tiu decido li metis profundan diferencon inter Esperanto kaj la pola lingvo, de kiu li depruntis la sisteman akcentadon sur la antaŭlasta silabo. La teoriuloj, kiuj nun kontraŭbatalas la uzadon de apostrofitaj vortoj en poezio, kaj apogas tiun prohibicion sur la «natura» paroksitona ritmo de la lingvo, kontraŭdiras do rekte la intencon kaj celon de Zamenhof pri tiu aparta punkto, kiel prave rimarkigis N. Hohlov al Leo Belmont (Vd «Esperanto», Marto 1929, pĝ 8).

² La sola signo en kontraŭa direkto estas la iom miriga alprenado de la germana kaj pola skribo de la v-sono per la litero *w*.

Eĉ en la transskribo de la radikoj, Zamenhof provis konservi pli fidele la lokon de la internacia akcento, skribante *familje* (L *familia*, D *Familie*, F *famille*). La formo *nacje* konservas la akcenton de la rusa *nacija* (kun ebla influo, sugestis sro Kohen-Cedek, de la jida lingvo: la litovaj Judoj laŭdire uzadis la formojn *nacje*, *nacjes*, dum la polaj uzadis *nacion*, *nacionen*).

Ĝuste tiu pli granda peno al internacieco klarigas, kial la kvar versoj de 1878 aspektas pli proksimaj al la nuntempaj «naturalismaj» projektoj, ol al nia klasika Esperanto: oni nur komparu ilian tradukon en la Occidental de 1930:

*Inamicie del naciones
Cade, cade! ja témpor es.
Li tot homanité in familie
Co-unificar se debi.*

Aŭ en la Interlingua de 1951:

*Inimicite del naciones
Cade, cade! jam tempore es.
Tote le humanitate in familia
Co-unificar se debe.*

Ke junulo deknauĵara atingis tian rezulton, kaj tio en tempo, kiam floradis nur apriorcaj kaj pazigrafiaj projektoj,¹ estas atesto de nekomuna lingvistika genio.

¹ La sola escepto estis la rimarkinda aposteriora lingvo *El Universal Glot* de Pirro. Sed estas tre duba, ĉu en la manojn de varsovia liceano povis trafi ekzemplero de tiu libro, eldonita unue en Bar-le-Duc en 1868. Kurioze estas, ke, kelkajn jarojn poste, du liceanoj el la sama urbeto elpensis artefaritan lingvon, *L' Ixessoise*: ili estis Raymond kaj Lucien Poincaré; ĉu la mistera, senantaŭnoma Pirro ne estus pseŭdonimo de ilia patro?

Kontraste al la unua, la dua stadio de la lingvo estas multe pli vaste atestita: ĝin prezentas la tekstoj 2 ĝis 15. Ĝi estas egala en ĉiuj tiuj tekstoj, ĉu de 1881, ĉu de 1882, kun la escepto de la peco nro 7a: la multajn hezitojn, korektojn aŭ erarojn, kiujn ni trovas tie, kaŭzis probable la fakto, ke tiun tradukon Zamenhof verkis eble tre frue en tiu dua epoko (ĝi komencas efektive la Vienan kajeron, kiun oni povus rigardi kiel la Krestomation de la nova dialekto). La strangan uzon de *kvan* (l. 1) anstataŭ *nenian*, de *kvol* anstataŭ *neniol* (l. 22) aŭ *ĉiol* (l. 19), de *bej* anstataŭ *bi* (l. 24), de *veje* anstataŭ ~~*bi* (l. 24)~~, de ~~*veje* anstataŭ~~ (probable) *beje* (l. 25), la provon akuzativigi la substantivojn kaj adjektivojn, dum en la ceteraj pecoj akuzativigas nur la pronomoj — povas klarigi nur la ĉi-supra hipotezo: Zamenhof havis sian lingvon ankoraŭ ne tute pretan, nek bone parkeritan. Ni do flanklasos la lingvajn apartaĵojn de tiu 7a peco, kaj priskribos la tiaman dialekton laŭ la ceteraj. La «Plena Grammatiko» probable aspektis iel jene:

1^o *La alfabeto enhavas kaj vokalojn kaj konsonantojn super-signitajn; tiuj vokaloj portas la akcenton, tiuj konsonantoj esprimas la ŝo-sonojn; la afrikato ĝ estas montrata per dŭlitero: dž.*

2^o *Artikolo nedifina ne ekzistas; la difina artikolo estas la, nevaria. Sed post prepozicio la vokalo eliziigas kaj la konsonanto algluiigas al la prepozicio: de la fariĝas del ktp.*

3^o *La substantivoj finiĝas per -o, plurale per -oj. La in-seksaj nomoj finiĝas per -aŭ, plurale per -aŭs. Ne estas kazoj.*

4^o *La adjektivoj finiĝas per -a, plurale per -aj. Komparacio per pli kaj plej.*

5^o *Numeraloj, kiel en Esperanto, krom un kaj cen. La komplemento de la substantiva formo ne estas enkondukata de prepozicio: cenoj princaŭs, kvardek miloj dukatoj. Por la signado de la numeraloj ordaj, oni aldonas -a; por la multoblaj oni aldonas la*

sufikson -obl-; por la frakciaj -on-; por la kolektaj -o-; por la disdividaj la vorton pej.¹

6^o Personaj pronomoj: mo, to, ro (uzata samtempe por li kaj ĝi), ŝo, no, vo, po (= ili); krome so (= si) kaj o (= oni). Ili do havas la saman finaĵon kiel la substantivoj, sed ili havas kazon akuzativan, formatan per aldono de -l: mol (= min).—Posedaj adjektivoj formataj per ŝanĝo de -o al -a: ma (= mia) ktp.

7^o Verbo: prezenco montrata per -é, imperfekto per -á, preterito per -u, futuro per -uj, kondicionalo per -as, imperativo per -ó, infinitivo per -i.

Participo: aktiva prezenca: -enta; preterita -aga;
pasiva prezenca: -ita; preterita: assa.

8^o La adverboj finiĝas per -e.

9^o Tabelvortoj:

	-o	-u	-a	-e	-al	-el	-am	-om
I-							kan	kom
TI-	fo	fu	fa	fĭ	fej	fe	fan	
KI-	kvo	kvu	kva			kve	kvan	
ĈI-	ĉio	ĉiu		ĉii			ĉian	
NENI-	fio	fiu					fian	

(Mi registris nur la atestitajn formojn; oni memoru, ke en la teksto 7a la rilataj pronomoj estas simpligitaj al: ko, ku, ke, kan).

¹ La notita konstruo daŭris eĉ en la unuaj jaroj de E: «dek milionoj adeptoj» (en la *Dua Libro*, de 1888), «kiom fojojn» (en «La Esperantisto» de 1890); sed en la *Unua Ekzercaro* ni jam legas: «tri milionoj kristanoj (aŭ da kristanoj)». — Mi ĉi tie klarigu, ke per *Unua Ekzercaro* mi montras la Ekzercaron entenatan en la *Dua Libro* (1888), poste represitan, sub la erara titolo *Dua Ekzercaro*, ĉe A. Paolet, 1921. La vera dua Ekzercaro estis publikigita en Varsovio, 1894, kaj enmetita en la *Fundamenton de E* en 1905. Reeldono de tiuj unuaj Zamenhofaj verkoj estus tre dezirinda.

La unua impresio farita de tiu ĉi praformo de E estas miro pri tiom da strangaĵoj: apenaŭ ni povas kredi, ke temas pri la sama aŭtoro. Kaj tamen, se ni zorgas ekzameni ĝin, ni facile malkovros parentecon kun la dialekto de 1878 kaj kun tiu de 1887.

Krom la tri strukturaj principoj, kiuj neniam ŝanĝiĝis, de la dialekto de 1878 restas jenaj karakteroj: 1° substantivoj kaj adjektivoj estas senkazaj; 2° la adjektivo finiĝas per *-a*; 3° la personaj pronomoj finiĝas per *-o*; 4° la verbaj formoj estas plejparte montrataj per akcentaj finvokaloj. Tio povas ŝajni malmulto, sed ni memoru, ke de la unua dialekto ni posedas tre magran tekston, en kiu mankas ekz-e rilativoj, subjunkcioj, participoj ktp: tre probable, ke, se ni disponus pli ampleksan tekston de 1878, ni retrovus multajn ties trajtojn konservitajn en la dialekto de 1881.

Cetere, la novaĵoj konstateblaj ne ŝajnas ŝuldataj al grava ŝanĝo de la baza strukturo; ili devenas, kiom ni povas juĝi, de la agnosko de novaj principoj, al kiuj la uzado altiris la atenton de Zamenhof.

La unua estas la belsonado. Kelkaj aŭtoroj de «Lingvoj Internaciaj» ĝin tute ne konis, kiel Schleyer: oni jam sufiĉe scias pri la «sovaĝa» aspekto de lia Volapük. Aliaj ĝin tre malmulte konsideris, kiel von Wahl, kies Occidental abundas je dentalaj finaĵoj. Male Zamenhof havis tre delikatan oreton kaj estis tre sentema al la muziko de la vortoj, kiel montras lia poezia inklinado. Provente sian projekton, li konstatis, ekzemple, ke la ofta ripetado de la so-sonoĵ «donus jam per si mem tre akran sonadon al nia lingvo»¹ — kaj sekve li serĉis alian signon de la pluralo: la naciaj lingvoj (latina, itala, slavaj) proponis kiel alternativon nur la finaĵon *-i*; pro la neceso konservi antaŭ ĝi la karakterizajn vokalojn de la substantivo kaj de la adjektivo, li tute nature mallongigis la *-i* ĝis *-j*: jen kiel naskiĝis tiu plurala finaĵo, kiu tiel bele proksimigas nian lingvon al la antikva greka.

Ĉar ni parolas pri la substantivoj, ni provu klarigi la anstataŭigon de ilia, pli internacia, finaĵo *-e* per nia *-o*: oni ne scias, kiel finiĝis la adverboj en 1878, sed en 1881 Zamenhof elektis por tiu kategorio la vokalon *-e*, kiu karakterizas tutan klason da latinaj

¹ «La Esperantisto», Febr. 1894.

adverboj (*clare, late, longe* ktp); li tial devis serĉi alian signon de la substantivo, kaj eble tiris ĝin de la tiamaj personaj pronomoj, kies senco kaj funkcio estas tiel najbaraj al la substantiva.¹ Kurioze estas observi, ke, pli poste, ankaŭ de tiuj personaj pronomoj venos al la substantivoj (kaj al la adjektivoj) la signado de la akuzativa kazo.

Ankaŭ al la belsoneco Zamenhof oferis la internacian finaĵon de la infinitivo: *-are*, pro la adverbaj formoj, devus fariĝi *-ar*, kaj tiu litero, en fina pozicio, «prezentus malbonsonaĵon».² La atribuita *-i* venas eble de la latinaj deponentaj infinitivoj: *nasci* (nask[iĝ]i), *progredi* (progresi), *uti* (uzi) ktp. Oni povus ankaŭ supozi, ke Zamenhof rimarkis, ke tiu vokalo estas karakteriza de la dua konjugacio de la francaj verboj: *courir* (kuri), *dormir* (dormi) ktp, de la germanaj pruntverboj: *depeschieren* (depeŝi), *disponieren* (disponi), *disputieren* (disputi) ktp kaj de la anglaj pruntverboj: *admonish* (admoni), *finish* (fini) ktp.

La dua principo, kiun Zamenhof tiam ekkonsideris, havis pli perturban influon; ĝi estas la oportuneco. Jen kiel li mem prezentas ĝin: «Pro motivoj, pri kiuj mi nun ne povas paroli pli detale, mi en tiu tempo havis la konvinkon, ke, kvankam la vortoj tehnikaj kaj ankaŭ ĉiuj novaj enkondukotaj vortoj devas esti prenataj senŝanĝe en tiu formo, en kiu ili ekzistas en la naciaj lingvoj (por ebligi facilan kaj liberan evoluadon de la lingvo), tamen por la vortoj fundamentaj (t. e. plej multe uzataj en la ordinara vivo) la nacilingva aspekto ne sole ne estas necesa, sed estus eĉ rekte malhelpa, kaj tial mi tiam tute ŝanĝis la plimulton de la vortoj konforme al tiuj principoj, kiuj tiam ŝajnis al mi la plej ĝustaj... Kvankam la vortoj eble ŝajnos al la leganto tute elpensitaj, ili tamen ne estis tiaj, sed ili estas vortoj naturaj, kiuj estas nur alkonformigitaj al mia tiama principo, ke en la vortoj fundamentaj la oportuneco estas pli grava ol la internacieco. Ekz-e... *kala* estas oportunigita formo de la latina *calidus* (= varma); *palli* anstataŭis la antaŭan malbonsonan *parli* (= paroli) ...»³

¹ Aliajn hipotezojn vidu ĉi-poste, ĉe *Etimologiaj esploroj*.

² «La Esperantisto», samloke.

³ *Leteroj de Zamenhof*, I pĝ 353, 354.

Tiu principo kondukis Zamenhof al vera kripligo de la radikoj,¹ kiujn cetere li tiris ankaŭ el ne-latinidaj lingvoj. Estas interese konstati, kiel li efektivigis siajn intencojn.

El la latina devenas la vortoj: *anno* (*annus*), *arka* (*archaicus*), *kadi* (*cadere*), *civo* (*ciuitas*), *fakto* (*factum*), *felo* (*feles*), *igno* (*ignis*), *kojpi* (*coepisse*), *komp* (*computare*), *kordo* (*cor*, *cordis*), *kuno* (*pecunia*), *kvila* (*tranquillus*), *leto* (*lætitia*), *magna* (*magnus*), *medi* (*mederi*), *miko* (*amicus*), *narri* (*narrare*), *odi* (*aŭdire*), *peri* (*perire*), *puo* (*puer*), *salva* (*saluus*), *satte* (*satis*), *sello* (*sella*), *sengo* (*synagoga*), *ŝuo* (*sus*), *uro* (*auris*), *uti* (*uti*), *verbo* (*uerbum*), *veksi* (*uexare*), *vidi* (*uidere*); probable *testi* (= admoni, el *testari*, *atesti*).

El la franca devenas: *ardzo* (*argent*), *bado* (*badinerie*), *balbi* (*balbutier*), *balko* (*balcon*), *blessi* (*blessé*), *cidi* (*décider*), *delka* (*délicat*), *denco* (*distance*), *desto* (*dette*), *dianto* (*diamant*), *dillo* (*tilleul*), *fala* (*facile*), *fano* (*enfant*), *fekke* (*effectivement*), *fio* (*fois*), *gorso* (*corset*), *hota* (*haut*), *kabro* (*cadavre*), *kluri* (*conclure*), *kotto* (*côté*), *kuli* (*couler*), *lodži* (*loger*), *luga* (*élégant*), *mandi* (*demander*), *modra* (*modéré*), *mezo* (*mesure*), *nanti* (*anéantir*), *parmi* (*permettre*), *pinti* (*penser* — kun influo de A *to think?*), *pitio* (*pitié*), *porda* (*opportun*), *pondi* (*répondre*), *rajo* (*rayon*), *romo* (*arôme*), ~~*stultero*~~ (~~*stultitudo*~~), *ŝando* (*chandelle*), *tori* (*autoriser*), *trema* (*extrême*), *ubli* (*oublier*), *vando* (*avantage*), *vidzo* (*visage*), *vioni* (*venir*, *vient*) *viuro* (*velours*), *zuo* (*joue*).

El la germana: *armo* (*Arm*), *brivo* (*Brief*), *krego* (*Kragen*), *kusso* (*Kusz*), *linda* (*blind*), *mirko* (*Märchen*), *opri* (*opfern*), *ŝenki* (*schenken*), *ŝtromo* (*Strom*), *tupo* (*Topf*), *viski* (*wickeln*), *vugi* (*wiegen*), *zalo* (*Saal*).

El la itala: *ĉella* (*celere*), *kopri* (*coprire*), *pregi* (*pregare*), *sero* (*sera*), *simo* (*settimana*).

El la angla: *madza* (*much?*), *tajmi* (*time*).

El la rusa: *matto* (*vnimatel'nost'*), *moe* (*molĉa*), *rado* (*radost'*), *sobo* (*sobstvennost'*), *strapa* (*straŝnĵi*), *ŝeppi* (*ŝepnut'*), *vório* (*vor*); probable *tergo* (= malĝojo, el *ternazie*, *turmento*), *tiski* (= plaŭdi, el *tiskať*, *premi*).

¹ Oni vidos, ke, kelkloke, ankaŭ la interna vokalo modifiĝis, por eviti konfuzon kun homonimo: *luga* (pro *legi*), *taŭro* (pro *tori*) ktp.

El la hebrea: *jerko* (*jarkatim*), *sedro* (*seder*), *sokka* (*sukkah*), *šemmo* (*šemeš*), *taŭro* (*thora*).

El la pola: *bawi* (*bawić się*).

Restas kompreneble vortoj, pri kies deveno mi nenion divenis: eble aliaj estos pli bonŝancaj ol mi, kaj aparte por ili mi listigas tiujn senpatrajn infanojn: *blena* (= abomena), *degi* (= deziri), *fiao* (= najtingalo), *fuko* (= sonĉo), *gava* (= gaja), *irio* (= kesto), *janta* (= belego), *kajdo* (= okazo), *keli* (= kolekti), *kini* (= ricevi), *koŝo* (= kortego), *kraže* (= aroge), *margo* (= edzo), *mianto* (= momento), *penĉi* (= kombi), *preji* (= ŝajni), *sutto* (= zorgo), *ŝanni* (= svati), *tabi* (= atingi). Al la vortoj ni almetu la iamajn afiksojn: *-ed-* (= *-ec-*, per modifo de la *-et-* de 1878), *-ett-* (= *-et-*), *-iŝ-* (el A *-ish-*: «servis por verbigado de substantivo»), *-iz-* (el G *-iz-*? = *-hava*, *-oza*), *mi-* (el F *mi-* = duon-), *pre-* (el R *pre-* = *-eg-*), *-or-* (= *-ul-*), *-i-* (= *-ar-* aŭ *-uj-*).

Sed la laboro de la oportuno ne limiĝas je tiuj transformoj; Z ankaŭ ambiciis difini «certajn reciprokajn rilatojn inter la vortoj» kaj traduki ilin per taŭga procedo: jen kiel el *vidi* li tiris *vitti* (= rigardi), el *odi* (= aŭdi) li tiris *otti* (= aŭskulti), el *levi* li tiris *lefi* (= leviĝi): estis probable multaj aliaj similigoj, kiujn li aludas en la supre-citita artikolo: li tie parolas pri *trovi* kaj *trofi* (= serĉi) ktp. Tiu provo estas certe ŝuldata al la entuziasmo, kiun naskis en li lia malkovro de la utiligebleco kaj fekundeco de la afiksa sistemo. Sed temas ĉi tie pri tre speciala procedo, pri ia speco de interna fleksio; la ideon li eble prenis el la germana lingvo, en kiuj kelkaj neregulaj verboj alternigas la voĉajn kaj senvoĉajn konsonantojn en la konjugacio, kiel *geben/gab*, *schlagen/schlug* (en kiuj la alterno estas nur prononca), aŭ *leiden/litt*, *schneiden/schnitt* (en kiuj ĝi estas ankaŭ skriba). Ankaŭ la hebrea konjugacio donis al li ekzemplojn de duobligo de la interna konsonanto ĉe la kaŭzativa formo: *lāmad* (li lernis), *lim-med* (li lernigis), aŭ intensiva: *qātal* (li mortiĝis), *qittel* (li masakris).

La gramatikaj vortetoj ricevis la saman prilaboradon. El la latina li tiris la adverbojn: *at* (*utinam*), *en* (*en*), *jam* (*iam*), *kvan* (*quando*), *nuk* (*nunc*), *sej* (*sed*), *ste* (*extreme*); el la franca: *lue* (*loin?*), *pli* (*plus*), *si* (*si*), *tuj* (*tout de suite*); el la germana: *baj* (*beide*), *kaŭ* (*kaum*), *nu* (*nu*), *os* (*auch*); el la itala: *pur* (*pur*); el la rusa: *es* (*esĉe*). Sed multaj ŝajnas pure elpensitaj:

et (= ja), *gu* (= do), *jur* (= hieraŭ), *koj* (= nur), *paŝ* (= almenaŭ), *pil* (= certe), *prej* (= tro). En la citita artikolo Z mencias ankaŭ: *ust* (D *erst*) kaj *des* (F *dès*), kiuj ne aperas en niaj tekstoj.

Pri la kon- kaj subjunkcioj, li tiris el la latina: *dum* (*dum*), *ec* (*etiam*), *vel* (*vel*); el la greka: *ej* (*εἰ*), *pin* (*πὴν*); el la franca: *hor* (*hormis que*), *kor* (*car*); el la germana: *el* (*als*); el la itala: *e* (*e*); el la pola: *ci* (*czy*), *es* (*aż*). Ŝajnas elpensitaj *dam* (= por ke — ĉu el R *dabī*?) *ŝu* (= ke — ĉu el P *že*?).

Nur malmultajn prepoziciojn oni povas devenigi el nacia lingvo: el la latina: *pro* (*pro*), *i* (*in*), *pra* (*supra*), *su* (*sub*); el la greka: *pri* (*πρὶ*); el la franca: *a* (*à*), *de* (*de*), *pu* (*pour*); el la itala: *da* (*da*), *ko* (*con*); el la germana: *je* (*je*), *laŭ* (*laut*). Kaj la plej granda parto donas la impreson de plena arbitreco: *ba* (= sur), *bi* (= post), *blo* (= kontraŭ), *bu* (= inter), *di* (= ĉe), *he* (= el), *ja* (= ekster?), *pej* (= po), *ple* (= sen), *ŝte* (= pro?). Sed tio estis preskaŭ neevitebla rezulto de la du kondiĉoj, kiujn Z tiutempe metis al la formo de prepozicio: ke ili estu unusilabaj, kaj ke ili finiĝu per vokalo, per povi unusilabe kunfandiĝi kun la sekvanta artikolo.

Nian detalan analizon ni povas konkludi per du konstatoj: la unua estas, ke en tiu dialekto de 1881 la juna Z profunde ricevis la influon de la en 1879 aperinta Volapük, kies ĉefa trajto estas ĝuste la sistema unusilabigo de la nacilingvaj radikoj. Sed li sciis tamen eviti la ekstremajn deformojn, kiuj ridindigis la lingvon de Schleyer: *nim* por L *animal*, *plim* por F *compliment*, *nol* por A *knowledge*, aŭ eĉ *sül* por la F *ciel*; kaj precipe li rezervis tiun pritraktadon al la komunuzaj vortoj, sed lasis senŝanĝe la vere internaciajn.

La dua konstato estas, ke antaŭ la giganta tasko de kreado de unu tuta lingvo, la juna studento sentis sin ankoraŭ nesperta kaj senkonsila: en pluraj partoj de lia dialekto regis ankoraŭ, se ne ĥaoso, almenaŭ malordo, precipe ĉe la morfologio de la substantivo kaj ĉe la konjugacio. La elekto de *l* kiel signo de akuzativo, tiu de *f-* kaj *fi-* kiel respektivaj radikoj de la montraj kaj neaj pronomoj estas nur mallertaj arbitraĵoj. La sufikso *-i-* respondis ne nur al nia *-uj-* sed krome al *-ar-* ktp.

Tamen pri pluraj punktoj la dialekto de 1881 evidente alproksimiĝas al tiu de 1887: la substantiva finaĵo *-o*, la plurala signo *-j*, la tabelo de la korelativaj vortetoj, la numeraloj, la prefiksoj *mal-* kaj

re-, la sufiksoj *-ad-*, *-an-*, *-et-*, *-ig-*, *-iĝ-* (sub formo *idz*), *-il-*, *-in-*, la gramatikiloj *aŭ*, *da*, *de*, *laŭ*, *pri*, *pro*, *for*, *eĉ*, *ne*, *nu* (kaj kun iom da modifo: *ĉu*, *jen*, *nun*, *ol*, variaĵoj de *ĉi*, *en*, *nuk* kaj *el*), la plej uzataj verboj *sidi*, *stari*, *movi*, *vidi*, *legi*, *morti* ktp. Eĉ el la stoko de la «oportunitaj» radikoj, certa nombro restis plu ĝis nia klasika E kaj ni baldaŭ retrovos ilin.

Ni komprenas nun, kun pli da klaro kaj precizo, en kio konsistis la perfektiga laboro, kiun Zamenhof aludis en sia letero al Borovko. Ni nun pli bone povas vidi lin jam frue malkovranta la bazajn principojn de sia estonta lingvo; longatempe hezitanta inter diversaj solvoj de la gramatikaj problemoj, inter la pluralo per *-s* kaj la pluralo per *-i* (*-j*), inter la konjugacio per akcentaj finaj vokaloj kaj tiu per konsonantaj finaĵoj, inter la etendo de la akuzativo al la substantivoj kaj ĝia limigo al la pronomoj; ĉiam provanta, obeema al la instruo de la sperto, kaj iom post iom pliboniganta jenan aŭ alian parton de la lingvo. Ni havas la ŝancon povi ĉeesti la naskiĝon de la fama tabelo de la korelativoj, en ankoraŭ rudimenta formo: estas bedaŭrinde, ke ni ne povus same observi, kiam kaj kiel la ĥaoso de la konjugacio subite fariĝis tiu admirinda ordo, en kiu tri karakterizaj vokaloj sufiĉas por difini la tri tempojn kaj la ses participojn. Tiu simpleco estis la frukto de longa serĉado kaj multa penado: sen tiuj tekstoj de 1831, ni neniam estus divenintaj, kiel malfacila estis la longa naskado de nia E.

Tiuj tekstoj prezentas cetere intereson en si mem: tiu praa lingvo estis jam dotita de esprimpovo kaj de literatura valoro. La duoblaj konsonantoj (kiujn poste Zamenhof rezignos, por kiel eble plej faciligi la eklernadon) iel donas nervan akcelon al la prononco; la varieco de la akcentloko ankaŭ plaĉas al la orelo, kaj la mal-longeco de la gramatikaj iloj ebligas potencon koncizon. Bonaj ŝatantoj de poezio eĉ opinias, ke la poemo *Pinto* sonas pli bele, pli emocie kaj pli frape en tiu sia unua formo, ol en la posta remuldata *Mia penso*. Estas sendube fantazio mia — sed, se iam, por ia aparta efekto, tradukisto (aŭ eĉ originala verkisto) bezonus doni la impreson de arĥaismo, ĉu ne estus dezirinde, ke li helpu al si per tiu malnova dialekto de Esperanto, kaj tiel oferu al la meritplena Moskva studento iom de la honoro, kiun ni ĝis nun tro ekskluzive rezervis al la Varsovia Majstro?

ALDONA NOTO

La 14an de Marto 1933, responde al demando mia pri Pra-Esperanto, Dro Leono Zamenhof, frato de la Majstro, skribis al mi: «La teksto, pri kiu vi mencias el la artikolo de Baghy, rilatas la projekton de Esperanto el la jaro 1881. El tiu ĉi periodo restis tri kajeroj... Por la historiisto de Esperanto tiuj ĉi kajeroj, kompreneble, povas havi grandegan intereson, sed oni devas ilin trastudi, kio postulas sufiĉe longan tempon. Kiel pruvon, mi donos al vi 3 tekstojn de *Nia patro* eltiritajn el la supre cititaj kajeroj:

N° 1

*Patro mie, kvo sah in celo,
sante suh te nomo,
venuh te regito,
suh te volo kom in el celo sik ak sur tero!*
5 *Mie omnudie panon donuh a mi hoj,
e parduh a mi mie debin,
kom mi ak pardah a mie debanil!
Ne dukuh min in tenton,
sed libriguh min de el malo!*

N° 2

10 *Patro ne, ku sah il celo,
sante suh te nomo,
venuh te regitto,
suh te volo, ke il lo celo, ke anku sur lo tero.
Ne cudie panon donuh a nu hoy,*
15 *e pardonuh a nu ne debos,
ke nu anku pardonah a ne debantos!
No dukuh nun in tento,
sed liberiguh nun de l' malbono!*

- 20 *sante suh tos nomo,*
 venuh tos regno,
 suh tos volo, ke in celo te ak sur tero:
 Mis skelghorne panon donuh a mi hoy,
 e skuzuh a mi mis debin,
- 25 *ke mi ak skuzeĥ a mis debori.*
 Ne dukuh min in tenton,
 sed liberiguh min de malo.
 Car tos seh gloro e forto ternu. Amen.

(Ke studo de tiuj tekstoj postulus longan tempon, bone pravas la fakto, ke eĉ la simpla kopio estis tre malfacila: Dro Leono Zamenhof faris ne malpli ol 13 leg-erarojn, kiujn malkovras simpla komparo kun la ĉirkaŭteksto; li skribis: *sak* (linio 1.), *santa* (l. 2), *parduh* (l. 7), *min sentos* (l. 8), *lebrigh* (l. 9), *ni* (l. 10), *sah* (l. 11), *mi* (l. 15), *ankau* (l. 16), *pardonuh* (l. 16), *mos* (l. 19), *skazuh* (l. 24), *libigh* (l. 27). Kaj li supozeble konis la skribmanieron de sia frato!)

Tiu letero kaj la entenataj tekstoj metas malfacilajn demandojn: 1° Kiel estis eble, ke en 1933 Leono Zamenhof parolis pri tri kajeroj de 1881 kaj kopiis tekstojn el unu, se jam en 1929 F-ino Lidja Zamenhof estis donacinta unu el ili al la Viena Muzeo? 2° Kiel fariĝas, ke la tri cititaj tekstoj prezentas evidente ekzemplojn de elprovata dialekto, dum la tri kajeroj de 1881-82 montras tute difinitan, memkoheran lingvon? 3° Kiel klarigi, ke la karakterizaj komunaj trajtoj de tiuj tri pecoj (neniaj supersignitaj literoj, pluralo per *-i* aŭ per *-s*, adjektivoj senvariaj per *-e*) ne akordas kun la linio de evoluo inter 1879, 1881 kaj 1887 (emo al vastigado de la akuzativo, de la varienco de la adjektivoj ktp)?

Alian respondon oni ne povas trovi, krom tiu, ke, kontraŭe al la opinio de Leono Zamenhof, niaj tri tekstoj ne datiĝas de 1881, sed de posta tempo. Kiam do? Estas la verbaj finaĵoj per *-h*, kiuj montris al mi la vojon: mi memoris, ke Zamenhof parolis pri tia detalo... en 1894. Efektive, la citaĵo, kiun mi faris sur la paĝo 39, legiĝas plu:

«Dank' al la 4 diritaj oportunaĵoj, kiuj povus esti akiritaj per unu tre simpla reguleto, la akcentitaj formoj havis por mi jam de longa tempo grandan allogon kaj mi decidis akcepti ilin en la projekton. Sed pripensinte la aferon pli objekte, mi devis konfesi, ke la akcentoj sur literoj por multaj personoj prezentos ion fremdan en nia lingvo, objekton de disputado kaj nekontenteco; al la komencantoj (tiuj ĉi personoj estas por ni la plej gravaj) la akcentoj per la unua rigardo prezentos ion komplikitan, la lingvo tiam ŝajnos al ili ne tiel simpla, kiel ni dezirus. Mi akceptis la formojn, eljetis ilin, denove akceptis, provis anstataŭigi ilin per aliaj formoj, kiuj en la esenco donus tion saman, ne fortimigante tamen la unuan rigardon (ekzemple *h* post vokalo devus signifi, ke la vokalo estas akcentita . . . k. t. p.), kaj post multaj provoj kaj reprovaj mi fine devis forĵeti la akcentitajn formojn, kvankam mi persone forte ilin aprobas».¹

Tiuj linioj donas al ni la solvon de la problemo. La tri cititaj tekstoj rilatas, ne al la dialekto de 1881, sed al tiu de 1894. Kaj ĉar tiu lasta estas malmulte konata, mi unue diros kelkajn vortojn pri ĝi.

En la Antaŭparolo de lia unua broŝuro, en 1887, Zamenhof skribis, fine de la Tria Parto: «Jen ĉio, kion mi opiniis necesa diri pri mia afero. Malproksima de mi estas la pretendo, ke la de mi proponata lingvo estas io tiel bona, tiel perfekta, ke nenio povus ĝin superi; sed mi penis, kiom estis eble, kontentigi ĉiujn postulojn de lingvo internacia. Nur post sukcesa solvado de ĉiuj problemoj, kiujn mi starigis al mi (nur la plej esencajn mi pritraktis ĉi tie, pro la dimensioj de la broŝuro), kaj nur post multjara pripensado de la afero, mi decidiĝis aperi kun ĝi antaŭ la publiko. Sed mi estas homo, kaj povas esti, ke mi eraris, ke mi faris ian nepardoneblan mispaŝon, ke mi malzorgis almeti al la lingvo regulojn, kiuj povus esti tre utilaj por ĝi. Tial, antaŭ ol mi eldonos plenan vortaron kaj komencos eldonadon de libroj kaj gazetoj, mi prezentas mian verkon por unu jaro al la bonvola prijuĝo de la publiko, kaj mi min turnas al ĉiuj kleruloj, kun peto, ke ili eldiru al mi sian opinion pri

¹ «La Esperantisto», N° 3, Marto 1894, pĝ 38.

la de mi proponata lingvo. Ĉiu informu min skribe pri tio, kion li rigardas necesa ŝanĝi, plibonigi, aldoni k. t. p. El la alsenditaj al mi rimarkoj mi danke uzos ĉiujn, kiuj montriĝos vere kaj sendube utilaj, ne tamen detruante la fundamentajn bazojn de la lingvo, t. e. la facilecon de ĝia lernado, kaj ĝian nepran taŭgecon por servi al internaciaj rilatoj sendepende de la nombro de la adeptoj. Post tiuj eventualaj ŝanĝoj, kiuj estos publikigitaj en speciala broŝuro, la lingvo akiros konstantan, definitivan formon».¹

La broŝuro ne aperis pro tio, ke la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio tiutempe proponis kunvoki internacian kongreson, «por decidi la finan formon de lingvo tutmonda»: al tiu estonta kongreso Zamenhof en 1889 konfidis la zorgon pri plibonigo de la lingvo. «La sola ŝanĝo, kiun mi trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ *ian*, *ĉian*, *kian*, *nenian*, *tian* — devas esti: *iam*, *ĉiam*, *kiam*, *neniam*, *tiam* (por malegaligi la vortojn *ian* etc. kaj *ia/n* etc.)»²

Sed la propono de la Amerika Societo ne ricevis favoran akcepton, kaj la koncerna kongreso ne okazis. Zamenhof tiam provis starigi ian «Ligon de la Esperantistoj», kiu prenis sur sin la decidon pri ŝanĝoj. Sed la Ligo ne bone funkciis, kaj finfine, antaŭ la multiĝo de la kritikoj kaj proponoj, Zamenhof en 1893 decidis ataki mem la demandon, kaj en la plej radikala maniero. «Mi preparolos la tutan lingvon, kaj pri ĉiu peco mi montros, kian formon mi donus al ĝi, se mi komencus la kreadon de la lingvo *n u n*, havante post mi jam 6½ jarojn da praktika laborado kaj elprovado kaj elaŭdinte jam tiom multege da opinioj kaj konsiloj, ricevitaĵ de plej diversaj personoj, gazetoj kaj societoj...»³ La ĉefaj ŝanĝoj, kiujn proponas la nova projekto, estas: la forigo de la supersignitaj literoj, de

¹ Tradukita el la tekstoj rusa kaj franca. Tiu parto estis preterlasita de Z en FK kaj de Dietterle en OV.

² Aldono al la Dua Libro, pĝ 5, 6. Oni eksciis poste, ke tiun plibonigon proponis sro E. von Wahl, tiam studento en Moskvo, kaj fariĝonta la aŭtoro de la lingvo «Occidental». Ke tiel evidentan difekton — la solan kaj ĝenan homonimon en la tiama lingvo — Zamenhof ne rimarkis antaŭ la publikigo, estas io al mi nekomprenebla.

³ «La Esperantisto», Januaro 1894, pĝ 3. Kp OV pĝ 189.

la akuzativo, de la fleksio ĉe la adjektivoj, kaj de la tabelpronomoj (anstataŭitaj de pli naturaj formoj). Nu, ĉiujn ĉi trajtojn ni retrovas en la tri ĉi-supraj variaĵoj — kaj estas nun klare, ke ili prezentas kelkajn el la eksperimentoj provitaj de Zamenhof antaŭ la definitiva redakto de siaj «reformoj». Se restus ankoraŭ ia dubo en la spirito de la leganto, li komparu tiujn tri tekstojn de la *Patro nia* kun la formo, kiun Zamenhof proponis ekzemple en la fino de sia dua artikolo:

*Patro nue, kvu esten in cielo,
sankte estan tue nomo,
venan regito tue,
estan volo tue, kom in cielo, sik anku sur tero.
Pano nue omnedie donan al nu hodi
e pardonan al nu debi nue,
kom nu anku pardonon al nue debenti;
ne kondukan nu in tento,
sed liberigan nu de malbono.¹*

Resume, oni devas supozi, ke la kajero priparolita de Leono Zamenhof estis la kvara, kaj ne la tria, el tiuj arĥivaĵoj, ke ĝi datiĝis de la jaroj 1893-94, kaj ke ĝi entenis diversajn provojn de reformata Esperanto.

En la fragmentoj tiel al ni konservitaj, aparte rimarkinda estas la uzo de unu sola konsonanto s- por la radiko de la verbo *esti*: tio ebligis tre oportunan mallongecon de tiu tre ofte uzata verbo, kaj ne ĝenis la komprenon.

Sed la plej frapanta trajto estas la miksado de arbitraj kriplajoj, kiuj rekondukas nin al la periodo de 1881 (*pardu*^k = pardonu, *ak* = ankaŭ, *cu* kaj *skel* = ĉiu, *ternu* = eterne) kaj de plene naturcaj formoj: la sufikso -ito de L -itas (= -eco), la vortoj *omnu* de L *omnis* (= ĉiu), *kom* de F *comme* (= kiel), *sik* de L *sic* (= tiel),

¹ «La Esperantisto», Februaro 1894, pĝ 21. Atentu, ke la vortaro publikigita tie en la Aprila kaj Maja numeroj alportos ankoraŭ kelkajn ŝanĝojn, kiujn oni trovos en *Leteroj de Zamenhof*, I pĝ 243.

hoj de *H hoy*¹ (= hodiaŭ), *ghorne* de *I giorno* (= tago) ktp. Same, en la pecoj 1 kaj 3, la elekto de la pronomo *mi* por la unua plurala persono, laŭ la modelo de la slavaj lingvoj, faras neatenditan kontraston kun la cetero de la lingvo-materialo, preskaŭ nur de latinida deveno.

Sed por juste juĝi, oni devas memori, ke floradis en tiu tempo, kaj ankoraŭ dum pluraj jardekoj, la aprioraj sistemoj, ke fruktodona kaj lumalportanta diskutado pri la principoj de aposteriora lingvo komenciĝis nur en 1896 per la gazeto «Linguist», ke nur en 1902 finiĝos la pretigado de «Idiom Neutral»: en 1894 Zamenhof havis nur sian genion por gvidi lin en la labirinto de la interlingvistiko, kaj la «Reformita Esperanto» de tiu jaro, kvankam lokloke hibrida, estis tre supera al ĉiuj sistemoj ĝis tiam publikigitaj, kaj al preskaŭ ĉiuj poste publikigitaj.

¹ Zamenhof, kiu ne sciis la hispanan, ekkonsideris tiun lingvon nur post siaj diskutoj kun E. von Wahl, kiu lernis ĝin en Moskvo dum prepariĝo al la ekzameno de mar-ofiĉiro.

ETIMOLOGIAJ ESPLOROJ

La sola etimologia vortaro de E, la tre bona kaj utila verko de nia respektata ekskolego Louis Bastien, sisteme flankklasas la afiksojn, pronomojn, prepoziciojn, konjunkciojn kaj adverbojn. Tio estas cetere tre komprenebla afero: dum Zamenhof klare diris, ke la vortradikoj devas esti prenataj el la naturaj lingvoj kaj sub ilia plej internacia formo, li neniam sentis sin tiel ligita koncerne la gramatikilojn, tiel ke pri la origino de kelkaj oni ankoraŭ diskutas.

Sed la studo de la pra-esperantaj dialektoj, same kiel tiu de la post-esperanta, instruis al ni sufiĉe multe pri la principoj, kutimoj kaj metodo de la juna Zamenhof, kaj tiuj instruoj povas servi al la klarigado de kelkaj mallumaj punktoj en nia esplorkampo. Ĝin aliaj provis jam trairi, sed mankis ofte al ili aŭ scienca metodo, aŭ ĝusta scio pri la pasinteco de E. Estas nescienca hipotezo proponi, kiel etimon, vorton de lingvo, kiun Zamenhof ne sciis, ekz-e el la dana aŭ sveda. Estas eraro ekspliki la vorton *jen* per D *jener*, ĉar en la dialekto de 1881 la formo de tiu vorto estis *en*, laŭ la latina samsignifa adverbo. Cetere, mi ĉiam miras konstatante, kiom malofte la esperantistoj uzis la avantaĝon, kiun ili ĝuis dum la vivo de Zamenhof, demandi lin pri la klarigo de enigmaj vortoj: la peto de Boirac pri *edzo* (en «Oficiala Gazeto», Dec. 1913) restis io preskaŭ unika. Tial ni plurloke devos konfesi nian nescion kaj kontentiĝi je probablaĵoj.

I

La substantivajn, adjektivajn kaj adverbajn finaĵojn ni jam vidis en la dialekto de 1881. La finaĵoj *-o* kaj *-a* probable venis de la sonora itala lingvo: vere ili estas tie ligitaj kun genroj (respektive

vira kaj ina);¹ sed, ĉar genro ne ekzistas en E, Zamenhof opiniis, ke tio ne tre ĝenos. Cetera la plej granda nombro de la internaciaj vortoj finiĝantaj per -o, kiuj transpasis en D, estas neŭtraj kaj sekve ne elvokas ideon pri genro (*Agio, Bŭro, Giro, Porto, Piano, Radio, Risiko, Tempo* ktp), aŭ, se virgenraj, ne elvokas ideon pri sekso (*Saldo, Salto, Sirokko, Tango, Tornado* ktp). La sola ĝeno, kiun lia elekto okazigos kun la tempo, troviĝos ĉe la propraj nomoj: nur malvolonte la romidlingvaj popoloj rigardos *Elviro, Julio, Lukrecio, Mario, Marto* ktp kiel virinajn nomojn. Sed la fleksebleco de la lingvo kaj la eltrovemo de Kalocsay malkovros solvon en la uzado de la substantivigitaj adjektivaj formoj: *Elvira, Julia* ktp.

II

La signo de la akuzativo, kiu estis -l en 1881, fariĝis -n. La finaĵo -l estis verŝajne elektita el la nura vidpunkto de la eŭfonio: ĝi estas unu el la konsonantoj, kiuj plej facile ligiĝas kun la aliaj (kaj tiu konsidero diktos la formon de la prepozicioj *al* kaj *el*, kaj probable de la tabeladverboj en -*el* kaj -*al*). Sed, en funkcio de akuzativo, ĝi prezentis nenian similecon al la naturaj lingvoj: jen kial Zamenhof anstataŭigis ĝin per -n, kiu trovis apogon ĉe G(τὸν λόγον = la parolon) kaj ĉe D (*den Knaben* = la knabon; *ihn* = lin).

¹ Sro N. Z. Majmon tiris mian atenton al kurioza koincido: en la moderna aramea lingvo, ĉiu substantivo finiĝas per unu vokalo, kiun oni nun ĝenerale prononcas a, sed kiun la litovaj Hebreoj (kaj do Zamenhof mem) prononcis o. Tiu vokalo prezentis komence nur la difinan artikolon, sed ĝi fariĝis poste la finaĵo de ĉiu substantivo, eĉ sen difina artikolo. Kaj la pluralo entenas unu j, laŭ la modelo: *malko* (reĝo), *malhajo* (reĝoj), *gavro* (viro) *gavrajo* (viroj). Sed celante doni al sia lingvo latinidan karakteron, Zamenhof multe pli probable atentis la italan modelon.

III

En 1881 la konjugacio estis ankoraŭ ĥaosa. La motivon de ŝanĝado oni povas diveni. Zamenhof mem klarigis, ke li devis rezigni pri la temposignado per akcentaj finaj vokaloj, ĉar tio riskis timigi la komencantojn: montriĝos jam sufiĉe forta baro la kvin supersignitaj konsonantoj! Eblaj restis do finaĵoj senakcentaj, kiuj, por ne konfuziĝi kun la signoj de la substantivoj kaj adjektivoj, devis konsisti el vokalo kaj konsonanto. La plej internacia konsonanto en tiu funkcio estus *-t*, kiu montras la trian singularan personon en multaj lingvoj; sed ĝin li ne volis akcepti, «ĉar ĝi malbonigus la harmonion en nia lingvo».¹ Probable estas, ke li tiam elektis la signon de la dua persono, kiu estas *-s* en L (*amas* = ci amas), G (*ἀμᾶς* = ci malligas), F (*tu aimes* = ci amas) kaj H (*tomas* = ci prenas). Cetere tiu finaĵo ankaŭ karakterizas ĉiun trian singularan personon de la anglaj verboj, ĉe la prezenco (*he loves* = li amas).

La vokaloj devis do signi la tempojn; ne estas klare, kial li ŝanĝis la *-é* de 1881 en *-a* ĉe la prezenco, des pli ke, en 1894, li revenos al *-e* (*lu amen* = li amas). Interesan solvon proponis al mi mia kolego Bastien — ke Zamenhof simple uzis la kvin vokalojn en ilia alfabeto ordo por la kvin unuaj tempoj: prezenco *-As*, imperfekto² *-Es*, preterito *-Is*, futuro *-Os*, kondicionalo *-Us*. *Se non è vero* ... Pri la infinitiva *-i* mi jam parolis; restis la imperativo, kaj tre verŝajne, ke Zamenhof elektis por ĝi *-u*, ĉar ĝi estis la lasta libera vokalo, kaj cetere ĝi servis al li kiel surogato por ĉiu alia neoportuna vokalo (vidu ĉi-supre *lug* — 1881 — kaj ĉi-sube *ju* kaj *uj*).

Kompreneble, ne estas neeble trovi en kelkaj naciaj lingvoj iel analogajn formojn; la plej frapantaj estas la letonaj: la refleksaj verboj, je la unua persono, tie finiĝas prezence per *-as*, future per *-os*, dum la preterita kunmetita formo de la aktivaj verboj entenas participon kun *-is*. Sed ĉu Zamenhof ion konis de la letona konjugacio, estas ege dubinde. Almenaŭ pli verŝajna estus la

¹ «La Esperantisto», Febr. 1894, pĝ 19.

² «La imperfekto, kies finiĝo estis *-es*, restis en la lingvo ankoraŭ eĉ en la komenco de 1887» (*Leteroj de Zamenhof*, I pĝ 351).

influo de la hebrea lingvo, kie la vokalo *a* karakterizas la perfektan (kiu povas ankaŭ signifi prezencon), dum *o* montras la futuron (*qātal: jiqtol* = li estas mortiginta : li mortigos); en ĝi ankaŭ oni renkontas *u* ĉe la imperativo (*halelu* = laŭdu). Sed tre probable temas pri simplaj koincidoj.

La genia eltrovo estis la uzo de tiuj tri gvidvokaloj por naski la participojn. Ilia konsonanta parto estis jam sufiĉe evidenta por la aktiva prezenca (L *amantem*, *punientem* = amanton, punanton; F *aimant*, D *liebend* ktp jam sugestis la finaĵon *-ente* de 1881), kaj pri la pasiva preterita (L *amatum*, *punitum* = amatan, punitan, I *amato*, *punito*; D *geliebt* ktp jam sugestis *-ita* en 1881). Tiuj du finaĵoj, obligitaj per la tri gvidvokaloj, liveris niajn ses participojn, kiuj verdire ekzistas tiel multaj nur en la antikva greka lingvo kaj en la nuna finna, kaj montriĝis, precipe ĉe la pasivo, fonto de diskuto kaj malkonsentoj. Sed oni ne povas nei, ke ilia sesopa garnituro multe levas la koncizon kaj nuancigon de E.

IV

La personaj pronomoj finiĝis per *-o* en 1881. Sed «praktikaj provoj montris al mi, ke tiuj formoj estas neoportunaj».¹ Efektive, se oni asimilas la personpronomojn al la substantivoj, la pluralo devas esti ankaŭ simila: *mo* devus fariĝi *moj* (= ni), kaj kiel de ĉi tiu formo derivigi posedan adjektivon? Cetere, logike, *ni* ne estas la pluralo de *mi*, sed ja signifas: *mi kaj aliaj*. Kaj se oni elektas apartajn radikojn por la pluralaj personpronomoj, tiam oni renkontas tiun nekoheraĵon, ke pronomoj pluralaj finiĝas same kiel substantivoj singularaj: *no esté homoj* estis eble ankoraŭ pli ŝoka, ol la alia solvo. Krome, du pronomoj havis tute arbitran radikon: *ro* kaj *po*, unu alia (*to*) riskis krei konfuzon kun la nova radiko de la demonstrativoj, kaj unu mankis por la neŭtra triapersona.

La vokalo, kiu sin proponis anstataŭe laŭ la naciaj lingvoj, estis *-u* (L H I *tu*, F *nous*, *vous*, D *du*, *uns*, A *you* ktp.); tiu vokalo cetere estis jam uzata ĉe la pronomoj de la tabelvortoj (*kvu*, *ĉiu*

¹ «La Esperantisto», samloke.

ktp) kaj povis liveri bonan finaĵon por tiu vortoklaso. Sed, kvankam Zamenhof revenis al ĝi en la dialekto de 1894 (*mu, tu, elu, su, nu, vu, loru*), li probable trovis, ke ties sono, precipe ĉe la akuzativo, estus tro surda kaj povus estigi konfuzojn (*nun, lun, sun* ktp — oni rimarkos, ke en 1894 tia danĝero plu ne ekzistis, pro la forigo de la akuzativo), kaj li preferis la vokalon *-i*, eble ĉar ĝi estis pli malpeza, donas ĉe la adjektiviĝo pli mildajn sonojn (*mia, sia* ktp), kaj tiel memorigas la formojn francajn (*mien, tien, sien*) kaj italiajn (*il mio, la mia*). Eble li konsideris ankaŭ, ke tri el la anglaj personpronomoj finiĝas per *i*-vokalo (*he, she, we*), ke en R unu finiĝas per *i* (*oni* = *ili*) kaj tri aliaj per tre proksima sono (*mī* = *ni*, *tī* = *ci*, *vī* = *vi*), kaj ke en H kaj I pluraj objektaj pronomoj finiĝas same (*mi, ti, ci, vi, li* = *min, cin, nin, vin, ilin*).

La radikoj de tiuj pronomoj estis konformigitaj al pli granda internacieco:

Singularo, Unuapersona: *m-*, laŭ F *me*, A *me*, D *mich*, R *moj* ktp

Duapersona: *devus esti t-*, laŭ F H I *tu*, A *thou*

Triapersona: Vira: *L-*, laŭ F *le*, *lui*, I *lui* ktp

Ina: *ŝ-*, laŭ A *she*

Pluralo, Unuapersona: *n-*, laŭ F *nous*, H *nos*, I *noi*, D *uns* ktp

Duapersona: *v-*, laŭ F *vous*, H *vos*, I *voi*, R *vī* ktp

Triapersona: *il-*, laŭ F *ils*

Refleksivo: *s-*, laŭ L *se*, F *se, soi*, H, I *se*, D *sich*, R *sebja* ktp

Nedifina: *on-*, laŭ F *on*, Kp A *one*

Sed du malfaciloj aperis: je la duapersona singulara, la poseda adjektivo *ti-a* konfuziĝus kun la nova tabelpronomo *tia*: Zamenhof tion evitis, per alpreno de la najbara formo, kiun la pola pronomo montras ĉe la dativo (*ci* = al *ci*) kaj akuzativo (*cię* = *cin*). Fine restis la triapersona neŭtra pronomo, por kiu neniuj eŭropa lingvo prezentis taŭgan konsonanton, ĉar A *it* kaj D *es* okazigus konfuzojn aŭ kun la tabelpronomo *tia* aŭ kun la refleksivo. Estas probable, ke la ina formo *ŝi* inspiris al Zamenhof la ideon uzi por tiu neŭtra pronomo alian supersignitan konsonanton; la responda voĉa *ĵ* ne estis ebla, ĉar ĝi tro similis la francan unuapersonan *je*; tial restis nur *ĝ*, kiun li elektis por fari nian *ĝi*.

La tabelvortoj metas al ni plurajn problemojn. En 1881, se la finaĵoj de la pronomoj estis jam la niaj, tiuj de la adverboj, krom la kvantaj, estis tute malsimilaj, kaj la radikoj prezentis ne homogenan aspekton. La plej internaciaj, laŭ la formo, estis la rilativoj: *kvo* (L *quod*), *kvu* (L *quis, qui*), *kva* (L *qualis*), *kvi* (Kp I *qui*), *kvan* (L *quando*), *kvom* (F *combien*): oni rekonas, ĉe pluraj el tiuj formoj, la sistemon de tranĉado de tro longaj vortoj, kiun ni renkontis en tiu «oportunigema» periodo. La kolektivoj iel povis pravigi sian radikon per la komparo kun F *chacun* (pr. *ĝakû*), I *ciascuno* (pr. *ĉaskuno*), A *each* (pr. *iĉ*). Sed la montraĵoj kaj neaj estis plene arbitraj, kaj ebligis multajn konfuzojn (*fo* = tio, *fio* = nenio, *fio* = fojo ktp), kaj la nedifinaj danĝere similis la rilativajn.

Oni ne scias, per kia metodo Zamenhof reformis la tabelon. Ŝajnas, ke li deiris de la kolektivaj, kaj pensis unue pri ĝeneraligo de ilia ligvokalo *-i-* kiel rimedo de unuecigo: *ki-* donus, ĉe la rilativoj, formojn pli malpezajn ol *kv-*; tiu *i* cetere sufiĉus per si mem kiel signo de la nedifineco, kaj iel povus memori pri D *irgend* (= ajn). Li do almetis tiun *-i-* al la komenca konsonanto de F *tel* (tia), A *that* (tio), R *to* (tio), *tak* (tiel) ktp por ricevi la radikon de la montraĵoj adjektivoj kaj adverboj. Por la neaj, multaj lingvoj proponis la konsonanton *n-*: L *nullus* (neniu), F *nul* (neniu), A *nothing* (nenio), G *niemals* (neniam), R *nikto* (neniu) H *nada* (nenio) ktp; sed la tiel ricevita radiko (*ni-*) riskis krei konfuzojn kun la unuapersona pronomo en pluralo. Zamenhof probable provis uzi la plenan negativan formon *ne* kaj, ĉar tio kreus serion da tri sinsekvaj vokaloj, almeti post ĝi ripetitan *n*: *ne+n+i*.¹

La finaĵoj ankaŭ postulis reordigon, sed ĝi ne estis plene kontentiga. En 1881 la manieraj adverboj finiĝis per la adverbaj signoj *-e*, kio estis simpla kaj logika. Sed estis bezone ŝanĝi la lokajn adverbojn, ĉar la hiato *-ii*, ripetite ĉe ĉiu el la kvin kategorioj, estis terure malbonsona. Anstataŭ uzi por la lokaj adverboj novan

¹ Oni tamen devas rimarki, ke en la Fundamenta Ekzercaro Zamenhof parolis pri «la prefikso *nen*», kio povus supozigi, ke temas pri ia miksa formo inter F *non* kaj D *nein*.

finajon (kaj la loka sufikso proponis facile *-ej*), Zamenhof atribuis al ili la manieran *-e*, kio devigis lin doni al la tabelaj manieraj adverboj alian finaĵon, ol al la cetero de tiu kategorio: tiel klariĝas la kontrasto inter *tie* (en tiu loko) kaj *alie* (en alia maniero), kaj la neeblo etendi la sistemon de la tabelvortoj al aliaj komunuzaj radikoj.

Tiu finaĵo *-el* devenas probable de F *quel, tel* (kiela, tiela); la kaŭza finaĵo *-al* venas eble de la oportuno de la L *quare* (kial): ĉar Z ne trovis la finan *r* bonsona, li elektis, eble pro analogio kun *-el*, la najbaran likvan *l*, laŭ la metodo de Volapük transformi A *year* al *yel*. Pri *-an* kaj *-om* li konservis la formojn de 1881, kaj nur en 1889 ŝanĝis *-an* al *-am*, laŭ la analogio aŭ de *-om*, aŭ de la adverbo *jam*. Fine la posedan finaĵon *-es* li tiris el la germanaj pronomoj *des* kaj *wes* (ties, kies).

VI

La aliaj primitivaj adverboj havas ordinare sufiĉe klaran etimologion, se nur, ĉe kelkaj datiĝantaj de 1881, oni memoras la sisteman mallongigon, kiun ili suferis: la L *etiam* ekz-e, mallongigite al *etj*, estis simpligita en *eĉ* ktp.

De la franca lingvo devenas la plej multaj, nome: *adiaŭ* (F *adieu*, H *adiós*, I *addio*),¹ *ankoraŭ* (F *encore*, I *ancora*), *apenaŭ* (F *à peine*, H *apenas*, I *appena*), *ĉi* (F *ci*), *hieraŭ* (F *hier*, I *ieri*), *ĵus* (F *justement*, Kp A *just*), *mem* (F *même*), *ne* (F *ne*, Kp R *ne*), *pli*, *plu*, *plej* (F *plus*, Kp I *più*),² *preskaŭ* (F *presque*), *tre* (F *très*), *tro* (F *trop*), *tuj* (F *tout de suite*).

De la germana devenas: *ajn* (el *irgend ein*, laŭ la prononco),

¹ Tiu finaĵo *-aŭ* estis la kurioza finaĵo de la virinaj nomoj en 1881; kiam Zamenhof rezignis ĝin por tia funkcio, li eble estis tiel kutiminta al ĝia sono, ke li volis uzi ĝin por alia rolo, kaj decidis signi per ĝi la adverbojn-prepoziciojn.

² La formo *plu* kopias la skribon de la franca vorto, *pli* la proksimuman prononcon; por signifi la superlativon, li variigis tiun saman formon, uzante tiun *j*, kiun li rezervis al si kiel variigilon, kaj kiun oni retrovas en *tuj*, *jen* kaj pluraj adverboj aŭ prefiksoj de 1881.

baldaŭ (*bald*), *for* (D *fort*, Kp A *forth*), *ja* (*ja*), *ju* ... *des* (*je* ... *desto*),¹ *morgaŭ* (*morgen*), *nun* (D *nun*, Kp L *nunc*), *ol* (*als*).²

De la latina devenas: *eĉ* (*etiam*), *hodiaŭ* (*hodie*), *jam* (*iam*), *jen* (*en*), *kvazaŭ* (*quasi*).

De la itala devenas: *almenaŭ* (I *almeno*, Kp H *al menos*, F *au moins*), *ankaŭ* (*anche* — prononcu: *anke*).

De la angla venas: *jes* (*yes*) kaj de la pola: *ĉu* (*czy* — prononcu: *ĉy*).

VII

El la konjunkcioj, la plimulto devenas el la latina: *aŭ* (*aut*), *nek* (*nec*), *sed* (*sed*), *tamen* (*tamen*); la ceteraj el la franca: *ĉar* (F *car*, kun modifo de la konsonanto por eviti la kolizion kun *kara*), *do* (*donc*, Kp D *doch*); el la germana: *nu* (*nu*), kaj el la greka: *kaj* (*καί*).

El la subjunkcioj, devenas el la latina: *dum* (*dum*), *kvankam* (*quanquam*); el la franca: *ĝis* (*jusqu'à ce que*),³ *ke* (F *que*, H *que*, I *che*), el la itala: *se* (*se*, Kp L F H *si*).

El la prepozicioj, devenas el la greka: *pri* (*πρί* — Kp R *pri* = *apud*);

el la latina: *al* (*ad*),⁴ *antaŭ* (*ante*), *apud* (*apud*), *ĉirkaŭ* (L *circa*, uzata ankaŭ en D *figursence*, H *cerca*, I *circa* — prononcu: *ĉirka*), *ekster* (*extra*, *exter/ior*), *el* (*e*, *ex*),⁴ *inter* (*inter*), *kontraŭ* (*contra*,

¹ Pro la ekzisto de la prepozicio *je*, Zamenhof variigis la vokalon *e* al *u*: tiu ĉi ludis en tiaj «oportunigoj» iom la saman rolon, kiel *j*. La simileco kun la sveda *ju* ... *dess* estas nur koincido.

² Oni memoras, ke en 1881 la formo estis *el* (*al* en tiu tempo signifis *al la*); kiam *he* fariĝis la pli internacia *el*, Zamenhof variigis la antaŭan *el* al *ol* (ĉar *ul* estis uzata kiel sufikso).

³ Probable, kun influo de D *bis*.

⁴ La fina konsonanto estis ŝanĝita al *l*, ĉar tiu ĉi plej facile ligiĝas kun la aliaj konsonantoj: *al kio* estas pli oreplaca ol *ad kio* ktp. Cetere, oni jam trovas tiun asimiliĝon en la latinidaj lingvoj, sed nur antaŭ alia *l*: L *adlocare*, F *allouer*, I *allogare* ktp.

Kp F *contre*, H *contra*, I *contro*), *kun* (*cum*, eble influita de I *con*), *per* (*per*), *post* (*post*), *preter* (*præter*), *pro* (*pro*, *propter*), *sen* (*sine* kun vokalsanĝo por eviti kolizion kun *sin* aŭ *san*, Kp F, A *sans*, H *sin*, I *senza*), *sub* (*sub*), *super* (*super*), *trans* (*trans*);

el la franca: *ĉe* (*chez*, prononcu: ŝe), *de* (*de*, Kp L *de*), *en* (*en*), *malgraŭ* (F *malgré*, I *malgrado*), *por* (*pour* — kun ŝanĝo de la vokalo por eviti kolizion kun *pura*; H *por*), *sur* (*sur*);

el la itala: *da* (*da*), *tra* (*tra*);

el la germana: *anstataŭ* (*anstatt*), *je* (*je* — kun tre ĝeneraligita senco), *laŭ* (*laut*);

el la rusa: *krom* (*krome*), *po* (*po* — ankaŭ P).

VIII

Esperanto 1887 havis 8 prefiksojn, al kiu en 1929 oni aldonis unu novan: *mis-*.

Venas de la latina: *dis-*: *discurrere* (diskuri), *disicere* (disĵeti) ktp. Tiu prefikso estas ankaŭ konata de la latinidaj lingvoj: F *disséminer* (dissemi), H *distribuir* (disdoni), I *disgiungere* (disjungi) ^{mal kunigi} ktp.

re-: *reducere* (rekonduki), *reficere* (refari) ktp. Tiu sufikso trapasis en la latinidajn lingvojn, F *reconduire*, *refaire* ktp, H *rehacer*, *rehabilitar*, I *ricondere*, *rifare* ktp, kaj de tie en A *to renew*, *resume*, *revive* ktp kaj en D *reaktivieren* ktp.

Venas de la franca: *bo-*: *beau-frère* (bofrato), *beau-fils* (bofilo);

ek- estas probable detranĉaĵo el la verbo *s'écrier* (ekkrii); la greka prefikso *ék-* havas iafaje la saman signifon: *γεῖν* (*ridi*), *ἐκγεῖν* (*ekridi*), *λάμπειν* (*brili*), *ἐκλάμπειν* (*ekbrili*).

eks- venas de la franca, kiu donis al tiu latina prefikso tiun apartan signifon: *ex-président* (eksprezidanto) etc. Tiu francismo trapasis en multajn lingvojn: H *ex ministro*, I *ex-ministro*, D *der Exminister* ktp.

mal-, kies praa senco estis *malbon-*, akiris la sencon de nia prefikso en F: *maladroit* (mallerta), *malpropre* (malpura) ktp kaj en I: *malaccorto* (mallerta), *malfermo* (malfirma) ktp.

Venas de la germana: *ge-*, kiu propre signifas kolekton, kaj havas nian seksan sencon nur en *Geschwister* (gefratoj) kaj *Geliebten* (geamantoj).

Venas de la rusa: *pra-*: *pradied* (praavo) ktp. Tiu prefikso ekzistis cetere en L sub la formo *pro-* (*proauus* = praavo, *pronepos* = pranepo ktp).

Fine venas de la ĝermanaj lingvoj la prefikso *mis-*: A *misunderstand* (miskompreni), D *missbrauchen* (misuzi) ktp, kiu cetere respondas al la franca prefikso (de tute alia deveno) *més-* (*mésalliance* = misedziĝo, *mécompte* = miskalkulo ktp).

IX

Esperanto havis, en 1887, 29 sufiksojn, al kiuj aldoniĝis oficiale la sufiksoj *-ac-* en 1909, *-ism-* en 1919 kaj *-end-* en 1953.

La sufiksoj prezentas, pli ol la prepozicioj aŭ konjunkcioj, enigmajn formojn: tio venas de tio, ke pluraj el ili probable naskiĝis en la tempo de praesperanto, sed ankaŭ de la fakto, ke Zamenhof trudis al ili (krom al du de tute aparta karaktero) unuforman konsiston, unusilaban, komenciĝantan per vokalo kaj finiĝantan per konsonanto.

Se oni ekzamenos la sufiksojn el la vidpunkto de ilia etimologio, oni rimarkos, ke multaj grupiĝas en parojn — kaj tio helpas, mi opinias, al la klarigo de ilia deveno. Ĉar ĉio okazas, kvazaŭ Zamenhof estus sisteme deforminta unu konatan sufikson por ricevi la malon, aŭ alian nuancon de ties signifo.

Ĉiuj konsentas, ke *-ig-* kaj *-iĝ-* faras tian paron: la sufikson *-ig-* Zamenhof evidente tiris el la germana, kie derivitaj verboj kun la sufikso *-igen* estas ne maloftaj: *reinigen* (purigi) el *rein* (pura), *kündigen* (konigi) el *kund* (konata), *sättigen* (satigi) el *satt* (sata); plejofte vere la sufikso estas simple *-en* kaj la antaŭa *-ig-* estas la adjektiviga sufikso: *nötigen* (necesigi) el *nötig* (necesa), *würdigen* (ŝati) el *würdig* (inda) ktp, sed multaj tion ne konscias, kaj dividas *nöt-igen* ktp. Eĉ la kunmeto de prepozicio + verbo + *igi*, tiel abunda en nia lingvo, estas konata en la germana: *einhängen*

= enmanigi. Estas kurioze, ke la latina konis kelkajn verbojn formitajn per la sufikso *-igare* (el *agere*), kiel: *mitigare* (mildigi) el *mitis* (milda), *purgare* aŭ, arkaïke, *purigare* (purigi) el *purus* (pura), *fumigare* (fumigi) el *fumus* (fumo), *remigare* (remi) el *remus* (remo) ktp. Male, por la ideo «fariĝi» ne ekzistis taŭga sufikso, kaj Zamenhof, por krei ĝin, ŝanĝis la velaron *g* en gingivalon *ĝ*. Ke tiu nova sufikso *-iĝ-* proksimiĝas al la itala sufikso *-eggiare* (prononcu: eĝare), en *biondeggiare* (blondiĝi), *verdeggiare* (verdadi, verdiĝi) ktp, tio estas, laŭ mia opinio, nura koincido.

La sufikso *-ar-* ŝajnas la simpligo de la latina *-arium*; tiu ĉi estis cetere de pli vasta signifo, ol nia *ar-*: *vocabulum* (vorto), *vocabularium* (vortaro); *columba* (kolombo), *columbarium* (kolombejo); *aqua* (akvo), *aquarium* (akvujo) ktp, kaj la plej ofta signifo en la latinidaj lingvoj estas tiu de ujo. Tial oni povus hipotezi, ke Zamenhof simple konsideris la rusan formon *slovar* (vortaro) de *slovo* (vorto), kaj tiris de tie sian sufikson.¹ Sed por la mala ideo, li ne disponis tian rimedon: li do probable limigis sin je la ŝanĝo de la vokalo, kaj kreis nian *-er-* per simpla modulado de la sono. Tion farante, li nur diversigis du sencojn de unua sama latina sufikso: en la francaj vortoj *légionnaire* aŭ *exemplaire*, *-aire* ŝajne montras al unuo el legio aŭ el tuta eldono.

La sufikso *-et-* estas unu el la plej klaraj: ĝi devenas de la latinidaj lingvoj (kvankam tie ĝia origino estas tre diskutata): *F maison* (domo), *maisonnette* (dometo); *I libro* (libro), *libretto* (libreto); *H lingua* (lango), *lengüeta* (langeto) ktp. Sed por la mala ideo, Zamenhof devis krei mem la sufikson, kaj tion li faris per profunda modifo de la rusa vulgarlingva sufikso *-jaga*, por ke la komenca vokalo¹ estu la sama, kiel en la diminutiva sufikso: *dvornoj* (kortohundo), *dvornjaga* (hundego); *kol* (stango) *koljaga* (stango); *ŝtormjaga* (marŝtormego) ktp. Antaŭ ol ekkoni tiun hipotezon de V. Laskin («Lingvo Internacia», Okt. 1896), mi supozis, ke Zamenhof depruntis tiun sufikson el la greka adjektivo μέγας (granda), per oportuna eltondo de la vorto ὁ μέγας (o granda, o ega).

¹ Oni atentu, ke en la rusa tiu vokalo (aŭ pli ĝuste diftongo) estas skribata per unu simpla litero, tiel ke de *-jaga* al *-ega* la distanco estas malpli granda, ol ŝajnas en E.

La sufikso *-ej-* venas de la germana *-ei*: *Abt* (abato), *Abtei* (abatejo), *Bäcker* (panfaristo), *Bäckerei* (panfarejo) ktp. Tiu ĉi cetere estis la diftongigo de la franca sufikso *-ie*, kiu almetiĝas al metinomoj: *lait* (lakto), *laitier* (laktisto), *laiterie* (laktejo) ktp. Kurioze estas, ke en la greka ekzistis sama sufikso (sen etimologia parenceco kun la germana, kompreneble) *κουρεός* (barbisto), *κουρείον* (barbirejo); *βιβλιοπώλης* (libristo), *βιβλιοπωλείον* (librejo) ktp. Por esprimi la najbaran ideon de lando, Zamenhof en 1881 uzis la internacian sufikson *-i-*; kaj, jam en tiu tempo, li etendis ties signifon por signi samtempe la arbojn, kiuj portas fruktojn aŭ florojn, kaj la aĵojn, kiuj entenas ion: vidu en la tekstoj n° 2 kaj 14 la vortojn *verbio* kaj *rudzio*. Nu, en 1887, kiam li decidis pri la unuformigo de ĉiuj sufiksoj, *-i-* fariĝis neebila (tiom pli, ke ĝi koliziis kun la finaĵo de la infinitivo kaj kun la radikoj de la nedifinaj pronomoj); por adapti tiun sufikson al la ĝenerala regulo, li probable konsideris la modelojn prezentitajn de D *Türkei* (pr. tyrkaj') kaj de R *Rossija*, en kiuj la *i* fariĝis konsonanto kaj alprenis al si apoge antaŭan vokalon; sed *ej* jam ekzistis kun alia signifo, *ij* ŝajnis malbonsona; tial li vokis helpon de la ĉioserva neŭtra vokalo *u* kaj ricevis de ĝi la formon *uj*. Ke tiu *-ujo* similas la italan sufikson *-oio* (aŭ *-oia*) en *lavatoio* (lavejo), *mangiatoio* (manĝujo), *servatoio* (konservujo), aŭ la finaĵon de la franca *étui* (etujo, ujo por etaj aferoj), tio estas, laŭ mia opinio, nuraj koincidoj.

La sufikso *-em-* estas la transformo en sufikson de la franca verbo *aime* (amas): *sciema* = *qui aime à savoir* ktp. Kaj tiu sufikso siavice influis la sufikson *-ebl-*, trudante al ĝi sian komencan vokalon *e* anstataŭ la *a* de la origina franca *-able*: *comparable* (komparebla), *pardonnable* (pardonbla) ktp. Ĉu mi devas averti ĉi tie, ke, malgraŭ la asertoj de pluraj kontinentaj etimologoj, la angla sufikso *-able* estas prononcata per tre mallonga *o* kaj vokalgita *l* — kaj sekve tute ne klarigas la *e* de la esperanta *-ebla*?

La lasta serio de sufiksoj estas la tri nombraj: *-obl-*, *-on-* kaj *-op-*: la unua estas kunmetita el la vokalo de la D *doppelt* (duobla) kaj el la konsonantoj de la F *double*, Kp H *dobľe*, A *double* (duobla), *treble* (triobla); la dua devenas simple de la lasta silabo de la F *fraction* (frakcio) transformita en sufikson; pri la tria, ni scias, ke

en 1881 ĝi havis la formon -o-; same kiel pri -i-, tiu sola vokalo devis serĉi la apogon de sekva konsonanto: de kie devenis la *p*? Probable, kiel sugestis al mi sro B. Gerdman, de la prepozicio *po*, kiu evidente havas kelkan sencan rilaton.

La aliaj sufiksoj retenos nin malpli longe. El la franca devenas la sufiksoj: -*ad*-: promeni *se promener*, promenado *promenade*; kanoni *canonner*, kanonado *canonnade* ktp.¹

-*aĉ*-: lano *laine*, lanaĵo *lainage*, lakto *lait*, laktaĵo *laitage* ktp.

-*ist*-: floro *fleur*, floristo *fleuriste*; fluto *flûte*, flutisto *flûtiste* ktp (kun respondoj en la aliaj latinidaj lingvoj).

De la germana devenas la sufiksoj:

-*in*-: tajloro *Schneider*, tajlorino *Schneiderin*; leporo *Hase*, leporino *Häsin*; cetere tiu sufikso ekzistis jam sporade en la greka (ἡρωίνη = heroino) kaj en la latina (*regina* = reĝino).

Al -*in*- rilatiĝas la vorto *edz*, kiu en la unuaj lernolibroj, interalie en la unua volumo de la «Kolekto Aprobata», estas montrita kiel sufikso. Ĝia historio estas kurioza. La franca ina sufikso estas -*esse*, kaj restas tia en kelkaj vortoj pruntitaj far la germana: *Komtesse*, *Mätresse* (grafino, favoratino); sed en unu vorto, la *F princesse* (princino), oni krommetis la germanan inan sufikson: *Prinzessin*. Kaj tiu duobla sufikso penetris en la judgermanan dialekton por nomi la edzinon de la rabeno: el *Rebe* formiĝis *Rebecin* (sro Appelbaum skribas: *Rebedzin*, sro N. Z. Maimon: *Rebecin* — temas pri parolaj variantoj, evidente). Jen la vorto, de kiu Zamenhof, per ia energia operacio, detranĉis -*edzin* aŭ -*ecin*, por signifi la leĝan kunvivantinon de titolhava persono; kaj de tiu *edzino*, per retroderivado, li tiris fine la vorton *edzo*. En 1913, kiam Boirac demandis lin pri la origino de la vorto, Zamenhof, timante la idistajn mokojn, kiujn povus estiĝi tia judgermana deveno, konfesis al li nur la duonon de la vero, kaj li citis la *D Kronprinzessin* kiel la originon: sed, ĉar *Kronprinzessin* povas egale esti fraŭlino, estas evidente, ke la precizan signifon kaj la afrikaton li pruntis de la judgermana.

¹ Prof. W. E. Collinson proponis interesan komparon kun la rusaj ripet-aspektaj verboj finiĝantaj per -*at'*: *znaval'* (renkontadi) ktp (En «Esperantologio», n° 2, 1950).

-*ing*:- el la finaĵo de vortoj kiel *Daumling*, *Fingerling* li de-tranĉis parton de la germana sufikso -*ling* por fari sian laŭmodelan sufikson -*ing*- kun la proksimume sama signifo en: *fingringo* (la germana signifas propre: fingrujo).

De la itala devenas la sufiksoj:

-*ec*:- *bellezza* beleco, *dolcezza* dolĉeco ktp. Deveninte de la latina sufikso -*itia*, tio respondas al la franca -*esse* (*joliesse*, *tristesse* ktp.), hispana -*eza* (*belleza*, *tristeza* ktp).

-*estr*- estis probable tirita de la finaĵo de *maestro* (= majstro), kiun oni retrovas en la germana *Meister*, *Bürgermeister* kaj en la franca *bourgmestre* (= urbestro).

-*aĉ*:- *casa* domo, *casaccia* domaĉo; *letto* lito, *lettaccio* litaĉo ktp.

De la rusa devenas la sufiksoj:

-*il*:- *korma* poŭpo, *kormilo* direktilo; *kadit* incenso, *kadilo* incensilo; *kropit'* aspergi, *kropilo* aspergilo ktp. Tiu sufikso respondas al la germana -*el*: *Flügel*flugilo, *Schlüssel* ŝlosilo, kaj al la franca *ail*: *fermail* fermilo (de koliero), *gouvernail* direktilo ktp.

-*ĉj*- kaj -*nĵ*-, kiuj estas kuriozaj sufiksoj, la solaj, kiuj konsistas nur el konsonantoj, kaj devas sekve almetiĝi post la unua aŭ dua vokalo de la propra nomo. Ŝajnas, ke Zamenhof deiris el la ina rusa sufikso (trovebla en: *Sonja*, *Manja* ktp) kaj modifis la viran -*ŝ*- (*Aleksej*, *Aljoŝa*; *Ilija*, *Iljuŝa* ktp.) al -*ĉj*- (*Aleĉjo*, *Eliĉjo* ktp); la kaŭzo de transformo de *ŝ* al *ĉ* estas neklara.

De la greka devenas la sufiksoj:

-*id*:- Πέλοψ, Πελοπίδης; Κρόνος, Κρονίδης ktp. Ĝi respondas parte al la rusa sufikso -*iĉ* fine de la propraj nomoj (*Ivanoviĉ*, *Fjodoroviĉ* ktp), sed ne estas ordinare uzata en E en tia funkcio.

-*ism*:- χριστιανισμός kristjanismo ktp. De tie ĝi trapasis en la latinan kaj en ĉiujn latinidajn kaj ĝermanajn lingvojn.

Fine, de la latina devenas la sufiksoj:

-*an*:- *urbanus*, *Romanus* (urbano, Romano) ktp.; tiu sufikso transiris en la italan (*cristiano*, *Luterano*: kristano, luterano ktp), en la francan sub la formoj -*ain*, -*ien* aŭ -*an*- (*Romain*, *Parisien*, *luthéranisme*: Romano, Parizano, luteranismo ktp.), en la hispanan (*cristiano*, *romano*, *luterano*), en la anglan (*Christian*, *Lutheran* ktp) kaj en la germanan (*Lutheraner* ktp); ĝi havas respondon en la rusa sufikso -*anin*: *Parijanin* (= Parizano).

-*ind-* estas speco de kunmikso inter la verb-adjektivo de la tria kaj tiu de la kvara konjugacio: *legendus* kaj *audiendus*, sed kun signifo pli malforta, ol la latina: tiun ĉi signifon, de devigiteco, oni poste donis al alia sufikso, prenita senŝanĝe el la originala: -*end-*.

-*ul-*, el vortoj kiel *bibulus* (drinkulo), *garrulus* (babilulo) ktp. Sed probable nur la formon Zamenhof deprenis de la latina: la ideon pri tia sufikso li ricevis de aliaj lingvoj: «la sufikso *ul*» li skribis al Couturat «sub tre diversaj formoj, estas uzata precipe en la slavaj lingvoj». Oni proponis ankaŭ, kiel devenon, la latinan pronomon *ullus* (iu).

-*um-* devenas probable de la neŭtra finaĵo de la dua deklinacio, kiu trapasis en multaj internaciaj vortoj: F *album*, *radium* ktp, D *Podium*, *Referendum*, *Spektrum* ktp, en kiuj ĝi povas esti sentata kiel sufikso kun nedifinebla senco. La supozo, ke ĝi devenus de la germana prepozicio *um* (ĉirkaŭ) ŝajnas malpli probabla.

* * *

Per tiu ĉi detala esploro ni povis, parte kaj fragmente, religi la dialekton de 1882 al tiu de 1887: por tiu longa kaj provoplena periodo la dokumentoj ja mankas, sed ĝi tamen postlasis sufiĉe da restaĵoj en nia E, por ke ni povu fari al ni ian ideon pri la linioj de la evoluo.

La unua fakto estas la plena forlaso de ĉiuj pure elpensitaj formoj, kiel la prepozicioj *ba*, *bi* ktp. Tio estas des pli rimarkinda, ke ĝuste dum tiuj kvin jaroj kreskis kaj potenciĝis la volapŭka movado, en kies lingvo abundis tiaj arbitraĵoj. Zamenhof alvenis do per si mem al la konkludo, ke la L I devas kiel eble plej proksimiĝi al la formo de la naturaj lingvoj. Alia fakto estas, ke li ne tute forlasis sian ideon pri la dezirindeco de ia «oportunigo» de la plej oftaj elementoj; li nur limigis la kampon de apliko de tiu metodo: ni vidos, ke en la vortaro plu restas nur sporadaj atestaĵoj pri ĝi. Dume ĉe la gramatikiloj, kaj precipe ĉe la afiksaro, li konservis sufiĉe multajn tiajn formojn. Kelkaj el la prepozicioj cetere konis neatenditan sukceson: pluraj estis konservitaj en Ido, kaj eĉ

la plej naturalisma Occidental konservis la zamenhofajn prepoziciojn *per, pro, por, pri* kaj *je* (sub formo *ye*).

Ĉiuj postvenintaj aliaj projektoj — inkluzive de la zamenhofa de 1894 — forĵetis tamen la interrilatan tabelon; sed, kvankam ties formoj estas altgrade «oportunigitaj», oni ne povas argumenti, ke tiu tabelo estis pura fantaziaĵo de Zamenhof; sufiĉos citi la analogajn, sed nekompletajn tabelojn, kiuj ekzistas almenaŭ en du el la lingvoj studitaj de Zamenhof, el la helena:

τις (iu).	τίς (kiu?)		ὅστις (kiu)
ποιός (ia)	ποιός (kia?)	τοιοῦδε (tia)	ὁποῖός (kia)
ποσόν (iom)	πόσον (kiom?)	τοσόνδε (tiom)	ὁπόσον (kiom)
πού (ie)	πού (kie?)		οὗ (kie)
ποτέ (iam)	πότε (kiam?)	τότε (tiam)	ὅτε (kiam)
πώς (iel)	πώς (kiel?)	οὕτως (tiel)	ὥς (kiel) ktp;

kaj el la rusa:

<i>kakoj</i> (kia)	<i>takoj</i> (tia)	<i>nikakoj</i> (nenia)
<i>kto</i> (kiu)	<i>tot</i> (tiu)	<i>nikto</i> (neniu)
<i>ĉto</i> ¹ (kio)	<i>to</i> (tio)	<i>niĉto</i> (nenio)
<i>poĉemu</i> (kial)	<i>potomu</i> (tial)	
<i>kogda</i> (kiam)	<i>togda</i> (tiam)	<i>nikogda</i> (neniam)
<i>kak</i> (kiel)	<i>tak</i> (tiel)	<i>nikak</i> (neniel) ktp.

La pedagogiaj provoj krome montris,² ke tiu tabelo prezentas avantaĝon, por la aktiva uzado de la lingvo, super la nekoheraj formoj prezentitaj de la latinidaj lingvoj, ĉar tuj kiam la lernanto memorigis la 9 finaĵojn, li aŭtomate ricevas ĉiujn bezonatajn pronomojn, adverbojn aŭ subjunkciojn.

Pri la afiksoj, estas klare, ke kelkaj el ili estis arbitre modifitaj en sia formo, kaj aliaj arte faritaj. La kaŭzo estas, ke tiuj aparte gravaj iloj devis respondi du postulojn: tiun de la penso kaj tiun de la lingvo mem.

La penso starigas inter ideoj certan nombron da rilatoj, por

¹ Prononcata: ŝto.

² Vidu poste la ĉapitron *Esperanto antaŭ tribunalo*.

kiuj la naciaj lingvoj ne ĉiam disponas esprimilojn, ĉar ilin strikte ligas la tradicio. La naturo same kiel la logiko, ekz-e, sugestas du rilatojn de relativa grandeco: aŭ inter mezgranda objekto kaj alia tre granda, aŭ inter la unua kaj alia tre malgranda; nu, la latinidaj lingvoj prezentas ja internacian sufikson por esprimi tiun duan rilaton (nian esperantan *-et-*), sed konas neniun por la unua: la *I -issimo* estas alligita al la superlativo de la adjektivoj, la *H -ón* kaj *I -one* estas kontraŭdirataj de la *F -on*, kiu estas diminutivo! Zamenhof opiniis, ke estus absurdaĵo senigi la lingvon je tiel oportuna derivilo, nur ĉar tiuj aŭ aliaj lingvoj ĝin ne posedas.

Tielan liberecon cetere aljuĝis al si la kreintoj de la internaciaj sciencaj nomenklaturetoj: en ĥemio, ekz-e, ili bezonis sufikson por signi certajn kombinojn de la hidrokarbidoj, kaj ili simple detranĉis la finaĵon de la vorto *alkoholo*, el kiu ili faris la sufikson *-ol*, en *metanolo*, *fenolo* ktp. Cetere, eĉ en la komuna lingvo de la okcidentaj popoloj, tiu procedo estas ankaŭ utiligita en kelkaj okazoj: unu el la plej amuzaj estas jena. En malnova Francujo, oni ofte donis al la kantoroj kromnomojn tiritajn el la latinaj vortoj, kiujn tiu aŭ alia prefere kaj pli artisme ĉantis; unu el la plej uzataj estis *Omnès* laŭ la psalmo 116 *Laudate Dominum omnes gentes!* (n° 117 en la hebrea teksto). Okazis, ke posteulo de unu el tiuj *Omnès* fondis en 1828 en Parizo kompanion, por provizi la publikon per malaltprezaj veturiloj regule komunikigantaj la ĉefajn lokojn de la granda urbo; kaj por nomi tiujn novajn veturilojn, li faris vortludon per sia propra nomo kaj titolis ilin *omnibus*, t. e. la plurala dativo de la latina *omnis*, do: '(veturiloj apartenantaj) al *Omnès* kaj (veturiloj) por ĉiuj'! Lia eltrovaĵo havis tian sukceson, ke la finaĵo de tiu nomo fariĝis vera sufikso por la komunuzaj transportiloj, kaj tiel kreiĝis en 1907 *autobus*, en 1908 *aérobús*, en 1922 *électrobús* kaj eĉ en 1930 *bibliobús* (migra pruntolibrejo per aŭtomobiloj).

Oni same povus citi la anglan lingvon, kiu el la finaĵo de *chandelier* (propre 'kandelingo', nun: 'lustro') plu formis *gaselier* (gaslustro) kaj *electolier* (elektrolustro); aŭ la usonan, kiu el la finaĵo de *physician* (kuracisto) fabrikis la novajn vortojn *mortician* (entreprenisto de funebraj ceremonioj) kaj *beautician* (specialisto pri vizaĝbeligado).

Aliflanke la lingvo postulis, ke tiuj afiksoj povu esti alkroĉataj, en ĉiuj okazoj, al ĉiaj radikoj, laŭ la nura kondiĉo de sencotaŭgeco: ili devis do akcepti tian formon, kiu ebligu al ili kunmetiĝi kun ĉiaformaj radikoj, kaj ankaŭ evitu, ke tia kunmeto prezentu al la okuloj aŭ al la oreloj ŝokan disonancon. Jen la kaŭzo, kial Zamenhof modifis plurajn el la latinidaj afiksoj, kaj iel stompis ilian tro videblan naciecon: *-ebl-* aŭ *-ind-* estas malpli evidente francaj aŭ latinaj, ol estus *-abl-* aŭ *-and-* ekz-e; kaj, kiam ili adaptiĝas al ĝermana radiko, ili neniel donas la impreson de heterogeneco. Sufiĉus kompari kelkajn kunnretaĵojn en Occidental: *scruvation*, *sestral*, *svimmator*, *svineria*, *tsaresse*, *yelbitá* ktp kun iliaj respondoj en E: *ŝraŭbado*, *fratina*, *naĝanto*, *porkejo*, *carino*, *flaveco*, por senti, kiagrade Zamenhof sukcesis doni unuton koloron al la gramatikiloj kaj al la ceteraj radikoj de sia lingvo: tio estis vera ĉefverko ne nur de lerteco, sed ankaŭ de estetikeco.

Postnoteto al VIII (sepa alineo).—Kurioze estas, ke ĉe kelkaj latinaj poetoj, la adverbo *male*, origino de la latinida prefikso, estis jam iafoje uzata kun ties senco: la Vergilia *male numen amicum* (*Eneado*, II 735) respondas tre ĝuste al nia «malamika diaĵo».

LA «FUNDAMENTO DE ESPERANTO»

I

HISTORIA ASPEKTO

La 9an de Aŭgusto 1905, la Unua Kongreso de Esperanto, en sia kvara kunsido, unuanime aprobis la tekston de la «Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo», pretigitan de Zamenhof kaj diskutitan de kongresa komitato. En tiu fama Deklaracio, kiu restas ĝis nun nia konstitucia dokumento, la punkto 4a tekstas: «La sola, unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo *Fundamento de Esperanto*, en kiu neniuj havas la rajton fari ŝanĝon». Tiu stariĝo de netuŝebla libro kiel fundamento de internacia lingvo estis per si mem io tute nova, ne atendita de multaj, kaj ni devas konstati, ke ĉe la aliaj elpensitaj projektoj aŭ jam uzataj planlingvoj ĝi restis ankaŭ unika ekzemplo. Valorpenas do iom esplori pri la kaŭzoj kaj sekvoj de tiu gesto, kiu profunde kaj definitive enpremis apartan karakteron en la esperantan movadon.

Kiam en 1887 Zamenhof elpaŝis kun sia *Unua Libro*,¹ li jam serioze kaj longe pripensis la vivkondiĉojn de artefarita lingvo — kiel montras al ni la IIIa parto de lia antaŭparolo, parto kiu, bedaŭrinde, ne estis tradukita de li en la *FK*, kaj sekve ne estis kolektita en la *Originala Verkaro*; ĝia sola traduko (kelke mallerta) troviĝas fine de la bela foto-represo de la *Unua Libro por Rusoj* farita en 1948 de Vilho Setälä. Oni tie vidas, ke unu el la plej gravaj problemoj, kiujn devis fronti la juna Zamenhof, estis la maniero stabiligi kaj konstantigi la formon de sia lingvo.

La naturaj lingvoj, efektive, estas submetataj al diversaj fortoj, kies efiko estas modifi pli-malpli rapide la fonetikon, morfologion kaj vortaron. Neniu generacio prononcas ĝuste la samajn vortojn kaj en la sama maniero, kiel la antaŭa. Eĉ interne

¹ Konforme al la kutimo mi regule uzos tiun fiktivan titolon por montri al la nacilingva broŝureto, kies esperanta titolo estus *Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro por...* (Varsovio, 1887). La aŭtoro estis indikita kiel «D-ro Esperanto».

de unu generacio, politikaj aŭ sociaj okazaĵoj povas konsiderinde ŝanĝi la aspekton de iu lingvo: la kunmikso de diversklasaj homoj en la kvarjara tranĉea milito de 1914 ĝis 1918 grave modifis la francan. Kaj se temas pri artefarita lingvo, al tiuj naturaj kaŭzoj de ŝanĝiĝo aldoniĝas aliaj, multe pli gravaj: la personaj gustoj. Ĉe la naturaj lingvoj tiuj ludas preskaŭ nenian rolon, ĉar ĉiu konscias, ke li ne kapablas trudi siajn personajn preferojn al la lingvo de tuta popolo; ili akiras male tre danĝeran povon ĉe la artefaritaj lingvoj, ĉar ĉiu pretendas, ke tion, kion unu homo kreis, alia homo rajtas perfektigi. Tiuj ŝanĝofortoj pli-malpli rapide detruus la lingvojn, se ne ekzistus iaj bremsoj.

Ĉe la naturaj lingvoj, la bremsa, kiu haltigas, aŭ pli ĝuste malrapidigas la evoluon, estas la tradicio kaj parola kaj skriba. La ekzisto de lernejoj, en kiuj oni instruas al la knaboj prononci kaj vortigi egale kiel iliaj gepatroj,¹ la ekzisto de arta literaturo, kiu staras kiel modelo antaŭ la okuloj de ĉiu nova verkisto, jen la du ĉefaj kolonoj de tiu lingva tradicio. Sed tiaj kolonoj tute mankis ĉe la komencaj jaroj de nia Esperanto.

Ni jam vidis (pĝ 51), kiel Zamenhof allasis al sia lingvo nur unu jaron da provtempo, kaj ke la sola ŝanĝo, kiun li poste konsentis, estis la modifo de la tempaj tabel-vortoj. Tuj post la fino de tiu unua jaro, urĝate de la deziro, ke la lingvo akiru «konstantan kaj definitivan» formon, li pretigis kaj publikigis du librojn, kiuj entenas ampleksan kolekton da vortoj: la *Plena Vortaro Rusa-Internacia* kaj la *Meza Vortaro Internacia-Germana* — aperintaj ambaŭ en Januaro 1889. En la unua troviĝis multe da internaciaj radikoj, kiuj estos oficialigitaj nur post longa tempo, en la *Unua Oficiala Aldono* de 1909, dum la dua limigis sin al la propre esperantaj radikoj: ĝia tuta teksto, kun aldono de tradukoj en kvar aliaj

¹ Eble nenie la influo de la lernejoj estas tiel frapa, kiel ĉe la instruado de la latina lingvo en Gallujo kaj Hispanujo: jam de longe la Italianoj plu ne prononcis la finajn *s*, sed la instruantoj tiel insiste lernigis tiun sonon en la gallaj kaj hispanaj lernejoj, ke ĝi efektive resoniĝis en tiu pozicio: tio klarigas, kial al la latina plurala akuzativo *muros* respondas unuflanke *I muri*, aliflanke *F murs* (kie la *s* estis prononcata en la mezepoko, kaj restas aŭdebla kiel *z* ĉe vortligiĝo) kaj *H muros*.

lingvoj, estos represita sensanĝe, aŭ preskaŭ,¹ en la kvinlingva *Universala Vortaro* de 1893, kiu siavice fariĝos en 1905 la tria parto de la *Fundamento de Esperanto*. Tiu bazo de nia lingvo ne estas do, kiel povus ŝajni unuavide, la rezulto de kontribuado de la unuaj esperantistaj verkistoj, kiuj estus kompletigintaj la skeleton de la *Unua Libro*, sed ĝi efektive eliris en sia tuteco el la kapo de Zamenhof. Ne povas esti parolo pri ia evoluo de Esperanto, almenaŭ sur la leksikologia kampo, inter 1887 kaj 1905; kaj la solaj indikoj pri ia evoluo montras al periodo antaŭa, al la periodo de provado antaŭ la publikigo. Pruve, se oni zorge analizas la enhavon de la *Universala Vortaro* el tiu vidpunkto, oni baldaŭ malkovras, ke ĝi konsistas verdire el diversaj tavoloj, kiuj kvazaŭ demetiĝis je diversaj epokoj de la zamenhova pens-evoluo. Kaj kribrante ilin, oni akiros specimenojn de la antaŭaj stadioj de la lingvo, de ni jam ĉi-supre esploritaj, specimenojn, kiujn la aŭtoro postrestigis en la definitiva formo, probable, ĉar ili fariĝis tiel familiaraj al lia memoro, ke li rigardis ilin malnovaj karaĵoj amikoj, sed eble ankaŭ ĉar li trovis en ili avantaĝojn, kiel ni vidos poste.

Se ni flankklasas la afiksojn, kiujn ni jam esploris, la plej malnova atestaĵo tiaspeca ŝajnas esti la duopo *pesi-pezi*. Ni vidis (pĝ 46), ke, ĉirkaŭ 1881, Zamenhof penis esprimi per ia speco de interna fleksio (duobligo de la meza konsonanto, aŭ alterno de voĉa kaj senvoĉa konsonanto) diversajn reciprokajn rilatojn, kiuj ne estis sufiĉe precizaj kaj ĝeneralaj por esti tradukitaj per afiksoj. La rilato inter *pesi* kaj *pezi* estas unu el ili. Tia esprimmetodo ne estas sen analogoj en la naciaj lingvoj: la hebrea, ekz-e, povas

¹ Nuraj diferencoj: la *UV* forĵetis la radikojn aŭ kunmetaĵojn: *anker'* (D *Anker* = likvomezurilo), *arb'et'*, *paf'ark'*, *bosk'*, *cian'*, *ĉiel'ruĝ'*, *fotograf'* (D *photographieren*), *grafit'*, *ĥameleon'*, *ĥan'* (D *Khan*), *hemorojd'*, *jod'*, *kalkan'um'*, *karab'* (D *Laufkäfer*), *sevrug'*, *el'sidi* (D *ausbrüten* = elkovi), *mal'ŝpar'*, *ŝovel'il'*, *ŝtop'il'*, *ŝton'eg'*, *vid'ig'* (D *aussehen* = aspekti), *vitr'o de fenestr'o*.

Ĝi aldonis la sekvantajn, kiuj mankas en la *Meza*: *aer'um'*, *ajl'*, *arb'et'aj'*, *azot'*, *ĉikan'*, *ĉiu'j*, *ekspozici'*, *fe'in'*, *ĥaos'*, *korespond'*, *al'mezur'*, *prez'*, *ŝarg'*, *mal'ŝat'*, *sekund'*, *sen'ŝel'ig'*, *sem'o*, *strek'o*. Krome la radiko *viper'* de la *Meza Vortaro* fariĝis *vipur'* en la *Universala*.

La detalan kontroladon de ambaŭ vortaroj ni danke ŝuldas al F-ino Marta Rameau.

esprimi la ideon vendi per speciala formo de la verbo *qānāh* (aĉeti); en la ĉina, nur la tono distingas *mai* (aĉeti) disde *mai* (vendi). Sed Zamenhof rapide malkovris, per la uzado, ke tiaj distingo malfaciligas la lernadon de la baza vortostoko, kaj li rezignis pri ili. Ke li tamen konservis la cititan paron, devenas probable de tio, ke en ĉiuj lingvoj, kiujn li konis, unu sama verbo esprimas ambaŭ ideojn: tian konfuzon li ne povis konservi en Esperanto, kie la transitiveco neniam konfuziĝas kun la netransitiveco,¹ sed per tiu parenceco de la interna konsonanto, li gardis el ĝi, kiom li povis.

En la sama tempo, ni vidis, li alprenis la decidon altrudi al la fundamentaj vortoj formon kiel eble plej facile prononceblan kaj uz-oportunan. La plej drastajn kripligojn de tiu epoko li saĝe forigis, sed li konservis tamen sufiĉe grandan nombron da vortoj pli-malpli profunde «oportunigitaj», kaj ne estos malfacile trovi la ĉefajn principojn, kiuj gvidis lin en ilia transformo.

La plej evidenta el ili estas la mallongeco: en lingvo, kiu, precipe en la komencaj jaroj, devis uzadi multege da kunmetitaj vortoj, estis dezirinde, ke la radikoj estu kiel eble plej mallongaj, por ke la algluitaj prefiksoj kaj sufiksoj ne rezultigu mejlolongajn vortojn. Jen kial li ne ĝenis sin kripligi la latinajn vortojn *fuligo* al *fulgo*, *hydrargyrus* al *hidrargo*, *intestinum* al *intesto*, *leucanthemum* al *lekanto*, *orphanus* al *orfo*, *procrastinare* al *prokrasti*, *quantitas* al *kvanto*, *sagitta* al *sago*, *servitutem* al *servuto*, *tedium* al *tedo*, *vanitas* al *vanto*, *vertex* al *verto*, *vespertilio* al *vesperto*, *vigilem* al *vigla* ktp.

Same okazis pri la francaj: *aboyer* kiu fariĝis *boji*, *chamois*: *ĉamo*, *éclairé*: *klera*, *alerte*: *lerta*, *ensorceler*: *sorĉi*, *escadron*: *skadro*, *esprit*: *sprito*, *éternuer*: *terni*, *tricoter*: *triki* ktp. Same ankaŭ pri la rusa *nepremjenno* mallongigita al *nepre*.²

¹ Mi scias, ke oni kontraŭmetos al mi la dusignifan verbon *fumi*; sed ĝuste pro la unikeco de tiu ekzemplo mi ĉiam demandis min, ĉu ĝi reale estas escepto, kaj ĉu Zamenhof simple ne donis al ĝi la nuran sencon: 'produkti fumon': *la kame-no fumas*, *la Dia kolero fumas*, *mi fumas per la pipo* (aŭ, senprepozicie) *mi fumas pipon*. Reto Rossetti, mi kredas, esprimis ie la saman ideon.

² Por tiuj, kiuj estus ŝokitaj de tiaj kripligoj, mi rimarkigos, ke la naturaj lingvoj konas mallongigojn same tiel drastajn: mi nur citos, post Collinder, la

Kurioze estas, tiuokaze, vidi, kiel li traktis la latinan sufikson *-tio* kaj francan *-tion*: kelkfoje li konservis nur la komencan konsonanton: *kuraco* (L *curatio*), *kapitulaco* (F *capitulation*), *obstrukco* (F *obstruction*); aliffoje li deformas ĝin al najbaraj konsonantoj: *fortikaĵo* (F *fortification*), el kio li poste tiros la adjektivon *fortika*; *haladzo* (F *exhalaison*); *okazo* (F *occasion*), ktp.

Dua principo estis, ke homonimojn oni devas nepre eviti; kaj, kiam tio ne ŝajnis ebla, Zamenhof deformis la elektitan radikon, modifante ties vokalon aŭ unu konsonanton, por ricevi ne konfuzodonan formon. Agante tiel, li eble memoris la variaĵojn, kiujn unu vorto ricevas interne de unu lingvo (ekz-e la genra kontrasto inter F *naïf* kaj *naïve* ktp) aŭ unu radiko en du parencaj lingvoj (ekz-e A *bed* kaj D *Bett*, A *God* kaj D *Gott*, A *red* kaj D *rot* ktp).

La vokalo de F *gruau* kolizius kun tiu de la birdonomo *gruo*: tial li ŝanĝis ĝin kaj ricevis nian *grio*. La trio *mil*, *mol*, *mul* trudis vokalaŝanĝon al *muel* (el malnoyskriba D *Mühle*). La D *treffen* estus doninta **trefi*, kiu kolizius kun (jam simpligita) *trefo* (el F *trèfle*): la analogo de *pafi* (kaj eble la preterito *trafi*) deformis ĝin en *trafi*, ktp.

Ĉe konsonantaŝanĝo, aŭ li voĉigis senvoĉan konsonanton (la D *locken* fariĝas *logi*, pro jama ekzisto de *loko* ktp), aŭ inverse (la I *lava*, por ne kolizii kun *lavi*, fariĝis *lafo*); aŭ la procedo estas eĉ pli komplika: pro la ekzisto de *lasi* (el D *lassen*), la F *las* fariĝas *laca*; la I *grata* (al kiu verŝajne por Zamenhof aldoniĝis la skriba formo de A *grate*) povis nek resti **grato* (pro la verbo *grati*), nek fariĝi **grado* (pro la homonimo *grado*): li tial senvoĉigis la unuan konsonanton (Kp L *crates* 'hurdo') kaj voĉigis la duan, el kio rezultis nia *krado*. Ofte ankaŭ la nova formo estas akirita per aldono de supersigno en la skribo (kaj responda modifo en la prononco): F *piston* (kies finaĵo estis detranĉita pro la tria principo) fariĝis *piŝto* (pro la ekzisto de *pisti*), F *verser*, pro *verso*, fariĝis *verŝi*, D *Weste* fariĝis *veŝto* pro la latindevena *vesto*, ktp.

svedajn vortojn *bil* kaj *el*, dehakitajn el *automobil* kaj *elektrisk*; la franca jam delonge uzadas *auto*, *photo*, *ciné*, stumpojn el *automobile*, *photographie* kaj *cinématographie*; sed precipe en la angla kaj usona svarmas tiaj mallongigoj: *bus* por *omnibus*, *to liaise* (dehakita el la francdevena vorto *liaison*), *fave* por *favorite*, *fan* por *fanatic*, *ammo* por *ammunition*, *motel* por *motor hotel*, *fridge* por *refrigerator* ktp ktp.

Iafoje la nova formo devenas el la transskribo de vokalo skribata sed ne prononcata en la originala lingvo: tiel, pro la ekzisto de *mino* (kaj ankaŭ de *min*) la vizaĝesprimo ne povis ricevi nomon el F *mine*: Zamenhof laŭtigis la vokalon mutan de D *Miene* kaj A *mien* en la E *mieno*.¹ Same, por nomi la specialan brulmaterialon, nek la F *coke* (pro *koko*), nek la germana *Koks* (pro *kokso*) estis eblaj kaj Zamenhof tial enmetis en tiu lasta formo la du skribitajn vokalojn de *coak*, malnova angla ortografio de *coke*. Same ĉar *pag(i)* kaj *paĝ(o)* estis jam enlasitaj formoj, la F *le page* ne povis trovi eniron, kaj Zamenhof helpis sin per la I *paggio* (kie la *i* ne estas prononcata) por formi nian *paĝio*.

Tria principo estis, ke radiko devas nek komenciĝi nek finiĝi per silabo simila al afikso. Por eviti tion, Zamenhof uzis du procedojn: aŭ li simple forigis la ĝenan silabon; tiel la F *détachement*, *emprunter*, *exhalaison*, *se repentir*, pro la prefiksoj *de-*, *en-*, *eks-* kaj *re-* fariĝis simple *taĉmento*, *prunti*, *haladzi* kaj *penti*. Same la F *accélérer*, *conduite*, *limite*, *crépuscule*, pro la sufiksoj *-er-*, *-it-* kaj *-ul-* simpliĝis al: *akceli*, *konduto*, *limo* kaj *krepusko*.

Aŭ li modifis la konfuzodonan silabon: li ŝanĝis la vokalon de radikoj komenciĝantaj per *de-* aŭ per *re-*: *diboĉi* (F *débaucher*), *difini* (F *définir*); *ribeli* (F *se rebeller*), *rikolti* (F *récolter*) ktp. Ĉe la vortoj komenciĝantaj per F *ex-*, li male ŝanĝis la lastan konsonanton: *ekzameno* (F *examen*), *ekzemplo* (F *exemple*) ktp. La modifoj de la vortfiniĝoj estas pli oftaj: la finaĵo *-et* fariĝis *-ed* (en *bufedo*, *cigaredo*, *planedo* ktp), *-il* fariĝis *-el* (en *makzelo*, el L *maxilla*; *mirtelo*, el F *mirtille* ktp), *-in* fariĝis *-en* (*karabeno* el F *carabine*, *kapuceno* el I *cappuccino*, *rubeno* el D *Rubin* ktp), *-ul* fariĝis *-ol* (en *kukolo*, *primolo*, *ranunkolo* ktp), *-um* fariĝis *-om* (*legomo* el F *légume* ktp). Sammaniere la R *klopotat'* fariĝis *klopodi*, la D *Pastete*: *pasteĉo*. En pluraj okazoj, la ĝena vokalo estis anstataŭita de

¹ Verŝajne al tiu procedo ni ŝuldas la supersignon de nia *ĉielo*: la F *ciel* proponis simple **cielo*, kaj la supersignon mi povas klarigi nur per la hipotezo, ke en tiu praformo de E *cieli* estis jam la formo de la D *zielen* kaj R *cjelit'*; kiam poste Zamenhof, eble sub la influo de P *celować* decidis forpeli la *i* el tiu verbo, li forĝesis depreni la supersignon for de la *ĉielo*, sed kompanse devis aldoni unu alian al la *ĉelo* (D *Zelle*, A *cell*): ĉenreakciaj modifoj.

la neŭtrala vokalo *u*: la *D dingen* fariĝis *dungi*, *fliegen*: *flugi*, la *F farine* fariĝis *faruno*, *vipère*: *vipuro* (kvankam por tiu aparta vorto oni povas dubi, ĉu ne temas pri preseraro: ni vidis, ke la *Meza Vortaro* enpresis *vipero*); *L cubitus* fariĝis *kubuto* — pro la ekzisto de sufiksoj *-ing*, *-ig*, *-in*, *-er* kaj *-it*. Ankaŭ por eviti troan similecon kun la verbo *iri*, la *D polieren* fariĝis *poluri*. Fine iafoje, laŭ jam konata procedo, muta skriba vokalo de la originala vorto estas sonigita: la fonetikaj formoj **saler* kaj **seman* fariĝis, per uzo de franca ortografio, *salajro* (F *salaire*) kaj *semajno* (F *semaine*).

Kvara principo, iel inversa de la antaŭa, estis, ke la radikoj devas esti severe unusencaj: ne nur du diversaj ideoj ne povis esti esprimataj per la sama radikoj, sed krome unu radikoj ne povis havi plurajn diversajn signifojn. Por tion atingi, Zamenhof, kiam tio estis facila, elektis radikojn el diversaj lingvoj, ekz-e la franca komplekso *le bal* kaj *la balle* estis lerte dissolvita en *bal*, *kuglo* kaj *pilko* (respektive pruntitaj de F, D kaj P). Sed en aliaj okazoj, kiam tiu procedo ne povis efiki, Zamenhof deformis la radikojn por atribui apartan formon al ĉiu aparta senco. Ekz-e el la *F accorder* li kreis la du vortojn *akordi* (spirite) kaj *agordi* (muzike). Tiujn «ĝemelvortojn» detale studis F. I. Wiener en artikolo de «Esperantologio» (n° 2). Mi citos nur kelkajn ekz-ojn, kiujn li preteratentis: la *F boucle* disiĝis en *buko* (el metalo) kaj *buklo* (el haroj), *conscience* en *konscio* (spirita) kaj *konscienco* (morala), *latte* en *lato* (el ligno) kaj *lado* (el metalo), *mine* en *mino* (de karbo) kaj *mieno* (de vizaĝo), *perche* en *perĉo* kaj *perko* (najbaraj fiŝspecioj), *pin* en *pino* kaj *pinio* (laŭ *D Pinie* — najbaraj arbspecioj), *poste* en *posteno* (de oficisto, laŭ la germana *Posten*) kaj *poŝto* (por leteroj, laŭ la rusa kaj pola formo: *poŝta*) ktp. Oni ofte rimarkis, ke tiuj ĝemelvortoj prezentas pli grandan malfacilon por memorigo, ol se temus pri du tute apartaj radikoj; sed oni ankaŭ devus rimarkigi, ke tiu procedo estas verŝajne tamen oportuna, ĉar ĝi estas ankoraŭ nun uzata de la teknikistoj por eviti konfuzon inter komuniza kaj teknika vorto: nur al ili oni ŝuldas la parojn *flaŭro* / *floro*, *termo* / *termino*, *tangento* / *tanĝanto*, *logistiko* / *loĝistiko* ktp.

Lasta grupo de deformiĝoj devas esti alkalkulita ne al ia principo, sed al la ĝenerala deziro doni al la esperantaj radikoj

plej grandan internaciecon. Estas efektive sufiĉe ofta okazo, ke unu sama, latina aŭ ĝermana, radiko evoluis tiel diverĝe en la modernaj lingvoj, ke tuja rekono fariĝis malfacila por la nespecialistoj. En tiaj okazoj Zamenhof provis elkonstrui ian mezan formon, elektante parton el la konsistigaj sonoj en unu lingvo kaj la ceteron en alia. Ekz-e, inter la germana formo *dreschen* kaj la angla *thrash*, la esperanta *draŝi*, kiu kunigas la vokalon de A kaj la konsonantojn de D, aspektas pli vere internacie ol **dreŝi* aŭ **traŝi*. Tiajn «kompromisojn» prezentas iom multaj el niaj vortoj: *ĉano* (F *chien*, D *Hahn*), *forgesi* (A *to forget*, D *vergessen*), *gliti* (F *glisser*, D *gleiten*), *hejti* (A *to heat*, D *heizen*), *koni* (F *connaître*, D *kennen*), *kuko* (D *Kuchen*, A *cake*), *lavango* (D *Lawine*, I *valanga*), *rabi* (F *ravir*, D *rauben*), *spiegulo* (L *speculum*, D *Spiegel*), *stablo* (R *stanok*, F *établi*), *ŝlimo* (D *Schlamm*, A *slime*), *ŝtono* (D *Stein*, A *stone*), *ŝpruci* (D *spritzen*, I *spruzzare*) ktp.

Kun la paso de la jaroj kaj la plivastiĝo de liaj spertoj, Zamenhof parte aŭ tute rezignis pri tiaj procedoj; tiel ke, en nia *Fundamento*, kuŝas flanko ĉe flanko deformitaj kaj nedeformitaj vortoj, ekz-e *alumeto* apud *bukedo*, *galantino* apud *gelateno*, *betulo* apud *tremolo*, *ŝraŭbi* apud *spiono* ktp. Tamen la nombro de tiuj deformitaj aŭ asimilitaj vortoj sumiĝas alte en nia *Fundamento*, ĉirkaŭ unu triono de la UV. Tiuj manipuloj de la komunuzaj vortoj havis interesan rezulton: la konscia prilaborado, al kiu Zamenhof elmetis ilin, prezentas efektive ion tute analogan al la nekonscia, malrapida efiko de la naturaj evoluofortoj en la naciaj lingvoj, inter kiuj fortoj la analogio ludas plej grandan rolon. Tiel la formoŝanĝoj, aŭdace truditaj de Zamenhof al la baza vortaro, polurante kaj glatigante la akraĵojn de la diversfontaj pruntovortoj, pliigis la internan koherecon de la lingvo, plifortigis ĝian aŭtonomion kaj akcentis ĝian apartan fizionomion: de tiam E ne plu estis, kiel estos poste Ido aŭ Occidental, ia seka kopio de tiu aŭ alia natura lingvo, sed ĝi per tiu genia knedado ricevis sian propran, preskaŭ individuan spiriton.

Ne nur la formon de la radikoj, cetere, Zamenhof kuraĝis modifi, sed ja ankaŭ plurfoje la signifon: tio ĉi estas ĝis nun preskaŭ ne esplorita kampo, en kiun mi riskos nur provajn paŝojn. En pluraj okazoj, ekz-e, Zamenhof atribuis al latindevena radiko aŭ la

latinan signifon, kiun tiu radiko perdis ĉe la modernaj lingvoj, aŭ novan signifon, kiun ĝi akiris nur en unu moderna lingvo: ekz-e *akcepti* plejofte respondas ne al la franca *accepter* aŭ al la angla *to accept*, sed ĝuste al la latina *accipere*, t. e. al la franca *recevoir*, angla *to receive*; same *singulto* havas la signifon de la latina *singultus*, ne tiun de la F *sanglot* aŭ I *singulto*, kiuj signifas 'plorĝemo'.

Aliflanke *oferi* respondas ĝuste al la senco, kiun la latina *offerre* alprenis en la germana *opfern*, sed ne al la F *offrir*, I *offrire* aŭ A *to offer*, en kiuj lingvoj ĝi tradukiĝas per *sacrifier*, *sacrificare*, *to sacrifice*. Iom simila estas la okazo de *ĝentila*, kun la senco de la I *gentile*, sed ne de la F *gentil* aŭ de la A *gentle*.

Pri du aliaj okazoj oni povas supozi ian provon kunfandi latinan radikon kun la signifo de germana, respektive rusa vorto, kies formo iom proksimiĝas: *strio* ekz-e ne havas la sencon de la latina *stria*, franca *strie*, itala *stria*, kiuj signifas 'longan neprofundan sulketon', sed ja tiun de la D *Streifen*, t. e. F *bande*, I *striscia*. Al *lerta* Zamenhof donis la sencon de F *adroit*, A *clever*, D *geschickt* — dum la origina vorto (F *alerte*, A *alert*) signifas 'vigla': mi kredas, ke la kaŭzo de tiu duobla deformato, forma kaj senca, estas deziro proksimigi tiun vorton al la rusa *lovkij*.

Ĉe la du sekvantaj vortoj, okazis ia deflankiĝo de la ordinara senco al alia proksima aŭ metafora: al *prudenta* kroĉiĝis la senco de F *raisonnable*, A *sensible*, D *verständlich*, dum la ordinara kaj etimologia senco estas tiu de 'singardema' aŭ 'antaŭvidema'. *Vekto* devenas de la latina *uectis*, sed anstataŭ la senco de 'levilo', Zamenhof donis al ĝi la du sencojn de la rusa *koromĝslo*, t. e. 'transversa trabo de la akvoportisto kaj de la pesilo'. Mi aldonu, kvankam la vorto ne estas fundamenta, ke al la sama kategorio apartenas la Zamenhofa *vinkto*, pruntita el la latina *uinctum* (ligita) por traduki D *Niet*, F *rivet*.

En aliaj kelkaj okazoj mi ne sukcesis diveni la kaŭzon de la sencodekliniĝo: al *ĉikani* Zamenhof atribuis la signifon ne de F *chicaner*, D *schikanieren*, sed ja de F *cancaner*, D *Klatschereien machen*, t. e. 'babili malicaĵojn'; al *gracia* li atribuis la signifon ne de F *gracieux*, A *graceful*, D *graziös*, sed ja de F *délié*, A *slender*, D *schlank*, t. e. 'maldika'; al *insigno* li donis la signifon ne de F *insigne*, D *Insignien*, sed ja tiun de F *armoiries*, D *Wappen* ktp.

Fine, sur tiu kampo de la semantiko, t. e. de la sencologio, restus esplorota tuta kategorio da okazoj: la ideo-analizo. Estas facile observebla fenomeno, ke, dum unu lingvo kontentigas sin per unu vorto por esprimi komplekson da ideoj, alia lingvo opinias necesa disponi por tiu sama komplekso du aŭ eĉ tri diversajn vortojn. Kreanto de planlingvo devas do, en ĉiu tia okazo, decidi, kian vojon li elektos; kaj la decidoj de Zamenhof estas ordinare tre bone klarigeblaj per la neceso jen de la komprenebleco, jen de la ekonomio de vortoj.

La komprenebleco ekz-e postulis, ke oni distingu la du sencojn, kiujn la franca esprimas per unu vorto interalie en jenaj okazoj:

franca	germana	angla	esp-a
<i>langue</i>	<i>Zunge</i>	<i>tongue</i>	<i>lango</i>
	<i>Sprache</i>	<i>language</i>	<i>lingvo</i>
<i>parents</i>	<i>Eltern</i>	<i>parents</i>	<i>gepatroj</i>
	<i>Verwandte</i>	<i>relatives</i>	<i>parencoj</i>
<i>temps</i>	<i>Zeit</i>	<i>time</i>	<i>tempo</i>
	<i>Wetter</i>	<i>weather</i>	<i>vetero</i>

Oni povas tamen dubi, ĉu estis efektive necesa jena alia distingo:

<i>aller</i>	<i>gehen</i>	<i>to go</i>	<i>iri</i>
	<i>reiten</i>	<i>to ride</i>	<i>rajdi</i>
	<i>fahren</i>	<i>to drive</i>	<i>veturi</i>

precipe en lingvo, kiu celis esti kiel eble plej simpla kaj uzi kiel eble malplej da vortoj.

La vortekonomio ludis ja pli grandan rolon, kiel atendite. Oni vidos, el la ĉi-subaj tabeloj, ke ofte Zamenhof rigardis decidiga la fakton, ke unu el la ĉefaj eŭropaj lingvoj kunigis du senconuancojn sub unu sola vorto, por fari la samon en Esperanto. Tiel li forferis la nuancigon jen de unu lingvo kontraŭ la aliaj:

franca	germana	angla	rusa	itala	esp-a
<i>ciel</i>	<i>Himmel</i>	<i>sky</i> <i>heaven</i>	<i>nebo</i>	<i>cielo</i>	<i>ĉielo</i>
<i>cher</i>	<i>teuer</i>	<i>dear</i> <i>expensive</i>	<i>dorogoj</i>	<i>caro</i>	<i>kara</i>

jen de du lingvoj:

<i>aimer.</i>	<i>gern haben</i> <i>lieben</i>	<i>to like</i> <i>to love</i>	<i>ljubit'</i>	<i>amare</i>	<i>ami</i>
<i>attendre</i>	<i>erwarten</i>	<i>to wait</i> <i>to expect</i>	<i>ĵdat'</i> <i>oĵdat'</i>	<i>aspettare</i>	<i>atendi</i>
<i>faire</i>	<i>machen</i> <i>tun</i>	<i>to make</i> <i>to do</i>	<i>djelat'</i>	<i>fare</i>	<i>fari</i>
<i>heure</i>	<i>Stunde</i> <i>Uhr</i>	<i>hour</i> <i>o'clock</i>	<i>ĉas</i>	<i>ora</i>	<i>horo</i>
<i>monsieur</i> <i>seigneur</i>	<i>Herr</i>	<i>sir</i> <i>lord</i>	<i>gospodin</i>	<i>signore</i>	<i>sinjoro</i>
<i>viande</i> <i>chair</i>	<i>Fleisch</i>	<i>meat</i> <i>flesh</i>	<i>mjaso</i>	<i>carne</i>	<i>viando</i>

jen eĉ de tri:

<i>tas</i> <i>foule</i>	<i>Haufe</i>	<i>heap</i> <i>crowd</i>	<i>kuĉa</i>	<i>mucchio</i> <i>folla</i>	<i>amaso</i>
<i>léger</i> <i>facile</i>	<i>leicht</i>	<i>light</i> <i>easy</i>	<i>legkij</i>	<i>leggiero</i> <i>facile</i>	<i>facila</i>
<i>escalier</i> <i>échelle</i>	<i>Treppe</i> <i>Leiter</i>	<i>staircase</i> <i>ladder</i>	<i>ljestnica</i>	<i>scala</i>	<i>ŝtuparo</i>

Kompreneble, ankaŭ ĉi tie la elekto de la simpleco povis havi siajn malavantaĝojn, precipe kiam la sola elektita radiko devenas de unu el la lingvoj, kiuj konas distingon inter du tiaj preskaŭ-sinonimoj; tial esprimoj, kiel *tibiviano* aŭ *Sinjoro Dio* neniam renkontis grandan aprobon inter la esperantistoj: sian tradukon de 1888: «Mi fariĝis tro korpa, mi litere ricevis viandon kaj ostojn», Zamenhof ŝanĝis al «karnon kaj ostojn» (*Fabeloj de Andersen*, Plena Kolekto, II, pĝ 136 — Eld. 1926); kaj oni scias, kiel, en la antaŭparolo al lia traduko de la *Biblio*, Zamenhof klarigis, ke «ĉar la titolado de Dio per *Sinjoro* ... estas io tro triviala kaj profananta (precipe en la tre ofte renkontata kuniĝo *Sinjoro Dio*)» li anstataŭigis ĝin per *la Eternulo*.

La ĉi-supra esploro de la konsisto de nia fundamenta vort-trezoro kaj de la modifoj, kiujn Zamenhof trudis al granda parto el ĝi, forme kaj sence facile komprenigos, ke tre baldaŭ post la publikigo de la *Meza Vortaro* montriĝis reagoj de okcidenteŭropanoj, precipe de Germanoj, kiuj deziris atingi egalan kaj regulan transskribon de ĉiuj nacilingvaj radikoj alprenitaj en Esperanto. Inter ili troviĝis Edgar von Wahl (kiu poste kreos la solan indan rivalon de nia lingvo, *Occidental*), Antoni Grabowski kaj Heinrich Trompeter; precipe tiu ĉi lasta, per la minaco ĉesigi la eldonadon de la ununura tiutempa gazeto, «La Esperantisto», kiun li subvenciis, devigis Zamenhof al granda kaj gravega elpaŝo. En 1894, kolektinte ĉiujn reformproponojn, la aŭtoro de Esperanto entreprenis sisteman analizon de la tuta lingvo, «komencante de la alfabeto kaj finante per la lasta vorto de la Meza Vortaro», kaj li rezulte prezentis radikale reformitan lingvon. Specimenon de tiu «nove proponata perfektigita dialekto» oni jam legis ĉi-supre (pĝ 53). Oni scias, ke la sekvanta voĉdonado decidis, per plimulto de unu triono, la konservon de la malnova formo de la lingvo. Tiun rezulton oni ŝuldas unuparte al la influo de Zamenhof mem, aliparte al la jam vekiĝinta sento pri la bezono de lingva stabileco. Kaj por plifortigi tiun rezulton, Zamenhof petis helpon de la alia faktoro, kiun mi difinis komence de tiu ĉapitro: li iniciatis eldonon de kolekto da literaturaj verkoj, kiun li nomis la «Biblioteko»; kaj tie, jam en la dua parto de la jaro 1894, li publikigis la unuan ĉefverkon de nia lingvo, sian faman tradukon de *Hamleto*, kiu, post la reforma

krizo de 1894, ludis la saman purigan kaj pacigan rolon, kiun ludos, post la Ido-krizo de 1907, lia alia ĉefverko, la traduko de la Goethea *Ifigenio*. Movon oni pruvas paŝante, kaj tiu elpaŝo montriĝis triumfa, en la du okazoj.

Tiujn historiajn faktojn mi resume memorigis, por ke oni pli facile imagu la spiritostaton de Zamenhof en la jaro 1905, antaŭ la malfermo de la Unua Kongreso. Lia lingvo, ekde 1900, faris grandegajn progresojn en la okcidenta Eŭropo: sed, sur tiu nova kampo kaj ĉe tiu nova generacio de esperantistoj, ĉu ne reviviĝos la malnova tento de reformado? Zamenhof ja sciis, ke en 1901 iu doktoro pri filozofio, L. Couturat, fondis ian «Delegacion por alprenado de Internacia Lingvo»; ke en 1903, la kanada gazeto «La Lumo» agitadis por forigo de la supersignitaj literoj; ke Dro Javal intencas elmeti la saman demandon antaŭ la Bulonja Kongreso; kaj li sciis tre bone (kion la reformistoj neniam suspektis), ke tiu afero de la supersignitaj literoj, unuavide pure ekstera detalo, havas intimajn rilatojn kun la konsisto de la vortaro kaj eĉ de la gramatiko de Esperanto. Jen kial li maltrankviliĝis kaj, ĉar la prestiĝo de la literaturo ŝajnis tiam ne sufiĉa, serĉis ian eksterordinaran rimedon por definitivigi la tiaman formon de la lingvo, ian artefaritan ekvivalenton de la tradicio, kiu konservas senŝanĝe la naturajn lingvojn.

La deziratan rimedon Zamenhof depruntis de la sperto de sia gento. Serĉante ekzemplon de neŝancelebla tradicio, li kompreneble tuj ekpensis pri la hebrea religio kaj moroj, kiuj restadis konstantaj tra ĉiuj tempoj, klimatoj kaj medioj, kaj kies stabilecon certigas la netuŝebleco de fundamenta libro, la Biblio. Netuŝebleco tiel pedanta, ke eĉ la vortoj nekompreneblaj aŭ rekte eraraj estas ĉiam plu, post dudektri jarcentoj, senŝanĝe kopiataj, dum la legota formo estas diskrete aldonita nur piednote. Kion unu libro faris por eternigi religion, unu alia libro povus tion same fari por fiksi lingvon, kondiĉe ke la uzantoj rilatu al ĝi kun sama sento de respekto kaj de fervoro. Jen do kiel naskiĝis en la spirito de Zamenhof la ideo pri iu solene kaj definitive akceptita *Fundamento*, en kiu nenia eĉ plej malgranda ŝanĝo estus tolerata. Por konsistigi tiun *Fundamenton*, li kunigis tri libretojn: la Gramatiko de la *Unua Libro* (1887), la *Ekzercaro* de 1894 kaj la *Universala Vortaro*

de 1893. La kolekton de tiuj tri dokumentoj, provizitan per grava antaŭparolo, li prezentis do al la Unua Kongreso kiel la solan eblan rimedon certigi la vivon de E kaj malhelpi ĝian disfalon en dialektojn. Kaj li sciis, precipe per sia Malferma Parolado, veki en ĉies animo tian religian emocion, ke la sankciado de la *Fundamento* fariĝis preskaŭ sanktigo, kaj ke ĉiuj veraj esperantistoj de tiam sentis sin ligitaj de la ĵuro, kiun iliaj antaŭuloj solenis en Bulonjo-ĉe-Maró.

Kaj efektive, de tiu dato nia *Fundamento* restis netuŝita,¹ kaj la verdaj branĉoj de nia literaturo povis potence disvolviĝi el tiu jam firmigita trunko. La formo de la esperantaj vortoj, kune kun ilia aparta ortografio aŭ ilia speciala senco, fiksiĝis en nia memoro tiel hejme, ke ni ne plu demandas nin pri ilia motivigo aŭ ilia deveno: ni lernis ilin kaj ni uzas ilin same instinkte, kiel la vortojn de nia nacia lingvo, kaj verŝajne pli ol unu leganto ekmiris pri la iom suspektinda origino de tiuj ^{an aliaj} malnovaj amikoj. Sed tio ne signifas, aliflanke, ke tiuj vortoj kvazaŭ ŝtoniĝis en mi ne scias kia malviva tabueco. Male, ĉar ili estas ĝuste inter la plej uzataj, ilia senco, iliaj sencoj, mi devus diri, evoluadis plue. Kaj tiu evoluo estas eble la plej interesa parto de ĉi tiu esploro.

La signifo de vorto estas io multe malpli facile fiksebla, ol ĝia formo. Kiam temas pri la nomo de konkreta objekto, ekzistas ordinare nenia ĝeno; kion Ruso komprenas sub *suno*, *fingro* aŭ *arbo*, estas la sama, kion ankaŭ komprenas Anglo aŭ Japano. Sed se ni konsideras la abstraktajn vortojn, la nomojn de ideoj, de agoj ktp, ni tuj rimarkas, ke ili respondas ordinare ne al unu aparta, klare distingebla ideo, sed al tuta komplekso da ideoj, ligitaj inter si per la najbareco, la metaforeco aŭ eĉ ia fonetika hazardo. Kaj la konsisto de tiuj kompleksoj ne ĉiam estas la sama en tiu aŭ alia lingvo. Nu, ni scias, ke la tri lingvoj plej familiaraj al Zamenhof

¹ Krom du esceptoj: ĉe ĉiuj eldonoj provizitaj de la Esperantista Centra Librejo, ekde la 5a en 1918, tre bedaŭrinda preteratento enmetis du ŝanĝojn, kiujn De Beaufront antaŭe iniciatis en sia privata eldono de la Ekzercaro: ĉe 14, 5 oni ŝanĝis *miljaron* al *jarmilon* kaj ĉe 36, 7 oni ŝanĝis *mia frato kaj fratino* al *miaj frato kaj fratino*. La eldono de la *Fundamenta Krestomatio* farita de la Londona The Esperanto Publishing Co forigis tiujn atencojn.

estis la rusa, la pola kaj la germana: tial okazis, ke la ideokompleksoj de tiuj lingvoj tute nature trudiĝis al lia penso. Sekve, se ekz-e por unu aparta ideo la elektita radiko estis francdevena, Zamenhof emis en sia uzado ankaŭ doni al tiu radiko la pli ampleksajn sencojn, kiujn havas la responda vorto en la germana aŭ la rusa, kaj kiujn eventuale neniam havis la franca.

Jen kelkaj ekzemploj de tiu senc-ampleksigo. *Agordi* signifas en F ‘ĝustigi muzikilon’; sed ĉar en la germana la verbo *stimmen*, kiu esprimas tiun ideon, havas ankaŭ la sencon ‘inklinigi, humorigi iun al io’, la esperanta *agordi* estis uzata ankaŭ en tiu senco, tute fremda al la franca *accorder* aŭ al la itala *accordare*: *lia animo agordiĝis pie* estas preskaŭ ne tradukebla en la francan. Same *kolekti*, krom la bazaj sencoj de L *colligere*, A *to collect*, akiris ankaŭ tiun kroman de la R *sobirat’*, t. e. ‘depreni, delevi’: *kolekti pajlon, falintajn foliojn* ktp. *Konsilo* estas ja la F *conseil*, A *counsel*; sed ĉar la D *Rat* signifas krome *rimedo*, Zamenhof uzas ĝin ankaŭ kun tiu senco: *kontraŭ ĉia malfacilo ekzistas konsilo*. La verbo *ŝiri* estas la kripligo de la F *déchirer*, sed krom ties signifo (*ŝiri siajn ŝtrumpojn*), ĝi alprenis la kroman sencon de la R *rvat’*: *ŝiru rozojn en somero*. . . kiu formo elvokus ĉe Franco la ideon de dispecigo de la floro.

Alia fenomeno, en mala direkto, estas la plimalvastigo de senco de kelkaj vortoj, kiuj estis komence uzataj kun ampleksa kaj sufiĉe elasta signifo, sed kies signifon oni pli kaj pli sentis la bezonon precizigi per la enkonduko de alia nova internacia vorto, kiu alprenis al si unu el la signifoj de la fundamenta radiko. Tiel ekz-e la komence tre vasta senco de *budo* estis praktike limigita per la enkonduko de *barako* en la 2a *Oficiala Aldono al la Fundamento* kaj de *kabano* en la 4a. Same pri *ĉikani*, al kiu *klaĉi* (4a OA) eĉ deprenis ĝian fundamentan signifon, repuŝante ĝin en la veran etimologian sencon de la franca vorto. *Feĉo* estis senclimigita de *rekremento* (3a OA) kaj de *skorio* (Zamenhofa vorto); *gracia*, pro la enveno de la neologismo *svelta*, rekondukiĝis al sia etimologia senco ‘harmonie ĉarma’; *kaduka* estis ofte uzata de Kabe kun kroma signifo, kiun senutiligis la alprenado de *efemera* (3a OA); *rondo* estis precizigita de *cirklo* (Zamenhofa vorto); *ŝtofo* forcedis unu el siaj sencoj al la nova *materio* (1a OA); *triviala* estis eĉ preskaŭ tute senutiligita de la enveno de *vulgara* (1a OA) kaj de

banala (2a OA); fine de la kuireja *viando* oni distingis la vivantan *karnon* (1a OA). En la okazo de *ami*, la puritana delikateco de la nordaj landoj deŝovis alian fundamentan verbon *ŝati* de ĝia propra signifo, kiu estis *A to appreciate*, *F faire cas de*, *D viel halten*, por anstataŭigi *ami* en la okazoj, kiam temas pri aĵoj aŭ agoj: tio plue necesigis la enkondukon de neologismo, por okupi la ekslokon de *ŝati*, kaj tial Newell riskis *aprezi* (enprenitan ankaŭ en la Norvega Ŝlosilo), al kiu formo, por eviti konfuzon kun *prezo*, mi preferus almenaŭ *apreci*.

En la okazo de *facila*, oni vastigis la uzon de *malpeza*, de *delikata* — kaj oni eĉ provis la novan vorton *leĝera*, ne senmotive, laŭ mia opinio: ĉar, se vi parolos pri knabino aŭ pri poezio, estus same danĝere uzi *facila*, kaj ĝene uzi *malpeza*, ĉu ne?

En kelkaj aliaj okazoj, oni provis uzi morfologiajn rimedojn, por starigi distingon, kiun oni sentis necesa. Tiel oni pli kaj pli uzas la pluralon *insignoj* por la blazona senco, kaj la singularon por internacia signifo: *la verda stelo*, *insigno de la esperantistoj*. Tia distingo ekzistas jam en la *Fundamento*, por malkonfuzi la ludpozicion *damo* disde la ludo mem: *damoj*; la ŝakludantoj, analoge, ofte esprimis la deziron povi ludi *ŝakojn* kaj la esperon fini per brila *ŝako* de la kontraŭa reĝo. Kaj mi ne vidas en tio ian danĝeron. Ankaŭ oni povas rimarki ian emon al la distingo per sufiksoj inter la *forketo*¹ de la manĝanto kaj la *forko* de la fojnistoj, aŭ inter la *ŝtuparo* el marmoro kaj la *ŝtupetaro* el ŝnuroj.

Tria karaktero de la lingva evoluo estas la emo al anstataŭigo de derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj per simplaj radikoj. Mi opinias utila doni ĉi tie precizajn observojn. En *UV* troviĝas, krom la nudaj radikoj, certa nombro da senperaj derivaĵoj (ekz-e *tamburi* apud la nuda *tambur*), kiujn provizore mi lasos flanke, kaj 295 kunmetaĵoj aŭ per afiksoj (ekz-e *ĉirkaŭskribi*, *mastrumi*) aŭ per radikoj (ekz-e *matenmanĝo*). Ili prezentas kompreneble tre malgrandan parton de la eblaj kunmetaĵoj, kaj estis tie enmetitaj nur kiel modeloj; sed ĉar la *Fundamento* donis al ili apartan oficialan sankcion, estos des pli interese konstati, kio fariĝis el ili.

¹ Tiu ĉi formo estis uzita de Zamenhof en la Unua Ekzercaro.

Nu, por la pli granda parto, la kvin sesonoj, ili restis neŝanĝitaj en la normala uzado.¹ Tamen, pri tiu lasta sesono, ĉ. 50-55, okazis substituoĵoj. Tri estas nun pli-malpli ordinare anstataŭigataj per tri aliaj simplaj radikoj el la *Fundamento*: *jesigi* per *konfirmi*, *kreskaĵo* per *planto* kaj *uzaĵo* per *ilo*.

26 estis anstataŭitaĵoj de novaj vortoj, ĝenerale lanĉitaĵoj de Zamenhof mem, kaj tial poste oficialigitaj en unu el la sekvintaj OA. Ili estas: *subaĉeti* (= *korupti*, 3a OA), *malafabla* (= *grumblema*, 2a), *anaro* (= *trupo*, 1a), *arbeto* (= *arbusto*, 6a), *brulumo* (= *inflamo*, 4a), *ĉirkaŭmano* (= *braceleto*, 2a), *fosilo* (= *ŝpato*, 4a), *hararo* (= *peruko*, 1a), *komercaĵo* (= *varo*, 4a) *flava kupro* (= *latuno*, 1a), *meĉaĵo* (= *tindro*, 2a), *almiliti* (= *konkeri*, 4a), *dunaskito* (= *ĝemelo*, 4a), *pafalego* (= *kanono*, 1a), *depago* (= *imposto*, 1a), *elparoli* (= *prononci*, 3a), *ponardego* (= *lanco*, 1a), *procentego* (= *uzuro*, 4a), *malrekta* (= *oblikva*, 1a), *rifuĝiĝi* (= *rezigni*, 3a), *sanktejo* (= *templo*, 1a), *malsobra* (= *ebria*, 1a), *superakvi* (= *inundi*, 4a), *temaŝino* (= *samovaro*, 2a), *terkolo* (= *istmo*, 1a), *vastigi* (= *propagandi*, 1a).

Fine por ĉirkaŭ 30 aliaj ekzistas anstataŭaĵoj, kiuj estas pli-malpli uzataj, laŭ la temoj, la medioj aŭ la personoj; mi listigos ilin en tri tabeloj, la komunuzaj, la teknikaj kaj la literaturaj: a) komunuzaj: *metalfadeno* (= *drato*), *ununombro* (= *singularo*), *elpensi* (= *inventi*), *supraĵo* (= *surfaco*), *trunketo* (= *tigo*), *vagonaro* (= *trajno*); b) teknikaj: *arkaĵo* (= *volbo*), *balenosto* (= *barto*), *barilo* (= *heĝo*), *norda cervo* (= *boaco*), *flugilo* (= *alo*), *fortikaĵo* (= *fortreso*), *glitilo* (= *patino*), *glitveturilo* (= *sledo*), *irilo* (= *stilzo*), *mordeti* (= *rongi*), *ovujo* (= *ovario*), *pafilo* (= *fusilo*), *postsigno* (= *spuro*), *rampaĵo* (= *reptilio*); c) literaturaj: *ĉirkaŭpreni* (= *brakumi*), *faleti* (= *stumbli*), *malfermi* (= *aperti*), *maljunulo* (= *oldulo*), *malluma* (= *obskura*), *manplato* (= *polmo*), *respondeca* (= *responso*), *ŝtuparo* (= *eskalo*), *vinbero* (= *uvo*), *malvirgigi* (= *deflori*) — sume 6 komunuzaj, 14 teknikaj kaj 10 literaturaj.

Pri ĉi tiu listo, mi deziras elmeti kvar rimarkigojn: 1° la ebleco

¹ Pri kvar el ili, oni nun kutimas uzi aliajn kunmetaĵojn el fundamentaj radikoj: *armilo* anstataŭ *batalilo*, *falĉileto* anst. *rikoltilo*, *ĉizilo* anst. *skulptilo* kaj *poŝtmarko* anst. *signo de poŝto*.

de tiaj substituoj per libera evoluo estas antaŭvidita en la Antaŭparolo de la *Fundamento* mem, kie oni legas: «Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo ... sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la *literaturo* ... Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron *oficialan*, kiel *Aldonon al la Fundamento*». Kaj ni vidis, ke efektive tiel okazis por parto el ili kaj verŝajne okazos por kelkaj aliaj. 2° Zamenhof mem iniciatis tiajn substituojn. 3° La aludita oficialigo, aŭ la enkondukado de tiaj novaj vortoj en la vortarojn tute ne signifas, ke la fundamentaj kunmetaĵoj estas ne plu uzeblaj; male, ne mankas okazoj, kie ili estas uzataj apud la novaj vortoj, aŭ kun afekcia nuanco, aŭ pro stilaj konsideroj ktp. 4° La amplekso de tiu neologisma ondo restis tre limigita rilate al la nombro de la netuŝitaj kunmetaĵoj de la *Fundamento*: unu sesono — kaj cetero mi jam indikis, ke tiuj fundamentaj kunmetaĵoj estas nur tre malgranda frakcio de la komunuzataj. Ni povas do konstati, ke el la vidpunkto de la leksikologio, la tiuvoja evoluo de nia lingvo estas io tute natura, tute leĝa, kaj sufiĉe limigita, por ne endanĝerigi la stabilecon de E.

Restas unu lasta demando, kiun mi devas tuŝi, kvankam la *Universala Vortaro* liveras mem tre malmulte da materialo por ĝia esploro; sed ĝi estas implicita en la 15a regulo de la Gramatiko, kaj klare elmetita en unu ekzemplo de la Ekzercaro («*Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato*» — § 36). Tio estas la problemo de la internaciaj aŭ pseŭdaj sufiksoj. Ni trovas ekz-e, ke al la fundamenta *ekspozicii* oni pli kaj pli emas substitui la simplan *eksponi* — dum Zamenhof, en siaj verkoj, male ŝajnis preferi tiajn internaciajn formojn, kiel *civilizacio*, *deklaracio*, *gubernatoro*, *organizatoro*, *medikamento*, *reglamento*, *sentimentala*, *parlamentarismo*, *provincialismo* ktp. La demando, laŭ mia opinio, estas kompleksa, kaj ne povas esti tranĉita per unu sola decido: sisteme elimini ĉiujn pseŭdosufiksajn formojn, kiel ekz-e provis fari la aŭtoroj de la Edinburga poŝvortareto, ŝajnas al mi eraro. Estas konfesinde, ke la spertaj esperantistoj, tiuj, kiuj multe kaj ofte uzas la lingvon, sentas kvazaŭ naturan instinkton senbalastigi la vortojn je tiuj

alpendaĵoj, uzi nur propre esperantajn radikojn kun la regulaj derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj, unuvorte igi sian lingvon kiel eble plej memstara kaj kohera. Estas sendube, ke serio kiel *observi*, *observisto*, *observejo* ktp estas preferinda al *observi*, *observatoro*, *observatorio*, aŭ *racia* al *racionala*, aŭ *senkreditigi* al *diskrediti*, el la vidpunkto kaj de la belsoneco kaj de la ekonomio. Sed aliflanke, ĉe la teknikaj vortoj, la uzado de la pseŭdosufiksa formo estas ofte rekomendinda, ĉar ĝi unuavide montras sian teknikan signifon kaj malebligas konfuzon kun komunuzaj vortoj, kaj sekve permesas tujan rekonon, eĉ de ne-esperantistaj specialistoj. Vortoj kiel ekz-e *ekskoriacio* aŭ *ekzekucii* prezentas jam ĉe la ekaŭdo aŭ eklego nekonfuzeblan sonbildon por la kuracisto aŭ la juristo, dum la pli simplajn *ekskorio* aŭ *ekzekvi* ili identigus kun malpli da facilu. Alia ekzemplo de tiuj utilaj distingo estas la fundamenta *konfirmi*, kies iom ŝvela senco estis poste analizi per la terminoj religia *konfirmacio*² kaj politika *ratifiki*.

Mi aldonu kroman rimarkon pri la okazo aludita en la frazo de la Ekzercaro: ekzistas en la grekdevena internacia vorttrezoro tuta serio de vort-duopoj, en kiuj la unua esprimas scienciston aŭ specialiston, kaj la dua la sciencon aŭ specialaĵon respondan, ekz-e *filosofos-filosofia*, *dramaturgos-dramaturgia*, *geografos-geografia* ktp. La propre esperanta procedo, en tiaj okazoj, estas elekti la nomon de la scienco kaj tiri el ĝi tiun de la sciencisto per la sufikso *-ist*: *dramaturgio-dramaturgiisto*. Sed tiu solvo ŝajnas al mi peko samtempe kontraŭ belsoneco kaj simpleco: belsoneco, ĉar la du *i* sinsekvaj povas plaĉi al neniu; simpleco, ĉar, malgraŭ la ŝajno, kian do avantaĝon E povas trovi en la uzado de ekz-e *demokratiisto*, dum ĉiuj lingvoj, eĉ la plej malproksimaj de la greklatina tradicio, kiel la rusa aŭ la japana, konas ja la du radikojn *demokrat* kaj *demokrati*? Se en tiuj okazoj oni volus kunigi la regulecon kun la internacieco, ĉu ne estus pli racie ekstrakti la sufikson *-io* por montri la agokampon de la koncerna specialisto — kio sufiĉus por unuecigi la duopojn ĝis nun heterogenajn *filozofo-filozofio*, *geografo-geografio* ktp? Sed pri tiaj anticipoj mi ne volas insisti.¹

¹ La Akademio, konsultita de mi pri tiu propono, malkonsilis ĝian nunan esploron per 24 voĉoj kontraŭ 10. Vidu la ĉapitron *Landnoma demando*.

Jen do kiel aperas la nuna stato de la problemoj, kiujn elmetis la konsisto de la *Universala Vortaro* kaj ĝia sankciado kiel parto de la *Fundamento*. La intenco de Zamenhof provizi sian lingvon per sekuriga bremsilo, per ia arta inerciforto, kiu anstataŭus la naturan tradicion, plene sukcesis, malgraŭ la duboj, la moko kaj la atakoj, kiujn kelkaj esperantistoj kaj multaj idistoj, occidentalistoj kaj aliaj teoriuloj ne ŝparis al tiu aŭdaca entrepreno. Kaj lia alia zorgo, ke sur tiu firma bazo la lingvo tamen restu kapabla libere evolui kaj evitu tiun mortigan neŝanĝeblecon de Volapük, trovis ankaŭ tute kontentigan respondon en la kresko de nia vortaro kaj en la disvolviĝo de nia literaturo.

Ekzistas ankoraŭ multaj punktoj, pri kiuj la esperantistoj diskutas inter si, iafaje kun akreco, tion mi konfesas: sed tio estas tute komprenebla, ĉar ni estas ankoraŭ juna popolo, kies interna diverseco povas nur malrapide homogeniĝi; kaj tio estas eĉ dezirinda, ĉar nia lingvo estas vivanta kaj ĉiutage devas fronti novajn problemojn, kiujn levas ĝia plivastiĝo mem. Sed hodiaŭ, kvindekkvar jarojn post la Unua Kongreso, ni rajtas fieri, ke ni restis fidelaj al la leĝo de nia Majstro, kaj ni povas danki al li, ke E ne restis ia artefarita, arbitre ŝanĝebla kaj ĉiam rompebla mekanismo, sed definitive kaj neŝanceleble enradikiĝis en la viva penso de la homoj. Kaj tiun ĉi mirindan, ni ne timu diri eĉ miraklan, rezulton Zamenhof atingis, ne nur ĉar li posedis la necesajn lingvistikajn sciojn, sed krome, kaj precipe, ĉar li havis, tridekkelkajn jarojn antaŭ la oficiala scienco, tiun genian intuicion, ke lingvo estas antaŭ ĉio ia socia fenomeno kaj, kiel ĉiuj sociaj realaĵoj, baziĝas ne tiom sur fonetikaj leĝoj aŭ raciaj rezonoj, kiom sur kelke da profundaj sentoj, la sentoj pri imitema simpatio, pri kolektiva disciplino, pri grupa solidareco, kiuj havas sian radikon en la socia instinkto kaj sian floron en la konscio sub la formo de la interhoma amo.

II

VORTKONSTRUA SIGNIFO

La *Universala Vortaro*, same kiel ĝiaj leksikologiaj antaŭaĵoj, la vortarfolio de la *Unua Libro* kaj la *Meza Vortaro*, prezentas al la eŭropa uzanto neordinaran aspekton. Se ni flanklasas la finaĵojn, prepoziciojn kaj adverbojn, la aliaj kapvortoj estas presitaj sen finaĵo, sub formo, kiu tamen estas supozata nekompleta, ĉar estas postmetita al ili la signeto (ne apostrofo!),¹ per kiu Zamenhof montris la diversajn partojn de kunmetita vorto, laŭ jena maniero:

a b a t' abbé / abbot / Abt / abbat / opat
a ĉ e t' acheter / buy / kaufen / pokupat' / kupować
a c i d' aigre / sour / sauer / kisliĵ / kwaśny

ktp. Oni rimarkos, ke la apudaj tradukoj montras tamen, ĉiu en sia lingvo, ke temas en la unua okazo pri substantivo, en la dua pri verbo, en la tria pri adjektivo. Kaj oni demandas sin, kial Z ne obeis la kutimon de la eŭropaj vortaristoj, kaj ne skribis la ĝustan ekvivalenton de tiuj nacilingvaj vortoj: *abat'o*, *aĉet'i*, *acid'a* ktp, des pli ke, en la vortarlistoj de la Fundamenta Ekzercaro, li skribis: *infano*, *matura*, *plori* ktp kaj ne *infan'*, *matur'*, *plor'*, kiel en la UV, kvankam la tradukoj estas la samaj en ambaŭ verkoj; des pli ankaŭ ke la formoj *abat'*, *aĉet'* aŭ *acid'* prezentas kaptilon: oni devas havi bonajn okulojn por rimarki, ke la ilin finanta streketo diferencas je la apostrofo.

Tian manieron prezenti la radikojn de lia lingvo probable inspiris al li la kutimo de la hebreaj vortaristoj: ĉar tiuj ĉi, pro la

¹ Oni do ne devas argumenti, kiel faris jam kelkaj, ke la radikoj de la *Fundamento* ne havas gramatikan karakteron pro tio, ke *aĉet'* ekzemple estas difinita per verbo, dum la sama formo en teksto havus, laŭ la 16a regulo de la Fundamenta Gramatiko, substantivan valoron: Z zorge precizigis, ke la eliziita *o* estas *anstataŭita* de la apostrofo; la rekta signeto estas nur indiko de fina limo de radikoj.

aparta konsisto de la lingvo, sisteme prezentas la vortojn klasitajn sub la formo de la tria singulara persono de la perfekto, ekz-e:

'*ā m a n* (li) 'subtenis, fundis';
 '*omenet* 'nutristino';
 '*ĕmunīm* 'fideluloj';
 '*amēn* 'firma, vera';
 '*āmānāh* 'definitivaĵo';
 '*ĕmeth* 'firmeco, fido' ktp.

Plejofte la substantivoj mem estas tiel prezentitaj, eĉ kiam oni devas supozi al ili neuzatan verbon, ekz-e:

g ā z a ' (araba radiko neuzata) (li) 'tondis':
 giza 'vergo, trunko' ktp.

En tia prezentado, kiu estis al li kvazaŭ hejma (la patro de Z estis bona hebreisto kaj instruigis tiun lingvon al la filo), Z trovis la deziratan procedon evidentigi la absolutan memstarecon kaj nevariecon de ĉiuj elementoj de la lingvo, kaj simpligi la laboron de la unuaj uzantoj. Nome, laŭ avizo presita je la komenco de la vortarfolio kaj de la *UV* (en la apartaj eldonoj antaŭ 1905): «Ĉion, kio estas skribita en ... Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro: vortoj, kiuj formás kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo; tiel ekzemple la vorto *frat'in'o*, prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte». Sekve, estis pli oportune, se la neinicito devos simple adicii vorterojn:

$$aĉet' + i = aĉeti$$

ol se li devos unue detranĉi la vortaran finaĵon, por poste aldoni alian laŭbezone, jene:

$$aĉet'i - i = aĉet' + o = aĉeto$$

Sed uzante tiun pure praktikan rimedon faciligi la uzadon de lia «kriptolingvo» (kia en tiuj jaroj estis aspekte E), Z tute ne suspektis, kiajn longajn diskutojn li preparas por la estonteco.

La unuaj esperantistoj, cetere, ne maltrankviliĝis pri tia afero. Disponante vortaron, kiu klare orientis ilin, per la nacilingvaj ekvivalentoj, pri la gramatika kategorio de la radikoj, kaj la verkojn de Z, kiuj montris al ili la manieron aldoni finaĵojn kaj afiksojn laŭ la postuloj de la senco, ili spertis nenian malfacilon en la farado de la vortoj. Kaj tiu feliĉa stato daŭris ĝis la jaro 1907a, kiam profesia filozofo kaj logikisto, Dro L. Couturat, ekzamenante la lingvon el principaj postulatoj, deklaris ĝin maltaŭga, ĉar ĝi ne obeas la principon de returnebleco (*F réversibilité*), kiun li, Couturat, ĵus elpensis.

«Ĉia derivado devas esti returnebla, t. e. se oni pasas de unu vorto al alia (samfamilia) laŭ certa regulo, necesas, ke oni povu pasi inverse de la dua al la unua laŭ ĝuste mala regulo...

... Sed ĉar necesas, ke oni povu sendiference pasi, ekz-e, de la substantivo al la verbo aŭ de la verbo al la substantivo senpere derivitaj de unu sama radiko, sekvas, ke la radiko devas havi per si mem nenian gramatikan karakteron, t. e. esti ne pli substantivo ol verbo aŭ adjektivo. Tio cetere estas preskaŭ evidenta, pro tio ke ĝuste la finaĵoj -o, -a, -i, -e difinas unike kaj entute la gramatikan karakteron de la vorto, aŭ pli ĝuste la vorton mem. Nu, oni kons-tatas, ke, en la UV... oni donas al ĉiu radiko unu difinitan grama-tikan sencon. Tiu teoria eraro... estas kontraŭa al la principo de returnebleco».¹

Jen la teksto, el kiu elfluis, kvazaŭ el venena fonto, ĉiuj teor-ioj pri la senkategorieco de la esperantaj radikoj. La sola difekto de tiu bela rezonado estas, ke ĝi baziĝas sur la apriora aserto, ke la esperanta vortfarado estas derivado; bedaŭrinde, ke ĝi en efek-tiveco estas kunmetado! La Couturat-a tezo similas la ĉevalinon de Rolando, kiu havis ĉiajn kvalitojn, krom tio, ke ĝi estas mortinta. Ĝi cetere utilis al nia lingvo per tio, ke ĝi devigis niajn gramatikis-tojn pli profunde esplori la mekanismon de la lingvo, kaj produktis tiun serion da brilaj kaj solidaj analizoj, kiuj pli kaj pli fidele

¹ Tradukita el la franclingva broŝuro *Etude sur la Dérivation en Espéranto*, par L. COUTURAT, Coulommiers, 1907, pĝ 7. En dua eldono (Parizo, 1910, pĝ 8), li aldonis kursivan konkludan frazon: «La gramatikaj finaĵoj ne povas do ŝanĝi la sencon de la radiko kaj servi por la derivado, kiel regule okazas en Esperanto».

ampleksis la lingvan realaĵon, de René de Saussure, de Eugen Wüster kaj de Kálmán Kalocsay.¹

Kaj tamen, kelkaj esperantologoj ne lasis sin konvinki per ili, kaj plu tenas la gramatikan senkategoriecon de la esperantaj radikoj kiel memevidentaĵon. Mi devas konfesi, ke iliajn argumentadojn mi apenaŭ povas kompreni. Mi supozas, ke kelkaj estas erarigitaj de la nekutima prezentado de la radikoj en la *UV*, prezentado, kies originon kaj motivon ili ne penis esplori. Aliaj, pli sciencemaj, estis frapitaj de la senvarieco en la ĉina kaj —laŭ malpli granda skalo— en la angla, kaj ambiciis, ke E prezentu la idealan tipon de tia lingvospeco. Aliaj, fine, apogas sin sur la psikologio por deklari, ke la vortkategorioj respondas al nenio en la regno de la ideoj, ke tiujn oni maksimume povus klasi en abstraktajn kaj konkretajn, sed ke eĉ tia klasado estas grandparte artefarita, kaj ke la limo inter ambaŭ klasoj estus nedifinebla.

Al tiuj longvidaj teoriistoj mi tre proze emus respondi per jena dilemo: aŭ viaj teorioj kondukas vin al postulado de ekzistoraĵto por formoj kontraŭaj al la nuna uzado (kiel *balao* por la ilo, *broso* por la ago, *hipokrito* por la homo, *fripono* por la stato ktp) — kaj tiam ili estas senvaloraj, ĉar laŭ la fruktoj oni arbon ekkonas; aŭ ili kondukas al la pravigo de la nun uzataj formoj — kaj tiam ili estas senutilaj, ĉar tiujn formojn jam bone klarigis la klasika analizo; kaj tiu klasika analizo havas krome tiun superecon, ke ĝi tiris sian originon el du konstateblaj faktoj: 1° la radikoj de la *UV* estas gramatike difinitaj per la kategorieco de la tradukvortoj, kiuj, ĉe iu ajn radikoj, estas la sama por la kvin lingvoj;² 2° Z tute klare skribis,

¹ RENÉ DE SAUSSURE, *La Vortteorio en Esperanto*, Ĝenevo, 1914; E. WÜSTER, *La Oficiala Radikaro, kun enkonduko kaj notoj*, Berlino, 1923; K. KALOCSAY, *Lingvo, Stilo, Formo*, Budapeŝto, 1931.

² Vere estas, ke, ĉe kelkaj tre maloftaj radikoj, la nacilingvaj tradukoj ne montras ĉiuj unu saman kategorion gramatikan. Dekunu tiajn okazojn mi konas (eble mi preterlasis du-tri); el tiuj, sep prezentas deflankiĝon ĉe la angla traduko: *bru*, *majest*, *rifuĝ*, *spez*, *supr*, *venĝ*, *ver*, tiel ke oni povas kun probable atribui ĝin al malbona scio de la angla lingvo. Pri la aliaj okazoj, ŝajne temas pri simpla oportuneco de traduko: la adverbo *prunt'e* havas respondan formon en la rusa kaj en la franca (*F à crédit* estus pli bone ol *en prêt*), sed ne en la angla kaj germana, kie Z devis uzi verbojn; same pri *song'i*, kiu ne havas precizan

almenaŭ unu fojon, ke li intencis doni al du diskutataj radikoj po unu certan gramatikan kategorion (Vidu *OV* pĝ 539).

Sed, se la principa demando ŝajnas al mi definitive solvita, restas ankoraŭ kelkaj aliaj detaloj, kiujn oni povus profite esplori: kial tiu aŭ alia radiko apartenas al tiu aŭ alia kategorio? Ĉu pro arbitra decido de la aŭtoro de *E*? Ĉu ne ekzistas dubaj okazoj? Kiel ilin juĝi? Ktp. Al la ĉefaj mi provos ĉi-poste rapide skizi respondon.

I. La unua, kion oni konstatas, kiam oni foliumas la *Universalan Vortaron* kun tia konsidero, estas, ke por treege granda nombro da radikoj povas ekzisti nenia dubo nek diskuto: ili per sia senco mem klasiĝas adjektive, substantive aŭ verbe. Kia fantaziulo volus vidi alion ol substantivojn en la radikoj: *abat*, *abel*, *absint*, *aer* ktp — ol verbojn en la radikoj: *ador*, *ag*, *akcept*, *akompan* ktp — ol adjektivojn en la radikoj: *agrabl*, *akr*, *alt*, *antikv* ktp?

Por fiksi la ideojn, mi kalkulis, per la sonda metodo, ke ĉirkaŭ 95 % el la radikoj apartenas al tiu speco, kaj sekve prezentas nenian malfacilon de lernado, nek materion de diskuto.

II. Estas kelkaj radikoj, kiujn oni povus meti en alian kategorion, ol tiun elektitan de la aŭtoro de *UV*. Ekz-e la radikoj *abomen*, *agac* ktp, kiuj estas substantivaj, povus esti egale bone konceptataj kiel verbaj; *argument*, *arm* ktp, klasitaj kiel verboj, povus esti apriorie rigardataj kiel substantivoj; *atent* estas adjektivo, sed ĝi teorie estus klasebla kiel verbo ktp.

Kion konkludi pri ili? Evidente, la uzanto de la lingvo estas devigata lerni ĉe ili, ne nur la signifon, sed ankaŭ al kia kategorio ili apartenas: sed tiun plian ŝarĝon oni ne povus evitigi al li. Ĝuste ĉar la ideo esprimita de tiuj radikoj estas plurvizaĝa, iu aŭ io ja

tradukon en la franca (*rêver* kaj *songer* estas ambaŭ uzataj metafore), tiel ke li devis uzi tie substantivon kaj ne verbon, kiel en la aliaj lingvoj; same pri *suffic'a* kies germana responda formo estas adverbo: *genug*. Cetere, ni devas ankaŭ allasi la eblon de skriberaroj: se ĉe *stamp'* nur la *F* donas substantivon, dum ĉiuj aliaj verbon, ĉu tio ne devenas de preteratenta forlaso de la fina litero de *estampiller*, *timbrer*?

devis nepre decidi pri ilia gramatika karaktero. Tiu leĝdona aŭtoritato estas la *Fundamento*, kaj restas al ni nur registri ĝiajn decidojn. Eĉ se kelkaj el ili ŝajnas al ni strangaj. Ĉar ni emas juĝi ĉion el la vidpunkto de nia nacia lingvo. Jam de longe oni kontrastigis la substantivecon de *bros'* kaj la verbecon de *bala'*, la substantivecon de *najl'* kaj la verbecon de *sigel'* ktp. Sed se en la franca *balayer* deriviĝas de *balai*, nek en la angla, nek en la germana, nek en la slavaj lingvoj la balailo esprimiĝas per vorto el la sama radiko, kiel *balai*; kio signifas, ke en multaj eŭropaj lingvoj, la ago *balai* ne estas strikte limigita al la uzo de la balailo, sed havas multe pli vastan signifon. La direkto de la vortfarado en E estas do tute logika. Male, la broso estas civiliza aparato, kiu servas nur por *brosi* (krom eble en Usono, ĉe *La Malgranda Akreo de la Bona Dio...*). Same *sigeli* estas pli vastsenca verbo, ol *najli* kaj tio pravigas la uzon de *sigelilo* apud *najlo*. Couturat aroge demandis, per kio oni povas *peigner*, se ne per *un peigne*, kaj konkludis, ke oni devus diri: *kombo* (ilo) kaj *kombi* (ago). Sed eĉ en la franca lingvo, la lino estis kombita komence per vegetaj, poste per metalaj kardoj; kaj kiu knabo ne kombis siajn taŭzitajn harojn per malpuraj fingroj? Tial, *kombi-kombilo* estas perfekte logika elekto.

III. Enestas en la UV 29 radikoj, sub kiuj ia gramatika kategorio, alia ol tiu donita al la radiko per la nacilingvaj tradukoj, estas montrita per la aldono de la koncerna finaĵo.

a) En 16 okazoj, al radiko verba, estas almetita substantiva formo, laŭ la tipo:

d i r e k t' diriger / direct / richten ktp.

d i r e k t'o direction / direction / Richtung ktp.

Ili estas: *direkt, dot, fart, flor, gut, honor, kaŭz, kost, not, okaz, pren, rul, sem, strek, teg, vest*.

La motivo de tiuj apartaj mencioj estas evidente montri, per tipaj ekzemploj, kian sencon oni devas doni al la kunmeto de verba radiko kun la o-finaĵo. Kio frapas unuavide, tio estas, ke, en la

ĉi-supraj ekzemploj, la o-kunmeto ne signifas la agon mem (kiu do estas esprimota per *-ad*), sed ian manifestiĝon de tiu ago. Pri la produkto-verboj, cetere, Z donis mem la regulon: «La ago estas: *stampi*; la rezultato: *stampo*; la instrumento: *stampilo*» (OV, pĝ 539). Oni povas daŭrigi lian klarigon: la *floro* estas, ne la *florado*, sed la konkreta rezulto de la ago *flori*; same pri la pliparto de la indikitaj vortoj, kaj same ankaŭ pri multaj aliaj, kiuj ne kuŝas en UV, sed kiujn sankciis la uzado: *gravuro*, malgraŭ la kritikoj de Stojan, estas ja la bildo, *planto* la vegetaĵo, *urino* la likvaĵo ktp.

Pri aliaj verboj, kiuj signifas agon sen konkreta rezulto, la senco de la o-kunmeto estas la aparta, abstrakta manifestiĝo de tiu ago: *okazo* ne devas esti konfuzata kun *okaziĝo*, nek *preno* kun *prenado*. Same, kvankam ne indikitaj en UV, oni klare distingas inter *opinio* kaj *opiniado*, *penso* kaj *pensado* ktp.

Iafoje eĉ, la rilato povas esti pli malstrikta: *direkto* signifas nek *direktadon*, nek *direktitaĵon*, sed la linion, laŭ kiu oni *direktas*; *honoro* estas nek *honorado*, nek *honoraĵo*, sed la sento ~~pli~~ *honorateco*; *rulo* estas nur io rulebla, ia cilindro ktp. Evidente tiaj vortoj ne obeas ian precizan derivregulon, kiel postulis la idistoj kaj ankoraŭ nun postulas certaj logikemaj esperantistoj: sed ili ankaŭ ne estas derivaĵoj! Ili estas kunmetoj, kaj montras la saman sencelastecon, kiel la kunmetaĵoj de radikoj.

b) en unu okazo, al radiko verba estas almetita adjektiva formo:

perfid' *trahir* / *betray* / *verrathen* ktp.

perfid'a *perfide* / *perfidious* / *verrätherisch* ktp.

Tiun precizigon probable inspiris simpla pedagogia zorgo: atentigi, ke la nacilingvaj vortoj, kiuj diferencas en A kaj F laŭ la verba aŭ adjektiva kategorio, devas esti tradukataj en E per unu sola radiko. Konfirmon de mia supozo alportas la fakto, ke ĉe *plac'*, tute analoga radiko, sed kie la nacilingvaj tradukoj estas ankaŭ samradikaj, nenio estas indikita pri la adjektivo.

c) en unu okazo, al adjektiva radiko estas almetita substantiva formo:

f i r m' ferme, compacte / firm / fest ktp.

f i r m'o raison (de commerce), enseigne / firm / Firma¹ ktp.

La du vortoj estas ĉi tie tiel malproksimsencaj, ke oni volonte opinius tiun prezentadon nur lerta maniero kovri la fakton, ke ni havas ĉi tie du homonimojn: kvankam etimologie nur unu vorto,² ili aspektas al la hodiaŭa uzanto kiel du senrilataj ideoj.

ĉ) en 6 okazoj, al substantiva radiko estas almetita verba formo:

f u m' fumée / smoke / Rauch ktp.

f u m'i fumer / smoke, fume / rauchen ktp.

Same ĉe: *nom', sel', silab', stan', tambur'.*

Oni vidas, ke ĉi tie la verbo havas la apartan signifon: agi per (la objekto montrita de la radiko), kio cetere, en la okazo de *fumi*, lasas lokon al dusencaĵo (Vd pĝ 76, noto 1).

Ankaŭ al tiuj ekzemploj mi atribuas volonte pedagogian moti-
von: R kaj P uzas malsamajn radikojn ĉe la substantivo kaj ĉe la verbo de *fum'*, *nom'* kaj *stan'*; la F, A kaj D ĉe tiuj de *silab'*. Nur *sel'* kaj *tambur'* ne bezonis tian klarigon; por la unua, eble la mo-
tivo estis akcenti la diferencon de la formita verbo ĉe la du apudaj kaj sonsimilaj radikoj: *s e l'*, *sel'i*, sed *ŝ e l'*, *sen'ŝel'ig'i*? La indiko de *tambur'i* restas al mi enigma.

d) Fine, en 6 okazoj, al substantiva radiko estas almetita ad-
jektiva formo:

f u n e b r' deuil / funeral / Trauer ktp.

f u n e b r'a funèbre / funeral / Trauer-, Leichen- ktp.³

Same ĉe: *mister', parti', person', publik'*, al kio oni povas
aldoni: *okaz'a* montrita triavice sub *okaz'* kaj *okaz'o* (Vidu § a).

¹ La franca devus teksti: *ferme, compact* kaj *raison sociale, firme*; la angla: *a firm*.

² *Firmo* venas de la A (a) *firm*, pruntita de la mezepoka latina *firma*, kiu havis la sencon de (kon)firm(it)a kontrakto.

³ La angla parto devus esti: *mourning* kaj *funereal*.

Ĉar la paso de substantivo al adjektivo estas io tute natura kaj simpla, oni rajtas iom miri pri tiuj ekzemploj. Pedagogia zorgo povas klarigi la duopojn *okazo-okaza*, *partio-partia*: por la unua A kaj F, por la dua P kaj R uzas du malsamajn radikojn ĉe tiuj du kategorioj gramatikaj; pri *funebr'* nur la F, pri *mister'* kaj *publik'* nur D tion faras. Kaj *persono-persona* estas samradika en ĉiuj kvin lingvoj, kvankam P uzas, krom la slava adjektivo *osoba*, ankaŭ la latindevenan *persona*.

La instruo, kiun Z donis al ni per tiuj 29 tipoj de kunmetoj, estas duobla: unue, ni evitu la tenton rigardi ilin kiel derivaĵojn kaj apliki al ili regulojn kutimajn al naciaj lingvoj; due, li neniel celis la striktan rigidecon de filozofia lingvo, sed klare volis enlasi en la vortkunmetadon, kiam bezone, tian neregulecon, kiu estas la signo de ĉia vivaĵo.

Tia nereguleco estas aparte videbla ĉe tri paroj:

direkti — *direkto*

ruli — *rulo*

firma — *firmo*

al kiu mi volonte aldonus kvaran:

korekti — *korekta*,¹

ĉe kiuj, evidente por atingi al plia internacieco, li difinis al simpla kunmeto sencnuancon ne dedukteblan el la radikoj laŭ strikta logiko, kvankam temas pri po du ideoj sufiĉe parencaj inter si, por ne esti esprimindaj per du apartaj radikoj. Estas la okazo ripeti la saĝan admonon de la Majstro: «Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus» (*Lingvaj Respondoj*, 3a eld., pĝ 28).

¹ Vere, UV donas nur *korekt'* kun verba signifo; sed Z donis la formojn *korekta* kaj *korekteco* en siaj germanaj kaj rusa vortaroj.

LA ORIGINALA STRUKTURO DE ESPERANTO

I

LA VORTO

Altestimataj Sinjoroj!

Altestimata Sioril

Altestimat Seniores!

Estimatissime Seniores!

*En la hieraŭa ĵurnalo de via urbo mi legis,
En la hierala ĵurnalo di via urbo me lektis,
In li ĝeral ĵurnal de vor cité yo ha leet
In le ĵornal de heri de vostre urbe io ha legite*

*ke vi serĉas kontoriston, kiu krom la librotenado
ke vi serĉas kontoristo, qua ultre la registrago
que vu serĉa un contorist quel ultra li tenida de libres
que vos cerca un commisso que ultra le tenantie de libros*

*ankaŭ povus korespondi en la lingvo ĉeĥa kaj Esperanto.
anke povus korespondar en la lingvo ĉeka ed Ido.
anc vell posser corespondar in li lingue tĉeĉ e Occidental.
etiam poterea corespondar in le lingua ĉeĉ e Interlingua.*

*La deziratajn konojn mi posedas, kiom mi ŝcias,
La dezirata konocajn me posedas, segun quante me savas,
Li desirat konoscenties yo possede, tant quant yo save,
Io possede le desiderate cognoscentias, quante io sape,*

*kaj pro tio permesu al mi, simple kaj sen plua atendo,
e pro to permisez a me, simple e sen vartar pluse,
e pro to ples permeser me, simplicmen e sin plu atender,
e pro illo permette me, simplement e sin plus attender,*

*proponi miajn servojn por tiu ĉi ofico, se ankoraŭ vakanta.
proponar mea servi por ica ofico, se ankore vakanta.
proposir mi servicies por ti-ci oficie, si ancor vacant.
de proponer mi servicios pro iste officio, si ancora vacante.*

Je la unua lego de la ĉi-supraj linioj, ĉia laiko opinios, ke la kvar uzitaj lingvoj distingiĝas unu de la aliaj nur per malgravaj eksteraj trajtoj kaj efektive prezentas nur dialektojn de unu esence sama lingvo. Kaj tamen! Kiu akiris ian malpli supraĵan scion pri ĉiu el ili, tiu instinkte sentas, ke inter Esperanto kaj ĝiaj konkurantoj ekzistas ia profunda diferenco, aŭ, kiel iam skribis Grosjean-Maupin, ia «principa kontraŭeco»; ke jam de longe Esperanto havas sian «propran spiriton», dum la ceteraj restis ĝis nun ne animitaj vortokolektoj, kiuj ne pli konsistigas lingvon, ol brikamaso domon. «La lingvo internacia devus esti ... arta verko. Kio faras la artan verkon, kio distingas ĝin je la verkaĉo de artefaristo, estas la *stilo*. Interlingua ne havas stilon».¹ Tiun tre ĝustan opinion mi volonte etendus al Ido kaj Occidental, kvankam iliaj aŭtoroj neniam havis la saman sincerecon, kiel sro Gode. Sed en kio do precize konsistas tiu «spirito», tiu «stilo» — jen malmulte diskutita demando, malmulte esplorita kampo, en kiun mi volus fari kelkajn paŝojn.

La eble plej karakteriza trajto de Esperanto estas la nevarieco de ĝiaj elementoj, aŭ, se diri alie, la neekzisto de fleksia kaj deriva sistemo. Ĝi estas des pli karakteriza, ke ĝi estas absolute fremda al la eŭropaj lingvoj (kun la escepto de la finna kaj de la hungara, kiujn Zamenhof ne konis). Fleksioj ekzistas en la latinidaj same kiel en la ĝermanaj aŭ en la slavaj lingvoj. La pluralo de F *cheval* estas *chevaux* (ĉevalo/ĉevaloj), de A *foot* estas *feet* (piedo/piedoĵoj), de R *uĥo* estas *uŝi* (orelo/oreloj) ktp. La preterito de F *je prends* estas *je pris* (mi prenas/prenis), de D *ich esse* estas *ich asz* (mi manĝas/manĝis), de P *jade* estas *jechaten* (mi veturas/veturis) ktp.

Derivreguloj ekzistas ankaŭ same en ĉiuj tiuj lingvoj, kaj ankaŭ suferas pli ol unu escepton. En la itala, ekz-e, oni principe

¹ «Un lingua international deberea esser ... un obra de arte. Lo que face un obra de arte, lo que distingue le obra de arte ab le obrastra del artefactor es *stilo*. Interlingua non ha stilo». («Novas de IALA», Febr. 1953). Sro Gode, la kreinto de Interlingua, kiu mem tradukis tiun leteron de iu sro A. Fritzsche, trovas ĝin «stimulantissime» kaj deklaras, ke «le ultime base del pensar de Fritzsche es identic con le nostre», kvankam ties konkludoj diferencas iafaje de la liaj.

ne povas iri de substantivo al responda adverbo, sed devas trapasi tra la adjektivo: de *femmina* (klasike: virino) oni derivas unue *femminile* (virina) kaj nur poste *femminilmente* (virine); *voluttà* (volupto) havas por adverbo *voluttuosamente* (volupte) pere de la adjektivo *voluttuoso* (volupta, voluptema). Sed al *notte* (nokto) ne respondas ia adverbo, nur la esprimo *di notte* (nokte) ktp. En la germana, la uzo de la samsignifaj sufiksoj *-heit* kaj *-keit* (-eco) dependas interalie de la ĉeesto de antaŭa sufikso: oni diras *Mann* (viro), *Mannheit* (vireco), sed *Männlichkeit* (vireco); *rauh* (kruda), *Rauheit*, sed *Rauhigkeit* (krudeco) ktp. Tamen responde al *Weib* (virino) ekzistas nur *Weiblichkeit* (virineco), ne **Weibheit*; kaj por esprimi la econ de juna aŭ maljuna homo oni ne uzas sufiksojn, sed nur finaĵojn: *jung* (juna) *Jugend* (juneco), *alt* (maljuna) *Alter* (maljuneco) ktp. Same en la ĉeĥa oni uzas ordinare la adjektivan formon por almeti al ĝi la sufiksojn *-ctví* / *-ství* (= -ado, -isteco, -profesio), aŭ *-ost* (= -eco): *les* (arbaro), *lesní* (arbara), *lesnictví* (arbarkulturo); aŭ *zahradá* (ĝardeno), *zahradní* (ĝardena), *zahradnictví* (ĝardenkulturo): tamen *louka* (herbejo), *luční* (herbeja), sed *lukařství* (herbejkulturo); de *květina* (floro) devenas neregule *květinový* (flora) kaj *květinářství* (florkulturo); ankaŭ de la substantivo *země* (tero) oni formas nur *zemědělství* (terkulturo), ne atentante la adjektivan formon *zemní* (tera). Al *pevný* (solida) respondas *pevnost* (solideco), al *kapalný* (likva) respondas *kapalnost* (likveco), tamen el *plynný* (gasa) oni ne formas *plynnost*, sed *plynovitost* (gaseco) aŭ eĉ prefere uzas la vortparon *plynný stav* (gasa stato).¹

Sufiĉas kompari ĉiujn tiajn nacilingvaj formoj kun ilia esperanta traduko, por konstati, ke ĉi tie temas pri ia tute alia sistemo.

De kie Zamenhof ricevis do ideon pri ĝi? Por respondi tiun demandon, ni devas retroiri ĝis la embriaj jaroj de Esperanto. El la antaŭparolo al la *Unua Libro*, ni scias, ke Zamenhof analizis, kun mirinda praktika sento, la kondiĉojn de sukceso de Lingvo Internacia, kaj jene difinis la tri ĉefajn:

¹ La ĉeĥajn ekzemplojn afable kontrolis Dro Pumpř.

«(I) Ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.

(II) Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la komprenigado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne — t. e. ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank' al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikiĝoj.

(III) Trovi rimedon por venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan...»

Nur la dua problemo interesas nin ĉi tie: por ĝin solvi, Zamenhof turnis sin al tute ne atendita helpilo, t. e. al la tiel nomataj «sekretaj skriboj». Efektive, unu el la plej oportunaj manieroj de ĉifrado estas la uzo de «kodo», t. e. de vortaro tiel aranĝita, ke al ĉiu vorto, gramatika vorteto aŭ eĉ tuta esprimo respondas aparta nombro. Tiajn kodojn oni nun ĝenerale uzadas por la telegrafaj korespondoj inter bankoj,¹ hoteloj ktp. Por klarigi la aferon, ni supozu, ke la posedanto de unu tia kodo ricevas jenan telegramon:

20.212.09 110.01.04 899.00.04 961.02 141 538

Li havos nenion alian por fari, ol malfermi sian kodon je la donitaj nombroj kaj legi ilian signifon, ekz-e:

- | | |
|----|---|
| 00 | Indice du substantif / Mark of a noun / Merkmal eines Hauptworts |
| 01 | Indice de l'adjectif / Mark of an adjective / Merkmal eines Eigenschaftsworts |
| 02 | Indice de l'adverbe / Mark of an adverb / Merkmal eines Adverbs |
| 03 | Indice du pluriel / Mark of the plural / Merkmal des Plurals |
| 04 | Indice du complément direct / Mark of the objective case / Merkmal des Akkusativs |
| 09 | Indice de l'impératif / Mark of the imperative / Merkmal des Imperativs |

¹ Ĉu estos maldiskretaĵo de mia flanko, se mi sciigos, ke nia fama kanzonisto kaj romanisto Raymond Schwartz, kiu pasigas sian perdotan tempon malantaŭ mahagona skribotablo en potenca banko, elpensis unu tian kodon pli oportunan kaj monŝparan, ol la ĝis nun uzataj?

- 20 Marque le contraire du mot suivant / Denotes the opposite of the following
 word / Bezeichnet den Gegensatz des folgenden Wortes.
- 110 je, moi / I / ich
- 141 à, vers / to / nach, zu
- 212 louer, réserver / to reserve; to book / bestellen
- 538 New York
- 899 aller (en auto etc.), voyager / to go (by rail etc.), to travel / fahren
- 961 voler (aviation) / to fly (aviation) / fliegen (Flugwesen).

kaj li tuj kapablos, indiferente ĉu li estas Franco, Anglo aŭ Germano, traduki klare:

Annulez mon voyage par avion pour New York
Cancel my airtrip to New York
Abbestellt meine Luftfahrt nach New York.

Jen la sistemo, kiu donis al Zamenhof la ideon konstrui sian lingvon tiamaniere, ke oni ne bezonas ĝin lerni por povi traduki el ĝi. Se efektive oni anstataŭigas ĉiun nombron de tia kodo per unu fonetika elemento, la sinsekvo de tiuj elementoj prezentos frazon tuj kompreneblan por ĉiu homo, kiu posedos la respondan kodon kun klarigoj en sia lingvo. La fonetikaj elementoj povas principe esti tute arbitraj — kaj en tia okazo oni ricevas ian specon de pazilalio.¹ Sed la genia eltrovo de Zamenhof estis kombini la kodsistemon kun la gramatika analizo de la vortoj. Se oni, en la supozita kodo, anstataŭigus la nombrojn de 00 ĝis 19 per finaĵoj, la nombrojn de 20 ĝis 99 per afiksoj kaj la triciferajn nombrojn per radikoj, laŭ jena ekzemplo:

00	anstataŭota de	o	110	anstataŭota de	mi
01		a	141		al
02		e	212		mend
03		j	538		Novjork
04		n	899		vetur
09		u	961		flug
20		mal-			

¹ Vidu *Fundamenta Krestomatio*, 17a eld., pĝ 252.

oni simple ricevos eltiraĵon el nia *Universala Vortaro*, tiel ke oni povos proponi al la uzantoj de tia kodo, bankistoj aŭ hotelmastroj, uzi anstataŭ la supre montrita serio da ciferoj jenan esp-an frazon:

Mal/mend/u mi/a/n flug/vetur/o/n al Novjork/o

kiu estos tiel facile komprenebla, kaj eĉ pli rapide, ol la ciferaĵo, kaj kies sendo kostos al ili malpli da mono (en la okazo, kompreneble, kiam la sekreto ne estas necesa). Aliflanke, tiuj, kiuj rigardos tiun frazon ne kiel kodaĵon, sed kiel lingvaĵon, suspektos nenion pri la aparta konstruo de la lingvo kaj kredos retrovi en ĝi vortojn tute simile aranĝitajn, kiel tiuj de ia ajn nacia lingvo.¹

Oni do povas diri, ke la solvo, kiun Zamenhof donis al tiu sia dua problemo, estis perfekta; sed tia solvo, evidente, submetis la elekton de la vortoj al tri nepraj kondiĉoj:

- 1) ke ĉiu lingva elemento estu senŝanĝa kaj memstara;
- 2) ke ĉiu elemento estu nekonfuzebla kun iu ajn alia, forme aŭ sence;

- 3) ke ĉiu elemento povu kuniĝi, laŭbezone, kun ĉiu ajn alia.

Tri kondiĉoj, kiuj profunde influis la konsiston de la lingvo Esperanto, kaj kies sekvojn eble ni ankoraŭ ne rimarkis ĉiujn.

* * *

I. Ke ĉiu elemento estu senŝanĝa kaj memstara — same kiel ĉiu kodnumero — tio estis klare precizigita de Zamenhof: «li [la lernanto] eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti

¹ Tiu iluzio estas tiel forta, ke, ankoraŭ en 1907, Dro Louis Couturat komencis sian *Etude sur la Dérivation dans la Langue Internationale*, prezentotan al la membroj de la fama «Delegitaro» per jena frazo: «Le système de dérivation de l'Espéranto est sans contredit le trait le plus caractéristique de cette langue» («la derivsistemo de Esperanto estas sendiskute la plej karakteriza trajto de tiu lingvo»)! Li, kiu pretendis plibonigi Esperanton, verŝajne neniam legis la tradukon de la *Unua Libro* en la *Fundamenta Krestomatio* — aŭ neniam ĝin komprenis.

uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto».¹ Kaj li eĉ, en la analizo de la vorto *fratino*, ne hezitas doni jenan difinon: «*o* = kio estas, ekzistas».

La lingvaj aplikoj de tiu unua principo montriĝis nur iom post iom, kaj en iel hazarda maniero:

a) Oni estus pensinta, ekz-e, ke el la ĵus citita difino la unuaj esperantistoj tirus la konkludon, ke estas eble uzi la finaĵojn memstare. Kaj efektive en 1890 Grabowski skribas: «Tial mi nun devas sidi kaj deziri, ke l'o plej malbona fariĝu, por ke mi ricevu mian monon?»² Sed tiu ekzemplo ne estis imitita, kaj, por traduki la neŭtran adjektivon (G τὸ καλόν, D *das Schöne*, F *le beau*, H *lo bello* ktp), oni preferis almeti la vokalvorton poste kaj diri *la belo* anstataŭ *l'o bela*. Nur en kunmetitaj vortoj oni trovas la finaĵojn uzatajn memstare: *evorto* (= adverbo) jam en *Dua Libro* (1888), *as-tempo* (= prezenco), *i-modo* (= infinitivo) ktp.

b) La memstara uzo de la afiksoj multe pli disvastiĝis, sed ankaŭ nur grade. En la *Unua Libro* (1887) ni trovas nur unu: *eble*; en la *Dua Libro*: *eblo*, *indo* (= valoro), *edzo* kaj *ree*; en la *Aldono al la Dua Libro* (1888): *ano*, *dise*. Samjare, en la *Neĝa Blovado*, Grabowski uzas unua: *emo*, *eksa*. En «La Esperantisto» de 1890-1892, Zamenhof plu riskas: *eco*, *estro*, *igi*, *eta*, *ingo*. En 1893, Kofman iniciatas: *ino*. En la *Ekzercaro* de 1894, ni trovas: *aro*, kaj en la samjara *Hamleto*: *ilo*.

Nur en 1896, en sia fragmenta traduko de *Faust*, Kofman memstarigas: *iĝi*. En alia loko de la sama traduko, li provas adverban uzon de prefikso:

Ho kiu la ĥaoson re ordigas
Kaj metas ritmon en la partojn re?

Kaj oni devos atendi ĝis 1908 por trovi en la zamenhofa traduko de la *Psalmaro*: *ejo*! En la sekvantaj libroj, oni renkontas:

¹ *Fundamenta Krestomatio*, 17a eldono, pĝ 235.

² *Kondukanto Internacia de l' Interparolado*, Nürnberg. «Tiu ĉi verko estas trarigardita de D-ro Esperanto».

aĵo, ido; en lia traduko de Andersen: *ulo*. A. Fiŝer siaflanke iniciatis en 1911: *eki* kaj *adi*, en 1913: *ega*.

Sed Z neniam volis, almenaŭ laŭ mia scio, uzi memstare: *adi*, *ega*, *ero*, *iĝi*, *ujo*, *gea*, *praa*. Nur en 1923 Setälä enmetos: *ismo* en si-an vortaron; *aĉa* datumas de 1924 (Kalocsay), *umo* de 1930 (Baghy).

c) La uzado de afikso, adverbo aŭ prepozicio kiel radiko de kunmetitaĵo komenĉiĝis jam de la *Unua Libro*, kun formoj kiel: *aliĝi* (sed mi ne renkontis *aliĝilo* antaŭ 1906); la *Dua Libro* alportis: *eksiĝi*, *eksedziĝi*; la unuaj jaroj de «La Esperantisto»: *senindeco*, *idaro*, *ilaro*, *emigi* ktp.

Tamen la uzado de sufikso kiel unua elemento de substantiva kunmetaĵo ne aperis antaŭ 1930 en la laborista gazetaro: *etburĝo*, *etindustrio*. Kurioze, ke samo ĝis nun ne okazis kun la malvorto: *egindustrio* estus tamen tiel bezona kaj klara, kiel ĝia kontraŭo.

ĉ) La senfinaĵa uzado de adjektiva, substantiva aŭ verba radiko kiel speco de interjekcio montriĝis pli malfrue kaj pli malofte. Ĝi komenciĝis en 1898¹, sub la plumo de Zamenhof, per la esprimo *dank' al* anstataŭanta la ĝistiaman *danke ~on*: en ĝi la apostrofo ne povas logike anstataŭi o-finaĵon, laŭ la regulo: ni devas do rekoni tie la nudan radikon *dank*. Analoge estas la ekkrio, trovebla jam en 1888 sub la plumo de Grabowski: *Glor' al Dio*. En tiuj tempoj oni renkontis ankaŭ *foj'* en la senco de *unu fojon*, sub la plumo de Leo Belmont:

*Ke povu mi foj' je eterne dormi!*¹

poste sub tiu de Devjatnin:

Jen foj' ne dormis mi...²

kaj pli poste ankoraŭ sub tiu de Grabowski:

Foj' en la arbaron / Mi sole ekiris...³

¹ *Dua Libro*. Reprodukta en FK pĝ 314, kun la korekto: *jam*.

² FK pĝ 319: ne korektita.

³ *Antologio Internacia*, 1904, pĝ 173; la traduko ŝajnas pli frua ol la dato de publikigo.

Estas bedaŭrinde, ke niaj poetoj forgesis tiun simplan kaj oportunan dirmanieron.

Sed de tiaj provoj restas nur (krom la esprimo *dank' al*) la interjekcioj *Halt'!*, *Help'!*, *Krak'!* ktp, uzitaj de Zamenhof en la *Fabeloj de Andersen*, kaj en kiuj cetere la apostrofo ŝajnas superflua.

d) Oni eble demandos sin, kial la disvolviĝo de la ĉi-supre menciitaj ebloj, entenataj en la konstruo mem de la lingvo, estis tiel longe bremsitaj, aŭ eĉ tute forbaritaj. La kaŭzo estas simple, ke ili ĉiuj estas fremdaj al la eŭropaj nacilingvoj — kaj sekve Zamenhof en la komenco ne volis ilin ekspluati, por ne fortimigi la lernantojn, kaj, en la posta periodo, la okcidentaj esperantistoj evitis aŭ kondamnis tiajn formojn sub la akuzo de «volapükismo» — dum efektive tiaj estas absolute ne troveblaj en Volapük. Sed oni devas konfesi, ke la pli kaj pli ofta uzado de tiaj formoj kreis en nia lingvo ian kolekton da duoblaĵoj, el kiuj unu serio prezentas purajn esperantismojn, kaj la alia la internaciajn vortojn:

<i>o-vorto</i>	<i>substantivo</i>
<i>aĵo</i>	<i>afero, objekto</i>
<i>ano</i>	<i>membro</i>
<i>aro</i>	<i>trupo, bando</i>
<i>eco</i>	<i>kvalito</i>
<i>ejo</i>	<i>loko</i>
<i>eki</i>	<i>komenci</i>
<i>emo</i>	<i>inklino</i>
<i>estro</i>	<i>ĉefo</i>
<i>eta</i>	<i>malgranda</i>
<i>ido</i>	<i>filo</i>
<i>ilo</i>	<i>instrumento</i>
<i>indo</i>	<i>valoro Ktp¹</i>

* * *

¹ Verdire, oni kelkfoje provis meti distingon inter kelkaj el tiuj duoblaĵoj: Zamenhof uzadis *kvalito* nur kun la senco de grado de boneco; W. Bailey konsentis al *instrumento* nur la signifon de muzikilo (kontraŭ la uzado de Zamenhof mem). Sed tiaj senclimigoj ne estas eblaj ĉe la uzado de tiel internaciaj vortoj.

II. La dua principo, ke nenia lingvoelemento povu konfuziĝi kun alia, forme aŭ sence, havis kiel rezulton:

A. Ke Z devis elekti el la naciaj lingvoj nur tiajn afiksojn, kiuj ne riskis kolizii kun la aliaj elementoj de lia lingvo. Ekz-e, jam elektinte en 1882 la sufikson *-i-* (en la signifo de la nuna *-uj-*), li devis rezigni je ĝi, kiam li decidis, ke la infinitiva finaĵo estos tiu sama vokalo *-i*. Mi jam diris, ke li puŝis tiel malproksimen tiun zorgon, ke, en la baza vortareto de la *Unua Libro*, li ne enlasis sen modifo eĉ unu radikon, kiu finiĝus per silabo simila al la ina sufikso: tial la *L asinus* fariĝis *azen*, la *F chagriner* — *ĉagren*, la *I giardino* — *ĝarden*, la *F courtine* — *kurten*, la *F coussin* — *kusen*, la *F cousin* — *kuz*, la *F magasin* — *magazen*, la *F matin* — *maten*.

Kurioze estas, ke li tute ne zorgis pri la ceteraj sufiksoj,¹ kaj tien enmetis senŝanĝe la radikojn: *danĝer*, *erar*, *esper*, *ĝentil*, *haring*, *humil*, *insul*, *invit*, *kajer*, *kalkul*, *koleg*, *koler*, *konsil*, *kuler*, *leter*, *liber*, *liter*, *makul*, *merit*, *milit*, *mizer*, *moder*, *monat*, *najbar*, *nebul*, *ofer*, *okul*, *ordinar*, *paper*, *parker*, *postul*, *prepar*, *regul*, *ripet*, *river*, *sever*, *simil*, *societ*, *somer*, *spegul*, *subit*, *sufer*, *suker*, *super*, *tabul*, *teler*, *trankvil*, *util*, *vesper*, *veter* — lasante tiele bonan materialon al la estontaj Schwartzoj.

B. Ke Zamenhof devis:

a) Elekti el la pluraj signifoj, kiujn ordinare havas la naciaj afiksoj, kaj severe limigi ĉiun je unu sola. Ekz-e la *F -age* signifas ja *-aĵo* en *laitage* (laktaĵo), sed ĝi signifas *-aro* en *feuillage* (foliaro), *-ado* en *brigandage* (rabado), *-eco* en *voisinage* (najbareco) ktp. La *F -ade* signifas ja *-ado* en *glissade* (glitado), sed *-aro* en *colonade* (kolonaro), *-aĵo* en *grillade* (kradrostaĵo), *-eto* en *bourgade* (urbeto), *-aĉo* en *pantalonnade* (burleskaĉo) ktp.

Tamen li enlasis unu escepton: la sufikso *-uj-* kun siaj tri signifoj: objekta, arba kaj landa. La akumulado, tiel kontraŭa al la spirito de la lingvo, kaj tiel ĝena (en *fruktujo*, *kafujo*, ĉu temas

¹ La sola escepto estas: *F cigarette* — *cigared*. Oni rekonas la zorgon de la tabakamanto.

pri la unua, dua aŭ tria signifo?), estis eble proponita al Zamenhof de la sama diverssenceco de la franca sufikso *-ier*: *sucrier* (suker-ujo), *pommier* (pomujo) ktp; sed se tiu sufikso povas ankaŭ signifi lokon: *grenier* (grenejo), *charnier* (kadavrejo) ktp, ĝi neniam estas uzata por landoj.

b) Elekti el pluraj samsignifaj sufiksoj, kiujn prezentas ordinare la naciaj lingvoj. Ekz-e, en F, la homo, kiu faras agon kutime aŭ metie, estas montrata per la sufiksoj *-eur* (*chauffeur* 'hejtisto'), *-ier* (*chapelier* 'ĉapelisto'), *-eron* (*forgeron* 'forĝisto'), *-aire* (*mousquetaire* 'muskedisto'), *-ateur* (*explorateur*, esploristo'), *-ien* (*musicien* 'muzikisto'), *-iste* (*journaliste* 'ĵurnalisto') ktp.

C. La plej evidenta rezulto de tiu ĉi dua principo estas la absoluta simpleco kaj regularco de la vortfarado, kio akre kontrastas kun la varieco kaj neregularco de la derivado en la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Oni komparu nur jenajn kelkajn ekzemplojn:

franca	angla	germana	rusa
1 pain : boulanger	bread : baker	Brot : Bäcker	ĥlĵeb : buloĉnik
2 livre : libraire	book : bookseller	Buch : Buchhändler	kniga:knigoprodavec
3 fiacre : cocher	cab : cabman	Droschke : Kutscher	droĵki : izvoŝĉik
4 dent : dentiste	tooth : dentist	Zahn : Zahnartz	zub : dantist
5 porte : concierge	door : doorkeeper	Tür : Pförtner	dver' : dvornik
6 soulier : cordonnier	shoe : cobbler	Schuh : Schuster	baŝmak : sapoĵnik
7 service : domestique	service : servant	Bedienung : Diener	sluĵba : sluga
8 barque : batelier	boat : boatman	Boot : Schiffer	lodka : lodoĉnik

kun la respondaj esperantaj:

- 1 *pano* : *panisto*
- 2 *libro* : *libristo*
- 3 *fakro* : *fakristo*
- 4 *dento* : *dentisto*
- 5 *pordo* : *pordisto*
- 6 *ŝuo* : *ŝuisto*
- 7 *servo* : *servisto*
- 8 *boato* : *boatisto*

kaj oni tuj sentos la profundan diferencon inter la spirito de tiuj lingvoj kaj de Esperanto. Diferenco, kiu kaŭzas, ke al multaj okcidentaj kleruloj Esperanto aspektas monotone kaj fremde:

«Lingvo absolute regula, kiel Esperanto aŭ Ido, ŝokas la intiman senton de ĉiuj parolantoj de hindeŭropa lingvo. Ekzistas regulaj lingvoj, la finna, aŭ la turka, ekz-e. Sed en la hindeŭropaj lingvoj, restas ĉie granda nombro da anomalioj, dank' al kiuj ĉiu grava vorto, ĉiu kutima dirmaniero havas sian indiduecon, sian propran resonon. La homoj, kiuj skribas la anglan aŭ la francan per la plej regulaj formoj, estas ne verkistoj; *émouvoir* havas poezian valoron, *émotionner* estas nature malpoezia. Por ĉiu, kiu havas la ĝustan komprenon de la grandaj literaturaj lingvoj de Okcident-Eŭropo, literatura teksto en Esperanto estas ŝoka, jam de la unua rigardo».¹ La eminenta lingvisto tute pravás. Sed la demando ĝuste estas —kaj tion mi senĉese rediros—, ĉu oni rajtas halti ĉe *la unua rigardo* kaj formuli definitivan juĝon post ĝi, aŭ ĉu oni ne devus malfremdiĝi kaj intimiĝi kun ia lingvo, antaŭ ol decidi pri ĝia valoro. Cetere tiaj «lingvosentoj» estas ĉiam iom artefaritaj kaj variemaj. Oni scias ekz-e, kun kia zorgego la modernaj francaj stilistoj evitas la ripeton de la sama vorto en mallonga teksto: nu, tian zorgon absolute ne konis la Latinoj, kaj nek Vergilio, nek Cicerono iam evitis tion, kion ni riproĉas, kiel gravan difekton, eĉ al niaj dekkvinjaraj lernantoj.

Aliflanke, oni ne forgesu, ke temas ĉi tie pri lingvo internacia, pri kiu ĉiu popolo havas sian apartan vidpunkton, siajn apartajn ambiciojn. La esperanta vortfarado ŝajnas terure mekanika al Franco aŭ al Anglo, sed ne la saman impreson jam ricevos Italo aŭ Hispano, kies lingvoj estas pli regulemaj, kaj eĉ ankoraŭ malpli Turko, Finno aŭ Hungaro: ateste, jena tabelo, kontrasta al la antaŭa:

¹ ANTONO MEILLET, *Les langues dans l'Europe Nouvelle*, dua eldono, 1928, pĝ 282. La aludo celas la du francajn verbojn respondajn al la substantivo *emotion*. Ni cetere havas ian similan nuancon inter *kortuși* kaj *emocii*.

itala	hispana	turka ¹
1 pane : fornaio	pan : panadero	ekmek : ekmeĉi
2 libro : libraio	libro : librero	kitap : kitabi
3 fiacchere : fiaccheraio	coche : cochero	araba : arabai
4 dente : <i>dentista</i>	diente : <i>dentista</i>	diş : dişi
5 porta : portinaio	puerta : portero	kapu : kapuci
6 calzatura : calzolaio	zapato : zapatero	kondura : konduraci
7 servizio : <i>servitore</i>	servicio : <i>servidor</i>	hizmet : hizmetci
8 barca : barcaiolo	barca : barquero	kaik : kaiki

Kaj, se oni atentis pri la kritikindaĵoj, kial aŭskulti nur la eŭropanojn? La Japanoj, kiuj disponas en sia lingvo pli ol dek diversajn manierojn sugesti la personojn de la parolo, laŭ la klaso, la sekso, la aĝo, la profesio, la rango ktp de la parolanto kaj de la alparolato, opinias, ke la ĉiama ripetado de niaj *mi* kaj *vi* prezentas ion strikte kaj eĉ ridinde regulan — ĝis ili akiris pli profundan scion kaj senton pri nia lingvo. Kaj mi estas konvinkita, ke ankaŭ Ĉino aŭ Arabo trovis, je la unua rigardo, apartaĵojn de Esperanto, kiuj «ŝokus» lian lingvan senton, sed kiuj kontraŭe ŝajnas tute laŭdindaj al la parizaj aŭ londonaj kleruloj.

* * *

III. La tria principo, ke ĉiu elemento povu laŭbezone kuniĝi kun ĉiu alia, havis ankaŭ tre gravajn sekvojn, forme kaj sence.

a) Tio devigis Zamenhof doni al ĉiuj sufiksoj unu saman fonetikan konsiston: vokalo + konsonanto(j), tiel ke ili povu facile almetiĝi al iu ajn radiko. Tio sola malhelpis lin, ekz-e, alpreni la plej internaciajn sufiksojn de agado: *-ment* kaj *-tion*, kiuj tute ne kongruis kun la skemo; nek la sufiksojn de aganto *-atoro*, aŭ de abstrakteco *-erie*, *-itate*, kies plursilabeco ankaŭ ne estis akceptebla en lia sistemo. La sekvoj de tiu ĉi principo (kuniĝante kun tiu de la dua, II B.) estis la difinado de aparta sistemo da afiksoj kaj sekve

¹ En la turka, c = ĝ; cetere ni devis uzi ŝ anstataŭ s kun ^usoĥhoketo, kaj ĭ anstataŭ i senpunkta.

la konstruado de propre esperantaj kunmetaĵoj, kiuj ne koincidas kun la tiel nomataj «fremdaj» vortoj.¹ Kaj ĉar tamen tiuj «fremdvortoj» konsistigas efektive la internacian vorttrezoron, Z devis, per ia elturniĝo, allasi ilin en sian lingvon: de tio venas la fama regulo 15a, kiu donas al ili la civitraĵton, aŭtomate. Sed la neevitebla rezulto estis la starigo de longa serio da duoblaĵoj, kiuj montriĝis jam en la konata frazo de la *Dua Libro* (1888): «Mi ne volas esti kreinto de l' lingvo, mi volas nur esti iniciatoro».² Kaj la nombro ne ĉesis kreski: mi citos nur tiujn, la plej frapajn, sub la litero A, iam uzatajn de Zamenhof: *abstinenco* (*abstinado*), *administracio* (*administrejo*), *administrato* (*administranto*), *aeronaŭtiko* (*aerveturado*), *aglutini* (*kunglui*), *agrikulturo* (*kampokultivado*), *agronomio* (*kultivscienco*), *alfabeto* (*aboco*), *akumulatoro* (*akumulilo*), *ambulatorio* (*promenhalo*), *anonima* (*sennoma*), *antipatio* (*malsimpatio*), *aperturo* (*malfermaĵo*), *arkipelago* (*insularo*), *armeo* (*militistaro*), *aspekti* (*elrigardi*), *astronomio* (*astroscienco*), *aŭtonomio* (*memregado*) ktp, ktp.

Tiu ekzisto de duoblaj formoj ofte elvokis protestojn, kaj kelkaj bonaj esperantistoj indigne kondamnas la «pseŭdosufiksojn»: la Edinburgha Vortaro, ekz-e, ilin sisteme forpelis. Mi ne opiniis, ke tio estas tre prudenta sinteno. Ni devas konscii, ke ili rezultas el la konstruo mem de nia lingvo, kiel mi ĉi-supre demonstris. Pro la facila komprenebleco en internaciaj sciencaj konferencoj aŭ teknikaj revuoj, estus tre domaĝe rezigni je la konsiderinda avantaĝo, kiun donas al ni la fundamenta regulo n° 15a. *Asembleo*, *ekzekucio*, *embriologio*, *plantopatologio*, *precipitato*, *prototipo*, *uzurpatoro*, *variacio* ktp, ktp estas partoj de nia kultura heredaĵo, kiujn neniu interlingvisto rajtus forĵeti.

Kelkaj eble demandos, kial do E, same kiel faras Occidental aŭ Interlingua, ne povus formi mem tiajn derivaĵojn dank' al la

¹ Tio estas ĝuste germanismo: ĉar nur al la Germanoj (kaj, post ili, al Rusoj ktp) ili aspektas «fremdaj». Oni pli ĝuste nomus ilin «pruntovortoj» aŭ «internaciismoj».

² Francoj certe demandos sin, kial ne egale *kreatoro* kaj *iniciinto*: nur ĉar *iniciatoro* estas «fremdvorto» en la germana kaj rusa, dum tiuj lingvoj esprimas la ideon de kreinto per propraj derivaĵoj.

alprenado de bone elektitaj internaciaj afiksoj. Sed ĝuste tion Esperanto ne povas fari, pro principaj motivoj: unue, ni ĵus vidis, ke forme kaj sence tiaj pseŭdo-afiksoj ne kongruas kun la spirito de nia lingvo; krome, kaj precipe, la uzado de tiuj afiksoj nepre postulus, ke la pli multaj verbaj radikoj havu du aŭ tri diversajn formojn, kio estas tute kontraŭa al la «kiel eble plej granda simpleco», fundamente celita de Zamenhof.

Al la sola radiko *kompren*, el kiu ni formas *kompreni* kaj *kompreno*, Occidental devis substitui jen *comprend/* por ricevi de tie la infinitivon *comprender*, jen *comprens/*, por ricevi de tie la substantivon *comprension*. Al nia sola *star*, ĝi kontraŭmetas jen *statu/er* (= *star/igi*), jen *re/stitu/er* (*re/star/igi*). Same faras Interlingua, kun la samaj verboj, aŭ kun la jenaj: *dirig/er* (*direkt/i*), *dirig/ibile* (*direkt/ebla*), *direct/ion* (*direktado*) — aŭ *ex/haur/ir* (*el/ĉerp/i*), *ex/haust/ion* (*el/ĉerp/ado*, aŭ: */iĝo*, oni ne povas scii), ktp.

Sed tiu volonta kaj konscia rezigno de Zamenhof pri la alprenado de la internaciaj afiksoj havis ankaŭ siajn profitojn. Ĉar, se oni eniras tian vojon, kiel Occidental aŭ Interlingua, oni ne plu povas halti sur ĝi: kaj tamen ne mankas internaciaj vortoj, kies signifo ne respondas al tiu de la konsistigaj elementoj. Occidental, ekz-e, pretendas komponi, per siaj propraj vortfariloj, la vortojn *multiplicativ*, *providentie* aŭ *revolution*; sed, se ni serĉas la signifon de tiuj elementoj en la *Radicarium directiv* de ĝia kreinto, ni trovas, ke la kunmetaĵoj devus signifi:

multi/plic/at/iv = multo/fald/it/ema (kaj ne: multiplika)
pro/vid/ent/ie = pro/vid/ant/eco (kaj ne: providenco)
re/volut/ion = re/volv/ado ... (kaj ne: revolucio) ...

La afero estus la sama kun Interlingua, eĉ ankoraŭ pli grave pro la etimologia tendenco de tiu lingvo. Laŭ la *Interlingua-Dictionary* de sro Gode, la vortoj *concupinage*, *detestar*, *dismantellamento*, *parasitismo* aŭ *spicilegio* malkomponiĝas jene:

con/cub/in/age = kun/kuŝ/aĵ/ado (anstataŭ: konkubineco)
de/test/ar = de/atest/i (anst. malami)
dis/mantell/amento = dis/mantel/ado (anst. senremparigo)

para/sit/ismo = apud/nutr/ismo (anst. paraziteco)
spici/leg/io = spiko/leg/? (anst. legelektaĵoj).

Ĉu ne pli simple kaj pli honeste estas alpreni tiujn vortojn kiel tutaĵojn, same kiel faras Esperanto, ol fanfaroni pri etimologia afiksosistemo, kiu ne kapablas doni la ĝustan sencon de la kunmetaĵoj?

Alia tre grava ĝeno, ĉe tiuj internaciaj vortoj: ili estas, fojfoje, internaciaj nur laŭ sia formo, ne laŭ sia senco — kaj liveras al la senspertuloj riĉan kolekton da *faux-amis*. Oni nur pensu pri la signifoj de A *ejaculation* (ekkrio) kaj F *éjaculation* (spermelfeto), de ~~A~~ *Expectoration* (korelverŝiĝo) kaj F *expectoration* (tuskraĉo), de A *convict* (punlaborulo) kaj R *konvikt* (kunvivejo), de R *kabala* (hipoteko) kaj I *cabala* (kabalo), de H *bizarro* (kuraĝa) kaj I *bizarro* (strangaspekta) ktp. Nu, tiu konsiderinda danĝero de miskompreno estas evitata en E ĝuste per la konstanta ebleco kontroli la signifon de internacia vorto per ĝia propre esperanta respondaĵo. Ĉar ni kutimas, ekz-e, uzi la ekvivalentojn «malsanulejo = hospitalo», ni neniam riskos doni al tiu ĉi lasta la svedan signifon de «frenezulejo». Same pri la paro «eventuale = laŭokaze», kio malhelpas nin uzi la unuan vorton kun la angla signifo de «finfine» ktp. Kaj inverse, por tiuj parolantoj, kiuj aŭ ne konas en sia nacilingvo la internacian vorton, aŭ ne bone scias ĝian precizan sencon, la ekzisto de la responda esperanta kunmeto donas ĉiam al ili rimedon esprimi sian penson per pli simpla vojo, sed tiel ĝuste kaj tiel same kompreneble.

b) Alia sekvo de la tria principo estis, ke al ĉia radiko oni povas almeti ĉian gramatikan finaĵon. Sed, se la rilatoj inter substantivo kaj adjektivo, inter adjektivo kaj adverbo, inter verbo kaj agnoma substantivo estas simplaj kaj facile kompreneblaj, male la rilatoj inter verbo kaj substantivo aŭ adjektivo estas ne tiel unuavide klaraj. De *patro* ni pasas senĝene al *patra* kaj al *patre*; sed kion pri *patri*? Ĉu ĝi signifos «esti patro», «agi kiel patro», «havi la aŭtoritaton de patro»? De *blanka* ni facile devenigas *blanke* kaj *blanko*; sed kia estas la senco de *blanki*?

Nu, tiu demando pri la sensufiksa verbigo de substantivaj aŭ adjektivaj radikoj ŝajne ne kaŭzis zorgojn al Zamenhof en la unuaj

jaroj de la lingvo. En «La Esperantisto» de 1891 ni legas *sapi*, en 1892 *ŝipi*; en la *Granda Germana-Esperanta Vortaro* de 1894: *digi, kolori, limi, ori, violoni* ktp. En *Hamleto* (samjare) ni havas: *makuli, funebri, frukti, sulki, spici* ktp — kaj ĉiuj tiuj verboj devenas de substantivaj radikoj. En la sama *Hamleto* ni legas:

*Spirito ĉiu, kie ajn li vagas,
Rapidas hejmen . . .*

. . . lango

La ĵurojn ne avaras.

Atenti estas mia sankta ŝuldo . . .

Li similas al tio . . .

Ne kuraĝu ludi! Ktp.

— kaj la reliefigitaj verboj ĉiuj devenas de adjektivaj radikoj.

En «Lingvo Internacia» de 1896 (nroj 6-7 kaj 12), A. Kofman, kiu estis tiam unu el la plej lertaj tradukistoj kaj versistoj, verkis du artikolojn pri tiu temo, en kiuj li penas «eltrovi la internaciajn leĝojn de vortfarado»; li citas abunde ekzemplojn de «verbigo de substantivoj», limigante sin je la nomoj de personoj, kiuj, laŭ lia opinio, donas verbojn kun la signifo 'plenumi la funkcion, la rolon de . . .': *friponi, tajlori, ĉarlatani, monarĥi, oficiri, sinjori* ktp. Pri la adjektivaj radikoj, li konkludas, ke ilia verbigo donas la sencon de stato: *nigri* = 'esti (montri sin) nigra'; same: *aroganti, avidi, bravi, diligenti, miopi, seki, sobri, verdi* ktp.

Sed en la sama gazeto, en la nro 7 de 1898, L. de Beaufront akre kontraŭbatalas tiun uzadon: «*Ori*: tia verbo ne povas ekzisti, tiel same kiel ne povas ekzisti la verboj *arĝenti, blanki, ruĝi* ktp». Kaj lia argumento (kiun reuzos kelkaj nuntempaj gramatikemuloj) estas, ke *ori* signifus 'esti oro', kio estas absurda, kaj *blanki* — 'esti blanka', kio estas neeble, ĉar *i* ne egalas *esti*. «La vero estas, ke la verbaj finiĝoj signas nur la modon aŭ la tempon por la elementoj esperantaj, al kiuj oni alligas ilin, sed tute ne povus doni per si mem al ia vorto la signifon de verbo stata, aktiva aŭ pasiva . . .» Oni rekonis la sekan tonon de la severa pedagogo, kiu ne hezitas frapi sur la fingrojn eĉ al Zamenhof mem, kaj la malvaste logika

rezono, kiu traktas la vortojn, kvazaŭ ili estus konkretaj solidoj, sen elasteco, sen vivebleco.

Probable al tiu rigida sinteno de Beaufront¹ oni ŝuldas la perfekte senutilan enmeton de la sufikso *-um-* en *akvumi*, *orumi*, *sapumi* (kion ajn alian oni povus fari per akvo, oro aŭ sapo, ol akvi, ori kaj sapi?). Sed liaj kritikoj ne malhelpis Zamenhof plu uzi la samajn verbigojn en ĉiuj siaj sekvintaj verkoj: en la *Biblio*, ekz-e, ni trovas ankoraŭ: *frukti*, *fulmi*, *kalki*, *nesti*, *nokti*, *pastri*, *vintri*, *malvirt*i, ĉiujn tiritajn el substantivaj radikoj; kaj de adjektivaj, mi kolektis el lia verkaro almenaŭ jenajn verbigojn: *avari*, *ĉarmi*, *malĉasti*, *diversi*, *egali*, *favori*, *fervori*, *fieri*, *furiozi*, *gaji*, *kaduki*, *kapabli*, *kuraĝi*, *lami*, *maloportuni*, *pravi*, *rapidi*, *sovaĝi*, *spriti*, *sufiĉi*, *utili*, *vigli* ktp.

Se ni konsideras la unuaseriajn ekzemplojn, ni vidos, ke li donis al la verbigaĵoj sencojn variajn, sed tamen unuecigeblajn: *-i* signifas 'agi en ia ajn rilato kun la nomita afero': *kalki* estas 'ŝmiri per kalko', sed *vintri* estas 'pasigi la vintron', *nesti* estas 'konstrui neston' ktp. Unuvorte, al la verboj venantaj de substantivoj, li ĉiam donas sencon de ago: *matenas* kaj *vesperas* signifas por li 'venas mateno', 'venas vespero' kaj neniam 'estas mateno, vespero' ktp.

Pri la dua serio, oni povas konstati, ke ĉe preskaŭ ĉiuj radikoj adjektivaj, kiujn li verbigis, enestas ia senco ankaŭ de ago; kio klarigas, ke multaj el tiuj verbigoj konstruiĝas kun objekto: *suspekto prawn*o *ne egalas*; *ne rapidu koleri*; *jen mi viglos super ili* ktp. Tamen, evidente, ĉe pluraj okazoj, la finaĵo *i* ŝajnas ja samvalora kiel *esti*: *kiam nokto vualas*, *ĉiuj koloroj egalas*; *kio jam havas*, *tiu pravas*; *sufiĉas*, *ke mia filo ankoraŭ vivas* ktp.


Ĉu do ni povus konkludi, ke Zamenhof kelkafoje donis tian valoron al la finaĵo *i*? Mi ne kredas, ĉar oni neniam trovas en liaj verkoj verbigojn kiel *blanki*, kiun ni trovas ĉe Kofman, *verdi*, ĉe Kabe, *feliĉi*, ĉe Devjatnin ktp; kaj oni cetere scias, ke en unu Lingva Respondo (Plena Kolekto, 3a eld., pĝ 70), li skribis nete: «Kvan-

¹ Kaj al la bedaŭrinda ekzemplo de UV: *butonumi*, ŝuldita al la fakto, ke en P kaj R la substantivo ne donas derivaĵon por esprimi tiun agon, kiun oni nomas el alia radikoj.

kam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo *esti*, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas». Sed mi opinias, ke en tiaj okazoj oni devas konsideri malpli la valoron de la finaĵo, ol tiun de la radikoj mem. Estas profunda eraro apliki al la lingvo la matematikajn metodojn. La gramatikaj kategorioj estas nur kondiĉaj klasifikiloj, en kiujn ni enmetas la lingvajn nociojn: kaj kelkaj eniras senĝene, kelkaj nur trudiĝe. *Adjektivo* ne estas io tiel absolute difinita, kiel la koncepto pri triangulo aŭ cirklo, ekz-e. Estas multaj radikoj, kiuj respondas perfekte al la nocio de 'eco aplikata al aĵo aŭ ulo': en ĉiuj naciaj lingvoj, ekz-e, *larĝa, flava, mola* ktp estas rigardataj kiel adjektivoj, kaj prezentas nenian problemon pri sia klasifikiĝo. Kun tiaj adjektivoj Zamenhof neniam uzas la finaĵon *i*, sed ĉiam esprimas la verbon *esti* aŭ la sufikson *-iĝ*: *Lernu juna, por esti saĝa maljuna*, aŭ: *Muso satiĝis, faruno malboniĝis*.

Sed kelkaj nocioj, kvankam klasifikitaj kiel adjektivoj, povas enteni en si ion pli ol la simplan valoron de eco: *prava* ekz-e estas tute proksima al la ideo de ago, ĉar nur ĉe siaj agoj — diroj aŭ faroj — oni povas esti prava. *Gaja* same elvokas iel la eksterajn manifestadojn de tia animstato. *Kapabla* oni juĝas nin nur laŭ niaj provoj ktp. Kun tiaj adjektivoj, kies naturo iom similas al tiu de verbo, Zamenhof tute prave uzadis la verbajn finaĵojn.

Se la geometriamaj spiritoj volus prezenti al si la aferojn en pli grafika maniero, mi proponus al ili la ĉi-suban figuron, kiu tradukas la interpenetriĝon de la gramatikaj kategorioj en kelkaj okazoj:



kaj kie radikoj kiel *kur, ŝvit* ktp trovas lokon en la blanka parto de la verba cirklo; aliaj, kiel *fort, nov* en la blanka parto de la

adjektiva cirklo; sed radikoj kiel *perfid* aŭ *prosper* lokiĝus nepre en la komuna haĉita duangulo.¹

c) Fine, se ĉiu elemento devas povi gluiĝi al ĉiu alia, nenio principe malpermesas, ke oni akumulu plurajn unu post la alia. En la praktiko tio efektiviĝis nur ĉe la afiksoj. Ĉe la substantivaj, adjektivaj kaj verbaj radikoj, oni trovas ordinare ne pli ol duelementajn kunmetaĵojn; la trielementaj jam sonas iom ĝene. *Vaporŝipo* aŭ *marmapo* estas tute oportunaj vortoj; sed *vaporŝipkompanio* aŭ *marmapdesegnisto* jam ŝokas niajn orelojn. Tian antipation por la plurelementaj vortoj ni ŝuldas simple al la rutino de la okcidenteŭropaj lingvoj. Se oni fantazius, ke Esperanton ĉefe uzadus sanskritaj verkistoj, en kies lingvo la vortoj ordinare egalas niajn frazojn, versoj kiel la sekvanta fluus tute nerimarkite:

Nigraharvirgulinvoĉo orelingargéntsonora...

Male, oni tre facile uzas tri afiksojn ĉe unu radikoj, kaj tiajn kunmetaĵojn oni renkontas jam ĉe la plej malnovaj tekstoj. En la *Dua Libro* oni povas legi: *neniu el la redaktoroj estas mirindaĵisto* ktp. En «La Esperantisto» de 1888 troviĝas inter aliaj *mirindegaĵo*, en 1893 *tutmondiĝado* ktp kaj tio daŭris plu, ĝis la zamenhofa *Biblio*, el kiu ni ĉerpas: *posteularo*, *korteganeŝtro*, *multinfanulino*, *memsemiĝanta* [grenoj], *unuenuaskiteco*, *penetriĝintaĵo*, *kaptitecanoj*, [rompita poto, kiu ne povas esti] *tutajigita* ktp. Vortoj kiel *domaninaro*, *fulmosorigilo*, *ŝanĝiĝemulo*, *neresaniĝebla*, *kamparanino* ktp ne mankas ĉe Kabe kaj aliaj slavaj verkistoj; kaj mi ne kredas, ke la okcidenteŭropaj esperantistoj trovas ĉe ili ion ajn malplaĉan. Kaj tamen, ties naciaj lingvoj ordinare toleras ne pli ol du afiksojn unu post la alia en la sama vorto: F *vi/abil/ité*, *Un/sterb/lich/keit*

¹ Tiukaze ni memorigu, ke Esperanto estas finfine «internacia» lingvo, sekve, ke ĝi ne devas ligiĝi tro intime kun unu grupo da naciaj lingvoj je la kosto de la ceteraj. En la hindeŭropaj lingvoj, la adjektivo estas tradicie rigardata kiel najbaro kaj iel parenco de la substantivo (samaj deklinacioj, en la fleksiaj lingvoj, ofta trapaso de unu kategorio al la alia ktp); sed en centoj da homaj lingvoj — en la japana ekzemple — la adjektivo estas konjugaciita same kiel la verbo, kaj povas eĉ ludi ties rolon. Oni diras: *kodomo wa ĉiisai* (la infano malgranda = la infano estas malgranda), sed oni devus diri: *kodomo wa ningjō desu* (la infanoj estas pupoj) kun esprimo de la verbo *desu*.

ktp. Eble tiun avantaĝon ni ŝuldas al la fonetika konsisto de niaj afiksoj, samtempe mallongaj kaj facilformaj, kiel mi montris ĉi-supre.

Sed ĝuste la facileco kaj oportuneco de tiaspeca kunmetado kondukis al vastigo de la idiotisma karaktero de Esperanto, je la malprofito de ĝia internacieco. Vortoj kiel *kvietigisto* (de serpentoj), *senlanigado* (de ŝafoj), *interligiteco*, *memmortigo* ktp estas nekompreneblaj al eŭropa klerulo, kontraste al la internaciaj vortoj *incantator*, *tonsura*, *interconnexion*, *suicide* ktp. Ni do retrovas ĉi tie la saman kontraston, kiun ni jam notis, inter la du memkontraŭdiraj tendencoj de E: unu al la plej kompleta memstareco; la alia, al la plej perfekta internacieco. La unuan kreis esence la postuladoj de la propagando: facila lernebleco de kiel eble plej malmultaj radikoj, kaj «koda» komprenebleco; la alian instigis la deziro partopreni en la komuna trezoro de la internaciaj vortoj, fariĝi tuj komprenebla al la teknikistoj aŭ sciencistoj. Ambaŭ tendencoj estas denaskaj en E, kaj vivrajtigataj: kaj ĝuste ilia kunbatalado havas tiun bonefikan rezulton, ke ili tenas unu la alian en saĝaj limoj kaj malhelpas reciprokajn ekscesojn. Sed ne E mem estas respondeca pri ili: antaŭ ĝia naskiĝa tago, ambaŭ efektive ekzistadis, en pli aŭ malpli alta grado, jam en niaj naciaj lingvoj. La adjektivo de F *chasse* (ĉaso) estas *cynégétique* (ĉasa); Germano povas ja *fernsprechen* (telefoni), sed devas tamen *telegraphieren* (telegrafi); la Angloj honoris siajn militmortintojn per la Whitehall-a *Cenotaph*, kiu, se dediĉita al ordinara civilulo, fariĝus simple ia *empty tomb* ktp.

La antikva kaŭzo de tiu bedaŭrinda ĥaosa stato estas la fakto, ke la Helenoj unuflanke estis pli frue kaj pli brile civilizitaj, ol la Romanoj,¹ aliflanke, ke ilia lingvo estis pli fleksebla kaj fekunda, ol la latina. Tiel la Romanoj, kaj post ili la Romianidoj devis ĉerpi el la greka siajn vortojn de arto, tekniko aŭ scienco (la juron, solan, la Romanoj iniciatis kaj estris).

Sed malfeliĉo malofte venas sola: en la 17a kaj 18a jarcentoj, la influo de la franca civilizo kaj lingvo sur la tutan Eŭropon pliiĝis

¹ Kiu do rimarkigis, ke en Romo la nomoj de la legomoj estas latinaj, sed grekaj tiuj de la floroj?

la malordigon. Mi kontentiĝos per du anekdotoj, por montri, kiel profunda estis tiu influo. Oni scias, kun kia malamo kaj malŝato Hitler rigardis la Francojn. Nu, el lia unua parolado post lia venko de Junio 1940 mi, kiel distriĝo en mia kaptitejo de Spittal, elpikis ĉirkaŭ kvindek da francaj vortoj, kiuj estis facile esprimeblaj per germanaj radikoj: *Zentralisation, Evolution, Instrument, Konsequenz, individualistisch, Revisionprozess* ktp. Poste, en mia kvara, kaj lasta, kaptitejo apud Lübeck, mi troviĝis kun unu filo de Stalin, leŭtenanto Djugajvili, kiu sciis nur la rusan, tiel ke ni povis interparoli kun li nur pere de unu nia kamarado, de rusa deveno. Unu tagon, dum la germana retiriĝo de 1944, okazis, ke ni deziris informi lin pri la sovetia konkerado de grava pontokapo (*F une tête de pont*) trans la rivero Dnjestro; nia interpretisto, ne konante la rusan vorton, penis klarigi al li la aferon per desegno, kiam Djugajvili, ekkompreninte, ĝoje ekkriis: «Da, da: tet-de-pont!»

La lastan difekton al la aŭtonoma elvolviĝo de la eŭropaj¹ (kaj ankaŭ japanaj) lingvoj fine metis, en la 19a kaj 20a jarcentoj, la enpenetriĝo de la scienca terminaro en la ĉiutagan lingvon. «Le médecin des yeux eût rougi de s'appeler œilliste...; déjà la qualification d'oculiste, insuffisamment barbare, humilie ses prétentions: il est *ophtalmologue*».² Mi trafis hieraŭ jenan frazon: «If you like Anglo-Saxon, I belched. If you fancy Latin, I eructed».³

¹ La eŭropanoj evitu, en sia naŭveco, tro laŭdi la memstarecon de la orientaj lingvoj: la turka, la persa, la urdua estas trapanetritaj de la araba; estas neeble apreci la persan literaturon, se oni ne konas la araban; kaj oni povus diri same pri la japana: de la cifernomoj ĝis la literformoj, la ĉinaj elementoj aperas ĉiuloke. Kaj mi ne parolas pri la anglaj pruntovortoj, kiel *danpingu* (*dumping*), *dansu* (*dance*), *debiru* (*devil* = diablo), *dëbitô* (*debit*), *debju* (*début*), *dedikëto* (*dedication* = dediĉo), *dehurësôn* (*deflation*), *dekorësôn* (*decoration*), *depâto* (*department* = ĉiovendejo), *derikaŝi* (*delicacy* = frandaĵo), *derikëto* (*delicate*) ktp ktp. Niaj aŭstriaj puristoj, kiuj volas ŝirmi Esperanton kontraŭ la infekto de la internaciaj vortoj, devus dediĉi kelkajn el siaj liberaj horoj al la studo de japana vortaro!

² «La okulkuracisto ruĝiĝus nomi sin *œilliste*...; jam la kvalifiko *oculiste*, nesufiĉe barbara, humiligas liajn pretendojn: li estas ja *ophtalmologue*». RÉMY DE GOURMONT, *Esthétique de la langue française*, 1899, pĝ 45, 46.

³ «Se vi ŝatas la anglosaksan lingvon, mi havis elpuŝojn. Se vi preferas la latinan, mi ruktis». REX STOUT, *Murder by the Book*, 1951, pĝ 17.

Hodiaŭ, germana humoristo ŝercas: «Er nannte nun, was bisher Materie geheissen hatte, 'die Quantitative', Bewegung — 'Ferment', Absicht — 'Logos', Wille — 'Exaltation', Verstand und Vernunft zusammengenommen — 'die psychische Vitalität'. Heut ist er Professor...»¹

Nenia mirindaĵo, se ankaŭ nia Esperanto iras la saman vojon, kaj nenia motivo, por indigni aŭ malesperi, se ni disponas la eblon paroli, laŭ la medioj kaj la okazoj, dokte aŭ sciencoplene, pri la kalvaj aŭ senharaj kranioj aŭ cerbujoj de la nukleaj aŭ kernaj fizikistoj...

II

LA FRAZO

Kio donas al la vortkonstruo de Esperanto ĝian apartan karakteron, tio estas la fakto, ke ĉiu elemento estas principe memstara, ke tiuj elementoj povas almetiĝi unu post la alia kun la sola konsidero de la esprimota senco, tiel ke la ekzisto de unu elemento ne neprigas la postmetadon de unu difinita alia elemento, sed ke plena libereco estas lasata al la uzanto daŭrigi la kunĉenadon laŭ sia arbitro. Se mi komencas mian parolon per *arb-*, mi neniel estas devigata de la kutimoj aŭ de iaj derivreguloj kompletigi ĝin per *-o*, pli ol per *-a*, *-e* aŭ *eĉ -i*; same, mi restas tute libera elekti la vojon de la sufiksoj, kaj nenia ekstera forto malhelpas min daŭrigi ~~per~~ *arb-ar-* prefere al *arb-et-*, *arb-ej-*, *arb-ist-* ktp, kaj ĉe tiu nova etapo, mi plu ĝuas la egalan disponon de la sekvantaj elementoj, ĉu per aliaj sufiksoj, ĉu per aliaj radikoj, ĉu en la direkto *arb-ar-ist-* ktp, ĉu en la direkto *arb-ar-kultur-* ktp.

Tiu karaktero, kiun oni povus nomi «linieca strukturo»,² plej

¹ «Li eknomis tiam, kio ĝis nun estis nomata materio — 'la Kvantitativo', movo — 'Fermento', intenco — 'Logos', volo — 'Ekzaltacio', intelekto kaj prudento kolektive — 'la psika vitalitato'. Hodiaŭ li fariĝis Profesoro». *Aus dem grossen Roda-Roda Buch*, 1957, pĝ 61.

² Tiun terminon unuafoje uzis la svisa lingvisto Ch. Bally en *Linguistique Générale et Linguistique Française*, Parizo, 1932, pĝ 123.

okulfrapa en la konstruo de la vortoj, estas, laŭ mia opinio, retrovebla ankaŭ en aliaj partoj de la lingvo. Kaj, kvankam oni ĝis nun ŝajne tion ne rimarkis, ĝi iel kolorigis la sintakson, kiom la propozician, tiom la frazan.

* * *

En la sintakso de la propozicio, almenaŭ du apartaĵoj de nia lingvo montras tian influon: la objekta predikativo kaj la refleksivo.

En la *Unua Libro* ni legas, en la dua ekzempla peco: «Kaj nomis Dio la lumon tago, kaj la mallumon li nomis nokto». De kie Zamenhof elpensis tiun nekutiman manieron esprimi la predikativon de la objekto? Ne de la helena aŭ la latina, kie tiu staras en akuzativo; ne de la slavaj lingvoj, kie ĝi staras en instrumentalo. Neniu eŭropa fleksia lingvo, laŭ mia scio, prezentas modelon de objekta predikativo en nominativo.

Vere estas, ke en la hebrea tia predikativo estas neniam enkondukata de la akuzativa prepozicio *'ēth*, kaj sekve povas aspekti nominativa; sed ĉar *'ēth* ankaŭ ne estas nepre uzata antaŭ ĉiu objekto, la kontrasto inter la objekto kaj la predikativo estas malpli evidenta, ol en E: ekz-e, en la ĉi-supre citita frazo, la hebrea ne uzis la akuzativan prepozicion: *wajjiqrā' 'ēlohīm lā'ōr jōm* (kaj nomis Dio lumo tago).

Laŭ mia opinio, la klarigo kuŝas en la maniero, kiel Zamenhof konceptis la tutan sistemon de la lingvo. Ni konsideru efektive la apartan karakteron de la verboj, kiujn sekvas tiaj predikativoj. Temas pri verboj kiel *nomi, fari, juĝi, trovi* ktp, kiuj, se analizite, povas ĉiam reduktiĝi al la skemo: 'iel agi super *ion* (aŭ: pri *io*), ke ĝi ekestu *ia*'; aŭ, alidire, tiuj verboj, kiujn oni povus nomi duefikaj (analoge, sed kontraste, kun la dudirektaj verboj: diri *ion* al *iu*, preni *ion* de *iu* ktp), ĉiuj esprimas *agon*, kiu trafas aĵon nur por meti ĉi tiun en novan *staton*. Ili do sekvigas unue objekton kaj due predikativon, esprimantan la novan staton de la objekto: kaj, ĉar la koncerna verbo entenas en si samtempe la du ideojn de ago kaj de stato, la objekto staras en akuzativo pro la ag-ideo, kaj la predikativo en nominativo pro la stat-ideo — sen tio, ke la unua

kazo influas sur la duan. Estas tiu komplekso, kiun la malnovaj gramatikistoj penis klarigi per la supozo, ke oni subkomprenas la verbon *esti*:

Dio nomis la mallumon [ke ĝi estu] nokto.

Evidente, nenio simila efektive okazas en la penso de la parolanto, kaj tio estas nur kruda figuro de pli profunda fenomeno.

En la klasikaj lingvoj, la objekta predikativo staras en akuzativo pro tio, ke ĝi kvalifikas vorton (la objekton), kiu mem staras en akuzativo: kio konsistigas la fenomenon konatan sub la nomo de «akordo». Nu, en E, tiu kaza ligiteco inter la du termoj ne ekzistas, la kaza akordo estas rompita. Kion oni povus figuri jene:

L *Appellauitque* → *lucem* → *diem*.

E Kaj nomis $\longrightarrow$ la lumon
 $\longrightarrow$ tago.

Do, kio aperas en tiaj okazoj, estas la instinkta sento, ke, dum la kvar unuaj vortoj formas unuon, kiu ne suferas internan paŭzon kaj ĝuas ian fonetikan interligitecon, la kvina vorto *tago* estas io aparta, ia komenco de nova unuo; kaj tiun apartiĝon oni markas per unu el tiuj paŭzoj, kiuj en la parola lingvo estas la ekvivalento de interpunkcia signo en la skriba:

Kaj nomis Dio la lumon || tago.

Konfirmon de tiu fakto oni trovas, se oni konsideros, kiel tiu nova, relative memstara parolunuoj kondukas rilate la refleksivon. Oni komparu jenajn du frazojn:

Jen la Eternulo montris al ni sian majeston (Read. V 24)

La Eternulo bonvolis fari vin || lia popolo (I Sam. XII 22)

En ĉi lasta ekzemplo, la aparteco de la du parolunuoj estas sufiĉe granda, por ke altirforto de la subjekto en la unua ne plu efiku en la dua sur la posed-adjektivon: *lia*, ne *sia* popolo!

Analogan apartiĝon ni povas observi ĉe aliaj okazoj, ĉe apozicioj:

Li kolerigis la Eternulon, || Dion de liaj patroj (II Kron. XXII 25)

ĉe loka adjekto:

La Eternulo forpelis la Amoridojn, || de antaŭ lia popolo Izrael
(Juĝ. XI 23)

ĉe kompara adjekto:

Ĉu viro estas pli pura, || ol lia Kreinto (Ijob IV 17)

ĉe infinitiva adjekto:

Dario bonvolis starigi super sia regno 120 satrapojn, || por administri lian tutan regnon (Dan. VI 1)

kaj tiel plu.

Resume, en ĉiuj tiaj okazoj, ĉu ĉe la objekta predikativo, ĉu ĉe la apozicio, ĉu ĉe la diversaj adjektoj, ŝajne montriĝas la sama tendenco limigi la fenomenojn de akordo al la baza nedisigebla parolunuo triterma: aŭ subjekto-predikato-objekto, aŭ subjekto-kopulo-predikativo; kvazaŭ ĉia aldoniĝo al tiu tritermaĵo emus konsistigi per si mem novan parolunuon, tenantan kontraŭ la alia relativan memstarecon.¹ Tiel ke la malsimpla propozicio prezentas serion da parolunuoj, metitaj unu apud la alia, en maniero, kiu ne povas ne memoriĝi al la observanto la liniecan strukturon de la malsimpla vorto.

* * *

¹ Tiun tendencon tre bone sentis la esperantistoj, kiuj inter la jaroj 1930 kaj 1935 iniciatis la nominativigon de la apozicio: *Oni ne forgesu la konkurson, organizita de nia gazeto* ... ktp. Tiun iniciativon kontraŭbatalis P. Corret, kiu prave montris, ke ĝi kondukus al miskomprenoj: estas unu el la okazoj, kie la supera leĝo pri klareco kontraŭstaras al malvolviĝo de normala tendenco de la lingvo.

Tiu originala karaktero montriĝas ankaŭ ĉe la kompleksa frazo, t. e. ĉe la frazoj konsistantaj el ĉef- kaj subpropozicio. Ni legas ekz-e, en la *Biblio*, jenajn frazojn, kiuj faras netan kontraston kun la kutimoj de la okcident-eŭropaj lingvoj:

Moseo aŭdis, ke la popolo ploras (Nomb. XI 10)

Faraono vekigis kaj vidis, ke tio estis sonĝo (Gen. XLI 7)

La reĝo laŭtege ekkriis, ke oni venigu la magiistojn (Dan. V 7)

Tia uzado de la manieroj kaj tempoj klariĝas en la plej simpla maniero, se oni rigardas tiujn subpropoziciojn kiel apartajn unuojn, kiuj konservas la saman tempon aŭ modon, kiun ili havas, se ili estus plene memstaraj:

Moseo aŭdis: «La popolo ploras!»

Faraono vidis: «Tio estis sonĝo!»

La reĝo ekkriis: «Oni venigu la magiistojn»

Kaj oni eĉ povus diri, ke la vorto *ke* estas la nura fonetika traduko de la skriba dupunkto.

Sammaniere klariĝas tiu uzo, sufiĉe ofta ĉe Zamenhof, de negativa volitivo post la verbo *timi*:

Mi timas, ke li ne rakontu al iu, ke li vidis min (G. Dandin, p. 6)

Mi timas la Judojn, kiuj transkuris al la Ĥaldeoj, ke oni ne transdonu min en iliajn manojn (Jer. XXXIX 19)

Sufiĉas anstataŭigi la *ke* per dupunkto, por tuj kompreni la logikecon de tia uzo.

Se, en la nerealaj supozoj, ni uzas la kondicionalon, dum la ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj uzas aŭ indikativan aŭ subjunktivan pasintan tempon, ankaŭ tio devenas de la sama pensoprocedo, kiu memstarigas la subpropoziciojn:

Se mi nur estus sana, mi estus tute kontenta (Unua Ekzercaro § 5)

kion oni povus prezenti ankaŭ jene: *Mi estus sana, (tiam) mi estus kontenta!* Oni ne sufiĉe diris, kiom tiu metodo simpligis nian

sintakson, malkatenante la uzon de la manieroj: oni nur konsideru la liberecon de nia volitivo:

Estas sekve nenio neebla en tio, ke, anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon (FK, pĝ 263)

La reĝidino rakontis al la sorĉisto, ke ŝi ricevis novan svatiĝanton, kaj demandis lin, pri kio ŝi pensu, por ke [tiu ne povu diveni ŝian penson] (Fabeloj I, pĝ 46)

Se mi faru riverencon, mi elektas potencon (Prov.)

La rimon, kvankam estu ĝi plej frapa,

Ne gardu ame kun admiro gapa...

Se ĝia teno al vi kostus troe (K. Kalocsay, *Parnasa Gv.*, p. 72)

Sed ankaŭ oni ne sufiĉe klare vidis, aŭ ne sufiĉe insiste diris, ke tiu aparta konstrumetodo de la esperanta frazo estas io tute kohera kun tiu de la propozicio kaj tiu de la vorto mem. Nur legu, kun tia atentado, la plej ordinaran tekston: *La reĝido*, || *kiu vidis*, || *ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj*, || *petis ŝin*, || *ke ŝi diru al li*, || *de kie tio ĉi venas* (F. Ekzercaro § 23), kaj oni estos frapita de la apudmeto de tiuj memstaraj frazoĉeloj, inter kiuj la fenomenoj de akordo estas reduktitaj je la minimumo. Klasikaj gramatikistoj dirus, ke, same kiel la helena, Esperanto preferas la *parataksis* al la *hypotaksis*. Ni konstatos, en pli simpla formulo, ke la tuta lingvo, ekde la vorto ĝis la kompleksa frazo, prezentas, en mirinde unueca spirito, tiun saman karakteron de la strukturo, kiun mi provis difini kiel liniecan.

LA AKUZATIVO EN INTERLINGVISTIKO¹

La ekzisto de akuzativo en Esperanto estas ofte, por la komencantoj aŭ la eksteraj rigardantoj, objekto de surprizo kaj kritiko. Kaj eĉ por multaj uzantoj el okcidenta Eŭropo, tiu kazo estas ia ŝtono de falpuŝiĝo. Tial eble ne ŝajnos superflua la ĉi-sekva konsidero de la problemo.

I

LA AKUZATIVO EN LA NATURAJ LINGVOJ

En la vidpunkto de la ĝenerala gramatiko, akuzativo estas rimedo esprimi la transformon de subjekto al objekto. Ĉar, kiel bone demonstris Charles Bally,² «la substantivo, antaŭdestinita al la subjekta funkcio, estas la sola signo, kiu estas determinita, ne estante mem determinanto... Estas neeble koncepti procezon sen ia substanco, kie ĝi estiĝas». Sed procezo estas malvolviĝado, evoluado, progreso — kaj estas tiel konforme al la natura irado de la penso esprimi la estiĝlokon de tiu procezo, kiel esprimi ĝian traflokon, celon aŭ koncernaton, t. e. la objekton de la verbo.

Povas ja okazi, ke kelkaj agoj estas prezentataj sensubjektaj (*Pluvas; Temas pri...*) aŭ senobjektaj (*Haltu! Mi akuzas!*), sed en la granda plimulto de la okazoj la klareco postulas la esprimon kaj de la aganto kaj de la agato — kaj oni povus diri, ke la subjekto kaj la objekto formas kun la verbo la sanktan triunuon de la parolo.

¹ Tiu ĉi artikolo aperis unue en «Esperantologio», n° 1, 1949. Mia kolego F. A. Faulhaber, repesante ĝin en «La Progresanto» (1956), bonvolis riĉigi ĝin per du notoj, kiujn mi evidentigis per: F. F.

² CH. BALLY, *Linguistique Générale et Linguistique Française*, 2a eld., Bern, 1944, § 190.

Sekve, ĉar la substantivo estas esence pensata kiel subjekto, ĝi povas esti plue uzata kiel objekto nur helpe de ia gramatika rekonilo, kiu montros tiun transformon kaj precizigos tiun novan funkcion — t. e. helpe de iu morfemo. Distingo inter la du ĉefaj funkcioj en la propozicio estas neevitebla neceso, kaj fakte ĉiuj lingvoj ĝin obeas. Objekt-esprima morfemo ekzistas efektive en ĉiuj lingvoj de la mondo, kaj oni ne vidas, kiel lingvo povus malhavi tian. Sed ĝi ekzistas sub kvar diversaj formoj:

1) En ĉiuj ⁿaktivaj lingvoj kaj en kelkaj modernaj (germana, greka, litova, latva, slavaj) de la hind-eŭropa familio, oni trovas akuzativon, kiu prezentas apartan kazon en la deklinacio de la substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj. La latina ekzemple kontraŭmetas *lupum timeo* (la lupon mi timas) al *lupus timet* (la lupo timas). La finaĵo de tiu kazo estis en la pralingvo *-n* je la singularo kaj *-ns* je la pluralo. Ekster la hind-eŭropa familio, akuzativon oni trovas ankaŭ en la hungara, finna, estona, turka, mongola kaj kelkaj hindaj lingvoj.

2) En japana lingvo oni trovas objekt-morfemon postpozician: la objekto estas montrata de postmetita vorteto *wo* same kiel la subjekto de postmetita *ga*. Ekzemple *tegami wo kaite imasu* (leteron skribanta li estas) kontraŭmetiĝas al *kakubeki tegami ga iroiro arimasu* (skribendaj leteroj diversaj estas). La du formoj klare montriĝas en la proverbo *ippai hito sake wo nomi... sambai sake hito wo nomu* (je la unua glaso la homo la brandon trinkas, je la tria la brando la homon trinkas). Simila stato troviĝas en la hindustana (urdua) kaj parencaj lingvoj.

3) En hebrea lingvo ekzistas objekt-morfemo prepozicia, ordinare uzata en prozo antaŭ la determinitaj substantivoj kaj antaŭ la propraj nomoj; formo de tiu prepozicio estas *'eth*. Ekzemple *wajbhaqqēš laħārog 'eth-Mōše wajjibhraħ Mōše* (kaj li deziris mortigi je Moseo kaj forkuris Moseo). Tian staton ni trovas en kelkaj modernaj romidaj lingvoj, ĉe la nomoj de personoj aŭ de personigitaj aferoj; komparu la hispanan *busco a mi criado* (mi serĉas je mia servisto), *amar a la patria* (ami je la patrio) aŭ la rumanan *am*

intâlnit pe fratele tău (mi renkontis je frato cia) aŭ la afrikansan: *ek het fer Jan gesé* (mi vidis je Johano);¹ ankaŭ en la gaskona dialekto oni povas trovi similajn konstruojn.²

4) Fine, en la okcident-eŭropaj lingvoj (itala, portugala, franca, angla, nederlanda, dana, norvega, sveda) kaj en la ĉina, anama ktp oni povas konstati la ekziston de objekt-morfemo *pozicia*, t. e. de sintaksa regulo, kiu trudas al la objekto devigan lokon en la propozicio, ĝenerale senpere post la verbo. Ĉar ekzemple, se la franca *un chien regarde bien un évêque* signifas 'hundo episkopon rajtas rigardi' kaj ne 'hundon episkopo rajtas rigardi', la kaŭzo estas, ke la postverba lokigo de *un évêque* havas sintaksan valoron egalan al tiu de la esperanta *-n*: en tiaj lingvoj, la vortordo mem konsistigas la morfemon.³

Oni vidas do, ke la koncepto de la objekto estas komuna trajto de ĉiuj homaj lingvoj, sed ke ĝia lingva esprimo varias laŭ la landoj kaj epokoj. Efektive, en multaj okazoj, kiel en Eŭropo, tiel ankaŭ en Azio, la historio instruas al ni, ke al la fleksia akuzativo iom post iom substituiĝas unu alia formo. En Azio, la kompara lingvistiko demonstris, ke la ĉina kaj la anama posedis iam fleksiojn, kiuj ankoraŭ ekzistas sporade en arĥaikaj dialektoj, sed ke ili foruziĝis kaj malaperis, lasante lokon al pozicia aŭ partikla morfemo. En Eŭropo, bona ekzemplo estas la franca, kiu el la 6 latinaj kazoj komence konservis nur du, unu por la subjekto kaj alian por la ceteraj kazoj. Ekzemple la nominativo latina *nullus homo* fariĝis *nus hom*, dum la akuzativo *nullum hominem* fariĝis *nul home*. Tia estas la stato, kiun oni trovas en la malnovaj tekstoj, kia la *Kanto de Rolando*:

Unques nus hom tel chevaler ne vit
(jam neniu homo tian kavaliron vidis).

Soûrs est Carles, que nul home ne crent
(trankvila estas Karlo, ĉar neniun homon li timas).

¹ P. BRACHIN, en «Etudes Germaniques», Jan. 1952, pĝ 34.

² CH. BALLY, citita libro, § 253.

³ J. VENDRYÈS, *Le langage*, Paris, 1921, pĝ 93.

Sed tiuj fleksiaj restaĵoj estis tre neregulaj, kaj ili baldaŭ malaperis (jam ĉ. 50 jarojn post la verkado, la kopiisto de la ĉi-supra verso kulpis eraron kaj skribis *nuls home!*), la franca konfidis al la sola vortordo la esprimon de la objekta funkcio, kaj la inversio de la objekto fariĝis neebla, kiel oni vidos el la moderna traduko de tiuj versoj:

Jamais nul homme ne vit tel chevalier . . .

Charles est tranquille, car il ne craint nul homme . . .

Saman evoluon montras la araba lingvo; sub sia klasika (kora-na) formo, ĝi ankoraŭ posedas fleksian akuzativon, kiu transformiĝis en pozician morfemon en pluraj modernaj dialektoj.

Tamen ni devas rimarkigi, ke tiu evoluo ne estas unudirekta: se plimulto el la cititaj lingvoj ŝanĝis fleksian morfemon al pozicia, almenaŭ tri aliaj, la hispana, la rumana kaj la afrikansa, post la ruiniĝo de la latina, respektive ĝermana, deklinacio, mem kreis al si, inter certaj limoj, novan prepozician morfemon.

Cetere estas diskutinda afero, ĉu tiun evoluon ne kaŭzis simple la fonetika eluzado de finaĵa malsonora konsonanto, kiel *-n*, pli ĝuste ol la spirita tendenco al analiza lingvoformo. Ĉar apriorie la analizemo devus konduki al la anstataŭigo de fleksia morfemo per prepozicia, paralele al la transformo de la aliaj kazoj en prepoziciajn adjektojn. Pozicia objekt-morfemo estas ne pli analizeca, ol la prepozicia. Apoge al tiu hipotezo, oni povus rimarkigi, ke aliflanke, en la ĉi-supre montrita dua grupo da lingvoj, la postpozicia morfemo ĉie rezistis, probable pro la pli fortika fonetika konsisto de ĝia esprimo. Oni do ne devas lasi sin influi per la grandiozaj vortoj de «konformeso a la lingvala evoluciono» (Couturat), aŭ de «absolut modernissim paneuropean gramatica» (von Wahl) ktp por tranĉi, sen plua esploro, la malfacilan demandon pri la akuzativo: oni devas, tute male, zorge pesi ĉian elementon de la decido.

AVANTAĜOJ KAJ MALAVANTAĜOJ DE LA AKUZATIVO

El la kvar esprimmanieroj de la objekto, ni povas, koncerne nian studon, fari nur du grupojn: tiu, kiu esprimas la objekton sen fonetika morfemo, per la nura pozicio de la vorto en la frazo — kaj tiu, kiu ĝin esprimas per iu ajn fonetika morfemo; ĉar la tri formoj, kiujn povas ricevi tiu morfemo, havas proksimume la samajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn; inter ili oni devos elekti pro okazaj motivoj (oportuneco, konformeco al la lingvo-karaktero ktp). Male elekton inter la du grupojn decidis la konsidero de ĝeneralaj principoj.

Efektive, por pravigi sian pretendon anstataŭi la lingvojn naturajn, planlingvo devas ilin superi per pli granda facileco. Sed facileco de lingvo estas, malgraŭ la ŝajnoj, malsimpla ideo: ĝi ~~de~~ dependas kompreneble de la grado kaj speco de instruiteco de la koncernaj lernantoj unuflanke, ĝi dependas aliflanke de la harmonia kompenso de pluraj elementoj: simpleco, klareco, fleksebleco, regulareco, stabileco, belsoneco ktp. Mi limigos min ĉi tie al la ekzameno de la tri unuaj:

A. Akuzativo kaj la lingva simpleco.

La postulato de simpleco en la L I pledas evidente por forigo de ĉia modifo en la formo de la vortoj — do por uzado de la nura pozicia objekt-morfemo. Sed mi ne konas uzatan planlingvon, kiu iris ĝis la fino de tiu tendenco, radikale forigante la akuzativon el ĉiaj vortoj: eĉ Occidental konservas ĝin ĉe la personpronomoj kaj ĉe la persona rilatpronomo: *noi-nos*, *vu-vos* ktp.; *qui-quem*.

B. Akuzativo kaj la lingva klareco.

La postulato pri klareco puŝas kontraŭe al elekto de ia konkreta kaj ne nur abstrakta objekt-morfemo. Efektive, se oni observas la lingvojn, kiuj konas nur tian lastan, oni ne malfacile malkovros frazojn, en kiuj la manko de fonetika morfemo estigas sencodubon. Kaj ĉar tiun fakton la kritikantoj de Esperanto tro ofte ignoras (aŭ nescias?), mi permesos al mi iom detale insisti. Mi tiros miajn ekzemplojn egale el la ĉiutaga kaj el la literatura

formo de la franca lingvo, por montri, ke ne temas pri eltorditaj, eksterordinare elpensitaj maloftaĵoj.

La okazojn, ĉe kiuj plena klareco estus atingebla nur pere de fonetika objekt-morfemo, oni povas klasi sub 4 ĉapitroj:

1) Elipsaj propozicioj.

Mr. de Talleyrand le reçut en prince (s-ro de T. akceptis lin kiel princo — aŭ — kiel princon).

Je vous aime comme un frère (mi vin amas kiel frato — aŭ — kiel fraton).

Il insulta le président plus violemment encore que l'orateur précédent (li insultis la prezidanton eĉ pli krude, ol la antaŭa oratoro — aŭ — ol la antaŭan oratoron).

Je n'ai pas d'autre appui que vous (mi ne havas alian apogon, ol vi — aŭ — ol vin).

... comme si le temps, ainsi que le vin, rendait les poésies meilleures — J. DU BELLAY (kvazaŭ la tempo, same kiel la vino, plibonigas la poeziaĵojn — aŭ — same kiel la vinon).

Le crime fait la honte et non pas l'échafaud — TH. CORNEILLE (la krimo estigas la honton, kaj ne la eĉafodo — aŭ — kaj ne la eĉafodon).

*Et Virgile écoutait comme j'écoute et l'eau
Voyait passer le cygne auguste, et le bouleau
Le vent, et le rocher l'écume, et le ciel sombre
L'homme ...*

V. HUGO.

(Kaj ²~~Virgil~~^{io} aŭskultis kiel mi aŭskultas, kaj la akvo vidadis pasi la majestan cignon, kaj la betulo la venton, kaj la roko la ŝaŭmon, kaj la malluma ĉielo la homon... — oni komprenas unuavide: la cignon kaj la betulon, la venton kaj la rokon, la ŝaŭmon kaj la ĉielon...)

2) Objektaj predikativoj.

Je trouvais ce fruit délicieux au cours de mes longues promenades (mi trovis tiun frukton bongustan dum miaj longaj promenadoj — aŭ — mi trovis tiun frukton bongusta dum...)

J'estime l'Essai sur l'Homme, de Pope, le premier des poèmes philosophiques — VOLTAIRE (mi estimas la Eseon pri la Homo, de Pope, la unuan el la filozofiaj poemoj — aŭ — la unua el la filozofiaj poemoj).

3) Apozicioj.

Fidèle ou non, il l'aimait (fidela aŭ ne, li ŝin amis — aŭ — fidelan aŭ ne, li ŝin amis).

François-Joseph télégraphia à l'archiduc Rodolphe qu'il le recevrait, seul (Francisko-Jozefo telegrafis al la arkiduko Rudolfo, ke li akceptos lin, sola — aŭ — solan).

Il aimait son fils, ce vainqueur — V. HUGO (li amis sian filon, tiu venkinto — aŭ — tiun venkinton).

Je t'aimais inconstant, qu'aurais-je fait fidèle? — J. RACINE (mi vin amis perfida, kiom pli mi vin amus fidela! — aŭ — mi vin amis perfidan, kiom pli mi vin amus fidelan!)

4) Inversioj.

On ne savait pas alors quel poète étouffait en lui le savant (oni tiam nesciis, kia poeto sufokas en li la scienciston — aŭ — kian poeton sufokas en li la sciencisto).

Il avait dans la terre une somme enfouie — LA FONTAINE (li havis monon enfositan en la tero — aŭ li estis enfosinta monon en la tero).

... ce foudre ridicule,
Dont arme un bois pourri ce peuple trop crédule
P. CORNEILLE

(... tiu ridinda fulmo, per kiu iu putrinta ligno armas tiun tro kredeman popolon — aŭ — per kiu iun putrintan lignon armas tiu tro kredema popolo).¹

¹ En la lingvo nederlanda ni renkontas la saman sencodubon: *Zij heeft haar als een zuster verpleegd* (Ŝi flegis ŝin kiel fratinon — aŭ — kiel fratino).

De film, die het publiek hoont (La filmo, kiun malestime mokas la publiko — aŭ — kiu malestime mokas la publikon).

Se, post rapida traserĉo, mi kapablis trovi tiom da ekzemploj de sencodubo, kaj en lingvo, kiun oni ĝenerale rigardas kiel plej klaran kaj precizan, kiom da tiaj aliaj oni povus kolekti el la diversaj planlingvoj, kiuj rezignis pri la helpo de akuzativo! Lasante flanke la jam eksmodiĝintan Latino sine Flexione de Peano kaj la ankoraŭ ne plene eloviĝintan Interlingua de IALA, mi limigos mian demonstradon al la Occidental de von Wahl. Ĉiujn miajn ekzemplojn mi ĉerpis el publikigitaj tekstoj, krom la unua, eltirita el privata letero. Oni facile rimarkos, kiel la gramatika malriĉeco de tiu lingvo (simileco de preterito kaj de preterita participo, nevarieco de la adjektivo kaj de la rilatpronomo *quel* ktp) kunigita kun la fiera pretendo de von Wahl al «absolut libertá de construction», multigas la okazojn de miskompreno.

1) Elipsoj.

Noi conosce altri scintistes quam sr M. (ni konas aliajn sciencistojn, ol s-ro M. — aŭ — ol s-ron M. — aŭ — kiel s-ron M.).

Li tēmpore passat, H. esset passabilmen patetic (la tempo pasis, H. estis ne malmulte emociema — aŭ — la pasintan tempon, H. estis...).

2) Objektaj predikativoj.

Il conosce anc tro mult detalies por posser vider li coses integri (li scias ankaŭ tro multajn detalojn, por povi vidi la aferojn integrajn — aŭ — integraj).

Die meneer kende de jongen niet (Tiun sinjoron ne konis la knabo — aŭ — Tiu sinjoro ne konis la knabon).

Scarlett wilde haar niet zien, niemand trouwens (S. ne volis vidi ŝin, neniun cetere — aŭ — neniun cetere).

Hij vond het niets goed met zo'n ^dvanzelfsprekendheit tot het lichtschuwe gepeupel gerekend te worden, dat de Pubblica Sicurezza te vrezen had (El: Mensen in de oorlog de A. LATZKO, nederlanda traduko) (Ne plaĉis al li esti kalkulata kun tia memkompreneblo al la lum-evita kanajlaro, kiu devas timi la Publikan Sekuraparaton — aŭ — kiun devas timi la P. S.).

Ankaŭ la germana originalo (*Menschen im Krieg*) ne donas certecon: *Es paszte ihm nicht mit solcher Selbstverständlichkeit dem lichtscheuen Gesindel zugezählt zu werden, das die Pubblica Sicurezza zu fürchten hatte.*—F. F.

3) Apozicioj.

... *pictura, quel monstrat li combatte ye Worcester, por li scotes tam sinistri* ... (pentraĵo, kiu montris la batalon ĉe W., por la Skotoj tiel timigan — aŭ — timigaj).

li nùmere del conosciellant electronos, queles emisse li disperset radiation prendet per atom, es quasi egal a . . . (la nombro de la kunoscilantaj elektronoj, kiuj elsendas la disan radiadon prenitajn po unu atomo, estas kvazaŭ egala al . . . — aŭ — prenitaj po unu atomo — aŭ — prenita po unu atomo . . .).¹

Lu poc quo restat in mi memorie yo prova fixar ci, forsan tre disparat e incoherent, sovente retornant a anteriori témpores o ja anticipante posteriori evenimentes (la malmulton, kiu restas en mia memoro, mi provas fiksi ĉi tie, eble tre misharmonia kaj nekohera, ofte revenanta al antaŭaj tempoj aŭ jam anticipante postajn okazaĵojn — aŭ — misharmonian kaj nekoheran — aŭ — misharmonie kaj nekohere).

4) Inversioj.

Senior R.-O. abusa li idé que just Latin es international (s-ro R.-O. trouzas la ideon, ke nur la latina estas internacia — aŭ — s-ron R.-O. trompas la ideo, ke . . .).²

¹ Mi supozas, ke *prendet* signifas 'kalkulita'; cetere la rilativa propozicio povus ankaŭ signifi 'kiujn elsendas la disa radiado'.

² Tiu mallonga frazo havas historion. Ĝin mi citis unuafoje en unu mia francelingva broŝuro, *A. B. C. d'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres*, Paris, 1946, kun jena komento: «vere bedaŭrinda dusenceco ĉe lingvo, kiu pretendas la ĉampionecon de la okcidenta kulturo». Kaj mi konfesas, ke, ne montrante la fontlokon de mia citaĵo («Cosmoglotta» n° 39, Marte 1927, pĝ 27—temis pri prof. J. Rossello-Ordines), mi esperis, ke bonvola kontraŭulo apogos mian demonstron per erara interpretado; tiu eta makiavelaĵo ne malprosperis: en posta numero de «Cosmoglotta» (Dec. 1946, pĝ 50), s-ro R. Berger honoris mian broŝuron per longa recenzo, en kiu li interalie skribis: «It es amusant constater que li sol exemple quel un Esperantist posset trovar til hodie in li tot litteratura de Occidental por criticar li supression del obligatori acusative es un exemple fals . . .», kaj li konkludis, ke la frazo de von Wahl povas havi nur la unuan signifon. Kiel bedaŭrinde, ke ĝuste la duan la aŭtoro donis al ĝi! — Tiom pri la «exemple fals»; kaj pri la «sol exemple in li tot litteratura de Occidental», oni nur legu plu, ne forgesante, ke tiu

Occidental, quel clar subtene li heredit classic-cultural base de Europa, es li natural lingue commun del cultivat Occidente (ĉu la aŭtoro pensis: «Occidental, kiu klare subtenas la hereditan klasik-kulturan bazon de Eŭropo» — aŭ — «Occidental, kiun klare subtenas la heredita klasikkultura bazo de Eŭropo»? Vetoj estas atendataj).

Multigi la ekzemplojn estus tede; nur ankoraŭ unu lasta, pruntita el la aŭtoro mem de tiu lingvo-projekto:

SENTENTIE DE SAADI

*Un pantere amnestiat
mult mutones condemnat*

— eta ĉefverko, kiu havas pli da signifoj, ol ĝi estas dika: ses, se mi bone kalkulas:

1. Unu pantero amnestiis multajn ŝafojn kondamnitajn;
2. Unu pantero amnestiita multajn ŝafojn kondamnis;
3. Unu panteron amnestiis multaj ŝafoj kondamnitaj;
4. Unu panteron amnestiitan multaj ŝafoj kondamnis;
5. Unu pantero amnestiis (,) multaj ŝafoj kondamnis;
6. Unu pantero amnestiita (,) multaj ŝafoj kondamnitaj.

Ĉu bezonaj pluaj ekzemploj, por pruvi, ke lerte reklameblan simplecon oni povas akiri nur je la kosto de la klareco?

Oni probable kontraŭdiros, ke, se tiuj frazoj estas efektive dusencaj (kaj, se mi diras *du* . . .), tamen la ĉirkaŭteksto permesas ilin senerare kompreni. Tio estas ofte vera, sed ne ĉiam; kaj oni devas konfesi, unue, ke ĉiam ekzistas la risko, ke tiu ĉirkaŭteksto mankas aŭ mem ne estas sufiĉe preciza por eviti ĉian konfuzon; due, ke ekzistas aparte gravaj tekstoj — filozofiaj, juraj, sciencaj — ĉe kiuj subtilo de la penso nepre postulas, ke ĉia eĉ plej malprobabla

tuta literaturo limigas sin al du-tri monataj malgrandformataj revuetoj kaj al kelkdeko da plejparte propagandaj aŭ instruaj libroj. Fine pri la recenzisto mem, mi diru nur, ke, transirinte al la Interlingua de Dro Gode, li direktas nun siajn kritikojn al Occidental.

dubo estu sisteme eliminata; trie, ke, se en niaj malnovaj lingvoj, al kies ideoĉenoj kaj vortoligoj ni denaske alkutimiĝis, ni povas sufiĉe sekure diveni la ĝustan respondon, en planlingvo, kiu estas kaj longe restos nenies patra lingvo, kaj kiun nekonscie ĉiu pli-malpli strikte modeligas laŭ sia propra, la ŝancoj ĝuste trafi sencon de la verkinto aŭ parolinto estos konsiderinde malpli multaj; kvare, ke tiujn ŝancojn eĉ pli malmultigos la fakto, ke pro simpleco planlingvoj senigis sin je pluraj gramatikaj iloj, kiuj laŭokaze povas helpi en la naturaj lingvoj al klarigo de konfuzo (ekz-e la genra akordo de la adjektivo en la franca, la triapersona -s en la anglaj prezencaj verboj ktp). De tiu pli granda malcerteco de la kompreno en planlingvoj, sekve de pli granda malriĉeco de ilia gramatiko, mi citos nur tri tipajn ekzemplojn:

La ĉefa specialisto de Ido, s-ro de Beaufront, iam kronis unu sian artikolon per jena bumeranga titolo: *La lingvo supleanta Ido* — kio signifas ne nur 'la anstataŭa lingvo Ido', sed ankaŭ, ho vel 'la lingvo anstataŭanta Idon'!

En idista propaganda kunveno, en 1911, germana oratoro deklaris: *Gramatiko donis a ni la logiko!* (ĉar, fidele al sia patra lingvo, li akcentis la objekton per inversio); la tradukanto, kiu estis franclingva Belgo, tradukis naive, laŭ la spirito de sia propra lingvo: *La grammaire nous a donné la logique!* (gramatiko donis al ni logikon).

En occidentala propagandilo, mi legas la frazon: *Li max bon comprension del nature del lingue monstra Occidental.* Kiel estus eble, ke la ordinara Franco aŭ Anglo ne tuj traduku: 'La plej bona kompreno de la naturo de la lingvo montras Occidentalon'?

Oni povas respondi al mi, ke tiuj frazoj estas eraroj de la aŭtoroj, kaj ke oni ja povus esprimi sin tre klare, ne uzante akuza-tivon sed antaŭmetante la adjektivon en la unua frazo kaj rezignante pri la inversio en la du sekvantaj. Tute konsentite, sed kial do la bonaj verkistoj, kiuj ilin skribis, tion ja ne faris? Ĝuste ĉar ili ne ekkonsciis la eblojn de konfuzo. Kaj se ili, ĉe sia tuta sperto kaj talento, ĝin ne konsciis, kio pravas al ni, ke morgaŭ aliaj ne same eraros? Neeviteble, tio estos senĉese la okazo, tiel longe dum interparolos homoj, kies penso formiĝis en diverĝaj lingvo-sistemoj.

C. Akuzativo kaj la lingva fleksebleco.

Ni vidis, en pluraj el la ĉi-supraj ekzemploj, ke la uzo de inversioj en senakuzativa lingvo ĉiam riskigas miskomprenojn. Efektive, malgraŭ la aserto de von Wahl, la du kvalitoj, ekstrema malriĉeco de la gramatiko kaj absoluta libero de frazkonstruo, ne povas pace kunekzisti. Mi scias ja, ke von Wahl provis de tiu sia aserto liveri almenaŭ unu pruvon: du paĝojn tradukitajn el Gogol. Sed kvankam li singarde elektis sian tekston kaj alportis grandan zorgon al la traduko, la rezulto estas vere malkuraĝiga. Oni nur tralegu jenajn frazojn:

Jace e estende se li grandi Mediterran mare e de tri divers láteres riguarda a it li ardent costes de Africa con fin palmes, li Syrian calvi desertes e li denspopulat, tut disfosat per li mare rive de Europa... Dissipat ha su liber colonies li gayi Grecia. Formica in li Mediterran mare insules... Prestressas, jun e gracil, con disbalayat bucles, inspirat ha plongeate su nigri oculus... Ye glorie, glorie sitia, oh hom! In li storm del inracontat gayitá, asurdet del son de ferre, vola sur li cludet scudes del guerriifer legiones!... Ad oriente directet su humid de delicie bell oculus anc Grecia... Un povri village, apoyat al denudat collines, rar, inegalmen adombrat per exsiccat figuiros... Comensat revar li antiqui Egypte ornat per hieroglyphes, abassante plu su pyramides...¹

Eĉ preteratentante la dusencaĵojn (kiu estas la subjekto de *dissipat*: colonies aŭ Grecia? Ĉu *inspirat* estas adjektivo —rilata al *prestressas*? aŭ al *bucles*?— aŭ adverbo? Ĉu *formica* estas substantivo —*formiko*— aŭ verbo —*svarmi*?— Ĉu *sitia* kaj *vola* estas indikativoj aŭ imperativoj? Ĉu *adombrat* determinas *village* aŭ *collines*?) kaj la mallertaĵojn (kion signifas *ha plongeate su oculus*? *inracontat gayitá*? *li cludet scudes*?); eĉ preterlasante la penon, kiun kulturita okcidentano devas fari por kompreni tiujn frazojn, kun ilia artifice distordita konstruo; eĉ malzorgante la fakton, ke orientano neniam povos diveni, sen longa trejno kaj lernado, kial oni devas serĉi la subjekton jen antaŭ la verbo, jen post la verbo,

¹ En *Occidental, die Weltsprache*, de E. PIGAL, Stuttgart, 1930, pĝ 173-175.

jen post la objekto ktp; ĉu do, el la simpla vidpunkto de la legado, la ĉi-supraj frazoj ne efikas kiel amaso da disaj, senkoheraj, neligitaj vortoj? *Dissecta membra*... Nenio ilin kunigas, konstruas en implikatan, organisman tuton. Oni nur relegu: *disfossat per li mare rive de Europa... su humid de delicie bell oculos anc Grecia*... La vortoj, lasitaj al sia propra sorto, senigitaj je rekoneblaj karakteriziloj, surprizas la vidon kaj ne kontentigas la spiriton. Prave skribis iam Aymonier:¹ «La akordo de la vortoj, kiuj ludas saman rolon, kaj la marko de tiu rolo per samaj karakteriziloj estas unu el la plej certaj rimedoj por reciproka interkompreno. Same kiel en la konversacio la orelo asocias similajn vortfinaĵojn, en lego ankaŭ la okulo proksimigas kaj grupigas la vortojn, laŭ iliaj finaj similaĵoj». Oni nur komparu la efekton de jena esperantigo de la citita teksto (mi ne estas certa pri mia interpreto de la ĉi-supre montritaj dubaĵoj):

«Kuşas kaj etendiĝas la granda Mediteranea maro kaj de tri diversaj flankoj ĝin alrigardas la ardaĵ bordoj de Afriko kun delikataj palmoj, la Siriaj kalvaj dezertoj kaj la bordoj de Eŭropo, dense loĝataj, tute distranĉitaj de la maro... Dissemis siajn liberajn koloniojn la gaja Grekio. Svarmas en la Mediteranea maro insuloj... Pastrinoj, junaj kaj graciaj, kun disbalaitaj bukloj, inspire dronigis siajn nigrajn okulojn... Gloron, gloron soifu, ho homo! En la tempesto de l' nerakontata gajeco, surdigita de l' sono de fero, flugu sur la kuntenatajn ŝildojn de l' militportaj legioj!... Al oriento siajn belajn okulojn, humidajn de ĝuo, turnas ankaŭ Grekio... Iu malriĉa vilaĝo, apogita al nudigitaj montetoj, maldense, neegale ombrata de sekiĝintaj figarboj... Komencas revii la antikva Egipto, ornamita de hieroglifoj, plu malaltigante siajn piramidojn...» Ĉu tio ne donas tuj la impreson, ke nova, animiga, unuiganta spirito cirkulas tra tiu antaŭe diserigita teksto? La vortoj revestis sin per siaj finaĵoj, ligis denove sin unu al la alia en flekseblaj artikigoj — reviviĝanta ostaro, denove tegita de karno kaj nutrata de fluanta sango.

¹ CAMILLE AYMONIER, *Pri Esperanto*. El franca lingvo esperantigis R. FERTER, Paris, 1913, pĝ 52. De tiu bonega verko mi multon pruntis.

Eĉ la plej talentaj verkistoj ne povas fari miraklojn. Ni ĵus vidis, kiel artifice von Wahl tiris sin de sia teksto; kiel do, ĉe sia tuta lerto, li estus traktinta la sekvantajn frazojn, en kiuj la esperantaj tradukintoj senpene kaj elegante reproduktis la ritmon kaj la signifon de la originalo?

Vian popolon ne plagu! — BIBLIO (En Occidental: *vor populus ne tribular!* «popolo» aspektus subjekto).

Brunan, grasan, viglan, sankta Pakomo estus ŝin aminta — A. FRANCE (En Occidental, la adjektivoj rilatus al Pakomo, aŭ estus komprenataj kiel adverboj).

Popol' rigardas iri, palegajn de teruro,

Nudpiede, la kaptitojn . . . V. HUGO

(En Occidental, «palegajn» rilatus al «popolo»).

. . . Ili paŝis,

Tenante la armilon ĉe l' brak', la frunton alta,

Seriozaj kaj stoikaj . . . V. HUGO

(En Occidental, *seriozaj kaj stoikaj* rilatus al *frunton*).

Ĉu la fadenojn de la vivo, teksitajn por vi en la transa vivo, mi ne povas tiel facile disŝiri, kiel ĉi tiun? — SCHILLER (En Occidental oni ne scius, ĉu *teksitajn* rilatas al *fadenojn* aŭ al *vivo* nek ĉu ĉi *tiun* estas rilatigota al *mi* aŭ al *fadenojn*, t. e. ĉu ĝi estas nomativa aŭ akuzativa).

Ni iru eĉ pli malproksimen: ĉu jenajn originalajn frazojn oni povus traduki en la occidentalan, konservante samtempe la ritmon kaj la klarecon?

Eternon mi balbutas, senlimon, ho Mistero!

K. KALOCSAY

La bruston peza vivo senkompata

Jen premas plata, senespere plata . . . K. KALOCSAY

Disajn tra l' mond', fermitajn en landniĉoj,

dum batas nin je ĉi tragika hor'

la sanga mar' de l' praaj superstiĉoj,

fidela, fratoj, restu nia kor'! G. E. MAŬRA

Envolvitajn en littukoj, makulitaj de sango kaj puso, kaŝitajn

*en litkovriloj, ni vidas mizerajn homajn korpojn preterpasi sur portiloj, ĉebrake subtenatajn de studentoj . . . — A. MUZZIOLI*¹

Kompreneble, temas ĉi tie pri literaturaĵoj . . . Sed kiu skribis, kaj prave: «La lingvo estas necesa, ne sole por skribado de poŝtkartoj kaj privata interparolo kun samideanoj, sed ankaŭ por ĉiutaga parolado kaj retoriko, politiko kaj literaturo, prozo kaj poezio, scienco kaj arto . . .»? Ĉu ne unu eminenta probatalanto de Occidental, s-ro A. Z. Ramstedt?² Kiu deklaris, kaj prave: «Tiu, kiuj limigas la servon de Lingvo Internacia al interparolado pri komercaj aferoj kaj al komerca korespondado, povas neateni la lingvan flekseblecon kaj preferi rigidecon; sed por fidele traduki ĉiuspecajn verkojn, skribitajn en ĉiaj lingvoj, la Lingvo Internacia devas kontraŭe posedi kiel eble plej grandan malrigidecon kaj flekseblecon, neniom perdante la klarecon . . .»? Ĉu ne la aŭtoro mem de Ido, s-ro Couturat, en sia historia kritiko de la planlingvoj? Cetere pri tiu punkto ĉiuj kompetentaj interlingvistoj konsentas: ni aŭskultu ankoraŭ la opinion de konata lingvisto kaj esperanisto, D-ro W. E. Collinson:³ «La ĝenerala demando pri la uzado de akuzativo estas intime ligita kun tiu de la vortordo. Sperto montris, kia grandvalora helpo por la parolanto kaj la skribanto estas ia elasta vortordo. la nereduktebla minimumo da fleksio ne estas tro peza pago por unu privilegio, kiu ebligas al la verkanto dori pli da reliefo al siaj ĉefideoj kaj atingi pli kontentigajn ritmefektojn».

Oni povas do senhezite konkludi, ke la Lingvo Internacia devas kontentigi tiom la postulojn de la artisma, filozofia aŭ diplomatia lingvo, kiom tiujn de la ĉiutaga. Kaj tion ĝi ne povos fari sen ia karakterizilo de la objekto, kiel, en la ĵus citita veko, konfesis Couturat mem: «Aŭ la Lingvo Internacia havos akuzativon, aŭ ĝi ne havos liberecon de vortordo!»

¹ Eble estas interese akcenti, ke tiujn du lastajn ekzemplojn skribis du aŭtoroj, kies patra lingvo ne konas akuzativon.

² Ni atentigas, ke la occidentalisto A. Z. Ramstedt ne estas identa kun la mondfama lingvisto G. J. Ramstedt, kiu de ĉ. 1890 estis esperantisto, kaj restis fidela al nia lingvo ĝis sia morto, la 25an de Novembro 1950.—F. F.

³ *Esperanto and its critics*, London, 1924, pĝ 9.

III

KIAL ESPERANTO HAVAS AKUZATIVON

Jen do resumo de la diversaj motivoj por kaj kontraŭ la starigo de fleksia akuzativo. Kia, antaŭ tiu situacio, estis la sinteno de la interlingvistoj? Unuavide, ŝajnas, ke oni povus rimarki inter ili la saman evoluon, kiun ni montris ĉi-supre ĉe la naturaj lingvoj: Volapük (1880), tiu kvazaŭ-latino de la planlingvoj, konis ankoraŭ 5 kazojn; Esperanto (1887), simila al la mezepoka franca lingvo, ilin reduktis al du, nominativo kaj akuzativo; Ido (1907) igas tiun lastan kazon nedevisa; Occidental (1922) forigas ĝin, krom ĉe la personpronomoj.

Sed tiu plaĉa perspektivo estas erara: jam en 1868 Pirro ĉe sia Universal Glott, jam en 1889 J. Lott ĉe sia Mundolingue, jam en 1903 Peano ĉe sia Latino sine Flexione forlasis ĉian fleksian akuzativon, eĉ pli komplete ol Occidental; kaj aliflanke O. Jespersen, ankoraŭ en 1928, ĉe sia Novial, ne nur konservis la nedevisan fleksian akuzativon de Ido (poste ŝanĝitan al prepozicia objektmorfemo), sed eĉ kreis novan kazon, unu genitivon per *-n*.¹

Eĉ pri Esperanto, la demando ne estas tiel simpla, kiel imagas al si multaj el niaj kontraŭuloj, kiuj naive — kaj malŝate — atribuas la konservon de fleksia akuzativo en Esperanto al la slavlingveco de ĝia aŭtoro. Mi jam rimarkigis, ke en tiu primitiva formo de lia lingvo, kiun montras al ni la fragmento citita en la *Letero al Borovko* (vidu, pĝ 23, la tekston n° 1), kaj antaŭa je 2 jaroj al la apero de Volapük, akuzativo tute ne ekzistas: komparu la du versojn:

*La tot' homoze in familje
Konunigare so debá!*

kun la traduko 'la tuta homaro en familion kununuigi sin devas'.

En posta formo de la sama lingvo, kiun oni trovas en tekstoj de 1881-1882 (vidu, pĝ 23 k. s., n° 2-15), la fleksia akuzativo estas en

¹ W. J. A. MANDERS, *Vijf Kunsttalen*, Purmerend, 1947, pĝ 233.

plena provado: en 8 el la 9 pecoj, la akuzativa finaĵo *-l* almetiĝas nur al la pronomoj. En unu sola peco, traduko de *La Rabistoj* de Schiller, tiu akuzativo estas provata ankaŭ ĉe la substantivoj.

Tiuj faktoj provas, ke, se Zamenhof enkondukis la fleksian akuzativon en la definitivan formon de sia lingvo, tion li faris post multaj provoj kaj naŭjara konsiderado. Alia fakto montras la gravecon, kiun li poste atribuis al la ekzisto de tiu kazo; kvankam, en sia reform-projekto de 1894, sub la influo kaj financa premado de Trompeter, li ĝin rezignis, poste, kiam dum la Idokrizo li ellaboris projekton pri reformoj por interkonsentigi la Delegacion kaj la esperantistaron, malgraŭ la postulo de Ostwald, ke la akuzativo malaperu, li konsentis igi ĝin nedevida nur ĉe la lokaj kaj tempaj adjektoj, sed obstine konservis ĝin «por la pli necesaj okazoj», t. e. por montri la objekton.¹ Certe li havis por tia persisto en la sama opinio konsiderindajn motivojn, kiujn diveni estas eble.

En efektiveco, la elekto de la diversaj kreintoj de Lingvoj Internaciaj dependis precipe de la maniero, kiel ili konceptis ĝin kaj de la celo, kiun ili proponis al si.

Por tiuj, kiuj, sekvante la vojon tre klarpense montritan jam en 1904 de André Blondel,² volas, ke la Lingvo Internacia estu kiel eble plej simila al la romidaj lingvoj, por von Wahl same kiel por la kunpatroj de IALA, la demando pri fleksia akuzativo povas ekzisti nur ĉe la pronomoj: ĉe la substantivoj kaj adjektivoj ne povas temi eĉ pri momenta hezito.

Sed por tiuj, kiuj, konsiderante la tutmondan skalon de apliko de Lingvo Internacia, ne volas simie kaj sklave ligi ĝin al certa tipo de malvasta lingvo-familio, sed depostulas por tiu komuna ilo de la tuta homaro pli grandan aŭtonomecon, pli grandan liberon en la elekto de ĝiaj materialoj, tiam la demandon pri akuzativo ĉe la substantivoj restas por diskuti.

Vere estas, ke, en ok el dek okazoj, la eŭropaj lingvoj metas la objekton post la verbo, tiel ke, ĉe unu planlingvo, la akuzativo kaj la pozicia morfemo havas la saman funkcion kaj senutile

¹ *Leteroj de Zamenhof*, IIa volumo, Parizo, 1949, pĝ 337.

² *Leteroj de Zamenhof*, Ia volumo, Parizo, 1948, pĝ 71.

duobligas unu la alian. La tento estas granda deklari la akuzativon pleonasma kaj ĝin forigi.

Tamen, el la dek restas du okazoj, ĉe kiuj la akuzativo sola savus la sencoklaron. Oni eĉ povas diri, ke ĉe planlingvo tiu proporcio estus pli alta, ĉar, pro la neevitebla heterogeneco de ĝiaj uzantoj, lingvo internacia donos al ne-eŭropanoj okazojn de miskompreno ankaŭ tie, kie eŭropaj lingvoj kapablas preterpaŝi tiun ŝtonon de falpuŝiĝo.

La demando estas do, finfine, ĉu lingvo, kiu aspiras fariĝi vere internacia, t. e. fariĝi la rimedo de perfekta interkompreniĝado inter parolantoj de plej diverssistemaj naturaj lingvoj, povas lasi en si lokon al hezito, al dubo, al malklaraĵoj? Ĉu ĝi rajtas kalkuli je la divenpovo de ĝiaj uzantoj, alidire allasi al ili eblojn de eraro? La respondo estas, laŭ mia opinio, evidenta per si mem.

Kaj se la pagota prezo ŝajnos al ni tamen alta, ni almetu, por faciligi niajn bedaŭrojn, sur la alian pesiltason, la konsideron pri la grandega, kaj de ĉiuj konfesata, dezirindeco de plene libera vortordo. Jen sufiĉe por pravigi Zamenhof.

Restas nur por esplori, ĉu oni uzu tiun akuzativon en ĉiuj okazoj, aŭ nur tie, kie ĝi estas necesa por eviti sencodubon. Tiu ĉi lasta formulo estis elektita de Couturat por Ido kaj de Jespersen por Novial. Ĝi estas tre alloga, ĉar ĝi konservas samtempe la avantaĝojn de la akuzativo kaj grandaparte evitas la ŝarĝon, kiun ĝi pezigas sur la frazo. Tamen la fakto, ke Zamenhof, en sia tre fidinda lingvo-instinkto, neniam haltis ĉe tiu formulo, estigas kelkan dubon pri ĝia efektiva valoro. Kiaj estas do la meritoj de tia solvo?

Pli simpla, ĝi evidente estas. Pli facila? Ne, ĉar por konscii, ke la objekto staras antaŭ la verbo, oni ja devas ankaŭ scii, kio estas objekto; same pri la objekta predikativo ktp. Almenaŭ, ĉu sekura? Malgraŭ la ŝajno, mi opinias, ke ne: la parolanto aŭ la verkanto, ne kutimiĝinta al la uzado de tiu kazo, ĉar en sep aŭ ok el dek okazoj li ĝin ne uzas, riskas tre ofte forgesi, ke ĝuste en tiu ĉi inversio, en tiu ĉi elipso ĝi fariĝas escept-okaze deviga. "Kaj la aŭskultanto aŭ leganto, kiam li en unu duba okazo konstatos mankon de akuzativo, neniam ĝuste scios, ĉu tiu manko estas la rezulto de intenco aŭ de forgeso. Unu konata lingvisto iam humure skribis: «Ke la finaĵo akuzativa ne estas ia luksaĵo, plej bone

evidentiĝas el tio, ke ĉiuj reformistoj, kiuj kritike mallaŭdis Esperanton tiurilate, malgraŭ ĉio en siaj propraj lingvaj projektoj konservis la akuzativon, tamen tiamaniere, ke ili aŭ limigis ĝin al la pronomoj aŭ provizis la akuzativan finaĵon per specialaj klaŭzoj, laŭ la stilo bonkonata el la fervojvagonoj pri alarmobremso: *Uzota nur ĉe efektiva danĝero. Senrajta uzo estos punata*.¹ Kaj ĝuste same okazas pri la nedeviga akuzativo, kiel pri la alarmobremso: ĝi plejofte neniel utilas, ĉar la danĝeron oni konsciis nur post la katastrofo.

Lastan argumenton mi devas menci, favore al la deviga uzado de la akuzativo, t. e. la kongruenco kun la strukturo mem de Esperanto. Sed tio estas alia temo, kiun mi tuŝos en aparta artikolo.

* * *

Ni povas do konkludi, post detala esploro, ke, se Esperanto havas devigan akuzativon, tio ne devenas de mi ne scias kia malklereco ĉe ĝia aŭtoro; tio ne mallevas ĝin ĝis la rango de «barbara ĵargono», kiel volus kredigi al ni neseriozaj pamfletistoj, aŭ de «groteska arbitraĵo» (*groteske Willkür*), kiel iam nomis ĝin von Wahl en bedaŭrinda koler-impulso. Ni ĉiuj scias ja, ke ĉe la homaj aferoj oni tre malofte havas por elekti inter bono kaj malbono: en la kutima irado de la mondo, la homa saĝo estas nur el du malbonoj la pli malgrandan elekti. Neniam Zamenhof nek la esperantistoj kaŝis al si la malavantaĝojn de la akuzativo deviga; sed ili ĉiam konsciis, ke tio estas la neevitebla kompenso de tre realaj kaj alte ŝatindaj avantaĝoj.

Sed tiuj avantaĝoj estas percepteblaj nur ĉe certa grado de solideco en la penso kaj de delikateco en la stilo; ili evidentiĝas plene nur en tekstoj, kiuj celas esprimi kaj ne nur babili. Kaj sama estas la afero pri aliaj lingvaj grandvaloraĵoj: ilin oni atentigas nur, kiam oni rigardas pli alte ol la nivelo de la felietonaj

¹ Prof. BJÖRN COLLINDER, *La problemo de lingvo internacia*, Purmerend, 1938, pĝ 58-59.

frazoj. La interlingvistikaj diskutoj plenplenas je rimarkoj, kritikoj, proponoj ktp rilataj al la fonetiko kaj morfologio, t. e. al la eksteraĵo de la parolo; pri la sintakso, pri la stilistiko, t. e. pri ĝia internaĵo — nenia raporto! Oni ĉiam havas en la buŝo la vortojn de okcidenta kulturo, de moderna civilizo — kaj oni vere kredigus, ke tiu kulturo aŭ civilizo kuŝas tuta en la formo de tiu aŭ alia sufikso, en la elekto inter finaĵa aŭ partikla konjugacio! Nun venis vere la tempo doni iom pli da seriozeco al tiuj supraĵaj, kaj tro ofte pasiaj, polemikoj, kaj senpartie pritrakti la lingvajn demandojn kun konsidero al la altaj kaj noblaj uzoj, al kiuj devas antaŭ ĉio servi la Lingvo Internacia. Oni jam sufiĉe demonstris, kaj ĉiam egale facile demonstros, ke oni povas verki propagandajn broŝuretojn, rakonti amuzajn anekdotojn aŭ traduki vulgarigajn artikolojn, ne bezonante helpon de akuzativo, de akordiĝanta adjektivo, de subtilaj subjunkcioj ktp. Alia afero estus, se temus pri la traduko de la *Biblio* aŭ de la *Odiseado*, de la *Infero* aŭ de *Faust*, de la Madách-a *Tragedio de l'Homo* aŭ de la Mickievic-a *Sinjoro Tadeo*, de la sanskrita *Bhagavad-Gita* aŭ de la finna *Sep fratoj*... Sed, konfesinde, por ekvidi tiajn altajn perspektivojn, nur Esperanto pruvis sin sufiĉe granda...

LA AKUZATIVO EN ESPERANTO

Kiam Zamenhof, en la jaroj 1881-1882, konsideris la enkondukon de la akuzativo en sian lingvon (oni eble memoras, ke en tiu tempo nur la pronomoj deklinaciigis), li verŝajne estis al tio alkondukita pro praktikaj eksperimentoj. Li senĉese elprovis sian lingvon per tradukoj, precipe el la germana (Heine, Andersen, Schiller) kaj el la hebrea (la Biblio); en la daŭro de tiu tradukado, li certe estis frapita de la eblaj konfuzoj, kiujn kuntrenis la manko de akuzativo ĉe la substantivoj; mi citos por ekzemplo nur la unuan version de lia tiutempa traduko de la fama poemo de Heine:

Mo bella princino in sonto vidá
(= mi belan princinon en-la sonĝo vidis)

en kiu la vortoj *bella princino* povus egale esti komprenataj kiel apozicio al la pronomo (= mi, bela princino, vidis...). Oni ne devas do supozi, ke, ĉe la enkonduko de akuzativo por la substantivoj, Zamenhof teorie kaj detale difinis al si la diversajn uzojn de tiu nova kazo. Kaj verŝajne li komence intencis signi per ĝi simple nur la objekton rektan, same kiel ĝi tion signadis jam ĉe la pronomoj.

I

LA OBJEKTA AKUZATIVO

A. En ĉiuj tiuj lingvoj, kiujn li prenis por modelo, efektive, la ĉefa kaj esenca valoro de tiu kazo estas ja montri la personon aŭ la aĵon trafitan de la ago esprimita per verbo (aŭ, kiel diris Zamenhof, «la suferanton de la faro»); hebrea: *'eth-hārāsā iŝpōt hāēlōhīm* (la malpiulon juĝos Dio); latina: *pasce capellas* (paŝtu la kaprinojn); rusa: *ja viŝu carja* (mi vidas la caron); germana: *den Frieden liebe ich* (la pacon amas mi).

Sed tuj de la komenco ni renkontas hezitagajn punktojn. En la aluditaj lingvoj, la regulo pri la akuzativigo de la rekta objekto ne ĉiam egale aplikiĝas: en la hebrea, ekz-e, oni ne uzas la akuzativ-prepozicion antaŭ la nedifinitaj substantivoj; en la rusa, oni anstataŭigas akuzativon per genitivo en la negaciaj frazoj. Sed ĉi-tie estis facile trovi la rimedon en unuformigita uzado de la akuzativo.

B. Dua malfacilo estis pli grava. El la verboj, kiuj signifas agon transirantan al ia objekto, ne ĉiuj montras tiun objekton per akuzativo; kelkaj montras al ĝi per aliaj kazoj, aŭ per prepozicioj. Tion la gramatikistoj nomas «la nereкта objekto», kaj faras el ĝi sian regalon. Kio cetere pli malsimpligas la aferon, estas, ke ne la samaj verboj tiel kondutas en ĉiuj lingvoj: ruse oni deziras, atendas, petas, timas «de iu» (genitivo), oni helpas, servas, flatas, minacas, venĝas «al iu» (dativo), oni posedas, estimas, oferas «per io» (instrumentalo) ktp, dum en la franca ĉiuj tiuj verboj estas uzataj kun rekta (senprepozicia) objekto. Male la hebrea diras: «malsani la piedojn, flui lakton kaj mielon, abundi grenon» ktp, dum post tiaj verboj la eŭropaj lingvoj ordinare uzas nerektan objekton, kiun eĉ kelkaj gramatikistoj rigardas adjekto. Ĉi-tie la solvo estis do pli malfacile trovebla, des pli ke nenia logika principo regas tiujn diversajn manierojn de esprimado.

Ŝajnas, ke, en la unuaj jaroj de sia lingvo, Zamenhof inklinis en tiuj okazoj uzadi sisteme nur la akuzativon: jam en traduko el Schiller (1880), ni legas: *to sciidzuj koj malmadzal* (= vi sciigos nur malmulton). Verŝajne al tiu unua sinteno ni ŝuldas la multajn similajn ekzemplojn troveblajn en la verkoj de la jaroj 1887-1888: *ni devas lin helpi (Unua Libro); ili rigardigis iliajn legantojn, kiel malbonsona . . . ; ili rigardigis, kiom da malfacillaboro kredeble la afero min kostis; se ia kompetenta akademio min sciigos, ke . . . ; tion ĉi vi ne povas respondi!; mi miras la saĝecon de tiu ĉi homo; li ne parolas eĉ unu vorton; kion li babilas?; ŝi ofte sonĝas mortintojn; plori la perdon . . . (Dua Libro); multaj . . . koleras min; mi respondas ĉiun leteron; tiam la tuta afero ja nenion taŭgos; la publiko povu koniĝi tiun ĉi lingvon; la nuna grandeco de la vortoj povas resti en la lingvo kaj neniu sentos la bezonon ĝin plendi . . . («La Esperantisto»).*

Tiun larĝan koncepton pri la uzado de la akuzativo Zamenhof ĉiam konservis: ankoraŭ en 1908 li skribas, en sia traduko de la *Psalmoj*: *tiu gravediĝis malbonon* (Ps. VII, 14); kaj, ĉar kelkaj argumentis el tio, ke oni ne bezonas uzi la voĉ-indikajn sufiksojn *-ig-* kaj *-iĝ-*, Grabowski, tiama Direktoro de la Akademia Sekcio pri Gramatiko, publikigis jenan noton en la Oficiala Gazeto: «Laŭ klarigo de l' Majstro, la opinio, ke en Esperanto ĉiu verbo povas havi sencon aktivan kaj pasivan ne estas ĝusta. La fakto estas, ke ĉiu verbo povas havi post si rektan komplementon, sed ne ŝanĝante la sencon de la verbo».

C. Sed post la etapo de 1882 Zamenhof provis alian solvon. Efektive li pli kaj pli konsciis, ke tia ĝeneraligita uzado de la akuzativo ĝenos multajn personojn, almenaŭ en la komenco: kutimintaj uzadi prepozicion post tiu aŭ alia verbo, ili ĉiel serĉos ian rimedon por ĝin traduki, kaj se rimedon oni ne donos al ili, ili simple uzados sian nacilingvan ne logikan formon. Jen kio probable inspiris al Zamenhof la elpenson de ia abstrakta, sencomalplena, nur forma prepozicio, la esperanta *je*.¹ Tiu elpenso okazis verŝajne ne tro longe antaŭ 1887, ĉar en la *Unua Libro* li akcentas ĝiajn meritojn, pli ol li faris poste en la esperanta traduko de la *Fundamenta Krestomatio*: «Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed, se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ~~ne~~ devas preni,² tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu memstaran signifon ne havas;

¹ Por diri la tutan veron, ni ne povas aserti, ke *je* estis kronologie la unua eltrovo en tiu direkto. La sola certo estas, ke Zamenhof, en tiu tempo, malkovris (eble el propraj eksperimentoj, eble el lingvaj studoj), ke teorie povas ekzisti kaj praktike ekzistas en kelkaj lingvoj vortoj, kiuj ne havas konkretan signifon, sed estas nur fonetika transskribo de gramatika rilato. Tiun fekundan ideon li eluzis trifoje, laŭ sia deklaro en la Ekzercaro de la *Dua Libro*: ĉe la malplena prepozicio *je*, ĉe la malplena sufikso *um* kaj ĉe la malplena verbo *meti* (sed pri tiu ĉi lasta verbo, la malpleneco estas malpli kompleta, ol ekz-e ĉe la franca verbo *faire* en la klasika lingvo, kie ĝi povas anstataŭi iun ajn alian verbon).

² La *Unua Libro* «por Francoj» diras eĉ pli grandioze: «se estas necese uzi unu prepozicion en tia okazo, en kiu ĝia elekto ne rezultas el la naturo mem de la aferoj...»

ekz-e *ĝoji je tio, ridi je tio, enuo je la patrujo*. La klareco de la lingvo neniel suferas de tio, ĉar en ĉiuj lingvoj oni uzas en tiuj okazoj kiun ajn prepozicion, se nur ĝin sankciis la kutimo. La internacia lingvo uzadas, en tiu okazo, nur la prepozicion *je*. Tamen anstataŭ la prepozicio *je* oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio».

Malgraŭ tiu alloga reklamo, la uzado de *je* antaŭ nereкта objekto ne tre prosperis: en la *Unua Libro* ni trovas nur unu ekzemplon: *je kia lingvo li skribis?* (oni efektive povis heziti inter *en* kaj *per*; estos *en*, kiu triumfos). En la *Dua Libro* oni trovas *je*-objekton post la verboj: *respondi (je letero), labori (je afero), sin okupi (je malsaĝeco), eksedziĝi (je ŝi), fianĉigi (iun je iu), morti (je malsano), enamiĝi (je li)*. Jena frazo de la *Unua Ekzercaro* aspektas eĉ kiel reklamo: *Koniĝinte je tiu ĉi nobla homo, mi tuj amikiĝis je li*. En la *Aldono al la Dua Libro* nur: *senigi sin (je privilegio)*.¹

D. Tiuj du unuaj solvoj, kvankam oportunaj kaj faciluzaj, tamen ne fariĝis sisteme uzataj. Jen kie ni povas konstati la ne subpremeblan forton de la lingva substrato. Sistema uzado de la akuzativo en tiaj okazoj ĝenis, ĉar ĝi anstataŭigis kutiman esprimilon per alia tute malsama, kaj ĝi impresis kvazaŭ truo en la fraztekstaĵo; la sistema uzado de *je* ne donis tiun ĝenan impreson, sed aliflanke ĝi ne kontentigis la bezonon pri konkreta, kolora esprimo. Tiujn reagojn Zamenhof spertis dum la unuaj jaroj de la propagando, kaj tial iniciatis ian ŝanĝon de stilo kaj eĉ de sintakso. Oni efektive ankoraŭ ne rimarkigis, ke pri pluraj punktoj, kiel la uzado de *sia*, de la adverbaj formoj de la sensubjekta predikativo, de *iĝi* anstataŭ *-i sin* ktp, la lingvaj kutimoj de Zamenhof profunde evoluis ĉirkaŭ la jaro 1894; la traduko de *Hamleto* montras al ni lingvon multilate pli modernan, ol la tekstoj de la antaŭaj jaroj: rezulto de la kontakto kun la publiko kaj pliviviĝo de la lingvo dank' al vasta korespondado kaj gazeta polemikado.²

¹ Kvankam ekster nia temo, mi menciuj ĉi tie alian pruvon pri la propagando por *je*, t.e. la pruvon uzi ĝin prefikse: *la bovo jelaboras la kampon (Unua Ekzercaro)*. En tiu funkcio, Zamenhof uzas ankaŭ *jeĵuri*. En ambaŭ okazoj oni nun uzas *pri-*.

² La preteratento de tiu fakto sufiĉas, ekzemple, por senvalorigi preskaŭ ĉiujn lingvajn studojn de W. Bailey, kiel ajn konsciencaj ili eŝtis.

Jam sur la tria paĝo de *Hamleto* ni renkontas la version:

Ne kredas li pri la fantom' terura . . .

en kiu la *je* cedis lokon al pli ĝusta kaj pli preciza prepozicio. Kaj de tiam ni vidos tiun tendencon ĉiam pli efikadi. El la verboj cititaj sub B., preskaŭ ĉiuj reakiris rajton al konkreta prepozicio, ĉiufoje kiam tiu montriĝis sufiĉe internacie uzata: *kosti, dolori, rigardi, komprenigi, sciigi al iu; koleri kontraŭ iu; miri, respondi, paroli, babili, sonĝi, koniĝi pri io; taŭgi por nenio* ktp. El la verboj cititaj sub C., preskaŭ ĉiuj same evoluis: *respondi al, labori super* aŭ *pri, sin okupi pri, ridi pri, fianĉigi kun, amikiĝi kun, morti de* ktp. Same al *enamiĝi je iu* (represo de *La Ombro*, en la *Fabeloj*) Zamenhof preferis poste *enamiĝi en iun*. Konkludon de lia sperto pri la prepozicio *je* ni povas trovi en jena frazo de «La Esperantisto» (1894, N° 2): «la pli kompetentaj Esperantistoj en la lasta tempo ne senprave evitadis tiun ĉi vorton», kaj en la posta konsilo de la Ekzercaro (1894): «estas bone uzadi la vorton *je* kiel eble pli malofte».

E. Alia kurioza influo de la nacilingvaj kutimoj estis, ke post kelkaj verboj nek Zamenhof nek la unuaj esperantistoj iam uzis la permeson pri la anstataŭa akuzativo, kvankam fojfoje, ekzemple en poezio, tiu estus al ili tre oportuna: oni legas ĉiam *aparteni al iu, plaĉi al iu* ktp. Aparte karakteriza fakto estas, ke ĉe la pronomoj la anstataŭa akuzativo, iniciatita de Zamenhof (vidu la ekzemplojn sub B.), preskaŭ tuj malaperis: la rusa kaj germana lingvoj, efektive, tre klare distingas la akuzativan kaj la dativan formon (Rusa: *menja* — *mnje*; germana: *mich* — *mir* ktp). Se Esperanto estus komence disvastiĝinta sur francalingva aŭ anglalingva teritorio, ambaŭ lingvoj en kiuj la sama formo servas por la du kazoj (*F me* aŭ *moi*; *A me* ktp), verŝajne estas, ke estus prosperintaj dirmanieroj kiel: *diru min, kion vi pensas* aŭ *skribu lin tuj veni*.

F. Restas ankoraŭ unu aspekto de la problemo pri la objekta akuzativo, t. e. la vastigado de ĝia uzo post vortoj aliaj, ol la verboj. Tio estas problemo, kiu en la hindeŭropaj lingvoj ne elmetiĝis, ĉar tiuj lingvoj akre distingas la sistemon de la verbo disde la sistemo de la substantivo (la tiel nomata «akuzativo de

rilato» ne estas ĉi tie koncernata). Sed Esperanto estas lingvo, en kiu la radikoj restas senŝanĝaj kaj memstaraj, kaj sekve konservas sian verban valoron eĉ sub la vesto de substantiva aŭ adjektiva finaĵo. Sekve la spirito mem de la lingvo emigis al uzado de objekta akuzativo post ne-verbaj vortformoj. Eble en tio Z estis ankaŭ influata de la hebrea lingvo, kiu konas tiajn konstruojn: *'abhdā'akhā hājā jārē' 'eth-jahwe* (= via-sklavo estis pia Dion); *mālā'ā hāārec dē'ā 'eth-jahwe* (= estas-plena la-tero de-konado Dion).

Ni distingos la ekzemplojn laŭ la gramatika kategorio de la verbradika vorto:

1) *Nomo de aganto*.—Objekta akuzativo post *nomo* de aganto ŝajnus la unua ŝtupo de la vastigado de tiu kazo: el *li skribas leteron* oni tuj transirus al *la skribinto leteron*. Tamen nur unu ekzemplon de tiu regmaniero mi trovis en la tekstoj konataj de mi el tiu periodo:

Mortu ĉiu intriganto

Kaj malamon konservanto

Longe en la koro!

(*Dua Libro* — repesita en *F K*, pĝ 329)

Kaj tiu estos la sola dirmaniero, kiun Zamenhof poste malkonsilos (Vd *Lingvaj Respondoj*, 3^a eld., pĝ 67) — kvankam li ne deklaras ĝin malkorekta.

2) *Nomo de agado*.—Male la objekta akuzativo post substantivo esprimanta agadon troviĝas plurfoje en la tekstoj de la unuaj jaroj: *Tre grava por la progresado de l' lingvo internacia estas diligenta uzado ĝin en korespondado* (*Aldono al la Dua Libro*); *La gazeto havos la celon labori por la progresado de tiu ĉi lingvo kaj por la vastigado ĝin en la mondo*; *La Ligo havas la celon zorgadi pri la disvastigo kaj enkondukado en la tuta mondo unu neŭtralan lingvon; multaj artikuloj, anstataŭ paroli pure pri nia lingvo, sin okupas de la komenco ĝis la fino je komparado ĝin kun Volapük* («La Esperantisto»). Tiun dirmanieron cetere Zamenhof neniam rezignis, kaj ankoraŭ du jarojn antaŭ sia morto li skribis: *Ĉi tiu devigata konstanta alkalkulado sin al ia speciala gento...* (*Alvoko al la Diplomatoj*, 1915). Sed pro la ĉi-supre montrita motivo,

ĝi nenie estis imitita, kaj ankaŭ ne la analoga uzado de *je*: *la juĝo de l' publiko je l' lingvo proponita de mi* (*Dua Libro*). Tiaj konstruoj restis nur kuriozaj zamenhofismoj.

3) *Adverbo*.—Tian konstruon oni trovas, en la esploritaj tekstoj, nur post la adverbo *danke*: *danke la fantazian punkton de l' voĉdono...* (*Dua Libro*); *danke tiun vastan liberecon...*; *vortoj, kiujn mi danke la gramatikon ne bezonis presi en la vortaro* (*Aldono al la Dua Libro*). Kurioze estas, ke tiu dirmaniero malaperis ĝuste post tiu aparta adverbo (ĝin anstataŭis, jam en 1893, la formo *dank' al*, kiu povas gramatike prezenti nur *danko al* kun neregula «absoluta nominativo», kaj estas simpla kopio de la franca *grâce à*, kaj germana *dank Ihnen*), sed prosperis post la analogaj adverboj: *koncerne, rilate, spite* ktp. Post aliaj similaj verbodevenaj adverboj, tamen, oni de longe pli kutimiĝis uzadi prepozicion.

4) *Adjektivo*.—Objekta akuzativo post verbodevena adjektivo ne estas trovebla en la unuaperiodaj tekstoj. Sed ekde 1900, oni ĝin trovas en unu sola okazo, post la adjektivo *inda*, kies senco tiam asimiliĝas al tiu de participo kiel 'meritanta'. En *Esenco kaj Estonteco* ... ni legas: *infanaĵo, kiu estas inda nenian atenton*, kaj Zamenhof konservis tiun dirmanieron, ekzemple en *Marta* (1910): *mi fariĝis inda vin*. Sed la ĝenerala uzado preferis la prepozician formon *inda je* aŭ *inda de*.

II

LA DIREKTA AKUZATIVO

A. Apud sia propra valoro de objekt-esprimilo, la akuzativo havas ankaŭ en la hindeŭropaj lingvoj du aliajn valorojn, kiuj malfacile povas reduktiĝi al la unua. El tiuj du, Esperanto alprenis la unuan, kiu esprimis la celon de movo.

Rimarkinde estas, ke distingo inter la movaj kaj senmovaj lok-adjektoj ne ekzistis, almenaŭ laŭ nia scio, en la praesperanto de 1881; tie Zamenhof faris nenian distingon inter *il nokto la mortagoj allé il sengo* (= en la nokto la mortintoj iras en-la sinagogon), kaj *igno mo santé il kordo* (= fajron mi sentas en-la koro). Sed

en samtempa alia provo, la sola en kiu li uzadis la akuzativon ĉe la substantivoj, li skribas jam laŭ la estonta esperanta formulo: *kadental ba sal sellol* (= falantan sur sian seĝon).

Ĉe posta etapo, li plu ne hezitis pri la neceso distingi la celon, al kiu iras movo, disde la loko, interne de kiu okazas movo. Sed tiam li devis elekti inter du rimedoj, aŭ duopo da prepozicioj, aŭ akuzativo kun eventuala uzo de unu prepozicio.¹ Al tiu ĉi lasta solvo li decidiĝis ĉe la definitiva formo de Esperanto. Ni efektive trovas en la unuaperiodaj tekstoj jenajn ekzemplojn de pure akuzativa cel-adjekto: *Kolektu sin la akvo de sub la ĉielo unu lokon!*; *Sendu ĝin ĉiun vilaĝon, ĉiun urbon kaj urbeton (Unua Libro)*; *li eniris la ĉambron*; *mi veturos Hamburgon (Dua Libro)*. Des pli interesaj estas tiuj ekzemploj, ke, ĉe la unua, la hebrea originalo prezentas prepozicion (*'el māqōm 'eḥādh* = al loko unu), kaj ke, ĉe ĉiuj, la rusa aŭ germana lingvoj uzus ankaŭ prepozicion. Ni trovas do ĉi tie propre esperantan formon, kiu pro la nacilingvaj kutimoj ne povis tamen enradikiĝi: oni konservas ĝin hodiaŭ preskaŭ nur ĉe la propraj nomoj de loko (*veturi Parizon*).

Oni cetere rimarkos, ke la uzo de la pura akuzativo povas, post certaj verboj, okazigi konfuzon kun la objekta akuzativo: en tiu frazo de Grabowski: *la sortigiton ni per ĉevalo ne forkuros (La neĝa blovado, 1888)*, oni povus dubi, ĉu la akuzativaĵo estas la movocelo aŭ male la deirpunkto, kaj heziti unuavide inter la du signifoj: 'ni ne forkuros for de nia sorto', aŭ 'ni ne forkuros al nia sorto'.

B. Tiu direkta akuzativo ŝajnis al Zamenhof tiel oportuna, ke li ne hezitis apliki ĝin eĉ al la poziciaj adverboj — kion klasikaj gramatikistoj opinius monstraĵo: deklinacieblaj adverboj! Tre frue oni trovas, ekzemple: *la afero sin movas antaŭen*; *mi rigardis, kien neniu povis rigardi*; *li tien ĉi venis*; *mi kuris supren kaj malsupren (Dua Libro)*. Kaj la ĝisnuna uzado fidele konservis tiun aŭdacon, ĝin uzante eĉ pli larĝe ol Zamenhof mem. Efektive, la duobla

¹ Ekzemplojn de tiuj du solvoj oni trovas en la variantoj N° 2 unuflanke kaj N° 1 aŭ 3 aliflanke de la projektoj de reformoj 1894: *ku sah il celo* kontraste kun *No dukuh nun in tento*, ĉe la varianto N° 2, sed *kvo sah in celo* kontraste kun *Ne dukuh min in tenton*, ĉe la varianto N° 1 (Vidu pĝ 49, 50).

tendenco al mallongigo kaj al evito de pure akuzativa cel-nomo efikis tiamaniere, ke multaj esperantistoj simple adverbigas la substantivon: *supreniri ĉielen, kuri hejmen, sendi eksterlanden, sin ĵeti teren* ktp ŝajnas malpli ĝenaj ol *supreniri ĉielon* ktp.

Rimarkinde estas, aliflanke, ke, se Zamenhof aplikis al la adverboj la akuzativon de direkto, li estis pli konservativa rilate al la objekta akuzativo; kaj tamen la paralelismo inter *Esperanto trovis multegon da amikoj* kaj *nia afero postulas tre malmulte da oferoj* estus rajtiginta, laŭ la analogio, la atribuan de la objekt-signo al tiu kategorio de adverboj (*postulas tre *malmulten . . .*).

C. Analoge al la konstruoj montritaj sub I F. 2), Zamenhof uzis la direktan akuzativon ne nur post verbo, sed ankaŭ post verbevena substantivo. Ekzemploj hazarde mankas en la verkoj de la jaroj 1888-90, sed poste oni ne malofte trovas frazojn de la tipo: *ni trinkis . . . por mia feliĉa reveno hejmen* (*Fabeloj de Andersen*, III, pĝ 109). Kaj la nunaj esperantistoj, kiuj nepre evitas la uzon de objekta akuzativo post substantivo, konservis kaj plu uzadas en la sama konstruo la direktan akuzativon (*mia vojaĝo Hispanujon*); cetere, ĉe la vortoj alispecaj ol la landnomaj, ili preferas la adverban formon: *punata per morto estas la aeroplana fuĝo eksterlanden*.

D. La direkta akuzativo troviĝas ankaŭ post certaj lokaj prepozicioj, post tiuj almenaŭ, kiuj ne esprimas per si mem ideon de almovo: *Ne konduku nin en tenton; la junecon . . . metis mi sur la altaron; li kuris sur la kampon* (*Unua Libro*); *li kondukis la kolegojn en sian loĝejon* (*Dua Libro*); *. . . prenu en siajn manojn la sorton de la lingvo* (*Aldono al la Dua Libro*).

Sed oni ne misinterpretu tiujn ekzemplojn: male al la stato de la rusa aŭ germana lingvo, tiu akuzativo ne dependas de la prepozicio; ĝi estas tute la sama, signife kaj funkcie, kiel en la ekzemploj cititaj sub II A., kaj simple aldoniĝas al iu prepozicio, kiu montras nur, ke la celo estas ne aĵo, sed pozicio rilate al aĵo. Tiu tre oportuna esprimilo tute konserviĝis en la hodiaŭa uzado — kun tiu rezervo tamen, cetere jam esprimita de Zamenhof (*Lingvaj Respondoj*, 3^a eld. pĝ 52), ke ofte oni povas uzi la nominativon post

poziciaj prepozicioj, «se la senco de direkto koncernas ne la substantivon, pri kiu ni parolas, sed iun alian vorton, kiun ni subkomprenas; ekzemple oni povas tute bone diri *oni metis antaŭ mi manĝilaron*, komprenante sub tio *sur la tablon*».

III

LA ADJEKTA AKUZATIVO

Se oni principe difinis la akuzativon kiel la kazon de la objekto, povas ŝajni nelogika uzi la saman kazon por certaj adjektoj. Tian nelogikaĵon konis tamen la hindeŭropaj lingvoj, kiuj uzis tiun kazon por signifi la spacan aŭ tempan etendiĝon, t. e. distancon (latina: *negat se a te pedem discessisse* 'li diras, ke li ne malproksimiĝis de vi unu paŝon') aŭ daŭron (*tres annos regnavit* 'tri jarojn li reĝadis'). Sama stato konserviĝis ankoraŭ en la rusa kaj parte en la germana. Sed pli instrua por nia afero estas la hebrea lingvo: ĝi efektive konas tre vastan uzadon de absoluta nominativo (la tradicia gramatiko eĉ nomas ĝin akuzativo, sed ja mankas la karakteriza prepozicio 'eth) per kiu ĝi esprimas proksimume ĉiajn adjektajn, de loko, distanco, pezo, mezuro, daŭro, dato, rezulto ktp: *nihag rūaḥ-qādhīm bā'ārec kol-hajjōm hahū wəkol-hallājā* (li-direktis orientan venton sur-la-lando tuta-la-tago tiu kaj tuta-la-nokto: *Eliro* X 13); *hikkīthā 'eth-kol-'ojəbhaj leḥī* (vi-frapis ĉiujn-miajn-malamikojn makzelo: *Ps* III 8); *wajjībhāne 'eth-hā'ābhānīm mizbēaḥ* (li konstruis la ŝtonojn altaro: *I. Reĝ* 18, 32) ktp. En tiuj du lastaj ekzemploj, Zamenhof, en sia traduko de la *Biblio*, inversigis la konstruon: *Vi frapis al ĉiuj miaj malamikoj la vangojn, kaj li konstruis el la ŝtonoj altaron*.

A. La ĉi-supraj faktoj probable inspiris al li la saman uzadon de absoluta nominativo en la praesperanto de 1880-81: *un dio o jam kompá rol mortaga* (= unu tagon oni jam kalkuladis lin mortinta); *eĉ mianto o ne lassá mol i kvilo* (= eĉ momenton oni ne lasis min en trankvilo); *sej kaŭ só allá malmagna denco* (= sed apenaŭ ŝi iris malgrandan distancon); *il kalaj guroj la ŝemmo rajiŝé*

alia prekalto el di no (= en-la varmaj landoj la suno radias alian varmegon, ol ĉe ni). Kiam li sistemigis la akuzativon ĉe la adjektivoj kaj substantivoj, li tute nature akuzativigis tiujn absolutajn adjektojn, kiel oni povas vidi el jenaj ekzemploj de 1889-90:

1) Tempo: *elirante ankoraŭ unu fojon. . . ; kelkajn fojojn mi eĉ legis longajn artikulojn. . . ; G. Vaŝingtono estis naskita la dudek duan Februaron; ricevinte kelkajn fojojn tiujn leterojn. . . ; la elpelito malsatas jam la trian tagon (Dua Libro).*

2) Daŭro: *servinte en la militistaro tridek jarojn. . . ; li babiladas la tutan tagon; mi restis tie tri semajnojn; laborante dekkvin horojn ĉiutage. . . (Dua Libro).*

3) Maniero: *ĉiu hajlero pezis pli ol kvindek gramojn; ĉu vi ludas violonon? —Ne, mi ludas kartojn; en la varmegaj landoj la suno radias alian varmegon ol ĉe ni; ni trinku nian fratecon! (Dua Libro).*

B. Kompreneble, en la samaj tekstoj oni ankaŭ trovas por tiu funkcio la pli freŝdate elpensitan prepozicion *je*:

1) Tempo: *je l' fino de la jaro. . . ; je unu bela tago ni sciigos. . . ; je l' deka horo; je kioma horo. . . ?; je l' vespero. . . ; je unu vespero. . . (Dua Libro).*

2) Daŭro: *mian laboron mi prezentas je l' tempo de unu jaro; je eterne (Dua Libro).*

Koncerne tiun alternativon, Zamenhof ne faris do distingon inter la objekta aŭ la adjekta okazo: por ambaŭ li formulis la saman regulon: «en ĉiuj okazoj, kiam ni ne scias, kian prepozicion uzi, ni povas uzi la akuzativon anstataŭ la prepozicio *je*» («La Esperantisto», 1892). Kaj li mem certe montris evitemon kontraŭ tiu malplena prepozicio: en la represo de la *La Ombro*, li ekzemple korektis la ĉi-supre cititajn *Je l'vespero* per *Vespere* kaj *Je unu vespero* per *Unu vesperon*.

C. Same kiel pri la nerektaj adjektoj, la plena elektolibereco lasita de Zamenhof al liaj disĉiploj evoluis al pli kaj pli precize difinitaj kutimoj. Unuflanke oni ne uzis la permeson ĉe la adjektoj, kies senco estas tute preciza kaj esprimilo senhezite trovebla:

neniam oni trovas la anstataŭajn prepozicion aŭ akuzativon por signifi kunecon, senecon, demovon, kaŭzon, instrumenton ktp. La anstataŭa akuzativo limiĝis preskaŭ nur al la adjektoj de daŭro (*li restis du horojn*), de tempopunkto (*la dekunu jarcenton okazis la unua krucmilito*) kaj de mezuro (*pezi cent gramojn, marŝi tri paŝojn* ktp). La uzado de *je* ankoraŭ pli malvastiĝis: ĝin oni uzas preskaŭ nur: 1°—por esprimi la daton, antaŭ nomo de festo (*je Pasko*) aŭ hor-indika numeralo (*je la dua posttagmeze*), malofte en la aliaj okazoj; 2°—por esprimi la diferenco-mezuron ĉe la komparativo (*li estis je tuta kapo pli alta ol ĉiuj aliaj*).

IV

LA LINGVISTIKA VALORO DE LA AKUZATIVO

El la ĉi-supra esploro rezultas kelkaj interesaj konkludoj:

A. La akuzativon Zamenhof verŝajne enkondukis en la lingvon, por doni al ĝi pli grandan klarecon, flekseblecon kaj unuformecon. Sed tuj de la komenco, li volis plene eluzi la oportunecon de tiu gramatika ilo, kaj ne limigis ĝian rolon al tiu de esprimilo de la rekta objekto: li asignis al ĝi du aliajn gravajn rolojn: unue montri la direkton — kaj tiele ŝpari duoblan serion da prepozicioj por la signifo de celo kaj por tiu de pozicio; due anstataŭi ĉian alian prepozicion — kaj tiele eviti la malfacilan elektaĉdon ĉe la dubaj okazoj. Se por la dua el tiuj funkcioj li trovis multajn precedencojn en la naturaj lingvoj, la tria estis pure lia elpensado, ĉe kiu li unu fojon plie pruvis sian lingvan genion (same kiel ĉe la kreado de la prepozicio *je*). La akuzativo tiel fariĝis ne simple unu el la diversaj elementoj de la morfologio, sed ja ĉefa kaj esenca subtenilo de la tuta esperanta sintakso, kaj eble ĝia plej karakteriza trajto. En nenia alia lingvo, tiu kazo ludas analogan kaj egale gravan rolon.¹ Tiom ke, se oni konsideros la esperantan

¹ Tiu aserto ne estas absolute ĝusta. Ekzistis almenaŭ unu lingvo, en kiu la akuzativo ludis rolon tiel gravan, kiel en Esperanto, kaj eble eĉ pli gravan: ĝi estas la malnova franca lingvo de la 11a kaj 12a jarcentoj. Tie la akuzativo troviĝis

sintakson tute sendepende de la gramatika tradicio de la okcident-eŭropaj lingvoj, oni devus paroli ne pri ia akuzativo — kazo, kiu ligiĝas kun certaj difinitaj gramatikaj funkcioj, kaj kontrastas kun unu aŭ pluraj paralelaj kazoj —, sed ja pri ia signo de komplemento, ia n-finaĵo, uzota ĉe ĉiu vorto (ekster kompreneble la subjekto kaj la predikativo), kiu ne estas signita per prepozicio, kia ajn estas la gramatika rolo de tiu vorto. En Esperanto, la kontrasto ne estas inter unu nominativo, unu akuzativo, aŭ iu genitivo, ekz-e, sed inter la subjekto (kaj la vorto, kiun oni identigas al tiu, t. e. la predikativo) kaj la komplementoj, el kiuj ĉiu devas esti montrata de fonetika signalo, aŭ de prepozicio antaŭ ĝi, aŭ de n-finaĵo post ĝi.

B. Se do ni konsideras tiufланke la konstruon de la lingvo, sub nova lumo aperos al ni la valoro de la akuzativo. Kiaj ajn estis la motivoj, propagandaj aŭ aliaj, de Zamenhof, li donis al la lingvo, kiun li proponis al la publiko en 1887, karakteron tute originalan, kaj absolute diferencon de la karaktero, kiun havis la praesperanto de 1881, aŭ kiun havos lia reform-projekto de 1894. Esperanto sin prezentas kiel konstruita el neŝanĝeblaj elementoj, kiuj estas ĉiuj memstaraj: el tiuj elementoj, unuj havas konkretan

post ĉiu prepozicio, montris la objekton de la verboj, kaj, se temis pri personoj, estis uzata ankaŭ por la genitivo kaj la dativo. Jenaj du ekzemploj, el la *Kroniko* de Ĝofredo de Villehardouin pri la konkero de Konstantinopolo (1207), klarigos tian sistemon: *Et li chevalier oissirent des uissiers et saillirent en la mer, tuit arme, les heaumes laciez et les glaives es mains . . . Et dont pristrent messages par le conseil l'empereor Kyrsac et envoierent a l'ost; et manderent le fil l'empereor Kyrsac et les barons que li empereres Alexis s'en ere foiz*» (laŭlitere: Kaj la kavaliroj eliris el la pordoŝipojn kaj eniris en la maron, tute armitaj, la kaskojn laĉitajn kaj la lancojn en la manojn. . . Kaj tial [ili] elektis kurierojn laŭ la konsilo la imperiestron Isaakon kaj sendis al la armeon, kaj sciigis la filon la imperiestron Isaakon kaj la baronojn, ke la imperiestro Aleksis for estis kurinta). Mi tamen ne volis mencii tiun precedencon, unue ĉar evidente Zamenhof ĝin ne konis, due ĉar en tiu lingvo la akuzativo havas ne la saman formon singulare kaj plurale, kaj eĉ plurale estas signata per la sama konsonanto, kiel la nominativo singulara (*li fils* = la filo, *le fil* = la filon; *li fil* = la filoj; *les fils* = la filojn), tiamaniere ke la ofteco de la akuzativaj vortoj estas multe malpli okulfropa, ol en Esperanto. Cetere tiu stato de la franca lingvo ne longe daŭris, kaj jam en la 14a jarcento plene ruiniĝis.

signifon kaj respondas al la «vortoj» de niaj eŭropaj lingvoj; aliaj signifas nur gramatikan rilaton, kaj esprimas, sub formo de memstara vorto, tion, kion niaj lingvoj esprimas jen per fleksioj, jen per finaĵoj, jen per la vortordo. Resume, oni povas diri, ke E estas la perfekta tipo de lingvo, kiu leksikonigis sian tutan gramatikon.

En tia tipo de lingvo estas kompreneble, ke la ĉefa el la gramatikaj rilatoj, tiu, kiu stariĝas inter la predikato kaj la objekto, nepre devas esti fonetike esprimata: la ekzisto de akuzativo estis necesigita de la lingvo-sistemo mem. Tion ne atentis la reformistoj, kiuj, je diversaj epokoj, postulis forigon aŭ nedevigecon de la akuzativo: ne ŝanĝon de detalo tiu reformo alportus, sed radikalan modifon de la strukturo de la lingvo. Oni povas ja konstrui aliajn tipojn de planlingvo sen akuzativo: sen akuzativo, E ne estas imagebla.

C. La natura sekvo de la asigno de tia universala funkcio por la n-finaĵo estas rimarkinde granda ofteco de ĝia uzo. La n-finaĵo, kiel ni vidis, fariĝis iel la ĉiofara servistino de la lingvo. Ne mankas, en la unuaperiodaj libroj, mallongaj frazoj kun du diversfunkciaj n-komplementoj (*la venontan Dimanĉon mi veturos Hamburgon [Dua Libro]*) — kaj ne estus malfacile aranĝi tute ortodoksan frazon, en kiu ĉiuj vortoj, krom la subjekto, havus tiun finaĵon (*tutan horon la hundo, la voston supren, postkuris en ĉiujn ĉambrojn ŝian ducent frankojn kostintan kateton kaj ĝin tri fojojn ekmordis*). Kontraŭ la danĝero de tia trouzo avertis Zamenhof: «Ŝajnas al mi, ke estus bone, se ni alkitimiĝus en ĉiuj okazoj d u b a j preferi la nominativon» (*Lingvaj Respondoj*, 3a eld., pĝ 53, 1908); sed li mem poste neniam hezitis akumuli la akuzativojn: *Li kolektis de ĝi koloĉintojn plenan sian veston* (II Reĝ 4,39) aŭ: *tio alkondukis min ĉi tien la duan fojon* (Andersen, III, pĝ 15).

D. Sub la konsidero de tiuj faktoj, interese estis esplori, kiel la pli modernaj verkistoj rilatis al tiu tre larĝa zamenhofa uzado de la akuzativo. Tiucele, mi faris statistiketon pri la ofteco de la n-vortoj rilate al la tuta vort-nombro en difinita peco; se oni zorgas kalkuli sufiĉe altajn nombrojn, oni povas atingi preskaŭ konstantajn proporciojn; mia kalkulo ampleksis po 10.000 vortojn. Aliflanke oni devas elekti por komparo la saman specon de verko:

la nombro de la akuzativoj estas efektive iom pli alta en la poezio, iom malpli en la oratoraĵoj. Mi elektis du specojn de tekstoj: unu mi ĉerpis el la tradukitaj fabeloj aŭ rakontoj, kiuj liveras bonan tipon de lingvo konkreta; la alian mi ĉerpis el originalaj traktaĵoj, kiuj liveras tipon de lingvo abstrakta. Cetere mi uzis por komparo al la zamenhofa lingvo-stato verkojn de aŭtoroj, kiuj tute ne pretendis imiti sklave la stilon de Zamenhof, kaj estis iel pli-malpli rigardataj kiel herezuloj. La esploritaj pecoj estas eltiritaj el:

Por la 1^a speco: ZAMENHOF, *La Ombro* (1888), *La Virineto de l' Maro* (ĉ. 1890), ambaŭ tradukitaj el Andersen; LANTI, *Kandid* (1929), trad. el Voltaire; MIJAKE-ŜIHEJ, *Leteroj el mia muelejo* (1939), trad. el A. Daudet.

Por la 2^a speco: ZAMENHOF *Dua Libro* (1888), *Aldono al la Dua Libro* (1888); K. KALOCSAY, *La evoluo de nia poezia lingvo* (1930), *La perspektivoj de la Esperanta Literaturo* (1936); W. MANDERS, *Interlingvistiko kaj Esperantologio* (1950).

Jen la trovitaj procentoj (7,65 signifas: po 765 n-vortoj el 10.000 vortoj):

1 ^a speco (konkreta)		2 ^a speco (abstrakta)	
Zamenhof	7,65	Zamenhof	9,1
Lanti	9,2	Kalocsay	10,1
Mijake-Ŝihej	10	Manders	9,5

Kvankam pri statistikoj oni devas ĉiam esti iom singardema, oni el la ĉi-supra tabelo povas almenaŭ tiri la konkludon, ke, malgraŭ la diverseco de siaj originoj, nacilingvoj kaj stilidealoj, la modernaj verkistoj esence konservis la zamenhofan sistemon, kaj eĉ ekspluatis pli komplete ĝiajn eblaĵojn. Alion oni povas ankaŭ konstati: spite al la multaj kritikistoj, kiuj re- kaj reasertis, ke la esperanta akuzativo estas arĥaika balasto, kontraŭas la spiriton de la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kaj estas destinita al neevitebla ruiniĝo, ĝi tamen ŝajnas neniel suferi de la lingva evoluo. Kaj oni povus al tiuj sinjoroj rebati per la vortoj de ~~Molière~~ *Molière*:

Les gens que vous tuez se portent assez bien!

INTERLUDO

- Kia fajrigilaĉo, nom' de Dio!
- Filip, mi petas! Se ne por mi, almenaŭ por la infanoj!
- Nu, kion do? Ĉu perturbas ilin, ke mi eĉ ne plu povas ekbruligi mian pipon?.
- Ho, vi scias tre bone, kion mi volas diri!
- Absolute ne, kara mia.
- Ne almetu mensogon super blasfemon: via pesiltaso jam sufiĉe malaltiĝis!
- Trezorinjo, mi havas nenian konscion, ke mi iel blasfemis — kaj cetere mi (*inferen ĉiuj fajrigiloj!*) estas tro bone edukita por fari ion tielan.
- Sed ne sufiĉe bone, por memori la parolon de la Biblio: «Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo!»
- Mi estas konvinkita, ke alvoki la nomon de la Eternulo por definitive damni la elpensinton de tiaj aferacoj tute ne estas malbona uzo. Sed, en la koncerna okazo, ĝuste tiun nomon mi ne prononcis! Dume vi, kiu estas tiel puritana, certe faras tion... mi eĉ ne povas kalkuli kiom da fojoj en la tago!
- Mi, mi... Akuzi min je tia peko, kaj antaŭ la infanoj! Ne kredu al via patro, miaj karaj, li ŝercas, laŭ sia ĉiama kutimo.
- Bela edukmetodo, ho patrino de miaj filinoj! Sed ja, mi ŝercas ne. Jes aŭ ne, ĉu vi, Gizela, ne krias, dekfoje en horo: «Joela, ne suĉu vian fingron!»?
- Eble, sed kion rilatas...
- Simple, ke, nomante nian plejjunan filinon, vi elparolas ĉiufoje du el la nomoj de via Eternulo!
- Ho paĉjo, ĉu Dio havas du nomojn?
- Pli ol du, Joela (*ha! unu fajrero...*), sed la du ĉefajn, kiujn donis al li la Hebreoj, vi havas en via nomo: *Jo* kaj *El*...
- tiel ke mi estas kiel la stacioj de l' subvojo: Richelieu-Drouot aŭ Barbès-Rochechouart!
- Se vi volas, krom tio, ke nek Richelieu nek Barbès iam estis

nomoj de diol! Dum Jo estis ja la mallongigo de Jaŭe aŭ Jaŭ, la nomo, kiun la Dio de l' Sinaj konfidis al Moseo, kaj (*ne — prefere donu al mi alumeton, Mariana!*) kaj El estas la nomo, kiun li malkovris al Jakob enironta Egiptujon: «Mi estas El, la Dio de via patro!» Ĉar ankaŭ mi kelkfoje memoras pri la Biblio, Gizela mial (*Blunderbuzo! Jen ĝi rompiĝis! Estu afabla, kaj donu al mi la plenan skatolon, mi petas*). Kaj krome, kara edzineto, vi abunde disponas aliajn okazojn malobei la biblian leĝon: kiam vi alparolas vian pastoran fraton, ekzemple.

— Jam de longe vi ne kuntrenis Elion en la konversacion!

— Ĉu mia kulpo, se lia nomo devenas de la hebrea Eljahu — finfine, mi tamen preferas Elio! — kun denove El kaj Jaŭe?

— Sed, paĉjo, mia Sankta Historio diras, ke Elio signifas 'la Eternulo estas mia Dio!'

— Kaj ĝi ne eraras, Joela (*cetere via skatolo tute ne estas plena, ba!*). La Hebreoj, vidu, akirinte brilnovan nomon por Dio, Jaŭe, transformis la malnovan, El, en ian komunan vorton, por signifi Dio. Sed antaŭ ili, tiu El estis la propra nomo de la dio de la Kanaani-doĵ, kaj post ili, ĝi restos la propra nomo de la Dio de la islamanoj, sub la formo Alah.

— Via patro estas tiel plezurigita elmontri sian erudicion, ke, vi vidos, li baldaŭ asertos, ke mia frato kaj mia filino portas nomojn de idoloj!

— Pri Joela, mi ne tro... (*Fuŝ! la lasta misfajris!*) — sed pri niaj pli aĝaj filinoj, la afero ŝajnas certa.

— Mariana, Ester! Jen bele pri vi, fratinegoj!

— Jes, Mariana, aŭ pli ĝuste Mariamna, kiel ni devus diri: via nomo prezentas probable la plenan formon, ^{de kiu} ~~ies~~ Mirjam estas la mallongigo: kaj ĉar 'Mirjam' aperas en la Biblio dum la migrorestado de la Hebreoj en Egiptujo, kaj ne havas verŝajnan etimologion en la hebrea lingvo, oni facile supozis, ke ĝi estis pruntita el la egipta, tute same kaj samtempe kiel tiu de Moseo. Kaj la sciencistoj, kiuj scias ĉion, eĉ la egiptan (la vokalojn tamen ili ne elruzis), asertas, ke Mariamna estas la transskribo de *mrj - c mn*, en kiu vorto *mrj* signifis 'ami' kaj *c mn* la dion 'Amon': vi estas do 'la amata de Amon', mia granda — kaj devas fieri pri tia nomo, kiu datiĝas de la tempo de la piramidoj kaj de la faraonoj! (*Malgraŭ tio,*

*helpu al mi, kaj diru al la kuiristino — Anĝela! Anĝelo de l' fajrujo!
— alporti du-tri brulantajn karbojn . . .)*

Kaj pri vi, mia Ester, kvankam via nomo estis famigita de la plej bela inter ĉiuj Hebreinoj, ĝi apartenas efektive al la babilona panteono, same kiel la nomo de ŝia kuzo kaj adoptinto, la ruza Mordehaj: sed en la babela lingvo, ili estis la dio Marduk kaj la diino Ištar. Kaj vi ankaŭ ne devas malestimi tiun nomon, ĉar ĝi prae montris la stelon de la amo, kiun ni nomas Venusol!

— Tamen, miaj karaj gepatroj, mi opinias, ke vi ne estis tre skrupulaj en la elekto de nomoj por viaj filinoj: mi kun mia babilona diaĝo, Mariana, kun sia egipta kaj Joela kun sia kanaana, ni faras belajn figurojn en la katehizejoj!

— Nenion bedaŭru, birdetoj miaj: unue viaj nomoj (*dankon, Anĝela, dankon!*) viaj nomoj estas sonoraj (*umpf, umpf*) kaj belaj kiel vi mem (*umpf*), kaj due la propraj nomoj perdas tiel rapide sian originan signifon, ke neniu zorgas pri ĝi: kiom da Helenaj, kiuj estas reĝinoj de malbeleco! (*la metodoj de la sovaĝuloj havas-iafoje sian bonan flankon, vidu!*). Pensu nur pri tiu konata episkopo de la Vla jarcento, kiu havis por nomo Izidoro, t. e. Izisdonaco, kaj kiun tiu videble pagana nomo ne malhelpis fariĝi katolika sanktulo.

— De la katolikoj, nenio mirigas min.

— Gizela, ĉu mi devos peti de vi pli da kristana indulgo por viaj apartiĝintaj fratoj? Kaj antaŭ la infanoj, eĉ! Fi, trezoringo, fil!

— Jen ili rekomencas ĉikani, tiuj du! Prefere, paĉjo, nun kiam via pipo ĝoje fumas, ĉu estas ankaŭ aliaj nomoj, kiuj venas de la vera hebrea kredo, kaj ne de ia idolista absurdaĵo?

— Mia tabakvendistino estas nomata Suzana: tio estas semida flornomo, kiun oni ordinare tradukas per 'lilio', sed kiu verŝajne signifis en Egiptujo la lotuson kaj en Palestino la anemonon.

— Tio estas io simila al niaj nomoj 'Roza' aŭ 'Viola,' ĉu?

— Jes, karinjo. Kaj vi havas ankaŭ Johano, kiu signifas 'Jaŭe korfavoris', probable unu el tiuj nomoj, kiujn oni donas al la longe esperita infano. Ĝi havas sinonimon, pere de la alia nomo de Dio, en Lazaro, kies hebrea formo Ele'azar signifis 'El helpis'. Vi scias, miaj belulinetoj, ke ĝi estis la antaŭnomo de nia majstro Zamenhof, kiu ĉe sia naskiĝo estis registrita sur la oficiala tabelo de Bjalistok kiel *Zamenkov Lejzer*, en la jida lingvo.

— Sed kial oni skribas ĉiam du lojn antaŭ lia nomo?

— Ĉar unu staras por Lazaro kaj la alia por Ludoviko: en tiuj regionoj kaj tempoj, la Judoj, kiuj ne plu observis siajn religiajn morojn, kromdonis al siaj infanoj duan antaŭnomon, elektitan el la kristanaj kaj komenciĝantan per la sama litero: tiel ke, ne ŝanĝante sian subskribon, ili povis klarigi ĝin, laŭ la medioj, jen per la hebrea, jen per la kristana nomo. Sed nia Majstro uzadis la duoblan L., verŝajne por evitigi konfuzon kun la frato, mem D-ro L(eono) Zamenhof!

— Kaj ĉu ankaŭ la helenaj dioj ankoraŭ servas por nomi la kristanajn infanojn?

— Certe, Mariana. Se ne serĉi pli malproksime, via kuzino Katarina faras tiele omaĝon al Apolono! Ĉar la plej malnova formo estis Ekaterina, kiun konservis la rusa lingvo, kaj ĝi tre probable devenas de la Homera epiteto de la Lumdio, *ἐκατηβόλος*, la 'Malproksimenĵetanta'. Kvankam aliaj preferus tiri ĝin de la Inferdiino, Hekate — kio estus malpli flata por via kuzino. Kaj estas ankaŭ la fratino de via patrino, Deniza, kies nomo estas simpla mallongigo de tiu de la granda dio de la vino kaj ebrio, Dionizo.

— Kaj ŝi, kiu estas abstinemulinol!

— Sed mi mem, kiu opinias la ĉevalojn la plej stultaj kvarpieduloj en la mondo, ĉu oni ne nomas min 'amiko de l' ĉevaloj', Filhippos?

— Ĉu do ĉiuj antaŭnomoj venas de la antikva tempo, paĉjo?

— Ne, kara mia. La kutimo doni al infanoj nomojn de greka aŭ romia martiro aŭ sanktulo malfortiĝis en nia lando inter la Va kaj la IXa jarcentoj, kaj dume oni pli kaj pli uzadis nomojn de la franka aristokratio, ĉar ili ŝajnis pli ŝikaj. Tial multaj francaj infanoj, precipe la knaboj, portas ankoraŭ nun nomojn de ĝermana origino; sed ili tute ne suspektas, kiajn kvalitojn ili elvokas: Ludoviko estas la 'glora en la batalo'...

— Aparte maltaŭga por nia Majstro, ĉu ne?

— Ne, se vi memoras pri la 'pacaj batalantoj'! Sed aŭskultu nur la aliajn: Bernardo la 'fortika Urso', Bertrando la 'brila Korvo', Raulo la 'Lupo de l' konsilantaro', Roĝero la 'Lanco de gloro'... Kaj la knabinoj ne estas pli modestaj, ĉu Berta la 'Brila',

Henrika la 'Estrino de l' domo' aŭ Matilda la 'forta Batalantino'! Ne forgesante vian karan patrineton, kies nomo estas la mallonga formo de la 'Gloria Ĵetlanko'; vere, ke kelkaj pedantaĵoj parencigas ĝin kun la germana *Geiszel*, kio estas 'skurĝo', sed tio estas absolute neverŝajna, ĉu ne, mia milda?

— Ĉesu do mem kun viaj pedantaĵoj! Ĉu vi opinias vin amuza?

— Sed jes, panjo, tio tre interesis min. Tamen, estas bone, ke oni ne plu scias la sencon de tiaj nomoj: ili ridindigus la mal-feliĉulojn, kiuj portas ilin!

— Gratulu vin do, miaj ĉarmaj, ke vi ne ricevis la nomojn de la tri filinoj de Ijob, kiuj estis Turtino, Cinamo kaj Ŝminkokorno, aŭ ke vi ne vivas en Turkujo, kie la knabinoj estas laŭkutime nomataj Vera Anĝelo, Lazurfonto aŭ Torento da Rozoj! Tiam vi estus tiel hontaj, ke vi certe rifuzus iri aĉeti por mi alian tabakbrikon... kaj ne forgesu la alumetojn!

Henrika la 'Estrino de l' domo' aŭ Matilda la 'forta Batalantino'! Ne forgesante vian karan patrineton, kies nomo estas la mallonga formo de la 'Gloro Ĵetlanko'; vere, ke kelkaj pedantaĉoj parencigas ĝin kun la germana *Geiszel*, kio estas 'skurĝo', sed tio estas absolute neverŝajna, ĉu ne, mia milda?

— Ĉesu do mem kun viaj pedantaĵoj! Ĉu vi opinias vin amuza?

— Sed jes, panjo, tio tre interesis min. Tamen, estas bone, ke oni ne plu scias la sencon de tiaj nomoj: ili ridindigus la malfeliĉulojn, kiuj portas ilin!

— Gratulu vin do, miaj ĉarmaj, ke vi ne ricevis la nomojn de la tri filinoj de Ijob, kiuj estis Turtino, Cinamo kaj Ŝminkokorno, aŭ ke vi ne vivas en Turkujo, kie la knabinoj estas laŭkutime nomataj Vera Anĝelo, Lazurfonto aŭ Torento da Rozoj! Tiam vi estus tiel hontaj, ke vi certe rifuzus iri aĉeti por mi alian tabakbrikon... kaj ne forgesu la alumetojn!

II. NIAJ PROBLEMOJ

LA LANDNOMA DEMANDO

Inter la ankoraŭ ne solvitaj demandoj tiu ĉi estas la plej ĝena, kaj estis eĉ iam la plej akra, kiu dividis la esperantistojn. Kaj tamen ĝi tuŝas nenian esencan punkton de la lingvo; tute male, ĝi prezentas ian eksteran trajton, ian okazan esprimilon, kiu ja ne ekzistas en pluraj naciaj lingvoj. Franco, ekz-e, kiu vidas ĉirkaŭ sia patrujo, *la France*, aliajn landojn nomatajn *l'Angleterre*, *la Belgique*, *les Pays-Bas*, *l'Allemagne*, *la Suisse*, *l'Italie*, *l'Espagne*, *le Portugal* ktp; Germano, kiu por citi la najbarojn de sia patrujo *Deutschland* elnomas *Frankreich*, *Belgien*, *Niederlande*, *Dänemark*, *Polen*, *Tschechoslovakei*, *Schweiz* ktp, rajtas senti iom da miro antaŭ tia agitado pri sufikso por nomi la landojn. Estas eble tempo, konsideri la aferojn per trankvilaj okuloj kaj peni malkonfuzi la fadenojn de tiu implikita problemo. Ĝi ja ne estas tiel simpla, kiel multaj opinias; ĝi havas almenaŭ tri flankojn, unu pure esperantan, unu internacian kaj unu politikan — kaj, kvankam ĉiu el ili influas la aliajn, estos pli klare, se ni pritraktos ilin aparte.

A. LA ESPERANTA ASPEKTO

Konkurenco de du sufiksoj, unu fundamenta, alia neologisma, por esprimi unu solan funkcion, estas io eksterordinara, eĉ unika en nia lingvo. Kiel do tia fenomeno povis okazi?

Ni vidis (pĝ 66), ke en la praesperanto de 1882 Zamenhof uzis, por derivi plantnomojn, la sufikson *-i-*; kaj ĉar tiu sufikso estas nenio alia, ol la internacia sufikso por landnomoj (tio estas la greka akcenta *-ia* en *Γερμανία* ktp, kiu substituiĝis al la neakcenta latina *-ia* sur la Galla teritorio kaj fariĝis la akcenta franca *-ie* en *Germanie*, dum sur la ceteraj teritorioj restis la neakcenta formo: D *Germania*, I *Germania*, R *Germanija*), estas tre probable, ke jam

en tiu tempo Zamenhof atribuis al ĝi la tri samajn funkciojn, kiujn havos poste la fundamenta *-uj-*. Mi studis samloke tiun novan formon, kies sencojn la *Unua Libro* prezentas jene: «*uj'* kiu entenas, portas, estas loĝata de; ekz-e *cigar' — cigar'uj'*; *pom' — pom'uj'*; *Turk' — Turk'uj'*». La saman klarigon donos la *Universala Vortaro*, sed kun ŝanĝo en la ordo de la sencoj: la botanika venas la unua.

Evidente tiun novan formon kondiĉigis la ĝenerala strukturo de la lingvo; tial, kiam en 1894 Zamenhof proponis al la kritikintoj aliigitan strukturon, li revenis al sia unua sufikso kaj enmetis en la reformitan vortaron: «*-i-* (= *-uj-*)».¹ Sed li neniel malvastigis la trioblan sencon de tiu sufikso. Oni memoras, ke tiun reformitan dialekton la tiamaj esperantistoj rifuzis per 157 voĉoj kontraŭ 107.

En la unua parto de la franca periodo (1900-1907), la diskutoj pri *-uj-* pligravigis. Sed kio komence ĝenis la Francojn, tio estis ne ĝia formo, sed ĝia plursenceco. Oni ankoraŭ ne rimarkis, efektive, ke ankaŭ de tiu vidpunkto tiu sufikso estas io unika: neniu alia havas same tri signifojn tiel diversajn, neniu alia prezentas tian kuriozaĵon, ke ĝia memstara uzo respondas nur al unu el la tri: rusa *ujo* estas ia vazo, poto ktp uzataj ĉe Rusoj, ĝi estas nek rusa arbo nek rusa lando. «Kio estas kafujo, teujo?» demandis Bourlet: ĉu lando, en kiu ili kreskas, ĉu planto, kiu produktas ilin, ĉu skatolo por ilin teni, ĉu poto por ilin pretigi? Kaj li tiam konkludis: «Por arboj kaj landoj mi uzis ĉiam kunmetitajn vortojn: *pomarbo*, *pirarbo*, *Franclando* ktp».² Kaj tio ŝajne estis la plej saĝa rimedo.

Sed tiam Zamenhof mem reŝovis la *i*-sufikson sur la verda tapiŝo. Sinsekvo de la okazaĵoj, en tiu jaro 1906, tion klare evidencigos:

Januaro 1906. Zamenhof sendas al siaj samgentanoj Emilo Javal kaj Gastono Moch ĵus aperintan numeron de «Ruslanda Esperantisto», en kiu li publikigis la *Dogmojn de Hilelismo*. La 5a dogmo finiĝas jene: «Se regno aŭ lando ne havas ankoraŭ neŭtralan

¹ «La Esperantisto», Majo 1894, pĝ 72.

² «Lingvo Internacia», Junio 1904.

nomon, mi devas ĉiam nomi [ilin] per nomo hilelisma, kiu konsistas el la nomo de ilia ĉefa urbo kun la aldono de la finiĝo *regno* por la tuta patrujo kaj *lando* por la nomo de ĝia parto. Ekzemploj: ... Peterburgregno, Varsovilando».

Marto 1906. Zamenhof publikigas en Sankta-Peterburgo la broŝuron *Homaranismo*, kiu estas nur korektita represo de la *Dogmoj*. Inter la kelkaj ŝanĝoj, la 5a dogmo finiĝas jene: «... per nomo homarana, kiu konsistas el la nomo de ilia ĉefurbo kun la aldono de la finiĝo *io* por la tuta patrujo kaj *lando* por la nomo de ĝia parto. Ekzemploj: ... Peterburgio, Varsovilando».

Novembro 1906. Zamenhof sendas al Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato, projekton pri *Neologismoj*, t. e. pri novaj formoj aŭ vortoj, kiuj, se oficialigitaj de la L. K., povos esti regule uzataj apud la fundamentaj formoj. Parto de tiu projekto tekstas: «Sufikso de lando estas *-i-* anstataŭ *-uj-* (ekzemple: *Anglio* anstataŭ *Anglujo*); la nomoj de kreskaĵoj estas farataj per la vorto *arbo* aŭ *planto* anstataŭ la sufiso *-uj-* (ekzemple: *pomarbo*, *rozoplanto*)».¹ Tiun projekton, sekve de peto de Boirac kaj aliaj personoj, Zamenhof reprenis poste.

Decembro 1906. Gastono Moch, komisiita de la Dua Kongreso prezenti antaŭ la Tria raporton pri la *Propraj Nomoj*, sendas ĝin al Boirac, kiu distribuas ĝin al la L. K.-anoj. Tie oni legas (§ 24): «Mi proponas simpligon, konsistantan en la alprenado de nova sufikso *-i-* por anstataŭi *-uj-* en ĝia geografia signifo. Laŭvere tiu propono enkondukas ion novan... Sed mi havas seriozajn motivojn supozi, ke ĝi estus aprokata de D-ro Zamenhof pro ĝia granda oportuneco».

Julio 1907. G. Moch presigas la resumon de la respondoj de la L. K.-anoj al lia raporto: el 69 efektivaj membroj (la solaj el la 99 proponitaj, kiuj jese respondis al la cirkulero de Boirac pri akcepto de aparteneco al la L. K., en Aprilo 1906), 50 respondis,

¹ *Leteroj de Zamenhof*, I, pĝ 316. Oni atentu, ke la rusa nomo de Anglujo estas *Anglija*.

el kiuj «nur 7 defendis la sufikson *-ujo*, unu eĉ kun bedaŭro; 40 aprobis aŭ ne malaprobis ĝian anstataŭigon per *-io*, kaj 3 proponis aliajn solvojn».¹

Decembro 1907. Esperante eviti skismon inter la Delegacio kaj la L. K., Zamenhof redaktas sian *Trian Cirkuleran Leteron*, kiu entenas nur parton de la neologismoj proponitaj en 1906. Tamen la punkto 6a plu tekstas: «Por nomoj de landoj oni povas uzi sufikson *-i-* anstataŭ *-uj-*». Sed la 18an de Januaro 1908 la intertraktadoj estis rompitaĵ, kaj la *Tria Cirkulera Letero* neniam estis sendita.

Aŭgusto 1907. En la Tria Kongreso, Moch resumis la ricevitajn respondojn, kaj, laŭ la konsilo de Bein, la kongreso elektis subkomitaton, kiu preparu vortaron de propraj nomoj.

Aŭgusto 1909. Boirac konigis al la ^{Kvina} ~~Sesa~~ Kongreso en Barcelono la rezultojn de la laboroj de la tiama Akademio (14 membroj el la L. K.) pri la laste proponitaj ŝanĝoj. Ĝi malakceptis tiujn, kiuj ŝanĝus la strukturon de la lingvo (pluralo per *-i* ktp); pri tiuj, kiuj respektas ĝin (novaj sufiksoj kaj prefiksoj), ĝi «esprimis la opinion, ke ne estas bone konsili la uzadon de novaj sufiksoj en la komuna lingvo». Pri la sufikso *-io* (kiu ŝajne apartenas al tiu dua kategorio) Boirac aldonis: «Cetere la tuta demando de la landnomoj bezonas apartan ekzamenon; ĝi estis jam esplorita de speciala komisiono kaj ni povos prokrasti decidon, ĝis tiu komisiono estos liverinta sian raporton».²

Decembro 1909. La «Oficiala Gazeto» publikigas la duan raporton de G. Moch, kune kun la listo de propraj nomoj proponitaj de la subkomitato; efektive nur tri laboris: Bein, Moch kaj Schröder; Moch estas la sola, kiu uzas sisteme *-io*. En la antaŭparolo

¹ *Pri la transskribo de la Propraj Nomoj*, E. Centra Oficejo, 1910, pĝ 60. Malakceptis: S-roj Codorniu, Dor, Ellis, Inglada, Millidge, Pollen, F-ino Schafer. Akceptis aŭ ne malakceptis, inter aliaj: Ahlberg, Beaufront, Bourlet, Christaller, Lambert, Lengyel, Sam. Mayer, Michaux, Mudie, Mybs, Nylén, Skeel-Gjörling, Wackrill, Zakrzewski. Ne respondis, inter aliaj, Bein kaj Cart.

² «Oficiala Gazeto», 25 Aprilo 1910, pĝ 322 — kun la arkaika formo «komisio».

al tiu kajero, Boirac skribas: «Nek la subkomitato, nek la L. K. trudas sian opinion al la publiko... sed al tiu ĉi apartenas... ekprovi tiujn novajn formojn, ilin eksperimenti kaj konstante uzi, se ĝi trovas ilin oportunaj».¹

Marto 1911. *Lingva Respondo* de Zamenhof; ĝin oni espreble konas.² Mi notos nur, ke Zamenhof rigardas la tutan aferon el la vidpunkto de la lingva unueco, kiu estis, tri jarojn post la Ido-krizo, efektive la plej grava kaj supera al ĉiaj aliaj.

Decembro 1918. Hektoro Hodler, en la organo de U. E. A., «Esperanto», decidas uzi la sufikson *-io*, profitante la kreadon de novaj regnoj en la postmilita Eŭropo. Lian ekzemplon baldaŭ imitos Teo Jung en sia «Esperanto Triumfonta» kaj poste Eŭgeno Lanti en «Sennaciulo». Kontraŭ tiu iniciato Cart, Corret kaj Butler komencas vastan agitadojn precipe, laŭ la metodo de Cart, per incita privata korespondado.

Julio 1920. Cart voĉdonigas al la tiam Akademio jenan Deklaron: «La Akademio insiste kaj forte konsilas al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa por konservi la unuecon de nia lingvo (kaj aparte al la gazetoj), uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon *-ujo*: Turkujo, Germanujo, Rusujo ktp. La Akademio memorigas, ke jam en la jaro 1909 ĝi oficiale voĉdonis kontraŭ la sufikso *-i* por landnomoj». El la pezeco kaj el la fina malveraĵo (ni vidis, ke oficiala voĉdono pri *-io* ne okazis, eĉ en la Akademio), oni tuj rekonas la plumon de Cart.

Junio 1921. Edmondo Privat, je la nomo de kvin L. K.-anoj (la aliaj estis s-roj Fiŝer, Bünemann, Krestanof kaj Stojan), prezentas raporton favoran al *-io* kaj postulas pri ĝi oficialan voĉdonadon de la L. K. Cart estas tiam devigata komisi al la Direktoro de la Sekcio pri Komuna Vortaro, Emilo Grosjean-Maupin, verkadon de raporto, kiu estu «pure objektiva, science metoda kaj pruve plena».

Oktobro 1921. Dissendo de la raporto de Grosjean-Maupin, kiu finiĝas jene: «Mi konfesas, ke, komencante tiun ĉi esploron

¹ «Oficiala Gazeto». Boirac skribis «praktikaj».

² *Lingvaj Respondoj*, 3a eld., pĝ 41-42.

al tiu kajero, Boirac skribas: «Nek la subkomitato, nek la L. K. trudas sian opinion al la publiko... sed al tiu ĉi apartenas... ekprovi tiujn novajn formojn, ilin eksperimenti kaj konstante uzi, se ĝi trovas ilin oportunaj».¹

Marto 1911. *Lingva Respondo* de Zamenhof; ĝin oni espreble konas.² Mi notos nur, ke Zamenhof rigardas la tutan aferon el la vidpunkto de la lingva unueco, kiu estis, tri jarojn post la Ido-krizo, efektive la plej grava kaj supera al ĉiaj aliaj.

Decembro 1918. Hektoro Hodler, en la organo de U. E. A., «Esperanto», decidas uzi la sufikson *-io*, profitante la kreadon de novaj regnoj en la postmilita Eŭropo. Lian ekzemplon baldaŭ imitos Teo Jung en sia «Esperanto Triumfonta» kaj poste Eŭgeno Lanti en «Sennaciulo». Kontraŭ tiu iniciato Cart, Corret kaj Butler komencas vastan agitadojn precipe, laŭ la metodo de Cart, per incita privata korespondado.

Julio 1920. Cart voĉdonigas al la tiama Akademio jenan Deklaron: «La Akademio insiste kaj forte konsilas al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa por konservi la unuecon de nia lingvo (kaj aparte al la gazetoj), uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon *-ujo*: Turkujo, Germanujo, Rusujo ktp. La Akademio memorigas, ke jam en la jaro 1909 ĝi oficiale voĉdonis kontraŭ la sufikso *-i* por landnomoj». El la pezeco kaj el la fina malveraĵo (ni vidis, ke oficiala voĉdono pri *-io* ne okazis, eĉ en la Akademio), oni tuj rekonas la plumon de Cart.

Junio 1921. Edmondo Privat, je la nomo de kvin L. K.-anoj (la aliaj estis s-roj Fiŝer, Bünemann, Krestanof kaj Stojan), prezentas raporton favoran al *-io* kaj postulas pri ĝi oficialan voĉdonadon de la L. K. Cart estas tiam devigata komisi al la Direktoro de la Sekcio pri Komuna Vortaro, Emilo Grosjean-Maupin, verkadon de raporto, kiu estu «pure objektiva, science metoda kaj pruve plena».

Oktoebro 1921. Dissendo de la raporto de Grosjean-Maupin, kiu finiĝas jene: «Mi konfesas, ke, komencante tiun ĉi esploron

¹ «Oficiala Gazeto». Boirac skribis «praktikaj».

² *Lingvaj Respondoj*, 3a eld., pĝ 41-42.

sen ia antaŭjuĝo, mi sincere esperis, ke mi povos proponi precizan solvon de la problemo. Sed, esplorinte metode kaj detale la demandon, kolektinte kaj komparinte la landnomajn radikojn en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kunmetinte proksimume plenan liston da akceptindaj esperantaj landnomaj radikoj elektitaj laŭ la principo de internacieco... prove aplikinte ĉiun el la ses eblaj solvoj al ĉiu tiu radiko aparte, mi estas devigata konkludi, ke neniasolvo estas plene kontentiga, nek absolute kaj nediskuteble preferinda super la aliaj... Nur la ĝenerala praktika uzado povos definitive decidi pri la afero, unue elektante inter la diversaj sistemoj tiujn, kiuj prezentas pli da bonaĵoj kaj malpli da malbonaĵoj kaj esceptoj, ol la aliaj, kiuj estos kredeble iom post iom forĵetataj. La Lingvaj Institutioj siaflanke devos plenumi gravan rolon, zorgante, ke oni ne malatentu la konsilojn de Zamenhof, ke oni respektu la spiriton de la lingvo, kaj precipe ke oni konservu ĝian elastecon kaj flekseblecon... Oni tro facile parolas pri danĝera ĥaoso en multaj okazoj, kiam temas nur pri libereco kaj facileco, kiu, dum ĝi ne malhelpas la kompreneblecon kaj klarecon, estas tute sendanĝera».

Februaro 1922. Preteratentante la atendemajn konkludojn de la raportinto, la L. K. «malkonsilas» la uzon de la sufikso *-io* per 74 voĉoj kontraŭ 5. Ĉi tiu triumfo konkludas: «Mi firme esperas, ke ĉiuj esperantistoj... restos fidelaj al la Fundamento kaj al la Zamenhofa kaj tradicia uzado, *ne enkondukante novan sufikson*». Kaj li tuj dissendas al ĉiuj gazetoj ultimaton kun minaco pri bojkotado.

El tiu resumo oni povos rimarki, ke la donitaĵoj de la problemo tre ŝanĝiĝis kun la tempo: ĝis la Ido-krizo, neniu protestis, eĉ ne unu voĉo laŭtiĝis kontraŭ la enkonduko de *-io*, sub la sola kondiĉo, ke la L. K. ĝin sankcius; ekde la Ido-krizo, ĝi estis ne nur intermiksita en la amason de la novaj afiksoj ekspensitaj de Couturat, sed eĉ ĝi rapide fariĝis la tipo mem de la idismaj herezaĵoj. La kristaliĝo de la kontraŭidismo super tiu malfeliĉa vokalo estas kurioza fenomeno, kiu klare komprenigas la decidon de 1922. Grosjean-Maupin juĝis kun scienca objektiveco kaj prudenta singardemo; la L. K.-anoj prijuĝis kun pasia alligiteco al la

zamenhofa idealo kaj tute prava timo antaŭ la danĝerega Ido-propagando. Oni nur memoru, ke en 1922 Ido estis ankoraŭ potenca malamiko, ke la movado komencis apenaŭ releviĝi el la ruinoj de kvarjara mondmilito kaj naciaj antipatioj, kaj ke en tia kriza tempo la plej granda unueco kaj tradiciemo estis nepre necesaj.

Sed de tiu tempo la cirkonstancoj multe ŝanĝiĝis. La morto de Ido donis plej brilan pravigon al nia taktiko de stabileco kaj kontinueco; la florado de la novgeneraciaj esperantistoj, kutimigitaj rigardi nian lingvon kiel fakton, ne kiel provon, definitive forflugigis el niaj vicoj la tentadon pri plibonigoj, reformoj kaj aliaj ĥimeroj; la konstanta publikigado de riĉa, densa, serioztema literaturo konsistigis la plej fortikan barilon kontraŭ la personaj kapricoj kaj individuaj utopioj, kiuj tiom ĝenis la 25 unuajn jarojn de la movado. La afekciaj motivoj, kiuj diktis la decidon de 1922, iom post iom perdis sian akrecon. Kaj tamen, mi ne opinias, ke, se oni konsultus nun la Akademion (heredinton de la antaŭmilita L. K.), oni trovus ĝin favora al la sufikso *-io*. La aŭtoritato de jam akirita voĉdono, la alĉutimiĝo al malnovaj formoj turnus kontraŭ ĝi la pli grandan parton de la akademianoj, se ne paroli pri la stranga antipatio de kelkaj kontraŭ la akcentita *i* — ĉiuj motivoj, kiuj aliflanke ne estus sufiĉe fortaj por trudi al aliaj la uzadon de sufikso, kiu tiel misformas la internaciajn nomojn. Sed ĉi tie ni alvenas al mia dua punkto.

B. LA INTERNACIA ASPEKTO

Estas evidente, ke, ankoraŭ pli ol la komunuzaj, la propraj nomoj de la landoj devus submetiĝi al la leĝo de internacieco. Bedaŭrinde, en la naciaj lingvoj, la landnomoj ŝajnas unuavide absolute ĥaosaj. Jen probable la kaŭzo, kial, en la tridek unuaj jaroj de la movado, Zamenhof tute ne atentis la problemon, kaj kontentigis sin per la rudimenta solvo aldoni sian sufikson *-uj* al ĉia nomo de lando. Oni tiel trovas en liaj verkoj antaŭaj al 1907 formojn kiel: Bolivujo, Brazilujo, Holandujo, Irlandujo, Palestinujo,

Sirujo kaj Siriujo ktp. Saman supersimplan sistemigon oni trovas ankoraŭ nun ĉe kelkaj SAT-anoj, kiuj alkroĉas sian sufikson *-i* al ĉia landnomo kaj maltimas skribi: Koreio, Malajio, Urugvio, Kanadio ktp.

Kiam la cirkonstancoj kaj la kritikoj invitis al pli funda esploro, oni baldaŭ malkovris, ke, sub tiu ekstera ĥaoso, distingiĝas kelkaj reguloj. Boirac estis la unua, kiu havis la honoron difini ilin. En Julio 1909, li finis la antaŭparolon de sia *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta* per jena paragrafo: «Ni starigis kiel principon, ke la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso *-an*, kiel ekz-e Eŭropo, Eŭropano; Irlando, Irlandano; Parizo, Parizano ktp, kaj ke la alia maniero, t. e. nomante primitive la genton aŭ nacion kaj devenigante la nomon de la lando per la sufikso *-uj*, kiel ekz-e Franco, Francujo, Germano, Germanujo, estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda. Nur kiam ekzistas efektive gentoj, nacioj, havantaj propran historion, nur tiam oni povas diri, ke la popolo nomas sian landon, kaj uzi la duan procedon; sed en ĉiuj ceteraj okazoj estas pli ĝuste diri, ke la terloko nomas siajn loĝantojn; kaj pro tio ŝajnas al ni, ke ekster Eŭropo kaj kelkaj partoj de Azio kaj Afriko, ĉie aliloke, nome en Ameriko, oni devas formi la nomojn per la unua procedo. Brazilo, Ĉilo ktp ne estas, laŭ nia opinio, loĝantoj de Brazilujo, Ĉilujo ktp, sed kontraŭe landoj, kies loĝantoj estas Brazilanoj, Ĉilanoj ktp. Ni do tre deziras, ke ĉiuj esperantistoj konsentu pri tiu ĉi regulo. En okazo de dubo, oni ĉiam preferu la sufikson *-an* al la sufikso *-uj* por formi la nomojn de popoloj kaj de landoj».

Oni vidas, ke, en Marto 1911, Zamenhof simple reuzis la Boiracan argumentadon en sia jam aludita *Lingva Respondo*, kun jenaj diferencoj: 1° Li flankklasas la finan regulon proponitan de Boirac, probable por eviti doni la impreson, ke ĉiu rajtas memdecidi pri la dubaj punktoj; 2° Li antaŭvidas, por tri tiamaj ŝtatoj konsistantaj el diversaj gentoj, la eventualon de nomŝanĝo («Aŭstrio, Belgio, Svisio»), kion li «ne malkonsilus», se la Akademio trovus tion necesa; 3° Li decideme forlasas la vorton *nacio* apud *gento*, probable ĉar li ne kapablis koncepti, ke la volo vivi kune povas esti tiel forta politika ligilo, kiel la rasa aŭ religia aparteneco.

Jen do la sistemo, kiun tiuj du klarvidaj spiritoj provis tiri el la nacilingva uzado, kaj kiun Zamenhof penis apliki en siaj postvenintaj verkoj. Sed ĝuste en tio eĉ li ne kapablis plene sukcesi — ĉar la internaciaj realaĵoj estas pli fortaj, ol la teoriaj simpligoj. En lia traduko de la *Malnova Testamento*, oni ekz-e devas klasi la landnomojn ne en du, sed en tri kategoriojn:

a) Nomoj finiĝantaj per *-ujo*: Egiptujo, Etiopujo, Hindujo, Lubujo, Medujo, Persujo ktp (la gentoj estas: Egiptoj ktp).

b) Nomoj finiĝantaj per *-io*: Asirio, Fenicio, Mezopotamio, Samario,¹ Sirio ktp (la gentoj estas: Asirianoj ktp).

c) Nomoj sen apartaj finaĵoj: Babel, Gilead, Kaftor,² Izrael, Kanaan,³ Ŝinar⁴ ktp (la gento estas: Babelanoj ktp).

Kaj tamen tiu mondo de la antikvanoj estis la plej oportuna por la laŭgenta nomado de la landoj. Ĉe la modernaj regnoj de la malnova mondo, la landnomoj uzitaj de Zamenhof formas almenaŭ 5 kategoriojn:

1) Nomoj finiĝantaj per *-ujo*: Anglujo, Francujo ktp (la ŝtatanoj estas: Angloj ktp).

2) Nomoj finiĝantaj per *-lando*: Belgolando, Finnlando, Greklando, Norveglando, Pruslando, Saksolando, Skotlando, Svislando (la ŝtatanoj estas: Belgoj ktp).

3) Nomoj finiĝantaj per *-lando*: Finnlando, Holando, Irlando, Islando, Jutlando, Laplando, Zelando (la ŝtatanoj estas: Finlandanoj ktp).

4) Nomoj finiĝantaj per *-io*: Alĝerio, Andaluzio, Aragonio, Kastilio, Pomerio, Siberio, Tunisio (la ŝtatanoj estas: Alĝerianoj ktp).

¹ Landnomo en multaj tekstoj: II *Reĝoj* 17, 24 ktp.

² Tio estas: Kreto.

³ Ktp. *Lev.* 25, 38 (reuzita en *Agoj* 7,11).

⁴ Tio estas: Babilonio.

5) Nomoj sen aparta finaĵo: Gvineo, Hannovero, Meklenburgo, Palestino, Taŭrido, Tonkino (la ŝtatanoj estas: Gvineanoj ktp).

Se oni komparas tiun zamenhofan liston kun la nuna plej konservativa uzado (kiel oni povas trovi ĉe «The British Esperantist», en la UEA-jarlibro ktp), oni vidos, ke la solaj aldonoj, faritaj pro historiaj kaŭzoj, trovis lokon nur en la tri lastaj kategorioj, kio signifas, ke oni senkonscie obeis la regulon de Boirac:

3) Nederlando, Sarlando, Tajlando;

4) Etiopio, Jugoslavio, Luksemburgio, Nigerio, Rodezio, Sovetio;

5) Cejlono, Ejro, Koreo, Libano, Liĥtenŝtejno, Malajo, Madagaskaro, Maroko, Monako, Ukrainio.

Kaj tiu ĉi lasta kategorio ne ĉesos ampleksiĝi kun la kreado de novaj sendependaj regnoj.

C. LA POLITIKA ASPEKTO

Ĉar — kaj ĉi tie ni frontas la trian flankon de la problemo — la landnomoj ne estas pure esperantaj apartenaĵoj: ili esence apartenas al la ŝtata potenco, kiu suverene decidas pri la maniero, kiel ĝi volas esti nomata. Kaj, kvankam la esperantistaro ĝenerale malzorgas pri tiaj ŝanĝoj, ĉu pro rutino, ĉu pro manko de uz-okazoj, la respondecaj instancoj ne povas tamen ilin ignori.

Kiam en 1921 la angla registaro, el la mandatlando Mezopotamio, kreis la reĝlandon Irako; kiam en 1922 la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj difinis la aŭtonomajn respublikojn Ukrainio,¹ Bjelorusio, Georgio, Azerbajĝano ktp; kiam en 1935 la persa registaro dekretis, ke la lando estos nomata Irano; kiam en 1938 la libera irlanda registaro dekretis, ke la regno reprenos la

¹ *Ukrajna* signifas ruslingve 'limlando'; sekve Ukrainio absolute ne povas esti uzata por nomi loĝanton.

malnovan nomon Ejro; kiam en 1944 tri eŭropaj regnoj decidis unuiĝi ekonomike sub la nomo Benelukso; kiam en 1947 la Imperio de Hindlandoj apartiĝis en tri dominiojn: Hindustano, Pakistano kaj Cejlono; kiam en 1957 la angla kolonio la Ora Bordo fariĝis sendependa ŝtato sub la nomo Ghanao — ĉiufoje la ceteraj regnoj rajtis nur registri tiujn novajn nomojn, kaj la decidintoj petis permeson de nenia akademio en la mondo, eĉ ne de la esperantista. Kaj ĉiuj tiuj novaj nomoj prezentas sin kiel landnomojn, de kiuj oni devas derivi per sufikso la nomon de la loĝantoj.

Kaj tio ne estas hazardo — ne pli ol estas hazardo la fakto, ke la loĝantoj de la plej malnovaj regnoj de Okcident-Eŭropo estas, en la naciaj lingvoj, nomataj per sufiksoj: *English, Spaniard, Italian; Anglais, Français, Espagnol, Italien; Engländer, Franzose, Spanier, Italiener; Anglijskij, Francus, Ispanjec, Italianjec* ... ktp.

Oni povus do konkludi, ke, kun la malvolviĝo de la demokratiaj ideoj, la genta aparteneco pli kaj pli perdas sian gravecon en la tutmonda pensado, kaj male pli kaj pli da graveco akiras la memvola spirita aparteneco al tiu aŭ alia regno. Bedaŭrinde, la sufikso *-ujo*, kun sia konkreta kromsignifo de entenilo, estas ligita kun ideologio de gento kaj eĉ de raso. Jen kial, ekz-e, la nomado de tiu lando, en kiu volis vivi la mulato Aleksandro Dumas, la Senegaliano L. S. Senghor, la italdevenaj Emilo Zola kaj Paŭlo Valéry, la hispandevena J. M. de Heredia, la poldevena Gulielmo Apollinaire, la japandevena Kikou Yamata ktp, la greknaskita Johano Moréas, la usonnaskitaj Fr. Vielé-Griffin kaj Juliano Green, la rumannaskitaj Anna de Noailles kaj Panaït Istrati, la rusnaskita Henriko Troyat, la urugvajnaskita Julo Supervielle ktp per nomo, kiu propre signifas 'ujo por Franco', profunde ŝokas la komunan saĝon.¹ Kaj tio tre bone komprenigas, kial la membroj de la

¹ Ne malpli ŝoka estas, fronte al tiu (tiel maltaŭga) *Francujo*, la nomo de la sola parto de la franca regno, kiu efektive estas la loĝloko de aparta gento, sed kiun oni difinas laŭ la an-sistemo per *Korsiko*. Oni devus diri, se oni akceptas la teorion zamenhofan, *Korsiko*, *Korsikujo*, same kiel oni diras: *Sardo*, *Sardujo*, *Anglo*, *Anglujo* ktp.

Sennacieca Asocio principe rifuzas uzi la sufikson *-ujo*. Vere estas, ke, por esti konsekvencaj, ili devus ankaŭ rifuzi la gentnomojn, kaj paroli nur pri francianoj, germanianoj ktp.

D. KONKLUDOJ

El la ĉi-supra analizo, la sekvantaj konkludoj ŝajnas al mi konsiderindaj:

1. *Ne estas eble trovi unu regulon por la formado de ĉiuj landnomoj.*—Sufiĉus citi, interne de la zamenhofa sistemo, la tri landojn, kiuj formas Benelukson, por trovi tri diversajn nommanierojn: Belgujo, Luksemburgio, Nederlando; sufiĉus kompari la zamenhofajn nomojn de la du regnoj, kiujn formis la hebrea popolo: Judujo sude kaj Izraelo norde, kies anoj estis respektive Judoj kaj Izraelidoj, aŭ tiujn de la najbara regno, sub ĝia antikva formo Filistujo kaj ĝia moderna Palestino. Sama kontrasto ekzistas ĉe la iamaj regnoj fariĝintaj provincoj: Zamenhof loĝigas Kastilianojn en Kastilio, sed Katalunojn en Katalunujo ktp.

2. *Ne estas eble kondamni absolute unu el la du partioj.*—La *ujo*-anoj pravas, dirante, ke la alprenado de *-io* enkondukus ŝanĝon en la *Fundamenton*, ke ne estas la rolo de la Akademio iniciati tian ŝanĝon, kaj ke la neta voĉdono de la Lingva Komitato havas leĝan valoron por la komuna uzado.

La *io*-anoj pravas, dirante, ke la alprenado de *-io* estus unu el la «aldonoj», kiujn precize antaŭvidis la *Antaŭparolo* al la *Fundamento*, kaj ke la voĉdono signifas nur, ke la L. K. opiniis en 1922 la sufikson *-io* ne sufiĉe vaste uzata por meriti oficialiĝon.

La unuaj akcentas la bezonon de konservativa tradiciemo, la duaj la neceson de evolu-ebleco, kaj ambaŭ plene pravas, ĉar tiuj ambaŭ fortoj normale kontribuas al la bonfarto de lingvo.

En tia situacio, la lingvisto povas nur registri la variojn de la uzado. Estas evidente, ke ekde 1921 la grupo de la *io*-anoj, primitive kolektitaj ĉirkaŭ Hodler kaj Privat, iom post iom disvastiĝis, kaj nun rekrutiĝas en la vicoj de SAT, en sciencaj kaj teknikaj

rondoj ktp. Aliflanke, ŝajnas, ke la ĝenerala sinteno de la gazetaro estas pli favora al *-ujo*, dum la universalaj kongresoj liveras multajn okazojn aŭdi formojn kiel *Francano*, *Anglano* ktp.

3. *Ne estas eble malkonfesi la ekziston de la sufiksso -io.*— Se la konservativuloj ne povas akcepti ĝin por la formado de la eŭropaj landnomoj, ili tamen devus agnoski, ke ĝi estis uzata de Zamenhof kaj estas oportune uzenda por formi landnomon el la nomo de ĉefurbo: Alĝerio el la urbo Alĝero, Meksikio el la urbo Meksiko ktp.

Tiu sama formado devus esti permesata en tri aliaj okazoj, pro la etimologio: *Egiptio* (ĉar tiu nomo devenas el la egipta nomo de la urbo Memfis: *Haj-Ĥu-Phtah*, la 'Domo de la Duobloj de Phtah'), *Svisio* (ĉar tiu nomo devenas de la urbo *Schwyz*) kaj *Romio* (kio ebligas utilan distingon inter Romanoj kaj Romianoj).

Krome, estus eble oportune vastigi la uzon de tiu sufiksso al du aliaj kategorioj:

a) por formi landnomon el karakterizilo alia, ol la gento-nomo, ekz-e:

el nomo de rivero: *Senegalio* (el la rivero Senegalo), *Nigerio* (el Nigero) ktp (sed mi konfesas, ke al la barbaraspekta *Kongio* mi preferas *Kongolando*, kies *-l-* retroviĝas en *A Congolese*, *F Congolais* ktp);

el nomo de dinastio: *Ĉinio* (lando de la dinastio *Tsin*);

el nomo de kompasdirekto: *Aŭstrio* (el la formo germana: *Ostreich*, t. e. la 'Regno Orienta') *Japanio* (el la ĉina nomo: *je-pun*, t. e. 'sunleviĝo');

b) por eviti konfuzon inter landnomoj finiĝantaj per *-ano* kaj la loĝantsufiksso: *Iranio*, *Azerbajĝanio*, *Pakistanio*, *Turkestanio* ktp.

4. Restas tamen la postuloj de la internacia komprenebleco. Se mi sendas leteron al *Give*, mia franca poŝtisto estos nekapabla rekonigi en la sube skribita *Danujo* (kiun li prononcos proksimume: daniĝo') la ĉie konatan *Danemark*, *Denmark*, *Dänemark*, *Danimarca* ktp. Se mi devas skribi al loĝanto de *Tajĝikistan*, estas dubinde, ĉu la sovetia registaro akceptos ĝin adresitan al *Tajĝikujo*. En ambaŭ okazoj, sekve, mi montros la landon per la nacia nomo, kaj mi ne estas la sola uzi tian procedon, se nur mi rigardas la

iom multajn de mi ricevatajn korespondaĵojn. Sed tia kutimo estas elturniĝo ne inda je nia lingvo, kiu ĝuste pretendas rolon de internacia interkomprenilo. Oni jam tro akuzis, ke la esperantistoj praktikas sian lingvon nur inter si, kaj ne zorgas pri la cetera mondo. Jen do grava problemo pri niaj rilatoj kun la ne-esperantistaro, kaj mi opinas, ke ĝi devus esti serioze kaj komune esplorata de la specialistaj asocioj, kiel la Internacia Asocio de la Poŝtistoj, de la Fervojistoj, la Internacia Geografia Asocio ktp.

Se mi rajtas fari personan elpaŝon, mi volonte memorigus al al tiuj esplorantoj la proponon iam faritan de Antono Grabowski¹ kaj de G. M. Meazzini,² t. e. apliki al tiuj okazoj la 15an regulon de la Fundamenta Gramatiko, uzante, kiel internaciajn formojn, ne la nunajn nacilingvajn, sed la jam internaciajn novlatinajn, kiel ekz-e: *Anglatero, Belgio, Britanio, Danemarko*,³ *Francio, Germanio, Greco, Helvetio, Hispanio, Hungario, Italio, Polonio, Rusio* ktp, kiujn la poŝtistoj de ĉiuj landoj facile deĉifros, kaj kiuj konsistigos simple internaciajn duoblaĵojn de la tradiciaj *uj*-formoj. Mi montris en alia eseo (pĝ 114 k. s., 122 k. s.), ke tia kunekzistado de internacia formo, kiel *redakcio*, kun la propre esperantaj, kiel *redaktado* aŭ *redaktejo*, estas unu el la esencaj trajtoj de nia lingvo. Ĉu do ne eblus helpi al si per tia rimedo ankaŭ en ĉi tiu okazo?

¹ Privata letero al Cart, de la 18. Julio 1920.

² *Dizionario Italiano-Esperanto*, 1924.

³ Analoge al *Finmarko* uzita de Zamenhof en *Fabeloj* III, anstataŭ *Finlando*.

LA ESPERANTA PASIVO

La originaleco de nia lingvo en tiu rilato estas malpli, ke ĝi havas tri pasivajn participojn (tiom multajn havas ekz-e la helena aŭ la litova), ol ke ĝi uzas tiujn participojn por konstrui sian tutan pasivan konjugacion. Tio signifas, ke por ĉiu tempo de la help-verbo la parolanto devas elekti inter tri ebloj, kaj sekve disponas entute naŭ pasivajn temprilatojn. Kompreneble tia sistemo, se ĝi prezentas grandan nombron da esprimeblaj nuancoj, aliflanke estas sufiĉe malsimpla aparato, por ke ĝia uzado postulu ian spertigon kaj delikatan lingvosenton. Jen kial, en sia reforma projekto de 1894, Zamenhof, volante kiel eble plej simpligi la morfologion, konservis nur du participojn, unu prezencan aktivan kaj unu preteritan pasivan. Jen kial, en la rusa kaj franca periodoj, la demando pri la ĝusta uzado de la pasivaj participoj leviĝis de tempo al tempo kaj estis diskutita en tiu aŭ alia gazeto. Sed, ĉar la plimulto de la verkistoj estis slavlingvanoj, do havis hejman senton pri la nuancoj de finiteco aŭ nefiniteco de la agoj, kaj ĉar la ceteraj estis tre obeemaj al la konsiloj kaj imitemaj al la zamenhofaj modeloj, oni atingis, se ne klare esprimitan teorion, almenaŭ unuecan uzadon; kaj la deflankiĝoj, kiam ili okazis, estis nuraj eraroj.

Sed en la kelkdek jaroj post la unua mondmilito, la Germanoj, Nederlandanoj, Danoj kaj Svedoj proporcie plimultiĝis en la movado; sub la influo de la ĝermana verbsistemo, kiu, en la nun koncernata demando, tre diferencas disde la esperanta, komencis svarmi la eraroj pri la pasivaj participoj; kaj, kio estis io tute nova, troviĝis en tiu nordeŭropa regiono —naskiĝejo de tiom da herezoj— kelkaj teoriistoj, kiuj volis pravigi sian nekorektaĵojn kaj penis starigi sistemon de pasiva konjugacio absolute fremda al la zamenhofa tradicio. Miloĵ da novaj esperantistoj suĉis tiun venenitan lakton, kaj nun ni troviĝas antaŭ efektiva skismo, eble malpli spektakla ol la apartiĝo inter ujo-anoj kaj io-anoj, sed multe pli serioza. Kiel mi jam diris, la landnomoj prezentas teritorion

preskaŭ eksteran al la lingvo mem, dum la sistemo de la verbo estas centra ĝia organo; kaj ĝin mistrakti, misformi intence kaj konsekvence estas unu el la plej gravaj atencoj, kiujn oni povas kulpi kontraŭ unu lingvo. Se mi uzos, parolante al Angloj, *Italia* anstataŭ *Italy*, aŭ, parolante al Germanoj, *Frankland* anstataŭ *Frankreich*, miaj aŭskultantoj ridetos, sed facile pardonos al mi tian eraron; dum, se mi diros al la unuaj *I become read* anstataŭ *I will read*, al la duaj *ich bin lesend* anstataŭ *nun lese ich*, kaj se mi krome asertos tiujn formojn la sole korektaj, miaj aŭskultantoj opinios, ke, uzante tiel fuŝe ilian lingvon, mi pli bone farus, se mi parolus alian. Jen ĝuste la impresoj, kiuj ricevis kelkaj esperantistoj, kiam ili legis, sub la plumo de eminentulo, ke li «dum la lasta monato estis renversata de aŭtomobilo en Parizo». Ĉar, kiel ajn danĝeraj estas la parizaj aŭtoj, neniu imagus, ke unu el ili ludis renversi sian viktimon plurajn fojojn sinsekve — kio estas la sola signifo de la frazo en Esperanto.

Mi opinias do ne superflue pritrakti iom detale tiun demandon, kaj, en la sama okazo, montri, kiel la matematika logiko kondukas al miskonkludoj, kiam oni volas ĝin apliki al la lingvaj aferoj.¹ Tio estis la ĉefa eraro de Couturat, kiu volis fari el sia *Ido* la lingvon de la logistiko, kaj atingis nur al solena aborto. La samo atendas la novajn logikemulojn, kiuj lasas sin trompi de eksteraj formaj similaĵoj, sed ne penis esplori la realan funkcion de la pensado.

Tiajn erarojn de metodo la skismantoj kulpas tri: ili asertas pri plena simetrieco inter la aktiva kaj la pasiva konjugacio, pri sameco de pasiva konjugacio ĉe ĉiuj verboj, kaj fine pri paraleleco de la esprimebloj en ĉiu el la tri pasivaj tempoj. Ĉar mi havis okazon klarigi tiujn tri punktojn en kelkaj diversaj okazoj, oni permesu al mi represi ĉi tie, kun kelkaj modifoj, miajn iamajn rebatojn.

¹ Kaj al aliaj ankaŭ... Ĵurnalisto, kiu demandis la tiutempe faman kolonikonstruanton, generalon Lyautey, pri la sekreto de l' sukceso, ricevis la konsilon: «Neniam forgesu, ke en la vivo du kaj du faras neniam kvar!»

I. RESPONDO AL S-RO G. R. EN LYON¹

... La bazo de la teorio de s-ro T. Jung estas, ke la temposignifo kaj uzado de la pasivaj participoj *-ata*, *-ita*, *-ota* devas esti logike kaj absolute simetriaj al tiuj de la aktivaj participoj *-anta*, *-inta*, *-onta*. Sub alia formo, tio signifas, ke la grupo *estis -ita*, same kiel la grupo *estis -inta*, ĉiam montras antaŭpasintecon kaj ne simplan pasintecon. Apliko de tiu teorio estis la frazo, kiu elvokis la tutan disputon: «La konsilantaro decidis amnestii 60 negrojn: ili estis kondamnitaj je morto», frazo, kiu, en la vera esperanta lingvo, prezentas nur ekzemplon de aparte nigra humuro.

Nu, sufiĉas malfermi la verkaron de Zamenhof por konstati, ke tiu teorio estas rekte kontraŭa al la lingvouzo de Zamenhof. Por tion pli klare montri, mi elektos el la *Fabeloj de Andersen* kelkajn simplajn frazojn kun pasivaj verboformoj, kaj mi provos turni ilin en la aktivan respondan formon; oni facile vidos, ke la rezulto estas senseca, kaj tiel pruviĝos *ab absurdo* la ne-zamenhofeco de la sistemo de s-ro Jung.

(*Fab. II* pĝ 78): *Antaŭe ni iradis en la lernejon kaj iom lernis, kaj poste ni estis konfirmitaj.*

Sub aktiva formo: *Ni iradis en la lernejon kaj iom lernis; oni estis nin konfirmintaj.* Tiu nova frazo signifas, ke la konfirmacio okazis antaŭ la lernejvizitado; sed ĝuste, en la originala frazo, la adverboj *antaŭe* kaj *poste* montras malan signifon.

(*Fab. II* pĝ 99. Temas pri ruĝaj ŝuoj): «*Jes, ili brilas!*» *diris Karen; kaj ili montriĝis laŭmezuraj, kaj estis aĉetitaj.*

Sub aktiva formo: *Ili montriĝis laŭmezuraj; oni estis ilin aĉetintaj.* Tiu nova frazo signifas, ke oni aĉetis la ŝuojn, antaŭ ol Karen ilin surprovis. La rakonto diras la malon.

(*Fab. III* pĝ 133): «*Kiam Phantasus venos, mi certe trovos ian okazon por elŝiri plumon el liaj flugiloj...*» *Kaj Phantasus venis, plumo estis elŝirita al li.*

¹ «Franca Esperantisto», Marto 1937.

Sub aktiva formo: *Kaj Phantasus venis; oni estis elŝirinta plumon al li.* Laŭ tia frazo, ĉiuj komprenus, ke oni elŝiris la plumon al Phantasus antaŭ lia alveno; kaj ĝuste tiel s-ro Jung komprenas ankaŭ la pasivan frazon; bedaŭrinde, la antaŭa propozicio antaŭdiras la malon.

Kaj oni ne rebatu, ke tio estas lingva deflankiĝo de Zamenhof en liaj lastaj jaroj: oni trovos la saman uzon de la grupo *estis -ita* por esprimi la simplan pasintecon en ĉiuj liaj verkoj, kaj, kio estas pli grava por ni, en la Fundamenta Ekzercaro: *Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniŭ...* (§ 39, 11). La returnita frazo: *Mia onklo ne mortis per natura morto; neniŭ estis mortiginta lin* prezentus rektan absurdaĵon, neadante, ke la murdo estus okazinta antaŭ la morto!

De kie do venis tia misinterpreto de la faktoj? Simple de tio, ke, anstataŭ analizi la tekstojn kaj poste formuli la regulojn laŭ la uzado, oni trovis pli oportuna kaj pli rapida elfari belan paradigmon, tabeligante en du kolumnoj la aktivajn kaj pasivajn participojn:

<i>mi estas kaptanta</i>	<i>mi estas kaptata</i>
<i>mi estis kaptanta</i>	<i>mi estis kaptata</i>
<i>mi estas kaptinta</i>	<i>mi estas kaptita</i>
<i>mi estis kaptinta</i>	<i>mi estis kaptita ktp</i>

kaj rezoni el tiu bela simetriaĵo. Sed atentu: en la vivanta lingvo, la kunmetitaj formoj estas nur escepte uzataj en la aktiva voĉo, kaj kio efektive respondas al la kumetitaj pasivaj formoj, tio estas la simplaj formoj de la aktivo:

<i>mi kaptas</i>	<i>mi estas kaptata</i>
<i>mi kaptis</i>	<i>mi estis kaptita ktp</i>

Por ilustrati ĉi tiun aserton, mi reproduktos parton de statistiko, kiun publikigis la rimarkinda lingv-esploranto Fenton S. Stancliff: en la *Originala Verkaro* de Zamenhof, kiu entenas tekstojn de 1887 ĝis 1917, oni trovas entute 1.055 participojn konjugacie uzatajn. El tiu nombro

1016 (t. e. 96,3 %) estas pasivaj
kaj 39 (t. e. 3,7 %) estas aktivaj.

En nia Esperanto, sekve, la pasiva voĉo ne estas plene simetria al la aktiva: esprimante la agon per du vortoj anstataŭ unu, ĝi prezentas ĝin sub iel akcentata, insista formo, en kiu la participo montras la gradon de finiteco de la ago kaj nur la helpverbo la tempon. Dume, en la aktiva, ĉar la tempon montras la simpla formo, la grupo *estis -inta* povas esti destinita al la esprimo de la antaŭpasinteco (= pluskvamperfekto) sen ia ĝeno.

Estas do falsa metodo, se oni provas difini la sencon de la pasivaj formoj, rilatigante ilin kun la aktivaj kunmetitaj formoj, kiel faras kelkaj okazaj gramatikistoj, emaj pensadi pli geometrie ol filologie...

II. NEFERMITA LETERO AL TEO JUNG¹

Ne, mia kara Jung, viaj klarigoj pri *ata-ita* ne igis por mi la problemon multe pli klara; sendube mi estas leganto de grumblema humoro aŭ de malvasta spirito, aŭ ambaŭ kune. Sed tiaj ĵongloj, kiel vi faras per pure elpensitaj ekzemploj, kaj via aserto, ke la esperanta gramatiko estas ĉiam simpla, ne povis min konvinki; eĉ pikis min ia dubo, ĉu plene taŭgas la metodo, kiun uzis ĝis nun ĉiuj studintoj de tiu problemo: ili ĉiuj, Beaufront, Aymonier, Fruictier, Stamadiadis kaj vi mem, atentis nur la signifon kaj valoron de la participaj sufiksoj, malzorgante la verbradikon, al kiu ili alkroĉiĝas. Sola escepto estas s-ro K. Kalocsay, kiu en sia libro *Lingvo, Stilo, Formo* (p. 84) antaŭsentas la irotan vojon.

Ofte la uzebleco de afikso dependas de la signifo de la afikso-porta radiko; kelkaj afiksoj povas esti uzataj nur kun unu speco de radiko (oni ne vidas, kian signifon havus ekz-e *bo-kaldrono* aŭ *ek-botelo*); kelkaj aliaj modifas sian signifon laŭ la radikspeco (ekz-e *-ad-* ne havas la saman signifon post verba radiko: *paf-ado*,

¹ «Lingva Kritiko», Oktobro 1932.

kiel post substantiva: *kron-ado*; simile *-uj-* post nomo de floro: *roz-ujo*, aŭ de homo: *Kafr-ujo* ktp). Estas do kompreneble, ke por difini la ĝustan uzadon de *-ata* kaj *-ita*, konvenas esplori la agojn kaj reagojn inter tiuj afiksoj kaj la diversaj verbaj radikoj.

Vi diras, ke esence *-ata* signifas samtempecon (daŭron) de la ago kaj *-ita* antaŭtempecon (finitecon) de la ago rilate al la momento, pri kiu oni parolas; kaj vi avertis kontraŭ miskompreno, precizigante, ke ne temas pri absoluta daŭro. Konsentite. Tamen, por ke oni konsciu, ke unu ago estas samtempa kun momento aŭ kun alia ago, ĝi devas posedi ian percepteblan daŭron. Nu, ĉu agoj kiel *perdi*, *forgesi*, *elpensi* ktp povas esti konsiderataj laŭ la kategorio de la daŭro? Efektive tiajn agojn oni ne perceptas, oni perceptas nur ilian rezulton, aŭ alidire la staton, kiun ili estigas. Aliflanke, por ke ago estu perceptebla kiel antaŭtempa al momento aŭ al alia ago, ĝi devas estigi ian rezulton, kiu mem state daŭru; ekz-e, kiam finiĝis la ago *skribi*, restas la rezulto kiel *io skribita*. Sed ĉu la verbo *koni*, ekz-e, apartenas al la sama speco? Kion signifas 'io konita'? Ion, kion oni konis kaj ankoraŭ konas — aŭ ion, kion ekkoninte oni ne konas plu? Saman heziton konfesas s-ro Fruictier pri la analoga verbo *ami*, en la frazo, kiun vi mem citas: *Mi estas amita de mia frato* = *antaŭe mia frato amis min; nun li verŝajne ne amas min*. Tiu *verŝajne* pravas, ke pri verboj de tiu kategorio, la sufikso *-it-* ne sufiĉas per si mem por trudi sencon de finiteco al ago, kiu ne allasas ĝin.¹

Se do ni volas klarigi la uzadon de la pasivaj participoj, ni devas unue klasi la verbojn en tri kategoriojn: unue tiujn, kiuj esprimas agon konceptatan kiel esence daŭran, kaj kies finiĝo estigas nenian rezulton: post ilia ĉeso komenciĝas ia tute nova stato. Tiaj

¹ Tiu aserto estas ĝusta en la konjugacio; sed kiam la pasiva participo estas uzata epitete, ĉar oni disponas nenian alian rimedon por esprimi la ĉesigon de la ago, la sufikso *-it-* alprenas tiun sencon: *Mono havata estas pli grava ol havita* (= ol tiu, kiun oni ne plu havas); sed tia uzo, kvankam tute zamenhafa, ne ĉiam estas konfuz-imuna: *la nomo de la homo amita kaj perdita* (*Marta*, pĝ 106): ĉu homo, kiun ŝi ne plu amas, aŭ kiun ŝi amis kaj ankoraŭ amas? Nur la ĉirkaŭteksto montras al ni, ke temas pri la dua signifo. Kun tiaklasaj verboj, *-ita* povas vere signifi nur pasinteccon.

estas ekz-e la verboj: ami, envii, havi, koni, memori, posedi, regi, scii, senti, teni, enteni, timi, viziti ktp; oni povas nomi ilin «verboj de daŭro sen rezulto».

Due tiujn, kiuj esprimas agon, kiu povas pli-malpli longe daŭri, sed kies finiĝo estigas ian rezulton, t. e. ian staton daŭran kaj samnaturan. Tiaj estas ekz-e la verboj: detrui, ekkoni, fermi, kaŝi, konfidi, legi, delogi, forpeli, skribi, vundi ktp; oni povas nomi ilin «verboj de daŭro kaj rezulto».

Trie, tiujn, kiuj esprimas agon, kies efektivigo estas preskaŭ neperceptebla pro sia rapideco, kaj kiuj estas sekve konsiderataj nur post sia plena finiteco, pro sia rezulto. Tiaj estas ekz-e la verboj: elpensi, fini, forgesi, heredi, perdi, savi, trafi, trovi ktp; oni povas nomi ilin «verboj de rezulto sen daŭro».

Kompreneble tio ne estas forma klasifiko: ĝi dependas nur de preciza signifo de ĉiu verbo: *fidi* apartenas al la unua klaso, sed *konfidi* al la dua; *trakti* al la unua, *pritrakti* al la dua ktp. Unu sama verbo povas aparteni al du klasoj, laŭ siaj diversaj sencoj: *ŝirmi* ekz-e povas signifi ‘meti en sendanĝerecon’ (duaklasa) aŭ ‘teni en sendanĝereco’ (unuaklasa) ktp.

Ni vidu nun, kiujn tempojn oni bezonas esprimi: ili estas kvin. En la estanteco, oni povas prezenti, aŭ ke la ago okazas (*prezenco*) aŭ ke ekzistas stato estigita de finita ago (*perfekto*); en la estinteco, oni povas prezenti agon kiel daŭre malvolviĝantan (*imperfekto*), aŭ kiel okazintan sen ia akcento pri daŭro (*aoristo*), aŭ kiel jam finitan antaŭ komenciĝo de alia ago (*pluskvamperfekto*). Malmultaj lingvoj, kiel la helena, posedas apartan formon por ĉiu el tiuj kvin tempoj: la franca konfuzas la prezencon kun la perfekto (*présent*), la germana la imperfekton kun la aoristo (*Präteritum*), la latina la aoriston kun la perfekto (*perfectum*) ktp, sed sub tiuj sintezaj formoj, oni ĉiam povas analizi la ĉi-supre cititajn tempojn.

Restas nur esplori, kiun sufikson oni uzas por ĉiu el tiuj tempoj en ĉiu klaso de verboj.

A. *Verboj de daŭro sen rezulto*.—Ĉar *-ita* propre signifas la finitecon, ĝi do ne povos esti ĉi tie uzata. Krome, el la nomo mem de tiu klaso, oni tuj vidas, ke povas ekzisti nek perfekto nek aoristo. Do tri eblaj tempoj:

Prezenco: La lando estas regata de reĝo.

Imperfekto: La lando estis regata de reĝo.

Pluskvamperfekto: En tiu tempo la lando estis respubliko, sed ĝi estis antaŭe regata de reĝo.

B. *Verboj de daŭro kaj rezulto.*—Tie ĉi ambaŭ sufiksoj estas normale uzeblaj, kaj la kvin tempoj formeblaj:

Prezenco: La akuzito aŭskultas senmove la vortojn, per kiuj li estas kondamnata.

Perfekto: La prezidanto finis legi la decidon: la akuzito estas nun kondamnita.

Imperfekto: La akuzito estis kondamnata, kiam li subite svenis.

Aoristo: Post longaj diskutoj, la akuzito estis kondamnita je morto.

Pluskvamperfekto: La akuzito estis jam kondamnita, kiam la polico malkovris lian senkulpecon.

C. *Verboj de rezulto sen daŭro.*—Ĉar temas pri momentaj agoj, oni principe ne devus uzi la sufikson *-ata*; sed, se la sama momenta ago ripetiga, la spirito povas prezenti al si tiun ripetigon kiel unu solan daŭran agon: kaj tial, ĉe tiuklasaj verboj, la sufikso *-ata* estas uzata, tamen, kun la nuanco de ripetigo:

Prezenco: Ĉiutage ŝlosiloj estas perdataj en la grandaj hoteloj (Ripeto).

Perfekto: Mia ŝlosilo estas perdita.

Imperfekto: Tago post tago, mono estis perdata por tiaj bagatelaĵoj (Ripeto).

Aoristo: La ŝlosilo estis perdita ne de mi, sed ja de vi.

Pluskvamperfekto: Pli frue, mia ŝlosilo estis jam alian fojon perdita.

Tiu ampleksa tabelo demonstros la malĝustecon de via ĉefa konkludo, nome, ke «estas preferinde uzi *-ita* nur, kiam oni volas klare esprimi la antaŭtempecon de ia ago rilate al la momento, pri kiu oni parolas». Via teorio postulus do, ke en la verboklasoj B. kaj C. oni uzu *-ata* en la aoristo; sed la konstanta uzado de Z kaj la ĝenerala uzado de la simplaj esperantistoj difinas *-ita* por

la aoristo, kontraste kun *-ata* ĉe la imperfekto. Aliflanke, dum vi emus rezervi *estis -ita* por la pluskvamperfekto, montriĝas klare, ke Esperanto ne disponas konjugacian esprimilon por tiu nuanco, kaj helpas al si per almeto de temp-adverboj al la formo de la aoristo.

Por pruvo, mi citos nur kelkajn frazojn de Z, tiritajn el la tria volumo de la *Fabeloj de Andersen*, kaj, por pli klarigi ilin, kaj eviti tro nacilingvan influon, mi aldonos latinan tradukon. Oni memoru nur, ke tiu lingvo esprimas perfektan kaj aoristan per la sama formo (*amatus sum*); cetere ĉiuj cititaj verboj estas de la klaso B.

(p. 103) *La historio rakontis pri hungara kavaliro, kiu estis kaptita de turka guberniestro (Historia narrabat de hungaro equite, qui captus erat de turco proconsule: PLUSKVAMPERFEKTO) . . . Ĝuste tiu guberniestro, kiu estis ordoninta aljungi lin al la plugilo, fariĝis nun lia kaptito, kaj estis metita de li en la malliberejon (Tum uero ille proconsul, qui iusserat eum ad aratrum iungi, factus est nunc eius captivus et coniectus est ab eo in vincula: AORISTO) . . . «Donu al mi la eblon morti kiel kristano!» Kaj lia peto estis plenumita. Tiel rakontis la historio, kiu estis voĉlegita (Da mihi ut moriar christianus! Et eius preces exauditaе sunt. Sic narrabat ea historia, quae magna voce lecta est: AORISTO).*

(p. 113) *La maljuna fraŭlino povis trovi uzon por ĝi, kaj tial la botelkolo estis provizita per korko, kaj tiu ĝia parto, kiu antaŭe estis turnita supren, nun estis turnita malsupren (Anus potuit inuenire quomodo uteretur ea re; itaque hoc lagænae collum obturamento munitum est, et haec eius pars, quae primum versa erat sursum, nun versa est deorsum: AORISTO, PLUSKVAMPERFEKTO, AORISTO).*

Mi kredas, ke tiuj ekzemploj estas sufiĉe klaraj kaj pruvaj, favore al mia tezo kaj kontraŭe al la via. Sekve la frazo *La konsilantaro decidis amnestii 60 negrojn: ili estis kondamnitaj je morto* estas almenaŭ konfuza, kaj devus teksti: *ili estis antaŭe kondamnitaj je morto . . .*¹

¹ Mi uzis ĉi-supre metodon de komparo kun nacia lingvo, kiu ebligis pli precizan analizon de la faktoj; sed ĝi ne bone evidentigas la propran karakteron de la esperanta verbsistemo, kiun oni trovos skizitan en la sekvantaj paĝoj.

III. RAPORTO ĈE PUBLIKA KUNVENO DE LA AKADEMIO¹

Estimataj gesamideanoj!

La lando, en kiu ni havas la honoron teni nian nunan kongreson, estas de longe fama pro la tolero, kiun ĝi ĉiam konsentis al la plej diversaj formoj de la homa pensado. Filozofoj, kiel Descartes aŭ Spinoza, teologoj, kiel Leibnitz, Arnault aŭ Jurieu, literaturistoj, kiel Bayle ou Voltaire, ŝuldis al ĝi, dum tiu aŭ alia parto de sia vivo, helpon kaj ŝirmejon. La natura sekvo estis, ke tiu ĉi lando konis floradon de tiom da religiaj aŭ filozofiaj konfesioj, ke ĝi probable superas Persujon, kie laŭdire kunvivadis sepdek islamaj sektoj. Mi ne scias, ĉu tiu spektaklo tiel influis la nederlandan pensmanieron, ke ĝi opinias kontraŭnatura la unuecon de unu spirita movado; sed mi devas konstati, ke ĝuste en tiu ĉi lando naskiĝis, inter la du mondmilitoj, tuta serio da herezoj kaj herezetoj pri la lingvo Esperanto.² Tial, levante nun mian voĉon kontraŭ la plej grava, la misuzado de la pasivaj participoj, mi sentas min iel kvazaŭ unu el tiuj apostoloj *in partibus infidelium*, kiuj estis komisiitaj alporti la bonan parolon al la paganoj, mahometanoj kaj aliaj miskredantoj. Mi cetere ne iluzias al mi pri la malfacileco de mia tasko: la ĉeesto, malantaŭ tiu impona tablego, de tiel eminentaj oponentoj, kiel F. A. F. Faulhaber, J. R. G. Isbrücker, Teo Jung, Paul Neergaard —mi ektimas citi pli!— jam montras al mi, kiel izolita kaj senalianca ĉi tie mi estas. Mi esperas tamen, ke ne ĉiuj miaj paroloj falos sur ŝtonajn lokojn, sed eble kelkaj trovos taŭgan grundon, kaj iam donos frukton.

Dume mi parolas, kaj estas aŭskultata kun ia atento, pri kiu mi vin dankas. Ĉar ankaŭ hieraŭ mi jam parolis antaŭ vi, kaj estis sammaniere aŭskultata. Cetere, vi estas tiel afablaj personoj, ke, se morgaŭ mi denove alparolos vin, mi estos aŭskultata ne malpli ĝentile. Ĉu vi ĉiuj konsentas? Jes, kaj pri tio mi ne estas

¹ En la Universala Kongreso de Haarlem, la 6. de Aŭgusto 1954.

² Du el ili, en tiu sama tempo, konvinke kontraŭbatalis mia amiko De Hoog, en sia libro: *Du Malsanoj en Esperanto: Kia-ismo, Tiom-Kiom-ismo*, bonega kaj brila ekzemplo de lingva esploro.

surprizita. He! kelkaj jam tikliĝas. Kaj mi supozas, ke multaj aliaj tikliĝos, se mi diros, ke, pri via ĝentileco, nek hieraŭ mi estis surprizita, nek morgaŭ mi estos surprizita.

Kaj tamen tiuj dirmanieroj estas ne nur pure zamenhofaj, sed ankaŭ, malgraŭ la ŝajno, absolute logikaj. Kiel do povas klariĝi tiu kontrasto inter la du asertoj, ke hieraŭ mi estis atente aŭskultata kaj ne estis pri tio surprizita? Tute simple, se vi bonvolos iom pripensi, kiel funkcias la spirito. *Aŭskulti* kaj *surprizi* estas ja du agoj, sed diversspecaj: kiam vi aŭskultas iun, via aktiveco estas multe malpli manifesta, ol kiam vi surprizas iun — tiel ke, fojfoje, la aŭskultado povas preskaŭ fariĝi stato (precipe se la parolanto estas endormiga...); aliflanke, *aŭskulti* ne estas ia krea ago; kiam vi finis vian aŭskultadon, vi transiras al alia ago aŭ stato, vi babilas aŭ dormas, ne restas ia rezulta sekvo. Sed *surprizi* estas alia afero: surprizo estas speco de spirita skuo, abrupta kaj mallonga — tiel ke, se vi zorge analizas vin, vi neniam konscias la momenteton, dum kiu vi surprizis iun: vi kaj li, ambaŭ povas konstati nur la rezulton de tiu spirita skuo.

Nu, kiam ni uzas pasivan formon, kio okazas? Ni estas devigataj, el la konstruo mem de nia lingvo, uzi la verbon *esti* kaj unu pasivan partupon. Nu la verbo *esti* per si mem signifas staton, ne agon! Kaj la diferenco inter ago kaj stato estas, interalie, ke ago povas esti longedaŭra aŭ momenta, sed ke stato estas ĉiam io daŭra.

La pasiva partupon, kies radiko esprimas la agon, povas do logike difini nur, en kia stadio de la plenumiĝo de tiu ago lokiĝas la stato montrata de *esti*. Do, kiam temas pri ago longedaŭra kaj senrezulta, kiel ekz-e *aŭskulti*, la stato povas nur koincidi kun la plenumiĝo de tiu ago. Jen kial ĉiuj, mi kredas, diras same: *Mi estas aŭskultata, mi estis aŭskultata, mi estos aŭskultata* ktp.

Sed kiam temas pri ago momenta, kiel ekz-e *surprizi*, evidente tiu momenteco estas tro mallonga por koincidi kun ia stato; la sola stadio, kiu prezentas eblon de daŭro, estas la rezulto de tiu momenta ago. Jen kial, zamenhofe kaj tradicie, oni diras: *Mi estas surprizita, mi estis surprizita, mi estos surprizita* ktp.

Tamen, estas alia eblo prezenti momentan agon sub la kategoria de la daŭro: se oni supozas, ke ĝi regule ripetiĝas, la spirito

emas rĝardi la serion de tiuj samaj momentaj agoj kiel unu solan daŭran agadon. Jen kial oni povas diri senerare: *Tra jarcentoj penoj kaj mono estis vane perdataj por eltrovi la konstantan moviĝon*, dum pri unu sola okazaĵo, oni povas nur diri: *Mia ŝlosilo estis perdita de la servistino*.¹


Mi vidas inter vi multajn dubantajn vizaĝojn. Ni elektu do alian ekzemplon. En lernolibro tre uzata en mia lando, oni ilustras la sistemon de la participoj per bildo de fiŝkaptisto. Kaj oni montras la fiŝon alproksimiĝanta al la hoko (*ĝi estas kaptota*), englutanta la hokon (*ĝi estas kaptata*), kaj levata el la akvo (*ĝi estas kaptita*). Sed tiuj tri bildoj prezentas ĝuste tiun falsan evidentcon, kiu trompas per sia verŝajno. En efektiveco, *kapti* estas unu el tiuj momentaj agoj, kiujn ni konscias nur, kiam ili finiĝis. Fiŝisto ekscias pri sia akiro nur per la streĉiĝo de la fadeno, t. e. kiam la fiŝo estas jam kaptita. Jen kial via fiŝvendisto, se li volas esti logika —pri lia sincereco mi preferas ne enketi— devas deklari al vi: *Tiu salmo estas tute freŝa: ĝi estis kaptita hieraŭ!* Kaj li povas, ankaŭ tute korekte, aldoni: *Cetere tiaj fiŝoj estas kaptataj ĉiutage en ĉi tiu sezono*, ĉar tiam temos pri ripetigaĵo.

Restas tria kategorio de agoj, la plej multaj, kies plenumiĝo daŭras pli-malpli longe (same kiel ĉe la unua kategorio), sed lasas tamen post si efektivan rezulton (same kiel ĉe la dua kategorio). Tia estas ekz-e la ago *skribi*: vi povas skribi dum horoj, kaj poste restos ia skribaĵo; aŭ *konstrui*, aŭ *pentri*, aŭ *manĝi* ktp. Ĉe tiaj verboj, oni uzas la *ata*-participon, kiam la stato esprimata de *esti* koincidas kun la plenumiĝo mem de la ago, kaj la *ita*-participon, kiam tiu stato koincidas kun la rezulto de tiu ago. Oni diras do: *En mia strato oni nun multe konstruas; dekstre de mia loĝejo, unu domo estas konstruata, kaj maldekstre unu estas konstruita*, por signifi, ke la konstruado de la dekstra domo ankoraŭ nun daŭras, kaj ke la konstruado de la maldekstra jam finiĝis. Same okazas ĉe la estinteco: *En la tempo de mia transloĝiĝo, la dekstra domo estis konstruata, la maldekstra estis konstruita*. Tio

¹ Pli belan ekzemplon oni ne povas trovi, ol la alvokon al la Fenikso: *Ho vi paradiza birdo, ĉiucenfare renovigata, en flamoj naskata kaj en flamoj mortanta!* (Fabeloj de Andersen, III pĝ 12).

estas klara, kaj akceptita de ĉiuj, mi supozas. Kaj de la konsidero de tia frazo venas la regulo, kiun kelkaj formulis, ke, en ĉia okazo, oni uzu ĉe la estinteco tiun saman particon, kiun oni uzus ĉe la estanteco.

Tio ŝajnas logika, kaj tamen ne estas. Ĉar tio supozigas, ke la estanteco estas io tute klare difinita kaj ĉiurilate komparebla kun la estinteco. La homoj, kiuj tenas tiun opinion, probable prezentas al si la tempojn per ia spaca bildo: ili ekz-e bildigas al si la estantecon kiel kvadraton, aŭ cirklon ktp, kiun oni povas transloki laŭlonge de ideala linio, por ricevi la estintecon kaj la estontecon, iel jene:



Sed tio ne respondas al la realaĵo psikologia. Kio estas reale estanteco? Tio estas kontinua percepto, ke io (ago, stato, procezo) malvolviĝas kaj trapasas antaŭ nia konscio, kvazaŭ filmobendo antaŭ spektanto. La estanteco havas do du esencajn karakterizojn: ĝi estas parto de io *daŭranta* kaj nur *parte konata*: por uzi la saman komparon, la antaŭaj bildoj estas jam en la estinteco, pri la postaj ni ankoraŭ nenion scias. Sed la estinteco estas io alia, ĝi estas jam tute registrita en la memoro, ĝi estas io plene konata kaj kies finiĝon ni ĉeestis. El la vidpunkto de la pensanto kaj de la parolanto, la estinteco alprenas do aspekton de finiteco, tre diferenca disde la aspekto de nefiniteco, kiun prezentas la estanteco. Jen kion Zamenhof volis diri, kiam li skribis, ke «tempo *estanta* ekzistas vere nur, kiam la ago aŭ stato daŭras sufiĉe; en alia kondiĉo la ago aŭ stato jam finiĝis, kiam ni parolas pri ili».¹ Jen kial, malgraŭ la pasia protesto de kelkaj tro atentaj al la forma simetrio, la sufikso *-at-* enhavas nepre en si ian ideon pri daŭro, kaj *-it-* ideon pri rezulto.

¹ *Leteroj de Zamenhof*, I, pĝ 7.

Ni klarigu tiujn konsiderojn per ekzemploj. Mi troviĝas antaŭ la urba teatro kaj, vidante ĝin prilumita kaj aŭdante eĥon de potencaj voĉoj, mi demandas la pordiston: *Kio okazas ĉi-vespere?* kaj li respondas: *La Damniĝo de Faŭsto estas prezentata*. Bone. Nun, supozu, ke mi estas teatra recenzisto; mia posta artikolo komenciĝos per: *Hieraŭ, en nia urba teatro, estis prezentita La Damniĝo de Faŭsto...* Kial do *prezentita*? Nu, kio interesas miajn legantojn? Ĉu ekscii, ke oni komencis kaj plu okupiĝis prezenti la operon aŭ — ke tiu prezentado estis kompleta kaj atingis sian normalan finon? Evidente, la dua informo. Mi do prave skribis *estis prezentita*, t. e. 'troviĝis hieraŭ en tiu stato, kiu sekvas kompletan prezentiĝon'.

Male, se mi volus insisti pri la malvolviĝo de la prezentado, aŭ por akcenti ties daŭron, aŭ por rilatigi ĝin kun interveninta okazaĵo, mi logike uzus la *ata*-participon, kaj skribus aŭ: *Hieraŭ La Damniĝo de Faŭsto estis prezentata kvar horojn, kaj mi ne enuis unu minuton*, aŭ *Hieraŭ La Damniĝo de Faŭsto estis prezentata, kiam la ĉefa lustrego falfrakasiĝis*, kio signifas, ke dum la daŭro de mia malenuado, aŭ en la momento de la falfrakasiĝo, la opero estis en la stato de plenumiĝado kaj de ankoraŭ-ne-finiteco.

Vi komprenas nun, kial la frazo pri la konstruata kaj konstruita domoj estis erare analizita de miaj oponentoj: oni en ĝi uzas la *ata*-participon en la estinteco, ne ĉar oni uzus ĝin en la estanteco, sed ĉar ĝi taŭge esprimas la daŭron, dum kiu intervenis unu okazo, mia translokiĝo. Forigu la mencion pri tia interokazaĵo, kaj vi devos diri: *Tiuj domoj estis konstruitaj en la 19a jarcento*, ĉar la sola interesa afero estas, tiam, ke oni finis la konstruadon, ne ke oni daŭrigis ĝin.

Tiuj pensnuancoj kelkfoje elglitis preter la atento de bonintencaj homoj.¹

¹ La komentisto de la nova eldono de la *Fundamenta Krestomatio*, ekz-e, ne komprenis la ripetitan signifon de *-ata* en sia notado pĝ 32 (Vidu ĉi-poste, en *Editoraj demandoj*, la subĉapitron *La nova eldono de la «Fundamenta Krestomatio»*). En siaj *Lingvaj Notoj* pri «*La Malnova Testamento*», s-ro M. C. Butler demandas: «Kial cirkumcidata, Gen. 17, 12 kaj 13; sed cirkumcidita 26-27?» kaj ne proponas respondon. Temas simple pri ĝenerala ordono (do: ripetota) en 17, 13: «Cirkum-

Permesu al mi do, por eviti se eble tiajn miskomprenojn, kolekti, el la verkaro de Zamenhof, kelkajn ekzemplojn de unu sama verbo en la diversaj tempoj, en kiuj la uzo de *-ata* aŭ *-ita* dependas nur de la daŭreca aŭ fineca nuanco. Kaj komence, unu tipa frazo de la *Unua Ekzercaro*: *Dum en unu ĉambro la gastoj dancadis; en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; kian la tablo estis preparita, oni invitis la gastojn al la tablo.* Alia bona kontrasto inter la plenumiĝanta kaj plenumita ago estas la komparo de jenaj du frazoj:

En fremda lando oni ne povas ĉiutage trovi ŝelon de fromaĝo kaj lardhaŭton, ne, tie oni riskas suferi malsaton, oni eĉ povas vivante esti formanĝata de kato!

Kaj ankoraŭ pli rapide ĝi kuris antaŭen tage kaj nokte. La panoj estis formanĝitaj, la ŝinko ankaŭ, kaj jen, ili estas en Laplando! (Fabeloj de Andersen, III, 76, kaj II, 70).

Tri frazoj bone klarigos la aspekton de rezulteco en la nuntempo, de daŭreco en la paseo kaj de sendaŭreca preterito:

La zorge ellaborita granda artikolo 'Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia' estas verkita ne de s-ro L. de Beaufront... (Lingvaj Respondoj, 3^a eld., pĝ 100).

En la tempo, kiam estis verkata la 'Dua Libro', la demando... ne estis ankoraŭ absolute decidita (Lingvaj Respondoj, 3^a eld., pĝ 50).

Ĉar la Krestomatia enhavas tre grandan kvanton da materialo, kiu estis verkita en diversaj tempoj kaj de diversaj aŭtoroj... (OV, pĝ 48).

cidata estu ĉiu naskita en via domo...», dum en 17, 26 temas pri unufoja ago: «En tiu sama tago estis cirkumciditaj Abraham kaj lia filo Iŝmael». En la unua eldono de la *La Nova Testamento*, la Anglaj pastroj tradukis Mateo VII, 1 kaj Luko VI, 37 per: «Ne juĝu, kaj vi ne estos juĝitaj», ne rimarkante, ke, kio estas grava en ĉi tiu loko, ne estas la rezulto, kondamno aŭ malkondamno, sed la fakto mem, ke oni estas almetata al juĝo; kion bone sentis Zamenhof, tradukante (en *Fabeloj*, III, 35): «Ne juĝu, tiam vi ne estos juĝata», kaj prave per tiu formo la redaktoroj de la Londona Biblio korektis la unuan lokon, sed forgesis korekti ankaŭ la duan.

En la sekvantaj frazoj, oni trovos sinsekve la nuancojn de malvolviĝo, de ripetigo, de finiteco kaj de antaŭtempeco:

Kaj ĉio, kion ili tie faris, estis farata sub lia kontrolo (Gen. XXXIX, 22).

Ribeloj estis farataj en ĝi de la plej malproksimaj tempoj (Ezra, IV, 15).

Ĉio estis farita laŭnombre kaj laŭpeze, kaj ĉio pesita estis tiutempe enskribita (Ezra, VIII, 34).

Kiam tio estis farita, okazis ankaŭ ĝojigaj aferoj (Fab. III, 108).

Kaj por fini, kiel ni komencis, per konstruaj aferoj, jen la denuncado de la Araboj kontraŭ la rekonstruo de Jeruzalemo kaj de la Templo (nenio nova sub la suno!):

Estu sciate al la reĝo, ke se tiu urbo estos konstruita kaj la muregoj estos finitaj, tiam ili ne donos tributon nek impostojn nek jarpagon.

Malhelpu tiujn homojn en ilia laborado, ke la urbo ne estu rekonstruata, ĝis estos donita ordono de mi.

Estu sciate al la reĝo, ke ni iris en la Judan landon, al la domo de la granda Dio: ĝi estas konstruata el grandaj ŝtonoj...

Tiam ni demandis tiujn plenaĝulojn... kaj ili... diris: Ni estas servantoj de Dio... kaj ni konstruas la domon, kiu estis konstruita antaŭ multe da jaroj...

Tiam venis tiu Ŝeŝbacar...: kaj de tiu tempo ĝis nun ĝi estas konstruata kaj ĝi ankoraŭ ne estas finita (Ezra, IV, 13, 21; V, 8-16).

* * *

Por resumi la tutan aferon, mi flatas al mi, ke mi klarigis tri punktojn:

1° La konsisto mem de nia esperanta konjugacio ne ebligas esprimi agon per la pasiva voĉo: ĉi tiu povas esprimi nur staton aŭ rezultan de plenumita ago, aŭ koincidantan kun plenumiganta ago, aŭ preparantan plenumigontan agon. Pasivan agon oni povas esprimi nur per la sufikso *-ig-*.

2° Sekve de tio, la elekto inter *-ata* kaj *-ita* dependas nur de la intenco prezenti la agon aŭ en sia daŭra malvolviĝo, aŭ en sia plena finiteco.

3° La estintaj agoj estas normale rigardataj sub sia aspekto de finiteco, kaj nur esceptokaze oni bezonas insisti pri ilia daŭro aŭ ripetiĝo.¹

Tia estis la konstanta uzado de Zamenhof, uzado plene konforma al la psikologia vero, kaj registrita en la ekzemploj de la Fundamenta Ekzercaro. Kondamni kaj forĵeti tiun uzadon estas kontribui ne al perfektigo, sed al fuŝado de la lingvo. Kaj se tia fuŝado fariĝis nun kutimo en kelkaj rondoj, mi sufiĉe fidus la forton de la tradicio kaj de la vera logiko por kredi, ke pli-malpli frue oni forpelos la falsajn profetojn kaj revenos al la sana doktrino. Kaj mia penado ne estos vana, se eĉ nur unu el vi mi sukcesis konverti kaj revenigi al la Majstro.

¹ En la tempo, kiam mi finis la netigon de tiu ĉi artikolo, mi ricevis «Bultenon de I. E. M.₃W.» kun informoj pri la kariero de la pioniro Hugo Steiner; tie mi legas: «1948. Post enmarŝo de Hitler, Steiner estis prenata en ŝirmaresto... Tiam I. E. M. W. estis fermata flanke de Gestapo...» Por la redaktinto, verŝajne, la interesa afero estas, ke la Germanoj komencis aresti s-ron Steiner kaj entreprenis la fermadon de la Muzeo, eĉ se tiujn du agojn ili neniam kondukis ĝis la fino; por mi (kaj, supozeble, por multaj) la sola interesaĵo estas, ke ili kompletigis kaj la arestadon kaj la fermadon: tial ni skribus: *estis prenita... estis fermita*. En tiaj aferoj, nur la rezulto gravas.

TRI ENKETOJ

I. PRI LA MODO POST *MALHELPI* KTP

En 1934, kiam Kalocsay kaj mi interkonsiliĝadis pri la estonta *Plena Gramatiko*, ni renkontiĝis kun la problemo de la volitivo en dependaj propozicioj. Kaj tio estis tikla problemo.

La volitivo estas principe uzata, por montri, ke la ago estas ankoraŭ ne plenumita, sed ke ĝia plenumiĝo estas la celo, la volo, la ordono de alia persono.

Ĝin oni kompreneble uzas en kompletivoj dependaj de ĉefverbo kun signifo *diri, skribi* ktp. En tiaj okazoj, oni povas tre facile rigardi la subjunkcion kiel ekvivalenton de dupunkto aŭ de citiloj, kaj tio nenion ŝanĝas en la formo de la subpropozicio: *Mi skribis al li, ke li venu* = *Mi skribis al li: li venu!*

Kiam la ĉefverbo mem esprimas la volon, la uzo de la volitivo en la subpropozicio estas ja ia senca pleonasm, sed tiel natura, ke neniu iam hezitis: *Mi ordonis, ke li venu*. Sed atentul! Jam en tiu okazo fariĝis ia pli intima ligiteco inter la ĉef- kaj la subpropozicio, ĉar, se la ĉefverbo havas nean sencon, tiu nedado influas ankaŭ la subverbon; tiel ke, se oni anstataŭigas la subjunkcion per du punktoj, oni tiam devas aldoni novan negacion: *Mi malpermesas, ke li venu* = *Li ne venu: tion mi malpermesas*.

Ĝis nun la afero estis sufiĉe klara. Sed apud la verboj, kiuj nepre esprimas volon (*ordoni, postuli, deziri* ktp), ekzistas aliaj, kiuj iom koloriĝas je nuanco de volo, sed tamen esprimas propre ian alian ideon: aŭ trudo de la cirkonstancoj (*estas necese, bezoni* ktp), aŭ deteniĝon (*permesi, lasi*), aŭ starigon de favoraj aŭ malfavoraj cirkonstancoj (*ebliĝi, malebliĝi, malhelpi* ktp). Kiun modon uzi post ili? Jen detalo, pri kiu neniu gramatiko ankoraŭ zorgis en tiu tempo.

Por iom orienti nin kaj kontroli niajn personajn analizojn, mi do iniciatis mallongan enketon pri tiu temo, kaj sendis la ĉi-suban

leteron al D-ro W. Lippmann, tiama Direktoro de la Akademia Sekcio pri Gramatiko, al la akademianoj C. Aymonier, W. Bailey, L. Belmont, P. Corret, B. Migliorini, P. Nylén, V. Setälä kaj al la Lingva-Komitatano M. C. Butler:

Lille, la 19. de Septembro 1934.

Tre Estimata Samideano!

Mi dezirus konsulti vin pri la sekvantaj punktoj, kaj estus feliĉa, se vi volus pruntedoni al mi iom de via konata sperto pri Esperanto. La demando estas pri la manieroj uzotaj en la subordigitaj propozicioj post verboj kiel malhelpi k.t.p. Bonvolu konsideri la frazojn, kaj aldoni la finaĵo(j)n, kiu(j)n en ĉiu loko vi opinias uzinda(j): -as, -is, -os, -us, -u.

Kun miaj respektaj antaŭdankoj.

* * *

1. *La malbona vetero malhelpis, ke mi forvetur— .*
(*Mi ne forveturis!*)
2. *La malĝojo malhelpas, ke ŝi kant— .*
(*Ŝi ne kantas!*)
3. *Tiuj kritiketoj ne malhelpas, ke la libro est— interesa.*
(*Ĝi efektive estas tial!*)
4. *Lingvaj malkorektaĵoj ne malhelpas, ke romano est— interesa. (Ĝi povas esti tial)*
5. *Estas eble, ke li alven— morgaŭ.*
6. *Neeble estas, ke ni denove am— tiun, kiun ni vere ĉesis ami.*
7. *La soldatoj malebligis, ke li fleg— sian fraton.*
8. *Nenio malebligas, ke vi gajn— en loterio, se vi havus biletojn.*
9. *Nenio malebligas, ke vi gajn— en tiu loterio morgaŭ.*
10. *La metaforaj sencoj riĉigas la lingvon, kondiĉe ke ili est— internacie kompreneblaj.*
11. *La industrio povos prosperi nur kondiĉe, ke la kampano konsum— ĝiajn produktojn.*

* * *

El la naŭ demanditoj, P. Corret ne respondis; W. Bailey respondis, ke ne estas problemoj, ĉar en ĉiuj tiaj frazoj Zamenhof

turnus aŭ per substantivo aŭ per infinitivo (*la malbona vetero malhelpis nian forveturon aŭ malhelpis al ni forveturi*).

Restis sep, kies respondojn mi tabeligas ĉi-poste, kun ^aldono, en la lasta kolumno, de la plej ofta solvo:

Frazoj	Lipm.	Aymon.	Belm.	Migl.	Nylén	Setäl.	Butl.	Pl. S.
1	is	is, us	u	u	u	u	u	u
2	as	as, us	u	u	u	u	u	u
3	as	as	as	as	as	as	u	as
4	as	us	us	as	u	u	u	u
5	os	os	os, u	os	os	os	os	os
6	as, os	os, us	u	as, os	us	os	u	os
7	as, is	us	u	u	u	u	u	u
8	us	us	us	u	us	us	u	us
9	os	us	os, u	u	os	u	u	u
10	as	as	as	as, u	as, u	u	u	as
11	os	as, os	os	as	os, u	os, u	u	os

La ekzamenado de tiu tabelo montras, ke la konsultitoj reagis al la problemo en du diversaj manieroj. Unuj —s-roj Belmont, Migliorini, Nylén, Setälä— sekvis principe sian lingvan instinkton kaj provis trovi ĉiukaze la ĝustan modon respondan al la nuanco de la penso; ili cetere bone akordiĝas inter si, kaj neniu el ili tre devias de la plej ofta solvo (maksimume en du lokoj).

La aliaj ŝajne gvidis sin per pli teoria kriterio kaj ili aŭ sisteme rifuzis la volitivon en ĉiuj okazoj —s-roj Lippmann kaj Aymonier, kun la diferenco, ke tiu lasta ofte akceptas la kondicionalon kiel surogaton— aŭ tute male sistemigas ĝian uzon —s-ro Butler. Ili do ne interakordas, kaj ĉiu forte devias de la plej ofta solvo (en kvin lokoj, el dekunu).

En la sintaksa kampo kaj ĉe tiaj nuancigitaj dirmanieroj, la rigideco de solvo ne estas bona signo. Ni estis do principe emaj alpreni la plej oftan solvon, eĉ se ne konsideri, ke la meza vojo estas la plej sekura. Sed ankoraŭ alia grava motivo pezis sur nia decido, tio estas la kelkaj analogaj ekzemploj, kiujn mi elpinĉis el la zamenhofaj verkoj:

*Vi ne malhelpu, ke ŝi resanktigu
La patran domon!*

(*Ifigenio*, pĝ 107. Kp frazojn 1, 2!).

*Estas do nenio neebla en tio, ke (anstataŭ ke ĉiu ellernas diversajn
lingvojn) ĉiuj ellernadu unu saman lingvon.*

(*OV*, pĝ 285. Kp frazon 6)

Ĉu ĝi estas ebla, ke ŝi sin tiom forgesus?

(*Georgo Dandin*, pĝ 13. Kp frazon 6)

Ĉu estas eble, ke mi ĉiam estos venkita de ŝi?

(*GD*, pĝ 34. Kp frazon 6)

*Sed se ĝi estas malbona, kiu do malpermesas, ke la esperantistoj
mem ĝin reorganizu?*

(*Let. II*, pĝ 147. Kp frazon 7)

Ĉu vi pensas, ke ŝi volus naĝi aŭ lasi, ke la akvo fermiĝu super ŝi?

(*Fab. II*, pĝ 39. Kp frazon 9)

Li ellernos nian lingvon kun la kondiĉo, ke ni elĵetu la vorton «kaj».

(*LR*, pĝ 78. Kp frazon 10)

Oni vidas, ke Zamenhof iris eĉ pli malproksimen en la uzado de la volitivo en subordigitaj propozicioj, ol la plimulto de niaj konsultitoj. Estis do klare, ke tiu modo havas ne nur la signifon de ago ordonata aŭ dezirata, sed ankaŭ de ago efikata aŭ simple ne malhelpata de la subjekto en la ĉefpropozicio, kaj ke la pozicioj de s-roj Lippmann kaj Aymonier respondas nek al la kutimoj de la lingvo, nek al la opinioj de la plimulto de ĝiaj uzantoj.

Ni redaktis do la ĉapitron de la *Plena Gramatiko* en akordo kun la rezultoj de tiu ĉi enketo, kaj praktike alprenis la solvojn montritajn en la lasta kolumno de mia tabelo. Kio cetera ne ĝenis kelkajn tiamajn recenzistojn por indigne kritiki niajn «apriorajn dekretojn».

II. LA MODO POST KVAZAŬ

Unu el la trajtoj de la ĝermana dialekto en Esperanto estas la sistema uzado de la indikativo post la subjunkcio *kvazaŭ*. Ĉar la anoj de tiu dialekto ordinare pravigas sin per la ekzemplo de Zamenhof, estas necese ĝin esplori, antaŭ ol diskuti la argumentojn de la novemuloj.

«El la Zamenhofa literaturo mi kolektis 319 ekzemplojn: el kiuj 153 havas *-us* kaj 166 havas *-as* aŭ *-is*. Ne supozu, ke tiuj 166 prezentas 'formojn' arkaikajn. *Fabeloj III* havas 37 el ili kontraŭ 26 kun *-us*».

Tiel parolis¹ akademiano William Bailey, kiu, laŭ la vortoj de s-ro M. C. Butler, «dediĉis sian vivon al konscienca studado de la Zamenhofa verkaro». Konscienca, certe; sed ĉu ankaŭ klera? Nu, ni iru kaj vidu mem.

Ni komencu per rememorigo de kelkaj faktoj, kiujn multaj ŝajne ne konas.

1. La vorto *kvazaŭ*, kvankam fundamenta, ne ekzistis en la tempo de la *Unua Libro*, 1887. Tie, por esprimi la fiktivan komparon, Zamenhof uzis la kunmetaĵon *kiel se* kun la kondicionalo: *Mi skribas al vi en tiu lingvo, kaj mi eĉ unu vorton ne almetas en alia lingvo, tiel kiel se ni tute ne komprenus unu la lingvon de la alia*.

Nur en la *Meza Vortaro Internacia-Germana* de 1889 aperas la vorto *kvazaŭ*; sed ĝia enkonduko en la literaturon estis progresiva. En la fabelo *Virineto de l' Maro* (verkitā probable en la sama tempo, kaj poste kolektita en *FK*), oni trovas ankoraŭ 8 ekzemplojn de *kiel se* kontraŭ 5 de *kvazaŭ*; en la *Batalo de l' Vivo* (1891) restas 4 ekzemploj de *kiel se* inter 20 de *kvazaŭ*; ktp. Sed, en tiuj samaj tekstoj, ni trovas alispecajn kuriozajn ekzemplojn: en la *Dua Libro* (1888), ni legas, fine de la fabelo *La Ombro: li faris, kiel li ĝemus* (korektita, en la *Fabeloj II*, pĝ 143, per: *li ŝajnigis, ke li ĝemas*); en la *Virineto*, same: *Estis al ŝi, kiel ŝi devus plori* (*FK*

¹ En «The British Esperantist», Majo 1941.

pĝ 40; same pĝ 50, 52). Nu, en tiaj frazoj, Zamenhof uzis poste *kvazaŭ* kun indikativo.

2. En sia *Commentaire sur la Grammaire Esperanto* (1900), kie li kolektis ĉiujn instruojn de Zamenhof senditajn al li dum detala korespondado, Beaufront klasas tiun vorteton inter la adverbojn (*F à l'instar de*), kaj ne donas la subjunkcian signifon (*F comme si*). En sia *Vortaro* (1910), Kabe difinas ĝin prepozicio, en la senco *kiel se*, kun la sola ekzemplo: *li parolas kvazaŭ pastro*.

Ŝajnas do, ke nek unu nek la alia el tiuj du bonaj kaj bone informitaj esperantistoj vidis en *kvazaŭ* ian ligilon por enkonduki subordinitan propozicion, sed ĝi estis por ili nur ia malfacile difinebla partikulo de fiktiveco.

3. Kaj tamen, etimologie, ĝi estas antaŭ ĉio ia subjunkcio. Ĝi devenas de la latina *quasi*, el *quam si*, kio respondas ĝuste al *F comme si*, *A as if*, *E als ob*, *H como si* ktp. En la latina ĝi sekvigis subjunktivon, modon de la nerealeco: *Honores petunt quasi honeste uixerint* (Honorojn ili aspiras, kvazaŭ ili vivus honorinde!). El tiu fundamenta funkcio devenas, per elipso, du aliaj, unu adverba: *Poeta quasi diuino quodam spiritu afflatur* (La poeto estas penetrata kvazaŭ per ia dia blovo), dua prepozicieca: *Et quasi cursores uitae lampada tradunt* (Kvazaŭ vetkurantoj, ili de la viv' transdonas la lampon). Tri klaraj kazoj, kun nediskutebla sintakso. De kie venas do la ĝeno, kiun ni perceptis ĉe Beaufront kaj Kabe?

4. La kaŭzo estas, mi opinias, tiu arbitreco, per kiu, kiel mi jam aludis, Zamenhof elektis latinan aŭ latinidan radikon kaj donis al ĝi la sencojn kaj uzojn de rusa (aŭ germana) vorto. Efektive, sub la latindevena *kvazaŭ* Zamenhof enmetis la substancon de la rusa *budto*, kiu estas kurioza apartaĵo de tiu lingvo. La primitiva formo estis probable *kak bud' to* (laŭlitere: 'kiel estus ĉi tio'), sed rapide la verba origino de *budto* malaperis el la konscio de la parolantoj, kaj oni uzas *budto* aŭ solan, aŭ akompanatan de *kak* (kiel) aŭ *bĭ* (us-partikulo) simple por enkonduki en la frazon nuancon de simileco aŭ de simulado. Dank' al sia origino, *budto*

ne havas propran, difinitan funkcion, sed ludas rolon de sendependa partikulo aŭ de tre elastsenca ligilo. Multo el tiu karaktero restis al la zamenhofa *kvazaŭ*.

5. Efektive, la uzo, kiun Zamenhof faris el tiu vorto, estas tre persona kaj iom subtila por okcidentaj spiritoj. Se ni, okcidentlingvanoj, zorge analizos tiun uzadon, ni distingos kvar diversajn funkciojn, ĉe kiuj troviĝas ĉiam, kompreneble, la sama nuanco, ke la diritaĵo ne apartenas al la kampo de la realaĵo, havas kun ĝi nur partan similecon, kaj devas do esti rigardata kiel fiktivaĵo.

A. La unua, kaj plej ofta, funkcio estas adverba; *kvazaŭ* tiaokaze signifas ‘proksimume, iel, ŝajne, se tiel diri’; ĝi metiĝas ĝuste antaŭ la vorto efikata, sed neniel influas ties kazon aŭ modon: Ekz-oj: *Floron, kiu estas kvazaŭ formita el plej delikataj plumoj* (F. III, 20); *Kiam mi vidis tiujn brulantajn okulojn, tiun ardon kaj kvazaŭ animan soifon je la . . . Evangelio . . .* (F. III, 103); *La beno tie kvazaŭ ŝprucis fonte* (F. III, 46).

B. La dua funkcio estas tiu de la komparilo *kiel*, kun la aldona nuanco, ke temas ne pri identeco;¹ ĝin oni povus traduki per: ‘kiel — sed tio estas ne vera, nur iluzia ktp’. La komparo povas rilati al la subjekto, al objekto aŭ la ago. Ekz-oj: *Vojoj, kiuj pendis ĉe la ŝtona murego kvazaŭ nestoj de hirundoj* (F. III, 64); *Tiesto ŝtelis filon de Atreo Kaj lin edukis kvazaŭ sian propran* (If. 21); *Verŝante larmojn kvazaŭ per riveroj* (Ham. 15).

C. La tria funkcio, kiun Zamenhof iniciatis kaj plej malvolvis, estas tiu de surogato de la subjunkcio *ke*, por enkonduki, kun ĉiam la sama nuanco de fiktiveco, subpropozicion kompletivan, t. e. subjekton aŭ objekton de la ĉefverbo. Ĉar tia uzo estis ĝis nun nenie klarigita, eĉ ne menciita (krom en la unua eldono de la *Plena Vortaro*, kaj, kompreneble, en la *Plena Gramatiko*), mi ĝin iom pli detale montros. Oni ĝin trovas:

a) en funkcio de subjekta propozicio, nur post senpersonaj verboj, esprimantaj — aŭ la ekziston de analogio ekstera:

¹ Tiun funkcion mi volonte nomus «prepoziciumo», ĉar ĝi estas meza inter prepozicio kaj subjunkcio.

esti: *Estis, kvazaŭ ŝi volas ion diri* (F. III, 14); *La stela ĉielo montriĝis pli klare: estis tiel, kvazaŭ ĝi pli alproksimiĝis al la tero* (F. III, 38).

fariĝi: *Kien ajn ŝi venis... , ĉie fariĝis tiel, kvazaŭ la radio ~~venis~~ venis* (F. III, 124).

ŝajni: *Ŝajnis, kvazaŭ mil voĉoj krias tion* (F. III, 11); *Kien ajn li venis, tie ŝajnis, kvazaŭ sunlumo flugis super la ebenaĵo* (F. III, 120).

aspekti: *Aspektis, kvazaŭ ili volas fali en la akvon* (F. III, 63).

— aŭ la ekziston de interna impresio:

esti al: *Estas al mi tute tiel, kvazaŭ aŭ mi staras sur ia alta turo, aŭ oni volas min pendigi* (Rev. 51).

fariĝi al: *Al Knut subite fariĝis tiel, kvazaŭ la ĉambro runde turniĝas kun li* (F. III, 61).

ŝajni al: *Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi manĝas konfitaĵojn* (GD, 38).

La senpersoneco de la verbo ŝajnas nepra kondiĉo de tia uzo; efektive, se la ĉefverbo havas esprimitan subjekton vortan, la kvazaŭ-propozicio ne plu povas roli subjekte, kaj ĝi envenas, laŭ niaj analizkutimoj, en la kategorion D.: oni nur komparu, kun la ĉi-supraj, jenajn du ekzemplojn:

En la ventro estas tia krakado, kvazaŭ tuta regimento ekblo-vus trumpetojn (Rev. 21) kaj: *La ĉielo aspektis, kvazaŭ ĝi estus balaita* (F. III, 26).

b) en funkcio de objekta propozicio, post verboj aŭ verbaĵoj esprimantaj — aŭ sentadon:

senti: *Li sentas, kvazaŭ li falegas en senfinan malplenen* (F. III, 33).

antaŭsenti: *Mi forlasas Amalion, mi ne scias... mi antaŭsentas, kvazaŭ ĝi estas por ĉiam* (Rab. 35).

havi la senton: *Ŝi havis la senton, kvazaŭ ĉi tio estas ŝia arbo* (F. III, 46).

havi la impreson: Li havis la impreson, kvazaŭ la luno lumas en la ĉambro (F. III, 14).

— aŭ sentigadon, simuladon:

ŝajnigi: Ni ŝajnigu, kvazaŭ ni tute ne scias, kia homo li estas (Rev. 32).

mensogi: La suboficiredzino mensogis ankaŭ al vi, kvazaŭ mi ŝin elvergis (Rev. 78).

fari impreson: Ĝi faris impreson, kvazaŭ per siaj floroj ĝi volas doni esprimon al sia ĝojo (F. III, 142).

havi mienon: Li havas mienon, kvazaŭ lia trumpetado estas io grava (F. III, 136).

En tia funkcio Zamenhof konstruas ĉiam¹ *kvazaŭ* kun la indikativo — kaj tio estas komprenebla, ĉar temas pri kompletivoj kaj ĉar la fiktiveco estas ordinare esprimita dufoje: kaj per *kvazaŭ* kaj per la ĉefverbo. Tiu sintaksa pleonasmo estas tiel forta, ke eĉ Zamenhof uzas en tiaj okazoj ankaŭ la simplan *ke* plus indikativo, kaj, kio estas pli grava por ni, sen ia sentebla diferencigo en la fiktiveco. Oni komparu ekz-e jenajn du frazojn de la sama rakonto:

Ho, kiel longa kaj dormema estis la tempo!... Li havis la senton, ke la mondo kaj ĝia tumulto havas plu nenian rilaton al li, ke li kuŝas jam ekster ĝi; kaj: La arbo ŝutis siajn aromajn foliojn... Ili falis sur liajn sensukiĝintajn lipojn, kaj li havis la senton, kvazaŭ pano kaj fortiga vino lin refreŝigis (F. III, 146 kaj 147).

aŭ jenajn du frazojn el *La Revizoro*, kun moda kontrasto:

Kaj ja tia seneksteraĵa, malalta... — ŝajnas, ke per la ungo oni povus lin dispremi! kaj: Diru al mi, mi petas, ŝajnas al mi,

¹ Estas vere, ke, en du okazoj, oni trovas us-modon: *Ĉu... ne estas al mi, kvazaŭ ĉiam spiono el la infero akompanus ĉiun mian paŝon? (Rab. 93) kaj: Ĉu li ne havas tian mienon, kvazaŭ li estus kapabla per kuireja kulero forpeli la marŝalon de Saksujo trans la Gangeson? (Rab. 85).* Sed mi kredas, ke tiu kondicionalo estas alkondukita de la negacio en la ĉefpropozicio, per efekto analoga al tiu de la kondicionala rilatpropozicio (*Ne ekzistas homo, kiu ne pekus*).

kvazaŭ hieraŭ vi estis de iom pli malalta kresko, ĉu ne vere? (Rev. 33 kaj 62).

En ĉiu el tiuj duopoj, la plej forta fiktiveco troviĝas ja en la frazoj kun *ke*, ne en tiuj kun *kvazaŭ*.

Jen verŝajne, kial tian uzadon, se ne paroli pri ĝia rusisma karaktero, alprenis neniu alia posta verkisto, nek Grabowski, nek Kabe, kaj kial ĝi tiel absolute arĥaikiĝis, ke kelkaj eĉ neniam suspektis ĝian ekziston.

D. Fine la kvara funkcio, la vere etimologia, estas tiu de subjunkcio servanta por enkonduki fiktivan komparon, kaj signifanta 'kiel (estus) se. . .' Ĝi, en tia funkcio, estas plejofte sekvata de la kondicionalo ĉe Zamenhof, kaj nur escepte de la indikativo:

a) Kun la *kondicionalo* aktiva aŭ pasiva: *Oni metis ĝin en akvon, kvazaŭ oni volus ĝin dronigi* (F. III, 8); *Unu el ili, kiu briletis, kvazaŭ ĝi estus skulptita el freŝe falinta neĝo* (F. III, 19); *Kial tiu manuskripto . . . estis kunvolvita tiamaniere, kvazaŭ ĝi estus tuj fordonota al iu?* (Mart. 151).

b) Kun la *indikativo*, prezenca, preterita aŭ futura: *Farinte, kvazaŭ ŝi sin mortigas* (GD, 45); *La knabo staris respektige, kvazaŭ li staris antaŭ la reĝo mem* (F. III, 73); *La greno kuŝis kiel terenbatita, kiel forportita de la fluo, kvazaŭ ĝi neniam plu povos releviĝi* (F. III, 30).

6. Kaj ĉi tie nin frontas la kerna demando: kial du manieroj por la sama funkcio? Al tiu demando W. Bailey, en la artikolo, el kiu mi citis komence, donis du respondojn:

«Iufoje okazas, ke oni volas starigi tempan rilaton inter la fakto kaj la supozo: kaj la kondiĉa modo, ne havante difinitan tempan sencon, ne povas esprimi tian rilaton».

La rezono estas trioble erara. Se efektive la us-modo ne havas difinitan tempan sencon, W. Bailey forgesis, *u n u e* ke, ĝuste pro tiu tempa nedifiniteco, Zamenhof neniam ĝenis sin uzi la simplan kondicionalon kun preterita senco; pruve: *Ŝi diris: Kiu dirus (= estus dirinta) al Abraham, ke Sara mamnutros infanojn?* (Gen. 21, 7), aŭ, rekte kun nia vorteto: *Vere, kvazaŭ mi tute ne manĝus (= estus ne manĝinta), mi nur ricevis pli grandan apetiton!*

(Rev. 28); *du e*, ke, en okazo de dubsenceco, ekzistas du rimedoj, per kiuj oni povas esprimi kaj la fiktivecon kaj la pasintecon, kiel instruis jam la Fundamenta Ekzercaro: *Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron* (aŭ: *se li estus dirinta al mi la veron*) (FE § 24), aŭ, kun nia vorteto: *Klitandro, kvazaŭ li estus frapita* (GD, 32); *trie*, ke, en pluraj zamenhofaj ekzemploj, la is-tempo tute ne montras antaŭecon, sed veran samtempecon, do ke la temp-esprimo neniel estis motivo por elekti indikativon: *La knabo staris respektige, kvazaŭ li staris antaŭ la reĝo mem* (F. III, 73: *estus starinta* havus nenian sencon ĉi tiel!); *La suna kampo elrigardis, kvazaŭ ĝi antaŭ minuto estis ankoraŭ blinda kaj nun ricevis okulojn, per kiuj ĝi rigardis supren al la brilanta ĉielo* (Bat. 62: *estis* prezentas pasintaĵon rilate al *elrigardis*, sed *ricevis* ja samtempecon!).

7. La dua respondo de W. Bailey estis: «En kelkaj okazoj, oni povas elekti tempan formon (-as aŭ -is laŭ la cirkonstancoj), por akcenti la eblecon aŭ kredeblecon de la priskribata ago aŭ stato; sed, por akcenti ĝian neeblecon aŭ nekredeblecon, la kondiĉa modo estas preferinda».

Tiu argumento estas simpla sofismo. *Kvazaŭ* enkondukas fiktivan komparon: nu, se temas pri fiktiva ago, memsekve temas ankaŭ pri nereala. Kiam vi anoncis, ke vi rakontos feinfabelon, neniun prudenta homo demandos vin, ĉu ĝi efektive okazis. Verŝajne tion eksentetis W. Bailey, ĉar li aldonis unu el tiuj artifikaj ekzemploj, kiuj estas la lasta helpo de la gramatikistoj, kiam iliaj belaj teorioj estas minacataj de la malbelaj etaj faktoj: «Parolante pri Johano, konato marŝanta ŝanceliĝe, Petro diras al Paŭlo: *Li iras, kvazaŭ li estus ebria*. Petro scias, ke Johano ne drinkas. Parolante pri nekonato same marŝanta, li povus diri: *Li iras kvazaŭ li estas ebria*. Ĉar povas esti, ke la nekonato estas efektive ebria. Tiamaniere, la libereco pri la uzado de ambaŭ formoj faciligas la esprimadon de nuanco utila». Jen la tipo mem de fantazia misrezono. En tiuj du okazoj, la observema Petro faras komparon, t. e. li proksimigas en sia penso du bildojn, tiun de zigzagiranto kaj tiun de ebrulo: nu, per la fakto mem, ke li faras komparon, li decidas, ke ne estas identeco inter la zigzagiranto kaj

la ebruiĵo: la komparo estas nepre fiktiva; ĉar, alie, li ne bezonus komparon kaj dirus: *Li zigzagiras, ĉar li estas ebria*. Esprimi, per la sama propozicio, ke du aferoj havas nur unu kompareblan detalon, kaj ke tamen tiuj du aferoj povas esti plene identaj — tio similas al la fama koncepto pri fero el ligno.

8. Se, anstataŭ konstrui en la aero, W. Bailey estus analizinta kelkajn okazojn, en kiuj Zamenhof uzis jen la kondicionalon, jen la indikativon, li povus konstati, ke ekzistas inter ili nenia nuanco aŭ senca aŭ eĉ stila.

La lasta sceno de *La Revizoro* estas «muta sceno», en kiu la sinteno de ĉiuj personoj estas priskribita en sia surpriza senmoveco. Ni tie legas: *Maldekstre de la urbestro: Zemlanika, klininte la kapon iom flanken, kvazaŭ li ion aŭskultas; post li la juĝisto kun disŝovitaj brakoj... farinte per la lipoj tian movon, kvazaŭ li volus ekfajfi*. Eble iu aglokula gramatikisto kapablos malkovri nuancon de «ebleco aŭ kredebleco» inter la ŝajna sinteno de Zemlanika kaj de Ljapkin-Tjapkin — mi rezignas.

Ni prenu alian paĝon (63-64) en *La Rabistoj*, kie Roller rakontas pri la eksplodo de la pulvoturo kaj sia forkuro: *Kaj subite la signalo de la libereco! Ĝi estis krako, kvazaŭ ĉe la ĉielbarelo krevis ringego... Tiel malbonodoris per sulfuro, kvazaŭ la tuta vestaro de Moloĥo estus aerumata sub la ĉielo!* Nu, se iu ekvidas pli da ebleco en la kreviĝo de la ĉielbarelo ol en la aerumado de la Moloĥaj kostumoj, tiu estas matura por diskuti pri la psikologio de la centaŭrinoj aŭ la sekso de la anĝeloj.

9. Laŭde citinte la du ĉi-suprajn argumentojn, s-ro M. C. Butler, en alia artikolo de «The British Esperantist» (Majo 1949), aldonis trian, ne pli trafan: «Ĉiu konsentas, ke post se oni povas uzi *-as, -is, -os* aŭ *-us* laŭ la senco esprimota: *Se li venas, li pagas; se li venis, li pagis; se li venos, li pagos; se li venus, li pagus*. Jen ĝusta esprimo de kvar malsamaj ideoj. Tute same, post kiel se (aŭ ĝia ekvivalento *kvazaŭ*) oni povas egale bone skribi laŭsence *-as, -is, -os* aŭ *-us*». Denove misrezono, devenanta de konfuzo inter la veraj valoroj de la verbaj finaĵoj: la cititaj eblaĵoj prezentas ne *kvar*, sed ja *du* malsamajn ideojn; post se, oni efektive uzas aŭ

la indikativon (kun la tri nuancoj de la tri tempoj), por indiki, ke la supozo estas aŭ teoria aŭ ebla (tial, preskaŭ ĉiam, oni povas anstataŭigi *se* per *kiam* aŭ eĉ *ĉiufoje kiam*) aŭ la kondicionalon, por indiki, ke la supozo estas neebla, fiktiva. Neniu dirus aŭ skribus: *Se mi estas birdo, mi flugus al vi* aŭ *Se mi estis farinta la supon, ĝi ne estus tiel pipra*, sed ja nur: *Se mi estus birdo . . . Se mi estus farinta . . .* Nu, se oni antaŭmetas *kiel* antaŭ *se*, oni aŭtomate eliminis la eblecon aŭ teoriecon de la supozo, kaj lasas nur lokon por neebla, fiktiva supozo. Pruvo estas, ke, en siaj unuaj verkoj, Zamenhof uzis ĉiam nur la kondicionalon post *kiel se*.

10. Kial do li ne same faris ankaŭ konstante post la ekvivalenta *kvazaŭ*? La sola motivo, kiun mi povas vidi, estas jena:

Mi montris, en la § 4, ke la rusa partikulo *budto* restis, se mi riskos tion diri, en ia likva stato, uzate egale en tre diversaj manieroj, por kies traduko la okcident-eŭropaj lingvoj uzas malsamajn vortspecojn, adverbajn, prepoziciumon, subjunkciojn. Ke Zamenhof intencis konservi tian fluidecon ankaŭ al sia latindevena partikulo *kvazaŭ*, evidentiĝas el la fakto, ke li almetis al ĝi la «neŭtralan», plurvizaĝan finaĵon -*aŭ*: tio ebligis al li uzi la saman vorteton kun la kvar valoroj de *iel*, *kiel*, *ke*, *kiel se*. Sed la klasigon de la ekzemploj inter tiuj kvar kategorioj ni faras per nia spirito, kutimiĝinta al la neta distingo de tiuj kvar esprimiloj; dum Z vidis probable en ili nur kvar nuancojn de la unu sama esprimo. Tiele nenio garantias al ni, ke li, kiu ne havis la samajn penskutimojn, estus klasinta tiun aŭ alian ekzemplon en la saman kategorion, kiel ni. El kio sekvas, ke nia problemo estas eble falsa problemo; ke, kiam ni supozas, ke Z intence uzis *indikativon post la subjunkcio k v a z a ŭ* (en intenco, kiun neniu ĝis nun kapablis difini), li eble tute simple intencis uzi *indikativon kun la adverbo k v a z a ŭ*.

Ni malfermu *La Revizoro* je la 37a paĝo. La urbestredzino staras ĉe la fenestro, senpacienca pri la novaĵoj, kaj koleriĝas: *Nu, jen ni jam tutan horon atendas! . . . Kia ĉagreno! Kvazaŭ intence neniu sin montras! Kvazaŭ ĉiuj formortis!* — Evidente, la unua *kvazaŭ* estas adverbo koncernanta *intence*; sed kial ne interpreti sammaniere ankaŭ la duan? *Ŝajne pro intenco neniu sin montras! Ŝajne ĉiuj formortis!*

Ni turnu nin al *Hamleto*, je la 29a paĝo: Horacio priskribas al Hamleto la gestojn de la fantomo:

*Li vokas vin, ke iru vi kun li,
Li kvazaŭ volas ion komuniki
Nur al vi sola.*

Por ni, nenia problemo: *kvazaŭ* estas adverbo kaj ne influas la verbon indikativan *volas*. Sed supozu, ke Z estus permesinta al si la licencon de trokeo je la unua piedo, ĉu li ne estus skribinta:

... kvazaŭ li volas ion komuniki ...

ŝanĝante nek la tempon, nek la *valoron* de la partikulo?

Plue, en la sama dramo (pĝ 126), kortegano anoncas pri la ribelo favore al Laerto:

*Lin la popolo nomas reĝo; kvazaŭ
La mondo nun denove komenciĝus,
Kaj kvazaŭ malaperis nun subite
La historio kaj la tradicioj ...*

Klarigi tiun diversecon de la tempoj per la hipotezo, ke *malaperis* estas mallongigo por *estus malaperintaj*, tio estas flata nek por la gramatika sento de Z (se *kvazaŭ* postulas la us-modon en la unua propozicio, ĝi postulas ĝin same en la dua), nek por lia versfara lerteco (*Kaj estus nun subite forprenitaj* aŭ io simila ne estis tre malfacile trovebla, ĉu?). Sed se ni rigardas la duan *kvazaŭ* kiel adverbos, nenio plu ĝenas: *Estis, kiel se la mondo nun denove komenciĝus, kaj jen subite iel malaperis la historio ...*

Alivorte, laŭ mia interpreto, *kvazaŭ* prezentus simple, ne eksterordinaran okazon de subjunkcio uzebla kun mallogika modo, sed unu alian ekzemplon de la tendenco al nedistingo de la adverbaj kaj subjunkciaj funkcioj, kiun oni trovas ankoraŭ nun ĉe la vortetoj *apenaŭ, ĉar, ĉu* kaj kiun oni trovis, en la lulila periodo de la lingvo, ĉe la vorteto *kvankam*. Tia interpreto havus alian avantaĝon, t. e. klarigi la uzon de preterito, kiam ne temas pri antaŭtempo; oni memoras la ekzemplon: *La knabo staris respektige,*

kvazaŭ li staris antaŭ la reĝo mem; mi ne scias, kiel oni povus pravigi tiun preteriton en la okazo de subjunkcio (la sola ebla kunmetita formo estus: *la knabo staris respektige, kvazaŭ li estus staranta antaŭ la reĝo*); male, en mia hipotezo, la preterito estas tute klara: *La knabo staris respektige, li proksimume, preskaŭ staris antaŭ la reĝo mem*.

11. Por tiuj, kiuj ne konsentos pri mia klarigo, estas tamen interese ekscii, kiel Zamenhof, laŭlonge de sia vivo, evoluigis sian lingvouzon rilate al la diskutata punkto. Ni vidis, ke W. Bailey asertis, ke li iom favoris la uzon de la indikativo. Mi, por kontrolo, decidis esplori tri grupojn da verkoj, de proksimume sama amplekso kaj analoga karaktero, verkitaj en tri nete distingaj periodoj; unue, en 1889-93: mi traserĉis la zamenhofajn paĝojn de la *Fundamenta Krestomatio*, *La Batalo de l' Vivo* kaj *Hamleto*; due, en 1907-08: mi esploris la kvar teatraĵojn *La Revizoro*, *Georgo Dandin*, *Ifigenio* kaj *La Rabistoj*; trie, en 1914-15: mi relegis la trian volumon de la *Fabeloj de Andersen*.¹ Jen la rezultoj, klasitaj laŭ la kvar funkcioj, al kiuj ni kutimiĝis (mi memorigas, ke A = *iel*, B = *kiel*, C = *ke*, D a = *kiel se* kun kondicionalo, D b = *kiel se* kun indikativo, laŭ la ordinara interpretado):

Grupo da verkoj	Suma nombro da ekz-oj	Kategorioj				
		A	B	C	D a	D b
I: 1889-93	80	16	17	8	27	12
II: 1907-08	86	12	34	16	15	9
III: 1914-15	108	35	5	32	28	8

Tiu tabelo instigas al pluraj rimarkigoj:

1° Se oni komparas la ciferojn de la Grupo III kun tiuj donitaj de W. Bailey (cititaj en la komenco de ĉi tiu artikolo), oni

¹ Kiel mi jam skribis (*Eseoj* I, pĝ 68), la eldono de tiu volumo estas ne tre korekta. Inter la preseraroj, du interesas nian temon. Mi kredas, juĝante laŭ la stilkutimoj de Zamenhof, ke oni devas korekti, pĝ 60, lin. 16 *elversigis* al *elversigus*; inverse, pĝ 126, lin. 22 *oni donus* al *oni donis*. Cetere tio ne ŝanĝas la kalkulojn.

vidos, ke, ne nur lia elnombrado estis erara, sed lia klasado estis malĝusta: li adiciis la kolumnojn C kaj D b, kaj tiel facile demonstris la malon de la realaĵo.

2° Kun la paso de la jaroj kaj pliperfektigo de lia stilo, Zamenhof regule malvolvis la uzadon de *kvazaŭ* en la *ke*-funkcio (kol. C).

3° Per ia kurioza kontraŭdiro, la verkistoj, kiuj apogas sin sur la indikativaj C-ekzemploj, por ĝeneraligi la indikativon ankaŭ en la D-funkcio, mem forlasis komplete la uzon de *kvazaŭ* en tiu *ke*-funkcio.

4° Pri la D-funkcio, estas evidente, male, ke la proporcio de la indikativaj konstruoj (se oni volas konservi tian analizon) estis ĉiam pli malalta, ol tiu de la kondicionalaj, kaj ankoraŭ malaltiĝis kun la tempo: la indikativaj prezentas 30% de la tutaj D-ekzemploj en la grupo I, 38% en la grupo II kaj nur 22% en la grupo III.

5° Se oni akceptas mian interpretadon, oni konstato, ke tiuj okazoj, en kiuj Zamenhof, kontraŭe al niaj kutimoj, uzas *kvazaŭ* en adverba funkcio per ia sendependigo de la propozicio, kiun ni emus rigardi subordigita, fariĝis malpli multaj kun la jaroj, kvazaŭ li konscius pri la ĝeno tiel kaŭzata al la lingvokutimoj de la okcidentaj esperantistoj; kaj ke, se oni flankmetas tiujn esceptajn okazojn, la sola funkcio, ĉe kiu li regule uzas la indikativon, estas la *ke*-funkcio, la sola ankaŭ, kiu plene malaperis el la uzado.

6° Cetere, kian ajn interpretadon oni elektos, la sola instruo, kiu koincidas samtempe kun la logiko kaj kun la evolu-linio de la zamenhova uzado, estas uzi post la *kiel-se*-funkcia *kvazaŭ* ĉiam nur la kondicionalon.

7° Fine mi volus memori, ke la «unua stilisto esperantista», Kabe, kvankam slavlingvano ankaŭ, sisteme uzis nur *-us* post *kvazaŭ*, eĉ kiam li devis uzi kunmetitajn formojn: *Cetere li vidas la vilaĝon, kvazaŭ li estus forlasinta ĝin hieraŭ* (Pola Antologio, pĝ 88); *mi sentis fortegan pulsobaton en la tempioj, kvazaŭ mia kapo estus krevonta* (samloke, pĝ 102); *li hontiginte praviĝis, kvazaŭ li estus iam sciinta [la polan lingvon]* (samloke, pĝ 147) ktp. Kaj oni eble memoras, kiel forte tiu sama Kabe kontraŭbatalis la tro oftan uzadon de kunmetitaj tempoj!

vobis, ke, ne nur lia elnombrado estis erara, sed lia klasado estis malĝusta: li adiciis la kondumojn C kaj D b, kaj tiel facile demonstris la malon de la realaĵo.

2^a Kim la paso de la jaroj kaj pliperfektigo de lia stilo, Zamenhof regule malvolvis la uzadon de *kvazaŭ* en la *ke*-funkcio (kul. C).

3^a Per ia kurioza kontraŭdiro, la verkistoj, kiuj apogas sin sur la indikativaj C-ekzemploj, por ĝeneraligi la indikativon ankaŭ en la D-funkcio, mem forlasis komplete la uzon de *kvazaŭ* en tiu *ke*-funkcio.

4^a Pri la D-funkcio, estas evidente, male, ke la proporcio de la indikativaj konstruoj (se oni volas konservi tian analizon) estis ĉiam pli malalta, ol tiu de la kondicionalaj, kaj ankoraŭ malaltigis kun la tempo la indikativaj prezentas 30% de la tutaj D-ekzemploj en la grupo I, 38% en la grupo II kaj nur 22% en la grupo III.

5^a Se oni akceptas mian interpretadon, oni konstato, ke tiuj okazoj, en kiuj Zamenhof, kontraŭe al niaj kutimoj, uzas *kvazaŭ* en adverba funkcio per ia sendependigo de la propozicio, kiun ni emus rigardi subordigita, fariĝis malpli multaj kun la jaroj, kvazaŭ li konscius pri la ĝeno tiel kaŭzata al la lingvokutimoj de la okcidentaj esperantistoj; kaj ke, se oni flankmetas tiujn esceptajn okazojn, la sola funkcio, ĉe kiu li regule uzas la indikativon, estas la *ke*-funkcio, la sola ankaŭ, kiu plene malaperis el la uzado.

6^a Cetere, kian ajn interpretadon oni elektos, la sola instruo, kiu koincidas samtempe kun la logiko kaj kun la evolu-linio de la zamenhova uzado, estas uzi post la *kiel-se*-funkcia *kvazaŭ* ĉiam nur la kondicionalon.

7^a Fine mi volus memori, ke la «unua stilisto esperantista», Kabe, kvankam slavlingvano ankaŭ, sisteme uzis nur -us post *kvazaŭ*, eĉ kiam li devis uzi kunmetitajn formojn: *Cetere li vidas la vilaĝon, kvazaŭ li estus forlasinta ĝin hieraŭ* (Pola Antologio, pĝ 88); *mi sentis fortegan pulsobaton en la tempioj, kvazaŭ mia kapo estus krevonta* (samloke, pĝ 102); *li hontiginte pravigis, kvazaŭ li estus iam sciinta [la polan lingvon]* (samloke, pĝ 147) ktp. Kaj oni eble memoras, kiel forte tiu sama Kabe kontraŭbatalis la tro oftan uzadon de kunmetitaj tempoj!

III. PRI LA SUFIKSO *-END-*

En 1950 s-ro M. C. Butler proponis, por la dua fojo, al la Akademio oficialigon de la sufikso *-end-*. Dum la prepara diskuto, inter aliaj kontraŭdiroj, ŝajnis al mi aparte grava jena de mia kolego Stöp-Bowitz: «Dum multaj jaroj mi observadis la sufikson *-end-*; mi konstatis, ke ĝi estas relative tre malmulte vidata, kaj dum mia 23-jara aktiva esperantisteco, mi neniam renkontis kazon, kie mi bezonis tiun sufikson». Tial mi dediĉis la ĉefan parton de mia raporto, kiel Direktoro de la Sekcio pri Komuna Vortaro, al esploro en tiu direkto.

«... Tiu lasta kontraŭdiro estas eble la plej konsiderinda: ĉar, pri iu ajn komunuza vorto, oni povas decidi la oficialigon pro aliaj motivoj, ol la nura uz-ofteco (pro bezono de fiksado de la formo, ekz-e, aŭ de difino de la senco, aŭ pro aŭtoritateco de la fontloko ktp), kaj ceterē tia oficialigo tute ne ŝargas la lingvon, ĉar ĝi neniel signifas, ke oni devos instrui tiun novan vorton en la lernolibroj aŭ postuli ĝian scion en la unuagradaj ekzamenoj. Tute male, sufikso estas esenca parto de la lingva mekanismo: oficialigi unu novan sufikson estas do plimultigi la parkeraĵojn, per kiuj ĉiu komencanto devos ĝeni sian memoron, plilongigi la elementajn gramatikojn kaj finfine iom pli malfaciligi la propagandon. Tio estas do gravega respondeco, kiun akcepti ni devas nur post funda esploro de la demando kaj post plena certiĝo, ke la sufikso estas samtempe taŭga kaj necesa.

»Por akiri tiun certecon, la personaj opinioj estas tute ne sufiĉaj. Tial mi entreprenis la taskon fari statistikon de ofteco de la koncerna sufikso (en la jam publikigita materialo statistika, de s-ro Stancliff aŭ de D-ro Blass, ne estas troveblaj informoj pri *-end-*). Jen mia metodo kaj la rezultoj.

»Mi elektis, kiel esplorkampon, la kvar laste aperintajn verkojn, al kiuj mi aldonis, por kompletigo, la lastan jarkolekton de la revuo «Literatura Mondo». Tia kunaĵo, pro la granda diverseco de la temoj kaj de la verkintoj, prezentas, laŭ mia opinio, la staton de la nuna vivanta lingvo, kaj ankaŭ eĉ de la aŭdace progresanta, kun sufiĉe da ĝusteco, por ke oni povu tiri el ĝia studo prudentajn

konkludojn. Interalie, la enkalkulo de versa traduko ebligis kontroli la opinion de s-ro Rollet de Lisle pri la koncizvaloro de la koncerna sufikso. Esploritaj estis do:

»1° *La mondo ne havas atendejon* (teatraĵo, trad. de F. Faulhaber, Nederlandano; ampleksas ĉirkaŭ 18 mil vortojn).

»2° *Ekspedicio Kon-Tiki* (vojaĝrakonto, trad. de C. Brynildsen, Norvego, prilaborita de Stellan Engholm, Svedo; ĉ. 73 mil vortoj).

»3° *Kredu min, Sinjorino!* (travivaĵoj de C. Rossetti, italkaj angla-lingvano; ĉ. 65 mil vortoj).

»4° *Peer Gynt* (drama poemo, verse trad. de E. A. Haugen, Norvego; ĉ. 26 mil vortoj).

»5° «Literatura Mondo» (la 4 kajeroj 1949; ĉ. 60 mil vortoj).

»En tiuj tekstoj mi trovis, respektive:

»N° 1: unu ekzemplon (*farenda*);

»N° 2: unu ekzemplon (*farenda*);

»N° 3: unu ekzemplon (*farenda*);

»N° 4: nul ekzemplon;

»N° 5: du ekzemplojn (*farenda* kaj *sarkenda*).

»Sume la ofteco de la sufikso *-end-* kalkuliĝas ĉ. 0,02 po mil vortoj; oni memoru, por komparo, ke, laŭ la statistiko de D-ro Blass kaj laŭ miaj propraj esploroj, la malplej uzata oficiala sufikso (se ne konsideri la numeralajn) estas *-er-*, kaj ke ĝia ofteco estas ĉ. 0,9 po mil vortoj.

»Al kia kaŭzo atribui la ege maloftan uzadon de la sufikso *-end-*? Ĉu al ĝia neoficialeco? Mi opinias, ke ne: unue, ĉar 4 el la 5 atestantoj tamen ĝin uzas, kaj cetere ĉiuj kvin uzas aliajn neoficialajn formojn (ekz-e *alies* en *Peer Gynt* ktp), ne povas temi pri troa konservatismo; due, ĉar ekzistis kontraŭ la uzado de *-end-* nenia barpafado simila al tiu, kiu provis haltigi la progreson de la sufikso *-i-*, oni ne povas suspekti ian timon antaŭ la publika opinio de la plimulto. Ŝajnas al mi, ke la vera kaŭzo estas alia.

»Efektive, mi ne kontentigis min per la kalkulado de la kvanto da *-end-* en tiuj tekstoj; mi ankaŭ atentis la frazojn, en kiuj la verkintoj estus povintaj uzi *-end-* kaj ĝin tamen ne uzis. Nu, tiujn frazojn oni povas klasi en du kategoriojn: en la unua, la ideo pri devigiteco estis grava, kaj, por ĝin akcenti, la verkintoj preferis

uzi pli drastan esprimon: *ni devis, neeviteble ni . . . , estis necese, ke ni . . . ktp.* ⁶ En la dua kategorio, la ideo pri devigiteco estis akcesora, kaj la verkintoj opiniis sufiĉaj la sufiksojn *-ot-* au *-ind-*, kiuj ne tro akcentas la trudiĝon, aŭ preferis aliajn parolturnojn: *por —i, mi intencis —i ktp.*

»Alia interesa fakto estas, ke el la 5 renkontitaj ekzemploj, 4 prezentas la sufikson ligitan al la sama verbo (*farenda*); kaj la lingvistiko instruas, ke, kiam unu sufikso estas uzata nur post malmultaj, ĉiam samaj radikoj, tio estas klara signo, ke ĝi kvazaŭ frostiĝis kaj estas mortanta.

»La konkludo de mia esploro do plene konfirmas la opinion de mia kolego Stöp-Bowitz: la sufikso *-end-* estas tre malmulte uzata, kaj tio, ĉar ĝi prezentas nenian efektivan utilecon. Ĝia oficialigo ŝajnas al mi superflua».

* * *

Sekve de tiu mia raporto, la sufikso *-end-* estis oficialigita de la Akademio per 24 voĉoj kontraŭ 16.

KELKAJ GRAMATIKAJ KONSULTOJ¹

Demando.—Kial vi kondamnas la uzon de *dum kiam* kaj de *ĝis kiam*?

Respondo.—Ne mi ilin kondamnas, sed la *Fundamento*, la tradicio kaj la logiko.

1° En la *Unua Libro* rusa kaj franca (la aliajn mi ne disponas), *dum* estas difinita nur kiel subjunkcio, kaj *ĝis* nur kiel prepozicio. En la *Unua Ekzercaro*, troviĝas unu ekzemplo de *dum* kaj du ekzemploj de *ĝis*: tiuj tri vortoj estas uzataj subjunkcie: *Dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; li kuradis, ĝis li falis.*

En la *Fundamenta Ekzercaro*, du ekzemploj de *dum*, ambaŭ subjunkciaj; unu de *ĝis*, prepozicia.

Fine; en la *Universala Vortaro*, oni legas:

d u m pendant, tandis que; while; während; poka, meĵdu tjem kak; póki, podczas gdy.

ĝ i s jusqu'à, jusqu'à ce que; up to, until; bis; do; do, až.

La tradukoj franca, rusa kaj pola de *dum*, la tradukoj franca kaj angla de *ĝis* evidentigas, ke tiuj du vortoj havas ne nur la signifon de prepozicio, sed ankaŭ tiun de subjunkcio; la ekzemploj en la ekzercaroj montras eĉ, ke *dum* estis tiam uzata nur kun tiu lasta funkcio. Praktike kaj sisteme rifuzi al *dum* kaj *ĝis* la subjunkcian signifon estas do malobservi la *Fundamenton*.

2° Ĉe neniuj el la bonaj verkistoj, nek ĉe Kabe, nek ĉe Privat, nek ĉe Baghy, nek ĉe Kalocsay, nek ĉe Lanti, nek ĉe Schwartz oni trovas, en tiu subjunkcia funkcio, la formojn kunmetitajn kun *kiam*. Uzi ilin estas do deflankiĝi de la plej firma lingva tradicio.

¹ Tiuj konsultoj aperis, en diversaj revuoj, gazetoj aŭ bultenoj, inter 1934 kaj 1946.

Kiam, post *des pli* venas propozicio, ĝi prezentas novan, kroman motivon de la priparolita ago; la logiko postulus do, ke ni uzu *ĉar* por ĝin enkonduki. Kaj mi ne opinias, ke tio estus malbons-tila. Sed la fakto estas, ke Zamenhof en tiaj okazoj uzis nur *ke*:

9. *Eble estos pli bone, se ni ĝin* (= la historion) *aŭskultos, des pli ke ĝi estas mallonga* (Fab. III, 57).

10. *La scenoj . . . faris sur ŝia spirito fortan impreson, des pli fortan, ke ĝi estis tute nova* (Marta, 27).

Tian uzon oni do ne povas nomi malkorekta.

Demando.—Se oni diras *antaŭ ol la suno leviĝis*, kial oni ankaŭ same ne povus diri *post ol la suno leviĝis*?

Respondo.—Logike, nenio malhelpas, efektive. La demando, cetere ne estas nova. En la «Bulteno de la Esperantista Ligo de Aŭtoroj», kiu aperis antaŭ la unua mondmilito, mi trovis jenan noton de E. Boirac, tiama prezidanto de la Lingva Komitato:

«En la nuna stato de la lingvo, ekzistas du paroj da esprimaĵoj por la tempaj rilatoj, uzeblaj kun verboj, kaj kiuj kvazaŭ konkuren-cas inter si. Unue *antaŭ ol*, jam uzata de D-ro Zamenhof kaj sole kōnforma al la Fundamento, kaj *post ol*, ne ankoraŭ uzata de D-ro Zamenhof, sed plene aprobata de li, laŭ tio, kion li diris al mi, kiam mi petis lian opinion pri tiu gramatika punkto dum la Berna kongreso; due *antaŭ kiam*, uzata nur de malmultaj aŭtoroj, kaj *post kiam* pli ofte trovebla, eĉ, se mi ne eraras, en la lastaj verkoj de D-ro Zamenhof.

»Kredeble la uzado mem de la esperantistaro fine elektos inter tiuj du paroj, kiuj estas ambaŭ logikaj kaj povas esti egale defendataj per bonaj argumentoj, kvankam la unua ŝajnas havi por si la aŭtoritaton de la Fundamento» («Oficiala Gazeto», n° 62).

La fakto estas, ke la uzado decidis por *antaŭ ol* kaj *post kiam*; la kaŭzo estas probable, ke *ol* por esprimi tempan rilaton havas ion strangan, kaj restis uzata en la unua esprimo nur pro la aŭtorit-ato de la *Fundamento*; aliflanke *post ol* ne estas tre bonsona, dum la du formoj *antaŭ ol* kaj *post kiam*, kun siaj po tri silaboj, plaĉas al la aŭdosento kaj agrable kontraŭpezas unu al la alia.

Demando.—Mia lernolibro diras, ke oni uzas la infinitivon nur post la prepozicioj *antaŭ*, *anstataŭ* kaj *por*, kaj tion klarigas per tio, ke oni ne povus esprimi la ideon alimaniere. Tiu aserto ne ŝajnas al mi ĝusta pri *antaŭ*, ĉar oni povus uzi anstataŭe la estontan partupon: oni ja uzas la estontan *por* anstataŭigi la prepozicion *post*. Se oni diras: *Manĝinte, li iris promeni*, kial oni ne diras, tute simile: *Manĝonte, li lavis siajn manojn*?

Respondo.—Via rimarkigo, aŭ propono, estas ne tute ĝusta. Mi devas, unu fojon plie, atentigi pri la iluzio, nutrata de multaj matematikemaj spiritoj, ke nia figurado de la tempo per spacaj bildoj respondas vere al la realo. Laŭ tiu, nun preskaŭ instinkta,¹ figurado, la estonteco kaj la estinteco faras perfektajn simetriaĵojn ĉiuflanke de la estanteco, kiel, sur la malnovaj kamenbretoj, la du kandelinoj egaldistance de la centra horloĝo.

Sed, en la psikologia realaĵo, inter la paseo kaj la futuro staras granda diferenco: la paseo estas io plenumita, do certa, dum la futuro estas io ankoraŭ ne okazinta, do pli-malpli probabla, kaj ĉiel ne certa.

Jen la kaŭzo, kial oni ne ĉiam povas uzi la estontan partupon anstataŭ la prepozicion *antaŭ ol*: per tiu prepozicio oni markas tempan interrilaton inter du okazoj, kiujn oni prezentas kiel realajn; ĝuste pro tiu karaktero de iel abstrakta sinsekvado, oni povas uzi ĝin *por* enkonduki egale pasintan aŭ estontan agon:

Antaŭ ol manĝi, li lavis siajn manojn (je la nuna horo, li ja manĝis), aŭ:

Antaŭ ol manĝi li lavas siajn manojn (en la nuna horo, li ankoraŭ ne manĝis).

Male la estonta partupon prezentas la koncernan agon kun tiu karaktero de eventualeco propra al la futuro. Via dua ekzemplo:

Manĝonte, li lavis siajn manojn

¹ Ĝi ja ne estis tiel instinkta, antaŭ la disvastiĝo de la mekanika civilizo. Dum centoj da jarmiloj, la homoj konceptis la agojn kiel finitajn aŭ nefinitajn, sen konsidero pri ilia loko en la kadroj de la tempo-spaco. Ankoraŭ hodiaŭ, kelkaj popoloj prezentas al si la futuron kiel sterniĝantan malantaŭ ili kaj la paseon antaŭ ili, ĉar en ilia penso la konateco aŭ nekonateco de la okazoj aspektas pli grava, ol la analogio kun la movaĵoj antaŭenirantaj laŭ linia vojo.

iel insistas pri la diferenco inter la lavado, kiu okazis, kaj la manĝo, kiu *eble* ne okazis. Se oni volus precizigi tiun karakteron de eventualeco, oni povus distingi la tri nuancojn, kiuj jam karakterizis la latinan partupon en *-urus*, kaj diri, ke nia estonta partucipo signifas:

1. jen *pretiĝante* —i, ekz-e: ...*kaŭzo, pro kiu mi publikigonte mian unuan libron pri E, decidis forĵeti la tro grandan vortaron* (*Lingvaj Responoj*, 3a eld., pĝ 36).

En la pasivo, oni klarigus per: *kiun oni pretiĝas* —i, ekz-e: *Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto* (F. Ekzerc.); *Viaj dentoj estas kiel tondotaj ŝafinoj* (*Alta Kanto* IV, 2).

2° jen *intencante* —i, ekz-e: *Irante promeni, purigu vian veston* (Unua Ekzerc., 13).

En la pasivo, oni klarigus per: *kiun oni intencas* —i, ekz-e: *Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota* (*Proverbaro*); *La manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero* (samloke).

3° jen *destinite* —i, ekz-e: *La mortonta mortu, la pereonta pereul* (*Zeh.* XI 9); *Pendonto ne dronos* (*Proverbaro*).

En la pasivo, oni klarigus per: *destinite esti* —ita, ekz-e: *El mia buŝo eliris vero, vorto ne retirota!* (*Jes.* XLV, 23).

El tiuj ekzemploj zamenhofaj, oni povas vidi la ĝustajn nuancojn de la estonta partucipo, nuancojn cetere sufiĉe riĉajn kaj koncize esprimitajn, por ke oni miru, ke ili restas relative ne ekspluatataj. La statistiko de s-ro Stancliff (en *Enciklopedio de E*, II, pĝ 566) liveras efektive jenajn ciferojn pri la uzado de la partucipaj sufiksoj; la ciferoj montras la po-centan oftecon de ĉiu sufikso ĉe Zamenhof (en *Originala Verkaro*), ĉe Privat (en *Historio de E*) kaj ĉe Baghy (en *Hural*):

Zamenhof	Privat	Baghy	Zamenhof	Privat	Baghy
<i>ant-</i> 7,920	6,483	6,650	<i>at-</i> 2,971	1,800	1,872
<i>int-</i> 1,284	2,017	2,467	<i>it-</i> 8,316	7,239	6,140
<i>ont-</i> 0,814	0,145	0,340	<i>ot-</i> 0,231	0,180	0,085

Tiuj ciferoj nete montras la seninteresiĝon de gravaj esperantaj stilistoj pri la malfeliĉa estonta partecipo: tion ni sendube ŝuldas al la fakto, ke neniue el la ĉefaj eŭropaj lingvoj posedas tian esprimilon, kaj ke niaj verkistoj ankoraŭ ne sufiĉe alproprigis al si Esperanton, por frukte malvolvi ĉiujn ties eblojn.

* * *

Demando.—Kiel oni povas analizi la vortojn *enradikigi* kaj *elradikigi*?

Respondo.—Tiuj vortoj apartenas al aparta kategorio de kunmetaĵoj, en kiuj la centra radikio ne estas la komplemento de la komenca prepozicio, kiel tio okazas en la pli multaj tipoj (*enkestigi* = *meti en keston* ktp). Ĉi tie, la centra radikio havas adverban karakteron kaj la komplemento de la prepozicio estas ordinare esprimita poste kun ripeto de tiu sama prepozicio. *Enradikigi* estas do: 'igi (ion) radike en', t. e. 'fari, ke io estu kun siaj radikoj en'. Jen du ekzemploj, kiuj klarigos la aferon: *Mi decidu pri popolo kaj pri regno, ke Mi ĝin fortikigos kaj enradikigos* (*Jeremia*, 18,9); *Se oni penis enradikigi en via kapo la konvinkon, ke...* (*Leteroj de Z*, II, 220).

Same pri *elradikigi*: 'igi radike el' aŭ 'tiri ion kun ĝiaj radikoj el io'. Ekzemploj: *Mian tutan akiritajn ĝi elradikigus* (*Ijob*, 31, 12) aŭ: *Ekron estos elradikigita* (*Cefanja*, 2, 4).

Tiuj kunmetaĵoj (oni trovas ankaŭ *elradikiĝi* ĉe Zamenhof) havas nenion por fari kun la simpla verbo *radiki*, kiu signifas: 'havi siajn radikojn en io'; ĝin oni trovas en la esprimo: *profunde radikanta inklinado* (*La Batalo de l' Vivo*, pĝ 84).

Al la sama kategorio apartenas *deflankiĝi*, kiun Teo Jung kritikis kiel malĝustan vorton, kaj kiu tute regule signifas 'iĝi flanke de io'; *detavoliĝi* t. e. 'iĝi tavolo de' aŭ 'apartiĝi laŭ tavoloj for de io', *surmasiĝi*, t. e. 'iĝi amase (unu) sur (alia)'; *forŝipiĝi* t. e. 'iĝi ŝipe for' ktp.

Laŭ pura abstrakta logiko, ebloj de konfuzo povus okazi inter tiu tipo kaj la pli ofte renkontata (*enkestigi*). Sed oni atentu, ke kunmetado ne estas ia algebra procedo, sed nur oportuna lingva metodo de mallongigo; per kunmetado oni komprenigas ion per skizo, se tiel diri, ne per difino; alivorte, en kunmetaĵo troviĝas

ĉiam pli da signifo, ol en la pura adicio de la termoj: *paperkorbo* estas 'korbo por (forĵeti senvalorajn) paperojn', dum *paperkorneto* estas 'korneto (farita el) paper (folio)' ktp. Oni devas iom pli fidi la lingvan instinkton de tiuj, kiuj kreis tiajn vortojn, kaj iom malpli la sekan racion de tiuj, kiuj ilin ne komprenas.

* * *

Demando.—Ĉu estas korekte diri: *Estis la unua fojo, ke mi lin vidis?*

Respondo.—Tiun demandon oni malfacile povas respondi per jes aŭ ne; efektive, la ekzemple donita dirmaniero ne estas plene internacia: dum ĝi estas kutima en A, F, ~~G~~^D, H, I kaj eĉ en la kroata, ĝi restas fremda al la orienteŭropaj lingvoj, ĉu P, R aŭ la hungara. Z, tradukante el la pola, skribas: *Nur nun la unuan fojon mi deziras komenci la profesion de instruistino* (*Marta* pĝ 27), frazo, kiu sub franca aŭ angla plumo, evidente fariĝus dupropozicia. Aliflanke tia dirmaniero levas du apartajn demandojn: unu pri la ĝusta formo de la ĉefpropozicio, kaj dua pri la ĝusta subjunkcio uzota post ĝi.

1° Estas tre diskutata punkto, ĉu oni diru *Estis la unua fojo* aŭ ĉu *Estis la unuan fojon* — t. e. kiamaniere oni analizu la formulon *la unua fojo* (aŭ ĉiun similan: *la lasta fojo*, *la sola okazo* ktp). Ĝin oni povas rigardi aŭ kiel predikativon (la subjekto tiam estas subkomprenata pronomo *ĝi* aŭ *tio*, al kiu apozicias la sekvanta subpropozicio) kaj oni sekve uzas nominativon; aŭ ĝin oni rigardas kiel tempan adjekton (*estis* havas tiam la sencon de *okazis*, kaj la subjekto estas la sekvanta subpropozicio), kaj oni sekve uzas akuzativon. Ambaŭ analizoj estas eblaj (kaj, rimarkigis al mi Kalocsay, egale mallogikaj: oni ja devus elekti inter *estis la unua okazo*, *ke* kaj *okazis la unuan fojon*, *ke*), sed mi nete preferas la unuan, pro tio ke, kiel jam ofte instruis al ni Z, «en ĉiuj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon — uzu ĉiam la *nominativon*» (*Lingvaj Respondoj* 3a eld., pĝ 47).

Cetere tia estis la analizo elektita de Zamenhof, ĉiufoje kiam li uzis tiun dirmanieron: tion pruvas la fakto, ke li ĉiam esprimas la neŭtran pronomon. La fundamentaj dokumentoj liveras al ni tri tipajn ekzemplojn:

Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino (F. Ekzer-caro, 17, 7);

Ŝi sciis, ke ĝi estas la lasta vespero, ke ŝi lin vidis (F. Kresto-matio, 17a eldono, pĝ 54);

Ĝi estis la lasta nokto, ke ŝi enspiradis tiun saman aeron, kiel li (samloke).

2° Alia tikla punkto estas, ĉu oni enkonduku la subpropozicion per *ke* aŭ per *kiam*.

Kvankam mi longatempe uzis la *kiam*-solvon, mi opinias nun, post plena konsidero, ke oni devas preferi *ke*. Pruve: a) la 3 ĉi-supraj ekzemploj de Z; b) la fakto, ke neniuj el la lingvoj kutima; al tiu dirmaniero uzas vorton respondan al *kiam*, sed ĉiam unu respondan al nia *ke*; c) la ĉeesto, en la ĉefpropozicio, de la adjektivoj *unua, sola, lasta* ktp, kiuj ĉiuj pensigas pri serio da similaj okazaĵoj, el kiuj la koncerna estas elmontrata: oni do havas la impreson malpli de tempa cirkonstanco, ol de unuopa fakto; kvazaŭ oni dirus, ekz-e: *Tiu vespero estis la lasta el la okazoj* [konsistantaj en tio], *ke ŝi lin vidis*.

La advokatoj de *kiam* rimarkigas, ke en la analogaj dirmanieroj oni ĉiam uzas tempan ligilon: *Foje kiam* ... aŭ *Unu fojon, kiam* ... ktp. Sed analogeco ne estas sameco: en tiaj frazoj, la vortoj *foje* aŭ *unu fojon* evidente egalas *iam*, kio nature sekvigas *kiam*. Frazo kiel: *La unuan fojon, kiam mi lin vidis, terura pluvo faladis* montras klare, kial oni devas uzi *kiam*: la subpropozicio povus rekte dependi de la ĉefpropozicio, ĉar *la unuan fojon* ne estas nepre necesa por la senco, kaj tiu subpropozicio estas evidente tempa.

Resume, mi opinias, ke la koncerna dirmaniero estas tute allasebla; sed mi konsilus, por eviti la ĉikanojn, uzi, laŭ la zamenhofa ekzemplo, ĉiam neŭtran subjekton: *Tio estis la unua fojo, ke mi lin vidis*. Kaj por tiuj, kiuj tamen trovas la formulon ĝena, restus nur —tio estas eble la plej eleganta solvo— uzi la adjektan akuzativon de rilativo, kiel faris almenaŭ unu fojon Zamenhof: *Tio estis la lasta vespero, kiun ĝi sidis sur sia kolono* (Fabeloj de Andersen, II, pĝ 117).

Demando.—Ĉu oni povas diri: *Lasu vin kisi!* aŭ ĉu oni devas diri, kun Pastro Downes: *Lasu vin esti kisata!*?

Respondo.—Kvankam mi dubas, ĉu mia atestimata kolego iam uzis tiun frazon, mi konfesas, ke li konsilis, en la notoj de la *Fundamenta Krestomatio*, similan dirmanieron. Kaj aliflanke, mi bone komprenas, ke, en la cirkonstancoj supozataj de tia admono, vi tro bone konsciis la multepezecon kaj absolutan malkonvenecon de *pasiva* infinitivo, por tian uzi. Sed eble la demando estas pli ĝenerala, ol tiu aparta, kvankam tre simpativeka, okazo. La *zamenhofa* uzado de la verbo *lasi* prezentas kelkajn delikatajn punktojn, kaj, krome, al ĝi ne tute konformiĝas la ordinara nuna uzado. Tial mi volonte uzos jenan demandon, por klarigi la unuan kaj pravigi la duan.

I. La fundamenta ideo entenata en tiu verbo, laŭ la difinoj F, A kaj R de la *Universala Vortaro* estas tiu de tolerata apartiĝo: laŭ tio, ĉu la apartiĝanto estas la subjekto aŭ la objekto, oni ricevas jenajn du signifojn:

1° ‘Malpreni, restigi post si’: *Li ekstermis ilin . . . li lasis nenium restanton* (Josuo, 10, 28), aŭ, metafore: *Sufiĉe pri tio, mia amata; ~~mi~~ lasu ĝin!* (G. Dandin, 10).

2° ‘Malteni, ne konservi kun si’: *Lasu min! ekkriis Marta . . . kaj kun spasma forto ŝi ektiris sian brakon* (Marta, 182), aŭ, pli metafore: *Lasu min for por du monatoj!* (Juĝistoj, 11,37).

Sed, en la ordinara uzado, tiuj du signifoj estas precizigitaj per prefiksoj (*forlasi* en la unua okazo, *delasi* aŭ *ellasi* en la dua), kaj la simpla verbo estas plejofte uzata kun la signifo:

3° ‘Ne malhelpi’ — kaj tiam la objekto estas kompletigata aŭ de predikativo, aŭ de subpropozicio. Oni povas distingi kvin tiajn nuancojn:

(kun adjekto)

a) ‘ne malhelpi, ke iu, io restu ie’: *Ĝi lasas sur la tero siajn ovojn.*

b) ‘ne malhelpi, ke iu, io iru ien’: *Ŝteliston neniu lasas en sian domon.*

(kun predikativo)

c) 'ne malhelpi, ke iu, io restu ia': *Lasu ŝin trankvila! — Feliĉaj, kiuj lasas en libereco la piedojn de la bovo!*

d) 'ne malhelpi, ke iu, io faru ion': *Mi paciencas lasis lin paroli — Ni lasu al la amasoj taksu la aperojn laŭ ilia ekstera brilo!*

(kun subpropozicio)

e) 'ne malhelpi, ke io fariĝu': *Ĉu vi pensas, ke ŝi volus naĝi aŭ lasi, ke la akvo fermiĝu super ŝi?*

Ĉiuj tiuj ekzemploj, kiujn mi tiris el la zamenhofa verkaro, estas, kvankam multaspektaj, tamen facile kompreneblaj. Sed nun venas la du tiklaj punktoj.

II. En ĉiuj ĉi-supre menciitaj uzoj, oni egale retrovas la saman esencan ideon de ne-kontraŭstaro, de konsento aŭ rezignacio al io, kion oni tamen povus eviti, se oni volus. Tia nuanco estas klare sentebla en jenaj frazoj:

Li rajdigadis sur siaj genuoj iliajn plej ĉarmajn... infanojn, kaj lasis ilin ludi kun lia sceptro (Fabeloj, I, 50).

La instruisto iris al la patro [kiu estis judo] kaj diris al li, ke li devas aŭ forpreni sian filinon el la lernejo, aŭ lasi ŝin fariĝi kristanino (Fabeloj, III, 102).

Sed, ĉar la germana traduko de *lasi*, t. e. *lassen*, havas krome en tiu lingvo la sencon *igi*, Zamenhof, ekde sia unua traduko el la germana, *La Virineto de l' Maro* (1889), atribuis ankaŭ tiun sencon al la esperanta verbo:

La maljuna avino lasis almordiĝi al la vosto de la reĝidino ok grandajn ostrojn, por montri ŝian altan staton.

Li lasis fari al ŝi viran vestaĵon.

Kaj tian uzon Zamenhof konservis ĝis la fino:

La maljuna reĝo lasis poluri sian oran kronon per la polvo el pistita grifelo (Fabeloj, II, 93) — sed ŝajne nur en la verkoj, kiujn li tradukis el la germana: oni komparu nur ekz-e kun la ĉi-supraj jenajn frazojn:

La ambicio kaj enviemeco, kiuj igas la virinojn transpaŝi la limojn destinitajn al ili de la naturo (Marta, 156) — aŭ:

La voĉo de la Eternulo igas cervinojn naski (Psalmoj, 29, 9). Zamenhof eĉ ne ĝenis sin uzi en la sama frazo tiujn du malsamajn sencojn:

Kelke da jaroj antaŭe la geedzoj lasis [= igis] pretigi por si sian tomban ŝtonon kun surskribo kaj nomoj, lasante [= ne malhelpante, ke estu] libera nur la lokon por la jaro de la morto (Fabeloj, III, 23).

Nu, tiun germanismon la postvenintaj verkistoj ne imitis, kaj tute prave. Ĉar ĝi enkondukus en la lingvon tiajn okazojn de konfuzo, kiajn klara lingvo ne povas elporti. Inter *igi* kaj *lasi* estas tiu diferenco, ke la unua signas volon, ordonon, dum la dua signas cedon, nereziston. *Li lasis ŝin eliri* signifas, ke li ne baris al ŝi la eliron; *li igis ŝin eliri*, ke li trudis ĝin al ŝi. Frazo kiel: *Ili ne volis lasi sin nobeligi, la maljunaj honestaj homoj!* (Fabeloj, III, 48), estas ne klara, en la zamenhova maniero, ĉar oni ne scias, ĉu oni laŭdas tiujn homojn pro tio, ke ili rifuzis proponon pri nobeligo, aŭ ke ili mem ne klopodis pri tiu nobeligo.

Mi lasis ilin tute ĉirkaŭfermi (Rabistoj, 67) povus egale diri aŭ la rabisto Moor, kiu ne volis malhelpi la ĉirkaŭbaradon, aŭ la ĝendarmestro, kiu ĝin ordonis!

Kaj ĉar, aliflanke, la lingvo disponas taŭgan rimedon esprimi ĝuste la bezonatan ideon (komparu la du zamenhofajn frazojn: *La bezono de viaj servoj igis min vin voki* kaj *Vi lasis voki min*), mi opinias, ke oni devas noti arĥaisma la uzon de *lasi* anstataŭ *igi*.

III. La dua malfacilaĵo tuŝas ne la verbon mem, sed ĝian konstruon. Ni vidis, ke en la okazo 3^o d), la verbo *lasi* estas sekvata de infinitivo. Kiam la subjekto de *lasi* kaj tiu de la postvenanta infinitivo ne estas la samaj, nenia ĝeno:

Eĉ inter la garboj lasu ŝin kolekti (Rut, 2,15) egalas: *lasu, ke ŝi kolektu*.

Sed kiam la du subjektoj estas identaj, okazas tio, ke la infinitivo akiras sencon pasivan:

Se jam nepre devas fariĝi ŝanĝo, mi lasus min nomi fraŭlino! (Fabeloj, III, 82) egalas: *mi akceptus, ke mi estu nomata fraŭlino*.

La fiŝoj lasadis sin karesi (FK, 36) egalas: *bonvolis, ke ili estu karesataj*. Ktp.

Ne povas temi ĉi tie pri ia subkomprenata subjekto de la infinitivo, kvazaŭ: *lasus iun nomi min, lasadis iun karesi*... ĉar en tia okazo, kiel oni vidas en tiu ĉi lasta ekzemplo, fariĝus neeble uzi la refleksivon: *lasadis iun karesi sin* signifus, ke la kareso irus al la *iu*, ne al la fiŝoj.¹ Kaj kiam Zamenhof devas esprimi la aganton de la infinitivo, li esprimas ĝin ne sub formo de subjekto, sed ja de ag-adjekto:

Ŝi... lasis sin peli de la ondoj, kien ili volis (FK, 43).

Nu, tia dirmaniero estas fremda al la angla lingvo, kaj efektive Angloj deadmonas de ĝi; sed ĝi troviĝas kaj en F kaj en D; en la rusa oni uzas ian verban substantivon, kiu kapablas havi ankaŭ same pasivan kiel aktivan signifon: tiu uzo estas do sufiĉe internacia; krome, ĝi kreas nenian konfuzon, ĉar la pasivsenceco dependas de la subjektoj.

Restas, ke oni ne kutimas rigardi la simplan infinitivon kiel eventuale pasivan; sed eble tion ni ŝuldas al troa sklaviĝo al la kadroj de la latina gramatiko. La Angloj, kiuj kondamnas: *Li lasis sin puni por ŝi*, forgesas, ke la sama pasiveco troviĝas, iom pli kaŝita, en: *li punigis sin por ŝi*, t. e. *li igis, ke li estu punata por ŝi*. Se ni nun memoras la respondon de Zamenhof, ke: «*igi* kun verbo signifas nek *igi—anta*, nek *igi—ata*, sed nur *igi—i*» (*Lingvaj Respondoj*, 3a eld., pĝ 31), oni emus pensi, ke la finaĵo *-i*, signas esence nur la substantivan formon de la verbo kaj restas iel neŭtra rilate al la aktiveco aŭ pasiveco. La aktiva senco, kiun ni kutimas aldoni al tiu ĉefa funkcio, estas eble la rezulto de la simpla okazo, ke tiu formo estas plejofte uzata kun tia valoro.

Kio apogus tiun vidmanieron, tio estas la fakto, ke en la angla same kiel en la franca lingvo ekzistas kelkaj frazturnoj, en kiuj la infinitivo havas tian valoron, ke oni povus klarigi ĝin per la pasiveco tiom, kiom per la aktiveco:

Les choses trop abstraites ou trop élevées pour moi ne m'ennuient pas à entendre (P. Valéry; laŭlitere: «la aferoj tro

¹ Kurioza estas jena frazo: *La malbelajn grasajn serpentojn de la maro ŝi nomadis siaj amataj kokidoj kaj lasis ilin ludi sur ŝia granda sponga brusto* (*Fabeloj*, I, 60); en «La Esperantisto» kaj poste en la *Fundamenta Krestomatio* oni legas: *sur sia*; nur en la *Fabeloj* Zamenhof(?) korektis sian tekston.

abstraktaĵ aŭ tro altaĵ por mi ne tendas min por aŭdi» aŭ «por esti aŭdataĵ»).

L'aïeule regarde déshabiller l'enfant (V. Hugo; laŭlitere: «la avino rigardis senvestigi la knabon» aŭ «la knabon esti senvestigata»).

Water Poole would take some time to explore systematically (Michael Innes; laŭlitere: «W. P. [tio estas domego] postulus kelkan tempon por sisteme esplori» aŭ «por esti esplorata»).

The most important thing to know . . . (H. G. Wells; laŭlitere: «la plej grava afero por scii» aŭ «por esti sciata»). Ktp.

PRI LA NOMOJ DE LA ESPERANTAJ LITEROJ

I

La unua paragrafo de la Fundamenta Ekzercaro tekstas: «*Nomoj de la literoj*: a, bo, co, ĉo ktp». Efektive tiuj estas la nomoj ordinaraj uzataj, kiam oni havas la okazon ilin nomi, ekz-e en la titoloj: «L. E. A.», «K. K. K.» ktp. Tiaj okazoj estas cetere sufiĉe maloftaj en la ordinara vivo.

Sed kun la kresko de la tempo kaj la disvastiĝo de nia lingvo, ekestis grupoj da personoj, kiuj havas profesion okazon citadi la literojn per ilia nomo, t. e. la matematikistoj kaj kemiistoj. Tiuj specialistoj rapide konstatis, ke la ĉi-supra nomaro estas tre neoportuna, ĉar ĝi ebligas aŭ eĉ estigas konfuzojn ĉe la aŭdantaro. La kaŭzo estas duobla: unue, la vokalo *o* estas aparte sonora, kaj sekve ĝia sonoro obtuzigas la sonon de la antaŭa konsonanto, precipe se ĉi tiu estas malforta; due, la konsonantoj, kies propra sono najbaras tiujn de alia konsonanto, malfacile distingiĝas pro tiu simileco de la komuna vokala finaĵo: ekz-e *mo* kaj *no*, *ĵo* kaj *ŝo* ktp.

Por helpi al tiu ĝeno, jam de 1909 estis proponitaj diversaj sistemoj de nomado, el kiuj tamen neniuj estis eĉ unufoje aplikita. Mi provos miavice proponi novan, eble pli racian solvon.

La unua por fari estas difini la kondiĉojn de la problemo: bona solvo devus kontentigi du postulojn: 1° ne atenci la *Fundamenton*; 2° ebligi efektivan distingon de la najbaraj konsonantoj. Ŝajnas vere stranga, ke la jam proponitaj solvoj respondas al neniuj el tiuj du postuloj.

La *Fundamento* tenas nin inter striktaj limoj: estus neeble, ekzemple, alpreni prononcon *zed* aŭ *jot* por la literoj *z* kaj *j*, kiel iam proponis G. Moch. Sed tiu teksto tamen lasas al ni kelkan liberon. Kial Zamenhof elektis finaĵon *o* por la nomoj de la literoj? Evidente, ĉar li traktis ilin kiel substantivojn. Nu, ekzistas alia vortkategorio, kiu kelkfoje ludas en nia lingvo la saman rolon,

kiel la substantivo: tio estas la adjektivo. Ĉe Zamenhof mem oni renkontas, pli ol unufoje, adjektivon uzatan en substantiva funkcio; sufiĉos jenaj du ekzemploj: *Sata malsatan ne povas kompreni kaj: Prokrastita ne estas perdita*, en kiuj la adjektivoj rilatas al subkomprenita substantivo (*homo* en la unua proverbo, *afero* en la dua). Sekvante tiun metodon, ni plene rajtus uzi adjektivan formon por nomi certajn literojn, subkomprenante post ili la vorton litero: *bo* aŭ *ba* (*litero*). Nenio en ĉi tio ŝokus, eĉ plej delikate, la *Fundamenton*.

Ni disponas do du finaĵojn por atingi ian distingon inter la plej ofte konfuzataj konsonantoj. Facila tasko, se nur oni profitas la instruojn de la fonetiko.

La konsonantoj estas klaseblaj en du grandajn kategoriojn, laŭ tio, ĉu ilia prononco estas akompanata aŭ ne de vibroj de la voĉkordoj. Ĉiu estiĝloko naskas efektive du fratajn konsonantojn, unu senvoĉan kaj unu voĉan. En Esperanto troviĝas jenaj paroj:

senvoĉaj:	p	t	k	f	s	ŝ	c	ĉ
voĉaj	:	b	d	g	v	z	ĵ	(dz) ĝ

Tiujn konsonantojn oni do distingu unujn de la aliaj, almetante la o-finaĵon al la senvoĉaj, kaj la a-finaĵon al la voĉaj: *po, ba, to, da* ktp.

Ekster tiu klasado restas du senvoĉaj, la elspiraj *h* kaj *ĥ*, kaj ses voĉaj, la sonantoj *j, l, m, n, r, ŭ*. Oni povus, laŭ la proponata sistemo, atribui al ili regule la o kaj la a, laŭ ilia voĉeco aŭ senvoĉeco; sed tio ne kontentigus nian duan postulon. Kelkaj popoloj, ekz-e, havas grandan malfacilon distingi inter la du elspiraj, kaj preskaŭ ĉiuj inter la kvar likvaj *l/r* kaj *m/n*. Estas do necese enmeti esceptojn, apogante nin sur aliajn motivojn ol la fonetikajn: eviti ekz-e konfuzon kun esperantaj vortoj *ja* kaj *la*. Tial mi proponas jenan distribuon:

a, ba, co, ĉo, da, e, fo, ga, ĝa, ha, ĥo, i, jo, ĵa, ko, lo, mo, na, o, po, ra, so, ŝo, to, u, ŭo, va, za.

Oni legus do la formulojn: *angulo MNO, frakcio b/p, aⁿ* jene: *angulo mo na o, frakcio ba sur po, a potenco na* (sekve ankaŭ: *levi nombron je la na-potenco* ktp).

Fine ni renkontas la literojn fremdajn al nia esperanta alfabeto, kiujn tamen la specialistoj havas okazon uzadi. Por plia klareco kaj por bone montri, ke temas pri pruntaĵoj, mi emus doni al ili plursilabajn nomojn.

El la latina alfabeto devenas kvar tiaj simboloj: *q*, *w*, *x* kaj *y*. Mi proponas nomi ilin respektive: *kuo*, *vavo*, *ikso* kaj *ipsilono*. Sed la kutimaj nomoj *duobla va* kaj *i greka* povus kompreneble esti ankaŭ uzataj por *w* kaj *y*.

El la greka alfabeto venas multaj literoj ankaŭ ofte uzataj en matematiko; oni povus akcepti sensanĝe tiujn, kiuj finiĝas per *-a*, transskribi ankaŭ per *a* la finaĵon de la grekaj adjektivoj *psilon* (nuda, t. e. maldika) kaj *mikron* (malgranda), kaj laŭvole almeti al la ceteraj la *o*-finaĵon. Oni tiel ricevus:

alfa, *beta*, *gama*, *delta*, *epsila*, *dzeta*, *eta*, *teta*, *jota*, *kapa*, *lambda*, *muo*, *nuo*, *ksio*, *omikra*, *pio*, *ro*, *sigma*, *taŭo*, *upsila*, *fio*, *ĥio*, *psio*, *omega* (Mi alprenis *taŭo* kaj *upsila* por distingi ilin de la latine uzataj *to* kaj *ipsilono*).

Mi kuraĝas opinii, ke la proponata sistemo kontentigas la du postulojn montritajn en la komenco. Sed ĉu ĝi ankaŭ kontentigus la praktikajn bezonojn, mi ne scias.¹ Tial mi tre dezirus, ke la interesatoj bonvolu kelke eksperimenti per ĝi kaj konigi al mi sian opinion.

II

Al la ĉi-supra alvoko, publikigita en la n-ro de «Esperanto» de Januaro 1951, venis du tre interesaj respondoj.

La unuan donis mia eminenta kolego Dro Hugo Sirk, Profesoro pri Fiziko ĉe la Vien'a Universitato. Li bonvolis lerni la

¹ Restus ankoraŭ la demando pri la pluralo: ĉe la plursilabaj literoj, nenia malfacilo: *skribu du betajn kaj ne du sigmajn!* Sed ĉe la unusilabaj, oni instinkte sentas la bezonon iom vastigi tiun solan silabon, aldonante pleonasman finaĵon: *viaj daoj kaj viaj pooj ne estas rektaj!* La solvon trudos la uzado.

novan alfabeton kaj uzadis ĝin en pluraj prelegoj faritaj en diversaj kongresoj, ĉe la Somera Universitato. Laŭ lia sperto la rezultoj estis favoraj kaj la kompreno facila.

La dua respondo venis al mi el la antipodoj. La 30. de Julio 1953, samideano Stanley R. Perfect, el Auckland (Nov-Zelando), skribis al mi pri sia interesa eksperimento:

«Unue mi lernis parkere vian alfabeton, por ke ĝi ne sonu strange al mi. Tiu ĉi unua parto estis multe pli malfacila, ol mi imagis, ĉar mi ofte konfuzis la novan kaj la malnovan alfabeton. Tamen mi tion faris, kaj uzis ĝin por esprimi problemojn en algebro kaj geometrio. Ĝi fluis bonege kaj sonis nekompareble pli bone rilate la distingeblecon de similaj literoj. Mi ne hezitus diri, ke almenaŭ en matematiko la akcepto de via propono estus granda paŝo antaŭen.

Poste mi instruis la du alfabetojn — la novan kaj la malnovan — al du neesperantistinoj... Mi legis 400 literojn al ĉiu, de distanco de 12 futoj [= 3,64 m] en ordinara rapida konversacia voĉo kaj trovis jenon:

Malnova alfabeto : 83 eraroj.

Nova alfabeto : 26 eraroj.

Vi devos memori, ke la fraŭlinoj ne estis esperantistinoj, kaj tial la procento de eraroj estis ĉie alta. Tamen la rezulto estas interesa. Per kontrolo, mi trovis, ke en la nova alfabeto, la pli-multo de la eraroj okazis pro konfuzo de la literoj *co* kaj *ĉo*, *jo* kaj *ĵo*, *ĝa* kaj *ĵa* kaj foje *ba* kaj *da*. La literon *ĵa* ni, angloparolantoj, parolas iom forte (pli forte ol vi Francoj, mi kredas), kaj eble tial ĝi konfuziĝis kun *ĝa*...»

Mi kompreneble estas tre danka al tiuj du diligentaj samideanoj, kiuj helpis al mi en la serĉo de solvo por delikata kaj tamen urĝa problemo. Eble ilian ekzemplon bonvolos sekvi kelkaj aliaj, tiel ke ni povus iam prezenti al la Teknika Sekcio de la Akademio dokumentitan raporton...

III

Por faciligi la literumadon, la poŝtovicistoj, radiotelegrafistoj ktp uzas serion da propraj nomoj, kies unua litero koincidas kun la nomo de la koncerna litero. El la listoj oficiale uzataj en Anglujo, Francujo kaj Germanujo, mi kompilis unu analogan por la bezonoj de la esperantistoj, plenigante la mankojn per nomoj el la esperanta historio aŭ el geografio:

<i>a</i>	el	<i>Anna</i>	<i>mo</i>	el	<i>Moseo</i>
<i>ba</i>	»	<i>Bastiano</i>	<i>na</i>	»	<i>Natalia</i>
<i>co</i>	»	<i>Cezaro</i>	<i>o</i>	»	<i>Oktavo</i>
<i>ĉo</i>	»	<i>Ĉefeĉ</i>	<i>po</i>	»	<i>Petro</i>
<i>da</i>	»	<i>Davido</i>	<i>kuo</i>	»	<i>Quirinal</i>
<i>e</i>	»	<i>Eduardo</i>	<i>ra</i>	»	<i>Rajmondo</i>
<i>fo</i>	»	<i>Frederiko</i>	<i>so</i>	»	<i>Sofia</i>
<i>ga</i>	»	<i>Gastono</i>	<i>ŝo</i>	»	<i>Ŝimŝon</i>
<i>ĝa</i>	»	<i>Ĝakomo</i>	<i>to</i>	»	<i>Tomaso</i>
<i>ha</i>	»	<i>Hamleto</i>	<i>u</i>	»	<i>Ursula</i>
<i>ĥo</i>	»	<i>Ĥoreb</i>	<i>ŭo</i>	»	<i>Ŭestlando</i>
<i>i</i>	»	<i>Izaako</i>	<i>va</i>	»	<i>Valentina</i>
<i>jo</i>	»	<i>Jozefo</i>	<i>vavo</i>	»	<i>William</i>
<i>ĵa</i>	»	<i>Ĵaval</i>	<i>ikso</i>	»	<i>Xerxes</i>
<i>ko</i>	»	<i>Kolumbo</i>	<i>ipsilono</i>	»	<i>Yelland</i>
<i>lo</i>	»	<i>Ludoviko</i>	<i>za</i>	»	<i>Zamenhof</i>

Proponojn de plibonigoj mi volonte ricevus.

NEOLOGISMOJ

I. KIAL RIĈIĜAS LA VORTAROJ¹

Neologismo, diras la vortaro, estas «nova, antaŭe neuzata vorto». Tre simpla difino, tre malsimpla demando. Efektive, lingvo servas al ni nur por komprenigi al aliaj homoj niajn sentojn, eĉ, iafoje, niajn pensojn. Kaj estas evidente, ke ni povos komprenigi ion al la aliaj nur per uzado de vortoj, kiujn ili jam aŭdis kaj konas. Kiel estas eble, ke troviĝas stranguloj, kiuj volas esti komprenataj, uzante novajn, ankoraŭ nenie uzatajn vortojn? Kaj eĉ se la alparolotoj kapablos diveni, dank' al la ĉirkaŭteksto, kion ili diremas, kial do ili subite sentas la bezonon uzi tiun aŭ alian vorton, kiun ĉiuj ceteraj samlingvanoj ĝis tiam neniel bezonis? Kaj tamen tio estas fakto, ke, en ĉiu vivanta lingvo senescepte, neologismoj floradas, kaj nenia aŭtoritato, Akademio aŭ Imperiestro, iam sukcesis bari al ili la vojon. De kie tiaj novaj vortoj akiris al si tian ne subpremeblan forton? El kia fonto ili ŝprucas tiel abunde? Tro facila respondo estus atribui tiun fenomenon al ia mensa mallaboremo aŭ snobisma novemo. La lingvaj demandoj ne estas tiel simplaj.

Se ni volas esplori science ĉi tiun, ni devas unue distingi inter la naciaj lingvoj, kiuj ekzistas jam kelkajn jarcentojn kaj posedas kompletan esprimaron por ĉiuspecaj ideoj, kaj la artefaritaj lingvoj, kiuj, pro sia relativa juneco, ne disponas ankoraŭ ĉiujn klavojn necesajn al la homa penso. Alia grava diferenco estas, ke, en la nacilingvoj, la plej favora medio por naskiĝo kaj multiĝo de neologismoj estas la popolo. Oni povus kalkuli per la fingroj de unu mano la neologismojn enkondukitajn en la francan far' de la grandaj verkistoj; kontraŭe abundas tiuj, kiujn eltrovis nekonataj gazetistoj aŭ nekleraj fakmetiistoj, se ne paroli pri la senfina riĉiĝo de

¹ «La Nova Epoko», Junio kaj Oktobro 1932.

la slango ĉe la plej malaltaj tavoloj de la socio. La situacio estas rekte mala en Esperanto: nia lingvo estis komence arta kreaĵo kaj nur iom post iom formiĝis esperanta popolo, kiu nun komencas konscii pri si mem, sed estas ankoraŭ nek sufiĉe grandnombra, nek sufiĉe komunviva por posedi tiun neologisman forton. Restas do nur la verkistoj, grandaj kaj malgrandaj, kiuj havas la senton pri manko de tiu aŭ alia termino, kaj samtempe la eblon proponi al la publiko siajn eltrovitaĵojn. Sed, nur pro ke ili solaj havas tiun senton kaj tiun eblon, estus ridinde akuzi ilin sisteme je senpripensado aŭ fantazio.

Mi parolis pri mankoj. Tiuj apartenas al du specoj: la ordinara ĉiutaga vivo kaj la literatura esprimbezono.

La vortaro de la *Unua Libro* celis havigi la necesan materialon por la ĝenerala konversacio en etburĝa klaso; kaj ĝi taŭgis por tiu celo. Sed tio mem indikas la limojn de tiu vortaro: la ordinara konversacio de la jaroj 1890 k. s. estis multe malpli teknika, ol tiu de la mondmilita epoko; kaj aliflanke ĝi ne postulis la precizecon, kiun bezonas, en multaj okazoj, ne nur la sciencaj studoj, sed eĉ la vivpraktiko de simpla faklaboristo. Vortoj kiel: *bremso*, *kranko*, *kriko*, *helico*, *ŝvebi* ktp estis tiam maloftaĵoj, ili fariĝis komunuzaj en la tempo de l' aŭtomobilo kaj aviado. Tio klarigas, kial oni atendis tiel longe, antaŭ ol povi nomi la suprediritajn aferojn aŭ agojn alie ol per malprecizaj kaj maloportunaj ĉirkaŭfrazoj: *haltigilo*, *turnilo*, *dentaŝlevilo*, *ŝraŭbego*, *flugpendi* ktp; kial, ankoraŭ hodiaŭ, mi defias iun ajn lingvokomitatanon elnomi senhezite la ĉefajn organojn de simpla biciklo aŭ de portebla skribmaŝino. Eĉ por kelkaj kutimaj aferoj de la ĉiutaga sperto ni disponas nur kilometrajn kunmetaĵojn: mi citu senorde la *poŝtranĉileton*, la *bolkaldronon*, la *fenestrokovrilojn*, la *porkonstruan antaŭtrabaĵon*, la *stratdefluilojn*, se ne paroli pri kelkaj tiel banalaj agoj, kiel *malsupreniri* aŭ *sencele promeni*. Por kelkaj aparatoj, kiuj prezentas inter si nur ian similecon, nia lingvo posedas nur unu vorton: la diversaj fajr-aparatoj estas ĉiuj *fornoj*, ĉu ili servas por baki brikojn, por hejti domon, por kuiri manĝaĵojn ktp; la diversaj dubranĉaj iloj uzataj jen por tranĉi paperon aŭ ŝtofon, jen por tondi la harojn, jen por senlanigi ŝafojn, jen por forpreni branĉetojn — ĉiuj estas nur *tondiloj*.

Estas neniel mirinde, se, kun la disvolviĝo de nia lingvo, la ĵunaj esperantistoj sentas la bezonon pri novaj, pli oportunaj nomoj de tiaj aferoj aŭ agoj, ĝuste en la mezuro kiel Esperanto fariĝas ilia hejma esprimilo. La oficiala Esperanto povas sufiĉi por tiuj, kiuj parolas ĝin unu fojon en la jaro kaj skribas per ĝi unu leteron ĉiun sesan monaton. Sed kiam oni provas vivi tiun lingvon (kiel okazas interalie en la hejmoj, kie la geedzoj povas interkompreniĝi nur per Esperanto), kaj kiam oni ekrimarkas, ekzemple, ke ni ne posedas registritan kaj tradician rimedon por esprimi la agon ekkapti ion falintan kaj levi ĝin de la planko, tiam vere oni sentas, kiom ankoraŭ mankas al nia lingvo, por ke ĝi estu kompleta! Jen kial, tuj de kiam Esperanto enpenetris en la komercajn rondojn, ĝi devis akcepti anstataŭigi la *vagonarojn* kaj la *komercaĵojn* per la *trajnoj* kaj *varoj*; kiam en la maristajn, la *naĝbarelojn* kaj la *rulblokojn* per *buoj* kaj *pulioj*; kiam en la aeronaŭtikajn, la *falsirmilojn* kaj la *krut-malsuprenirojn* per *paraŝutoj* kaj *plonĝoj* ktp, ktp.

Sur la kampo de la literaturo ni renkontos du novajn specojn de neologismoj: unuj alportas novan formon por jam bone difinita koncepto, alia enkondukas novan nuancon de penso.

En la unua klaso troviĝas ĉiuj simplaj vortoj, kiujn la verkistoj enkondukas por anstataŭigi la kunmetitajn tradiciajn. Ili do tute similas al la neologismoj de la ĉiutaga vivo, kiujn ni ĵus pritraktis — kun tiu ega diferenco, ke la ĉiutagaj neologismoj koncernas konkretaĵojn, dum la literaturaj koncernas abstraktaĵojn. En la unua okazo temas pri vortoj, kiuj povas fariĝi pli-malpli ofte uzataj laŭ la cirkonstancoj, la epokoj ktp, sed kiuj ne apartenas vere al la heredaĵo de nia lingvo; en la dua, temas pri kvalitoj aŭ agoj, kiujn ni sentas multe pli intime ligitaj al nia spirita vivo. Tial la rezisto kontraŭ ĉiu el tiuj du specoj de neologismoj estas tute malsama: la ordinara esperantisto spertos nenian ŝokon, se li renkontos *barĉo* aŭ *burko* por nomi tian brasiksupon aŭ tian feltan mantelon; sed antaŭ *orgojlo* aŭ *sublima* li ne povos eviti la impreson, ke oni kva-zaŭ atencas lian propran. Kaj tamen la ekzemplo de Zamenhof mem, kiu, kun la tempo, anstataŭigis la kunmetaĵojn *ŝajnkaŭzo*, *vidigo*, *elrigardi*, *kuntiriĝi*, *ŝanceliĝi* ktp per la simplaj *preteksto*, *pruvo*, *aspekti*, *ŝrumpi*, *heziti* ktp montras al ni, ke tiu vojo ne estas tiel danĝera, kiel oni asertas, se nur ni ne tro rapide antaŭeniras.

La anstataŭigo, en tiu okazo, ne kreas novan signifnuancon; la sola ĝeno estas la multiĝo de la radikoj, kaj oni devas agnoski, ke tiu ĝeno estas grava por la propagando. Tial oni ne devas enkonduki tiajn anstataŭojn senpripense nek facilanime; tri motivoj de enkondukado ŝajnas al mi precipe konsiderindaj:

1° aŭ la kunmetita vorto estas tro longa: *malhumileco*, *animpremiteco*, *favorkoreco*, *kuntiriĝi* ktp, kaj tio bonvenigas la formojn: *orgojlo*, *angoro*, *graco*, *ŝrumpi* ktp.

2° aŭ ĝi estas dusenca: *klarigi* (aŭ 'igi klara' aŭ 'ekspliki': oni povas ekspliki problemon, kaj ĝin tamen ne igi klara); *kulpigi*, *senkulpigi* (ili devus signifi respektive 'kondamni' kaj 'absolvi', fakte ili estas uzataj kiel 'akuzi' kaj 'ekskuzi'); *maltimi* (uzata kiel 'aŭdacigi', sed la vera malo de timo estas espero); *rapidi* (*esti rapida* ne samsignifas kiel *hasti*); ktp.

3° aŭ ĝi estas psikologie malkonvena pro trouzado de la prefikso mal-: *malvasta*, *malkondamni*, *malvirtema*, *malĝojigi* ktp.

Tiu tria motivo estas la plej malfacile akceptata de multaj bonaj esperantistoj; ili timas, ke, se oni komencas anstataŭigi la mal-vortojn per simplaj radikoj, oni iom post iom detruos la mekanismon de la vortfarado kaj neniigos la genian elpenson de la juna Zamenhof, kiam li vidis «la grandegulajn vortarojn malgrandiĝadi sub radio de lumo». Mi ne opinias, ke ilia timo estas pravigebla. Ĉar, unue, ne temas pri sistema forigo de ĉiuj mal-vortoj, sed de tiuj, kiuj estas tro pezaj aŭ maltaŭgaj; aliflanke, la ekzisto de simpla vorto ne signifas, ke ankaŭ la kunmetitan oni ne povas uzi laŭbezzone, ĉu se oni ne plu memoras la novan vorton, ĉu se oni volas doni apartan stilefekon. Kaj cetere, oni povas ĉiam firme apogi sin sur la ekzemplo kaj agmaniero de Zamenhof: ĉi tiu, eĉ en la komenco de la lingvo, ne volis tiri el la prefikso mal- ĉiujn eblojn, kiuj tie kuŝis: mi neniam aŭdis, ke li skribis *malmorgaŭ* anstataŭ *hieraaŭ*, *malvendi* anstataŭ *aĉeti*, *malmemori* anstataŭ *forgesi*, *mal-konstrui* anstataŭ *detru*, *malparoli* anstataŭ *silenti* aŭ *maltago* anstataŭ *nokto*. Li do jam rigardis la kunmetadon per mal- nur kiel helpantan rimedon por esprimi ideon, por kiu ne ekzistas vere internacia radiko. Kun la disvolviĝo de la literaturo, li poste sentis, kiom la ĉiama ripetado de la sama prefikso povas makuli la belecon de literatura peco, kaj tial li iom post iom enkondukis

ekz-e strikta, absolvi, perversa, aflikti anstataŭ la mal-vortoj cititaj ĉi-supre. Mi absolute ne vidas, kial ni haltu sur tiu vojo, kaj ne plenumu la taskon de li entreprenitan. Ĉu ia delikata orelo ne suferas, laŭtleĝante tiujn frazojn: *Estis ankoraŭ ne tre malfrue vespere, sed sufiĉe mallume; malmultaj lanternoj malbone lumis la mallarĝan straton...* Ondo da malvarma aŭtuna vento enfluis en la pordegan arkaĵon tra la malfermita pordeto... (Marta, pĝ 11)? Sendube, oni ne devas konkludi, ke ĉiu kunmetitaĵo, kiu klasiĝas en unu el tiuj tri kategorioj, devas esti forigata absolute. Oni observu mezuratecon kaj atendu, ĝis la nun provataj neologismoj estos komune akceptitaj, antaŭ ol ĵeti novajn sur la merkaton. Sed aliflanke oni devas agnoski la rajtojn de la literaturo disponi lingvon vervan, koncizan kaj plastikan, sen kiu ĝi simple forvelkus.

La dua klaso de la literaturaj neologismoj estas tute alia. Ekzistas, sur la intelekta aŭ sentimenta tereno, pensnuancoj, kiuj ŝajnas facile distingeblaj kaj eĉ nepre distingendaj por unu popolo, sed aspektas unuavide, kaj iafoje definitive, konfuzaj por alia najbara. Ĉiuj popoloj akordas pri la organoj de aŭtomobilo, sed kiom el ili metas la saman ideon sub vortoj kiel *sendependeco, demokratio, sekureco* ktp? En la unuaj tempoj de Esperanto, oni disponis nur malmultajn abstraktajn terminojn, kaj sekve oni uzis ilin en sufiĉe vasta senco. La *Unua Libro* ekzemple konas nur *dolĉa, facila, konveni, sonĝo, ŝpari, trankvila*, kaj nur poste estis enkondukitaj la siatempe neologismaj: *milda, delikata, deci, revo, damaĝi, kvieta* ktp. Sed tiu enkonduko ne estis sendifekta: ĉar la primitiva vorto estis plurfoje konservita en klasikaj verkoj, kun la senco, kiun akiris poste la neologisma. En la versoj de nia himno:

*Sur flugiloj de facila vento ...
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro ...*

en la proverboj:

*Pri dolĉa vorto ne fieru ...
Ŝpari nek monon nek penon ...*

oni devus korekti per: *delikata, revo, milda, damaĝi*; sed ne ĉiu esperantisto estas devigata koni la historion de nia lingvo, kaj

riskas, imitante tiujn tekstojn, daŭrigi la konfuzon. Des pli ke Zamenhof mem ŝajne neniam bone distingis inter kelkaj el tiuj duoblaĵoj: li uzas *konveni* kun la signifo de *deci*: *Al malsaĝulo ne konvenas alta parolado* — kaj inverse: *Li vidis, ke la malbela ofte ricevas la kronon, kiu decas al la bela* (F. III, 118); same pri *trankvila* kaj *kvieta*. Dum Kabe skribas ĝuste: *Kvieta akvo ŝiras la bordojn*, Zamenhof kreas la proverbon: *Akvo trankvila, akvo danĝera*, kaj ne hezitas eĉ miksi ambaŭ en la sama frazo: *La malpiuloj estas kiel malkvieta maro, kiu ne povas trankviliĝi*.

La enkonduko de tiaj neologismoj estas do ofta kaŭzo de malordo kaj konfuzo en la lingvo. Kiam oni devas, kiel mi faris, esplori kaj provi difini la respektivajn nuancojn de *delikata*, *subtila*, *maldika* aŭ de *banala*, *triviala*, *vulgara* ktp oni plene ekkonscias, kian embarason iafoje estigas la limuzurpoj de tro najbaraj vortoj. Jen kial oni devas esti aparte singardema pri tiu klaso de neologismoj, kaj provi ilin nur en la okazoj, kiam oni estas certa, unue, ke la esprimota nuanco vere kaj egale ekzistas en pluraj el la ĉefaj lingvoj, due, ke oni urĝe bezonas ĝin en Esperanto. Mi ne estas tute certa, ekzemple, ke nuancoj kiel *persvadi* aŭ *ekspekti*, apud la fundamentaj *konvinki* kaj *atendi*, plenumas tiujn du postulojn.

II. MAJSTROADMIRO AŬ IDOLKULTO?¹

... Se ni ekzamenas kritike la sintenon de Zamenhof rilate al la neologismoj, ni tuj konstatos, ke li tute ne estis kontraŭa al la enkondukado de novaj vortoj. Kvankam li zorge avertis kontraŭ perforta evoluigo de Esperanto kaj maloportuna trorapidigo de ĝia vortriĉigado — «Ne tro multe, ne tro krude per unu fojo!» — li neniam rifuzis al si novan vorton, kiam la tradukota ideo ĝin postulis, aŭ eĉ simple invitis. Ĉiu el liaj verkoj, de *Hamleto* ĝis la *Fabeloj de Andersen*, alportis novan stokon da neologismoj; tiel

¹ «Literatura Mondo», Novembro 1932.

ke, en 1908, P. Boulet povis publikigi libron kun la titolo: *Du mil novaj vortoj, ĉerpitaj el la verkaro de D-ro Zamenhof*. Du mil, vi bone legis, 2.000 neologismoj preter la *Universala Vortaro*! Kaj ĉe la dua eldono, kiu okazis ses monatojn poste, la rikolto de Boulet atingis 2.126! Kaj la afero daŭris. De tiu dato ĝis la nuna, oni povas proksimume taksi je du mil aliaj la neologismojn enkondukitajn de nia Majstro. Ili parte eniris en la 4 *Oficialajn Aldonojn*, sed ne ĉiuj: multe ja mankas: sufiĉas malfermi la *Biblion* por trovi vortojn, kiel *fuli*, *kolumno*, *kultivi*, *perversa*, *sedimento*, *sistro* ktp, aŭ la ĵus aperintan trian volumon de la *Fabeloj de Andersen* por trovi aliajn, kiel *asperulo*, *drato*, *driado*, *klaŭno*, *kompakta*, *mantilo*, *maskerado*, *paraŝuto*, *strebi*, *ŝminko*, *ŝrumpi*, *transponi* ktp, kiuj eĉ ne troviĝas en la bonega *Zamenhof-Radikaro* de E. Wüster (1927). Sume, je la tempo de lia morto, oni povas kalkuli je 1.294 la radikojn uzitajn de Zamenhof, kiuj ne estis ĝis nun kolektitaj en la 4 *Oficialaj Aldonoj*. Oni povas do prave aserti, ke Zamenhof mem estis la plej granda neologisto en nia lingvo, kaj ke li enkondukis novajn vortojn ne nur pro kruda neceso, sed ankaŭ pro oportuna mallongeco (komparu ekz-e *kalva* apud *senhara*, *farbo* apud *kolorilo* ktp) aŭ pro aparta efektoserĉo (*usuri* apud *flustri*, *kokeriko* apud *kokokrio* ktp).

Nu, tiu tre klara sintenado, tiu sistema taktiko de Zamenhof estas simple ignorata —aŭ eble nesciata— de estintaj kaj nunaj kelkaj konservativuloj. En «Lingva Kritiko» mi antaŭ ne longe legis, de konata verkisto, jenan strangan frazon: «En tiuj [*de Zamenhof kaj Kabe*] verkoj, la lingvo estas vere vivanta. Kial? Ĉar la verkistoj aŭ tradukantoj uzas vortojn, kiuj estas plene vivaj *pro ĉiama uzado*». Laŭ la ĉi-supraj citoj, oni povas juĝi, kiel malmulte tiu opinio taŭgas pri Zamenhof. Aliflanke, en flugfolio, malavare dissendita de s-ro H. Fischer-Galati al ĉiuj siaj kolegoj, okaze de la projekto por la 5a OA, tiu lingva-komitatano pli-malpli volonte akceptinte 75 kaj rifuzinte, pro ilia faka karaktero, 25 el la proponitaj radikoj, aldonas ĉi tiun admonon: «Restas el tiu longa listo 118 vortoj, facile anstataŭeblaj aŭ per alia radiko el nia nuna trezoro, aŭ per kunmetita vorto trovita aŭ trovota. Ili estas la rezulto de *nura malspacienco*, de *troa ekzakteco*, de *infana vortfabrikemo*, kaj mi intence ilin ne tradukas por al neniuj altrudi

mian opinion [Sekvas la listo de tiuj 118 damnindaj monstraĵoj]. Ne aŭskultu tiujn, kiuj krias, ke ili nepre bezonas 'nuancojn'. La serĉemo de nuancoj plejofte estas *nura malebleco precizigi ideon* . . . Ĉu ne ŝajnas al vi la supra listo kvazaŭ *fremdlingva* teksto pli aŭ malpli facile tradukebla en *nian* lingvon? Pripensu, ĉu nia Majstro, ĉu Kabe ne estus povinta verki majstraĵon malgraŭ malpermeso uzi tiujn 'nuancojn'? . . . »

Ĉu vi ne kredus, ke temas pri tabelo da fenomenaj vortoj, neniam uzindaj de iom inteligenta homo? Nu, el tiu timiga listo de 118 neologismoj, 57 estis uzataj de Zamenhof mem kaj 2 de Kabe!¹ Tiel, ke por ĝuste la duono, la «troa ekzakteco», la «infana vortfabrikemo» kaj la «malebleco precizigi ideon» estas rektaj batoj sur la vangojn de Zamenhof kaj de Kabe. Jen okazo por ripeti, kun nia konservativegulo, ke «la plibono estas la malamiko de l' bono», kaj eĉ aldiri, ke, kiu volas tro pruvi, tiu nenion pravas.

Nu, estas tempo por rifuzi tiujn neobjektivajn envicigadojn de Zamenhof en tiun aŭ alian partion, sen konsidero de la homo, kia efektive li estis. Hontigu nin la bela, tro malmulte konata iniciato de niaj japanaj samideanoj, tiu kreado de la «Studejo de Zamenhofa Gramatiko», el kiu venis al ni tiel valoraj studoj. Estas la tempo science esplori la karakteron, la ideojn kaj la verkojn de nia Majstro, ne penante altrudi al li niajn antaŭjuĝojn. La rezulto eble ne ĉiam plaĉos al ĉiuj. Sed Zamenhof estas sufiĉe granda, por ne timi la kritikan, objektivan ekzamenon de lia pensado kaj verkaro: li meritis pli ol blindan adoron de idoloj aŭ fanatikuloj; li meritis, kaj certe ricevos, la kleran admiron kaj amon de ĉiuj prudentaj homoj.

¹ Por la scivolemuloj, jen ili: «absolvi, aĝioto, amatoro, anatemo, angoro, aplombo, arkeo, aŭreolo, aŭroro, bankiero, blago, blanketo, blufi, bufro, devii, distribui, drasta, drato, dreni, ekrano, flakono, generi, graki, grego, grunti, imputi, kabineto, kaprioli, kartelo, kaskado, kirurgo, klaŭno, koĉero, kulmini, magistrato, minus, negacio, orta, perversa, promocii, psiko, renomo, sino, slango, slipo, staplo, strebi, strikta, susuri, suvereno, ŝrumpi, tajdo, taŭzi, torturo, trajno, treti, tribo»; plus, de Kabe: «persvadi, surfaco». Dank' al la inteligenta opozicio de tiu digna lingva-komitatano, la 5a *Oficiala Aldono* estis reduktita al 8 vortoj, post la morto de Grosjean-Maupin.

III. RESPONDO AL LA APELACIO DE LA AŬSTRIA ESPERANTA INSTITUTO¹

La «Apelacio» de A. E. I. al la esperanta popolo, al la Akademio kaj al la esperantaj gazetoj levas plurajn interesajn demandojn, kiuj estis periode levataj ekde la dua ekzistojaro de nia lingvo ĝis la hodiaŭa dato.

En 1889, certe troviĝis jam esperantistoj, kiuj volis limigi sin je la 921 vortoj de la *Unua Libro* kaj deklaris, ke la 2.640 radikoj de la *Meza Vortaro Internacia-Germana* estas freneza lukso, ne permesebla al tiel juna lingvo.

En Novembro 1904, T. Cart dissendis «private» iun *Malfermitan Leteron al D-ro Zamenhof*, por protesti kontraŭ la diluvo da novaj vortoj, kiujn la Majstro enkondukis per siaj du vortaroj esperanta-germana kaj germana-esperanta. «Ĉu tiaj vortoj estas internaciaj, ĉu esperantaj, ĉu el sama lingvo, kiel tiuj de *Universala Vortaro*, aŭ ĉu ili estas ia Idiom-neŭtrala Volapŭkaĵo?»²

En Julio 1935 Japana Kongreso voĉdonis unuaniman proteston «por vere internacia Esperanto», kaj en tiu protesto ĝi interalie asertis, ke la verkoj de K. Kalocsay estas «degenerado de la arto poezia».

Kaj nun, en 1955, AEI kondamnas «la poemvolumon Kvaropo» — la plej elstaran literaturan verkon kaj krome la plej

¹ Tiu Apelacio estis dissendita, okaze de la publikigo de la *Suplemento* al la *Plena Vortaro*, 1954.

² Oni vidas, ke Cart, se li ne postlasis grandan verkon, iniciatis tamen prosperantan metodon, tiun de la «savantoj de nia sankta afero»: oni elpikas kelke kvindek vortojn el tuta vortaro, oni atribuas ilian enkondukon al la influo perfida de ia rivala lingvo-projekto (en 1904 estis Idiom Neutral, en 1933 estos Ido, en 1954 Interlingue ktp), kaj oni finas per la deklaro, ke oni ne plu povas kompreni Esperanton, laŭ la krokodila lamento de la iniciatinto: «Nun, kara Majstro, tre melanholie mi preskaŭ antaŭvidas momenton, kie [tiel!] Esperanto iĝos por mi tro malfacila kaj eble por aliaj ankaŭ. Mi restas tamen via respektplena...» Mi montris cetere, en la *Leteroj*, I, n-roj 79 ĝis 81, kiel Cart malpermesis al Zamenhof eĉ respondi tiun nelojalan atakon. Ni aldonu, por la instruo de niaj Aŭstraj amikoj, ke la kvina vorto denunciata de Cart kiel «malesperanta» estas... *apelacio*.

belan vendsukceson de post la dua mondmilito. Ĉio estas do en ordo.

Nur du el tiuj demandoj mi volus tuŝi hodiaŭ, unu principan kaj unu personan, unu pri la funkcio de la literaturo kaj unu pri la devoj de vortaristo.

I

Maldetale, oni povas distingi en la esperantista popolo du grandajn grupojn: tiuj, kiuj interesiĝas ĉefe al la propagando kaj tiuj, kiuj interesiĝas ĉefe al la lingvo mem. AEI prezentas sin ĉampiono de la propagandistoj, kaj pretendas malpermesi al la literatur-amatoroj la vortoprovizon necesan al ilia plezuro. Sed, mi demandas, el kia rajto? Mi rimarkigos, komence, ke la literatur-amatoroj tute ne volas, kaj neniam volis trudi al la propagandemuloj siajn proprajn gustojn. Mi neniam aŭdis, ke oni perforte devigis iun ajn esperantiston legi la *Inferon* de Dante en la traduko de Kalocsay aŭ *Peer Gynt* de Ibsen en tiu de Haugen.

Plue, se ni komparas la rezultojn atingitajn de tiuj du grupoj da samideanoj, ni facile konstatos, ke en la pasintaj tridek jaroj la dua grupo brile sukcesis ne nur efektiviĝi tradukojn de la grandaj naciaj ĉefverkoj kaj produkti mem altnivelajn originalajn romanojn kaj poemarojn, sed eĉ pli, trovi por ili publikon; dum la unua grupo, tiu de la propagandemuloj, starus sur la sama nivelo, kiel antaŭ tridek jaroj — se ne estus la lastjara sukceso en Montevideo. Kaj mi tre, tre dubas, ĉu tiu stagnado de la movado devenas de tio, ke Karlo Bodó iniciatis la adjektivon *aŭdaca* aŭ Reto Rossetti la verbon *avanci*.

La propagando postulas simplan lingvon? Sed ĝi ja disponas tian, en la oficiala radikaro. Kiu do kredus, ke eĉ unu el la vortoj cititaj en la nigra listo de AEI kaj montritaj kiel nenecesaj, povus troviĝi en lernolibro aŭ eĉ en ordinara gazet-artikolo? Kiel do povus ĝeni la kursgvidantojn la fakto, ke ĝardenisto devas jen *ĵosi*, jen *stiki*, jen *buti* siajn plantojn? Aŭ ke aviadisto devas lerni jen *ŝvebi*, jen *glisi* en la aerondo? Kial do la kiel-vi-fartas-uloj kaj la ĝis-revido-istoj devus maltrankviliĝi je la penso, ke ekzistas

poemoj kun la abomenaj vortoj *humida, paseo, tarda, turpa* ktp, se poezion ili simple *ne* legas? Mi ne povas kredigi al mi, ke la rifuzo de la Aŭstria Delegito al la Unesko-Konferenco voĉdoni la unuan meksikian rezolucion estis motivita de la ĉeesto de 46 poeziaj «neologismoj» en la *Suplemento* de la *Plena Vortaro*.

Mi aldonu, por diri mian tutan penson, ke la propagandistoj donas ofte la impreson, ke ili rigardas sian publikon kolekto da infanaĝaj pinglokapuloj. AEI kondamnas ekz-e, kiel «superfluaĵn», la oficialajn vortojn *poemo* kaj *poeto*, kiujn ĝi volus anstataŭigi per *poeziaĵo* kaj *poeziisto*. Nu, por kiaj do popoloj tiuj du vortoj prezentas ian malfacilon? Mi malfermas mian rusan vortaron, kaj trovas la triopon: *poezija, poema, poet*; mian estonan vortaron, kaj trovas: *poeesia, poeem, poeet*; mian japanan vortaron (de Okamoto), kaj trovas: *poetori, poemu* kaj *poetto*. Sed eble tiuj vortoj mankas efektive al la aŭstria dialekto de la protestantoj?

La vero estas, ke por multaj esperantistoj la internacia lingvo devus esti kaj resti kvazaŭ artiklo de unugroŝa ĉenbutiko, kaj ke la literaturo estas kvazaŭ persona atenco al ilia «nesufiĉa penskapablo», por uzi, pli ĝustaloke, la esprimon de AEI. Kaj pri tiu temo, mi ne povas pli bone fari, ol kopii kelkajn pensojn de Zamenhof: «Lernolibroj, anoncado ktp estas necesaj, sed literaturo estas ankaŭ necesa, ne malpli, sed eĉ multe pli... La batalantoj por nia ideo jam longe konvinkigis, ke ĉiu nova verko, kiun ni povas montri al la publiko, efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj... La konstanta kreskado de nia literaturo (kun ĝi ankaŭ la kreskanta elasteco de la lingvo) iom post iom silentigos niajn malamikojn... Agadi per lernolibroj, anoncoj ktp estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon apud la literaturo, kaj ne anstataŭ la literaturo!» (OV, pĝ 205, 206).

II

Pri la dua punkto, t. e. kia devas esti la sinteno de vortaristo antaŭ la novaj vortoj, ŝajne la redaktintoj de la «Apelacio» ne dividas la vidpunkton de la profesiaj vortaristoj, kiel ekz-e Zamenhof: «Ĉiufoje, kiam aperas nova eldono de la vortaro en ia lingvo, ĝi

enprenas en sin ĉiujn novajn vortojn, kiuj ekzistas jam en la aliaj vortaroj, kaj tiamaniere la vortaroj en diversaj lingvoj tute ne diferencas inter si kaj tamen la lingvo konstante ĉiam pli kaj pli riĉiĝas, sen ia ŝargado de la lernanto (ĉar la plej granda parto de la novaj vortoj estas aŭ pure internaciaj, kiujn la vortaroj ne kreas sed nur fiksas, aŭ vortoj speciale sciencaj aŭ teknikaj, kiujn la ordinara lernanto ne bezonas)» (OV, pĝ 429).

Por ilustrati la aserton de nia Majstro, mi citos nur unu fakton: en la ĉi-jara kongreso de la franca SAT-Amikaro, kamarado riproĉis, ke mi enlasis en la *Suplementon* la «neologismon» *trista*. Nu, eĉ preterlasante la uzadon en la literaturaj verkoj ekde 1929,¹ mi trovis tiun vorton en jenaj vortaroj:

Esperanta-Itala de Tellini, 1931.

Esperanta-Dana de Friis kaj Frey, 1938.

Esperanta-Ĉeĥa de Filip, 1947.

Ĉeĥa-Esperanta de Filip, 1949.

Ĉeĥa-Esperanta de Hromada, 1949.

Esperanta-Norvega de Rian, 1949.

Esperanta-Germana de Butin und Sommer, 1952.

Esperanta-Sveda de P. Nylén, 1954.

Português-Esperanta de Gomes Braga, 1954.

Kaj mi demandas, ĉu unu vorto, jam 26 jarojn aĝa, regule uzata de bonaj poetoj, kaj registrita en naŭ fidindaj vortaroj, devas esti plu rigardata kiel pario kaj forĵetata el la *Plena Vortaro*? Mi ne opinius tion la ago de konscienca leksikologo.

Cetere, ankaŭ ĉi tie niaj bonintencaj kritikistoj ŝajnas nescii la faktojn. AEI asertas ekz-e, ke kontraŭe al la modernaj verkistoj «nia majstro Zamenhof per sia simpla lingvo kapablis esprimi profundajn sentojn same aŭ eĉ pli bone». Sed neniuj el la modernaj verkistoj arogis al si proponi eĉ la dekonon de la novaj vortoj iniciatitaj de Zamenhof en siaj tradukoj: kaj ĝuste tiu *farbo*, kiun

¹ Se ni supozas, ke ĝia uzo en la *Internacia Krestomatio* de Kabe, en 1907, pĝ 1, estas nura preteratento — kio ne estas tiel certa: la lingva-komitatano kaj akademiano Ed. Kühn uzis ĝin en 1909, en sia originala romano *Sherlock Holmes en servo de la hispana trono*.

kondamnas la 3a regulo de la aŭstria cirkulero de AEI, estis, kun multaj aliaj, kiel *aŭtenta, blagi, blufo, ĉirpi, inkrusti, jodli, kampa-nulo, klareto, kvaki, pilafo, plastika, savano, skulpturo, tino, tofo, treti, vermifugo, zefiro* ktp, ktp, novige enkondukita de la Majstro en sian tradukon de la *Fabeloj de Andersen*! Mi memoras, ke alia kontraŭneologisto admiris, kiel Zamenhof sciis traduki la tutan *Biblion* kun tiom malmulte da novaj vortoj: li simple nesciis, ke la biblia hebrea lingvo estas unu el la plej malriĉaj lingvoj, kaj enkalkulas nur 5.642 vortojn! (la *Nova Testamento*, kiu ampleksas nur unu trionon de la *Malnova*, entenas tamen 4.800 vortojn).

Mi konklude diros, ke grupoj kiel AEI estas tre utilaj, ĉar ili prezentas la konservativan forton nepre necesan en ĉiu lingvo, por ekvilibri la fortojn de evoluado. Sed ilia agado povas esti fruktodona nur, se ĝi baziĝas sur serioza kaj kompetenta esploro de la faktoj kaj tiras el ili ĝustajn deduktojn. Oni ne rajtas pritrakti la problemon de la «neologismoj», se oni ne familiariĝis kun la jam ekzistanta leksikologia scienco. Oni ne rajtas proklami unuflanke, ke Esperanto estas vivanta lingvo, kaj samtempe rifuzi al ĝi ĉiun eblon vive evoluadi. Kaj fine, por admoni «la verkistojn kaj poetojn verki nur per oficialaj vortoj», oni devus pruvi mem, ke tio estas ebla. Kiam s-roj Grimme kaj Werner alportos al ni en verva traduko la *Faŭston* de N. Lenau aŭ la *Sonetojn al Orfeo* de Rainer Maria Rilke, uzinte nur la oficialajn vortojn, tiam mi humile klinos min antaŭ ili kaj ĝoje ĵetos en la purigan fajron la *Parnasan Gvidlibron*, la *Suplementon de la Plena Vortaro*, kaj eĉ, se ili iom insistos, min mem, pentofere.

EDITORAJ DEMANDOJ

Ankoraŭ unu neologismon! Mi petegas pri pardono, sed mi ne povis diri alimaniere tion, kion mi deziras esprimi. *Eldonistaj demandoj* estas tute alia afero — kaj pri tiuj mi havas neniajn lumojn nek kompetentecon. Eldonisto estas samtempe spekulaciisto, kiu elektas inter la proponataj manuskriptoj tiun, kiun li esperas plejmulte aĉetota libroforme, administristo, kiu diskutas kun la presistoj kaj la aŭtoroj, por ricevi de ĉiuj la plej favorajn labor-kondiĉojn, kaj komercisto, kiu, per lerta reklamado, provas vendi kiel eble plej rapide kiel eble plej grandan kvanton de siaj varoj. Editoro estas homo de kabineto, kiu pretigas por publikigado la verkon de iu alia, provas trovi ties plej fidindan tekston, kaj, se necese, provizas ĝin per la bezonataj klarigoj, notoj, rimarkoj ktp.

Dum longaj jaroj en Esperantujo ekzistis nur eldonistoj, ĉar la literaturo estis juna kaj ĉiu nova verko originala. Sed nun, kiam oni komencis reeldoni verkojn de la lulila periodo de nia lingvo, aperis ankaŭ editoroj. La *Originala Verkaro de Zamenhof* estis eldonita de la Lepsika firmo F. Hirt und Sohn, sub la editoreco de Dro J. Dietterle. La *Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj* de Kabe estas eldonaĵo de S. A. T. kaj editoraĵo de la Literatura Komitato de F. L. E. Ktp.

Kia estas la devo de editoro? Evidente respekti la verkon de la aŭtoro, en la formo, kiun tiu ĉi donis al ĝi definitive. De tio venas la regulo de ĉia scienca editorado, ke oni represas la tekston de la lasta eldono aperinta dum la vivo de la aŭtoro; kaj nur rilate al ĝi oni notas la variantojn de la antaŭaj eldonoj, aŭ de la manuskripto, kiam oni ĝin posedas.

Sed, por esperantistaj editoroj, la afero ne estas ordinare tiel simpla. Unuflanke, multaj reeldonotaj tekstoj prezentas tiajn deflankiĝojn disde la nuna uzado, ke ili postulus notojn aŭ atentigojn ĉe ĉiu dua linio; aliaj diverĝas nur per uzo de kelkaj formoj, kiujn

anstataŭis aliaj oficialiĝintaj — tiel ke oni estas tentata supozii, ke, se la aŭtoro verkas nun, li uzus tian kaj tian . . . kaj oni mem korektas; fine pluraj el tiuj verkoj havis — kaj konservas — pedagogian celon kaj utilon, kaj oni hezitas meti sub la okulojn de lernantoj vortojn kaj dirmanierojn, kiujn oni devas poste kondamni kaj plibonigi. Jen la ĉefaj kaŭzoj, pro kiuj la esperanta editorado prezentas hodiaŭ ian ĥaosan aspekton, kaj kial mi opiniis urĝa esplori tiun demandon.

1.—Antaŭ ĉio, unu principo: editoro ne estas aŭtoro, sekve havas nenian rajton substitui sin al tiu. Ĝi estas afero de simpla honesteco. Se vi publikigos eĉ nur unu linion sub la nomo de Zamenhof, de Bein ktp, vi morale garantias al mi, ke ĉio, kio kuŝas sub tiuj nomoj, estis ja skribita de tiuj homoj mem — kaj ne de sro B., C. aŭ D. Kompreneble, ĉe simplaj citaĵoj, povas okazi, ke parto de frazo estas neinteresa por via celo: vi rajtas ĝin forpreni, sed kondiĉe, ke vi tion klare montras per tipografiaj rimedoj. Oni kutime uzas por tio la tri punktojn; sed tiu procedo estas neoportuna, ĉar oni fojfoje povas dubi, ĉu tiujn tri punktojn enmetis la aŭtoro aŭ la editoro. Tial la sola klara maniero estus enfermi la tripunkton inter krampoj rektaj. Aliflanke, povas okazi, ke vi bezonas aldoni klarigan vorton al la citata frazo: ankaŭ tion vi devas signi, metante tiun vorton inter angulaĵoj, aŭ, se neeble, rektaj krampoj (ĉar la ordinariajn rondajn krampojn oni povus atribui al la aŭtoro). Jen tipa ekzemplo de ĝusta prezento:

«La pli maljuna <filino> estis tiel simila al la patrino [...], ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrino».

2.—Ni supozu nun, ke ni havas, por reeldoni, tekston el la unuaj jaroj de nia literaturo. La regulo egale validas: vi ne rajtas fari en tiu teksto ian ŝanĝon, se pri ĉiu modifo vi ne avertas la leganton. Tion oni povas atingi en du manieroj:

a) se temas pri libro destinita al erudiciuloj, necese estas prezenti senŝanĝe la originalan tekston, kaj almeti piednote la lingvajn aŭ dokumentajn rimarkigojn. Tiel prezentiĝas, ekz-e, la 17a eldono de la *Fundamenta Krestomatio*.

b) se temas pri libro destinita al vasta publiko, preferinde estas liveri al ĝi tekston facile legeblan, en kiu oni anstataŭigis la

arĥaismojn, plumerarojn ktp per la ĝustaj formoj, kaj liveras piednote la originalajn formojn. Tiel prezentigas, ekz-e, la *Originala Verkaro* kaj la *Leteroj de Zamenhof*.

Sed, kontraŭdiros tiu eldonisto, se mi celas publikon de lernantoj, mi povas akcepti neniun el tiuj du prezentoj, ĉar ili nur pezigos la libron kaj riskos fortimigi la aĉetontojn. Vidpunkto certe pravigebla, kiun mi plene allasas. Mi aldirus eĉ, ke same okazus ĉe ia arta eldono (kun ilustraĵoj ktp) de kelkaj fabeloj de Andersen, ekz-e *La Virineto de l' Maro*, kiun Zamenhof tradukis inter Decembro 1889 kaj Decembro 1890, kaj apenaŭ korektis ĉe la enmeto en la *Fundamentan Krestomation* (dum *La Ombro*, kiu aperis en la *Dua Libro* komence de 1888, estis funde korektita ĉe la enmeto en la trian volumon de la *Fabeloj de Andersen*). Tamen tiuj bonaj motivoj ne sufiĉas por neniigi la ĉi-supre formulitan principon. Kiel do elturniĝi? Tre simple: la editoro kuraĝu preni sur sin la respondecon kaj klare diru, ke li modifis la tekston. Ne mankas la rimedoj, diable! Min ŝokas, kiam mi malkovras, ke, en la *Unua Legolibro* de D-ro Kabe, 5a eldono havigita de s-roj Ellersiek kaj Borel, en Berlino, ĉiuj ŝubjunkcioj *ĝis* estas ŝanĝitaj en *ĝis kiam* — sen ia ajn avertito. Mi indignas, kiam, en ia *Esperanta Krestomatio*, kompilita de s-roj H. A. de Hoog, A. J. Kalma, W. F. Kruit kaj W. van Zon, ĉiuj seriozaj homoj, sub la titolo *La Feino* mi eklegas: «Iu vidvino havis du filinojn» — precipe se, je la fino, oni almetas la fontindikon jene: «El la *Fundamento de Esperanto*». Mi ĉi tie ne diskutas la korekton mem (kvankam...), sed kial do ne skribi, lojale: «Laŭ la *Fundamento de Esperanto*»? Oni eĉ estu tiel honesta kaj avertu la leganton pri la stato de la afero jam ĉe la unua paĝo, kjel ekz-e faris la firmo Literatura Mondo, kiam ĝi reeldonis la ~~unuan~~ esperantan romanon sub jena titolo:

D-ro Vallienne

Ĉu Li?

Stile reviziita de

Kolomano Kalocsay

3.—En kiaj limoj editoro rajtas enkonduki (en la ĉi-supre montrita maniero) korektojn en klasikan tekston? Oni povus diskuti pri kelkaj apartaj okazoj — sed mi opinias, ke la ora regulo estas

teni sin je la formoj kaj dirmanieroj akceptataj de *ĉiuj* bonaj verkistoj. Alidire, neniam enkonduku personajn preferojn en la prino-tadon, kiel ajn pravaj ili povas ŝajni al vi. Por doni ekzemplojn, estus necese, ĉe editorado de zamenhofa praa teksto, glosi la formojn *kiel* aŭ *kiel se*, en la lokoj, kie ili estas uzataj anstataŭ *kvazaŭ*; la formojn *esceptinte* aŭ *komisio*, en la lokoj, kie ili estas uzataj anstataŭ respektive *krom* kaj *komisiono* ktp. Sed mi ne konsilus modifi la modon post *kvazaŭ*, trudante en ĉiu okazo aŭ la indikativon aŭ la kondicionalon: ĉar la afero ankoraŭ pendas, oni sin detenu.

En la represo de la *Pola Antologio* (farita de S.A.T.-F.L.E. sub la titolo *La Lanternisto* ke) mi konsentas kun la editoroj pri korekto de la diroj *nidoj* al *nestoj*, aŭ *dubi*, *ke li venos* al *dubi*, *ĉu li venos* ktp. Sed mi ne konsentas pri anstataŭigo de *okulo kontraŭ okulo*, kio estas tute zamenhofa kaj logika esprimo, per *okulon kontraŭ okulo*.¹ Kaj precipe mi ne aprobas tie la difektadon de figuroj, kiel *almozpeti pardonon* aŭ *la belecoj*, kiujn oni prozaĉe modifis al *humile peti pardonon* kaj *la belulinoj*. Oni tamen scipovu distingi inter la gramatikaj aŭ vortaraj arĥaismoj kaj la stilefektoj. Se tion oni ne kapablas, oni ne improvizu sin editoro!

En la sekvantaj paĝoj, oni trovos pliajn ekzemplojn de la malfacilaĵoj, kiuj atendas editoron. Oni tie povos konstati, ke tiu tasko postulas bonan scion de la lingva historio — kaj ankaŭ de kelkaj aliaj aferetoj.

¹ En tiaj «interpozitivoj», la unua substantivo tute ne estas sendependa de la dua, kaj ne rolas mem kiel adjekto: *rigardi iun okulo kontraŭ okulo* ne povas esti analizata *rigardi iun per okulo kontraŭ okulo*, kvazaŭ temus pri du sinsekvaj adjektoj. En efektiveco, la unua substantivo tiel strikte ligiĝas, en la penso, kun la sekvanta prepozicio kaj dua substantivo, ke la tuto formas nedisigeblan blokon, kaj oni povas analizi la blokon nur jene: ke la duopo da substantivoj estas interligita de la prepozicio, kiu kvazaŭ emanigas sian altirforton same malantaŭen kiel antaŭen. Cetere la neeblo aldoni ian ajn determinilon en tiajn formulojn pravas, ke temas pri ia «fermita sistemo». Akuzativigi la unuan parton de tia sistemo estas do rompi ĝin, t. e. igi ĝin senseenca.

I. LA LETERO AL BOROVKO

Kiam, en 1948, mi reeldonis tiun faman leteron en la fino de la unua volumo de la *Leteroj de Zamenhof*, mi disponis ne la originalan tekston, sed nur la represojn en *Originala Verkaro* de Dietterle kaj en *Lingvaj Respondoj*, 3a eld. Nu, en la antaŭparolo al tiu ĉi 3a eldono, estis dirite: «S-ro William Bailey... zorge korektis ne sole la erarojn de ĉi tiu libro, sed ankaŭ, post komparo kun la originaloj mem, la erarojn, kiuj troviĝas en la volumoj jam eldonitaj». Ĉar mi alte ŝatis la pedantan ekzaktecon de W. Bailey, erarigite de tiu deklaro, mi donis la preferon al la teksto de la *Lingvaj Respondoj* — kion poste mi tre bedaŭris. Jam unu detalo devus min averti: pĝ 105, oni legas unu *fordoniĝadi min*, kiu almozkriis korektiĝon. Sed ... *quos uult perdere Juppiter dementat*. Poste, dank' al la ega malavareco de Paul Nylén, mi ricevis preskaŭ plenan kolekton de la numeroj de «Lingvo Internacia» aperintaj dum la sveda periodo; kaj mi povis proprukule konstati, ke Dietterle reproduktis la originalan tekston, dum W. Bailey allasis en ĝin ĉiadevenajn korektojn aŭ eĉ miskorektojn. Nur pri du detaloj mi ne konsentas kun Dietterle: lia piednota traduko de *Švejcarskaja* per 'trinkejo' anstataŭ la ĝusta 'pordistejo' — kaj lia noto, asertante, ke «konstati ilin [*la variantojn*] ne estas necese, ĉar Zamenhof ne mem faris la tradukon». Estas vere, ke, supre de la letero, «Lingvo Internacia» indikas: «Tradukis el lingvo rusa V. G.», t. e. Vladimir Gernet: sed tiun tradukon tre certe reviziis kaj korektis Zamenhof, ĉar la teksto estas (krom pri unu punkto)¹ tiel konforma al lia tiama stilo, ke estus vera miraklo, se la nove varbita Gernet atingus per si mem tian rezulton.

Sed, laŭnature, tiu teksto entenas multajn arĥaismojn, al kiuj oni devas turni la atenton de la nunaj legantoj, se oni volas, ke ili ne miskomprenu la tekston (mi referencas la *OV*):

¹ «mi... per flamaj paroloj inklinados la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj»: la ĝusta formo estas: *inklinigados*. La eraron kaŭzis aŭ la analogio de *klini* aŭ la influo de la responda rusa verbo *sklonjat'*, kiu estas transitiva.

(pĝ 418, —21): *forlogata*, kiu havas nun nuancon de malvirto, malfidelo ktp., signifis tiam nur: 'allogata'.

(—13) *artifika* havis nur la sencon 'artefarita, komplika'.

(—12) *ne unufoje* signifas ĉe Zamenhof nur: 'ne sole unufoje', t. e. 'plurfoje'; li neniam uzis tiun dirmanieron kun la senco 'eĉ ne unufoje'.

(pĝ 419, 2) *fordoniĝi* t. e. 'dediĉi min'.

(samloke) *grandegulaj* ne signifas 'grandegaj', kiel multaj ĝin simpligis. Temas ĉi tie pri adjektivo tiritita el la kunmetaĵo 'grandegulo' («La legendoj rakontas pri grandeguloj, kiuj volis batali kun la dioj» skribas la Unua Ekzercaro), kiun anstataŭis la neologismo *giganto*: oni devas do interpreti per 'gigantaj'.

(pĝ 420, 1) *estante jam sur tiu ĉi tero*, t. e. 'tereno'.

(10) *La San de Decembro 1878* laŭ la rusa kalendaro, do la 17an laŭ la gregoria.

(11) *La sanktigon de la lingvo*, t. e. la 'bapton'.

(—11) *mi preskaŭ nenie estadis: estadi* signifas proksimume 'foresti el la hejmo por distraĵoj'.

(—8) *faciligadis mian koron* t. e. 'senpezigis'.

(421, 13) *alskribadis*, t. e. 'atribuadis'.

(422, 2) *nededicita adresato* signifas 'ne ensekretigita, ne iniciata adresulo'.

Pri la sintakso, oni notas neniun arĥaismon: la singulareco de la epiteto rilatanta al du singularaj substantivoj estas efektive tute regula ĉe Zamenhof: *Mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron*, kaj *Mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian*.

Estas tre kurioze, ke ne la arĥaismajn vortojn aŭ turnojn (krom la du unuaj) Beaufront penis klarigi en sia represo de tiu letero en «L'Espérantiste»: li limigis sin ĉefe al la enmetado de la sufikso *-ad-* en multaj verboj, kie ĝi ne estas nepre necesa, al korekto de tri uzoj de la artikolo, kaj al la simpligo de la vortordo de du-tri frazoj. La sola videbla interveno de W. Bailey, post li, estas la majuskligo de la popolnomoj.

Postrimarko.—En alia parto de tiu 3a eldono de la *Lingvaj Respondoj*, ni tamen trovas ateston de la interveno de nia granda

zamenhofisto: pĝ 25, li zorgis traduki el la *Grammaire et Exercices de la langue internationale Esperanto* de L. de Beaufront la tutan klarigon «pri la prefikso re-». Sed, se li estus priserĉinta la *Ekzercoj de aplikado* de la sama aŭtoro, li estus trovinta tie la originalan tekston de Zamenhof, kiun mi reproduktas ĉi-sube, por komparo, laŭ la kopio, kiun s-ro R. Jossinet bonvolis havigi al mi:

«*Tiu ĉi prefikso signifas venon returne al la loko aŭ al la stato, de kiu oni foriris. Sekve: 1^o Se A donis ion al B, kaj nun la objekto estas denove ĉe A, ni diras, ke B redonis ĝin; A reprenis ĝin; la objekto revenis al A. Tiel spegulo reĵetas la radiojn, kiuj falis sur ĝin. La pilko resaltas de la tero, k. t. p. (Tie re = returne). 2^o Se mi ion faris kaj poste denove faras tion saman, mi ankaŭ venas returne (en mia farado) al tiu punkto, de kiu mi foriris. Sekve refari t. e. fari denove, kion mi (aŭ alia persono) jam faris, rekanti, rejuniĝi, k. t. p. (Tie ĉi re = denove).*»

Beaufront aldonis: «tiu ĉi klarigo estas donita kaj redaktita de doktoro Zamenhof mem».

II. KRITIKA APARATO DE LA ZAMENHOFA HAMLETO

La tradukon de *Hamleto* Zamenhof verkis probable dum la jaro 1893 kaj publikigis en 1894 en «Nurnbergo, presejo de W. Tümmel». Tiu eldono surhavas la n-ro 71 de la «Biblioteko de la Lingvo Internacia». Kompleta titolo estas:

Hamleto
Reĝido De Danujo
Tragedio En Kvin Aktoj
De
V. Ŝekspir.
Tradukis L. Zamenhof.

La libro entenas 136 paĝojn, bele presitajn sur bona papero, en formato de 13,4×21 cm. Ĝi estis reeldonita en 1902 en «Paris,

Librairie Hachette et C^{ie}. Tiam ĝi apartenas al la «Kolekto Esperanta aprobita de D^o Zamenhof». La kompleta titolo estas:

W. Shakespeare
Hamleto
Reĝido De Danujo
Tragedio En Kvin Aktoj
Tradukis
L. Zamenhof
Nova Eldono.

Tiu reeldono entenas 176 paĝojn, en formato de 11,5×17,5 cm. Novaj represoj okazis, ĉe la sama firmo, sub la ĝenerala titolo, ekde 1905:

ESPERANTO
VERKARO. DE
D^o ZAMENHOF

La «nova eldono» de 1902 estas multe malpli korekta ol tiu de 1894. Aliflanke, oni konstatas inter ambaŭ kelkajn variantojn. Mi listigos do ĉi-poste unue la preserarojn, due la variantojn, kaj provos determini ties originon (Mi uzos ekzempleron de la «5a Eldono», t. e. represio, 1909).

La citaĵoj estas tiel aranĝitaj, ke oni trovos unue la tekston de la 5a represio, poste la tekston de la 1a, fine la lokon de la citaĵo en la 5a eldono, montritan per du ciferoj interkrampe: tiu de la paĝo kaj tiu de la linio; por la nombrado de la linioj estas kalkulata ĉiu eĉ parte presita linio, do, inkluzive de la nomoj de la personoj. Formulo kiel: «men : mem (30, 25)» signifas do, ke la 5a eldono prezentas, sur la 25a linio de la 30a paĝo, la vorton «men», dum la 1a prezentis «mem».

A) Preseraroj

strangaj teruraj : strangaj kaj teruraj (7, 10).

reĝo : reĝa (12, 2).

Me : Ne (12, 17).

al patro : al la patro (18, 6).
 men : mem (30, 25).
 ĉiuj kulpoj : ĉiuj miaj kulpoj (35, 1).
 de mi : do mi (37, 33).
 mirindaj : mirinda (39, 26).
 de tempo : de la tempo (65, 17/18).
 mi — ambaŭ : mi — ni ambaŭ (73, 31).
 trogandigata : trograndigata (81, 11).
 pantomino : pantomimo (86, 15).
 mortiginto : mortiginton (100, 17).
 la : al (110, 23).
 hakisto : bakisto (124, 10).
 pova : povas (141, 3).
 l : la (145, 26).
 ka : kaj (145, 27).
 lo : ol (146, 20).
 enhaon : enhavon (158, 9).
 m : mi (161, 35); (165, 27).
 liaakajj : kaj aliaj (174, 14).

Unu preseraro, ekzistanta en la 1a eldono, restis en la sekvantaj:

ĉio *devus esti* : ĉi (154, 22).

B) Interpunkcio

! : ? (9, 12).
 post' : post (49, 36).
 flutistoj : flutistoj! (92, 15).
 montras : montras; (103, 33).
 animon: el la : animon, el la (104, 3).
 kia, bruo : kia bruo (126, 9).
 Mi preĝas Dio : Mi preĝas. Dio (131, 13).
 ĉiel, ĝi : ĉiel' ĝi (132, 2).
 la dual : la dua (168, 21).
 palaj mutaj : palaj, mutaj (173, 3),

C) Kursivaĵoj

En la 1a eldono estis presitaj maldense (kio en la germana tipografio respondis al niaj kursivaj) jenaj vortoj:

Ke la spirito, por *ni* tiel muta

Al *li* parolos. (9, 9/10).

Ekŝajnis? Ne, ĝi *estas*, ho, patrino. (12, 29).

Ĉio estas *ŝajno*. (12, 34).

Funebron estas tre facile *ludi*. (13, 1).

Ĝi *devis*; (13, 18).

Ĝi *devas* tiel esti! (13, 28).

kiam *mi* ĝin vidis (20, 22).

En *tia* formo, nek la kapon vian

Balancu *tiel* (39, 31/32).

Unu parolon (66, 8).

Mi *tiam* lin ekkaptos, *tiam*, glavo, (100, 32).

Ĉ) Variantoj

Laŭ la kontraktoj starigitaj inter Hachette kaj Beaufront, kiel garantianto de Zamenhof, ni scias, ke Beaufront estis persone respondeca pri la korektado de la verkoj de la «Kolekto Aprobita». El la solenaj deklaroj de «fideleco al la Majstro», oni povus opinii, ke Beaufront enkondukis nur variantojn aprobitajn de Zamenhof. Sed du faktoj hĉzigitas: unue, almenaŭ du el tiuj «variantoj» estas kontraŭsencoj, kaj oni ne povas trovi verŝajna, ke Zamenhof mem kulpis ilin en 2a eldono, se li donis en 1a la ĝustan tradukon; due, la 1a Akto de *Hamleto* estis represita en la *Fundamenta Krestomatio*, kiu aperis en Junio 1903, do preskaŭ unu jaron post la «nova eldono» de *Hamleto*: nu, en la *Krestomatio* oni trovas nek la preserarojn, nek la variantojn de la «nova» eldono. Se oni memoras, ke, dum la tuta vintro 1902-1903, Carlo Bourlet batalis por rompi la kontrakton drakonan, kiu ligis Zamenhofon pere de Beaufront, kaj ke li sukcesis en la printempo de 1903, oni facile solvos tiun malgrandan enigmon: la *Krestomatio* estis presita ekster la kontrolo de Beaufront, sub la sola gvidado de C. Bourlet, kiu absolute nenion ŝanĝis en la manuskripto de Zamenhof. Tiun kon-

kludon apogas la fakto, ke Beaufront, en sia gazeto «L'Espérantiste», anoncis siatempe la reeldonon de *Hamleto* kun laŭda komento, sed informis pri la apero de la *Krestomatio* nur en Decembro 1903 per ia seka noto, sen komento. Mi opinias do, ke ĉiuj ŝanĝoj enmetitaj en la dua eldono de *Hamleto* estis enkondukitaj de Beaufront.

Sed tio ne signifas, ke ili ĉiuj estis enkondukitaj *kontraŭ* la volo de Zamenhof. La tuta kaj grava korespondo inter Beaufront kaj Zamenhof perdiĝis, mi kredas; sed ni eksciis, el diversaj aliaj fontoj, ke Beaufront altiradis la atenton de Zamenhof al pluraj lingvaj malebenaĵoj, kiel la konfuzo inter *pli* kaj *plu*, la uzo de la refleksivo kun aktiva verbo anstataŭ la mediala voĉo, kiam ne ekzistas vera ago (*sin trovas* ktp), la uzo de la refleksivo ĉe la unua aŭ dua persono ktp — kaj ke pri tiuj punktoj Zamenhof iom post iom evitis la kritikitajn formojn. Tial mi dividos la variantojn en du kategoriojn, laŭ tio ĉu ili konformiĝas al la posta uzado de Zamenhof aŭ ne.

1. Variantoj, probable akceptitaj de Zamenhof¹

petegas : priĵuras (4, 20); (60, 6). Post 1900 Zamenhof ne plu uzis la formon *priĵuri*, tro sklava traduko de la germana *beschwören*: en la *D.-E. Vortaro* de 1905, li tradukos tiun verbon per *petegi*. nudpiede : nudapede (68, 11). La fakto, ke *ped* ne ekzistas en E (ĝi estis probable memoraĵo de la Praesperanto), pravas, ke Zamenhof akceptis, eble eĉ iniciatis tiun korekton. troviĝas : sin trovas (73, 35); (139, 11). troviĝos : sin trovos (83, 11). troviĝis : sin trovis (97, 26).

¹ Oni demandos sin, kial, se Zamenhof efektive akceptis kelkajn variantojn, li ne enkondukis ilin en la *Fundamentan Krestomation*. La respondo oni trovos en la *Antaŭparolo al la 5a Eldono*: «ĉar ne venis ankoraŭ la tempo, por diri la lastan vorton pri tiuj dubaj formoj...» Dezirante ĝeni kiel eble plej malmulte la naturan evoluon, Zamenhof ne volis, per enkonduko de korektoj en fundamentan modelaron, ŝajni trudi al la esperantistaro siajn proprajn preferojn. *Hamleto* kontraŭe ne havis tian pedagogian celon.

troviĝi : sin trovi (118, 30).

troviĝas : vin trovas (148, 6).

troviĝas : min trovas (148, 9).

troviĝas sin : trovas sin (81, 28). La sistemeco de tiuj ŝanĝoj, kaj la fakto, ke de 1900 Zamenhof ne plu uzis *sin trovi* en tiu senco, montras sufiĉe, ke li profitis la konsilojn de Beaufront (La lasta citaĵo klariĝas per tio, ke, anstataŭiginte *trovas* per *troviĝas*, la korektanto forgesis forstreki *sin*, kiu troviĝis eks-terkute post la verbo).

Polujon : Polujo (120, 6). Post *kontraŭ*, Zamenhof plurfoje uzis la akuzativon por akcenti la malbonan intencon, la malamikecon ktp.

nia : sia (163, 30). La uzo de la refleksivo por la unua aŭ dua persono estas slavismo, kiun Zamenhof ankoraŭ poste kulpis (ekz-e en la *Biblio*); sed plejparte li evitis ĝin, kaj ĝuste en la *FK* (pĝ 326, 17) li korektis sian tekston de 1887: *Tenante sin koro ĉe koro* en: *Tenante nin koro ĉe koro*. Dro W. Lippman rimarkigis, en sia *Raporto pri la Refleksiva Pronomo* (1926), ke Zamenhof lasis similan ekzemplon nekorektita:

Diru, kion

Vi volas fari? Plori? aŭ batali?

Aŭ fasti? aŭ disŝiri sin [= vin]? (155, 4)

Ni diru, pli ĝuste, ke pro la sinsekvo de pluraj infinitivoj, tiu misuzo ne altiris la atenton de Beaufront.

leviĝi : sin levi (172, 11). La ŝanĝon Zamenhof akceptis el du kaŭzoj: la refleksivo koncernas la 1an personon, kaj la mediala formo estis preferata de Zamenhof en ĉiuj liaj postaj verkoj.

2. Variantoj, ne akceptitaj de Zamenhof

tempo : templo (22, 17). La tekstoj angla (*this temple*) kaj germana (*dieser Tempel*) klare montras, ke nur la originala traduko estis ĝusta. La editoro ne komprenis la komparon inter la homa korpo kaj templo (eble ĉar Zamenhof preterlasis la demonstrativon *jena*), kaj supozis, ke temas pri la paso de la tempo.

finiĝo : fino (58, 8). La korekto de konciza kaj konversacia formo en pli longan kaj pli logikan certe venas de homo, kies spirito ne ŝatis flekseblecon kaj malrigidecon en la lingvaj aferoj. Tian specon de korektoj oni retrovos abunde en la notoj de la 17a eldono de la *FK*, kie la editoroj konstante korektas *konstruo* per *konstruaĵo*, *kompetento* per *kompetenteco*, *elpenso* per *elpensaĵo*, *bezona* per *bezonata* ktp.

ŝi : ĝi (58, 11). La seksigo de la Fortuno ekzistas jam en la angla kaj germana tekstoj; en la esperanta mem, kelkajn liniojn super, oni legas, ke «la feliĉo estas publika virino», kiu estas ankaŭ seksigo de abstrakta ideo; sed plejofte Zamenhof reprezentas tiajn abstraktaĵojn, eĉ seksigitajn, per la neŭtra pronomo. La genro de *Fortune* en la franca lingvo eble instigis Beaufront al tiu korekto.

plu : jam (67, 7; 75, 30; 76, 29; 88, 27; 102, 30; 104, 31; 134, 2; 136, 21; 140, 30; 141, 21; 172, 11). En ĉiuj tiuj okazoj, *jam* estis uzata kun negacio. Tiel radikala korektado povas veni nur de Beaufront, ĉar Zamenhof daŭrigis ofte la uzadon de *jam . . . ne*. Ni devas tamen rimarki, ke de tiu ĉi tempo, li ankaŭ uzis *plu . . . ne* (kvankam en senco iom malsama: Vd *Lingvaj Respondoj*, 3a eld., pĝ 73).

juĝis : jugis (105, 3). La angla teksto parolas nur pri sklavigo, servutigo; nur la germana diras *unterjocht* (subjugis). La teksto kun *juĝis* estas apenaŭ komprenebla, kaj eble rezultas ne de korekto, sed de preseraro.

ŝia : sia (106, 27). Laŭ la konstanta uzo de Zamenhof, la refleksivo resendas al la subjekto de la lasta esprimita ago; do en:

helpu

Al ŝi en malfacila batalado

Kun sia propra korpo kaj animo

sia prezentas la subjekton de *batalado* (= dum ŝi batalas kun sia korpo kaj animo). Sed tion Beaufront ne komprenis aŭ akceptis, kaj, en sia *Commentaire sur la grammaire Esperanto*, li instruas, ke la refleksivo resendas al la gramatika subjekto de la propozicio (t. e. *vi* en la citita peco); jen kial li korektis la tekston de Zamenhof.

pendigilo: pendingo (145, 2/5/8/9). Beaufront opiniis *pendingo* mallogika vorto: efektive, ĝi devus havi la formon *pendigitingo* kaj, eĉ tiam, signifus nur la ŝnuron, ne la tutan aparaton; li sekve donas nur *pendigilo* sub la franca *potence*, en sia *Vocabulaire Français-Esperanto* de 1902. Male, Zamenhof plu uzadis la formon *pendingo*, ekz-e en sia *Wörterbuch Deutsch-Esperanto* de 1905 (sub *Galgen*), kaj en *La Rabistoj* (1908): eble ĝia koncizo kaj sonoro plaĉis al li, eble ankaŭ, kiel sugestis al mi s-ro Jervis, ĝia tono de «nigra humuro», ofte renkontebla en la naciaj lingvoj pri tiaj temoj kaj aparatoj.

Postnoto

La editoroj de la 17a reeldono de la *Fundamenta Krestomatio* provizis la Unuan Akton de *Hamleto* (pĝ 383-421) per 24 notoj, en kiuj ili proponas lingvajn korektojn: nur unu estas ĝusta (pĝ 419: «pri la apero de nuna nokto», kie la artikolo estus efektive pli bonstila: «de l' nuna nokto») — dum ili preteratentis, ke *Satiro* devus esti, laŭ la posta uzado de Zamenhof: *Satiruso* (pĝ 396). Korektan kaj ĝuste komentitan eldonon de *Hamleto* ~~mi~~ⁿ ankoraŭ atendas.

III. LA NOVA ELDONO DE LA *FUNDAMENTA KRESTOMATIO*

Grandan dankon la esperantistaro ŝuldas al la firmo, kiu prenis sur sin la reeldonon de tiu klasikaĵo. Efektive, pro bedaŭrindaj kaŭzoj, la Centra Librejo, kiu antaŭ la dua mondmilito eldonadis la verkaron de Zamenhof, ŝajne rezignis pri tiu tasko, kiun multaj rigardus devo, kaj lasis iom post iom elĉerpiĝi preskaŭ ĉiujn verkojn de nia Majstro; tiel, ke, en 1955, ĉe la Bolonja kongreso, kiu

celebris la 50an datrevenon de la Bulonja Deklaro kaj de la unuanima akcepto de la *Fundamento*, la kongresanoj eĉ ne povis havigi al si unu ekzempleron de tiu esenca libro. Almenaŭ ĉi tiun alian fundamentan libron ili povas de nun mendi, kaj ricevi.

Dua motivo por danko estas, ke tiu ĉi reeldono estis farita, ne nur kun lukso de papero kaj tipografio, sed ankaŭ kun zorgo pri praktika utilo. La *FK* konsistas ĉefe el kolekto da artikoloj aŭ artikoletoj, aperintaj inter 1889 kaj 1894 en «La Esperantisto», kaj plejparte Zamenhof lasis ilin en ilia originala formo, kune kun la malnoviĝintaj vortoj aŭ dirmanieroj: nur la pure gramatikajn erarojn li korektis. Estas do evidente, ke, post pli ol kvindek jaroj, oni ne povis reprodukti tian kompilaĵon sen komentoj kaj avertoj, se oni volis, ke ĝi konservu sian lingvan normigan karakteron. La eldonejo do komisiis la editoradon al William Bailey, kaj, post lia morto, al la heredinto de liaj laboriloj kaj vasta sliparo, akademiano W. J. Downes. La rezulton de ilia laboro detale recenzis Dro K. Ossaka en «La Revuo Orienta» (1955, pĝ 243-247), kaj mi mem en «Esperanto» (1955, pĝ 201-205). Sed ĉar temas pri tiel grava libro, oni pardonos, se mi ĉi tie rediskutos kelkajn metodajn punktojn.

I. La editorado de tia verko, por esti kompleta, devus prezenti duoblan karakteron, historian kaj lingvan. Nu, oni povas diri, ke la historia dokumentado preskaŭ tute mankas: ne nur oni ne indikas la daton de publikigo de ĉiu peco en «La Esperantisto», sed eĉ oni ne indikas, kiajn partojn verkis Zamenhof mem; kaj ĉar la listo de tiuj partoj estis donita de li mem, en poŝtkarto al Dro P. Corret (vd *OV*, pĝ 557), oni ne komprenas, kial tia grava informo estis preterlasita. Oni hazarde instruas nin, ke Nadson estas rusa poeto (pĝ 370); sed kiu estas S. Frug (pĝ 333), Vejnberg (345) kaj Boheme (361)? Kial ne klarigi (pĝ 253), ke «Unuel» estas la mallongigo de «Unu el ĉiuj», plej modesta el la pseŭdonimoj? Kaj ne estus superflue, en aldona noto, doni almenaŭ kelkajn informojn pri la kunlaborintoj de tiu *Krestomatio*, ilia nacio, ilia numero en la Jarlibro ktp (Enbe, pĝ 86, estas probable Nikolao Borovko).

II. Sed ankaŭ la lingva parto de la prinotado tute ignoras la historian vidpunkton. Evidente, eble ne estus interese, por la plimulto, detale indiki ĉiujn korektojn, kiujn Zamenhof faris super la originalajn artikolojn, aŭ poemojn. Sed fojfoje tiuj variantoj havas instruan valoron. Mi citos nur unu: en la unua eldono, la *Antaŭparolo* diris, ke «por ke ĉiuj povu uzi la lingvon egale, estas necese, ke ekzistu iaj *modeloj*, leĝdonaj por ĉiuj». En la sekvan-taj eldonoj, Zamenhof anstataŭigis «leĝdonaj» per «gvidaj»: tio klare signifas, ke, post la Bulonja Kongreso, estis leĝdona por Zamenhof nur la *Fundamento de Esperanto*, dum la *Krestomatio* perdis, en liaj okuloj, sian karakteron de decida dokumento; la kritika sinteno de Beaufront kontraŭ la *Krestomatio* probable ne estis senrilata kun tia opinioŝanĝo.

Io pli grava: kiam la editoro volas apogi sin sur historiaj do-kumentoj, li iafoje eraras. Pĝ 244, okaze de la frazo: *li ankoraŭ eĉ ne povis klare sin esprimi pri ia ideo de lingvo tutmonda*, li prinotas: «W. Bailey proponis, ke oni legu *sia*; tamen en fruaj eld-onoj de *Krestomatio* aperis *i a* —dise por emfazo— kaj tio ŝajnas tute prava». Tio eĉ ne estas ĝusta: en la unua eldono de la *Kres-tomatio* oni legas: «pri *sia* ideo de lingvo tutmonda», kaj la *ia* de la postaj eldonoj venas simple de la elfalo de la unua litero ko-mence de la linio!

Pĝ 308, je la unua verso de la *Kanto de Studentoj*, ni legas note, ke «W. Bailey volis plibonigi la unuajn liniojn de la strofoj, alĝustigante ilin al la vera ritmo de *Gaudeamus igitur*». Kaj la nova editoro proponas al ni legi la unuan version de ĉiu strofo jene:

1. Ĝoju, fratoj, ĝoju ni...
2. Vivo nia kuras for
3. Kie gent' de antaŭ ni
4. Vivu la Akademi'
5. Vivu, floru nia land'
6. Junulinoj, glor' al vi
7. Kuru la malĝojo for

Nu, se li estus foliuminta la *Originalan Verkaron*, pĝ 563, li tie vidus, ke la novan formon de tiuj sep versoj donis Zamenhof mem, por «akordigi (tiun) versaĵon ... kun la tradicia melodio»!

III. Samo okazas ĉe la leksikologiaj rimarkoj. Pĝ 206 noto instruas nin (kaj oni ripetas ĝin tutan sur la sekvanta paĝo!), ke *kurso* havas nur du sencojn (1° ‘serio da lecionoj’; 2° ‘takso por interŝanĝo de objektoj’) kaj sekve ne povas havi la signifon de ‘vojlinio’: nu, tiu vorto estis oficialigita en la *Unua Aldono* ĝuste sur la bazo de tiu ĝia uzo en la *FK*, do kun la senco ĉi-tie kondamnita! La franca, angla, germana kaj rusa tradukoj enhavas efektive tiun signifon, kaj Zamenhof plu uzis ĝin en tiu sama senco sur la pĝ 255 (kie ĝi estas mise glosita ‘kuradis’ anstataŭ ‘cirkulis’). Estas do klare, ke *kurso* signifas unue ‘vojlinio’ (kaj cetere ĝi estas, por tiu signifo, nete preferinda al la monstra *raŭto*, proponita en la *Fervoja Terminaro*).

Pĝ 61 kaj en multaj aliaj lokoj, la arĥaismo *instruitulo* estas klarigita kiel ‘instruito’ (aŭ ‘klerulo’), dum Zamenhof mem anstataŭigis ĝin per *scienculo* en sia korektado de *La Ombro* (*Fabeloj de Andersen*, II, 134). Cetere, la arĥaismoj *semita*, *Mandarina* (pĝ 182), *rilate* (241), *Satiro* (396) ne estas klarigitaj per siaj nunaj tradukoj: *semida*, *mandarena*, *relative*, *Satiruso*. Ĉio, kio pravas ne sufiĉan atenton al la historio de nia lingvo.

IV. La sintaksaj notoj ankaŭ ne estas senriproĉaj. Eĉ, sur tiu ĉi tereno mi eksentis plej grandan miron: kiel do estis eble, ke du akademianoj, unuigante siajn fortojn, ne kapablis kompreni kelkajn kutimajn dirmanierojn de Zamenhof? Sur la paĝoj 33-34, ni legas, en la rakonto pri la junaj marfeinoj: «La tutan tagon ili povis ludi en la palaco, en la grandaj salonoj, kie vivaj floroj elkreskadis el la muroj. La grandaj sukcesaj fenestroj estis malfermataj, kaj tiam la fiŝoj ennaĝadis al ili...» Evidente la senco estas, ke ĉiutage, kutime, ripete, oni malfermadis la fenestrojn, kaj en tiu tempo, sed ne en la nokto, la fiŝoj ennaĝadis; *estis malfermataj* estas imperfekta preterito kun ripeta aspekto. Nu, tiun tre simplan frazon la komentintoj ne komprenis: ili diras al ni, en la noto 1a: «Legu *malfermitaj*». Kaj ili klarigas: «oni ne estis malfermanta la fenestrojn; ili estis jam malfermitaj». Kaj al tiu unua kontraŭseno ili aldonas duan en la noto 2a: «*tial* ŝajnas preferinda» al la originala *tiam* — preferinda, se oni ne komprenis, ke *tiam* kontrastas al la nokta tempo, kiam la fenestroj estas ~~mal~~fermitaj.

La saman strangan nescion pri la ripeta valoro de la *at-parti-*cipo montras la notoj 3a sur la pĝ 146, 6a sur la pĝ 148 kaj 1a sur la pĝ 181: la du lastaj ekzemploj prezentas la formon *esti perme-*sate, kiu esprimas ĝeneralan, ĉiam validan permeson, kaj ne unu okazan, en la tempo difinitan, kiun oni ja esprimus per *esti perme-*site. Se la komentintoj estus komparintaj jenajn du frazojn de Zamenhof en *Marta*:

Ni sopiras ĝis tiu momento, kiam estos al ni permesite [...] turniĝi al tiu [...] Adoniso (pĝ 2),

Ŝi ne sciiĝ, [...] ke, kio estas permesata al Jupitero, ne estas permesata al bovo (pĝ 34),

kaj legintaj nian komenton en la *Plena Gramatiko*, 2a eld., § 241 (aŭ 3a eld., 113), ili ne konfuzus tiujn du okazojn. Se oni volas prilumi al aliaj, oni unue eklumigu sian lanternon.

V. Sed eble la plej grava difekto de la lingva prinotado estas, ke ĝi plurloke ne konformiĝas kun la principoj deklaritaj en la antaŭparolo. Ni legas tie, el la plumo de pastro Downes: «Oni do povas juste supozi, ke, se la Majstro estus povinta vivi pluajn jarojn, li estus kaptinta la unuan okazon fari elfundan revizion de *FK*, por akordigi ĝian stilon kun la vere matura stilo, kiun li tiam uzis» (pĝ XIII); kaj iom pli sube: «La unuanima opinio estis . . . , ke oni indiku per piednotoj la ŝanĝojn, kiujn Zamenhof mem plejeble aprobus» (pĝ XIV). Tiuj linioj klare difinas taskon precizan kaj sufiĉe facile plenumeblan. Sed la editoroj bedaŭrinde ne limigis sin je tio: ili plurfoje prezentis en la piednotoj ŝanĝojn (pri la loko de *ne*, de *nur*, pri *estas* kape de frazo, pri *unu fojon* ktp), kiuj tute ne apartenas al la stilo, eĉ matura, de Zamenhof, kaj kiuj montras nur la personajn gustojn de la editoroj. Eĉ, kiam ili apogas sin sur teksto de Zamenhof, ili (precipe W. Bailey) interpretas ĝin kun sennuanca mekanikeco; ĉar Zamenhof skribis, ke «pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi la ‘ĉi’ antaŭ la montra vorto», ili simple forgesas la «ordinare», kaj perforte modifas eĉ versojn por antaŭenigi tiun malbenindan *ĉi*; ĉar li skribis, ke «estas diferenco inter ‘multaj homoj’ kaj ‘multe da homoj’: ‘multaj homoj’ = *diversaj*

homoj (ĉiu aparte); 'multe da homoj' = granda nombro da homoj (kune)» — ili ne rimarkas, ke tiu opinio eldirita en 1893 suferis de tiam tiun modifon, ke, se Zamenhof kaj la aliaj bonaj stilistoj konservis ja la nuancon de *multe da*, ili aliflanke uzadis indifere *multaj* por ambaŭ signifoj, tiel, ke la konstanta korektado de *multaj* aŭ *kelkaj* per *multe da* aŭ *kelke da*, estas efektive arĥaisma manio. Same erara estas ilia opinio, ke Zamenhof rezervis *pro* por esprimi la motiven kaj uzis nur *de* por la kaŭzo: oni povus citi dekojn da frazoj el *Marta* aŭ el la *Fabeloj*, en kiuj *pro* esprimas ĝuste la kaŭzon.

Kompreneble, ĉiu el ni rajtas havi kaj libere esprimi lingvajn preferojn; sed enkonduki ilin, eĉ piednote, en eldonon de unu fundamenta dokumento, tio estas kovri ilin per ia oficialeco, kaj kvazaŭ (pro la averto en la antaŭparolo, kiun mi ĉi-supre citis) atribui ilin al Zamenhof mem. Tia agmaniero estas ne nur grava scienca mispaŝo, sed ja rekta peko kontraŭ la interesoj de la movado. Ĉar en tiu verko, kiu devas servi al ĉiuj kiel modelo de la bona stilo Esperanta, oni ne rajtas enmeti aferojn, pri kiuj konsentas ne ĉiuj esperantaj verkistoj. La sola tereno, sur kiu oni povis firme stari, timante nenian ajn kontraŭdiron aŭ kritikon, estis la historie konata, de ĉiuj kontrolebla stiluzado de Zamenhof. Pri kelkaj punktoj ja la hodiaŭa uzado ŝajnas deflankiĝi de la zamenhofa: sed tiuj hodiaŭaj dirmanieroj eble ne estas tiel ĝeneralaj, nek tiel definitive alprenitaj, kiel povas unuavide ŝajni, se oni iom vaste legadas kaj diskutadas. Kaj aliflanke, oni neniam devas forgesi, ke, eĉ se unu zamenhofa lingvaĵo fariĝis ekstermoda, ĝi tamen konservas sian valoron kaj intereson, ĉar Zamenhof estis ne nur la elpensinto de Esperanto, sed ĝia plej kompetenta stilisto, kaj, verdire, ĝia sola klasikulo. Tial liaj solvoj estas la solaj, kiujn oni rajtis enlasi en la prinotadon de tia klasikaĵo, la solaj, pri kiuj, pro ilia jam historia karaktero, ne povas estiĝi malkonsentoj kaj diskutoj — kion eviti estis ĝuste la celo de la kompilinto de tiu *Krestomatio*!

IV. ĈU ESTAS FIDINDA LA TEKSTO DE LA ORIGINALA VERKARO?

Kvankam multaj opinias, ke nenio estas pli facila, ol kopii tekston, la fakuloj scias, kiom da eraroj povas enŝoviĝi, okaze de la transskribo kaj de la presado. Dum mia kompilado de la *Leteroj de Zamenhof*, mi havis ofte la okazon kompari la originalajn tekstojn de Zamenhof kun ilia transskribo en la *Originala Verkaro*, editorita de Dro Dietterle, kaj mi konstatis, ke en nemalmultaj lokoj ili kelke diferencas. Mi citos nun nur unu ekzemplon.

En la dua volumo de la *Leteroj*, pĝ 301, mi menciis leteron al Boirac, publikigitan en *OV*, pĝ 575, kaj citis el ĝi la sep unuajn liniojn laŭ la teksto de Dietterle. Nu, de tiam s-ro Warnier havis la komplezon komuniki al mi la originalon de tiu letero, kiun li retrovis en la arĥivoj de la iama Centra Oficejo. Ĝi tekstas:

D-ro L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika N^o 9.

15 / XII 11.

Kara Rektoro!

Antaŭ unu monato mi sendis por la Oficiala Gazeto kelkajn «Respondojn», kaj inter ili estis unu, kiu koncernas la Lingvan Komitaton. Mi petis tiam s-ron Chavet, ke li sendu la tekston de tiu respondo al Vi kaj ke li presigu ĝin nur en tia okazo, se Vi ĝin aprobos. Ĉar mi ĝis nun ne scias ankoraŭ Vian opinion pri tiu «Respondo», tial mi nun skribas al Vi aparte.

Laŭ mia opinio estus tre utile, se Vi donus al ĉiuj komitatanoj ian laboron:

a) tiam oni ĉesus plendi, ke la L. Komitato nenion faros kaj ke la titolo de Komitatano estas nur titolo honora, kiu elvokas konstantan envion kaj atakadon;

b) la forto de la 200 kompetentuloj, kiuj nun neniun faras, estus utile eluzata por nia afero (se 200 kompetentaj personoj laboros, ili povas ja alporti al nia afero grandegajn servojn!)

Se iu komitatano ne plenumus sian taskon, oni povus eksigi lin. Tiam ni ne havus tiun «malvivon korpon», kiu al ĉiu pikas la okulojn kaj estas kaŭzo de konstanta ironiado; tiam ni ne havus

tiajn faktojn, ke ekzemple iu laboras kontraŭ Esperanto kaj absolute nenion faras por Esperanto kaj tamen li estas membro de nia Lingva Komitato! (kiel ekzemple s-ro Kofman).

Ŝajnas al mi, ke estus plej bone komisi al la komitatanoj krei provizoran Vortaregon kaj difini por ĉiu lian parton en la komuna tasko. Ducent laborantaj kompetentuloj povus plenumi tiun taskon en plej mallonga tempo kaj la rezultato estus efektive gravega. Kia estas Via opinio pri tio?

Via L. ZAMENHOF

Tio estas simpla kopio de tiu letero. La editoro devus kompreneble fari kelkajn ŝanĝojn, por forigi la plumerarojn ŝulditajn al la rapideco de la skribo: la du vortgrupoj *nenion faros* kaj *neniun faras* devas ambaŭ esti korektitaj al *nenion faras*, kaj la erara formo indikita piednote; li devas krome noti, ke, en la antaŭlasta frazo, la verbo *plenumi* anstataŭas unu *fini* forstrekitan. Sed jen limiĝas la devoj de editoro.

Nu, en tiu nelonga teksto, Dro Dietterle, aŭ la persono, kiu kopiis por li la tekston, faris naŭ legerarojn: inter ili kelkaj estas eĉ neklarigeblaj: kial *Sinjoro* anst. *Rektoro*, *efike* anst. *utile*, *en ia okazo* anst. *en tia okazo*? Aliajn kaŭzis nekonado de la zamenhofa skribformo: *plenumas* ... *povas* anst. *plenumus* ... *povus* devenas de la simileco inter la manskribitaj *a* kaj *u* en liaj leteroj. Aliajn inspiris probable pli malpli konscia deziro korekti la lingvon de Zamenhof: *koncernis* anst. *koncernas*, *se vi ĝin aprobas* anst. *se vi ĝin aprobos*, *Du cent* anst. *Ducent*: tiuj tri korektoj supozigas al mi, ke la kopiinto estis Franco, ĉar li tie sekvis la kutimojn de sia lingvo.

Mi ne kalkulis kiel erarojn —fakte ili estas preteratentaĵoj— la minusklan skribon de *Vi*, kies majuskligo karakterizas la tutan korespondon de Z, la forlason de la substreko en la kvar lokoj, kaj la forgeson de la mallongigo *L.* antaŭ *Komitato*. Fine la forigo de la nomo de Kofman, kiu en 1929, dato de la publikigo de Dietterle, estis ja konata «occidentalista», do jam forlasinto de Ido, havis nenian pravigon.

Mi bone komprenas, ke Dro Dietterle ne povis, en ĉiuj okazoj, havigi al si la originalojn de la leteroj: sed tiam la devo de

konscienca editoro estas indiki, ke la tekston li reproduktas el kopio, ne el la originalo.

Bedaŭrinde, ni ne ĉiam havas rimedon por kontroli evidente eraran tekston. Oni povas nur konstati, ekzemple, ke la unua strofo de la poemo *Pluvo* (OV, pĝ 591) estas difektita, kaj estis jam tia en la kataluna revuo, kiu ĝin publikigis en 1909. La ceteraj strofoj konsistas nome el versoj de, alterne, kvar kaj tri anapestoj, kun ĉiam ina finaĵo:

*Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
Murmurado penetras mistera,
Mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
Kion diras la voĉo aera.*

Male la unua strofo tekstas:

*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
Senĉese, senfine, senhalte,
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
Are gutoj frapiĝas resalte.*

Evidente mankas, en la unua verso, komence, du silaboj kaj en la dua, unu komenca; krome la tria verso devus finiĝi per senakcenta silabo. Mi volonte supozus, ke la originalo estis:

*Kiel pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
Senĉesiĝe, senfine, senhalte!
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la tero
Are gutoj frapiĝas resalte.*

Sed tio restas hipotezo, ĝis oni retrovos la originalon, aŭ pli fidelan tekston — kion mi dubas.

La lingvistoj, kiuj volas studi la stilon de Z, devus antaŭ ĉio zorge kontroli la tekstojn, kiujn ili uzas; kaj en la okazoj, kie tiu kontrolo estas neebla, estas konsilinde meti demandopunkton antaŭ la formoj, kiuj nete kaj forte devias de la kutima Z-a stilo.¹

¹ Utilan liston de diversaj preseraroj en OV publikigis, en «The British Esperantist» (Julio 1957), unu el niaj plej kompetentaj esperantologoj, s-ro D. B. Gregor. Aldonu almenaŭ jenan: pĝ 47/-13: esprimata *igu* esprimita!

V. LA BIBLIA MALNOVA TESTAMENTO

La editorado de la *Malnova Testamento* metis tre multajn kaj malfacilajn demandojn. La manuskripto (tajpita), kiun Zamenhof transdonis al la Angla Biblia Komitato, prezentis ne perfektan tradukon, ĉefe el du kaŭzoj: unue, la kondiĉoj, ĉe kiuj Zamenhof faris la laboron; due, la maniero, kiel li komprenis sian taskon.

Oni eble memoras, ke li komencis traduki la *Predikanton* (1907), poste la *Psalmaron* (1908), poste la *Sentencojn de Salomono* (1909). En tiu tempo fondiĝis Esperantista Biblia Komitato, kiu devis preni sur sin la tradukadon de la tuta Biblio. Sed ĉar post unu jaro montriĝis, ke la afero ne progresas, Zamenhof, kun la konsento de la Komitato, entreprenis sisteman tradukon de la *Malnova Testamento*, el kiu la *Pentateŭko* aperis ĉe Hachette inter 1911 kaj 1914. Sed la traduko mem estis probable multe pli progresinta, ĉar, jam la 3an de Marto 1915, li sciigis al pastro Rust, ke «l'Ancien Testament est déjà en entier traduit (et écrit à la machine)».¹ Oni devas prezenti al si, kia estis la vivo de Zamenhof dum tiuj ok jaroj: dediĉante siajn tagojn al la okulista praktikado, li dividis la vesperajn kaj la noktajn horojn inter tiu grandega entrepreno, la vasta korespondado, kiun li daŭrigis kun Sébert, Bourlet kaj multaj aliaj samideanoj (se ne paroli pri siaj familianoj), kaj la mil zorgoj, kiujn kaŭzis al li la diskutoj inter esperantistoj kaj la bataloj inter la nacioj. Oni tiam komprenos, kial la stilo ne estas egala en la *Psalmaro* ekzemple kaj en la *Profetoj*, ĉar, se kun la tempo li elfaris al si ian biblian esprimaron, li ne havis sufiĉe da tempo por revizii la unue tradukitajn pecojn kaj unukolorigi la tutaĵon. Al multaj problemoj li donis fine solvon alian ol komence: en la *Psalmoj* li skribas ekz-e *Adamo, Dio*; en la *Genezo*: *Adam, la Eternulo* ktp. Krome la paralelaj lokoj ne estis tradukitaj ĉiam per la samaj vortoj: la popolo estis *malliberigita* en la *Psalmoj*, sed *forkaptita* en *Jesaja* ktp.

¹ Pro la cenzuro milita, li devis skribi franglingve: «la Malnova Testamento estas jam tradukita en tuteco (kaj tajpita)» (OV, pĝ 472).

Aliflanke, la Biblion li tradukis «ne kiel verkon *religian*, sed kiel gravegan verkon de la homara *literaturo*». Li celis atingi, per sia traduko, la amatorajn sciemulojn kaj la literaturistojn (vidu lian *Antaŭparolon* al la *Genezo*, punktoj 3° kaj 4°). Por tia celo, ekzakteco scienca kaj ekzegeza estis superflua: la grava estis liveri verkon bonstilan kaj interese legeblan, sekve traduki flue kaj verve. Al tiu labormetodo helpis ankaŭ la maniero, kiel Z scipovis la hebrea lingvon. Mi ie esprimis mian miron, ke al la Kainido Jubal Zamenhof atribuis la ludadon de «violono kaj fluto», iom modernaj instrumentoj por tiuj prauloj. Prof. J. Kohen-Cedek klarigis al unu nia komuna kolego, F. R. Banham, ke la instruistoj de la hebrea, en la slavaj tiamaj komunumoj, celis ne tiom akcenti la antikvan koloron, la pitoreskajn apartaĵojn, kiom sentigi la lingvon ankoraŭ vivanta, do nuntempigi, alhejmigi la malnovajn tekstojn al la moderna vivo: tiel ili interpretis *kinnōr* per *violono*, *‘ugābh* per *fluto*, *šōšannah* per *rozo* ktp, kvankam, science, temas pri specoj, respektive, de harpo, de ŝalmo kaj de anemono. Ne mirinde, ke traduko farita kun tiaj celoj kaj en tia atmosfero ne povus sensaŝe servi al sciencistoj aŭ al teologoj. Zamenhof tre bone tion konsciis, kaj tial, jam en sia *Antaŭparolo* al la *Psalmaro*, antaŭvidis, ke lia verko devos esti «korektita laŭ la montroj de la Biblia sekcio».

Tiun pezan, temporaban kaj fortolacigan taskon prenis sur sin la dum- kaj postmilita Biblia Komitato: ĝi konsistis, kiom mi scias, el kvin personoj; inter ili tri pastroj zorgis pri la kongrueco kun la angla *Revised Version*, kaj du aliaj personoj, J. M. Warden kaj W. Bailey, pri la egaligo kaj unuformigo de la stilo kaj de la lingvo. Tiun laboron, des pli meritoplenan, ke ĝi estis senglora, ili ĉiuj faris kun ega skrupulo: ŝanĝinte, laŭ la bezonoj de la interpretado, la sencon aŭ la vortojn, ili respektis la zamenhofan sintakson kaj stilon tiom, kiom estis eble en tiaj kondiĉoj.

Tiu respekto riskas nun suferi strangajn atencojn. En la tria represo (1956), la nova editoro, pastro W. J. Downes, akademiano, korektis «preserarojn», kies listo estis publikigita en «Kristana Alvoko» kaj en «The British Esperantist» (Januaro 1957). Inter tiuj «preseraroj», almenaŭ ses prezentas efektive lingvajn korektojn:

1. En du lokoj, la editoro korektis *por* al *pro*:

Beniĝos per via idaro ĉiuj popoloj de la tero, por tio, ke vi obeis Mian voĉon (Gen. 22, 18).

Se Vi punas homon por lia krimo ... (Ps. 39, 11).

Nu, se li estus konsultinta la Hachette-ajn eldonojn, li estus vidinta, ke ne temis pri preseraroj; kaj se li estus komparinta kun aliaj lokoj, ekz-e:

La Eternulo rigardu vin kaj juĝu vin por tio, ke vi malbonodorigis nian odoron (El. 5,21)

aŭ kun la preskaŭ konstanta uzado de *por* post la verboj *danki*, *rekompenci* ktp, li konkludus, ke Zamenhof uzadis *por* kun la senco ne nur de *celo*, sed ankaŭ de efektiva aŭ metafora *interŝanĝo*: la beno, la puno ktp estas donataj kvazaŭ interŝanĝe de la obeado, de la krimo ktp.

2. En du aliaj lokoj, la editoro korektis *sia* al *via*:

Vi, kiu per Sia dekstra mano helpas la fidantojn! (Ps. 17, 7);

Ho Sinjoro, nia Dio, kiu elkondukis Sian popolon el la lando Egipta (Dan. 9, 15).

Nu, se li estus komparinta kun aliaj lokoj, ekz-e:

Regno de homoj, kiu apartenas ... al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi!» (OV pĝ 393); aŭ:

Vi, kiu fortigas montojn per Sia forto (Ps. 65, 6)

li konkludus, ke Zamenhof kutime rigardas la rilativon *kiu* kiel triapersona, analoge al *ĉiu*, *iu* kaj *neniu*.¹

¹ Mi aldonu, por anticipe nin ŝirmi de pliaj korektoj, ke ankaŭ la apozicion, eĉ al duapersona pronomo, Zamenhof rigardas kutime triapersona:

Aŭskultu Min, vi, kiuj konas la veron, popolo havanta Mian instruon en sia koro! (Jes. 51, 7);

Ĉu nun estos paco, ho Zimri, mortiginto de sia sinjoro? (II Reg. 9, 31).

En ambaŭ okazoj, ni havas simple la aplikon de tiu principo pri memstarigo de la frazelementoj, kiun mi provis klarigi ĉi-supre, pĝ 126 k. s.

3. Fine en du lokoj, la editoro korektis kondicionalon en indikativon aŭ volitivon:

Ĉar ne estis domo, en kiu ne estus mortinto (El. 12, 30).

Parolu, ĉar mi dezirus, ke vi montriĝus prava (Ijob, 33, 32).

Nu, se li estus konsultinta la *Plenan Gramatikon* (2a eld., § 367a) aŭ la bonegajn *Lingvaj Notoj pri la Malnova Testamento*, kiujn s-ro M. C. Butler publikigis en «Kristana Revuo» (1930-31), li konstatus, ke, en la unua okazo, temas pri tute regula uzado de la us-modo en epiteta rilatpropozicio, kiam la ĉefa propozicio estas demanda aŭ nea: kaj tio estas logika sistemo, ĉar oni ne emas aserti ion pri io, kio ne ekzistas.

Pri la dua ekzemplo, li vidus, el la samaj *Lingvaj Notoj*, ke probable enestas preseraro, sed ne tie, kie li korektis. La teksto, liverita al s-ro Butler de W. Bailey, estas ja: «ĉar mi deziras, ke vi montriĝus prava» — kio estas iom eksterordinara uzo de us-modo post verbo de volo, sed kiu klariĝas per tio, ke la necerteco de la pravo estas iel pli forta, pli atentinda, ol la voleco de la deziro.¹

Ke pastro Downes ne funde scias la zamenhofan lingvon kaj ĝin fojfoje miskomprenas, tion ni jam konstatis ĉe lia editorado de la *Fundamenta Krestomatio*. Ja tio estas pardonebla manko, eĉ en la persono de akademiano, kaj oni povus simple bedaŭri malbonan ŝancon de The Esperanto Publishing Co en sia elekto de editoro. *Errare humanum est*, sendube, sed... (ĝin mi apenaŭ kuraĝas citi, en la nuna cirkonstanco)... *perseverare diabolicum*. Efektive, p-ro Downes ŝajne ne rigardas sian nescion kiel motivaĵon de sindeteno, tute male.

En respondo al la prava rimarkigo, kiun s-ro D. B. Gregor faris al li pri la du lastaj ĉi-supraj korektoj,² p-ro Downes respondis (en la junia numero de la sama gazeto) per jena deklaro:

«Mi konsentas, ke ĉi tie ne temas pri preseraroj; tamen mi

¹ Cetere, inter la korektoj faritaj en la *Nova Testamento* je la sama okazo, ankaŭ unu almenaŭ kontraŭas la zamenhofan uzadon: en *Gal. 2,21*: «mi ne vantigas la gracon» ne estas preseraro anst. «vanigas». Komparu nur la faman: *Vantaĵo de vantaĵoj!* — kaj ne: *Vanaĵo!*

² Vidu «The British Esperantish», Marto 1957.

restas firma en mia opinio, ke en ambaŭ lokoj la ĝusta formo estas *estis*, ĉar en la koncernaj frazoj troviĝas nenia gramatika pravigo por la kondicionalo. La fakto, ke tiu aŭ alia nacia lingvo havas idiotismon uzi kondicionalon post negativa pronomo aŭ adverbo — ankaŭ la fakto, ke kelkaj frutempaj Esperantistoj imitis (kaj kelkaj nuntempaj Esperantistoj imitas) tiun idiotismon — tute ne estas decidiga por iu suspektinda gramatika formo. Esperanto devus ne havi iajn idiotismojn; kaj la Biblio, kiu estas atente studata de miloj da samideanoj kiel vera modelo pri gramatiko kaj stilo, des pli devus ne havi idiotismojn. [...] Efektive, la koncernaj ŝanĝoj ne starigas la demandon, ĝis kia grado ni rajtas tuŝi arkaikaĵojn en la malnova literaturo, ĉar la Biblio ne estas en tiu kategorio. La Biblia Komitato faris tre multajn ŝanĝojn en la Zamenhofa manuskripto (laŭ permeso de la Majstro mem), kaj la kompleta Biblio eldoniĝis unuafoje en 1926. Ĝi do ne estas 'malnova'. Plie, la Biblio devus esti tiel lingve perfekta, kiel eble. Rilate siajn *vortojn* ĝi ne estas netuŝeble sanktega, kaj Zamenhof mem deziris, ke kompetentuloj laboru super ĝi, por forigi el ĝi ĉiujn neĝustajn aŭ nebonajn formojn». Tiajn eksterordinare danĝerajn opiniojn oni ne povas lasi senrespondaj.

1° P-ro Downes ŝajne konfuzas tute malsamajn specojn de korektoj. Zamenhof efektive skribis, ke li lasas al «ekleziuloj-specialistoj» la rajton korekti la sencajn «erarojn», se ili volas aperigi tradukon dediĉitan al «celoj pure religiaj» (vidu: *OV*, pĝ 49) — li absolute neniam kaj nenie donis la permeson ŝanĝi la *lingvon* kaj la *stilon* laŭ la personaj ideoj de la Bibli-komitatanoj. Lia zorgo pri tiu ĉi punkto evidentiĝas el la fakto, ke li eĉ ne volis uzi la jam faritajn partajn tradukojn kaj ĉion refaris mem: «Afin que l'œuvre entière ait partout un style égal, j'ai tout traduit *moi-même*. Ce n'est que pour les livres *Chant de Salomon* et *Ruth* que je me suis servi des travaux [*tiel*!] de M. Fred, tout en y faisant des corrections nécessaires».¹ Kaj tion tre bone komprenis la

¹ Letero al p-ro J. C. Rust, *OV*, pĝ 472: «Por ke la tuta verko havu ĉie stilon egalan, *mi mem* tradukis ĉion. Nur por la libroj *Alta Kanto de Salomono* kaj *Rut* mi faris uzon el la laboroj de s-ro Fred, tamen farante en ili la necesajn korektojn».

Komitatanoj, kiuj tenis sin, tute lojale, en la limoj difinitaj per tia kontrakto. Ĉar tio estas ja afero de intelekta lojaleco. Se vi prezentas al la publiko la *Malnovan Testamenton* «el la hebrea originalo tradukitan de L. L. Zamenhof», vi ne rajtas liveri, sub lia nomo, fremdajn al li dirmanierojn, eĉ se tiuj ricevis la benon de p-ro Downes.

2° P-ro Downes ŝajne ne vidas, ke li eniris vojon, kiu povus konduki al strangaj aventuroj. Hodiaŭ li korektas, kiel «idiotismon» kaj «suspektindaĵon» la zamenhofan uzadon de la kondicionalo: kio do garantias al ni, simplaj samideanoj, ke, ĉe la kvara represio, li ne opinios same kondamninda la zamenhofan uzadon de tiu aŭ alia formo, de la participoj, ekzemple, aŭ de la subjunkcioj ktp? Pretekste de korektado de «preseraroj», ni povos ricevi unu tagon — eble de manoj ankoraŭ malpli singardemaj, ol la liaj — kaj ĉiam sub la nomo de Zamenhof, tekston funde malfidelan al la tradicio de nia Majstro, kaj eble eĉ de Esperanto. Kiel diras la Ĉinoj: «Milmejla vojo komenciĝas per unu paŝo».

3° Konfesinde, la *Biblio* ne estas «malnova» teksto — almenaŭ en nia literaturo. Sed ĉu tio signifas, ke ĝi ricevu malpli da respekto? Ĝi prezentas, por la Hebreoj kaj la Kristanoj, fundamentan libron, por la ceteraj homoj gravan kolekton da historiaj, moralaj kaj poeziaj verkoj: la intereso de tiuj du homaj grupoj povas esti tre malsamaj — sed sur tiu ĉi kampo ili plene akordas, ke la konstanteco, la stabileco estas la plej dezirinda eco de bona traduko biblia. Egale ĉu por uzado en la religiaj ritoj, aŭ por inspirfonto en la literaturaj medioj, estus tre maloportune, se oni estus kondukita al, ekzemple, citado de la sama peco sub diversaj formoj, se oni komencus diskuti pri la gramatika ĝusteco de tiu aŭ alia frazo, se, unuvorte, oni ekfarus el ĝi batalkampon por lingvaj teorioj: ĉu oni ne vidas, kiom tia necerteco deprenus de la edifa aŭ poezia valoro de ĝi citita aŭ aludita grava teksto?

Nu, por eviti tiajn maloportunaĵojn, ni disponas unu rimedon, kaj nur unu: teni nin firme al la lingvo-uzo de Zamenhof. Tio estas la sola nediskutebla fakto, pri kiu ĉiuj konsentas. Ni, persone, povas opinii tiun aŭ alian apartaĵon de tiu lingvo-uzo kritikinda aŭ neimitinda; ni tute prave rajtas uzi alian en nia parolado kaj skribado. Sed ĉe tiel bela kaj ampleksa traduko, kian Zamenhof

donis al ni el originalo, en kiu li rekonis kaj ame flegis la heredaĵojn de sia raso, ni ne altrudu al tiu granda artaĵo niajn etajn personajn preferojn: ni konservu al ĝi la netuŝeblecon, se ne de fundamento, almenaŭ de tutmonda ĉefverko.

POSTRIMARKIGOJ

Ĉu, anstataŭ flati al si, ke oni plibonigos la stilon de Zamenhof, ne estus pli prudente alporti al la teksto kelkajn sencajn korektojn?

En I. *Reg.* 7, 21 la traduko *salono* estas malĝusta: palaco povas havi salonon, templo ne. Oni devus uzi la saman vorton, kiun oni trovas en analoga loko, *Jeĥezkel* 40, 8, kie la hebrea *'ulam* estas tradukita per *portiko*.

En II. *Kron.* 6, 41, la traduko *arkeo* estas fakta eraro: temas ne pri la *arkeo* de Noa, sed pri la *kesto* de Interligo!

En *Sent.* 30, 19, la traduko *virgulino* estas nedefendebla: la originalo havas ne *betulā* 'virgulino', sed *'almā* 'juna virino', kaj la ĉirkaŭteksto —ĉu oni interpretas la nekompreneblaĵon kiel la misteron de la embriiĝado aŭ kiel la nepruveblecon de la adultado— trudas la sencon 'junulino'.

En *Jes.* 7, 14, per la sama okazo, oni povus ankaŭ ĝustigi la saman konfuzon, kaj anstataŭigi *virgulino* per *junulino*, kiel finfine faris la plej moderna katolika traduko (de la Jerusalemaj dominkanoj) kaj kiel bone klarigis D. B. Gregor (*La esperanta traduko de la Malnova Testamento*, n° 510).

En *Jes.* 53, 12, ĉu estas certe, ke la manuskripto donas la leĝon *li*? La frazo ŝajne trudas la refleksivon: ... *li elmetis sian animon al la morto kaj estis alkalkulita al krimuloj, dum li portis sur <si> la pekon de multaj...*

En *Jer.* 2, 13: *Min ili forlasis, la fonton de viva akvo, por elhaki al si putojn, truhavajn putojn, kiuj ne povas teni la akvon*, enestas evidenta mistraduko: la hebrea vorto *bor* signifas aŭ 'puto' aŭ 'cisterno' aŭ 'fosajo', kaj la ĉi tie elektota vorto ne povas esti alia ol 'cisterno'; nur al cisterno oni povas riproĉi «ne teni la akvon». Tiu sama eraro cetere okazis kaj estis konstante konservata en la modernaj tradukoj de la orienta fablo pri la kapro kaj la

vulpo (vidu, ekz-e *Ezopa Saĝo*, pĝ 91): en «puton» kapro povus fali, rompante al si la krurojn, sed ne «salti»; la besta komedio estas komprenebla nur, se temas pri larĝa kaj malprofunda cisterno.

En *Jeĥezkel* 14, 14 kaj 20, kaj 28, 3, la nomo *Daniel* devus esti *Danel*: ne temas pri la profeto, sed pri la antikva justulo, kiun celebras la fenicaj poemoj de Ras-Ŝamra.

En *Daniel* 5, 25, estas nenia kaŭzo konservi en la hebrea formo la konjunkcion *kaj*, kio igas nerekonebla la surskribon (v. 25) kaj ĝian klarigon (v. 28): oni do legu: MENE, TEKEL kaj FARSIN anstataŭ UFARSIN!

Kaj, ĉar la komenco de nia diskuto estis la preseraroj, ni finu ĝin per cito de kelkaj:

Ijob 11, 6: *forton* estas malpli konvena, ol *formon*, laŭ la originalo.

Ps. 50, 4: oni legu: *li vokas la ĉielon de supre* (laŭ la Hachette-a eldono);

Jer. 3, 20: *perfidas* estas pli ĝusta, ol *perfidis*;

Jeĥ. 27, 7: same *tia*, ol *tio*;

Fine en *Jeĥ.* 40, 3: W. Bailey jam indikis al mi la ankoraŭ ne faritan korekton: *Li venigis min* (kaj ne: *Min!*).

VI. LA NOVA TESTAMENTO

La demando pri la korektado estas ĉi tie multe malpli delikata, ĉar ne temas pri zamenhofa teksto, sed pri kolektiva verko, kiu, laŭ la sciigoj alportitaj de p-ro Downes, ankoraŭ ne kontentigis la Biblian Komitaton, kiam ili presigis ĝin en 1926. La Komitatanoj disponis efektive tradukon faritan de pluraj anglaj pastroj kaj jam eldonitan en 1912 kaj represitan en 1913: sed ili deziris egaligi ties stilon kun tiu de la *Malnova Testamento*, kaj doni al la tuto ian lingvan unukolorecon. Tiun taskon ili ne povis sufiĉe funde plenumi, pro manko de tempo. Se, kiel skribas p-ro Downes, ekzistas

teksto plibonigita de la mano de W. Bailey, estus ĉies profito, ke tiu teksto publikiĝu iel aŭ aliel.

Ĝis tiu tempo, oni permesu al mi noti kelkajn lokojn, kiuj bezonus glatigadon.

En *Mateo* 28, 10-11, la nuna teksto estas konfuza, pro uzo de *ili* pri malsamaj personoj. La zamenhofa maniero estus:

Kaj alveninte, ili [la virinoj] ekprenis liajn piedojn kaj ador-kliniĝis al li.

10. *Tiam Jesuo diris al tiuj: «Ne timu; iru, diru al miaj fratoj, ke ili foriru en Galileon, kaj tie ili min vidos».*

11. *Kaj dum tiuj iris, iuj el la gardistoj...*

En *Luko* 1, 63 la *tabuleto* estas *tabelo* en la zamenhofa lingvo.

En *I. Joh.* 3, 16 kaj 4, 11, oni konservis la tekston de la unua traduko: *ni devus demeti la vivon pro la fratoj kaj ni ankaŭ devus ami unu la alian.* Nu, laŭ la zamenhofa lingvo, tiu kondicionalo ĉe *devi* signifas, ke la devo ekzistas, sed ne estas (aŭ ne estos) obeata: iom ĝena aserto en tia buŝo. La korektoj *devas* estus bonvenaj ambaŭloke.

En *II. Kor.* 3, 5, kial *ne kvazaŭ ni taŭgas ion fari per ni* mem kun indikativo, dum en la sama epistolo, ĉe 1, 24, oni skribas: *Ne kvazaŭ ni estrus super via fido* kun kondicionalo?

Ankaŭ la akordigo inter la citaĵoj de la *Nova Testamento* kaj la originalaj lokoj en la *Malnova* ne estis kompletigita, precipe en la *Apokalipso*: tiu ĉi parolas ekzemple pri *Absinto*, kie *Jeremia* diras *Vermuto*, pri *kunvolvata libro*, kie *Jesaja* diras *kunerulata skribru-laĵo*, pri la *Sinjoro de la Tero*, kie *Zeharja* diras *Reganto de la tuta tero* ktp.

Cetere, la traduko mem estas kelkfoje ne kontentiga, ĉu pro timemo, ĉu pro nekonsekvenco, ĉu pro mallerto:

T i m e m o: Marko verkis en tre populara lingvo, kun oftaj nekorektaĵoj laŭ la vidpunkto de la klasika greka lingvo; sed en la esperanta traduko nenio respegulas tian karakteron. Eble la plej karakteriza trajto de lia stilo estas la abrupta komenco de nova epizodo per prezenca verbo, kiun sekvas preteritaj, ekzemple:

(I. 12) *Kaj tuj la Spirito pelas lin for en la dezerton.* 13. *Kaj li estis en la dezerto kvardek tagojn...*

(21) *Kaj ili iras en Kapernaumon; kaj tuj en la sabato li eniris en la sinagogon kaj instruis...*

(40) *Kaj venas al li leprulo, alvokante lin, kaj genuante, dirante: Se vi nur volas, vi povas min purigi.* 41. *Kaj kortuŝite li etendis la manon.*

(II. 18) *Kaj la disĉiploj de Johano kaj la Fariseoj estis fastantaj, kaj oni venas kaj diras al li...*

Vere, konservi tiun stilefekon estis facila kaj ne prezentis ĝenon eĉ por la piuloj, kun tamen la avantaĝo gardi iom el la originala fizionomio de la greka teksto.

Nekonsekvenco: Ŝajnas, ke la interkonsentita sistemo estis traduki laŭvorte la arameismojn konservitajn en la greka teksto; tio estas solvo de pli granda facileco, kaj ne tre favora al populara legado. Kion nuntempa laiko povas kompreni, ekzemple, ĉe tia esprimo:

«Ĉu la *filoj de la edziĝejo* povas fasti, dum la fianĉo estas kun ili?» (*Mk* II, 19. *Kp Mt* IX, 15, *Lk* V, 34), se noto ne instruas al li, ke temas pri la «kompanianoj» de la edzo, kiel oni diras ĉe *Juĝistoj* XIV, 11? Aŭ ĉe jena:

«Li firmigis *sian vizaĝon*, por iri al Jerusalemon, kaj sendis senditojn antaŭ *sia vizaĝo*... en vilaĝon de la Samarianoj... kaj tiuj lin ne akceptis, ĉar *lia vizaĝo* estis direktata al Jerusalemon» (*Lk* IX, 51-53), se oni ne sciigas iel, ke «*lia vizaĝo*» estas simpla esprimo de la triapersona personpronomo? Sed ni akceptu tiun principon: kial do, oni sin demandas, la tradukistoj ne aplikis ĝin egale ĉe alia esprimo de mor-detalo komuna al la tuta civilizo mediteranea, «kuŝiĝi ĉe tablo»? La tuta rakonto de *Luko* VII, 36-38 fariĝas absurda, se oni tradukas *κατελθὼν* per «sidiĝis»: kiel la prostituitino povus «stari» malantaŭ la piedoj de Jesuo *sidanta*, kaj ŝmiri ilin per parfumo, kaj esti vidata de la ceteraj kunmanĝantoj? La sceno estas komprenebla nur, se Jesuo kuŝas sur manĝosofo, apoganta sin sur la maldekstra kubuto kaj havanta la kruojn horizontalaj.

Mi dirus la samon pri la origin-epitetoj: se oni uzas «la Nazaretano» (*Mk* XIV, 67) aŭ «Simonon Kirenanon» (XV, 21), kial subite «Maria Magdalena» (XV, 47) kaj ne «Maria la Magdalanino»?

• *Mallerto*: Mi elektos nur unu frazon. Mi ja scias, ke la teksto de la *Epistoloj* estas pli ol unufoje kruta, precipe ĉe Paŭlo, kies koncizo kaj pensosaltoj kaj aludoj al la misterkultoj kaj rabe-necaj pseŭdorezonoj ne tro faciligas la komprenon. Sed mia frazo legiĝas en la *Epistolo al la Hebreoj*, kies nekonata aŭtoro (eble Apolos) skribas per glata kaj eleganta greka lingvo. Nu, en la ĉapitro XI, 1, ni legas jenan difinon de la fido: *Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado de aferoj ne vidataj*. Mi ne scias, ĉu oni povas trovi pli malbonan tradukon de sufiĉe klara teksto.

En si mem, tiu traduko estas absurda. *Realigo de esperataĵoj*? Mi esperas gajni en la loterio; mi gajnas; mia esperataĵo estas realigita: kie estas la fido en tia afero? *Provado de aferoj ne vidataj*? *Provi* estas apliki ion por kontroli, eksperimenti: sed kiel eksperimenti pri *aferoj ne vidataj* (ĉar *vidi* ĉi tie evidente signifas *sperti per la sensoj*)?

Nu, la vorto tradukita per *realigo*, t. e. ὑπόστασις, signifas propre ‘fundamento’, ‘bazo’, kaj aparte, ‘tio, sur kio baziĝas la animo: firmeco, kuraĝo, memfido, certiĝo ktp’: ĝuste en tiu senco la sama vorto estas uzata en la sama *Epistolo* (III, 14), kaj tie bone tradukita per ‘certiĝo’. La alia ŝlosilvorto tradukita per ‘provado’, t. e. ἔλεγχος, signifas propre ‘argumento (por rebati), pruvo’ (Ĉu nia ĉitiera ‘provado’ ne estus preseraro anst. ‘pruvado’?). Sed ŝajnas al mi, ke ĉi tie la vorto havas iom flankan nuancon: temas malpli pri ‘pruvado al aliaj’, ol ‘pruvado al si mem’, t. e. ‘konvinkiĝo’. Tial mi proponus la korekton: *Kaj la fido estas la certiĝo pri esperataĵoj, la konvinkiĝo de aferoj ne vidataj* — kio estas almenaŭ klara difino de neklarigebla sento.

INTERLUDO

II

— Onjo diris, ke vi atendas amikon por via ĉiusemajna ludo. Nu, dum vi lin atendas, ĉu vi ne povus, oĉjo, iom montri al mi la aferon? Tio ŝajnas tiel amuza, ĉiuj tiuj pecoj kun kuriozaj formoj, aranĝitaj unuj kontraŭ aliaj kiel du armeoj!

— Pli bone vi ne povus diri, bela mia knabino. La ŝakoj estis, almenaŭ en la komencaj tempoj, la bildo de la milito. Sed oni ne lernas ludi ŝakojn tiel facile. Unue, se vi volas fariĝi bona ludantino —kvankam la virinoj neniam brile distingiĝis sur tiu kampo— vi devas komenci lernante la historion de tiu el la ludoj, kiu plej honorigas la homan spriton.

— Ĉu vi ne iom troigas, oĉjo?

— Tion Voltaire mem diris, kaj, se temas pri sprito... Nu, vi scias, de kie venis la ŝakoj?

— Mi ne estas tiel senscia, kiel vi kredas! Mi legis, kiel ĉiuj, en mia SAT-vortaro, ke ili venas de Persujo.

— Hm! Tio estas vera, sed je iom nevera vereco, se vi ekaptas mian penson. Tio estas veraĵo por legantoj de vortaroj, ni diru, por hastemaj personoj. Sed la vera vero estas, ke la ŝakojn elpensis la Hindoj. La legendo rakontas, ke la reĝo (aŭ *raĝo*, kiel mia kolego Rossetti volus skribi la ĝisnunan *raĵaon*), do ke la reĝo Belkib terure enuadis, kiel solaj kapablas enui la reĝoj, kaj ke lia ĉefministro elpensis, por lin distri, la ludon de la ŝakoj: la reĝo, entuziasmigita, promesis al la bramano Siŝa ĉion, kion li postulos. Kaj la bramano, por krome doni al sia monarko lecionon pri aritmetiko, postulis, ke oni donu al li tritikgrajnojn, unu por la unua ĉelo de la ŝaktabulo, du por la dua, kvar por la tria, ok por la kvara kaj tiel plue. La suvereno, ravita de la malavideco de la ĉefministro, ordonis tuj pagi al li la rekompenco: sed baldaŭ la ministro pri financaj aferoj malkovris, ke eĉ ĉiuj grenejoj en la reĝlando ne sufiĉus por kontentigi tiun ŝajne tiel modestan postulon.

— Kaj vi trovas, ke tio estas pruvo? Vi ja ne estas postulema!

— Ha, kiel kritikemaj kaj senpaciencaj estas la hodiaŭaj infanoj! Ne, tio ne estas pruvo, sed kio estas pruvo estas la fakto, ke tiun ludon pruntis ĉiu el la du najbaroj de la Hindoj, la Ĉinoj kaj la Persoj, kaj ke ĉiu el ili konservis kelkan memoron de tiu origino. Pri la Ĉinoj kaj ilia «ludo de l' Elefanto», mi ne parolos, ĉar tio kondukus nin tro malproksimen. Sed ke la kristanaj Kruĉistoj depruntis de la Persoj la ŝakojn, tion pruvas interalie la nomo mem de tiu ludo kaj tiuj de la ĉefaj pecoj, kiuj estas aŭ persaj aŭ arabaj, ĉar en tiu tempo la arabaj regantoj trudis al la persa lingvo multegon da arabaj vortoj.

— Kurioze! Mi ne pensus, ke *damo*, *turo* aŭ *ĉevalo* estas persaj vortoj.

— Ne moku la fraton de via respektinda patro. Mi aludis la antikvajn nomojn de tiuj pecoj.

— Ili do ne ĉiam estis same nomataj?

— Certe ne: ili, je la fino de la XIVa jarcento estis francigitaj, kaj poste pluraj el tiuj francaj nomoj transiris en la najbarajn lingvojn, dum la rusa restis pli fidela al la originaj, en ilia mistera nekomprenebleco. Sed tiuj Francoj ĉiam volas ĉion klarigi... Tamen, ili konsentis konservi la formulon, kiu finas matĉon.

— *Ŝak mat!* Mi ĉiam miris, kion signifas tiuj kabalaj vortoj.

— Nu, ili kaŝas nenion misteran, kredu al mi. Ili estas nur proksimuma transskribo de la frazo: *eŝ-ŝaĥ māt!*, en kiu la unua vorto estas persa kaj la dua araba, kaj kiu signifas: 'la Reĝo mortis'! Sed pli bone, aŭskultu la koncernaton mem:

*La Reĝo diras: Min, la Ŝahon,
neniu kaptas, dank' Alahon!*

Tiu islamano diras cetere la puran veron. *Ŝaho* estis la titolo de la persaj reĝoj. La komenco de la finofara formulo *eŝ-ŝaĥ* prezentas tiun saman vorton kun la araba artikolo, kaj de tie devenas la malnova franca nomo de la ludo *eschac* aŭ *eschec* (hodiaŭ: *échecs*), kiu trapasis en la anglan kun la mallongigita formo *check* (el la singularo) aŭ *chess* (el la pluralo *eschecs*), kaj en la germanan kun la formo *Schach*, dum la rusa konservis la plenan formulon:

ŝahmat. Nia esperanta vorto venas de la germana kun la fina konsonanto de la franca.

Apud la Reĝo staras la Damo, dekstre de sia edzo, se ŝi estas nigra, maldekstre, se blanka. Ni aŭskultu ŝin ŝiavice:

*Diras la Dam': Kia perplekso,
ke ŝanĝi devis mi je sekso!*

— Ŝanĝi je sekso? Tian anglismon oni jam konis tiutempe?

— Jes, sed filologie, ne fiziologie! Efektive, meze de batalo, kaj por defendi la Reĝon, oni atendas malpli Reĝinon, ol Ĉefministron. Jen kion ja simbolis tiu peco, en la tre antikva tempo de la Hinda historio, en la tempo de la *Mahābhārata*, kiam la Reĝo ĉiam havis apud si ĉefmarŝalon. Tiun oni nomis (per la sama metaforo, kiun ni uzas hodiaŭ kun nia 'ĉefstabejo'), la 'tendo de la komando', t. e. *maŝk i aparzen*. Sed, kiam la ludo trapasis en Iranon, ĉar tie la Reĝo mem komandis la armeon, oni plu ne komprenis la vorton, kiu kripliĝis al ia *parzin*: kaj siavice la araba pruntaĵo *ferzin* kripliĝis al *ferz'* en la rusa, kaj al *Fierce* aŭ *Fierce* en la malnova franca. Evidente la Francoj ne povis rezisti al la tento transformi tiun *Fierce* en *Vierge*, kaj, dank' al la kutima dirmaniero: *Ma Dame la Vierge* 'Mia Damo la Virgulino', fari el la maljuna veziro junan Sinjorinon: kaj tiun Damon heredis same la hispana, kiel la germana lingvo. Sed juna Sinjorino havis nenian sencon apud Reĝo, se ŝi ne estas lia edzino: de tie, la nuna nomo de tiu hermafrodito en la franca kaj en la angla: la Reĝino.

Tiu stranga aventuro de la iama Ĉefkomandanto kuntrenis la metamorfozon de la najbara peco, la Kuriero:

*Diras la Kurier': Ho vantol
Fortrotis mia elefanto!*

— Mi ne sciis, ke kurieroj rajdis elefantojn.

— Ne temis tiam pri kurieroj: la koncernaj elefantoj — la antikvaj tankoj — formis la korpogardon de la Ŝaho, lian militrezerwon. Tiu peco estis tial nomata en la persa *pīl*, t. e. 'elefanto', el kiu devenis, kun la artikolo, la araba *al-fīl*. De tie ĝi trapasis rekte en la hispanan: *alfil*, dum la rusa tradukis ĝin ĝuste per sia *slon*. Sed ĉie aliloke oni trovis tian dikan beston ne taŭga por

tiel subtila ludo, kaj oni vete transformis ĝin. La Maŭroj faris el ĝi ian rajdiston, *al-fāris*, de kiu la Italoj tiris sian *Alfiere*. En la malnova franca lingvo, *alfil* iel fariĝis *aufin*, kio nenion signifis, kaj kion oni rapide misformis en *dauphin*, t. e. 'delfeno'. Sed delfeno tiel malbone sidis sur la ŝaktabulo, kiel elefanto, kaj, manke de pli bona rimedo, ĉiu popolo anstataŭigis ĝin laŭ sia gusto: al la Francoj plaĉis meti amuziston, *un Fou*, ĉe la gereĝoj, al la Angloj seriozigi la kortegon per episkopo, *Bishop*, al la Germanoj provizi la suverenon per kuristo, *Läufer*.

— Bela kariero por nia Kuriero! Ni esperu, ke la Ĉevalo ne donos al ni tiom da zorgo.

— Tute ne; tion cetere li mem asertas:

*Neniam, diras la Ĉevalo,
mi cedis lokon al rivalo!*

La kavalerio estis, efektive, la sola speco de militistoj komuna al la Oriento kaj al la Okcidento. Tial la persa *asp* estis ĝuste tradukita en la rusan *Kon'*, en la hispanan *Caballo*, kaj en la italan *Cavallo*; sed la mezepokaj Francoj, en sia deziro humanigi la ludon ne povis fari alion, ol aldoni al la eta kortego du novajn ornamojn, la *Chevaliers* 'kavaliroj', kiuj trapasis en la anglan kaj tie restis: *Knights*, dum ni revenis al pli demokrataj *cavaliers* 'rajdantoj'. Por la Germanoj, peco, kiu faras tiel strangajn saltojn sur la tabulo, povis esti nur *Springer* 'saltanto'.

— Kaj kion pri la Turo?

— Ha, la Turo!...

*Diras la Turo: Ĉu fabelo,
ke iam estis mi kamelo?*

Ne, tio ne estas fabelo, sed nur ne kompleta vero, kiel tiel ofte en nia vivo, ve! Nia peco do havis ĉe la Persoj la nomon *Roĥ* aŭ *Ruĥ*, kio ne estas persa vorto, kaj kiun ili interpretis per 'kamelo': ankoraŭ nun ĉe la Hindiaj Parsioj oni nomas ĝin tiele. Sed, laŭ la modernaj filologoj, la vera senco de la vorto estas donita de ĝia etimo, la sanskrita kunmetaĵo *raĥ-vartin*, t. e. 'ĉaro kun kesto', kio tre probable montris la militĉaron. Kun la malapero de tiu antikva batalrimedo, la vorto iĝis nekomprenebla, kripliĝis,

kaj sub tiu enigma formo venis en la malnovan francan *Roc* kaj en la anglan *Rook*. Sed tiuj «rokoj» ne kontentigis la fantazon de niaj avoj: sur tiuj rokoj, ili konstruis al si la kvar turojn, kiuj devas fortikigi la kvar angulojn de reĝa kastelo, kaj la Angloj iris eĉ pli malproksimen, ĉar ili nomis mem tiun rokon *castle* 'kastelo', imititaj en tio de la Hispanoj, *castillo*. Sed la Turo gajnis al si la vivrajton en ĉiuj aliaj lingvoj, krom en la rusa, kiu faris el ĝi ian boaton, *ladja*, mi ne divenas kial. Tamen ankaŭ ĉiuj lingvoj konservis la malnovan vorton en la verbo *aroki*, kiun ni tiris el la akcentita itala formo *arroccare* (paralela al la hispana *enrocar*), dum aliaj limigas sin je *roquer*, *rochieren*, *rokirovať* ktp. Jen ĉio, mi kredas.

— Sed vi forgesis la peonojn, oĉjo!

— Fi! Piedistaĉoj!

*Peon', mi, taŭga por piedi,
ne rajtas unu paŝon cedi!*

Ĉar nur tion signifas ilia latindevena nomo, en la franca (*pion*), itala (*pedina*), hispana (*peón*) aŭ angla lingvo (*pawn*), dum la germana malarmas ilin en kampuloj (*Bauer*).

Jen kiel, vi povas nun vidi, plenumiĝis la adapto de ekzotika ludo al nova socia medio. La Hindoj vidis en ĝi du malamikajn armeojn, ĉiun kun siaj ĉefoj, reĝo kaj ĉefkomandanto, kaj siaj elitaj trupoj, elefantoj, ĉevaloj kaj ĉaroj, antaŭirataj de la esploristoj. Kaj la epizodoj de tiu ĝismorta (*eššāh māt!*) batalo simbolis por iliaj poetoj la ŝanĝiĝojn de la homa sorto. Vi eble memoras, ke mi jam recitis al vi el Omar Kajam:

*Se tion diri simple, senmetafore, ni
estas ŝakpecoj, kiujn priludas Mond-ĝeni';
kaj ni, post eta rolo sur la tabul' de l' vivo,
revenas unuope en keston de l' Neni'...*

Dume la mezepokaj baronoj, «saĝaj kaj maljunaj», preferis vidi en ĝi la bildon de ia kortega baletisto, dancata de la Reĝo, la Reĝino, iliaj Burleskuloj aŭ Episkopoj, iliaj Kavaliroj, interne de riĉa kvartura kastelo.—Sed oni sonorigis je la pordo. Sufiĉe da babilaĵoj, kara mia. Jen la horo de la seriozaj aferoj — mi volas diri de la ludo!

III. NIAJ PERSPEKTIVOJ

1. La naciaj lingvoj kaj la internacia

LINGVAJ OBSTAKLOJ AL LA INTERNACIA KOMPRENIĜADO

Sed dissaltos la obstinaj baroj...

Inter la «muroj», kiuj dividas la homaron en fremdajn kaj ofte malamikajn grupojn, la plej evidenta, se eble ne la ĉefa, estas tiu, kiun prezentas la lingvoj. El la malproksimo de la jarcentoj, la legenda malbeno de Babel eĥigas tra la homa historio; kaj neniam eble oni tiel profunde sentis ĝian efikon, kiel en niaj tagoj de transkontinentaj flugadoj kaj de mondskala radiofonio. Sur ĉiu paŝo hodiaŭa homo spertas tiun malhelpon, kaj eklernas taksi ĝian amplekson. Ĉar ĉiu iom atentema spirito rapide konstatis, ke la malbono ne konsistas sole en tio, ke iuj diras *chat*, dum aliaj diras *Katze* aŭ *moâ* aŭ *gerbeh*: se ĝi tie limiĝus, la tradukmaŝino estus jam de longe utiligata, kaj nia Esperanto apenaŭ bezonata. Sed, eĉ pli ol la vortoj, diferencas kaj la strukturoj de la lingvoj, kaj la psikologiaj kondiĉaroj, kiujn ili celas esprimi, kaj la sociaj funkcioj, kiujn ili plenumas. Pri tiuj tri punktoj mi provos resumi la staton de la aferoj, laŭ la plej freŝaj esploroj de la lingvistoj.

I. STRUKTURAJ PROBLEMOJ

Nenio estas pli senkuraĝiga, por la apostoloj de tutmonda interkompreniĝado, ol la plej supra rigardo de la lingva situacio sur nia planedo. La nombro kaj la diverseco de la lingvoj estas io apenaŭ kredebla. Se ni malfermas tian kompilaĵon, kiel *La Lingvoj de la Mondo* aŭ *La Ĉefaj Lingvoj de la Mondo*,¹ ni malkovras

¹ A. MEILLET kaj M. COHEN, *Les Langues du Monde*, Paris, 1952.—M. A. PEI, *The World's Chief Languages*, New York, 1946.

svarmon da idiomoj, pli-malpli disvastigitaj, pli-malpli internacie gravaj, sed el kiuj ĉiu estas la esprimilo de aparta kolektiva sento, de jarcenta, eble jarmila originala tradicio. La cifero donita de Gray¹ de 2.796 diversaj lingvoj nuntempe parolataj, ekskluzive de la malgrandaj dialektoj, povas ŝajni iom pretendema en sia precizeco, sed ĝi almenaŭ donas ideon pri la grandeco de la koncerna nombro. La plejofte prezentata meznombro estas 1.500 lingvoj, en kiu oni ne enkalkulas la jam malaperintajn. En la sola Hinda duoninsulo ekzistas 222 lingvoj aŭ dialektoj, el kiuj naŭ estas parolataj de pli ol po dek milionoj da homoj.² La lingvoj de Eŭropo ne limiĝas al la 25 registritaj en la oportuna kompendio de A. Lyall: L. Tesnières, en *La Lingvoj en la nova Eŭropo*,³ kalkulas entute 120 lingvojn parolatajn sur la supraĵo de Eŭropo, el kiuj 68 estas parolataj de pli ol po cent mil homoj, kaj 37 de pli ol po unu miliono; nur 19 atingas pli ol po kvin milionoj da parolantoj. Eĉ inter la limoj de unu lando tiel forte centralizita kiel Francio, ekzistas, krom la ĉie parolata oficiala franca lingvo, naŭ aliaj lingvoj tradicie parolataj en diversaj anguloj de la lando: ili estas, en mal-kreska ordo de la nombro da lingvanoj, la okcitana, la alzata, la bretona, la korsika, la flandra, la kataluna, la vaska, la jida kaj la cigana; al kio oni devas ankaŭ aldoni la fremdajn lingvojn parolatajn de la enmigrintoj, t. e. la itala, la hispana, la pola kaj la galicia; krome estas ankoraŭ parolataj ne difinebla nombro da francaj subdialektoj, de la pikarda ĝis la limoĝa, de la vendea ĝis la ĵurasa, kiuj ĉiuj estas tre proksimaj al la franca, sed sufiĉe malsimilaj inter si, per la akcento kaj la vortaro, por esti nekompreneblaj al ordinara Franco.

Tiu ĉi tre rapida trarigardo de la lingva situacio agordas nin humure kontraŭ la aserto de M. A. Pei, en la komenco de lia citita verko, ke «la persono, kiu havas kelkan praktikan scion de la

¹ L. H. GRAY, *Foundations of Language*, New York, 1950.

² En «Scienca Revuo» (1958, pĝ 80-82), Prof. Dro S. S. Culbert listigis 129 lingvojn parolatajn de almenaŭ po unu miliono da homoj, laŭ la informoj en 1957.

³ A. LYALL, *Guide to 25 Languages of Europe*, London, 1932.—A. MEILLET, *Les Langues dans l'Europe Nouvelle*, kun apendico de L. TESNIÈRES, 2a eldono, Paris, 1928.

angla, de la franca, de la germana, de la hispana, de la portugala, de la itala, de la rusa kaj de la japana lingvoj, estas en pozicio fari al si vojon ĉirkaŭ la mondo». Vere estas, ke li krome rekomendas akiri kelkajn scietojn pri la araba, la ĉina, la malaja kaj la flandra — kio prezentas evidente nenian malfacilaĵon por nia praktika usonano!

Sed la nombro de la lingvoj ne estas la plej granda baro. La diverseco de iliaj strukturoj prezentas ion ankoraŭ pli mirindan, preskaŭ timindan. Ni ja tro ofte kutimiĝas al la konsidero de la eŭropaj lingvoj, kiuj estas plejparte konstruitaj laŭ la sama modelo, kaj al la kadroj de la klasika gramatiko, latina aŭ greka. Sed se ni rigardas trans la limojn de tiu «malgranda promontoro de la Azia kontinento», laŭ la fama formulo de Paŭlo Valéry, tiam, kia neatendita malsameco en la esprimado de la homa penso!

Ni konsideru ekzemple la plej simplan elementon de la parolo, la vorton, kaj, inter la vortoj, tiujn, kiuj esprimas simplan konkretan ideon, kiel *hom* aŭ *grand*, kaj ni trarigardu, kiamaniere la diversspecaj lingvoj ilin esprimas. Ni tuj konstato, ke tre maloftaj estas tiuj, kiuj povas, same kiel ni faras per niaj nudaj radikoj, esprimi tiujn ideojn nudaj, t. e. ne alkroĉante al ili kromajn precizigojn pri gramatikaj rilatoj. La plej perfekta el tiu vidpunkto estas la klasika ĉina lingvo: en ĝi la vortoj estas unusilabaj kaj nevariaj, ili esprimas la ideon mem, dum la gramatikajn funkciojn montras nur ilia pozicio en la frazo. Nia *hom* estas *jên* kaj *grand* estas *ta*: *ta jên* signifas: 'granda homo', sed *jên ta* signifas: 'la homo estas granda' aŭ: 'la homo grandas', se tiuj du vortoj formas la tutan frazon; se, male, ilin sekvas tria vorto kun signifo de ago aŭ stato, niaj *jên ta* fariĝos la subjekto, kaj oni tradukos ilin per: 'la homa grandeco' ktp. Alidirite, la vorto *ta* povas roli kiel adjektivo, substantivo aŭ verbo, laŭ sia pozicio en la frazo; evidente, la vorto *jên*, pro sia signifo, rolos plejofte kiel substantivo aŭ adjektivo, sed ĝi povas okaze akiri ankaŭ verban funkcion, analoge al la vortoj *lao* 'maljunulo' kaj *jeu* 'infano' en la fama Konfucea maksimo: *lao laoj jeu jeu*, kion oni komprenu: 'trakti la maljunulojn kiel maljunulojn kaj la infanojn kiel infanojn'. Tio ne signifas, kiel oni ofte asertas, ke la Ĉinoj ne kapablas distingi la verbojn disde la substantivoj; tio signifas, ke ili distingas tiujn du fundamentajn partojn

de la parolo¹ ne per la formoj sed per la signifoj kaj la pozicioj; cetere la moderna ĉina ankaŭ plejofte distingas ilin per ŝanĝo de modulo aŭ eĉ de elspiro eĉ la komenca konsonanto.

Male tre multaj lingvoj enkorpiĝas en la vortojn la apartenecon al tiu aŭ alia kategorio de la parolo. En la franca, ekzemple, aŭ en la germana, *homme* aŭ *Mensch* estas devige substantivo kaj neniam povas esti adjektivo; *grand* aŭ *groß* estas adjektivoj kaj neniam povas esti verboj ktp. Tia distribuo de la vortoj en parolkategoriojn ŝajnas al ni tute natura kaj simpla; sed se ni rigardas ĝin el la ĉina vidpunkto, ni konstato, ke efektive eĉ ĉiu vorto ni diras dufoje la saman precizon. Kio nome estas substantivo, se ne ia *formo* tradicie destinita plenumi la *funkcion* de subjekto aŭ de objekto? Kio adjektivo, se ne ia tradicia *formo* por la epiteto aŭ la predikativo? Kio verbo, se ne tradicie antaŭdestinita *formo* de la predikato? Kiam do ni diras *der Mensch* aŭ *l'homme*, ni fakte esprimas dufoje la rilaton kaj de substantivo kaj de eventuala subjekto; kiam ni diras *menshlich* aŭ *humain*, ni dufoje esprimas la rilaton kaj de adjektivo kaj de eventuala epiteto aŭ predikativo; kiam ni diras *vermenshliche* aŭ *humanise*, ni dufoje esprimas la rilaton kaj de verbo kaj de eventuala predikato. Ni kulpas do ian leksikologian pleonasmon. Kaj aliflanke, la nocio *hom*, kiun la ĉina prezentas bloke kaj unuece en sia unika vorto *jên*, estas disrompita, de la eŭropaj lingvoj, en plurajn apartajn vortojn (*homo*, *homa*, *homigi* ktp).

Sed kelkaj lingvoj iras ankoraŭ pli malproksimen en tiu sinteza procedo. La latina, ekzemple, efektive ne posedas unu vorton respondan al nia nocio *homo*: la latina *homo* ekzistas nur kontraste kaj rilate al *hominem*, *hominis*, *hominum* ktp, kio signifas, ke ĝi

¹ Kvankam fundamentaj, ili ne lasas sin facile difini. La plej trafa distingo, kaj la plej profunda, ŝajnas al mi tiu de Prof. J. Larochette (en *Grammaire et Psychologie*, Paris, 1950): «La substantivo ne *indikas* aĝon, estulon, enton, sed esprimas unu 'aferon' (t. e. ĉio, kio prezentiĝas al nia konscio: personoj, bestoj, vegetaĵoj, koloroj, statoj, movoj ktp) *sub formo* de aĝo, de estulo, de ento, t. e. prezentas ĝin *en la spaco*. La verbo ne indikas agon, movon, staton, procezon, sed prezentas 'aferon' *sub formo* de ago, movo, stato, procezo, t. e. prezentas ĝin *en la tempo*. Per tio mem, la verbo estas *formo*, kiu ebligas atribui al la 'afero' karakterojn apartenantajn al la daŭro ...»

krome al kroĉas nedisigeble al la esprimo de la nocio, ne nur, kiel la franca ktp, kategorion de parolelemento, sed ankaŭ sintaksan funkcion: la latina *homo* estas ne nur tradicie fiksita formo por la funkcio de substantivo, sed ĝi ankaŭ signas la apartan funkcion de subjekto, kontraste al *hominem*, objekto, *hominum*, plurala genitivo ktp. La fakto, ke ni registras la latinan vorton kutime sub la nominativa formo en niaj vortaroj ne devas iluzii al ni: oni ne povas propre esprimi en tiu lingvo la abstraktan ideon pri homo, se oni ne samtempe «aktualigas» ĝin, t. e. anticipas difinas ĝian funkcion en eventuala frazo.

Ne ĉiuj vortoj, cetere, estas tiel simplaj, kiel *homo*, *granda*, *manĝi* ktp. Ni ofte bezonas esprimi pli kompleksajn nociojn, ekzemple tiujn, kiuj rilatigas homon kun aĵo (*kampulo*, *klubano*, *ŝipestro* ktp) aŭ kun ago (*parolanto*, *skribisto*, *vundito* ktp). Tie ĉi, denove, ni povas konstati plej diversajn manierojn de esprimado. Je unu ekstremo, ni retrovas la unusilabvortajn lingvojn, kiel la ĉina aŭ la anama. En ili la malsimplaj ideoj esprimiĝas per apudmeto de nevariaj vortoj en difinita ordo: ĝenerale la determinato sekvas la determinanton. En la ĉina, ekz-e, *t'jen ci* (litere: 'ĉiel fil') estas la nomo de la imperiestro, kaj *ŝūi fu* (lit. 'akv hom') tiu de la akvoportisto. En la tibeta *kang maj* ('neĝ hom') signifas: 'homo de la neĝoj', dum *maj ti* signifus: 'homsimila urso'.

En aliaj lingvoj, oni uzas modifon de la internaj vokaloj por atingi esprimon de kompleksaj nocioj. En la araba, ekz-e, el la radiko *ktb* 'skrib' oni tiras jen *kitāb* 'libro', jen *kātib* 'verkisto' ktp. En la hebrea, la 'mortiganto', *qotēl*, kaj la 'mortigito', *qātūl*, estas ambaŭ formitaj el la radiko *qtl* 'mortig'.

Sed en la pli granda nombro da lingvoj, oni uzas por tiu celo afiksojn, t. e. vortetojn, kiuj ne ekzistas per si mem, sed ekzistas nur en kuniĝo kun radiko, al kiu ili aldoniĝas aŭ antaŭe (prefiksoj) aŭ malantaŭe (sufiksoj) aŭ interne (infiksoj). Tiu lingvotipo estas parte konata al ni, ĉar al ĝi apartenas la eŭropaj lingvoj, almenaŭ pri la uzo (en certaj limoj) de prefiksoj aŭ sufiksoj: la francaj vortoj *adroit* / *maladroit*, *meurtre* / *meurtrier*, *fleur* / *fleuriste*, t. e. 'lerta / mallerta', 'murdo / murdanto', 'floro / floristo' ktp bone ekzempligas tion. Sed niaj okcident-eŭropaj lingvoj faras tre moderan uzadon de tiuj esprimiloj: ne mankas aliaj, kiuj tiras el ili pli vastan efikon.

En la turka, ekz-e, la konjugacio efektiviĝas precipe per infiksoj: el la verbo *sevmek* 'ami', oni tiel tiras: *sevilmek* 'esti amata', *sevdirmek* 'amigi', *sevenmek* 'sin ami', *sevişmek* 'sin ami reciproke', *sevmemek* 'ne ami', *sevememek* 'ne povi ami' ktp. En tute alitipa lingvo, parolata en la insuloj Filipinaj, oni trovas analogan metodon de konjugacio: *sad* 'atendi' kun la prezenca infikso *um* kaj unuapersona sufikso *ak* donas *sumidak* 'mi atendas'; *kineg* 'silenta' tute same donas *kuminekak* 'mi estas silenta'; la infikso de la preterito estas *inm*, do: *kinminekak* 'mi estis silenta' ktp. En la indianaj idiomoj, oni ofte trovas same tre kompleksajn konjugaciojn per afiksoj; en la gvarani-lingvo ekz-e: *mbaapo* 'labori'; *a/mbaapo* 'mi laboras'; *a/mbaapo/se* 'mi emas labori'; *nd/a/mbaapo/se/i* 'mi ne emas labori'; *nd/a/mbaapo/se/vei/i* 'mi plu ne emas labori'; *nd/a/mbaapo/se/vei/ro* 'se mi plu ne emus labori' ktp.

Oni vidas, ke ĉe tia vasta uzado de la afiksoj la vorto emas ampleksi en unu tutaĵo pli kaj pli da nocioj, tiel ke ĝi finfine egalas tutan propozicion: tio estas la okazo en la eskimo-lingvo kaj en pluraj indianaj. Eduardo Sapir citas¹ ekz-e unu vorton en ĉinuk-lingvo, kiu signifas 'mi venis por doni ĝin al ŝi': *inialudam*, kiun oni analizas jene: *i* = 'is', *n* = 'mi', *i* = 'ĝin', *a* = 'ŝi', *l* = 'al', *u* = 'for(move)', *d* = 'doni', *am* = 'iri (kun nuanco de celo: *iri por fari ion*)': la ĉefa radiko estas la lasta, *am*, kaj la esprimo de la tempo fariĝas tuj en la komenco de la vorto. Komparu la turkan vorton *evindekilere* 'al la homoj, kiuj estas en cia domo', t. e. *ev* = 'domo', *in* = 'ci', *de* = 'en', *ki* = 'ul', *ler* = 'oj', *e* = 'al'.

Ordinare, en la plimulto de la lingvoj, oni uzas samtempe tiujn diversajn rimedojn esprimi kompleksan ideon. La germana, ekz-e, ofte kombinas modifon de la interna vokalo kun apudmeto de simplaj vortoj en unu kunmetaĵo: 'etaĝo' estas *Stock*, sed 'kvar-etaĝa' fariĝas *vierstöckig*; 'domo' estas *Haus*, sed 'dombloko' estas *Häuserblock*. Oni cetere scias, ke la germana tute ne malŝatas la kunmeton de pluraj vortoj, eĉ se tiuj estas jam kunmetitaj: oni povas paroli pri *Häuserblockbesitzer* 'posedanto de bloko da domoj'. La malfacilo montriĝas, kiam epiteto devus rilati nur al unu el la

¹ ED. SAPIR, *Le Langage* (franca traduko), Parizo, 1953, pĝ 69.

elementoj de la kunmetaĵo: mi memoras gazetanoncon, kiu parolis pri *vierstöckiger Hausbesitzer* 'kvaretaĝa domposedanto': vere altnivela kapitalisto.

En la angla, la rolo de la vokalmodifo estas preskaŭ nekonsiderinda. Male, pro la preskaŭ plena nevarieco de la vortoj, la rolo de la akcento en la kunmetaĵo fariĝis grava, des pli grava, ke la akcento ne estas tipografie montrata kaj lasas al la leganto ĉion por diveni. S-roj Trager kaj Smith citas jenan trafan ekzemplon: LIGHT HOUSE KEEPER. Tiel skribite, tiuj tri vortoj povas havi tri diversajn signifojn, sed montras nenian rimedon elekti inter la tri. Nur la prononco klare distingas la sencojn: se *light* estas akcentita, ili signifas 'lumturgardisto'; se *house*, ili montras al 'etkuireja mastrumantino'; se *light* estas samtempe akcentita kaj apartigita de la sekvanta vorto, temas pri 'blonda dommastrino'.

En pluraj indianaj lingvoj, la kunmetado de la radikoj kuniĝas kun vasta uzado de la afiksoj por krei kilometrajn vortojn. Sapir citas el la pajuta-lingvo (sudokcidenta Utao) vorton, kiu signifas 'ili, kiuj sidas por dispecigi per tranĉilo nigran hejmbubalon': *wii/to/kuĉum/punku/rŭgani/jugwi/va/ntŭ/m/ŭ*, vorto, kiu analiziĝas tre kurioze en du partoj: la unua entenas la vortetojn esprimantajn la ideojn, kaj la dua tiujn esprimantajn la gramatikajn rilatojn:

<i>wii</i> = 'tranĉile'	<i>va</i> = 'o' (indikilo de futuro)
<i>to</i> = 'nigra'	<i>ntŭ</i> = 'nt' (ind. de participo)
<i>kuĉum</i> = 'bubalo'	<i>m</i> = 'j' (ind. de pluralo ĉe uloj)
<i>punku</i> = 'hundo (= hejm)'	<i>ŭ</i> = 'subjekto'
<i>rŭgani</i> = 'tranĉi'	
<i>jugwi</i> = 'sidi'	

Se ni volus iel imiti tian vorton, ni ricevus ion similan al la *tranĉile-nigrabubalhundo-tranĉsidontaj*. Inter tiaj vortoj kaj la tibeta aŭ ĉina unusilaba ideesprimilo, oni povas mezuri la nekredeblan diversecon de la parolprocedoj.

Se nun ni alpaŝas al la pli supra grado de komplekseco, t. e. al la esprimo de opinio en frazo, ni renkontos la samajn egajn

variaĵojn. Ni elektu tre simplan ekzemplon, la germanan frazon *das Kind ißt* 'la infano manĝas'. Verŝajne tiu frazo ŝajnos al germanlingvano tiel simpla, ke pli simpla preskaŭ ne povus ekzisti. Tamen, se ni atente rigardas ĝin, ni trovos en ĝi esprimon de multaj gramatikaj rilatoj: unue tiu de la subjekto al la verbo, montrita de la kazo de *Kind* kaj *das*; due tiu de la verbo al la subjekto: pro la triapersona subjekto, la verbo staras en *akordo* kun ĝi, kaj ni havas *ißt* anstataŭ ekz-e *esse* ktp; trie ambaŭ, substantivo kaj verbo, montras, ke temas pri *unu* infano: kontraste al *die Kinder essen*, ni havas ĉi tie duoblan signadon de la *nombro*; kvare, la substantivo estas klasita kiel neŭtra, pro la formo de la artikolo *das*, kontraste al *der Knabe*, kio signas la *genron*; kvine la substantivo estas akompanata de artikolo difina, por montri, ke temas pri jam konata infano: signo de la *difiniteco*.

Jen do, en tre simpla frazo, esprimado de kvin gramatikaj rilatoj, kiujn esprimi multaj lingvoj trovas tute superflue. La indiko de la kazo ekzistas ekz-e nek en la franca, nek en la angla, en kiuj lingvoj nur la pozicio de la vorto rilate al la verbo donas al ĝi la valoron de subjekto aŭ de objekto.

La *akordo* de la verbo al la subjekto ekzistas en la angla, sed nur en la prezenco (*the kid eats*, kontraste al *I eat*, sed *the kid ate* same kiel *I ate*, t. e. 'mi manĝis'); ĝi ekzistas en la franca, sed nur en la skriba lingvo: la parola ne distingas *ty māj* 'vi manĝas' disde *lāfā māj* 'la knabo manĝas' aŭ *lezāfā māj* 'la knaboj manĝas'. Ĝi tute ne ekzistas en la dana ktp.

La *nombro*, en la parola franca, troviĝas nur ĉe la artikolo; kaj ne estas eksterordinare renkonti tutajn frazojn, en kiuj la nombro ne estas fonetike esprimita eĉ unu fojon: *quatre jeunes filles couraient aux plongeoirs* estas prononcata tute same kiel *une jeune fille courait au plongoir*, kaj nur la nombronomo *quatre* aŭ *une* montras, ke temas pri pluralo aŭ singularo; 'kvar junaj knabinoj kuris al la plonĝtabuloj' — aŭ: 'unu knabino kuris al la plonĝtabulo'. Eĉ en la angla, oni povas renkonti frazojn, en kiuj la pluralo estas montrita de neniuj gramatika signo: en *The dead cannot return* oni komprenas, ke temas pri 'mortintoj' (kiuj ne povas reveni) nur pro la vortara kutimo almeti *man* aŭ *person* apud *dead* en la singularo. En ĉiuj orientaj lingvoj, la kategorio de la nombro simple ne

ekzistas: la malaja *anak makan* 'infan manĝ' povas tiel bone montri al unu, kiel al pluraj infanoj.

La esprimado de la *genro* estas ankoraŭ pli malfirma. Oni scias, ke la angla tute ne konas ĝin, nek la orientaj lingvoj; male, la afrikaj lingvoj multigis ilin: la bantua lingvo konas 23 genrojn (oni ordinare nomas ilin «klasoj» — sed temas pri la sama afero), kaj ĉiu el ili estas indikita per aparta afikso, kiun oni devige ripetas ĉe ĉiuj aliaj akcesoraj vortoj kaj ofte ĉe la verbo mem. En la subija-lingvo, ĉe frazo kiel: 'la knabinoj marŝas', oni ripetis trifoje la genro-esprimilon de la persono en pluralo, t. e. *ba*, kaj oni dirus: *b-o ba-kazana ba-enda*.

Fine la *difinado* estas ankaŭ elmetita al tre variaj kondiĉoj: la slavaj lingvoj ignoras la difinadon per la artikolo: la pola *dzieci* signifas aŭ: 'infano', aŭ: 'la infano'. Male aliaj lingvoj tiel volonte uzadas la artikolon, ke ili ripetis ĝin ĉe la epiteto, kiel la norvega en *den hvite katten* (lit.: 'la blanka kato-la') aŭ la hebrea: *hannāhār haggādōl* 'la-rivero la-granda', kelkaj eĉ ĉe la verbo, kiel la taitia *te amu nei te aiu* (lit.: 'la manĝi la infano' = 'la infano manĝas'). Kaj tiu lasta ekzemplo rekondukas nin al la konsidero de la unua rilato, inter la subjekto kaj la verbo.

Nenio estas pli familiara al ni, ol la ideo pri subjekto, kvankam ĝia difino ne estas ĉiam tre facile formulebla: «tiu, kiu plenumas la agon aŭ estas en la stato, kiun esprimas la verbo», oni diras ordinare, forgesante, ke tia difino ne povas aplikiĝi al la pasivaj frazoj: en *la lakto estas vendata de la laktistino*, temas ja pri ago, kaj tamen la faranto ne estas la subjekto! Sed en la praktiko, neniu hezitas. Tamen, se ni konsideras la antikvan staton de la afero (kaj de ĝi restas multaj spuroj en kelkaj lingvoj nunaj, precipe orientaj), ni ekvidas tute alian perspektivon.

En tiu stadio ekzistis du diferencaj tipoj de frazoj, la substantiva kaj la verba. La substantiva konsistas en la apudmeto de du substantivoj aŭ de substantivo kaj adjektivo, por esprimi la atribucion de ia eco al iu afero: la du termoj rilatas kiel subjekto al predikativo. Tiu tipo konserviĝis pura en la rusa: *dom nov* 'la domo estas nova', en la hungara: *az ég kék* 'la ĉielo estas blua', en la araba: *Zajdun 'alimun* 'Zaid estas saĝa' ktp. Ĝi eĉ etendiĝis en la klasika sanskrito al la esprimado de la agoj: oni trovas pli ofte

ekz-e *sas gatah* (lit.: 'li irinte', t. e. 'li estas irinta') ol *ĝagāma* 'li iris'. Nur tre poste eniĝis en tiaj frazoj ia eluzita verbo, kiu fariĝis la kopulo (nia *estas*).

La verba frazo konsistas esence en la esprimado de ago, lokita (aktualigita) en la tempo kaj rigardata kun ia daŭro: eventuale ĝi estas rilatigita al iu farinto aŭ suferinto. En tiu fraztipo, la farinto, kiam esprimita, estis, en tiu stadio, prezentita ne kiel «subjekto», sed kiel «adjekto»¹: en la tibeta, ekz-e ĝi estas esprimita kiel agant-adjekto, en la birma, kiel origin-adjekto. En la klasika tibeta, la frazo 'mi vidas homon' tradukiĝis per *nga-s mi thong* (lit.: 'mi-per hom vid', t. e. 'per mi homo estas vidata'). Tute simile, la vaska lingvo kontrastigas substantivan frazon kiel *Aita Jainco da* (lit. 'la Patro Dio estas', t. e. 'la Patro estas Dio') kun: *Jaincoac creatu Adam* (lit. 'per-Dio kreiĝis Adam', t. e. 'Dio kreis Adamon'). Eĉ la hindia, kvankam hind-eŭropa, konas frazojn kun senvaria verbo, la anto en instrumentalo kaj la ato en dativo: *māin nē us larkī kō dēkhā* (lit. 'mi-per tiu-knabino-al vidite', t. e. 'mi vidis tiun knabinon').

Io analoga okazas en la japana, kiu kutimas rigardi la agojn sen nepra rilato al ia aganto, t. e. emas uzi la verbojn senpersonaj. Se oni, en tia sistemo, volas esprimi la personon aŭ aĵon, kiu estas en rilato de kaŭzo kun la ago, oni uzas ilojn, kiuj esprimas la priparolitecon, ne la subjektecon. La japana frazo *kodomo wa tabemas* respondus pli ĝuste al ia 'pri la infano(j) okazas ia manĝado', ol al nia 'la infano manĝas'. La japana eĉ malvolvis, sur tiu bazo, originalan konjugacion: anstataŭ distingi tri personojn ĉe aktiva aŭ pasiva voĉo, tiu lingvo distingas «voĉojn» laŭ la sentaj rilatoj inter la interparolantoj: ili distingas tiele multajn gradojn de ĝentileco, de la humila —tradicie rezervata por la parolanto— ĝis la honora; se oni aldonas, ke ili disponas pli ol dek manierojn esprimi la pronomon *mi* (intelektulo, metiisto, farmisto, virino, nobelo ktp ne uzos la saman nek la saman «voĉon»), oni facile komprenos, ke tiel

¹ Spuron de tiu «ergativa» kazo la lingvistoj supozas en la opozicio, en la latina, de la nominativoj finiĝantaj per *-s* (*dominus, dux*) kaj iam uzitaj en la verbaj frazoj, al la nominativoj senfinaj (*rosa, templum*), iam uzitaj en la substantivaj frazoj. N. S. Trubetzkoy vidis en tiu konfuzo de la ergativo kaj nominativo la ĉefan karakterizon de la hind-eŭropaj lingvoj.

delikata esprimaro povas senerare anstataŭigi la sistemon de la latinida konjugacio, almenaŭ tiel longe, kiel daŭros la komplika socia hierarkio, kiu ĝin naskis.¹

Se al nia tre simpla, ĉi-supra frazo ni aldonas unu novan elementon: *das Kind ißt die Suppe* 'la infano manĝas la supon', ni denove trovos, por esprimi tiun objekton, malsamajn rimedojn, laŭ la lingvoj. Kelkaj montros ĝin per aparta kazo, la akuzativo: la germana, la hungara, la slavaj lingvoj. Aliaj montros ĝin per la loko de la vorto post la verbo, kiel en la franca: *l'enfant mange la soupe* aŭ la ĉina: *ō cē fan* 'la infano manĝas la rizon'. Por Ĉino aŭ Anamo, la germana frazo, kun siaj ses esprimataj gramatikaj rilatoj, ŝajnos do ŝarĝita de perfekte superflua precizigoj. Sed la sama frazo, al anoj de kelkaj aliaj lingvoj, ŝajnus mizere malriĉa en esprimataj rilatoj. En la hungara la verbo *enni* 'manĝi' havus malsaman formon laŭ tio, ĉu la objekto estus io difinita, kaj tiam oni diras *en*, aŭ io nedifinita, kaj tiam oni diras *en*, kvazaŭ la ago 'manĝi ion difinitan' estus diferenca de la ago 'manĝi ion nedifinitan'. En la jana (indiana lingvo de la Norda Kalifornio), la verba sufikso responda al nia -as esprimus ne la nombron de la subjekto, kiel en la franca, ne la difinitecon de la objekto, kiel en la hungara, sed la fakton, ke la raportaĵo estas propra sperto de la parolanto, t. e. ke li mem vidas la infanon manĝi; oni uzas alian sufikson, se li nur citus la aserton de alia persono, ekz-e se la koncerna frazo troviĝus en rakonto, en legendo ktp. Tio povas ŝajni al ni tute ekstergramatika afero, sed tio estus nur ŝajno: en tute aliaj sociaj kondiĉoj, la parola franca lingvo kreis al si unu morfemon por esprimi la saman precizigon, kaj distingas inter *l'enfant i-mange sa soupe* kaj *l'enfant i-mange sa soupe, qui-dit*, per kiu lasta frazo oni signas, ke oni transdonas alies aserton kaj ne respondecas pri ĝia vereco. Alia indiana lingvo, la kŭakiutla, postulus la precizigon de la distanco, ĉu la priparolataj estas videblaj de la parolanto, aŭ en ia nedifina malproksimeco ktp.

Oni vidas do, ke ĉe la plej simplaj frazoj, la nombro de la faktoj, kies esprimadon tiu aŭ alia lingvo opinias necesa, estas tre

¹ La informojn mi danke ŝuldas al s-ro Teruo Mikami.

varia; la permesata kvanto da subkomprenitaĵoj kaj la specoj de tiuj subkomprenitaĵoj estas tute malsamaj de unu lingvo al alia.

Kaj se ni esplorus frazon plurpropozician, kia komplikeco, kiaj diferencoj! Nenio ŝajnas al ni pli simpla kaj facile uzebla, ol subpropozicio rilata aŭ tempa, sed, ekster la hindeŭropaj lingvoj, tre malmultaj disponas tiajn subtilajn esprimilojn. Kaj eĉ inter la hindeŭropaj, pluraj preferas aliajn dirmanierojn. Ni trovas strangaj la turkan, kiu tradukas la frazon 'li ne povis kredi, ke vi estus veninta' per du vortoj signifantaj proksimume: *al-veninteco-via li-ne-estis-povinta-kredi*, aŭ la finnan, kiu transformas la simplan 'mi ne povas fari tion' en ian *minä en voi olla tekematta sitä*, t. e. 'mi ne povas esti faro-sena ĝin'. Sed kion pri la irlanda, kiu anstataŭ demandi: 'kial vi leviĝis tiel frue?' preferas diri: *kia kaŭzo de tiu fruleviĝo far vi?* Aŭ pri la angla, kaj tia ordinara konversacia frazo, ekz-e: *dont you believe by her madaming me I am French* (lit.: 'ne kredu per ŝia madam-ado min mi estas Francino', t. e.: 'ne kredu, ĉar ŝi diris al mi «Madame», ke mi estas Francino')?

Antaŭ tia diverseco de pensomuldiloj, oni povus eĉ unuamomente demandi sin, ĉu entute traduko estas ebla. Kaj tamen, en la plej malnovaj epokoj, inter plej diversaj gentoj, tradukado ĉiam ekzistis, kaj ordinare sen tro da miskomprenoj, almenaŭ sur la elementa ŝtupo. Oni trovis la unuajn dulingvajn vortarojn, la sumero-akadajn, en la mezopotamiaj prifosoj, kaj ili datiĝas de Hamurabi, ĉirkaŭ du mil jaroj antaŭ Kristo. Kaj dum la tuta — kaj malgaja — historio de la koloniaj ekspedicioj, la konkerantoj, ĉu Cezaro en Britonio, ĉu Ĝiŝis-Hano en Irano, ĉu Pizarro en Peruo, ĉiam trovis al si interpretistojn. Ofte estis komercisto, al kiu la akiremo donis neatenditajn lingvokapablojn; fojfoje ili uzis pli plaĉan (sed ne malpli kostan) metodon: Cortés ŝuldis grandparte siajn sukcesojn, kaj eĉ sian vivon dum la «sanga nokto» de Meksiko, al sia konkubino, la bela aztekino, Marina. Kaj la franca poeto Arturo Rimbaud, bezonante eklerni, por sia armiltrafiko, plurajn dialektojn de Abisenujo, simple provizis sin per poliglota haremo, kiun li aludis kiel siajn «litvortarojn».

Tia interkompreniĝo estis ebla pro tio, ke, sub tiel diversaj vestoj, ĉiam retroviĝas identa pensirado, komuna al ĉiu homo.

Kiel ajn surprizaj povas ŝajni la manieroj ilin esprimi, ĉiuj homoj distingas inter la aĵoj, la agoj kaj la kvalitoj, ĉiuj distingas tion, kio okazas, disde la personoj aŭ la aĵoj, kiujn koncernas tiu okaziĝo, ĉu kiel kaŭzon, ĉu kiel celon. Traduko estas do ĉiam ebla, sed plejofte je la kosto de ia spirita gimnastiko, necesa por pasi de unu gramatika sistemo al alia. Kaj tia trapaso ne estas ordinare tujmomenta.

Jen kial la nuntempe tre uzata sistemo de samtempa tradukado, pere de mikrofonoj kaj orelumoj, la fama *Filene-Finlay Translator*, laŭdata en la gazetaro kiel la solvo de ĉiaj lingvaj malfaciloj, ne prezentas tamen kontentigan solvon. Krom la okazoj, evidente maloftaj (aŭ, pli ĝuste, kiuj devus esti maloftaj en vere vivantaj kaj vere diskutantaj internaciaj kunvenoj), kiam oratoro legas prelegon sufiĉe frue verkitan, por ke la sekretarioj povu anticipi liveri al la tradukontoj jam tajpitan tekston, tiuj interpretistoj trovas sin antaŭ la kompleksa tasko aŭskulti la oratoraĵon, registri ties sencon (en la okazoj, kiam ĝi havas unu, kaj kiam ili ĝin komprenas), ekpensi la rimedojn gramatikajn kaj leksikologiajn por ĝin traduki, kaj fine elparoli tiun tradukon en la mikrofonaĵon. Eĉ se temas pri tre najbaraj lingvoj, povas okazi, ke la nura konstruo de la frazoj tiel diverĝas, ke la tradukisto estas devigata atendi la finon de la frazo aŭ frazparto, por povi transdoni ĝin sub la nova formo. Se li aŭdas, ekz-e, anglan parolanton diri: *The social, economic, political, cultural, moral and spiritual situation of the people...* kaj se li devas traduki tion francen, li devas ĝisatendi la aŭdon de la vorto *situation* antaŭ ol komenci, ĉar la franca ordigas la adjektivojn jene: *La situation sociale, économique, politique, culturelle, morale et spirituelle du peuple...* Sed, kompreneble, dum li ĝisatendas la vorton *situation* kaj poste rekonstruas inverse la frazmembron, la angla oratoro daŭrigis sian parolon — kaj la kompatinda interpretisto, ne povante plu sekvi lin egalpaŝe, devos, por bone traduki jenan parton de la teksto, foroferi tian alian. Kaj kiu povus anticipi decidi, ke ne la ĉefajn vortojn li tiele preteraŭdis?

Fronte al tiaj malfacilaĵoj, kiel supera pruvis sin nia Esperanto! Ne tial ke ĝi, pli bone ol alia nacia lingvo, kapablas traduki rapide kaj ĝuste ĉiujn oratoraĵojn: ĉar en tia funkcio ĝi renkontus la samajn obstaklojn, kiel ĉiu ajn nacia lingvo — diferencoj de vort-

ordo, de frazkonstruo ktp. Sed ja tial ke tradukadon ĝi komplete eliminus. Kiu diplomato, sciencisto aŭ literaturisto ne povus dediĉi al ĝia studo la bezonatan unu jaron, se nur la modo postulus aŭ la neceso urĝus? La propran penson ĉiu oratoro muldus en la esperantan formon, kun tia rezultato, ke nenio malklara aŭ konfuza povus almiksiĝi kaj ĝeni la komprenon, ke nenia sento pri malsupereco aŭ timo de ridindiĝo embarasus lin, ĉar ĉiuj diskutantoj starus sur la sama grundo, en egalaj kondiĉoj. Ĉiuj esperantistoj jam de longe spertis tion en siaj kongresoj, kunvenejoj, korespondoj; sed ne ĉiuj eble pripensis, kiel tiu rimarkinda rezulto estis atingita. Mi do fine volus tiri la atenton al unu el la karakteroj de nia lingvo, kiu konsistigas ĝuste en tiu funkcio ĝian superecon sur la ceteraj planlingvoj.

La ĉefa nome estas, ke Esperanto plej altgrade leksikonigis ĉiujn gramatikajn rilatojn. Tiuj finaĵoj: *o, a, e, i*, —kiuj ŝajnas ofte superfluj el la vidpunkto de la ekonomio (ĉar *tabl* estas necese *o*, ĉar *bel* estas necese *a*, ĉar *ir* estas necese *i*, diras iaj occidentalistoj — kaj eĉ kelkaj esperantistoj) — havas ja tiun ĉefan rolon, ke ili gvidas la aŭskultanton al ĝusta kaj tuja ekkapto de la gramatika rolo kaj funkcio de ĉiu vorto. Nenia ebla konfuzo, kiel en la franca inter *un riche aveugle* kaj *un aveugle riche* ‘riĉulo blinda’ kaj ‘blindulo riĉa’, aŭ eĉ inter la du signifoj de *les pauvres fri-leux*, ‘la kompatindaj fridotimuloj’ aŭ ‘la fridotimaj malriĉuloj’. Antaŭ tri jaroj, J. Audiberti prezentis en Parizo sukcesan teatraĵon, *Le mal court* — kies titolo estis egale komprenebla kiel ‘La mallonga malsano’ aŭ ‘La malico kuras’; kaj nur post aŭdo de la dramo oni povis ekscii, ke la ĝusta traduko estas la dua: ĉiuj konfuzoj, kiujn estigas la plurvizaĝeco de vortoj kapablaj pasi de unu gramatika kategorio al alia sen ia forma averto. Samajn danĝerojn kaŭzas en la angla la samaj kaŭzoj. Jenan frazon de A. Christie: *all of which went to show how little Emmy knew miss Pinnegar* oni povas traduki, laŭ tio, ĉu oni rigardas *little* adjektivo aŭ adverbo, per ĉio ĉi nur montris, kiel ^{la}malgranda Emmy konis f-inon P.’ aŭ per ‘... montris, kiel malmulte Emmy konis ...’ Grupo da vortoj kiel *the mystic rose* povas signifi ‘la mistikuloj sin levis’ aŭ ‘la mistika rozo’, depende ĉu *rose* estas verbo aŭ substantivo. En jenaj versoj de T. S. Eliot:

*Unflowering between
The live and the dead nettle,*

oni rajtas dubi, ĉu *live* estas substantivo (kiel tradukis A. Gide) aŭ adjektivo, kaj ĉu *dead* estas aŭ ne memstara vorto; kaj, ĉar en tia simbola poezio certe ne la senco povas gvidi, oni hezitos elekti el '(Senfloranta inter) La vivo kaj la lamio' kaj '. . . La viva kaj la morta urtiko'. Nenio simila riskas okazi en E, dank' al ĝiaj markvokaloj, kies utilecon spertas precipe aŭskultanto: la orelo tuj klasas la vortojn, de kiam ĝi ilin aŭdas; kaj se la adjektivo akordiĝas kun la substantivo, tion decidis Zamenhof ne el blinda oboeo al nacilingvaj kutimoj, sed kun la klara intenco garantii eksteran gramatikan klarecon. Ed. Sapir skribis, ke «la akordiĝo estas manifestado de timo kontraŭ la plej malgranda dusenceco»: kaj sur kia kampo la senckonfuzoj estas pli probablaj kaj pli timindaj, ol sur la internacia? Same pri la no-kazo: tiun finaĵon oni povus rigardi pleonasma, ĉar en ok el dek okazoj la objekto estas aŭtomate lokita post la verbo. Sed por lingvo, kiu devas esti nenies gepatra lingvo sed ĉies propraĵo, oni ne povas fidi tiajn aŭtomatecojn. Inter samlingvanoj, la denaskiĝa kutimo al certaj kuniĝoj de vortoj, al certaj difinitaj subkomprenaĵoj, al certaj tradiciaj evitoj de parolobloj faciligas la komprenadon kaj povas helpi kompensi la difektojn de nacia lingvo. Kvankam ne tia estas ĉiam la okazo. Mi citos nur la 5an paragrafon de diplomatia noto, sendita de la Brita Registaro al la Usona, kaj publikigita en la «New York Times» la 4an de Januaro 1950: «La interkonsento, kiu validus tri jarojn, estus skribita kaj redaktita tiamaniere, ke ĝi ebligus nur unu solan interpretadon». Mira fido en la klareco de la angla lingvo! Sed tia sinteno estas plene komprenebla, se oni memoras, ke ĝuste la angla estas unu el la lingvoj, kiuj lasas neesprimita plej grandan kvanton da gramatikaj rilatoj.

Nia Esperanto, kiu, tute kontraŭe, sisteme kaj fonetike esprimas ilin ĉiujn, povas esti difinita kiel lingvo, en kiu la subkomprenaĵoj estas limigitaj je la minimumo, sekve en kiu la klareco de la parolo estas certigita je la maksimumo. Jen ĝia plej efektiva titolo pretendi la rolon de mondlingvo kaj la privilegion de komuniklingvo en la internaciaj konferencoj.

II. SENCAJ PROBLEMOJ

En la antaŭa ĉapitro mi montris la komprenmalfacilojn kaŭzitaĵojn de la *formo*; mi volus nun skizi tiujn, kiujn elmetas la *enhavo*.

Ili ĉiuj fontas el la sama fakto, ke lingvo estas tiel kompleksa aparato, ke tuta homa vivo estas apenaŭ sufiĉa por ĝin kompetente estri. El tio sekvas, ke fremdan nacian lingvon oni neniam povas tiel bone scii, kiel sian propran. La mekanismoj, kiuj enpenetris en nian infanan menson, atingis tiel profunde en la subkonscion, ke ni neniam povas ilin plene forgesi aŭ eĉ forpeli, nek povas plene liberiĝi de ilia despoteco. Kaj ĉe la plej eta malstreĉiĝo de la atento, ili kaŝe reokupas sian regpostenon, kun okazigo de la plej bedaŭrindaj mistradukoj. Feliĉe, kiel rimarkigis franca eseisto, kaj mem granda tradukinto, Valery Larbaud, la historio ankoraŭ registris neniun ekzemplon de tradukisto, kiu mortigus sin pro tio, ke li kulpis kontraŭsencan!

La plej malalta ŝtupo de la mistradukoj estas eraro pri la senco mem de tiu aŭ alia vorto. La kaŭzo estas plejofte nescio, sed ankaŭ fojfoje neatento; oni senkonscie asimilas fremdan vorton al samforma, sed malsamsenca vorto en sia propra lingvo. Ŝajne, simpla rimarkigo pri la danĝeraj similaĵoj devus sufiĉi: kiam oni unu fojon eklernis, ke en la sveda *bonjour* signifas 'redingoto', *russ* signifas 'poneo' kaj *russin* signifas 'sekvinbero', aŭ ke en la kroata *potpis* estas 'subskribo', *koliko* estas 'kiom longe', *meso* estas 'viando', ke *oni* egalas 'ili' kaj *ili* egalas 'aŭ', oni emus kredi, ke oni neniam plu forgesos tiajn kuriozaĵojn — aŭ faros tion nur por ŝerco, kiel la junaj francaj latinistoj, kiuj interpretas la Vergilian

Numero Deus impare gaudet

per 'la numero du ĝojas esti nepara', aŭ iliaj junaj anglaj kolegoj, kiuj tiras el la Cicerona *Pax in bello* la higienan konsilon 'Kvieteco en la ventro!' Kaj tamen! Ĉu nerepremebla forto de la mensrutino, ĉu neeskapebla tentado de la tradukdemono, la

realaĵo estas ne malpli fekunda, ol la fantazio, kaj riĉega estas la monstromuzeo de la tradukarto.

Mi memoras ekzamenan taskon de bakalaŭr-aspiranto, en kiu la Vergilian version *Una ambo procedunt* 'ambaŭ samtempe ekiras' estis transformita en la franca: *Une, deux! Ils s'en vont* 'Unu, du! Ili foriras'. Lastatempe, mi hazarde vidis unu mian lernanton, kiu el la hispana *los caballeros de la mesa redonda* 'la sinjoroj de la komuna manĝotablo' noblanime tiris: *les chevaliers de la Table Ronde* 'la kavaliroj de la Ronda Tablo'. Félix Boillot kolektis¹ kelkajn valorajn perlojn el la ekzamenaj taskoj de anglaj studentoj pri la franca lingvo: *du jambon cru* 'kruda ŝinko' fariĝis *what was thought to be ham* 'kion oni kredis esti ŝinko', *une écrevisse* 'kan-kro' alivestiĝis en *lady typist* 'tajpistino', kaj la ridetanta frazo *l'abbé était gras, car il aimait la bonne chère* 'la pastro estis dika, ĉar li amis bone manĝi' alprenis kontraŭklerikan koloron: *the abbot was fat for he loved the dear housemaid* 'la abato estis dika, ĉar li amis la karan servistinon'.

Sed estus iluzio kredi, ke nur lernantoj aŭ amatoroj kulpas tiajn fuŝaĵojn. En la franca traduko de la fama libro de admiralo Byrd pri lia sudpolusa esplorvojaĝo, oni povas legi, ke li kuiris *je la varmo de la primitivaj fornoj*, t. e. de *primus stoves* aŭ petrolgasaj fornetoj, kio estis tiutempe la lasta vorto de la civilizo! En hispana romano, iu kamparano, eksciinte pri la morto de sia filo, *viŝis al si la okulojn per herbo anstataŭ poŝtuko*, asertas la franca tradukisto, miskompreninte la hispanan *con un pañuelo de yerbas* t. e. 'per granda krudedesegna poŝtuko'.

Mi ne rezistas la plezuron citi anekdoton, siatempe aperintan en la «Finnlanda Bulteno». En la nordan parton de tiu lando, detruitan dum la lasta milito, anglaj kvakeroj venis partopreni la rekonstruadon; fine de ilia labortempo, ilia estrino estis intervjuita ĉe la finna radiofonio, kie interpretisto tradukis en la finnan la respondojn de la simpatia Anglino. Sed kia estis la surprizo de la aŭskultantoj (tiel komprenebla, kiam oni memoras la rigoran sintenon kaj de la kvakeroj kaj de la finna registaro pri tiu

¹ En la enkonduko al sia libro *Le Vrai Ami du Traducteur anglais-français*, Paris, 1930. Vd ankaŭ *Le Second Vrai Ami du Traducteur*, Paris, 1956.

punkto), aŭdante ŝin deklari: *En Laponio, ni trovis multe da bona alkoholo!* Feliĉe, oni poste informis ilin, ke la skandalo ekzistis nur dank' al la momenta forgesado de la interpretisto pri la diferenco inter *good spirits* 'bona alkoholo' kaj *good spirit* 'bona spirito'.

La afero estas pli grava, kiam temas pri titoloj. En la 18a jarcento, Colley Cibber verkis komedion *Love's Last Shift* 'La lasta elturniĝo de l' amo': ĝi fariĝis france sub la plumo de La Place: 'La lasta ĉemizo de Amo'. Ĉiam la sama frivoleco de tiuj Francoj! Ili cetere ŝajne ne pliserioziĝis kun la tempo. Oni ankoraŭ nun vendas en Francujo volumon tradukitan el Rudyard Kipling, kun la titolo *Simples Contes des Collines* 'Simplaj fabeloj de la montetoj', kiu vere rompas la rekordon de miskompreno: tri eraroj el kvin vortoj! La angla titolo *Plain Tales ^{from} of the Hills* signifas proksimume: 'Cinikaj klaĉoj el la Himalajaj Stacioj'.

En ĉi tiuj ekzemploj, la erarintoj ne havas ian ekskuzon. Sed estas okazo, kie la naciaj lingvoj, kvazaŭ insideme, prezentas tiajn eblojn de konfuzo, ke pardoneblaj estas kelkaj mispaŝoj. Eĉ en mia patra lingvo, kiu havas reputacion de klareco, oni ne malofte povas stumbli kontraŭ tiaj obstakloj. Germano, tradukinte la raporton de franca esploristo en la Centra Afriko, skribis pri certa tribo: *es ist unmöglich mit ihnen zu sprechen* 'estas neeble paroli kun ili', dum la tuta rakonto pruvis la malon. La franca teksto diris nur: *leur parler est impossible* 'ilia dialekto estas nebla', t. e. 'terure komplika' (*parler* povas efektive esti komprenata kiel infinitivo aŭ kiel substantivo). Mi legis, en komentario de Baudelaire, pri unu aldonita strofo, jenan noton: *VI. Ce dernier manuscrit dans le placard*: por la neinicito, tio ŝajnas signifi: 'tiu lasta manuskripto en la ŝranko', dum la senco estas: 'tiu lasta [strofo] manskribita sur la unuaj presprovaĵoj'!

F. Boillot citas analogajn konfuzaĵojn el la angla gazetaro: «Mi turnas la paĝon: *Red Designs on China*. Mi naive tradukas: 'La ruĝaj desegnoj sur la porcelano'.—Mi iom maltrafis, ĉar la senco estas: 'Intencoj de la Bolŝevikoj kontraŭ Ĉinujo'...

»Kaj jen *Workers Fashion Plates*. Vi komprenas: 'Laboristoj fabrikas telerojn', kaj neniu povus riproĉi vin pri tio; tamen la ĝusta senco estas: 'Tutpaĝaj modgravuroj por laboristinoj'...

»Sur la sportpaĝo mi elŝovas veran perlon: *Surbiton Selling Three Year Old Hurdle*. Mi, kiu scias proksimume la anglan, konkludas, ke iu sinjoro, nomata Surbiton, estas vendanta palisaron tri jarojn malnovan. Tion tre precize signifas la angla teksto. Sed ne! La ŝlosilo de la enigmo liveras: 'Vetkurado kun bariloj ĉe Surbiton por trijaraj ĉevaloj poste vendotaj'. Ĉu oni povus trovi pli bonan?»¹

Eĉ en la kuranta prozo, oni povas renkonti tiajn dusencaĵojn. En romano de A. Christie, mi legas: *He had never been known to miss Ascot*, kion oni egale povas kompreni: 'Li neniam estis konata de F-ino Ascot' aŭ: 'Oni neniam vidis lin ne ĉeesti la Ascot-kuradojn'.

Tiajn danĝerojn prezentas precipe la lingvoj, kiuj lasas sen fonetika esprimo gravajn gramatikajn rilatojn. Sed gravas ankaŭ la fakto, ke sub la sama konkreta vorto, ne ĉiu lingvo metas ĝuste la saman signifon.² Ni turnu nin, unu fojon plie, al niaj japanaj samideanoj. Recenzante vortaron, s-ro Teruo Mikami rimarkigis: «Eĉ la plej fundamentaj vortoj, kiel *kapo* kaj *kolo*, elvokas malĝustan ideon en la menso de Japanoj, kiuj ne sufiĉe scipovas iun ĉefan eŭropan lingvon... En Esperanto, *kapo* estas la korpoparto, entenanta la kranion, cerbon, vizaĝon kune kun la organoj de pluraj sentumoj: sed ĝuste tiun parton, sendepende de la malsupra parto de la korpo, ni nomas japane *kubi*, t. e. 'kolo'. La japana-vorto *atama* t. e. 'kapo' signifas: 1° la parto de la korpo entenanta la kranion kaj la cerbon; 2° tiu parto rigardata kiel la sidejo de inteligento; 3° la vorto. Siaflanke, la japana *kubi* 'kolo' signifas: 1° same kiel en Esperanto; 2° la kapo dehakita ĉe la kolo. El tio sekvas, ke en la japana *Nova Testamento*, la filino de Herodias petas al Herodo, dirante: *Donu al mi ĉi tie sur plado la kolon de Johano la Baptisto!*».³

Sendube tio estas iom neordinara okazo. Tamen, kvankam la propra senco povas esti identa inter du lingvoj ĉe la nomoj de

¹ Jam citita libro, pĝ 13.

² Tio okazas eĉ inter du dialektoj de la sama lingvo: sub *roach* la Angloj komprenas 'ploton' kaj la Usonanoj 'blaton'!

³ «Oomoto», Majo-Junio 1956, n° 191-192, pĝ 81.

korpoparto aŭ de bestoj, ofte la metaforaj uzoj montras, ke intervenis ia senca transŝoviĝo jam ĉe la konkreta senco. La anglaj *arm* kaj *hand* montras ja ĝuste la samajn aferojn, kiel la francaj respondaj *bras* kaj *main* 'brako' kaj 'mano': sed se ni rigardas la metaforajn esprimojn, ni konstato, ke la angla uzadas *hand* por esprimi la laboroforton, kion la franca esprimas per *bras*: *to be short-handed* (ne konfuzu kun la usona *to be shorthanded* 'esti stenografiita!') respondas al la franca *manquer de bras* 'havi ne sufiĉan laborantaron'.

Ni komparu la franca *chameau* 'kamelo' kaj la araba *gamal*: por la Franco, la vorto elvokas la bildon de iom groteska besto, kun la asociitaj ideoj de *un vieux chameau* 'groteske vestita maljunulino' kaj de *tu n'es qu'un chameau!* 'vi estas nur bestaĉo'; por la Arabo, ĝi elvokas la ideon pri nobla, delikata kaj utilega besto, kun la asociitaj ideoj de la longaj karavanoj tra la dezerto kaj la heroaj aventuroj de la mezepokaj batalantoj. Oni vidas, ke, se *chameau* tradukas *gamal*, ĝi tradukas ĝin tre malbone.

Sed oni ne bezonas iri tiel malproksimen, por konstati egajn diferencojn en la maniero, kiel du najbaraj popoloj imagas la karakteron de unu sama besto. En Frostavallen, oni donis al mi amuzan parodion de la fama monologo de *Hamleto*; iu A. E. M. B. faris el ĝi la monologon de stenotipistino, kiu hezitas antaŭ la edziniĝo. Kaj tie mi legis:

*Alie, kiu volus elportadi
La mokojn kaj kapricojn de la estro ...
Turmentojn de la bubo oficeja,
La katinecon, kiun ĉiu kolegino
Regalas al merito efektiva ktp ...*

Neniu ajn franca tajpistino ekpensus plendi pri la 'katineco' de siaj koleginoj, se ŝi havus la ŝancon havi tiajn! Ĉar france *chatterie* signifas 'dorlotaĵo', eble nur sincereta, aŭ profitcela, sed agrable suferata. *I am a cat!* respondas al la franca *je suis rosse* aŭ, pli familiare, *je suis vache* (kie miaj samlingvaninoj anstataŭigas, kiel simbolon de la malico, la katinon per la ĉevalo aŭ la bovino), dum junulo diros al vi fiere pri sia amatino: *elle est chatte!* 'ŝi estas

karesamal' Kaj oni plu asertos, ke la Francoj ne amas la bestojn, kaj ke la Angliinoj adoras siajn katojn!

El la japana literaturo, ni vidas, ke la kukolo elvokas por tiu popolo plej poezian atmosferon. Oni eble konas la ĉarman anekdoton de la juna poetino Ĉijo, kiu okaze petis de migra instruisto, Rogenbo, lecionojn pri la arto de hajko. La instruisto estis kompleza, sed iom senzorga; tiel, unu vesperon, li donis al sia lernantino, kiel temon, la kukolon. Kaj dum ŝi pripensis, li simple endormiĝis. Li dormis la tutan nokton, kaj la knabino respektate atendis, ĝis, je la unuaj tagheliĝoj, li malfermis la okulojn; tiam ŝi simple recitis:

Hototogisu
hototogisu — tôte
ake ni keri.

Tio estas:

Kukolo,
kukolo — fine
tagiĝ' alvenis.

Ĉe tiuj simple belaj (kaj kaŝe ironiaj) versoj, la majstro klinis sin kaj adiaŭis, dirante, ke ŝi ne bezonas plu instruon. Nu, la tuta ĉarmo de la anekdoto kaj de la poemeto estas propre ne redonebla en francan lingvon: ĉar tie la kukolo havas nomon ne tre poezian, kvankam sonimitan (*coucou*, t. e. *kuku'*) kaj precipe ĝi estas la simbolo de la kokrita edzo: kaj la situacio de kokrito, jam de la mezepoko, ĉiam aspektis al Francoj, io tre komika (kaj tute ne kompatveka, kiel ĉe kelkaj pli realistaj popoloj). Tiel ke, por provi ĝuste traduki la anekdoton, oni devas esti malfidela kaj anstataŭigi la kukolon per najtingalo, ekzemple!

Evidente, miaj legantoj riproĉos al la Francoj ilian nekuracblan *gauloiserie*, sed . . . finfine la franca ruĝiĝus diri, kiel la angla, ke «Fraŭlino Smith lernas la novajn dancojn *sub* Professor Jacques Dalcroze», aŭ kiel la rusa, ke «Sinjoro Popov edziĝis *sur* Fraŭlino Olga»!

Samaj malfaciloj povas okazi ĉe la abstraktaj vortoj, ĉar la ligitaj kunideoj, kiujn ili elvokas, ne ĉiam estas egalaj en la diversaj lingvoj. La germana *nüchtern* ĝuste respondas, en la propra senco, al la franca *sobre* kaj al la angla *sober*: ĉiuj tri vortoj signifas ja 'malebria'. Sed ĉiu lingvo aparte malvolvis flankan sencon: en la angla *sober* kromsignifas 'serioza': *a sober opinion* estas bone pripensita opinio; en la franca *sobre* kromsignifas 'modera, senekscesa', kun ia laŭda nuanco: *un dessin sobre* estas severgusta desegno; en la germana *nüchtern* akiris la mallaŭdajn kromsignifojn de 'senideala (homo)', 'banala, senloga (afero)'. La rezulto estas, ke esprimon, kiel *sobra stilo*, Franco komprenos 'elegante senornama' kaj Germano 'tede sensprita'. Tiuj diverĝaj pensiradoj montriĝas klare ĉe la proverbaj komparoj: la Francoj diras: *sobre comme un chameau* 'sobra kiel kamelo', la Angloj: *as sober as a judge* 'serioza kiel juĝisto' kaj la Germanoj: *nüchtern wie ein Kaufmann* 'malsentimentala kiel komercisto'! Oni tie konstatas, kiel singardeme oni evitu tiajn metaforajn uzojn en Esperanto, se ne certe, ke ili estas internacie kompreneblaj. La verso de Baghy

forgesii pri la damna sobro

ne esprimas strebon al ebrio, sed naŭzon pri fia realaĵo — sed, krom la Hungaroj kaj la Germanoj, kiuj legantoj komprenis? Ne imitinda ekzemplo.

Restas ankoraŭ unu grava kaŭzo de malfideleco en la tradukoj, kiu ne plu dependas de la ĝusta senco de la vortoj, nek de la etoso elvokita de ili, sed de io pli subtila kaj tamen esenca, mi volas diri la konstrumanieron mem de la lingvoj. Tiu malfacilo ne sentiĝas, kiam oni pasas de unu hindeŭropa lingvo al alia, ĉar ĉiuj estas konstruitaj laŭ la sama modelo. Sed tuj kiam ni alvenas al alia lingvofamilio, ni spertas, ke io esenca mankas al la plej strikta traduko, kaj la manko estas des pli sentebla, ju pli literatura estas la teksto. Ni vidis, ĉi-supre, ke kelkaj lingvoj kunĝluas ĉirkaŭ unu radiko amason da afiksoj por sinteze esprimi tutan ideokomplekson sub la formo de unu sola vorto; aliaj lingvoj esprimas nur la ideojn per unusilabaj vortoj, kiujn ili apudmetas kvazaŭ mozaïke, lasante al la spirito kompletigi la rilatojn inter ili. Inverse,

la hindeŭropaj lingvoj eklernis, de la heroe pacienca laboro de la unuaj helenaj pensistoj, krei al si rimedojn por analizi la homan penson, starigi klarajn rilatojn inter la vortoj de la propozicio, poste kunligi la propoziciojn kaj eĉ la frazojn en ampleksajn kaj logike artikigitajn periodojn, dank' al konjunkcioj, subjunkcioj ktp. Estas evidente, ke la efekto produktita de la arta uzado de unu el tiuj diverstipaj lingvoj preskaŭ neniam povos esti konservata en alia de alia tipo: la impresoj pri denseco, blokeco de la pajuta lingvo, ekz-e, aŭ tiu de konkreta dinamismo de la ĉina forperdiĝas, tuj kiam oni transponas la parolon en la harmonian dismetitecon de la franca.

Jen fragmento de ĉina rakonto: «Tiam li rapide iras al tiu kabano; tie estis forgesita la mono; tiam li estas atendanta, ke iu venos; tiam li donos al la alia». Oni vidas, ke la faktoj aŭ ideoj estas zorge aranĝitaj en tia ordo, ke la komprenado de iu ajn el ili ne dependu de alia ankoraŭ ne esprimita; kaj tia maniero rakonti havas ian simplecon, ian logikecon, kiu plaĉas al la spirito; sed ĉu ni povas diri, ke la ĉi-supra traduko, kiel ajn fidela ĝi estas, vere redonas por eŭropano la stilon de la ĉina aŭtoro? Kaj kiu tradukisto ne preferus skribi, laŭ nia maniero rakonti: «Li rapide revenis al la kabano, kie li estis trovinta la monon, kaj restis tie, por ke, se iu venus ĝin serĉi, li povu ĝin redoni al tiu»?

La problemoj estas ankoraŭ multe pli prema, kiam temas pri altastila peco. Estus tro facile citi el la ĉina literaturo — ekzemple tiun *Vojo kaj Virto* de la legenda Lao Ceŭ, pri kies unu traduko s-ro Marcel Granet skribis: «perfekte konscienca, ĝi ne perfidas la tekston, sed ankaŭ ne permesas ĝin kompreni». Ni elektu ion pli proksiman al ni. Oni scias, ke la hebrea lingvo estis malriĉa je frazligiloj, mallerta esprimi la abstraktaĵojn — lingvo de lirikistoj, plena de energio, de pasio, de sovaĝaj ekkrioj kaj ardaĵoj — sed tiel ribela al la filozofio, ke la grandaj hebreaĵ pensistoj devis forĝi al si, en alia dialekto, la aramea, alian ilon, cetere ankoraŭ tre neperfektan. Nu, ĉirkaŭ la tria jarcento antaŭ Kristo, la Hebreoj ekkontaktis la helenan filozofion, kaj komencis meti al si demandojn, kiujn iliaj antaŭuloj neniam suspektis; unu el tiuj estis, ĉu ni povas ŝanĝi la mondon. Jen do, kiel Hebreo ĝin prezentis:

*Kian profiton havas la homo de ĉiuj siaj laboroj,
 kiujn li laboras sub la suno?
 Generacio foriras kaj generacio venas,
 kaj la tero restas eterne.
 Leviĝas la suno kaj subiras la suno,
 kaj al sia loko ĝi rapidas kaj tie ĝi leviĝas.
 Iras al sudo kaj reiras al nordo,
 turniĝas en sia irado la vento
 kaj en siaj rondoj revenas la vento.
 Ĉiuj riveroj iras al la maro,
 sed la maro ne pleniĝas;
 al la loko, al kiu la riveroj alfluas,
 ili alfluas ĉiam denove.
 Ĉiuj aferoj estas lacigaj,
 ne povas homo tion eldiri;
 ne satiĝas la okulo de vidado,
 kaj ne pleniĝas la orelo de aŭdado.
 Kio estis, tio estos,
 kaj kio estis farata, tio estos farata,
 kaj ekzistas nenio nova sub la suno.
 Ekzistas io, pri kio oni diras:
 vidu, ĉi tio estas nova;
 sed ĝi estis jam en la eterna tempo,
 kiu estis antaŭ ni.
 Ne restis memoro pri la antaŭuloj;
 kaj ankaŭ pri la posteuloj, kiuj estos,
 ne restos memoro ĉe tiuj,
 kiuj estos poste . . .*

Oni rekoni la unuan paĝon de la *Predikanto*, en la admirinda traduko de Zamenhof, kiu tiel bele redonis la eĥon, la ritmon, eĉ la muzikon de la originalo. Sed, denove la sama demando kiel pri nia ĉina rakonto: ĉu tio estas vera traduko?

Evidente, tio dependas de la celo, kiun oni asignas al la traduko. Per ĝi, ni povas efektive difini al ni du malsamajn celojn: aŭ ni deziras abrupte ŝoki niajn legantojn per la kontakto kun fremda penso kaj fremda parolo — kaj en tia okazo, ni konservos

kiel eble plej fidele ĉiujn karakterojn de la originalo, precipe tiujn, kiuj estas plej malkutimaj al ni; aŭ ni deziras fari sur niajn legantojn la saman impreson, kian faris la originalo sur la legantojn aŭ aŭskultantojn de la aŭtoro — kaj en tia okazo, ni provas repensi mem la tekston, kaj trovi la rimedojn, kiujn tiu aŭtoro estus uzinta, se li estus nia samlingvano kaj samtempo.

La ĉi-supre citita traduko estas bona ekzemplo de la unua tipo. Sed, se ni penus imagi, kion la *Predikanto* skribus, se li parolus nian Esperanton, ni ricevus proksimume jenan eseeton:

Ĉu ekzistas progreso?

Estas neutile labori, ĉar oni povas percepti nenian progreson en la mondo, nek en la homo. Neniu el la kvar elementoj de la naturo povas doni al ni tian ideon: nek la tero, kiun ne movas la trapaso de la sinsekvantaj generacioj, nek la suno, kiu senfine rondiras la saman orbiton, nek la vento, kiu blovas alterne el la diversaj ĉefpunktoj, nenion atingante krom vasta kirlado de la aero, nek fine la akvo, kiu kuras de la fonto al la maro, por refari poste la inversan vojon. Ĉi tiu tuta monotoneco estas enuiga, pli ol oni povas diri. Ĉar la homo, kiom ajn li streĉas siajn okulojn kaj siajn orelojn, ne kapablas eltrovi ian ŝanĝiĝon en la irado de la aferoj: la estonteco simple reproduktos la estintecon, kaj la samaj fenomenoj ripetigās en senfina determinismo. Ekzistas do inter la generacioj absolute nenia komuneco de akiritaj scioj, nenia vera progreso.

Evidente, el tia traduko malaperis la tuta poezio de la hebrea: sed kiel pli klare kaj pli forte montras sin la konturoj de la rezonado! El tia specimeno oni povas konstati, unuflanke, la fundamentan unuecon de la homa pensado, aliflanke la egan diversecon de ĝiaj esprimmanieroj. Rekoni la unuan sub la dua ne estas ĉiam facile — kaj la ĉi-supra ekzemplo tion sufiĉe pruvigas.

Ĉar, se en teksto elvortita laŭ nia moderna maniero, ne estas eble konfuzi la detalojn kun la tuto, nek atribui al ĉiu el ili valoron apartan je tiu de la rezulta rezonado, male, en la hebre-maniera

prezentado, oni ĉiam povas heziti pri la ĝusta irado de la penso kaj demandi sin, ĉu tiu aparta trajto estas izola aserto aŭ nur relativa etapo de la demonstrado. Ni rigardu ekz-e en la citita paĝo la version 4an; la hebrea teksto *wəhā'ārec lə'ōlām 'ōmādeṯ*, kiun Zamenhof bone tradukis per *kaj la tero restas eterne*, estis interpretita de Hieronimo per *et terra stat in aeternum* — ĉar, same kiel en la hebrea, la sama verbo en la latina signifas 'resti' kaj 'stari'. Sed, kiam en la 16a jarcento, genia itala sciencisto, Galilejo, malkovris kaj demonstris, ke la tero rondiras ĉirkaŭ la suno, la katolikaj teologoj apogis sin sur tiu ĉi verso por pruvi, ke, laŭ la dia Biblio, la «tero staras eterne» kaj sekve ne povas moviĝi! Evidente, ili uzis la frazon kontraŭsence, sed tio estis ebla nur dank' al tiu hakata maniero de pensado de la hebrea verkisto, kiu permesis al ili rigardi la elementon de kompleksa rezono «kaj la tero restas eterne», kiel apartan, fundamentan veraĵon. Kaj oni scias la timindajn rezultojn, kiujn tia kondamno de la Inkvizicio havis kaj por Galilejo mem kaj por la malvolviĝo de la astronomio, kiu suferis malfruigon de unu jarcento.

Alian frapan ekzemplon de la influo de lingvokonstruo sur la homan historion montras la longa kaj fojfoje sanga disputo, en la kristanaro de la IVa jarcento, pri la naturo de la Kristo kaj ĝia rilato kun la naturo de Dio — alinome la disputo pri arianismo. Episkopo Ario (Areios) asertis efektive, ke inter la naturo de la Kristo kaj tiu de Dio ekzistas ia simileco, dum aliaj episkopoj kontraŭdiris, ke ambaŭ estas identaj. Por esprimi tiujn du nociojn, la helena lingvo kapablis konstrui du adjektivojn, tiel same klarajn kiel niaj esperantaj: *ὁμοούσιος* 'samsubstanca' kaj *ὁμοιοούσιος* 'similsubstanca'. Sed en tiu epoko, la okcidenta parto de la kristanaro jam de unu jarcento komencis paroli latine; kaj la latina lingvo kapablis traduki per adjektivo nur unu el tiuj du grekaj kunmetaĵoj: al *ὁμοούσιος* ĝi povis respondi per *consubstantialis* 'samsubstanca', sed ĝi posedis nenian rimedon por paŭsi la alian epiteton, 'similsubstanca'. Kaj tiu lingva neeblaĵo kondukis, en la Nicea koncilio de 396, la latinajn Patrojn voĉdoni unuanime kontraŭ la similsubstanceco, t. e. la arianismo, dum la helenaj dividis sin, preskaŭ egale, inter la du teorioj. La nefleksebleco de la latina lingvo kontribuis do, almenaŭ parte, al la diigado de Jesuo, kaj tiele

decidige influis la evoluon de la kristana religio, preparante la senfinajn kaj sensolvajn diskutadojn pri la internaj rilatoj de la Triunueco.

Mi ne volas tro insisti pri tiaj okazoj; tamen unu pli modernan ekzemplon mi mencios. Unu el la akuzitoj en la granda proceso, kiu okazis en 1947 en Madagaskaro okaze de la malgaŝa ribelo, unuafoje pridemandite de la enketisto: «Ĉu vi ne partoprenis en la ribelo?» respondis: «Jes» — kio estis registrita kiel memkonfeso. Nu, dum la proceso montriĝis, ke per sia «jes» li volis diri, ke li *ne* partoprenis: ĉar, en la malgaŝa same kiel en la japana kaj aliaj orientaj lingvoj, oni respondas per «jes» al negativa demando ĝuste en la okazo, kiam ni Eŭropanoj respondas «ne». Tiuj du vortoj, *jes* kaj *ne*, estas, en tiu funkcio, interjekcioj resumantaj tutan penson: la malfeliĉo estas, ke la subkomprenita penso *ne* estas la sama por orientano kaj por okcidentano; por la Malgaŝo, la elipso estis: «Jes, via opinio, ke mi ne partoprenis, estas ĝusta», dum ni subkomprenus: «Ne, mi ne partoprenis»; per aliaj vortoj, la orientano konsideras la opinion de la alparolinto, kaj ni nian propran opinion.

Tiaj ekzemploj montras la tutan gravecon de la problemo pri la tradukado. Ne povas temi pri simpla anstataŭigo de vortoj aŭ esprimoj el unu lingvo per respondaj el alia. La sencokompleksoj estas ofte tre delikataj kaj nuancoplenaj, kaj eĉ ne ĉiam facile kapteblaj de la fremdlingvanoj. Jen kial la elektrona tradukmaŝino ŝajnas al mi amuza paradokso de fantaziaj aŭ iluzioplenaj sciencistoj. Sufiĉas pripensi, kiom da diversaj signifoj unu sola vorto povas havi: la franca *pièce* devus esti tradukita jen per 'peco', jen per 'teatraĵo', jen per 'kanono', jen per 'ĉambro', jen per 'barelo', jen per 'dokumento', jen per 'artkukaĵo', jen per 'monero', jen per 'rompitaĵo', jen per 'poaĵo' ktp. La angla *box* signifas, laŭ la okazoj: 'loĝio', 'kondukbenko', 'kabanø', 'kofro', 'fako', 'kesto', 'manfrapo', 'skatolo', 'bukso' ktp. La hispana *cabo* respondas al 'kapo', 'restaĵo', 'prenilo', 'fadeno', 'terkapo', 'ludkarto', 'estro', 'fino', 'marŝnur(eg)o', 'kaporalo' ktp. Kaj la elekto inter tiuj multaj sencoj estas eĉ ne ĉiam precizigita de la ĉirkaŭtekstoj! Kiel do la maŝino povos scii, ke *ne quittez pas l'écoute* estas: 'ne forlasu la aŭskulton!', dum *ne lâchez pas l'écoute* estas: 'ne ellasu la

ŝkoton'? Ke *monter une pièce* signifas jen 'surscenigi teatraĵon', jen 'munti pecon', jen 'dekoracii kukaĵon'? Kiel ĝi povus distingi la okazojn, kiam *mettre en boîte* signifas propre 'enskatoligi' aŭ metafore 'primokadi'? Kiel ajn multegaj oni supozos la elektronajn kombinojn, ili neniam povos antaŭvidi la variecon de la lingvaj nuancoj. La sola maniero uzadi tian maŝinon (kaj efektive la sola praktikata ĝis nun) estas anticipe traduki por ĝia funkciado la koncernan tekston en intence simpligitan kodlingvon, la «maĉinan». Oni ne vidas tre klare la avantaĝon de tia procedo.

Antaŭ tiomaj kaj tielaj malfaciloj, kia estas la situacio de nia Esperanto? Estus infanece kaŝi al ni, ke nia lingvo ne povas alporti al ili tujan kaj plenan solvon. Se por ĉio, kio dependas de la lingvaj mekanismoj mem, Esperanto certigas, kiel mi antaŭe montris, tute klaran kaj senkonfuzan esprimadon de la penso (kondiĉe ke tiu penso estu mem klara!), ĝi povas nek liveri senmankan rimedon eskapi la kaptilojn, kiuj svarmas en la naciaj lingvoj, nek laŭbezone provizi siajn vortojn per la aŭreolo da nuancoj, da kunligitaj bildoj aŭ ideasocioj, kiuj garnas la vortojn de tiu aŭ alia nacia lingvo. Ĉu tio signifas, ke ni nenion alportas al tiu grandioza entrepreno de la homa interkompreniĝado? Tute ne. Du faktoj permesas al ni, se ne proponi radikalajn ŝanĝon de la situacio, almenaŭ esperi ĝian estontan plibonigon.

La unua estas, ke Esperanto, fariĝante la dua lingvo de ĉiu kulturita homo, ebligos iompostioman malaperon de la funkcio de interpretisto — kio povos ĉagreni nur la anojn de tiu cetere respektinda, kaj alte salajrata, korporacio. Por la interesoj de la tuta homaro, la atingo, ke ĉiu homo povos esti sia propra interpretisto kaj esprimi rekte siajn pensojn en unu mondlingvo, prezentas tian progreson, ke ne estas bezone insisti. Sed estus eraro kredi, ke per tiu sola paŝo ni tuŝos jam la celon. Mi ĵus diris, ke ĉiu homo estos sia propra interpretisto — sed tio nur lokŝanĝas la problemon. Sendube, estas pli facile interpreti siajn proprajn pensojn ol la aliulajn; sed restas ankoraŭ la antaŭe montritaj danĝeroj: kutimante uzi la rimedojn de sia hejma lingvo, la esperantisto havas naturan kaj fortegan emon paŭsi sian Esperanton sur tiu nacia lingvo, doni al la esperantaj vortoj la nuancojn de siaj pli

familiaraj vortoj, kaj supozi, ke liaj esprimoj elvokos en la spirito de la aŭskultantoj la samajn bildojn, kiel ili farus ĉe liaj samlingvanoj. Ĉiuj miskomprenoj, kiuj fontas el la apartaĵoj de ĉiu lingvo, el la nuancodiverseco de ties vortoj ktp, minacas do persisti en tiu ĉi dua stadio de la homprogreso, stadio, kiun ni strebas kaj pri kies atingo ni havas nenian motivon malesperi. Eĉ se ili ĉiuj parolas denaske Esperanton, nenio malhelpas Kalifornianojn nomi tria etaĝo tion, kion Franco opinias la dua, nek Germanoj trovi la simbolon de la stulteco en tiu sama ŝafo, kies ĉefa trajto ŝajnas al Franco la mildeco kaj senhelpeco.

Sed, kaj ĉi tio estas la dua fakto, ni rajtas antaŭvidi trian stadion, en kiu la menciitaj riskoj de miskompreno estos grandparte eliminataj. Kun la plivastigata uzado de Esperanto, iom post iom kreiĝas internaciaj lingvokutimoj, internacia pensmaniero. Zamenhof jam diris al ni, ke li portis en si Esperanton, ĝis li sentis, ke tiu lingvo fariĝis aŭtonoma, ĝis ĝi akiris memstarecon, kaj, laŭ liaj vortoj, «propran spiriton». Mi montris, en la unua parto de ĉi tiu libro,¹ el kiuj elementoj, fonetikaj, vortaraj, gramatikaj, konsistas tiu propra spirito. Kaj ĉiuj kleraj esperantistoj konstante insistis pri zorga esplorado de la zamenhova lingvo, pri skrupula konservado kaj respekto de liaj lingvokutimoj, ne nur ĉar lia evidenta genio donis al li rajton pri tia respektatesto, sed precipe ĉar tio estis la nemalhavebla bazo, sur kiu poste povas stariĝi kaj kreskadi unu vere unueca mondlingva stilo. Tia celo estas sufiĉe grava, por foroferi al ĝi niajn personajn gustojn kaj preferetojn. Ĉar tia estas la vojo, per kiu ni povas esperi malmultigi kaj malpligravigi la interhomajn miskomprenojn. El la duobla uzado de Esperanto, la unua, eble nun la ĉefa, fare de la bonaj gazetistoj, verkistoj, poetoj ktp, la dua, kiu kun la tempo fariĝos la pli konsiderinda, fare de la parolantoj, delegitoj, prelegistoj, diplomatoj, aferistoj ktp, produktiĝas iom post iom originalaj ideosferoj kaj bildocenoj propraj al nia lingvo. Laŭ la imito de Zamenhof, ĉiu el ni, konscie aŭ ne, elektas el inter la apartaĵoj de sia nacia lingvo kaj provas, sur la internacia kampo, la kompreneblecon de tiu aŭ

¹ Kaj en la unua volumo de *Eseoj*, pĝ 75 k. s.

alia metafora esprimo, la efikecon de tiu aŭ alia bildo, la elvoki-vecon de tiu aŭ alia nova vorto. Kelkaj el tiuj provoj sukcesas, multaj malsukcesas; tiu verkisto aŭ oratoro lanĉas en la komunan uzadon aparte brilan formulon, kiu estos la komenco de aliaj bildretoj — same kiel ĉirkaŭ elstara rifo, en la varmaj maroj, iom post iom kreskas koralaj kronoj. Kaj el tia konstanta konfrontiĝo de la provantaj aŭtoroj kaj de la elektanta publiko rezultas ia kribrado de tiuj novaĵoj, ia ĝenerala akcepto de kelkaj, aŭ forrifuzado de aliaj (pensu, ekz-e, pri la tute nova, pure esperanta fekundeco, en nia parola kaj skriba literaturo, de la vorto *verda*, aŭ pri la nova afekcia nuanco akirita de la vorto *rondo*, pro la fama *rondo familia*).

Tial oni rajtas esperi al tiu tria stadio, en kiu Esperanto estos akirinta jam propran personecon, kiu sin trudos al ĉiu ĝia uzanto; kaj ni ankaŭ rajtas esperi, ke, dank' al la kontribuo de ĉiam pli multaj, diversoriginaj, diverskulturaj kaj diverslingvaj samideanoj, tiu personeco de nia estonta mondlingvo estos senkompare pli vasta, pli fleksebla, pli riĉa, ol tiu de iu ajn nacia lingvo. Sed ĝi estos tamen sufiĉe difinita kaj sufiĉe konfirmita, por ke niaj posteuloj havu la klaran senton de tio, kio estos komuna kaj esperantisma, kaj de tio, kio restos nur nacilingva apartaĵo. En tia maniero, la riskoj, kiujn mi montris, pri miskompreno de la interna valoro aŭ de la sugesta povo de la vortoj, povos esti pli kaj pli evitataj, ĉar la esperantistoj, unue konscie, poste tradicie kaj senkonscie, fidos kaj respektos la tiam elprovitan kaj ĉieegalan propre esperantan kulturon.

Sed tia perspektivo estas ankoraŭ malproksima, ni staras tre modeste je la komenco de la tien kondukanta vojo, kaj tial ni devas humile subigi nin al la disciplino de unueco kaj konstanteco, kiu sola povos permesi al ni progresadi al tia estonteco.

III. SOCIAJ PROBLEMOJ

Lingvo estas esence socia fenomeno, ĉar ĝia tuta valoro kaj unua funkcio estas ebligi la interŝanĝon de emocioj, de deziroj, de ordonoj, de malpermesoj, de argumentoj. Sed tiu socia fenomeno ekzistas nur kiel prezentata en la konscio de la individuoj; kaj oni scias, ke la lingvistoj kutime distingas eĉ tutan kategorion da lingvaj faktoj, kiuj dependas nur de la individuo: «La stilo estas la homo mem» jam delonge skribis nia Buffon.

La individua flanko de la lingvo estis komence la plej esplorita, kaj oni devis atendi la malvolviĝon de la sociologio en la dua parto de la 19a jarcento, por ke oni turnu la atenton al la socia flanko. Kaj, kiel ordinaro okazas ĉe la malkovro de novaj vidpunktoj, oni emis troigi tiun socian karakteron. Kelkaj marksistoj iris ĝis la konkludo, ke la lingvo estas unu el la sociaj strukturoj; kaj tiu eraro estis tiel potenca, ke Stalin mem devis improvizi tute novan erudicion, por konvinki siajn adeptojn, ke la lingvo estas nur socia superstrukturo.

Efektive oni povas trovi iajn rilatojn inter unu sociostato kaj unu stadio de lingva evoluo; sed, je pli profunda esploro, oni rapide konstatas, ke tiaj rilatoj estas pure vortaraj, t. e. supraĵaj. Facile demonstrebla estas la fakto, ke la latina estis primitive lingvo de kampuloj; ke multaj abstraktaj vortoj estas nur metaforigo de agrokulturaj apartaĵoj: la *calamitas* t. e. 'katastrofo', estis propre la malsano de la grentigo (*calamus*), la 'lerta' homo, *callidus*, estis tiu, kiu havas kalojn ĉe la fingroj, la 'mono', *pecunia*, konsistis komence 'el'brutoj' (*pecus*), kaj la 'kulturo' mem estis nenio alia ol la figura 'plugiteco', la kultiviĝo intelekta. Estus same facile montri en la franca de la 17a jarcento ĉiujn spurojn de feŭdaj moroj, interalie de la falkoĉasado: *niais* 'naivega' kaj *hagard* 'kva-zaŭfreneza' difinis la du specojn de falkoj, tiuj, kiujn oni kaptis ĉe la nesto, kaj tiuj, kiujn oni kaptis jam adoltajn ĉe la heĝoj ktp; aŭ de la cervoĉasado: *rompre les chiens* 'disligi la hundojn', kaj, figure, 'ekfini ĝenantan konversacion', *prendre le change* 'eksekvi falsan spuron', kaj, figure, 'lasi sin trompi', *être aux abois* 'esti atingita de la hundoj', kaj, figure, 'esti en ekstrema situacio' ktp.

Sed tiuj faktoj neniel influis la lingvistikan strukturon aŭ la literaturan elvolviĝon de la latina aŭ de la franca; ili ne klarigas, kial la unua estas fleksia sinteza lingvo, la dua fleksia analiza lingvo. Je la sama civilizstadio, oni trovas inter amerikaj Indianoj lingvojn jen fleksiajn, jen polisintezajn, jen analizajn ktp. Oni rajtas do konkludi, ke, se lingvo estas grandparte socia fenomeno, ĝi estas nek klarigita nek profunde influata de la sociostato de siaj parolantoj.

Tute male, mi emas opinii, ke la lingvoj mem probable influas la mensojn de la homoj, kiuj ilin parolas, kaj ne inverse. La plimalpli granda facileco, per kiu ili kapablas esprimi la abstrakton aŭ la konkreton, ligi la sensaĵojn en unu kompleksan blokon aŭ male artikigi la frazojn en interkroĉitaj propozicioj — tio, kvankam ĝi evidente ne kreas en la spiritoj propran emon al filozofio aŭ poezieco, tamen ebligas al tiuj du emoj malvolviĝi aŭ ne, kaj certe influas la direkton de la literatura fluo. La florado de la religieco ĉe la hebrea popolo, de la filozofio ĉe la helena, de la juro ĉe la romana ja ne estas ŝuldata al la diferencaj ecoj de tiuj tri lingvoj — sed tiuj ecoj ja kontribuis al tiu florado kaj akcentis la nacian karakteron. La kvazaŭ simbola konstruo de la hebrea, kie la vortoj konsistas el tri signifoplenaj konsonantoj, inter kiuj venas ludi la nuancokreaĵ vokaloj; la senfina fleksebleco kaj kunmetiveco de la helena; la masiva koncizeco de la latina: tio prezentis la plej favorajn rimedojn por la esprimado de la pasiaj Di-adoroj, de la subtilaj dialektikaĵoj, de la eterne valoraj maksimumoj. Estas neeble imagi iun Aristotelon kursanta en la hebrea, kaj, inverse, kiel oni sentas, ĉe legado de la *Septuaginta*, ĉion, kion la psalmaj aŭ profetaĵoj kantas en tiu flua, klara kaj intelekta lingvo!

Al tiu strikta rilato inter unu lingvo kaj la menso de ĝiaj uzantoj aldoniĝas la tuta forto de la tradicio kaj de la parola aŭ skriba literaturo. Pro tio ke, kiel mi montris, aparta tipo de lingvo favoras apartan tipon de literaturo, la lingvo mem, iom post iom, ŝargas sin per amaso da aludoj al ĉefverkoj, al infanaj kanzonoj aŭ al eposaj epizodoj ktp. Alivorte, la lingvo, kiu ebligis la floradon de originala pensado, iom post iom identiĝas al tiu pensado mem. Mi citos ekzemple la kazon de la angla lingvo, en kiu la memoraĵoj de la angla Biblio kaj de la Ŝekspiraj dramoj koloras tiom la lingvon, ke kelkaj verkoj fariĝas simple ne tradukeblaj. Tre bone

tion sentis kaj konfesis la granda eseisto Aldous Huxley, en antaŭparolo al la franca traduko de lia romano *Brave New World* (france: *Le meilleur des mondes*), kie li deklaras, ke «kelkaj partoj de tiu ĉi volumo apartenas al la kategorio de la netradukeblaj aferoj», ĉar ili baziĝas sur la kontrasto inter la lingvaĵo de la Ŝekspira poezio kaj la moderna angla prozo.¹

Mi ĉiam demandis min mire, kio povas resti el la potence elvokiva atmosfero de la kristana komunio por ekstremorientaj popoloj: tiu rito efektive pruntas parton de sia prestiĝo al la jam de jarmiloj atestita kulto de la du sanktaj kreskaĵoj, la tritiko kaj la vito. La pano, kiun rompis Jesuo en la eterne memorata vespero, la vino, kiun li verŝis al siaj disĉiploj, estis ja sanktaĵoj jam antaŭ lia gesto, kaj, post ĝi, fariĝis diaĵoj. Sed kion ili povas signifigi, kiajn emociojn ili povas vibrigi ĉe homoj, kiuj konas nek unu nek alian, kiuj tradicie manĝas rizon kaj trinkas rizalkoholon? Tio cetere ne estas nura religia afero: la legantoj eble memoros tiun ĉefverkon de la hispana filmarto *Marcelino Pan y Vino*: la tuta simboleco de la rakonto kuŝas jam en tiu titolo — kaj kio restus el ĝi, kiam Ĉino aŭ Japano estos tradukinta ĝin per *Kaŭaseo Rizo kaj Sakeo*?

Ni estas do alkondukataj al tiu konsidero, ke la lingvo prezentas sin kiel la preferatan esprimilon de la tuta kreda, senta kaj pensa tradicio de unu popolo, konsistigas iel la idean deponejon de ĝiaj spiritaĵoj, kaj finfine simboligas ĝian eston mem. Sed la konscio de unu popolo pri sia originaleco, sia distingiĝado disde la aliaj popoloj, tiu sento alprenis en la modernaj tempoj la formon de la naciismo. Kaj ni sufiĉe spertis, kiel danĝera estas tiu sento, kiel danĝere proksima ĝi estas al la malamo de la aliaj popoloj, por meti al ni la demandon pri la rolo kaj respondeco de la lingvoj en la kreskado de la modernaj naciismoj.

Oni konas, pri tiu punkto, la tute difinitan kaj tranĉe esprimitan opinion de Zamenhof. En sia *Memuaro por la Kongreso de Rasoj* (1911), li ekzemple skribis: «La vera kaŭzo de ĉia intergenta malamo estas nur la malsameco de la lingvoj kaj religioj. Precipe

¹ Vidu la unuan volumon de *Eseoj*, pĝ 56-57.

la lingvo havas tian grandegan kaj preskaŭ ekskluzivan rolon en la diferencado de la gentoj, ke en kelkaj lingvoj la vortoj *lingvo* kaj *gento* estas plenaj sinonimoj».¹ Evidente Zamenhof pensis pri la vivkondiĉoj en orienta Eŭropo: sed ĉu lia opinio havas ĝeneralan kaj konstantan valoron?

Estas fakto, ke, en multaj okazoj, la lingvo estis, por la popoloj, kiuj akiris konscion pri sia memstareco kaj volon pri sia politika sendependeco, la potenca ilo, per kiu la gentanoj aŭ nacioj unue rekonis sin, poste per kiu ili defendis sin kune kontraŭ subpremanta potenco, kaj fine, per kiu ili ilustris sian agnoskitan kolektivan personecon. Tio estis ekzemple la kazo ĉe Polujo, en kiu la kulturado de la pola lingvo, kunigita kun la praktikado de la katolikismo, estis la plej potenca rimedo rezisti la asimilprovojn de Germanujo kaj de Rusujo, kaj, post la unua mondmilito, reglui en unuecan ŝtaton la landpartojn, kiujn jarcenta diseco igis malkoheraj kaj individuemaj.

En kelkaj similaj okazoj, ni ĉeestis eĉ spektaklon neatenditan, kiun la klasikaj lingvistoj estus eĉ rigardintaj neeblaĵo: pluraj popoloj, en Eŭropo, atinginte al la politika sendependeco, forĝis al si novan lingvon sur la bazo de sia arĥaika, kampara dialekto. En Eĵro, oni vidis la naciistajn deputitojn reiri al la lernejo, por akiri la tiel nomatan nacian lingvon, kiun ili naive nesciis ĝis tiu tempo. En Finnlando, Estonio ktp oni tiel perfektigis la malnovan dialekton, ke (Helmi Dresen iam tion rakontis al mi) la elmi-grintoj, revenante hejmen post dek jaroj, apenaŭ kapablis legi la gazetaron: en la estona, ekzemple, oni kreis, tute arte, sufikson por la pasiva konjugacio, ktp. En Sovetunio, oni ĉeestis la elforĝadon de tute novaj literaturaj lingvoj, kiel la permiaka, la vogula, la ostiaka, la tunguza ktp.

Sed la plej mirinda okazo estas tiu de la mortinta hebrea lingvo, kiun revivigis la cionistoj, por la starigo de la Nacia Juda

¹ Por bone klarigi la sencon de *gento*, mi citu la komencon de la *Memuaro*: «Kvankam la nomo de Via kongreso estas 'Kongreso de Rasoj', tamen permesu al mi, ke mi parolu ne sole pri *rasoj*, sed ankaŭ pri *gentoj*, ĉar ambaŭ egale signifas etnologian grupon da homoj kaj diferencas nur per sia amplekso . . . Tre ofte estas malfacile diri, ĉu tiu aŭ alia homa grupo prezentas rason aŭ genton».

Hejmo, kaj precipe post la kreo de la ŝtato Izraelio. Ili alprenis de la mezepoka rabena aramea lingvo kelkajn sufiksojn (precipe por esprimi la abstraktaĵojn), ili depruntis de diversaj modernaj lingvoj kelkajn necesajn vortojn — sed precipe ili fruktigis la malnovan Biblian lingvaĵon, uzante ĉiujn eblojn por adapti ĝin al la moderna vivo.

Kaj ni tuŝas ĉi tie fenomenon treege instruan por ni. La kazo de la mortinta hebrea lingvo estas teorie tute analoga al tiu de la mortinta latina lingvo — ambaŭ du gravaj civilizaj lingvoj ankoraŭ uzataj en du grandaj religioj. Sed ĉiuj provoj revivigi la latinan, ĉu de la flanko de la katolikaj medioj, ĉu de la flanko de la sciencistoj kiel Peano, ĉu de la flanko de la politikistoj, kiel Prof. J. Cappel, kiu aranĝis kongreson en Avignon en 1956, ĉiuj malprosperis kaj plu malprosperos — dum la decido revivigi la hebrean estis aplikita kaj sukcesinta. La kaŭzo estas, videble, ke la hebrea fariĝis la parolilo de unu naciismo (des pli drasta, ju pli juna ĝi estas), dum malantaŭ la latina troviĝas nenia profunda impulso komparebla kun la naciisma idealo.

Ĉe la lumo de tiuj historiaj ekzemploj, la lingvo povas do aperi kiel la enkarniĝo de la ekzistovolo, de la vivaserto de nacio — kaj pri tiu punkto Zamenhof ŝajne pravis. Sed la homaj aferoj ne estas simplaj, nek ĉiam logikaj. Apud la ĉi-supre montritaj ekzemploj, aliaj montras, ke la lingv-unueco ne estas nepra kondiĉo de la ekzisto de nacio. En Eŭropo mem, Svislando jam de jarcentoj prezentas la tipon de plurlingva ŝtato, kiu kun la tempo akiris tamen ĉiujn karakterojn de nacio: ekzistas nedubable nekonfuzebla svisa nacieco — mi eĉ je kelkaj okazoj suspektis, svisa naciismo.

Pli malfrue alveninte al la politika sendependeco, Belgio tamen montras la saman evoluon: malgraŭ sia dulingveco, ĝi elkovis ankaŭ nacian senton, kiu nete apartigas la Flandrojn disde la Nederlandanoj, kiuj ja parolas la saman lingvon, aŭ la Valonojn disde la Francoj, kun kiuj ili havas komunan lingvon. En tiu «privilegia kazo», kiel diras la sciencistoj, oni povas konstati, ke la samlingveco ne nur ne estas nepre necesa al la nacieco, sed eĉ estas, ambaŭflanke, malpli forta ligilo, ol la nacia sento: loĝanto en Lieĝo komprenas loĝanton en Valencieno kaj ne komprenas loĝanton en Mehilino; tiu ĉi komprenas loĝanton en Roterdamo kaj ne

loĝanton en Lieĝo: kaj tamen la Mehlinano kaj la Lieĝano sentas sin samnacionoj kaj pli proksimaj unu al la alia, ol respektive al Franco aŭ Nederlandano.

Eĉ je la nivelo de la plej primitiva sociostato oni povas konstati analogajn ekzemplojn. La franca antropologo Claude Lévy-Strauss rakontas, en sia libro *Tristaj Tropikoj*, ke, ekspediciinte en 1938 interne de la Mato Grosso, en Norda Brazilo, li renkontis du hordojn da Indianoj: unu konsistis el 18 anoj, la alia el 34; ĉiu estis gvidata de estro; la anoj de la unua nomis sin Sabane, tiuj de la dua Tarunde. Nenio distingas la du hordojn, nek la aspekto, nek la kulturo, krom la lingvo: la sabanea estis absolute diferenca de la tarundea. Kvankam la kampadfajroj restadis apartaj, ambaŭ hordoj vojaĝis kune, kampadante unu apud la alia. Unu persono, en ĉiu hordo, ludis rolon de interpretisto. La viroj de unu hordo nomis ĉiujn virinojn de la alia «fratinoj», kaj la virinoj ĉiujn virojn de la alia hordo «fratoj», ĉiu en sia aparta lingvo. Je la sekventa generacio, laŭ la moroj de tiuj triboj, la du hordoj devis do kunfandiĝi per intertribaj geedziĝoj. Kaj tamen, la du estroj ne kapablis interkompreni unu la alian, nek la hordanoj. Kaj tiu stranga alianco estis tiam sufiĉe freŝa. La antropologo atribuis ĝin al la terura malmultiĝado de la Indianoj, kaŭzita de epidemioj alportitaj, en tiun terpecon, ekde 1930, de la blankuloj.

Do antaŭ la danĝero de mortiga izoleco en tiuj praarbaroj, la du hordoj, per lasta puŝo de la vivimpulso, atingis tiun miraklon, ke ili ne nur ne malfidis unu la alian, sed eĉ decidis unuiĝi, malgraŭ la ŝajne radikala neeblo interkompreniĝi. Kaj la saĝo de tiuj mizeraj, malproksimaj, kadukaj sovaĝuloj strange kontrastas kun la sinteno de la tiel diritaj civilizuloj, en tiu sama Suda Ameriko, kie la komuneco de la hispana lingvo neniel malhelpis (nek eble ankoraŭ nun malhelpas) la malkonsentojn kaj fojfoje militon inter la modernaj regnoj Gvatemalo, Nikaragvo ktp. Kio estas inversa demonstro de la sama fakto, ke la interhoma malamo ne fontas ekskluzive el la neeblo interkompreniĝi.

Ni alvenas do al konkludo iom malsama, ol tiu de Zamenhof. Kio kreas la naciecon, tio estas la komuna volo vivi kune — ĉu tio volo baziĝas sur efektivaj malnovaj komunaj memoroj, ĉu ĝi baziĝas simple sur komuna rifuzo dividi la sorton aŭ suferi la regadon

de alia popolo. Kie ekzistas tia volo, tie ekzistas nacio, tute sendepende de tio, ĉu ankaŭ ekzistas unu liganta lingvo, aŭ ĉu tiuj samvolanoj uzas diversajn lingvojn. Ĉiufoje, kiam aperas tia volo de kunekzistado, oni ne zorgas pri la lingvaj diferencoj. En la hodiaŭa Francujo kunekzistas homoj parolantaj la flandran, la bretonan, la alzacan, la italan, la katalunan lingvojn, kune kun tiuj, kiuj konas nur la francan: kaj ne ekzistas ia aŭtonomisma movado, nek en Bretonio, nek en Katalunio (francia), nek eĉ en Alzaco, malgraŭ la provoj de la Germanoj krei unu dum la dua mondmilito.

Male, tuj kiam aperas deziro pri aŭtonomeco, ĝi unue evidentiĝas per strebo al lingva diferencigado. Oni ĵaluze esploras la plej arĥaikajn dialektojn de la ĝis tiam komuna lingvo, aŭ la plej antikvajn literaturdokumentojn, por elfosi el ili lingvajn apartaĵojn kaj per tiuj nutri kaj plilarĝigi la lingvan diversecon. En la daŭro de unu jarcento oni povis vidi la tri nord-eŭropajn ŝtatojn, Danujon, Svedlandon kaj Norvegujon, kiuj ĝis tiam ĝuis la oportunecon de unu komuna lingvo, provi ĉiajn rimedojn por akcenti la malkomunecon de siaj dialektoj; kaj kie la prononco aŭ la vortaro ne sufiĉis, oni apelaciis al la ortografio: se por prezenti la sonon de la franca *eu* unuj uzas la signon *ö*, tuj aliaj decidas ekuzi *ø* ktp. La ĉefverko de tiu distingomanio estas probable atingita en Jugoslavio, kie Kroatoj kaj Serboj, parolante efektive la saman lingvon (krom kelkdekoj da vortoj malsamaj en la nordo kaj en la sudo de la teritorio), pie konservas por unuj la latinan skribon, por la aliaj la slavan alfabeton, favorante tiamaniere eble la presindustriion, sed certe ne la popolan kulturecon.

Konsiderante tiujn faktojn, ni povas pli ĝuste taksi la rolon de la lingvo en la interpopolaj malkonsentoj: ĝi estas nur unu el la iloj uzataj de la nacia apartismo por ligi inter si siajn anojn kaj kontraŭmeti ilin al la anoj de alia nacio; ĝi estas unu el la *ŝiboletoj*,¹ dank' al kiuj oni pli facile rekonas la buĉotajn fremdulojn; ĝi estas speco de flago, kiun oni svingas kontraŭ la najbaraj, kun la orgojla pretendo, ke ĝiaj koloroj estas pli belaj kaj ĝiaj emblemoj pli

¹ La leganto eble memoras tiun simbolan historion de la Biblio (*Jug.* XII, 6), unu el la plej sovaĝaj en sia simpleco.

venkodonaj; unuvorte, ĝi estas, kun la religio, nur la eksteriĝo de tiu kolektiva deziro enfermi sin fanatike en la striktajn limojn de unu gento, de unu sentimentala aŭ politika tradicio, kiun oni povas nun nomi naciismo aŭ rasismo indiferente, ĉar la profunda kaŭzo kaj la historiaj sekvoj estas esence la samaj, t. e. malhumanaj.

Nur en tre maloftaj okazoj kelkaj kleraj spiritoj provis teni la lingvon ekster la naciisma batalkampo. Meze de la milito por la sendependeco de Alĝerio, unu juna araba poeto kaj romanisto, Kateb Yacin, skribis en 1955: «La franca lingvo apartenas al ni kaj ni intencas gardi kaj konservi ĝin tiel ĵaluze, kiel niajn tradiciajn lingvojn. ... Estas la franca lingvo, plejofte, per kiu ni proklamas nian anecon al ia alĝeria komunumo. ... Estus plorinda afero, se, ŝrumpante sur sin mem, la morgaŭa Alĝerio, rekonkerinte la rajton pri sia propra lingvo, estus kondamnita al la nuraj babilaĵoj de la reinfaniĝintaj ulemoj. Estus plorinda afero, se niaj arablingvaj poetoj daŭrigus prikanti la dezertan leonon, la perlodentan amatinon kaj aliajn similajn gurditaĵojn por malkleruloj. Ni devos batali sur du frontoj: ĝenerala instruado de la araba lingvo kaj de la berberaj dialektoj, por kontentigi la naciajn postulojn, sed ankaŭ konservo de la franca lingvo, por gardi alireblojn al la grandaj fluoj de la moderna literaturo».

Nobla fiera voĉo, al kiu eĥis tiu de la Antila poeto Aimé Césaire aŭ de la Senegalia poeto Léopold Senghor, kiuj kantas, en francaj versoj, la mizerojn de siaj negraj fratoj kaj la grandon de la negra civilizo, kaj la ambiciojn de la negra spirito. Evidente tiaj esceptaj pozicioj estis ebligataj de la fakto, ke Francujo ĝis tiam apenaŭ konis rasimon kaj estis la sola blankula regno, en kiu la prezidanto de unu el la parlamentaj ĉambroj havas nigran haŭton. Sed tiaj pozicioj estas tre malfacile teneblaj, ĉar, eĉ se la kleruloj inter la Afrikanoj aŭ la Magrebanoj agnoskas la prestiĝon kaj utilecon de la franca lingvo, ili ne povas tute forgesi, ke tiu lingvo estas tamen tiu de la iamaj konkerintoj, de la ĵustempaj kolonimastroj; la lingvon de Kartezio, de Voltero, de la Homaj Rajtoj ili volonte, eĉ entuziasme alprenus, se ĝi ne estus ankaŭ la lingvo de la kapitalismaj trustoj kaj de la metropola polico.

La solvo de la problemo, por tiuj iam koloniigitaj popoloj same kiel por la eŭropaj iam subigitaj nacioj, estus do la alpreni

de ia lingvo, kiu malfermus al ili la pordojn de la moderna, literatura aŭ scienca, civilizo kaj tamen neniel aspektus al ili kiel apartenaĵo de koloniiginta ŝtato. Kaj ĝuste por tia uzado estis elpensita nia Esperanto. Ke Esperanto estas jam de nun taŭga portilo de la plej altaj kulturaj valoroj, nur la nekompetentuloj povas tion diskuti. Ke ĝi estas neŭtrala interkomprenilo, metante ĉiujn siajn uzantojn sur la sama nivelo kaj en la samaj kondiĉoj, tio estas evidenta al ĉiu, kiu eĉ unu fojon ĉeestis niajn kongresojn. Esperanto ne malaperigas la diskutojn, nek la kaŭzojn por diskuti, sed ĝi donas al ĉiu la konscion, ke li estas egalrajta kun ĉiuj aliaj, ke, parolante Esperante, li faras tiun saman oferon, kiel ĉiuj aliaj, kiuj ankaŭ oferas la uzon de sia nacia lingvo. La alprenado de Esperanto en internaciaj konferencoj, kaj precipe en la politikaj, radikale forigus tiun «komplekson de malsupereco pri la lingvo», kiun sagace analizis antaŭ ne longe la sudamerika Prof. Martel. Kaj tio estas vera, ne nur el la pure praktika vidpunkto (ĉar neniŭ delegito havus la avantaĝon paroli sian naskiĝan lingvon kaj tiel facile superi en la argumentado tiujn, kiuj devus deprunti fremdan lingvon kaj suferus la bremsadon de la tradukpenado), sed precipe el la intelekta kaj kultura vidpunkto, ĉar la memrespekto kaj prava fiero de iu ajn ano de unu lingvo ne estas ofendata per la deviga rezigno pri la uzo de sia hejma lingvo kaj la deviga submetiĝo al alia, alivorte per ia deviga fremdiĝo kaj de la parolo kaj de la pensado.

En tiu senco, sed nur en tiu senco, ni povas diri, kiel Zamenhof proklamis neforgeseble en sia parolado antaŭ la Unua Kongreso, ke Esperanto estas ilo de pacigado de la spiritoj, certigante al ĉiuj homoj la lingvan egalrajtecon.

Sed krom tiu (ankoraŭ sisteme ignorata) utileco de Esperanto ĉe la supraj instancoj kaj ĉe la gravaj momentoj de la internacia diplomatio, mi opinias, ke nia lingvo povas ludi ankaŭ pli gravan rolon en la pli ordinariaj kondiĉoj de la ĉiutaga vivo. Kaj ĉi tie mi devas konfesi, ke, eble pro mia profesio, mi ne kredas, ke la lingvodiverseco estas en si mem ia malbono, se nur ĝi estas iamaniere ekvilibrita per alia faktoro. Ŝajnas al mi, ke la varieco estas unu el la kondiĉoj de la belo, kaj eble de la feliĉo; mi ne opinias, ke, por esti nerezisteblaj, ĉiuj virinoj devus, kiel la famaj *The Blue Bell girls*, esti unuforme 173 cm. altaj kaj havi ĝuste la

saman mam- kaj pugmezuron. Ke ekzistas multaj lingvoj sur la supraĵo de la tero, ĉiu kun sia propra spirito, siaj apartenaĵoj, siaj idiotismoj kaj siaj parolkoloroj, tio estas spektaklo, kiu ĝojigas mian koron kaj allogas mian scivolon.

Sed la lingvoj havas, en la nuna mondo, du apartajn funkciojn: unuflanke, ili servas al la homoj por esprimi siajn sentojn, aliflanke ili servas por komuniki scierojn. La unua funkcio estas afekcia, la dua intelekta. Nu, laŭ miaj spertoj kaj emoj, nur en la unua funkcio la lingvoj ŝajnas al mi vere individuaj, nepre ne anstataŭigeblaj unu per alia. En niaj hejmaj idiomoj, eĉ en niaj plej humilaj dialektoj ekzistas amaso da sukaj, sonplastikaj vortoj, da bildokreaj dirmanieroj, da kortuŝaj tonoj, kiujn oni ne povus esprimi en iu alia. Kaj ĉio tio estas la preferata kampo de la artistoj, de la poetoj.

La dua funkcio, kontraŭe, konsistas en la transportado de la abstraktaĵoj, ĵuraj, sciencaj, politikaj ktp. Tial kelkaj filologoj nomas la lingvojn, kiuj fariĝis iom post iom aparte dediĉitaj al tiu funkcio, lingvoj «veturilaj»: sed, sur tiu kampo, ĉiu povas rapide konstati, ke ĉiuj tiuj veturilaj lingvoj estas perfekte egalaj: parlamenta konstitucio, difino kaj klarigo de nova teoremo, priskribo kaj uzebleco de nova kuracilo ktp povas esti dirata indiferente per la angla, la franca, la germana, la rusa, la ĉina, nenion perdante el sia valoro kaj utileco. Kompreneble, tiu dua funkcio trudi al tiuj veturilaj lingvoj siajn postulojn: riĉeco de la teknika vortaro, unuformeco kaj monotoneco de la pens-esprimiloj, kiuj antaŭ ĉio celas klaran formuladon kaj ne estetikan originalecon.

Nu, en la daŭro de ĉi tiu jarcento, dum ni ĉeestis la floradon de tiom da novaj naciaj lingvoj, ni konstatas tiun fenomenon, ke ĉiu el ili, kiel ajn malvasta estas ĝia teritorio, kiel ajn senprecedenca estas ĝia uzado por abstraktaj celoj, tamen strebas rivali kun la grandaj veturilaj lingvoj, forĝante al si abundan artefaritan vortaron; kaj, kio pli gravas, tiu vortaro estas sen ia originaleco, ĉar la naciistoj ordinare limigas sin je la kopiado, pere de indiĝenaj radikoj, de la kunmetaĵoj uzataj en la rusa, la germana ktp. Tio konsistigas absolute senvaloran entreprenon, almenaŭ el la lingva vidpunkto: la tiel transdonataj scioj, apartenante egale al ĉiuj nacioj, alportas nenion fortigan kaj ŝatindan al la kulturo de la

malgrandaj landoj, sed nur multigas, sen ia ajn profito por la homaro, la sumojn pagatajn por la presado de libroj kopiitaj el la alilingvaj kaj la penojn faratajn de kelkaj sciencistoj aŭ gazetistoj por la lernado de tiuj novaj lingvoj: kiom gravas, ĉu ni kapablas nomi policiston, benzinon aŭ natrian bikarbonaton en dek du lingvoj? Tio alportas ŝarĝon al la memoro, sed nenian veran akiron al la spirito!¹

Ĉe tia politiko, la malgrandaj lingvoj havas ĉion por perdi. Anstataŭ kulturi tion, kio estas al ili vere propra, akcenti sian naskiĝan originalecon, perfektigi kaj diskonigi sian grundan guston, ili penas paliĝi kaj unuformiĝi kaj fariĝi la senverva transpono de la veturila lingvo, kies influon ili ĝuste volas eviti sur la politika kampo. Kaj tiu blinda imitado ŝajnas al mi por ili la plej granda danĝero.

Mia karmemora majstro Grosjean-Maupin fieris malpli pri sia sperteco en esperantologio, ol en kuirarto. Kaj ĉar, en 1923, li disponis, en la Blinduleja Instituto, kiun li estris, sufiĉe grandan parkon, li zorge kolektis la plej famajn kaj bongustajn speciojn de fragoj, kaj enplantis ilin, ĉiun en aparta angulo. La unuan jaron, li, kun nekaŝebla plezuro, surtabligis al mi ses aŭ ok diversajn specimenojn de tiuj frandaĵoj. Sed post tri-kvar jaroj, ho ve! ĉiuj fragoj en la parko fariĝis la samaj — ia ordinara, vulgara specio, sen rimarkinda gusto kaj eminenta valoro: la vento, ĉiujare disportante kaj dismiksante la polenojn, finfine deprenis de ĉiu specio ĝiajn plej ŝatatajn karakterojn.

¹ Vidu: A. MEILLET, *Les Langues dans l'Europe Nouvelle (La Lingvoj en la nova Eŭropo)*, 2a eldono, 1928, pĝ 263. La fakto estas cetere jam de longe vidita kaj bedaŭrata: ateste JOAKIMO DU BELLAY, kiu en sia *Défense et Illustration de la Langue Française (Defendo kaj Famigado de la Franca Lingvo)*, publikigita en 1549, jam rimarkigis: «Ho ve! Kiel pli bone estus, se ekzistus en la mondo nur unu natura lingvo, ol uzi tiom da jaroj por lerni vortojn! Kaj tion ni faras ĝis la aĝo, tre ofte, kiam ni plu havas nek la kapablon, nek la tempon okupiĝi pri pli grandaj aferoj! Certe, pensante multajn fojojn, de kie venas, ke la homoj en ĉi tiu jarcento estas ordinare malpli lertaj en ĉiaj sciencoj kaj malpli valoraj ol la antikvuloj, inter multaj kaŭzoj mi trovas jenan, kiun mi kuraĝus diri la ĉefan, t. e. la studadon de la lingvoj greka kaj latina... Kaj tre ofte, konfuzitaj de la malfacileco kaj malrapideco lernadi vortojn nurajn, ni forlasas ĉion pro malespero, kaj malamas la literaturon, antaŭ ol ni ĝin gustumis aŭ komencis ĝin ami...»

Mi timas, ke ankaŭ al la lingvoj okazos, en la nuna mondo, la sama malagrablaĵo: per silaboj kaj vortoj malsamaj, ili finfine ĉiuj diros la samajn aferojn en la sama maniero. Kaj kontraŭ tiu timiga unuformiĝado, mi vidas nenian alian rimedon, ol la ĝeneraligon de la uzo de Esperanto. Tiu nia lingvo ja posedas ĉiujn ecojn postulatajn de veturila lingvo — kaj krome, pro ĝia origino, ĝi elvokas, ĉe neniuj malgranda nacio, la naciismajn reagojn, kiujn elvokus unu el la grandaj naciaj veturilingvoj. Estus do, laŭ mia opinio, la bona ŝanco kaj la intereso de tiuj malvaste parolataj lingvoj, se, anstataŭ peni rivali kun siaj grandaj fratoj, ili simple lasus al Esperanto la rolon de perilo en la internaciaj rilatoj, kaj saĝe dediĉus siajn fortojn al la kulturado de sia propra ĝardeno.

La solaj lingvoj, kiuj povus senti sin ofendataj, estas tiuj, kiuj jam plenumas tiun funkcion de intelekta komunikilo; sed ankaŭ al ili la samaj konsideroj valoras. Ĉar la uzado de nacia lingvo sur la internacia kampo ĉiam kuntrenas kun si grandajn oferojn kaj difektiĝojn. Kiam mi vidas la manieron, kiel oni mistraktas la francan lingvon eĉ en la oficialaj dokumentoj de Unesko (mi eĉ ne parolas pri UNO), mi deziras tutkore, ke tia kalvario estu domaĝita al ĝi! La situacio cetere ne estus la sama, se la interrilata lingvo estus Esperanto: ĉiuj parolantoj kaj skribantoj havus la saman zorgon respekti ĝin, ĉar ĝi aperus al neniuj kiel fremda lingvo, sed ja kiel komuna posedaĵo; kaj aliflanke ĉiu havus multe pli da faciligo por lerni ĝian simplan sintakson kaj ĝian raciigitan vortaron.

Per tia divido de la laboro inter la naciaj lingvoj kaj la internacia, oni povus atingi, kun nemezurebla ŝparo de penoj kaj elspezoj, ian staton de la aferoj, en kiu ekzistus certe ankoraŭ multaj motivoj de konflikto, sed kompanse ankaŭ unu efektiva rimedo de intergenta kompreniĝado, ia efektiva kaj efika ilo je la dispono de la veraj pacamantoj.

DU ALVOKOJ AL LA INSTRUISTOJ

I. LILLE, 1928

... Mi ĵus demonstris al vi (almenaŭ mi tion esperas), ke Esperanto estas lingvo sufiĉe simpla por esti instruata jam al geknaboj de la unuagradaj lernejoj. Mi povus pli longe paroli al vi pri la eksperimentoj faritaj tiucele en pluraj landoj, en Francujo — kaj ĝuste en ĉi tiu urbo jam inter 1908 kaj 1914, en Anglujo, en Germanujo, en Svedlando ktp. Cetere mi havus nur mian parolon por doni al vi pri la atingitaj rezultoj; tial mi simple diros, ke, el mia propra sperto, kiam knaboj lernadis Esperanton dum du jaroj, po du horoj ĉiusemajne, ili efektive ĝin *scias*, kaj ofte parolas ĝin pli flue, ol ilia instruisto mem. Kio estus neeblaĵo ĉe iu ajn nacia lingvo.

Permesu al mi, nun, pli detale montri al vi, kiajn servojn tiu instruado povus fari al junaj knaboj por la lernado de sia hejma lingvo. Tio eble ŝajnos al vi paradoksa. Kaj tamen! Ĉu tio ne estis ĉiam kaj restas la karakterizo de la duagrada instruado, ke tie, dank' al la komparado kun unu fremda lingvo, aŭ latina, aŭ vivanta, la lernantoj akiras pli fundan scion kaj pli bonan komprenon pri la mekanismo kaj strukturo de la franca? Jen kion oni jam de nun povus fari en la unuagrada instruado, dank' al tiu mirinda ilo, Esperanto.

Kaj ĉi tie mi volas saluti la nomon de modesta, forgesita, sed meritoplena antaŭulo, Jean-Marie Picard, ŝtata instruisto en Beauvais, kiu, en 1911, publikigis ĉe P. Brodard (Coulommiers) lernolibron de 244 paĝoj, titolitan: *L'Espéranto à l'Ecole* (E en la lernejo) kun la subtitolo: *Metoda instruado de la Franca lingvo per E. Elementa Kurso: inter 7 kaj 10 jaroj*. Tiu franca gramatiko, en 1032 paragrafoj, lernigas ĝuste, efike kaj pedagogie la ĉefajn regulojn de tiu malsimpla lingvo, ĉiam apogante sin sur esperantaj ekzemploj, kiuj, per sia logiko kaj klareco, gvidadas la infanon, vekas lian scivolemon kaj instigas lin al propraj esploroj. Sufiĉus nur

trafoliumi tiun ĉefverketon de la instruarto, por dokumenti mian tezon. Sed la materio estas tro abunda, kaj mi elektos nur kelkajn signifoplenajn punktojn.

1° La vortaraj ekzercoj, precipe ĉe la junaj knaboj, estas io malfacila, ĉar ili ne sentas la bezonon serĉi ekz-e la malon de donita vorto, aŭ la respondan adjektivon, kiel postulas de ili la leciono. Sed, kiam oni disponas pri la afiksaro de komparlingvo, oni tuj vekas en tiuj malfortaj spiritoj la allogon de la donitaj ekzemploj, la naivan ĝojon kunlabori al ia vortkonstruado. Estas unu afero diri seke: «Trovu la malojn de *attentif*, *facile*, *poli*» ktp; estas alia afero prezenti al ili la duopojn:

granda = *grand*; malgranda = *petit*.

atenta = *attentif*; malatenta = ...?

facila = *facile*; malfacila = ...?

ĝentila = *poli*; malĝentila = ...?

kontenta = *content*; malkontenta = ...? ktp

en kiuj la esperantaj vortoj estas kiel atendoŝtonoj, kiuj instigas la serĉemon. Kaj, kiam la tasko estas finita, la infano ne nur trovis la francajn vortojn *inattentif*, *difficile*, *impoli*, *mécontent* ktp, sed li jam ne rigardos ilin kiel simplajn vortojn, li jam sentos, ke ili havas ion komunan; kaj ne estos tro malfacile al la instruisto komprenigi al li, kio estas prefikso, aŭ rimarkigi, ke pluraj prefiksoj francaj *in-*, *dif-*, *mé-* egalas unu prefikson esperantan, t. e. estas samsignifaj.

2° Ĉe aĝo iom pli matura, oni povos atingi pli interesajn konstatojn. Vi scias, ke, ekde la milito, oni pli kaj pli rezignas pri la malnovaj «vortfamilioj», en kiuj la vortoj estis grupigitaj laŭ sia formo ĉirkaŭ naska simpla vorto: tro da membroj el tiuj familioj rompis ĉiajn sencorilatojn kun siaj parencoj, por ke tiu tasko estu utila al franca lernanto. Ekz-e la verbo *hacher* devenas de la substantivo *hache*, sed la du ideoj fariĝis tute fremdaj unu al la alia: kuiristino ne uzas *une hache* por *hacher* legomojn. Nu, estas ne tre facile sentigi tiajn sencdistingojn al junaj infanoj, ĉiam pli frapitaj de la forma parenceco, ol de la senca diferenco. Sed la esperantaj ekvivalentoj tuj ebligas al la plej mallertaj tion ekkonscii:

haki : *couper* (à la hache)
hakilo : *hache*

hacher : haketi
hachoir : haketilo

kaj la afero estus ankoraŭ pli klara, se oni uzas la modernajn instrumentojn (mueliloj).

Por anstataŭigi la malnovajn «vortfamiliojn», oni do nun ekzercas la infanojn grupigi ĉirkaŭ unu ideo ĉiujn vortojn, kiuj sence rilatas al ĝi. Tio estas tre fruktodona peno, sed ofte tro malfacila por la lernantoj, kiuj ne scias, en kia direkto serĉi la vortsatelitojn, nek en kiaj limoj sin teni. La uzo de simpla esperanta vortaro helpus al ili en nekredebla maniero. El la centra ideo *labourer*, la infano iros al *laboureur* kaj *labourage* kaj tie probable haltos. Sed, se li gvidas sin per E, el *plugi* li iros ne nur al *pluganto* kaj *plugado*, sed per *plugilo* li eltrovos *charrue*, per *plugileto* li atingos *hoyau*, per *pluga* li venos al *aratoire*, per *plugebla* li malkovros *arable* ktp.¹ Kiel praktika rimedo riĉigi la esprimkapablon de knabo! Kaj ankaŭ kia rimedo okulfrape evidenti la malkoherecon de la franca vortrezoro, kaj ĝian konstantan alvokon al la latina fonto! Nenia leciono, farita per la sola franca lingvo, povus igi la faktojn tiel klaraj kaj «parolantaj» al la spirito.

3° Ne malpli gravaj estas la servoj, kiujn oni povas atendi de E pri la instruado de la gramatiko. Mi ne bezonas memorigi al vi, kun kia malfacilo la knabetoj lernas distingi kaj ekkoni la gramatikajn kategoriojn: substantivo, participo ktp, aŭ la gramatikajn funkciojn: subjekto, predikativo, objekto ktp. Tiu malfacilo estas tiel ĝenerala, ke en kelkaj svisaj lernejoj oni elpensis uzon de malgrandaj diverskoloraj kartetoj, kaj provas kutimigi la infanojn meti la substantivojn sur la bluajn kartetojn, la verbojn sur la ruĝajn ktp. Iom primitiva, sed almenaŭ konkreta rimedo, do adaptita al la menso de la infano. Nu, saman konkretan, kaj cetere multe malpli primitivan helpilon proponas al vi E, kiu, per siaj finaj vokaloj, tuj videble kaj sendube klasas la vortojn kiel substantivojn (*domO*), adjektivojn (*belA*), adverbojn (*bonE*) ktp. Same la objekton tuj

¹ Vidu la raporton, kiun Dro Pierre Bovet, Direktoro de la Instituto J. J. Rousseau, faris pri la internacia Konferenco de 1922 en Ĝenevo, aperintan en la revuo «L' Education», Parizo, Dec. 1922.

montras la no-finaĵo (*mi karesas la katoN*). Por knabo, kiu estos akirinta tian lingvon (kaj memoru, kion mi diris pri la kapablo de knabo *vere* estri Esperanton!), por tiu knabo la gramatikaj abstraktaĵoj fariĝos do familiaraj konkretaĵoj, per kiuj li senĝene kaj plezure ludas (*la domo de patro, la patra domo — ŝi bele kantas, ŝia bela kantado* ktp), tiel ke li neniam sentos ian heziton pri la klasado de la respondaj vortoj en sia naskiĝa lingvo.

Mi diros eĉ, ke, malgraŭ ĉia ŝajno, la scio de E helpas lin ankaŭ ĉe la akiro de la ĝusta skribmaniero. La malfaciloj de la franca ortografio venas, almenaŭ por la duona parto, de tio, ke ĝi respegulas gramatikajn apartaĵojn ne plu ekzistantajn en la parolo. La konscio de la esperanta ekvivalento en tiaj okazoj atentigos la infanon pri la ĝusta analizo. Kiam li aŭdos: *Qu'est-ce?*, li pensos pri la esperantigo: *Kio estas tio?* kaj tuj ekvidos, ke temas efektive pri tri vortoj — kio evitigos al li la eraron de liaj malpli kleraj kolegoj, kiuj, allogite de facila analogio, senzorge skribas *Quesse?*, aŭ eĉ: *Caisse?*

Jen kelkaj, pure pedagogiaj vidpunktoj. Aliajn mi ankoraŭ povus pritrakti, multon mi ankoraŭ povus diri al vi pri la morala valoro de la Internacia Lingvo por la formado de tiuj junaj animoj, aŭ pri ĝia valoro de liberigo el la karcero de la unulingveco kaj unuliteratureco. Sed mi timas trouzi, ĉi-vespere, vian komplezon, kaj fidus vian sciamon, ke vi ne lasos seneĥa mian inviton al la Verda Regno.

II. UTRECHT, 1946

Estimataj Gesinjoroj!

Viaj samlandanoj petis min veni ĉi tien esprimi mian opinion pri Esperanto kaj klarigi, kial mi, universitatano kaj profesoro pri klasikaj lingvoj, defendas la tezon, ke Esperanto, kiu estas nek la ununura, nek la plej moderna kandidato al la ofico de internacia komprenilo, estas tamen la sola, kiu havas ŝancojn triumfi, kaj kiu, laŭ mia kredo, fine triumfos.

Mi ne volas, kaj cetere ne povus, en la mallonga daŭro de ĉi tiu parolo, esplori ĉiujn detalajn demandojn pri la fleksebleco, pri la vortriĉo, pri la klareco kaj precizeco de Esperanto; tion oni pli trafe farus per via patra lingvo, kaj krome tio estus ne tre utila por mia celo, ĉar ĉiuj tiuj belaj ecoj, kiujn mi ĵus citis, servus ja por nenio, se la ilin posedanta lingvo estus nur ia kabineta elpenŝaĵo. La ĉefa afero ŝajnas al mi, ke mi klare kaj konvinke montru al vi, kiel Esperanto definitive transpasis la fazon de eksperimento kaj provado, kaj ke ĝi estas ne nur vivipova, sed ja vivanta lingvo.

Unu granda franca medicinisto, Claude Bernard, iam difinis la vivon: «la tutaĵo de la fortoj, kiuj batalas kontraŭ la morto». Tiun difinon oni povus transporti de la biologio al la lingvistiko: lingvo estas vivanta tiel longe, dum ĝi havas la kapablon rezisti al la centrifuga tendenco, kiu puŝas ĝin al disdialektiĝo — aŭ, se pli science paroli, dum, en la spirito de ĝiaj parolantoj, la konscio pri la kolektiva kohereco estas pli efika, ol la egoismaj tendencoj al dialekta partikularismo.

Nu, en la jam pli ol duoncentjara historio de Esperanto, okazis unu kriza momento, en kiu tiuj du malaj fortoj kontraŭstaris unu al la alia: en la jaro 1908a unu franca filozofo, Louis Couturat, iniciatis reformon de Esperanto laŭ aprioraj principoj kaj el logistika vidpunkto; li apogis sin sur pli-malpli efektiva Delegacio de Internaciaj Asocioj kaj altiris al sia projekto, poste nomata Ido, kelkajn el la esperantistaj ĉefoj, interalie la plej eminentan post Zamenhof, la francan propagandiston, kiu donis al si kaj la nomon Louis de Beaufront kaj la titolon markizo. La reformoj, aplikitaj en la projekto Ido, estis relative malmultaj en tiu jaro 1908a, kaj unu duona horo sufiĉis por ilin lerni, tiel ke esperantisto povis facile kompreni idistojn, kaj reciproke. Kaj tamen la entrepreno rapide kaj tute fiaskis: ekde la morto de Couturat kaj Beaufront, praktike plu ne estis parolate pri Ido. Tiun malsukceson oni dankas al pluraj kaŭzoj, sed la precipa estis, ke, kvankam la idistoj tion ne ekrimarkis, Esperanto intertempe jam malvolvigis ĝis plena aŭtonomio, ke ĝi plu ne estis ia provtuba kombinaĵo inter la manoj de kelkaj eksperimentantoj, sed ke ĝi fariĝis la komuna posedaĵo de jam granda publiko da simplaj uzantoj. Couturat kaj Beaufront ne konsciis, ke evoluigadon de Esperanto, tute same

kiel de ia ajn nacia lingvo, povis de tiam efektiviĝi ne decidoj de individuaj gvidantoj, sed nur la kolektiva sento de ĉiuj ĝiaj parolantoj aŭ skribantoj. Kiel humure rimarkis profesoro Ĵirkov:¹ «La interesoj de la kolektantoj de poŝtmarkoj triumfis super tiuj de la filozofoj kaj lingvistoj».

De tiu kruca momento, neniu plu parolis pri reformoj en Esperanto, ĉar ĉiu iom klera esperantisto komprenis, ke tiu lingvo estas akirinta tiun spiritan inerciforton, kiun oni nomas la lingva tradicio, kaj kiu donas al la naturaj lingvoj ilian stabilecon kaj kontinuecon. Stabileco kaj kontinueco estas ja la du veraj kriterioj de la vivkapablo de lingvo, kaj ilin ambaŭ plene kontentigas nia Esperanto. Jen kial la morto de ĝia kreinto, se ĝi afliktis la esperantistojn, neniel afekciis Esperanton mem. Jen kial, post la perturboj de du mondmilitoj, kiuj kaŭzis tiom da ruinoj sur la kampo de la internaciaj aferoj, Esperanto retrovas sin ĉiam verda kaj florpreta. Jen kial oni povas sentime komisi al ĝi la gravan rolon de internacia lingvo, sen ia risko, ke kapricaj ŝanĝemoj venus iam endanĝerigi ĝian sekuran konstantecon.

Favore al tia oficialigo de Esperanto militas multaj argumentoj, kiujn ĉiu racie pensanta homo kapablas facile eltrovi mem. Mi do ne ripetos ĉi tie la gurditajn pledojn pri la dezirateco kaj avantaĝoj de internacia lingvo. Cetere la diskutoj en la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj en la Pariza Packonferenco tre sufiĉe montris la urĝan neceson de tia solvo. Kiam oni ĉeestis, kiel mi faris, kvarhoran laborkunsidon, okupitan nur de duonhora referaĵo kaj de ĉiuj ĝiaj tradukoj, retradukoj kaj mistradukoj, sen ia ajn eĉ komenco de diskuto, oni plene konscias pri la neebleco fari en tiaj kondiĉoj efektivan kaj bonan laboron. Tamen pri du punktoj mi volus insisti, kiuj, en la pasinta tempo, ne prezentis tian saman gravecon kiel en la nuna, kaj kiuj alportas hodiaŭ pliajn motivojn por akceli la elekton de internacia lingvo.

La unua estas la tre malfavoraj cirkonstancoj, kiuj peze malfaciligas la intelektan laboron. Sekve de la militoj, la prezo de la papero kaj de la presado tiel altiĝis, ke —almenaŭ en niaj plagitaj

¹ *Kial venkis Esperanto?*, Moskvo, 1931.

landoj— fariĝis preskaŭ neeble presadi aŭ represadi grandajn sciencajn verkojn: la malgranda nombro de ilia aĉetontaro ne povas kovri la grandon de la eldonkostoj. Kaj tio estas des pli bedaŭrinda, ke la nuna situacio de la scienca aŭ teknika libroeldonado povus daŭri pli longe, ol oni unuavide supozus. Ĝi dependas efektive ne sole de la pasantaj postmilitaj vivoĝenoj; ĝi ja dependas de pli potenca, pli ampleksa faktoro: la mondekonomio emas stabiliĝi je la nivelo de la merkato en la grandegaj nacioj, kiuj disponas tre vastan teritorion, tre diversajn naturproduktojn kaj tre abundan konsumantaron. En tia mondo, konstruita laŭ la normoj de Usono, de Sovetio aŭ de la Brita Regno, la mezgrandaj kaj malgrandaj landoj estos pli kaj pli malfavorigataj; pli kaj pli grandan parton de siaj produktofortoj ili devos dediĉi al la necesega vivteno, kaj des pli malgrandigi la sumojn rezervatajn al la intelektaj bezonoj. En iliaj budĝetoj kaj bilancoj, la parto de la spirito estos pli kaj pli oferita al tiu de la materio. Frapanta ekzemplo estas en mia lando la enciklopediaj entreprenoj. En la dua duono de la 19a jarcento, aperis en Francujo tri enciklopedioj: la *Encyclopédie Moderne*, en 27 volumoj, finpresita en 1863, la *Grande Encyclopédie* en 31 volumoj, finpresita en 1902, kaj la *Grand Dictionnaire Universel* en 17 volumoj, finpresita en 1890. Nu, de tiu epoko, la teorio de la relativeco, la esploroj pri la atomoj, la cibernetiko kaj kiom multaj eltrovoj, kiujn mi ne povas elciti, tiel revoluciis la homajn sciojn; la politikaj kaj ekonomikaj skuegoj aliflanke tiel perturbis la aspekton de la socia vivo, ke oni povas sentroige aserti, ke la homo de 1890 estis pli proksima al la homo de 1200 ol al la homo de 1946. Kaj tamen neniu franca entrepreno estis sufiĉe fortika, por elporti la elspezojn de funda reviziado de unu el tiuj enciklopedioj; kaj, dum la *British Encyclopaedia* (cetere deaĉetita de usona firmo) povis liveri sian dekunuan ĝisdatigitan eldonon, dank' al sia mondskala publiko, la Francoj devas malhavi tiun necesegan laborilon. Kaj tiu situacio estas la sama en preskaŭ ĉiuj niaj eŭropaj landoj, kaj ĝi povos nur akriĝi. Se la adopto de Esperanto ne venos ebligi vastan kunfandadon de ĉiuj tiuj liliputaj legantaroj en unulingvan vastegan publikon, kiu povus elporti la kostojn de eĉ tre teknika publikigado, mi timas, ke la intelektaj verkoj iom post iom putriĝos en

la tirkeŝtoj de senhelpaj eldonistoj, kaj tiamaniere iom post iom malaltiĝos la kulturnivelo en niaj okcident-eŭropaj landoj — aŭ la sciencistoj kutimiĝos redakti siajn verkojn en la angla aŭ la rusa, kaj la rezulto por niaj naciaj kulturoj estos ĝuste la sama.

Ĉar — kaj ni estas nun alkondukataj al la dua punkto, kiun mi ĉi-antaŭe aludis — ĉar la alia danĝero estas, ke, ĉe la kolosaj malfaciloj, kiujn ĉiuflanke estigas la lingvodiverseco en mondo, kiu gigantpaŝe fariĝas ekonomika unuaĵo, la du grandaj regnoj, kiuj fakte dividas inter si la globon, Usono kaj Sovetio, celos altrudi sian nacian lingvon kiel internacian perilon al ĉiuj malgrandaj ŝtatoj, kiuj pli-malpli volonte kuŝas en ilia influfero.¹ Mi ne bezonas atentigi vin pri la minaco, kiun la nacia lingvo de granda popolo prezentus por alilandaj kulturoj, se ĝi estus trudita al ili kiel internacia lingvo. Ne nur la konstanta redaktado de pli kaj pli granda nombro da verkoj en unu fremda lingvo penetrigus en la nian abundon da vortoj kaj parolturnoj, kiuj difektus ĝian belecon, sed, pro la konstanta legado de fremdspirita, fremdinspira gazetaro, revuaro kaj libraro, la sento mem pri nia kultura individueco iom post iom degenerus. Tio eble povus esti rigardata kiel bono, se temus pri cede de naciisma spirito antaŭ vere internacia, aŭ pli ĝuste sennacia terskala spirito. Sed en la nun minacanta konjunkturo, tute ne pri tio estas la demando! Temas kontraŭe pri ensorbado de malgrandaj naciaj kulturoj en unu grandan naciismon, kiu ne nur ne kapablos konservi iliajn bonajn ecojn, estante mem ia vulgariganta kaj heterogena intermiksaĵo, sed ankaŭ multigos kaj intensigos iliajn malbonajn ecojn, kontribuante al la starigo de du gigantaj ŝovinismoj unu antaŭ la alia. Kaj ni pagis sufiĉe kare por scii, kion signifas por la etuloj la antagonismo de tiaj kolosoj!

¹ En 1958 tio estas ja efektiviĝinta: en la kunvenoj de NATO (Organizo de la Teritorioj Nord-Atlantikaj) oni uzas nur la anglan lingvon, same kiel nur la rusa estas uzata en la organizoj, kiuj pli-malpli anstataŭis la iaman Komintern. La paraleleco ekzistas eĉ en la malgrandaj detaloj: la usonaj infanoj de la oficistoj de NATO estas instruataj en apartaj lernejoj en Francujo, sed oni ne instruas al ili la francan lingvon; kaj la rusa estas devige instruata en la elementaj lernejoj de la orienteŭropaj landoj.

Jen al kia katastrofo ni kuras, jen la efektiva, neniel ĥimera danĝero, kiu minacas ĉiujn mezgrandajn aŭ malgrandajn naciojn. Ŝajne, ili ĝin ankoraŭ ne konscias, ili ankoraŭ ne suspektas, ke la sola rimedo, kiun ili disponas por savi sian apartan kulturon estas la ĝeneraligita uzado de sennacia lingvo. Mi esperas, ke vi serioze konsideros tiun aspekton de la demando, kiu speciale vin devas interesi, ĉar vi estas la naturaj defendantoj de tiu minacata kulturo. Kaj mia sola deziro estas, ke el inter vi voĉo pli aŭtoritata ol la mia resendu al la intelektularo kaj politikuloj de via lando mian alarmokrion. KREDU al mi, ne sensperte mi parolas, la afero urĝas kaj ne restas perdota tempo!

Fine, permesu al mi lastan admonon. Ni havas en Esperanto proverbon, kiu diras: «Sonorilo vokas al preĝejo, kaj mem neniam eniras». Ne imitu ilin, mi petas! Se mi sukcesis persvadi vin, aŭ eĉ simple levi en vi ian dubon, ne lasu dormi la demandon: esploru ĝin malvarme, kaj konvinkiĝu mem pri la nobleco kaj indeco de la vin postulanta tasko. Ne hezitu, sed kuraĝe venu al ni, ke ni ĉiuj kune faru el nia idealo efektivan bonfaron por la pensanta homaro. Ĉar tiel grandega kultura progreso ne dependas de mi ne scias kia alta instanco, de la suverena dekreto de iaj mondpotenculoj: ĝi kuŝas tuta en viaj manoj — simile al tiu Regno de Dio, pri kiu la Evangelio konsilas al vi ne demandi, kiam ĝi venos, «ĉar, jen! la Regno de Dio estas inter vi».

2. Esperanto kaj ĝiaj konkurantoj

LA VOJO NIA¹

Revenas la tempo de la «Delegitaro». Okaze de la kreo de Unesko, la problemo de internacia lingvo estas denove debatata. Kaj, dum en Ĝenevo s-ro Julien Benda agitas, cetere sen ia sukceso, por la agnosko de la franca lingvo kiel ununura internacia tradukilo, la radiostacioj, la politikaj kluboj kaj la popolkulturaj societoj invitas la diversajn partianojn de artefaritaj lingvoj diskonigi siajn opiniojn. Efektive, ne temas plu pri Ido: pri tiu «genia definitiva solvo», kiel modeste nomis ĝin profesoro L. Couturat, neniuj plu parolas, krom tie kaj tie ia fantoma voĉo en la mallumo. La nunaj pretendantoj estas siavice «li maxim bon lingue» Occidental de s-ro Edgar von Wahl kaj la ne jam naskiĝinta, sed ankoraŭ pli perfekte nesuperebla lingvo-projekto de I. A. L. A.² La defendantoj de tiuj du dialektoj abunde demonstros pri la mankoj de Esperanto aŭ, kiel unu el ili ĝentile skribis, «quant grotesc e infantesc es li *kara lingvo*».³ Kaj kiam tiuj spertuloj finis sian demonstradon, ili miras, ke nek la esperantistoj estas konvinkitaj, nek la laikoj varbitaj. «Fanatisat masses»,⁴ ili titolas la unuajn, «profanes, quel have li audacie del ignorantie», ili asertas pri la aliaj.⁴ Tiuj koleraj vortoj plej bone malkovras la naivecon de niaj apartigitaj fratoj: ili ne kapablas kompreni la sintenon de la esperantistoj, nek tiun de la publiko, ĉar ili plene eraras pri la kondiĉoj mem de la problemo. Tiu ilia eraro estas la sama, kiun kulpis ĉiuj reformemuloj aŭ reformintoj de Esperanto, ekde Trompeter en 1893

¹ Artikolo en «Literatura Mondo», Marto 1947.

² International Auxiliary Language Association. Post multaj internaj bataloj inter la de ĝi dungitaj lingvistoj, finfine venkis s-ro Alexander Gode kun Interlingua, 1951.

³ «Cosmoglotta», Februaro 1946.

⁴ E. VON WAHL, «Cosmoglotta», Majo 1940.

ĝis Couturat en 1907. Ili ĉiuj, konstatinte, ke la granda publiko ne favoras Esperanton, nek alprenas ĝin kun la sama entuziasmo kiel ili, atribuis tiun nesukceson al la mankoj aŭ malperfektoj, kiujn ili trovis en la lingvo. Kaj ĉar ĉiu el ili havis sian apartan opinion pri la reformendaj punktoj, ĉiu prezentis siajn proprajn proponojn, deklarante absurdaj tiujn de la aliaj. Tio klarigas la svarmon da malvive-naskitaj projektoj, kiuj sekvis sin seninterrompe de post la unuaj sukcesoj de Esperanto. Nur kelkaj el tiuj reformantoj havis la konstantecon, aŭ la monajn rimedojn necesajn por finpretigi sian skemon, eldoni ĝin kaj varbi adeptojn; la aliaj, ne povante realigi sian idealon, aŭ tute forlasis la aferon, aŭ adeptiĝis al unu el la freŝe bakitaj projektoj.

Cetere estas interese rimarkigi, ke, en la sinteno de tiuj personoj, grandan rolon ludas la mensa konstitucio: reformistoj estas plejofte nestabilaj karakteroj, ĉiam persekutantaj la novon kaj ĉiam pretaj forbruligi morgaŭ, kion ili adoris hieraŭ. Ni ĉiuj konas tiajn homojn, kiuj ne povas kontentiĝi je sia fontoplumo, poŝtranĉilo aŭ biciklo, tuj kiam ili ekscias, ke nova, pli rafinita modelo aperis sur la merkato; ili truadas siajn poŝojn per aparatoj strangaformaj, dudekklingaj kaj perfekte neuzeblaj; iliaj bicikloj surhavas tiel delikatajn rapidŝanĝilojn, turnokomputilojn, kompanse ekvilibritan selon ktp, ke estas mirakle, se ili funkcias sendifekte trans la unua kilometro; ilia kuirejo estas provizita per ĉiaspecaj instrumentoj, el kiuj la plej simpla ebligas tranĉi la terpomojn triangule, kube, piramide, pirforme, sed kiujn la bone inspirita kuiristino zorge lasas ripozi en la tirkesto. Sur la kampo de la lingvistiko, la sama temperamento produktas tiujn «reformistojn, perfektigistojn, novasistemistojn kaj unuigistojn»,¹ kiuj forlasis Esperanton por Ido, Idon por Novial, Novialon por Occidental, kaj morgaŭ forlasos Occidentalon por la IALA-lingvo,² atendante ankoraŭ pli freŝdatan, pli lasthoran kaj pli (provizore) definitivan solvon.

Tiuj nomadaj mondlingvanoj forgesas aŭ preteratentas kelkajn

¹ L. ZAMENHOF en *Originala Verkaro*, pĝ 425.

² Kio okazis, kiel mi antaŭvidis, interalie al la ĉefredaktoro de «Cosmoglotta», s-ro Ric Berger, en 1956.

simplajn verojn, kiujn jam longa sperto instruis al ni, kaj kiujn genia intuicio jam divenigis al Zamenhof. La unua estas, ke la publiko absolute ne interesiĝas pri lingvistikaj polemikoj, unuflanke ĉar ĝi ofte ne kapablas ilin kompreni, aliflanke ĉar ĝi ne opinias, ke ili povas liveri al ĝi la kriterion de bona lingvo. Kun sia kruda saĝo, ĝi opinias, ke lingvo estas aparato por interkompreniĝo, ne por gramatikumado; same kiel la perfekteco de biciklo kuŝas en longedaŭra kaj facila ruliĝado, kaj ne en mil-kaj-unu-peca malmuntebleco. Bona lingvo estas, por la publiko, lingvo, en kiu oni povas verki kaj paroli kun la certeco esti komprenata de la samlingvanoj; kaj ne pli pozitivan pruvon pri tiu ebleco oni povas doni, ol efektivan uzadon de ĝi, parolan kaj skriban, ol multon da internaciaj kongresoj, ol abundon da gazetoj kaj ĉiusecaj libroj. Jen kial la esenco de la problemo ne estas senfine ŝanĝi formon de internacia lingvo por alia, eĉ teorie pli perfekta; tio estas uzadi la jam elprovitajn formojn, por fari el ĝi plene vivantan lingvon. Prave skribis Zamenhof: «Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton... nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, *heredan*».¹ Kaj ne senkaŭze li substrekiis tiun lastan vorton: en ĝi kuŝas efektive la tuta solvo de la demando. Lingvo estas, antaŭ ĉio, afero *tradicia*; nur tradicio donas al ĝi fortikon kaj stabilon. Kaj nur kiam Esperanto estos fariĝinta tradicia lingvo, la publiko ĝin akceptos kun la sama respekto kaj konfido, kun kiu ĝi rilatas al la naturaj, eĉ mortintaj lingvoj. Kaj nur tiam ĝi senbare disvastiĝos inter ĉiuj, kiuj sentas bezonon de internacia komprenilo, sed ne volas foroferi karegan tempon al la lernado de ne tute sekurigita idiomato.

Ni tute ne asertas, ke Esperanto estas la sola ebla solvo, nek la plej perfekta solvo; ni simple asertas, ke ĝi *estas* solvo, solvo sufiĉe elprovita, por ke oni estu certa pri ĝia taŭgeco; ke la malrapideco de ĝia propagando estas ŝuldata ne al ĝiaj internaj mankoj,

¹ Letero al Kofman, 1901, *OV*, pĝ 323. Tio estas, parenteze, bona argumento por la sennaciistoj, kiuj ĝuste celas konsistigi tian homan grupon.

pri kiuj la publiko nenion scias, nek kapablus juĝi, sed al la natura inerteco de la homa spirito kaj al ĝia timo antaŭ novaĵoj sur la spirita kampo; kaj tiujn barojn oni venkos ne per facila ŝanĝanimeco, sed per konscia obstinado en la vojo unu fojon elektita. Jen do kio devas esti la regulo de nia agado: persisti en la uzado de nia lingvo, paroladi ĝin, skribadi ĝin, riĉigadi ĝin per ĉia literaturo, ĝis ni atingos la tempon, kiam ĝi aperos en la okuloj de la mondo kiel io familiara pro sia malnoveco kaj tute trankviliga pro sia memkonstanteco. El tio sekvas la neceso severe gardi nian unuecon, deteni nin de ĉia tento al ŝanĝo en la strukturo de la lingvo, kaj, kiel eble plej fidele, imiti la stilon de Zamenhof. «Ĉe la piedoj de la Majstro», la buddistan devizon ĉiu vera esperantisto devus havi en la koro kaj en la spirito.

Ne malpli granda estas la naiveco de niaj skismintaj samcelanoj, kiam ili kontraŭpropagandas kontraŭ Esperanto ĉe la politikaj aŭ kulturaj internaciaj instancoj. Ili ŝajne esperas (ĉar mi tamen supozas ilin sinceraj partianoj de la internacia lingvo), ke, se ili pruvos sian kandidaton pli perfekta ol Esperanto, ili tuj ricevos por ĝi la tutmondan oficialigon. Kaj ĉiufoje, kiam esperantistoj klopodas ĉe tia instanco, ili siaflanke kontraŭklopodas per ĉiaj rimedoj, eĉ ne ĉiam tre lojalaj.¹ Tia agmaniero elmontras plenan nesciadon de la homa psikologio. Eĉ se Esperanto ekzistus sola, kaj senrivala, kaj tre disvastiĝinta, tamen estus tre multaj ŝancoj, ke internaciaj instancoj ĝin oficiale adoptus. Oni memoru nur, el kiaj homoj konsistas tiuj instancoj: ili estas regnaj funkciuloj —kaj oni scias, ke regna funkciulo nenion tiel timas, kiel la iniciativojn; al ili prosperis atingi bone pagatan (kaj senimpostan!) postenon en internacia administrejo— kaj ilia sola zorgo estas kompreneble ĝin konservi, neniam riskante unu paŝon, kiu povus, se malbonrezulta, endanĝerigi ilian situacion; fine ili apartenas al organizo, kiu vivas nur per la unuanima konsento de siaj membroj — kaj ili neniam do inklinos akcepti proponon, kiun unu

¹ «Esperanto-Yiddisch» kalumniis J. Prorok en «Kosmoglott» de Jan. 1924.— «En Russia li sciencistes deve esser caut [*singardemaj*] con enunciations contra Esperanto, quel es protectet del Soviet-regime» skribis E. von Wahl en «Cosmoglotta» de Marto 1927. Ktp.

sola registaro povus rigardi malamika aŭ malprofita por si. Doni oficialigon al io tiel senprecedenca, kiel artefarita lingvo, al io, pri kies estonteco neniam rajtigita aŭtoritato povas ion aserti aŭ garantii, estus do por tiuj burokratoj (kaj burokratoj je la deka potenco!) unu ago de tia blinda fido kaj tia aŭdaca entuziasmo, kian oni povas atendi nur ĉe esceptaj, ekstreme favoraj cirkonstancoj. Kaj se, en tiu momento, konkurantoj venas diri al ili, ke tiu internacia lingvo estas ne la sola, nek la plej bona, la koncernaj burokratoj neniel zorgos enketi pri la nove prezentataj projektoj, nek elekti inter ili: ilia sola reakcio estos eviti kompromiti sin en tia danĝera vesponesto kaj ĝentile «enterigi» la aferon, transdonante ĝin al ia komisiono, kiu siaflanke enmanigos ĝin al ia subkomisiono ktp ĝis la fina forpolviĝo en la eternaj arĥivoj. Kaj oni ne argumentu, ke la resendo al komisiono de lingvistoj povus provizi nin per la ideala solvo: jam la ekzemploj de la Ido-Akademio kaj de la cerbostabo de I. A. L. A. montris al ni, ke estas humane neeble, ke du lingvistoj iam akordiĝu pri la detaloj de planlingvo: ĉiu havas sian propran ideon, ĉiu estas konvinkita, ke li estas la plej kompetenta, kaj ĉiu sekrete malŝatas siajn kolegojn: lingvistojn, teologojn kaj krabojn neniam enmetu en la saman korbon!

La sola rezulto de la kontraŭklopodoj estos do rekte malhelpi al la ideo de lingvo internacia, kaj tute ne adoptigi ian alian pli bonan formon de ĝi. Tia politiko estus defendebla, se niaj kontraŭuloj havus la certecon, ke Esperanto estas nevivipova projekto kaj nepre nekapabla elporti tian pezan rolon, kian oni postulas por ĝi. Sed ĝuste tiu Esperanto estas la ununura inter la kandidatoj, kiu havas malantaŭ si sufiĉe longan paseon por gajni la konfidon de ĉiu serioza esploranto, la ununura, kiu efektive kaj okultrafe pruvis sin taŭga por ĉiaj uzoj, ekde la poezio ĝis la kemia nomenklatur, ekde la elokvento ĝis la diplomatia stilo. Kiam Occident al povos apogi siajn pretendojn per verkoj, kiel la *Biblio* aŭ la hungara aŭ sveda antologioj, *Psikoanalizo kaj Edukado* aŭ *Interpola Konduto*, *Rigardu la Teron* aŭ *Fine mi komprenas la Radion*,¹

¹ La *Biblio* tradukita de Zamenhof kaj de Anglaj pastroj; *Hungara Antologio*, redaktita de K. Kalocsay; *Sveda Antologio*, du volumoj, redaktitaj de Sam Jansson, Bjarne Beckman kaj Arne Lenner; *Psikoanalizo kaj Edukado* originalaĵo de Prof.

ni povos konsenti ekzameni ĝiajn meritojn. Sed tiajn verkojn ĝi eĉ neniam prezentos, ĉar la tempo mankos al ĝiaj adeptoj, antaŭ ol ili estos transfuĝintaj al ia alia pli nova projekto — same kiel okazis pri Ido.

Kiu do estas nia devo, al ni, esperantistoj? Tiu, kiun obeis la soldatoj en la tranĉeoj de la unua mondmilito: elteni. Ni ne devas luli nin per fantaziaj espero; ni ne varbos en la venonta jaro milionojn da anoj, ni ne ricevos de Unesko oficialan sankcion, ni ne ĝuos la helpon de la bonfaraj miliarduloj. Ni devos penige kaj malfacile propagandi, faradi kursojn, multigi la utilajn tradukojn, penetri en la rondojn de homoj, kiel kuracistoj, poŝtistoj, aviadistoj ktp, kies profesio postulas internaciajn rilatojn aŭ korespondadon, ne por atingi de ili formalan agnoskon de nia ekzisto, sed por humile proponi al ili praktikajn servojn. Kiel ajn blinde rutinemaj estas la homoj, ili ne povos finfine ne rimarki, ke estas pli oportune korespondi kun la tuta mondo per unu lingvo, ol per dekelkaj... Kaj tiel, paŝo post paŝo, ni atingos tian faktan pozicion, ke unu belan tagon la mondo povos ĝin nur konstati kaj reguligi per oficialigo. Tiu aglinio ja estas nek fulma, nek sensacia, sed ĝi estas la sola ebla, laŭ mia konvinko — kaj tia estis ankaŭ la konvinko de Zamenhof:

Malfacileco, malrapideco

Al ni la vojon ne baros.

Sen malhonora malkuraĝeco

Ni, kion povos, ni faros...

P. Bovet; *Interpopola Konduto*, originalaĵo de prof. E. Privat; *Rigardu la Teron*, de H. W. van Loon, tradukita de G. Saville; *Fine mi komprenas la Radion*, originalaĵo de E. Ajsberg.—Mi hodiaŭ citus ankaŭ: *Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj*, kaj *La Vivo de la Plantoj*, originalaĵoj de Dro P. Neergaard, *Aktualaj Problemoj de la Internacia Vivo kaj Retoriko*, originalaĵoj de Dro I. Lapenna, kiel la plej rimarkindajn konkerojn de nia literaturo teknika en la lastaj jaroj.

ESPERANTO ANTAŬ LA TRIBUNALO¹

Ne la unuan fojon oni vokas nian lingvon antaŭ juĝantojn: ni ĉiuj memoras pri iu Delegacia Komitato, kiu absolvis ĝin nur konsidere al ĝiaj multaj konatuloj kaj sub la kondiĉo, ke ĝi plibonigos sian sintenon. Oni scias, kio rezultis: la malbonkondata knabo plu kreskis, dum la severmora kaj altkoluma tribunalo forgesigis en la ĝenerala indiferenteco.

Ĉi-foje la tribunalo konsistis el universitata areopago, kaj la raportanto estis vere kompetenta pri la afero: eĉ la neprobabla povas okazi. Tiu raportanto, W. J. A. Manders, nun filologia doktoro, havis la nekutiman ideon, antaŭ ol pretendi juĝopovon super nia lingvo, devigi sin al dumjara praktikado de Esperanto; kaj ni povas diri, ke li pruvis sin majstro: al li efektive ni ŝuldas tiun belegan tradukon de la *Odiseado*, kiu restos inter la grandaj verkoj de nia literaturo. Lia nuna tezo estas unu el tiuj verkoj, kiuj honoras la sciencon kaj la scienciston: ĝi certe faros epokon en la historio de la Lingvo Internacia. La sola bedaŭrindaĵo estas, ke tia verko aperis en la nederlanda lingvo, restante tiel ekster la atingo de tre multaj eŭropanoj: Esperanta traduko, aŭ almenaŭ adapto, ŝajnas vere necesa. Provizore, mi penos resumi ĝin sufiĉe detale, por ke oni havu klaran ideon pri la enhavo kaj ĝia valoro. Mi avertas cetere, ke mia traduko ne estos ĉie laŭlitera. Post tiu resumo mi, en dua parto, aldonos kelkajn miajn konsiderojn.

I

En sia antaŭparolo, la aŭtoro deklaras: «Kvankam mia verko celas unualoke la lingvistojn kaj aliajn intelektulojn, kiuj, ne lerninte apartan lingvon internacian, deziras orientiĝi en tiu nova

¹ Okaze de la universitata tezo de Dro W. J. A. MANDERS: *Vijf Kunsttalen (Kvin artlingvoj)*, unu volumo el 386 paĝoj, ĉe J. Muusses, Purmerend (Nederlando), 1947.

tereno de la lingvistiko, tamen mi esperas, ke ĝi prezentos ankaŭ intereson por la anoj de la diversaj lingvoj internaciaj — mi pensas precipe al la esperantistoj, ne nur ĉar ili estas, el nombra vidpunkto, la plimulto, sed ankaŭ ĉar ĉe ili regas ofte malĝustaj ideoj pri la aliaj lingvoj internaciaj, precipe pri Ido kaj Occidental. La idistoj kaj occidentalistoj multe pli interesiĝas al la teoria flanko de la problemo, ol la esperantistoj... Cetere ne estas la plej malgranda kaŭzo por timi la veron. Esperanto estas neperfekta, tion Zamenhof mem konfesis; sed ĉe ĝiaj neperfektaĵoj ĝi posedas ankaŭ eminentajn kvalitojn. Mi opinias, ke mi demonstris, ke neniu el la diskutitaj lingvoj internaciaj superas Esperanton — sed, se eĉ alie estus, mi havas la konvinkon, ke la granda disvastiĝo de Esperanto pezas pli grave en la pesilo, ol la bonaj ecoj de ĝiaj konkurantoj'. . . Aliflanke, estas superflue aserti, ke mi atendas nenian bonon de antaŭtempaj reformoj. Kun Zamenhof mi opinias, ke oni ne povas pensi pri modifoj, ĝis ia supera leĝdona instanco decidis pri la definitiva formo de la lingvo internacia». (Verko citita, pĝ v).

Post enkonduko el kvin partoj (1. Multeco de la ekzistantaj lingvoj. 2. Ekspansio de difinitaj lingvoj. 3. *Lingua franca* kaj la kreolaj lingvoj. 4. La kaŝlingvoj. 5. Artlingvoj) sekvas du ĉapitroj pri la *Celo kaj intenco de la artlingvoj* kaj pri *Historiaj donitaĵoj koncerne al Volapük, Esperanto, Ido, Occidental kaj Novial*.

El tiuj 109 unuaj paĝoj oni povas, eĉ kiam oni jam legis la historiojn de Couturat kaj de Drezen, ankoraŭ ĉerpi multajn interesajn faktojn kaj pripensindajn ideojn: la aŭtoro estas rimarkinde informita kaj lia dokumentado estas plej freŝa. Li tie difinas tre precize la celon, kiun proponis al si la kreantoj de la kvin studitaj lingvoj kaj la kondiĉojn de ilia laboro. Tio estis la necesa bazo por la ĉefa parto de lia libro, la tria ĉapitro: *Esploro pri la valoro de Volapük, Esperanto, Ido, Occidental kaj Novial*. Jen efektive kion li diras, en ties unua paragrafo, pri sia metodo:

«Ĉiu el la pritraktitaj lingvoj celas fariĝi internacia komprenilo, sed ĉiu el ili prezentas al si diversmaniere, kiel atingi tiun celon. En mallongaj formuloj, ni povas diri, ke Volapük celas plej grandan perfektecon, E plej grandan simplecon, sed kun la konservo de ĉiufanka efikeco, Ido volas — almenaŭ en sia primitiva intenco—

esti nur plibonigita kaj pli sciencotaŭga Esperanto, Occidental volas havi la aspekton de romida lingvo, kaj Novial celas fariĝi kompromiso inter Ido kaj Occidental. Tial estas nejuste apliki al ĉiuj tiuj lingvoj la saman mezurilon. Ĉiu detalo devas esti ekzamenata en la kadro de la tuto, kaj oni ĉiam devas havi antaŭ la okuloj, kian koncepton la aŭtoro de ĉiu lingvo havis pri la celo de sia kreaĵo» (Samloke, pĝ 112).

Kvankam oni atendus, el tia rimarkigo, prezenton kaj apartan studon de ĉiu lingvo en ĝia tutaĵo, Dro Manders opiniis pli oportuna sinoptikan prezenton de la kvin lingvoj okaze de ĉiu ĉapitro de la gramatiko. Krome, li ne volis limigi sin al ilia teoria konsisto: prave asertante, ke lingvo, kiu ne kapablas praktike plenumi sian rolon, estas senvalora, kiel ajn harmonia estas ĝia strukturo, kiel ajn granda estas ĝia teoria perfekteco, li volis esplori la manieron, kiel artefarita lingvo estas uzata, en la ĉiutaga vivo, far' de nekulturitaj homoj. Sed materialon por tia uzateco liveris nur E: Volapük, Ido, Occidental kaj Novial povis provizi lin nur per tekstoj redaktitaj de kelkaj intelektuloj kaj specialistoj, kaj tiaj tekstoj neniel informas pri la maniero, kiel tiuj projektoj eltenos la vivelprovon. La aŭtoro devis do kontentigi sin per pure teoria prezentado de tiuj lastaj kvar lingvoj, dum E estas detale ekzamenata kaj sur la teoria kaj sur la praktika kampo. La teorian studon li faris precipe kun la helpo de la *Plena Gramatiko*, la praktikan li faris per du rimedoj: li prinotis pli ol mil leterojn, skribitajn de homoj de plej diversaj nacioj kaj kulturniveleoj — kaj aliflanke li utiligis la rimarkindajn statistikojn de ofteco, kiujn s-ro Fenton Stancliff publikigis en *Enciklopedio de E* (sub *Vortstatistiko*) pri la afiksoj kaj prepozicioj en *OV*, *Hural* kaj *Historio de E*; li eĉ plilarĝigis tiun enketon al 9 aliaj volumetoj (4 poeziaj kaj 5 prozaj). Tiamaniere li donas sciencan kaj objektivan priskribon de E, kaj, se li ne elĉerpis la temon, li almenaŭ atingis, ke de nun oni ne plu povos ĝin pritrakti sen referenco al lia verko.

Jen nun la sinsekvaj partoj de tiu grava tria ĉapitro:

I. ALFABETO. Oni jam konas la grandajn riproĉojn faritajn al niaj supersignitaj konsonantoj; la aŭtoro konstatas, ke, malgraŭ tio, Occidental ne hezitis aldoni supersignojn al siaj vokaloj.

Cetere, mi tre dubas, ĉu nia lingvo akirus eĉ unu adepton plian, se ĝi estus malembarasita je tiuj tipografiaj ĝenoj.

II. ORTOGRAFIO kaj PRONONCO. La aŭtoro montras, kiel la zorgo pri simpleco kaj konsekvenco en E kontrastas kun la historia ortografio kaj la multeco de la occidentalaj prononcreguloj.

III. VORTARO. Dro Manders resumas la vortfaradon kaj afiksaron de ĉiu el la kvin lingvoj:

a) Pri Esperanto li montras, helpe de siaj statistikoj, plurajn interesajn trajtojn: ekz-e, aprobe al la tendenco de la neologismema skolo anstataŭigi la mal-vortojn per simplaj radikoj, li notas, ke en la *Fundamenta Krestomatio* oni renkontas meznombre po unu malvorton inter 64 vortoj; en la (pli posta je almenaŭ 10 jaroj) *La Rabeno de Baĥaraĥ*, po unu inter 50; en la *Teatra Korbo*, po unu inter 116 kaj en *Preter la Vivo*, po unu inter 196 — des pli rimarkinda konstato, ke Baghy en 1933 metis sin sur la flankon de la Japanoj, kiam tiuj ekbatalis kontraŭ la neologismemuloj.

Same, kuriozaj ciferoj pri la relative granda ofteco de *ek-* ĉe la Hungaroj: la oftec-proporcio de *mal-* kaj de *ek-* estas:

en <i>La Rabeno de Baĥaraĥ</i>	328	kontraŭ	127;
en <i>Teatra Korbo</i>	56	—	43;
en <i>Infero</i>	231	—	148;
en <i>La Stranga Butiko</i>	57	—	9;

t. e. ke (proksimume) kontraŭ la sama nombro da mal-vortoj (56), Zamenhof uzis 21 fojojn *ek-* kaj la franca Schwartz 9 fojojn, dum la hungarlingvaj Kalocsay kaj Baghy uzas ĝin respektive 37 kaj 43 fojojn.

Pri *-an* la aŭtoro notas, el la analizita korespondado, la jam konatan kaj ne subpremeblan emon uzadi tiun sufikson ĉe ĉiuj popolnomoj (*Bulgaranoj, Anglanoj, Italianoj, Rusanoj, Francanoj, Turkanoj, Hispananoj* ktp estis renkontitaj). Pri la sencligita *-uj*, li konkludas: «Oni povas antaŭvidi, ke kun la tempo *-ujo* devos lasi la lokon al *-io* kaj al *-lando*, sed oni ne povas ankoraŭ antaŭvidi, kiu el tiuj du lastaj formoj finfine triumfos».

Pri *-ig* kaj *-iĝ*, lia traesploro de la koresponda materialo montris, ke tre multaj esperantistoj eraras pri la uzo aŭ neuzo de tiuj du sufiksoj, ĉar ili ne ĝuste memoras la transitivecon aŭ netransitivecon de la verbaj radikoj.

Konklude al la vortfarada sistemo de E, Dro Manders deklaras, ke la radikmalriĉo, principe intencita de Zamenhof, restas, malgraŭ la nombro de la neologismoj poste enkondukitaj de Zamenhof mem kaj de liaj sekvantoj, potenca helpilo por la ne-eŭropaj popoloj, kiuj, dank' al tiu senfina multformeco de la kunmetado, povas malŝarĝi sin je la lernado de peza vortaro.

b) Pri la *Ido*-vortaro, li detale difinas la multajn afiksojn kaj la famajn regulojn de «renversebleco», por konkludi kun Jespersen (tamen unu el la kreintoj de tiu lingvo): «Kiam oni skribas en *Ido*, oni ĉiam troviĝas antaŭ la demando: ĉu la logiko ĉi tie permesas al mi senpere derivadi, aŭ ĉu mi devas uzi sufikson, kaj kiun? *Skribo, skriburo, skribajo?* — *Vundo, vunduro?* — *Impedo, impedilo, impedivo?* — *Grupar, grupifar, grupigar, grupizar...*? Kion mi elektu?»

c) Pri *Occidental* Dro Manders montras, kiel von Wahl intencis kaj sukcesis «enkorpiĝi la internaciajn vortojn en unu regulan sistemon de derivado». Efektive vortoj kiel: *television, stabilisation, amabilitá, cigarette, promenada, herbarium* ktp estas regule formataj occidentalaj derivaĵoj. Sed li montras ankaŭ la koston de tiu sukceso: la malfacila etimologia ortografio, la multegaj afiksoj (91, el kiuj multaj estas sinonimaj) kaj la senaŭtonomeco de la lingvo.

Al tio aldoniĝas la malfacila akcentado: la akcento falas sur tiun vokalon, kiu antaŭas la lastan konsonanton, kaj jam tia regulo estas malpli aŭtomate aplikebla ol la nia, ĉar oni devas okuli la vorton por malkovri la akcentitan silabon: tiu povas esti jen la lasta (*autor*), jen la antaŭlasta (*maschine*), jen la praantaŭlasta (*linea*). Krome oni devas scii, unue, ke la plurala finaĵo *-s* kaj la adverba finaĵo *-men* ne influas la akcentlokon (*families, practicalmen*); due, ke la finaĵoj *-bil, -ic, -im, -ul, -um* neniam ricevas la akcenton; fine, ke estas okazoj neregulaj, en kiuj la akcento estas

principe montrata per supersigno (*buró, árbor, supé ktp*). Por montri la oftecon de tiuj lastaj okazoj, Dro Manders notas, ke en hazarde elektitaj 5 paĝoj li trovis ĝis 74 supersignojn. Vere estas, ke von Wahl deklaris, ke ili estas necesaj nur en la lernolibroj kaj vortaroj: tio, respondas Dro Manders, ne estas plene ĝusta, ĉar ekzistas homoj, kiuj lernas lingvon nur per legado de tekstoj, kaj eĉ, ĉe LI, tio ŝajnas la plej bona maniero. Oni konfesu, ke multaj el tiuj neregulaj akcentoj estas nature prononcataj de la kulturitaj homoj, eĉ sen supersignoj, sed tio ne estas ĉiam la okazo, ekz-e *eco, mone* (prononcendaj: *ecó, moné!*).

Ankaŭ ĉe la derivado, sub la unuavida komprenebleco, kaŝiĝas malfaciloj. Por atingi regulan faradon de la internaciaj vortoj, von Wahl elpensis tri regulojn (kiuj, same kiel la Tri Musketeroj, estas efektive kvar!):

Antaŭ ol almeti al verba radiko la sufiksojn -ion, -or, -ura, -iv kaj -ori, oni zorgu:

1. *ĉe la radikoj finiĝantaj per -a aŭ per -i, aldoni -t!*
(ekz-e: *amar, radiko ama, do amat-or, -ori ktp*)
2. *ĉe la radikoj finiĝantaj per -ye, ŝanĝi -ye al -t!*
(ekz-e: *atinyer, rad. atinye, do atint-ion ktp*)
3. *ĉe la radikoj finiĝantaj per -de aŭ -re, ŝanĝi tiujn literojn al -s!*
(ekz-e *vider, rad. vide, do vis-ion ktp*; *carrer, rad. curre, do curs-iv ktp*)
4. *ĉe la radikoj finiĝantaj per alia konsonanto plus -e, simple forpreni la -e!*¹
(ekz-e *opiner, rad. opine, do opin-ion ktp*).

Jen la kondiĉoj, laŭ kiuj von Wahl ricevis regule formojn internaciajn. Sed Dro Manders ĝuste rimarkigas: «Kvankam oni ofte povas dedukti laŭ tiu metodo la infinitivon el la internacia substantivo (ekz-e el *destruct-ion* oni eltiras *destruct-er*), oni ankaŭ

¹ Lastatempe, oni elpensis alian formon por la Wahlj reguloj, forstrekte la radikojn finiĝantajn per *-ye* (oni diras nun *atinger, distinter ktp*), sed oni devis lasi ekster la reguloj kvin «neregulajn verbojn».

ofte riskas erari, ĉar oni neniam povas diveni, ĉu la forigo de la internaciaj sufiksoj lasos primaran aŭ modifotan radikon: *definit-iv* respondas ne al *definit-er* sed al *defini-r*, *adhes-ion* ne al *adhes-er* sed al *adher-er* ktp».

Kaj li finas la occidentalan ĉapitron per jena konkludo: «Oni devas konfesi, ke von Wahl plene atingis sian celon: li celis difini derivregulojn, kiuj ebligis ricevi ĉiujn internaciajn vortojn en la formo, kiun donis al ili la romidaj lingvoj. La rezulto de lia laboro estas unu homogena kaj harmonia sistemo, kiu estas senpere komprenebla de la kleruloj kaj kiu, ĉe nura supra ekkonatiĝo, ne malkaŝas sian artefaritecon. Sed la vera demando estas, ĉu la celo de von Wahl estas ĝusta. Kia estas la profito, krei lingvon tuj legeblan nur por la kulturitaj homoj? Se tiajn homojn oni volus atingi, pli facile estus uzi tuj la francan lingvon. La tuta sistemo de Occidental supozigas fundan scion de almenaŭ unu romida lingvo. Kiu volas esprimi sin en Occidental, tiu ne povas uzi libere la prezentatajn afiksojn laŭ sia bontrovo, sed li devas uzi nur tiujn, kiuj kondukas al internacia konata vorto aŭ al derivaĵo kun romida aspekto. Jespersen diris:

Tie, kie unu sufikso sufiĉas, Occidental havas multajn: *coquett-erie*, *alt-ess*, *ver-itá*, *liber-tá*, *long-ore*, *malad-ie*. Reguloj ne estas liverataj, kaj ne povas esti liverataj, krom jena: oni eklernu kelkajn naciajn lingvojn kaj eksciigu el ili, kian sufikson oni devas uzi. Kaj eĉ en tia okazo la lernanto povas heziti, ĉar la F *longueur* (de kie *long-ore*) respondas al la I *lunghezza*, kun tiu sama sufikso, kiu estas difinita por *alt-ess*.¹

»Tiu juĝo de Jespersen estas tro severa, ĉar oni povas ankaŭ lerni la uzadon de la afiksoj per funda studado de Occidental. Pli vere estas, ke pri individua vortfarado oni apenaŭ povas paroli en Occidental. Se oni deiras de la hipotezo, ke la LI devas pli malpli frue sennecesigi por multaj la studon de la fremdaj lingvoj — kaj tio estas ankaŭ la opinio de von Wahl — tio signifas, ke en la estonteco tiuj homoj devos eklerni la vortaron de Occidental

¹ O. JESPERSEN, *An International Language*, London, 1928, pĝ. 97.—Ni aldonu unu trafan ekzemplon: la *Occidental-Deutsch Wörterbuch* de A. MATEJKA (Chappelle, 1945), por traduki *flavo* lasas al la uzanto la elekton inter *yelbesse*, *yelbine*, *yelbore* kaj *yelbitá*!

kune kun ĉiuj ĝiaj kunmetaĵoj kaj derivaĵoj preskaŭ en la sama maniero, kiel oni nun lernas la derivaĵojn de la franca aŭ de la hispana. Sendube Occidental restas multe pli facila, ol la naciaj lingvoj, dank' al la relativa reguleco de sia derivado kaj sia simpla gramatiko; sed por tiu, kiu ne havas la apogon de romida lingvo, ĝia sistemo de vortfarado estas superita de E kaj de Ido pri la facileco, dum pri sia aplikeblo ĝi estas superita eĉ de Volapük. Oni ne forgesu ankaŭ, ke tiu imitado de la romidaj lingvoj, kaj la evitado de ĉio, kio povus fari impreson de artefariteco, povas esti ŝatata nur de tiuj, kiuj familiariĝis kun la romidaj lingvoj. Se iam devas okazi, ke multaj homoj kontentiĝos nur je Occidental krom sia patrina lingvo, tiuj homoj, se nur ili ne apartenas al romidlingvaj popoloj, tiros tre malmulte da profito el la fakto, ke la occidentala vortfarado senigis sin je ĉiu apriora elemento» (Samloke, pĝ 198-199).

ĉ) Komparante la meritojn de la diversaj lingvoj internaciaj pri la vortfarado, Dro Manders resumas sian studon per tio, ke «Zamenhof iris plej malproksimen en la uzado kaj alĝustigado de la afiksaro; ke la idistoj eraris, rigardante la internaciecon de la vortaro pli kiel celon, ol kiel rimedon; kaj ke von Wahl limigis sin je la analizo de la ekzistantaj internaciaj kunmetaĵoj, malatentante la kreadon de novaj; tia aŭtonomeco, kiu ekzistas en Volapük, en E kaj en Ido, plene mankas en Occidental kaj parte en Novial... Sume estas nejuste kritiki vortaron, nur ĉar ĝi entenas vortojn aŭ derivaĵojn, kiuj laŭforme ne havas paralelojn en la okcident-eŭropaj lingvoj. La decidiga demando estas, ĉu tiu vortaro havas altan gradon de efikeco kaj de facila lernebleco. Se unu skema sistemo, laŭ la tipo de E, alportas krome gravajn intelektajn profitojn (kaj mi opinias, ke tia estas la okazo), tiam ĉiuj aliaj konsideroj havas akcesoran valoron» (Samloke, pĝ 216).

IV. GRAMATIKO. Tiu ĉi ĉapitro estas kompreneble la plej ampleksa, kaj la aŭtoro ekzamenas sinsekve ĉiujn punktojn: la artikolo, la substantivo (nombroj, genroj, kazoj), la adjektivo, la adverbo, la pronomoj, la numeraloj, la verbo, la prepozicioj, la konjunkcioj, la subjunkcioj kaj la vort-ordo.

Mi ne povas sekvi lin tra ĉiuj detaloj de lia esploro; mi resume diros, ke li severe kritikis la tutan gramatikon de E, kiu ne obeas la principon de Zamenhof, t. e. la facilan lerneblecon. Sen granda peno li montras, per la analizo de sia koresponda materialo, ke la simplaj esperantistoj tre ofte pekas kontraŭ la akuzativo, la akordo de la adjektivo, la distingo inter adjektivo kaj adverbo, la ĝusta uzado de la perfektaj participoj ktp.

Nur —mirinde!— la tabelo de korelativoj trovas favoron antaŭ liaj okuloj, pro la eksperimento farita en 1933 en Usono. Multaj el miaj legantoj, kiuj havas la okazon aŭdadi plendojn pri la artefariteco de tiu tabelo, probable ne konas tiun kuriozan empirian pravigon de unu el la geniaj intuicioj de Z; tial mi tradukos la lokon: «Sub la aŭspicioj de IALA, oni organizis jenan eksperimenton: 20 universitataj studentoj, havantaj specialan scion nek de E nek de Ido, studis la 45 tabelvortojn de E kaj la respondajn, neregulajn, vortojn en Ido, dum 90 minutoj en ĉiu kazo. La afero estis aranĝita tiel, ke 10 el ili studis la esperantaĵon la 4an de Januaro kaj la idajon la 5an, dum la 10 aliaj studis inverse la idajon la 4an kaj la esperantaĵon la 5an. Poste, la 6an de Januaro, okazis por la 20 studentoj unu testo, kies rezultoj estis: por la traduko de la vortoj el la LI en la anglan lingvon, la meznombro de la ĝustaj respondoj estis:

44 pri Esperanto kaj **43** pri Ido;

por la inversa traduko el la angla en la internacian lingvon, la meznombro de la ĝustaj respondoj estis:

32 pri Esperanto kaj **15,5** pri Ido.

Kaj la raporto konkludas: 'La esperanta sistemo de korelativoj estis kritikita kiel artefarita, trosistema kaj malfacila; nia propra ekzameno kaj personaj spertoj inklinigis nin al la sama kritiko, sed niaj pli vastaj eksperimentoj instruis nin pridubi ties validecon' (*Language Learning, a Report to I. A. L. A.*, Columbia University; New York, 1933)»¹ (Samloke, pĝ. 259).

¹ Por ĝui la tutan guston de tiu peco, oni atentu, ke Interlingua, profite al kiu IALA organizis tiun eksperimenton, fiere reĵetis la korelativan tabelon kaj elektis, kiel Ido, senkoherajn vortojn por tiu funkcio. La raporto probable perdiĝis en iajn arĥivojn...

Kelkajn el la gramatikaj malfaciloj de E malaperigis Ido, aliajn ĝi kontraŭe pligravigis (tri infinitivoj en *-ar*, *-ir*, *-or*; sintezaj verbformoj en *-ab-*, *-es-* ktp). Male, kaj tion Dro Manders aprobas, Occidental kaj Novial ilin tute forigis. Eĉ Novial estis pli radikala, ol Occidental, ĉar ĝi konas nur unu verban formon, al kiu ĝi aldonas diversajn partiklojn por formi la tempojn kaj modojn, dum Occidental distingas ankoraŭ formojn kunmetitajn kun la infinitivo kaj aliajn kun la pasiva participo:

Esperanto	Occidental	Novial
<i>mi amas</i>	<i>yo ama</i>	<i>me ama</i>
<i>mi amis</i>	<i>yo amat</i>	<i>me amad</i>
<i>mi estas aminta</i>	<i>yo ha amat</i>	<i>me ha ama</i>
<i>mi amos</i>	<i>yo va amar</i>	<i>me sal ama</i>
<i>mi estas amata</i>	<i>yo es amat</i>	<i>me bli ama ktp.</i>

V. KONKLUDOJ. «Ĉiuj ĉi tie pritraktitaj lingvoj estas uzeblaj. Tiu juĝo apogas sin ne sur la teorio, sed sur la praktiko. Volapük, E kaj Ido estis parolataj de miloj da homoj, apartenantaj al ĉiaj sociaj klasoj kaj al ĉiaj nacioj. Occidental nun akiras ne malmulte da adeptoj (precipe inter la intelektularo) kaj ŝajne jam venkis Idon. Male Novial restas ankoraŭ nun ĉe eksperimenta stadio... Kvankam Occidental kaj Novial ne povis ĝis nun pruvi, ke ili estas uzeblaj por grandaj amasoj de ne-intelektuloj kaj por homoj, kies patrina lingvo estas tre diferenca de la romidaj, tamen ni povas supozi, per analogio kun E kaj Ido, ke tiuj du lingvoj estas taŭgaj por ĝenerala uzado. Tio tamen ne signifas, ke oni devas rigardi ĉiun en la sama maniero».

La aŭtoro tiam resumas la ĉefajn karakterizilojn de la kvin lingvoj. Lia juĝo pri E kontraŭmetas la preskaŭan perfektecon de la vortfara sistemo al la malsimpleco de la gramatiko. En la vortfarado, la sola eraro de Zamenhof estis ne elekti simplajn vortojn por kelkaj tre ofte uzataj kaj simplaj nocioj, kiel: *malpli*, *malsupre*, *malgranda*, *maljuna* ktp. Cetere Zamenhof mem ofte enkondukis neologismojn anstataŭ kunmetitaj vortoj: li do sentis mem, ke troa limigo de la vorttrezoro ne estas ĉiam gajno. Kiam temas pri oftege renkontataj vortoj, la malavantaĝo de kunmetita formo

superas la avantaĝon de radikŝparo; tio estas sentebla precipe ĉe la pluformado: *malgrandigi*, *malfermiĝo*, *patrineco* ktp.

Male, «la malforta punkto de E estas ĝia gramatiko. Zamenhof ja asertis, ke liajn 16 regulojn oni povas lerni en duonhoro: sed kiom gravas tiu eblo, se tiujn regulojn oni sukcesas apliki senerare nur post longa praktikado? La deviga akuzativo, la akordiĝo de la adjektivo, la distingo inter adjektivo kaj adverbo, la refleksa poseda pronomo, la kunmetitaj tempoj, ĉio tio postulas tiom da pripenso, kiom da rutino. Aldonu al tio la subtilaĵojn de la akuzativo de direkto, de la objekta predikativo, de la adverba formo de la predikativo en sensubjektaj frazoj ktp — jen kion oni ne povas lerni en duonhorol Estas vere, ke oni ne povas fari gramatikon, kiu estus oportuna por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj individuoj. Vere ankaŭ estas, ke ekzistas limoj al la serĉo de plej granda simpleco. La Lingvo Internacia devas posedi altan gradon de uzebleco — kaj tiun nekontesteble atingis Esperanto. La eraro estas pli ĝuste, ke por tio oni ne uzis la plej simplajn rimedojn, kaj tiu eraro estas grava ĉe artefarita lingvo, kiu celas ĝeneralan uzadon» (Samloke, pĝ 345).

Al Occidental Dro Manders ^Tripoĉas precipe la tro limigitan celon, kiun difinis al si ĝia kreinto. «Von Wahl destinis ĝin nur por tiuj, kiuj efektive jam okupas sin pri internaciaj rilatoj, t. e. nur por tiuj, kiuj jam faris altajn studojn kaj scias almenaŭ unu romidan lingvon. Tiu opinio estas funda eraro. Tiaj kulturitaj homoj estas ĝuste tiuj, kiuj malplej bezonas ilon por internaciaj rilatoj, ĉar ili jam posedas por tio la lernitajn naciajn lingvojn. La ekzemplo de E montras, ke artefarita lingvo disvastiĝas precipe inter homoj, kiuj havas preskaŭ nenian scion pri fremdaj lingvoj, kaj kiuj ĝuste uzas Esperanton por orienti sin sur la tereno de la internaciaj rilatoj. Krome estas neĝusta opinio, ke la Ll divastiĝos nur en la landoj anglalingvaj kaj romidlingvaj, kiuj precipe interesiĝas pri la internacia trafiko: eĉ se ne paroli pri la granda disvastiĝo de E en la iama Rusujo, en la antaŭhitlera Germanujo, oni scias, ke ĝi trovis la plej favoran grundon en la malgrandaj nacioj de la centra kaj orienta Eŭropo, kaj, ekster Eŭropo, en la malproksima Japanujo. Oni cetere povas rimarki, ke, se E pro sia strukturo mallogas la intelektulojn, Ido, kiu ekzistas jam de 40 jaroj, estis pli laŭdata ol

lernata de tiuj samaj intelektuloj, kiuj favoris ĝian naskiĝon, kaj ke Occidental, en siaj 25 jaroj da ekzisto, jam liveris almenaŭ la pruvon, ke la intelektuloj ne sentas urĝan bezonon de LI.

»Dua malavantaĝo de Occidental estas ĝia vortfarado: von Wahl rigardis, kiel plej grandan superecon de sia lingvo, ke ĝi entenas nenian aprioran elementon; ĝiaj sufiksoj estis elektitaj malpli por konstrui memstarajn kunmetaĵojn, ol por rekonstrui la jam ekzistantajn internaciajn vortojn de romida deveno. Oni povas admiri, ke li sukcesis redukti la vortfaradon de la romidaj lingvoj en tiel relative simplajn regulojn. Sed kiel ajn inĝenia estas tiu sistemo, ĝi havas malgrandan praktikan valoron. Dum en E aŭ en Ido oni povas kombini la lingvajn elementojn libere, tio estas neebla en Occidental. Ĉiu kunmetaĵo, kiu ne respondas al formo uzata en la romidaj lingvoj, estas tie malpermesata. Se oni zorgas nur pri la propra signifo de la afiksoj kaj radikoj, oni neeviteble estas alkondukata al kreado de vortoj kiel *militariatu*, *affabilierie*, *esperore*, *povrificar*, *capitalario*, *liberie*, *mortantie*, *commensation* ktp, kiuj, kvankam teorie korektaj, estas tamen eraraj, ĉar la tradicio de la romidaj lingvoj trudas la uzon de aliaj samsignifaj afiksoj (*militarism*, *affabilitá*, *esperantie*, *apovrir*, *capitalist*, *libertá*, *mortalitá*, *commensament* ktp). Tiu, kiu ne scias romidan lingvon, devas do lerni ĉiujn tiujn kunmetojn kiel simplajn vortojn. Vere estas aliflanke, ke tiu, kiu scias romidan lingvon, povas unuavide legi occidentalan tekston — kion oni ne povus diri pri E aŭ Ido.

»Ankaŭ la gramatiko de Occidental estas pruntita en tutaĵo de la okcidentaj lingvoj. Von Wahl ĉi tie montris tre bonan komprenon de la problemo. Neniu el la aliaj artefaritaj lingvoj povas fieri pri tiel simpla kaj celtaŭga gramatiko, kiel Occidental. Same pri la ortografio kaj prononco, Occidental sekvas la kutimojn de la okcidentaj lingvoj.

»Ĉio tio estas aprobinda, se oni difinas la Lingvon Internacian nur por tiuj, kiuj jam posedas vastan lingvosciencan. Sed se male la LI devas antaŭ ĉio koncerni tiujn, kiuj scias nur sian patrinan lingvon, por tiuj nek la etimologia ortografio, nek la romida derivsistemo havas ian valoron, sed ili trovas ja pli da profito en fonetika ortografio kaj en aŭtonoma sistemo de vortfarado» (Samloke, pĝ 349-352).

Lasta ĉapitro de la libro estas dediĉita al la *Lingvistiko kaj la artlingvoj*, interalie al la entrepreno de IALA. Ĝi rakontas pri la sinteno de la ĉefaj lingvistoj rilate al la ideo de LI, kaj montras, kiel, komence tre malŝatantaj kaj nekredemaj, ili finfine ekvolis partopreni mem en la kreado de LI. El tiu ĉapitro mi tradukos nur unu tre interesan paĝon de Jespersen, kiu mem partoprenis en la konstruo de du projektoj de LI: «Ne estas ĉi tie la loko, li deklaris en la IIa Internacia Kongreso de la Lingvistoj, diskuti pri la meritoj aŭ malmeritoj de la diversaj proponitaj lingvoj internaciaj. La elekto inter ili ne povas esti senprezare decidita per okaza tarigardo de lernolibroj kaj specimenoj; ili estas, tiurilate, similaj al homaj estoj, kies kelkaj plej ŝatindaj kvalitoj estas malkovrataj nur post pluraj jaroj da intimeco. La demando postulas daŭrajn seriozajn esplorojn, kaj ilin mi konsilas al ĉiu el vi. Mi povas certigi vin, el mia propra sperto, ke kun la tempo tia esplorado estas profitodona. Mi ne estus estinta kapabla fari la malmulton, kiun mi faris sur la kampo de la ĝenerala lingvistiko, kaj eĉ sur tiu de la angla sintakso, sen mia profunda studo de la Lingvoj Internaciaj» (*Aktoj de la Kongreso . . .*, Parizo, 1933, pĝ 101).¹

II

Jen do, en ĝiaj ĉefaj trajtoj, la tezo de Dro Manders; kompreneble, multajn sagacajn rimarkigojn mi devis preterlasi, sed mi penis kiel eble plej fidele resumi lian verkon, kies senpartiecon kaj objektivecon oni povas nek pridubi nek tro laŭdi. Nun, mi permesos al mi esprimi pri kelkaj punktoj mian personan opinionon, kaj eĉ kuraĝos elmeti kelkajn kritikojn. *Amicus Plato . . .*

1° Unualoke, mi bedaŭras, ke inter la pritrakitaj lingvoj ne troviĝas Latino sine Flexione de Prof. Peano: ĝi havas, en la historio de la LI, almenaŭ tian gravecon, kiel Novial, kaj ĝi certe instigis von Wahl al la prilaborado de Occidental; krome ĝi prezentas la ekstreman finon de la ventumilo, kies alian ekstremaĵon

¹ Oni komparu tiun deklaron kun tiu de Prof. A. Sauvageot (pĝ 14), kaj oni vidos, kie troviĝas la modesteco, tiu neerariga kriterio de la vera sciencisto.

okupas Volapük, kaj estis, por scienca studo, io necesa disponi kaj kompari la du limtipojn, inter kiuj viciĝas ĉiuj aliaj. Cetere, eĉ el praktika konsidero, la LI de Peano longtempe havis adeptojn, eĉ eminentajn, en Italujo.

2° Mia dua riproĉo koncernas la amplekson, kiun Dro Manders donis al la prezento de E: dum la ceteraj lingvoj estas studataj nur teorie, E estas studata detale en sia praktikiĝo: tio donas al la tuta verko malbonan ekvilibron kaj al la rapidema leganto la impreson, ke nur en la praktikado de E oni renkontas tiom da eraroj kaj misuzoj. La aŭtoro probable respondos, ke nenio povis doni pli forte la pruvon, ke la sola E estas vivanta, dum la aliaj projektoj estas apenaŭ uzataj; eble, sed tamen ŝajnas al mi, ke la priskribo de E per la dokumentoj meritis formi tute apartan ĉapitron, kiu sekvus la sinoptikan prezentadon de la kvin sistemoj el teoria vidpunkto, kaj kiu estus nure dediĉita al la *Aplikado kaj evoluo de unu artlingvo*. La elstara pozicio de E inter ĝiaj rivaloj estus tiele evidentigita, sen ia difekto de la senpartia sinteno de la aŭtoro.

Tiamaniere, li estus povinta montri, en plena klareco, kio ĝuste estas la «vivanteco» de E: ĝi estas efektive nenio alia, ol tiu interna forto, kiu malhelpas la enkondukon de eĉ dezirindaj reformoj, se nur ili kontraŭus la koherecon aŭ endanĝerigus la tradicion de la lingvo. La vivantecon de lingvo oni povas mezuri laŭ ĝia forto de inercio. Kaj la kontrasto estas vere frapanta, inter Ido aŭ Occidental, en kiujn diversaj akademioj aŭ eĉ personoj enkondukis pli-malpli gravajn ŝanĝojn, sen ia rezisto de la flanko de la uzantoj¹ — kaj E, kies uzantoj sentas sin intime respondecaj pri ĝia kontinueco kaj stabileco. La historio de la reformprovoj por senĉapeliĝi niajn ĉ, ĵ, ŝ, ĥ, de la proponoj de nova prepozicio por

¹ Kelkajn ekzemplojn: en Oktobro 1911, post tri jaroj da esploroj, la Idista Akademio jam publikigis 686 decidojn, modifantajn ne nur la formon de radikoj, sed afiksojn ktp. En la n-ro de la idista gazeto «Progreso» de Majo-Aŭgusto 1953, oni registris, ekde la renaskiĝo de la Akademio post la dua mondmilito, 144 novajn decidojn, kaj preparadis novajn.

Aliflanke, en Novembro 1949, la oficiala (kaj cetere sola) gazeto de Occidental, «Cosmoglotta», decidis ŝanĝi la finaĵon de la adjektivoj, kiu de -i fariĝis -e: kaj neniu ajn protestis, eĉ ne la Academie Interimari de Occidental!

enkonduki la pasiv-agenton (la formortintaj *da, baj, par* ktp) estus liverinta al li valorajn dokumentojn pri tiu punkto, kaj estus tiele reliefiginta la unikan karakteron de E inter la aliaj lingvoj internaciaj.

3° Rilate la analizon de la plej ofte renkontataj eraroj — kio estas bonega maniero ekzameni lingvon artan — ŝajnas, ke Dro Manders estus devinta fari gravan distingon. Iuj el la kolektitaj eraroj rezultas ja el la malsimpleco de la esperanta gramatiko, sed aliaj rezultas el la ekzisto de gramatikaj distingo, kiuj trudas sin al ĉiu LI, kia ajn estas ĝia strukturo aŭ celo: ekz-e la eraroj faritaj de slavlingvanoj pri la artikolo, la konfuzoj faritaj de germanlingvanoj inter la adjektivo kaj la adverbo, la konfuzoj faritaj de francilingvanoj inter la infinitivo kaj la pasiva participo — ĉio tio koncernas ne propre Esperanton, kaj ne devus esti aljuĝita al ĝia ŝuldokonto.

Cetere estas tre malfacile decidi, kion la eraroj de nekulturitoj aŭ de komencantoj pravas kontraŭ la koncerna fremda lingvo. Tiujn erarojn plejofte estigas la malsimilecoj inter la gepatra lingvo kaj la lernata; sed ili ankaŭ povas deveni simple de la misformado de la spirito de la skribinto, kiu eble ne kapablas korekte uzi eĉ sian propran lingvon: kiel alimaniere klarigi la erarojn kontraŭ la akuzativo trovitajn sub la plumo de Polo kaj de Ruso (pĝ 230)? Mi estas certa, ke nekulturita Franco, uzante Occidentalon, trovas malfacilaĵojn kaj kulpus erarojn, kiujn Dro Manders apriorie ne suspektus; la pluralo de la substantivoj ne plu ekzistas en la parola franca lingvo, tiel ke eĉ abiturientoj forgesas almeti la finan -s en multaj okazoj: ĉu ankaŭ en Occidental ili ne farus tiun eraron? Ĉu la distingo inter la *ha* de la helpverbo kaj la *have* de la verbo *havi* estus facila por Franco, kiu tian ne havas en sia lingvo, kaj ĉu li ne skribus senhezite: *yo have scrit* 'mi estas skribinta' tute same kiel *yo have un lettre* 'mi havas leteron'? Ĉu li malkonfuzus la pronomojn *noi* 'ni' kaj *nos* 'nin', 'al ni' ktp, *vu* kaj *vos*, se li ne kutimas fari tiun distingon en sia lingvo? Ĉu li retrovus sin inter la *tu, te, ti, to, ta* aŭ inter la *que, quo, qui, quin, qual, quel, quem*¹ ktp,

¹ Respektive, en E: *ci, cin, tiu, tio, tie* kaj *ke, kio, kiu, kvin, kia, kiu, kiun*.

la kompatindulo? Ĉu tio estus sufiĉa motivo por kritiki la komplikecon de la occidentala gramatiko? Unu el miaj 12-jaraj lernantoj skribis en sia lasta tasko: *Les bonne femme bavardées sur le pas de leur portent*. Se li estus analoge skribinta en E: *La bona virino babilitaj sur la sojlo de iliaj pordas*, ĉu tio ion signifus pri la meritoj aŭ la malmeritoj de la esperanta gramatiko? Tio pruvus, ke temas pri unu nenormale kreskinta knabo, nenion pli. Mi timas, ke pluraj el la ekzemploj de mistraduko cititaj de Dro Manders apartenas al tiu kategorio.

4° La vera demando estus, laŭ mia opinio, esplori precize la konfuzojn, kiuj ekzistas en la ĉefaj naciaj lingvoj, kaj decidi pri ĉiu el ili, kiuj do povas esti tolerataj en LI sen difekto de ĝia klareco, kaj kiuj ja ne povas. Tio evidente postulus vastajn kaj longajn esplorojn kaj evidentigus ion, kion la genio de Zamenhof divenis, kaj kion la modernaj lingvistoj komencas suspekti: nome, ke lingvo estas relative kohera mekanismo, kies ĉiuj partoj iel interrespondas. Kaj tio liveras bonan kriterion pri la valoro de la diversaj lingvoj internaciaj: ĉar estas eraro opinii, ke oni povas, por konstrui unu tian, prunti de unu nacia lingvo apartigitan elementon, ne konsiderante la aliajn, kiuj necese interrilitas kaj kongruas kun ĝi.

Oni ekzemple diras al ni, ke en A la adjektivo ne varias, kaj ke tian saman nevariecon devas havi la adjektivoj en LI. Sed oni simple forgesas, ke la angla verbo, almenaŭ en la prezenco, montras mem la pluralon, kaj ke aliaj rimedoj helpas ankaŭ evitigi ĉian konfuzon. Angla esperantisto iam demonstris, ke lia lingvo iafoje esprimas la pluralon pli ofte, ol E. Inter *a dog is a faithful animal* kaj *dogs are faithful animals*, la pluralo estas esprimita kvin fojojn: per du pluralaj finaĵoj *-s*, per la forigo de la singulara nedifina artikolo *a* kaj per la plurala formo de la verbo: en la respondaj esperantaj frazoj la pluralo estas esprimita nur trifoje (komparu: *hundo estas fidela besto* kaj *hundoj estas fidelaj bestoj*). Ĉu do la simpligo de tri pluralsignoj al du, kio estas la tuta plibonigo de Ido aŭ Occidental pri tiu punkto, sufiĉas por kompensi la malpliigon de la klareco en la okazoj, kie adjektivo povos egale rilati al singulara aŭ al plurala substantivo (kiel en jena ida frazo: *la filii dil funcionero subskribinta co kontrato* ... kio povas egale signifi: 'la filoj

de la funkciulo subskribinta jenan kontrakton' aŭ 'la filoj de la funkciulo subskribintaj jenan kontrakton')?

En tio ĉi ĝuste kuŝas la plej granda difekto de Ido; eble mia rimarkigo havas nur historian valoron; ĝi povas tamen esti instru-dona en la diskuto pri aliaj projektoj de LI. Couturat efektive volis konservi multon de E kaj samtempe enkonduki novaĵojn, kiuj estis fremdaj al la strukturo de tiu lingvo. Rezulte Ido aspektas kiel monstro, ĉar ĝi ne havas internan harmonion inter siaj elementoj. Mi klarigu per tipa ekzemplo: se en unu LI oni atribuas karakterizan valoron al la vokalaj finaĵoj, oni kreas sistemon analogan al tiu de la romidaj lingvoj, I aŭ H: nu, unu el la ĉefaj karakteriziloj de tiuj lingvoj estas la akordo inter la substantivo kaj la adjektivo. Se oni alprenas aŭ konservas la unuan trajton, kiel faris Ido,¹ kaj forigas la duan, oni ricevas ian senkoheraĵon. Neniu kulturita homo, neniu romidlingvano tolerus sen malplaĉo grupon da vortoj kiel *la inteligenta homi esas rara*. Por allasi la neŝanĝeblecon de la adjektivoj, unu LI devas havi almenaŭ eksteran aspekton analogan al tiu de D aŭ A kaj ne doni al la vokalfinaĵoj ian gramatikan rolon: la occidentala frazo: *li intelligent homes es rar* prezentas multe pli kontentigan tipon, almenaŭ el tiu vidpunkto.

Tutsame oni povus imagi ian lingvon internacian kun aŭ egale sen akuzativo; sed starigi laŭvolan akuzativon, kiel faris Ido, estas absolute erara solvo. Oni povus multigi tiajn rimarkojn: naskita de kompromisoj, konstruita de diverstendencaj lingvistoj, Ido neniam akiris la kunteniĝeman strukturon necesan al vivanta lingvo, dum E aŭ Occidental, kreaĵoj de unu sola spirito, ĝin vere posedas.

5° Restus do por kompari tiujn ĉi du lastajn lingvojn. Pri tiu komparo, mi devas konfesi, ke la sinteno de Dro Manders ŝajnas al mi, mi ne diros partia, sed ne tute justa kontraŭ Esperanto. Unuflanke li ne sufiĉe reliefigas la malfacilojn de Occidental, aliflanke li ne sufiĉe montras la originon de la malfaciloj de Esperanto. Kompreneble, li volis eviti ĉion, kio povus aspekti

¹ Kaj kiel faras parte Interlingua, atribuante al la finaj vokaloj o kaj a la signifon de seksomontriloj ĉe komunaj nomoj.

kiel polemiko aŭ apologio kaj maldecus al la serena tono de doktoreca disertacio. Tial mi, kiu ne havas tiajn skrupulojn, ne hezitas anstataŭi lin sur tiu kampo.

A) Pri la *akcentado* de Occidental, ekz-e, Dro Manders skribas, ke «multaj neregulaj akcentoj devas esti nature divenataj de la intelektuloj». Nu tio estas eble vera por Nederlandano, sed certe ne por Franco, mi tion povas ĵuri. Neniu Franco «nature» akcentos la vortojn *anim*, *corpore*, *tempore* aŭ *domino* sur la unua silabo, kaj oni povas veti, ke la akcentita estos la lasta. Cetere, pri jenaj vortparoj, mi ankaŭ vetas, ke nur tre malmulte el la ne-francaj intelektuloj ĝuste divenos la lokon de la akcento (oni ne forgesu, ke ĝi ne estas nun montrata per supersigno en la gazeto de Occidental!):

nomines — *nominar*

borgos — *borges*

bulbes — *bulbos*

termino — *termine*

tempore — *tempera*

ordine — *ordona*¹

Krome, se Dro Manders ŝatas analizi la erarojn (ĉar ankaŭ mi havas miajn dokumentojn!), mi aldiros, ke en la sola occidentala frazo, kiun mi iam aŭdis, ĉe radio-dissendo, en la buŝo de tiulingva eminentulo, s-ro De Guesnet, troviĝis ĝuste unu akcenteraro: la ne speciale malofta vorto *gramática* estis akcentita sur la antaŭlasta. *Ab uno disce omnes*...

B) Same pri la *vortfarado*.

1. Dro Manders bone montris, ke la simpleco de la Wahljaj reguloj estas nur unudirekta, nur en la pasiva uzado de la lingvo, kaj ke, se temas pri aktiva formado de novaj kunmetitaj vortoj, la afero fariĝas multe pli malfacila por tiu, kiu ne konas almenaŭ unu

¹ Ĉu vi provis? Nu, jen la solvoj: la unua vorto en ĉiu paro estas akcentita sur la unua silabo; la dua vorto estas akcentita sur la lasta en la tri unuaj paroj, sur la antaŭlasta en la tri lastaj. Kiu gajnis?

romidan lingvon. Sed li estus povinta aldoni, ke eĉ por romidlingvanoj la aktiva uzado de Occidental estas okazo de sennombraj eraroj. Kiamaniere Franco povos diveni, sen konstanta kaj peniga pripenso pri la formo de la respondaj derivaĵoj, la ĝustan vokalon de la infinitivoj? F *finir* tradukiĝas ja per *finir*, sed *contenir* per *contener*; F *concerner* estas ja *concerner*, sed F *composer* estas *composir*; F *résumer* fariĝas *resumar*, sed F *consumer* — *consumpter*, kaj F *assumer* — mi ne scias kio (tiu vorto ne troviĝas en la occidentala vortaro, malgraŭ A *to assume*, H *asumir*, I *assumere* ktp). Al F *perdre* respondas la occidentala *perdir*, sed al F *tordre* respondas *torder*; al F *rendre* — *rendir*, sed al F *pendre* — *pender* ktp.

Se temas pri la afiksoj, kiel do Germano povos diveni, ke la paralelaĵoj *frei* — *Freiheit* kaj *neu* — *Neuheit* difektiĝas en la neparalelaj *liber* — *libertá* kaj *nov* — *novitá*? Aŭ ke al la samsufiksaj *compensation*, *illustration*, *intention*, *reaction*, *sedition* respondas la malsamsufiksaj adjektivoj: *compensatori*, *illustrativ*, *intentional*, *reactionari*, *seditioni* (t. e. ‘kompensa’, ‘ilustra’, ‘intenca’, ‘reakcia’, ‘ribela’)? Aŭ, lerninte, ke la sufiksoj *-iere* kaj *-uore* signifas ambaŭ D *Gefässe* (= ujo), kiel do li povos elekti inter *teiere* kaj *teuore* por signifi la ‘tekruĉon’? La germana vortaro de Matejka nenion instruos al li pri tio — kaj ni bonanime supozos, ke li antaŭe ne konfuzis la sufiksojn *-iera*, *-iere* kaj *-iero*!

2. La sistema kaj perfekta aposterioreco de la occidentala vortfarado havas por la uzanto alian gravan malavantaĝon. Pro tio ke, en la romidaj lingvoj mankas kelkaj afiksoj por signifi diversajn tre utilajn rilatojn, von Wahl ne opiniis sin rajtigita elpensi surogatojn kaj senigis sian lingvon je tiaj oportunaĵoj. Ekz-e, ĉar F, H kaj I ne posedas komunan, ĝeneraluzan sufikson de grandigo, oni povas eble paroli en Occidental pri *pluviett* ‘pluveto’ — «eble», ĉar oni neniam estas certa pri la uzebleco de neinternacia derivaĵo, sed estas tute neeble paroli pri ‘pluvego’, kaj oni devas kontentigi sin per *pluvie battant* (kio ne estas la sama afero!). Kaj tamen ni vidis (pĝ 71), ke nek la popola lingvo nek la scienca rifuzas al si tiajn kreaĵojn: ĉi tie von Wahl montris sin, laŭ la franca proverbo, pli rojalisto ol la reĝo mem! Jen kial vi ne trovos en Occidental afiksojn respondajn al niaj *-ig* aŭ *-il*,

kies oportunecon eĉ plej okaza uzanto de nia lingvo kapablas atesti. Jen kial niaj sufiksoj *-ind* kaj *-ebl* estas tradukataj per unu sola *-bil*, tiel ke mi neniam aŭdacus flustri al juna occidentalistino (se tiaj ekzistas¹), ke ŝi estas *amabil*, timante, ke ŝi komprenos nur, ke mi trovas ŝin amebla...

3. Alia flanko de la demando pri la vortfarado estas lasita de Dro Manders tute en ombro: tio estas la demando pri la signifo de tiuj kunmetaĵoj. En E tiu signifo estas simple kaj precize la sumo de la signifoj de ĉiuj kuniĝintaj elementoj: *malsanulejo*, *senelirejo*, *samideanaro* ktp povas esti analizitaj same tiel laŭ la senco, kiel laŭ la formo, kaj ĉiu vortero ĉiam kaj ĉie konservas sian propran signifon. Tio ne estas vera en Occidental. Von Wahl fieras (kaj Dro Manders laŭdas lin pro tio), ke internacia vorto kiel *circumstantie* povas laŭregule esti analizata laŭ la occidentala afiksaro: *circum-sta-nt-ie*; tio estas vera; sed se oni serĉas la signifon de ĉiu el tiuj vort-elementoj (kiel estus devigata fari iu ajn Ruso, Turko, Japano ktp) kaj se oni aldonas ilin, oni ricevas la sencon de *ĉirkaŭstaranteco*, kio estas iom malproksima de la esprimota ideo de *cirkonstanco*! Ni supozu unu Hungaron, aŭ eĉ unu Germanon antaŭ jenaj vortoj, provantan malkovri ilian sencon laŭ la informoj liveritaj al li de la *Radicularium Directiv* de von Wahl, aŭ laŭ la *Wörterbuch* de A. Matejka: laŭ tiu metodo, li trovos, ke *disposition* signifas *dismetado*, ke *prejudicie* signifas *antaŭjuĝisteco* (Matejka donas nur *prejudicament*, kio egalus al *antaŭjuĝistado*), ke *survigilar* 'kontroli' signifas *maldormi sur*, kaj ke *ondular* 'ondadi', montrita de von Wahl kiel derivaĵo de *unde*, havas verŝajne nenian signifon, ĉar la sola formo *ul* trovebla en la vortaroj signifas... *strigo*! Oni do konfesu, ke tiuj vortoj, pri kiuj oni asertas, ke ili estas pure occidentalaj derivaĵoj, devas esti lernataj kiel simplaj vortoj, kaj oni ne plu fanfaronu pri la «senlima facileco» de la occidentala vortfarado! (Vd. ankaŭ pĝ 116).

¹ Tio ne estas malĝentila aludo, sed nur konstato de kurioza fakto, kiu cetere respegulas la kabinetan karakteron de tiuj lingvoj, kaj signifas ne malmulte pri ilia vivanteco: nek en la Ido-gazeto «Progreso», nek en la occidentala «Cosmoglotta» oni renkontas eĉ unu kunlaborantinon!

4. La vero ŝajne estas, ke von Wahl simple preteratentis la semantikon en la konstruo de sia lingvo. Tute okupita de la analizo de la internaciaj vortoj (kaj mi konfesas, ke tiun analizon li faris brile, kvankam iom koste, se oni pensas pri la nombro de la necesaj afiksoj), li simple forgesis, ke tiuj vortoj havas ofte plurajn signifojn, kaj ofte ne la samajn en la diversaj naciaj lingvoj. Jam de longe nia Akademio rimarkigis, ke la vortoj estas ofte pli internaciaj per sia formo, ol per sia senco. La occidentalistoj ankoraŭ ne aŭdis pri tio.

En E tiu diverssenceco ne estas ĝena, ĉar la internaciaj vortoj estas enkondukitaj en la lingvon nur kun preciza signifo, kiun kontrolas kaj garantias la propre esperantaj kunmetaĵoj, kiujn ili anstataŭas. La signifo de *hospitalo* estas ĉiam kontrolebla, ne nur el la oficialaj dokumentoj, sed ankaŭ kaj precipe per la sinonimo *malsanulejo*, kiu estas iel ĝia duoblaĵo. Sed en Occidental okazas nenio simila, kiu povus malhelpi Svedon kompreni *hospitale* kiel *frenzeulejo*, laŭ la sveda signifo de tiu internacia vorto.

Sub *col(l)ector* 'kolekti', vi trovos en la du occidentalistaj vortaroj la derivaĵon *col(l)ector*, sed neniue ajn instruos al vi, ĉu tiu vorto havas la anglan signifon de *kolektisto*, la francan de *kloakego* aŭ la germanan de *vendisto de loteribilettoj*. *Expedition* estas ja bona internacia formo, sed ĉu ni komprenu ĝin *ekspedicio* kun la Francoj, *malprokrasto* kun la Angloj, *gazetoficejo* kun la Germanoj? Ĉu *exhibition* signifas laŭ la angla *stipendio*, laŭ la franca *senhonta parado* aŭ laŭ la germana *ekspozicio*? Ĉu *tentator* estas la franca *tentanto* aŭ la sveda *ekzamenanto*? En sia *Radicarium* von Wahl indikas al *turre* 'turo' la derivaĵon *turriero*: ĉu tio respondas al la I *torriere* 'turgardisto', aŭ al la H *torrero* 'turgvatisto'? Mil similaj problemoj prezentas sin ĉe la internaciaj vortoj; sed ne esperu trovi al ili solvon en la occidentalaj dokumentoj: pri tiu punkto la aŭguristoj estas mutaj.

C) Tiom pri Occidental. Koncerne Esperanton, mi plene forcedas al Dro Manders, ke nia gramatiko enhavas malfacilaĵojn. La tuta demando estas, ĉu ili estas utilaj aŭ forigindaj. Ne distingi, kiel faras Occidental, inter la formo de la subjekto kaj tiu de la objekto, havi nur unu partupon en ĉiu voĉo, konfuzi ol

kun *kiel*, malhavi refleksivan pronomon ktp estas ja malembarasi sin je multaj delikataj elektokazoj — sed eble je la kosto de la komprenebleco mem.

Kiam mi legas en ilia germana lernolibro jenan ekzemplon: *Su patre e su matre hat fat omni arrangeamentes, necesi por su viage*, mi ne povas ne miri, kiel von Wahl ne sentis la bezonon precizigi, ĉu tio signifas: «lia (aŭ: ŝia) patro kaj patrino jam faris ĉiujn aranĝojn necesajn por lia (aŭ: ŝia) vojaĝo» aŭ «por sia vojaĝo»: estas tamen ia malgranda diferenco, kiel diris la fama anekdoto.

Se mi legas, aliloke: *Rapport approximativ pri merces importat durant ti ci estive*, ĉu mi devos kompreni: «Proksimumaj raportoj pri varoj importitaj dum ĉi tiu somero» aŭ «Proksimumaj raportoj pri varoj estis gravaj dum ĉi tiu somero»?

Oni eble respondos al mi, ke el la ĉirkaŭteksto estas divenbla la senco de tiaj frazoj. Ĝustege: en la divenado ĉiam kuŝas almenaŭ unu ŝanco de eraro! Cetere, oni neniam forgesu, ke en tia divenado multe helpas al ni aŭ la fakto, ke la lingvon ni konas jam de frua infanaĝo, kaj kutimiĝas al ĉiuj ties malfaciloj, kaptiloj kaj nuancoj, dum la LI estas kaj longatempe restos nenies gepatra lingvo, do iagrade ĉiam fremda, kaj ke ĝiaj malfacilaĵoj riskas montri sin pli ribelaj al nia intuicio; aŭ tiu alia fakto, ke la temo estas al ni tiel bone konata, tiel facile komprenebla, ke ĉiu racia spirito senpene distingos la veran signifon: sed ĝuste tia povas ne esti la okazo en la internaciaj aferoj. Estas kutima eraro de la adeptoj de la unuavida komprenebleco forgesi, ke la LI devas servi ne nur por mendi tagmanĝon aŭ aĉeti vojaĝbiletan, verki propagandan artikolon aŭ babili en kongreseto, sed ankaŭ por la redaktado de la plej delikataj kaj gravaj tekstoj en la juro, la scienco kaj la diplomatio. Se tion oni ĉiam gardas en la memoro, oni eble konsentos, ke iom tro da klareco ne estas principe kondamninda, eĉ se aĉetita per iom tro da malfacilo. Mi konis anglan importiston, kiu ĉiam postulis, ke la komercaj kontraktoj estu redaktitaj en la franca, kaj al mia miranta demando, li iam respondis: «Ĉar en la franca, la participoj akordiĝas!». Ne estus ja malfacile trovi okazojn, ĉe kiuj la akordo aŭ neakordo de participo ŝanĝis la signifon de grava frazo kaj sekve gajnis

aŭ perdigis unu proceson. Kiom pli tio gravas ĉe la politikaj kontraktoj!

Résume Occidental pagas sian gramatikan simpligadon per malriĉigo de sia esprimkapablo, kaj fojfoje eĉ per manko de klareco. Oni havas la impreson, ke von Wahl estis des pli avara pri la morfologio, ju pli malavara li montris sin pri la radikaro kaj afiksaro. Estas unu afero bone ebenigi krudan tabulon, estas alia afero forraboti ĉiajn ornamaĵojn de skulptita panelo. Finfine, lingvo estas rimedo de interkompreniĝado; kaj kiam oni vidas la malfacilojn, kiujn la homoj suferas por interkompreniĝi eĉ per sia gepatra lingvo, oni ne povas troigi la valoron de la klareco en lingvo, kiu ambicias interkomprenigi ĉiujn homojn en la vasta mondo!

* * *

Evidente, eĉ antaŭ tia severa kaj erudicia tribunalo, la afero de E estis sukcese pledita: tion pruvas la fakto, ke ĝi aprobis la tezon de s-ro Manders, aljuĝante al li la «filologian doktorecon *cum laude*».

Oni cetere komprenas ke, en science objektiva kaj universitata disertacio, ne povis esti loko pri kompara taksado de la meritoj de ĉiuj kandidatoj al la rolo de LL. Sed nenio malhelpas nin lasi nian fantazion arogi al si la ruĝan talaron kaj la pompan bireton kaj atribui al ili notojn kvazaŭ en konkurso. Al tio povas helpi al ni la materialoj diligente kolektitaj de Dro Manders, kaj la ekzemplo de lia spiritlarĝeco. Ĉar lingvo, precipe lingvo internacia, estas io tro kompleksa, por ke oni povu ĝin juĝi el unu vidpunkto: mi opinias, ke ni devus ekzameni la kandidatojn koncerne jenajn diversajn kvalitojn: I. La simpleco de la fundamenta vortaro. II. La simpleco de la gramatiko. III. La reguleco de la vortfarado. IV. La klareco. V. La stabileco de la lingvo. VI. La facileco de pasiva uzado (t. e. legado) por poliglotoj. VII. La facileco de pasiva uzado por ne-latinidaj unulingvuloj. VIII. La facileco de aktiva uzado (parolo, skribado)

por poliglotoj. IX. La facileco de aktiva uzado por ne-latinidaj unulingvuloj. X. La estetika valoro.¹ Se ĉiun el tiuj kvalitoj oni notos de 1 ĝis 5, oni povus, mi opinias, interkonsenti proksimume pri jena taksado:

	I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII	IX	X	Sumo
Esperanto	5	1	4	5	5	1	4	3	3	3	34
Ido	2	3	3	4	1	3	3	2	2	3	26
Occidental	1	5	3	3	2	5	2	3	2	2	28

Ĉi tiu tabelo probable mirigos la sinjorojn, kiuj flatas al si, ke ili kapablas juĝi artefaritan lingvon per la unua rigardo; sed, kiel diris La Fontaine:

La perfekteco estas afero pli sekreta!

Kaj ni fine danku al Dro Manders, ke li donis al ni la okazon konstati, ke nia alligiteco al la esperanta formo de LI, jam pravigita sur la sociologia kampo (kiel mi montris en antaŭa artikolo: paĝo 359 k. s.), estas ankaŭ pravigebla sur la filologia tereno.

¹ Kiel ajn delikata estas ĉi tiu lasta kriterio, ĝi tamen estas konsiderinda. Oni prave riproĉis al E akumulajn da ŝo-sonoj. Sed ankaŭ en Occidental la akumulado de la malgraciaj sufiksoj *-tion*, *-tional*, *-ment*, *-mentari* ktp, la hakata kaj malplaĉa ripetado de la finaj dentaloj ne levas ĝian literaturan valoron: oni nur aŭskultu jenajn durajn versojn, montritajn kiel modelon en «Cosmoglotta» (kaj oni ne forgesu akcenti la vokalon antaŭ la lasta konsonanto!):

*Tra l' bosquett sonat
 Alt li joy-cantad
 E li fonte de li mont saltat —
 It sonat del mont
 Al fugient hibern:
 Oh! quam bell li mund
 Nu es in li vern!*

ENKETSUPLEMENTO PRI INTERLINGUA

I

Por ĝisdatigi la ĉi-antaŭan artikolon, mi devus diri kelkajn vortojn pri la lasta mirinda bebo de la interlingvistiko, Interlingua.

Mi tuj atentigas, ke, ne pli ol Ido estis, malgraŭ siaj laŭtaj reklamoj, la Linguo di la Delegitaro, same Interlingua ne estas, kiel proklamite, la rezulto de kolektiva laboro de la stabo de International Auxiliary Language Association, pli konata sub la mallongigo IALA. Ĝi estas ja la persona kreaĵo de Dro Alexander Gode, usonano de germana deveno. Pri tiu punkto, unu el la eksĉefoj de tiu stabo, la franca profesoro André Martinet, skribis: «Neniam mi havis la manojn liberaj en la gvidado de la aferoj. Kiam mi alvenis al IALA, mi tie trovis taĉmenton ~~da~~^{de} ses romid-lingvistoj, senkondiĉe sindonaj al Gode, kiuj ne ĝenis sin diri malkaŝe, ke ili ne kredas en la LI... Dro Gode, siaflanke, prenis la sintenon de homo, kiu, senpripense, ĵetis sin en strangan aventuron».¹

La sama profesoro, en recenzo pri la Interlingua Vortaro kaj Gramatiko, insistas pri la teoria procedo uzita de Dro Gode: kolekti, inter la lingvoj F, I, H-Portugala (kalkulataj kiel unuo) kaj A ĉiujn internaciajn formojn komunajn al tiuj kvar atestantoj — «ne konsiderante, almenaŭ teorie, ĉu ili estas taŭgaj, aŭ ne, por produkti lingvon akcepteblan en la praktiko». Kaj li eĉ deklaras, ke «estas dubinde, ĉu unu LI estis iam prilaborita kun tiel malmulta konsidero pri ĝia fina praktikebleco».²

Ĉiuj difektoj de Interlingua defluas de tiu konstrumaniero:

1° Akumuliĝis la sinonimoj: *manĝi* povas, laŭ la personaj gustoj, esprimiĝi per *eder*, *mangiar* aŭ *manducar*, sen ia nuanco ktp.

2° La plej malmalmodernaj etimologiaj formoj estas preskaŭ sisteme preferataj: *aĉeti* estas nek *achetar*, nek *comprar*, sed *emer*, kio estas komprenebla nur por la latinistoj; *ofte* estas *subinde*, kaj

¹ «Cosmoglotta», n° 199 (Julio-Aŭgusto 1957), pĝ 56.

² A. MARTINET, «Word», n° 2 (Aug. 1952).

ĉi-foje nek la latinistoj, kiuj konas nur *saepe*, nek la romidistoj, kiuj konas nur *I sovente*, *F souvent* ktp povos tion kompreni ktp. Kiu klera eŭropano, se ne hispanscianta, komprenos la titolon Centro Obrer Francia-Interlingua? Laŭ la oficiala vortaro, tio signifas Center workman France Interlingua, t.e. Centro Laboristo Francujo-Interlingua; bela modelo de «comprehension a primevista», ĉu ne?

3° La derivado estas tiel ĥaosa, kiel en Latino sine Flexione de la karmemora Peano: Dro Gode rifuzis eĉ la minimuman skemecon de la Wahl-reguloj, kaj sekve postulas, ke la uzantoj lernu du seriojn da radikoj: unuflanke la formojn de la verboj, aliflanke tiujn de la substantivoj: *ager* sed *action*, *corriger* sed *correction*, *poner* sed *position*, *effringer* sed *effraction*, *metir* sed *mensura*, *pinger* sed *pictor* ktp.

4° Oni trovas strangan nekoherecon inter la metodo, laŭ kiu oni elektis la vortojn kaj iliajn formojn, skrupule atentante la rezultojn de la etimologio, kaj la maniero, kiel oni skemigis la gramatikon laŭ la angla lingvo. Oni uzas la plej antikvemajn formojn de la pronomoj: *io*, *tu*, *ille*, *illa*, *illo*, *nos*, *vos*, *illes*, *illas*, *illos* — sed la verbo mem estas nevaria laŭ la personoj; kio kontraŭas al la kutimoj de tri el la kvar lingvoj-atestantoj kaj eĉ parte al la kvara (ĉar tamen, ĉe la prezenco, A distingas inter *he loves* kaj *they love*!). Same, oni ne konservas la latinidan imperfekton, sed, per miriga nekonsekvenco, oni elektis por marki la anglo-germanan preteriton ĝuste la sufikson de la latinidaj imperfektoj; tiel ke *io creava* respondas ne al *I io creava*, *F je créais*, *H yo creaba*, kiel ŝajnas laŭ la aspekto, sed al *A I created*, kun ĝia vasta tempsignifo.¹

Vere estas, ke, eble pro malfrua pento, la aŭtoro de Interlingua allasis, por la pluralo de la prezenco de *esti*, duan formon, pli konforman al la latinidaj kutimoj: *son* apud *es*; sed li verŝajne

¹ La afero estas des pli ŝoka, ke, laŭ la plej freŝaj esploroj de Sigmund Feist, kies konkludojn akceptis A. Meillet kaj H. Hubert, tiu skemeco de la konjugacio en la ĝermanaj lingvoj estas nur la rezulto de la kruda fuŝado, per kiu la praaj ĝermanaj triboj simpligis la hind-eŭropan lingvon, kies subtilecojn ili ne kapablis asimili. Se oni, kiel faras Dro Gode, asignas al si la celon tiri kvazaŭ la kvintesencon de la romidaj lingvoj, oni ne turnas sin al tiuj, kiuj tiel sovaĝe kripligis ilian avinon!

pretervidis, ke Francoj aŭ Italoj trovos ankoraŭ pli ŝoka la kunmeton *vos son*, ol *vos es* (= vi estas). Oni ne povas, kiam oni ekiris en la vojo de la «naturalismo», halti je unu punkto kaj rifuzi paŝi plue: troviĝos ĉiam unu pli «naturalista» ol vi, kiu iros pli malproksimen kaj insultos vin kiel «reakcian aprioriston».

5° Pri la sintakso, mi ne povas paroli, ĉar ĝi, en ankoraŭ pli granda grado ol ĉe Occidental, estis serene preterlasita de Dro Gode; kaj ĉar la literaturo en Interlingua ĝis nun limiĝas al kelkaj tradukoj de teknikaj informoj el la plumo de A. Gode mem, estas neeble rekonstrui ĝin el la tekstoj.

6° Ankaŭ, kaj *a fortiori*, la stilon estas tre malfacile taksi. Tamen oni povus tion provi, esplorante la pecojn, kie ĝi plej klare evidentiĝas, t. e. la poeziaĵojn; bedaŭrinde la ekzemploj estas maloftegaj. Jen unu, aperinta en «Novas de IALA» (Dec. 1952), sub formo de kristnaska kanto:

*Nemo ante vos, pastores,
Assisteva a tal splendores:
Ibi dormi calme intra su cellula
Christo del prophetisate fabula.*

(kio ŝajne signifas: «Neniu antaŭ vi, ho paŝtistoj, ĉeestis tiajn brilegojn: Tie dormas trankvile en sia ĉelo Kristo de la profetita fablo (?)»; oni rimarkos, ke la du lastaj versoj ne rimiĝas, ĉar la akcento falas sur la silabon antaŭan al la sufikso *-ula*). La intermikso de modernaj formoj kaj de latinaj arĥaikaĵoj donas al tiu tipa peco originalan koloron, kiu memorigos al la Francoj la kelteran latinaĵon de la *Malsanulo pro Imago*:

*Ego cum isto boneto
Venerabili et docto
Dono tibi et concedo
Virtutem et puissanciam
Medicandi,
Purgandi,
Seignandi . . .
Et occidendi
Impune per totam terram!*

Kio ne sonus senanaloge en Interlingua:

*Ego cum iste bonetto
Venerabile et docte
Dona ti et concede
Virtute et potentia
De medicar,
Purgar,
Sanguificar . . .
Et occider
Impunite per tota terra!*

Ne mirinde, se la medicinaj fakrevuoj estas tiel emaj, laŭdire, uzi Interlinguan por siaj resumoj.

La ĉi-supre aluditajn recenzon profesoro A. Martinet finis per jena rimarko: «Estas neeble decidi, ĉu Interlingua, sume, estas supera al ĝiaj multaj konkurantoj. Unu lingvo, eĉ se artefarita, estas fenomeno tro kompleksa, por povi esti submetata al kruda klasifiko . . .» Malpli modesta, ol la eminenta interlingvisto, mi riskos prinoti, laŭ la jam uzita tabelo, la kvalitojn de Interlingua:

I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII	IX	X	Sumo
1	5	1	3	3	5	1	3	1	2	25

II

Kvankam tiu kritiko de Interlingua estas rapida kaj skema, (sed efektive multo el tio, kion mi skribis pri Occidental aplikiĝas ankaŭ al ĝi), tio almenaŭ donas al mi la okazon resumi, el la amaso de la ĉi-supraj detalaj diskutoj, la ĉefajn konkludojn, kiujn instruis al mi kelke tridekjara spertiĝo pri interlingvistiko.

La unua estas, ke E prezentas ian ekvilibropunkton en la serio de la proponitaj projektoj de lingvo internacia. Antaŭ 1887, la provantoj, indaj disĉiploj de Komenio, Kartezio kaj Lejbnico, montris sin puraj raciistoj kaj, preteratentante la rolon de la

memoro kaj de la afekcio, celis al pli-malpli apriora sistemigado de la parol-elementoj. Zamenhof, la unua, sciis kontentigi la du ĉefpostulojn de la simpleco kaj de la facileco, en sufiĉe alta grado por vivebligi sian lingvon; *facileco*: ĝiajn radikojn li pruntis de la eŭropaj naciaj lingvoj; *simpleco*: la morfologiajn finaĵojn kaj la afiksaron, kvankam pruntitaj el la sama fonto, li submetis al severa skemigo. E estas kolekto da facile memoreblaj vortoj, simple adapteblaj unu al la aliaj laŭ la solaj postuloj de la senco.

Sed tuj post Zamenhof, tiu ekvilibro estis iom difektita per pli kaj pli ekskluziva atento donata al la konservo de nacilingvaj formoj kaj al la evito de ĉio, kio ne havus tie respondejaĵon. La unue postvenintaj projektuloj ankoraŭ akceptis, kiel fonton, same la ĝermanajn kiel la romidajn lingvojn: tia estis la sinteno de von Wahl (Occidental) aŭ de Jespersen (Novial). Sed baldaŭ venis pli malkompromisemaj kritikantoj: la taĉmento de IALA, sub la vergo de Dro Gode, decidis limigi siajn esplorojn al la romida vorttrezoro, kun tamen (ili ja estis pagitaj per dolaroj) konsidero al la angla lingvo, precipe pri la gramatiko.

Kelkaj ekzemploj resumos la tiel trairitan vojon.

La E *ŝraŭbo* (el D *Schraube*) Ido modifis al *skrubo* (laŭ A *screw*) kaj Occidental al *scruv* (laŭ la sveda *skruv*); sed Interlingua preferis la romidan *vite* (I *vite*, F *vis*), eĉ se ĝi devas konfuziĝi kun alia *vite* t. e. 'vito'.¹ La *ŝraŭbingo*, siaflanke, fariĝis *skrubino* en Ido (kun ankoraŭ ĝermandevena sufikso), *scruviere* en Occidental (kun jam romida, kvankam ne tre ĝusta), sed *matre vite* en Interlingua, t. e. 'patrino ŝraŭbo' (kio prezentas efektivan rezignon al la ebloj de la derivado). Same la *ŝraŭbturnilo* pasis de *skrubturnilo* en Ido al *tirascruv* en Occidental kaj *tornavite* en Interlingua — du lastaj formoj, kiuj prezentas en Occidental escepton al la ordregulo en la kunmetado, sed ja en Interlingua rezignon al ĉia kunmetado ekster la malvastaj tipoj konataj de la romidaj lingvoj.

Ido konservis la artefaritan konjugacion de E, krom pri la infinitivo kaj imperativo, kiujn ĝi provizis per naturaj finaĵoj: *amar*

¹ Tiu naturalisma purismo estas senscie komika: laŭ la plej freŝaj priserĉoj, la etimo de *screw*, *skruv*, *écrou* ktp estas la latina *scrofa* 'porkino', laŭ la sama metaforo, kiu donis la inan aŭ patrinan parton de objekto.

(ami) kaj *amez* (amu). Occidental kreis al si pli naturaspektan konjugacion, precipe per helpverboj tiritaj el la franca: *yo ha amat*, *yo va amar*, el la latina: *yo vell amar* kaj el la angla: *yo mey amar* (respektive: mi amis, amos, amus, amu). Interlingua decideme alprenis la romidajn konjugaciajn sufiksojn: *io amava*, *amara*, *amarea* (resp. mi amis, amos, amus).

Sed eble ĉe la nombronomoj, la afero fariĝas plej frapa. Al la simpla kaj klara sistemo de Esperanto:

- I. *du, dua; tri, tria; dek, deka* ...
- II. *dek du, dekdua; dek ok, dekoka* ...
- III. *dudek, dudeka; tridek, trideka* ...

jam Ido aldonis nenecesajn komplikaĵojn:

- I. *du, duesma; tri, triesma; dek, dekesma* ...
- II. *dek-e-du, dek-e-duesma; dek-e-ok, dek-e-okesma* ...
- III. *duadek, duadekesma; triadek, triadekesma* ...

Occidental revenis al iom pli da simpleco, se ne da naturalismo:

- I. *du, duésim; tri, triésim; deci, decésim* ...
- II. *dudeci, dudecésim; otdeci, otdecésim* ...
- III: *duanti, duantésim; trianti, triantésim* ...

Interlingua rompas la rekordon:

- I. *duo, secunde; tres, tertie; dece, decime* ...
- II. *duodece, duodecime (aŭ) dece-duo, dece-secunde; dece-octo, [dece-octogesime]* ...
- III. *viginti, vigesime (aŭ) vinti, vintesime; trenta, trentesime* ...

Tiun ŝajne nerezisteblan evoluon oni ne haltigos. Dro Gode farus al si iluzion, se li kredus, ke lia kreaĵo estas la lasta stadio de la «progreso». Eĉ Interlingua havas ankoraŭ kulpajn indulgojn al la skemigo: ĝi havas nur unu formon por ĉiuj personoj de la verbo, ĝi ne konas genrojn, ĝi ne akordigas la adjektivojn, ĝi ne

distingas la imperfekton je la preterito — ĉiuj trajtoj fremdaj al la romida ŝablono. Pli aŭ malpli frue aperos nova projekto (kelkaj cetere estis jam skizitaj), kiu realigos la revon jam difinitan de André Blondel en 1904, pri ia artefarita frato de la romidaj lingvoj, en kiu la aberacioj de ĉiu el ili estos reduktitaj al mezaj formoj, kaj kiu prezentos kvazaŭ la kunfanditan fotografajon de la tuta familio. Kaj al la anoj de tiu nova sistemo, la hodiaŭa Interlingua ŝajnos tiel barbara, kiel E ŝajnis al la occidentalanoj; eĉ pli, cetere: ĉar ju pli oni proksimiĝas al unu difinita modelo, des pli akre frapas la heterogenaj detaloj. Kaj frazo kiel *ili kreis belajn verkojn* multe malpli ŝokas romidlingvanojn, kiuj tuj sentas sin antaŭ alitipa lingvo, ol la interlingua responda frazo: *illes creava belle obras*, ĉe kiu ili ĝene toleros la mankon de la akordoj tiel karakterizaj de la franca: *ils créèrent de belles œuvres*, de la itala: *essi crearono delle belle opere* aŭ de la hispana: *crearon obras bellas*.

La konsidero de tiu unudirekta konkurado, de tiu serio da projektoj regule pliproksimiĝantaj al unu difinita ŝablono, povus impresi la naivajn animojn kaj doni la iluzion, ke oni ĉeestas ian naturan evoluon, regatan de iom post iom malkovrita scienca leĝo. Ilin mi devas atentigi, ke la interlingvistiko ankoraŭ ne estas scienco, sed nur la kolektiĝo de la spertoj de kelkaj sensukcesaj provintoj; ke pri unu idealo de internacia lingvo neniel konsentis nek konsentas la lingvistoj profesiaj; kaj ke la ĉi-supre montritan strebadon al pleja naturismo diktis ne la internaj postuloj de la lingvo internacia, ne ia neeskapebla necesigo, sed ja la deziro de la provintoj akiri la aliĝon de la poliglotoj, kaj, se eble, la aprobon de la specialistoj. Estas komprenebla afero, ke publiko el plurlingvuloj, kiuj kutimiĝis al la nereguleco de la naturaj lingvoj kaj dediĉis al ties lernado multe da mono, da tempo kaj da penoj, ne ŝatus esti senigitaj je la profito de tiuj oferoj, kaj ebligi al aliaj pli facilan vojon por rivali ilian privilegion. Tio estas sinteno tute simila al tiu de la anglaj aŭ francaj kleruloj, kiujn ĝisrabie incitas ĉia provo simpligi la frenezan ortografion de ilia lingvo. Se do tiujn poliglotojn oni konsultas, kiel faris IALA en 1947 per plurlanda enketo, ili evidente konsilos fuĝi for de ĉia skemismo kaj konservi kiel eble plej da naturecaj esceptoj. Jen kial niaj interlingvistoj, hontaj eĉ pri la vorto artefariteco, volas pardonigi ĝin

al si per pretendo al laŭnatureco kaj aposteriorismo. Sed la rezulto de tia enketo ankaŭ tute ne pruvas, ke la koncernan projekton alprenos tiuj samaj konsilintoj. Kial do ili tion farus? Lingvon internacian ĝuste ili absolute ne bezonas, kaj krome havas la senton, ke lernado de tiel facila lingvo estus por ili ia degenerado.¹ La opinio de tiuj poliglotoj kaj la peno de la interlingvistoj konformiĝi al ĝi havas do nenian sciencan valoron. Mi iros eĉ pluen: kiam oni projektas fari sian lingvon internacia, decidi dekomence, ke oni ne konsideros lingvojn ekster la hindeŭropa grupo, ke eĉ en tiu oni konsentos nenian atenton al la slava kaj ĝermana familioj, tio ŝajnas iom tro limigita vidpunkto, kaj pli ĝuste regreso, ol progreso. Tiom pri mia dua konkludo!

Mia tria kaj lasta estos, ke la vera publiko, kiu bezonas (kvankam tiun bezonon ĝi ofte ne konscias) lingvon internacian, estas ĝuste tiu de la unulingvanoj: kaj ĉi tiuj neniel zorgas pri la konservado de naturaj neregulaĵoj je la kosto de la facileco de lernado, tute male; kaj ili ege mirus (se oni malfermus antaŭ ili la interlingvistikan dosieron), kiel kleraj homoj povas tiom peni, por simple kontraŭstari la modernan strebon al la normigo. Dum la fabrikistoj kongresas por atingi unuecigon de la ŝraŭbpaŝoj aŭ de la foli-dimensioj, la interlingvistoj serene duobligas la manierojn diri 'dudek' aŭ elektas kvar radikojn por la verbo 'fari' (t. e. *fac*, *fact*, *fic* kaj *fect*), kun la pretendo, ke ili solide progresigas la sciencon. Se tiajn oferojn postulas artefarita lingvo, rezonos la simplanimoj, kaj prave, estos pli profitodone kaj ne tiel pli malfacile lerni tuj la anglan aŭ la rusan!

¹ Pli netan pruvon oni ne povas trovi, ol la decidon de la Division of General Education de la Nov-Jorka Universitato ĉesigi ĉi-jare (1959) la kurson pri Interlingua, pro manko de interesiĝo.

3. La instruoj de la pasinteco

HISTORIA SKIZO DE LA ESPERANTA MOVADO

La esperanta movado estas, samtempe kaj kune, lingva, idea kaj socia movado, kaj devus esti studata laŭ tiuj tri aspektoj: tio klarigas la malfacilojn de tia studo, kiu ĝis nun estis apenaŭ komencita.¹ En la sekvantaj paĝoj mi kompreneble ne pretendas al kompleteco: nur la ĝeneralajn trajtojn mi provos ĉi tie desegni.

La historio de la esperanta movado komenciĝas la 21an de Julio 1887 kun la publikigo de la *Unua Libro* por Rusoj. Sed ĉar la aŭtoro de la lingvo multe influis ties postan malvolviĝon, ne estas superflue serĉi la motivojn de lia entrepreno. En letero al Michaux de la 21a de Februaro 1905, Zamenhof skribis: «Mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuiĝo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo — pri la tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii; kaj pli aŭ malpli frue . . . , kiam Esperanto jam ne bezonos min, mi elpaŝos kun unu plano, por kiu mi jam de longe prepariĝas . . . Tiu ĉi plano (kiun mi nomas *Hilelismo*) konsistas en la kreado de morala ponto, per kiu povus unuiĝi frate ĉiuj popoloj kaj religioj . . . » Kaj li precizigis, ke, se li ne estus «hebreo el la ghetto», la ideo pri la unuiĝo de la homaro aŭ tute ne venus al li en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus lin tiel obstine en la daŭro de lia tuta

¹ Utiligeblaj verkoj: Z. ADAM, *Historio de Esperanto 1887-1912*; ED. PRIVAT, *Historio de la Lingvo Esperanto* (unua vol. 1887-1900; dua vol. 1900-1927) — la plej informriĉa; E. DREZEN, *Analiza Historio de E-movado, 1887-1928* — la plej ideriĉa; kaj ne forgesi la esencan broŝureton de Prof. L. ĴIRKOV, *Kial venkis Esperanto?* (1931). Multajn utilajn dokumentojn kaj novajn perspektivojn oni trovos en *Leteroj de Zamenhof* (du volumoj), kiujn mi publikigis kun konstanta komentario, ĉe S. A. T. (1948).

vivo. Tiuj rimarkoj ĵetas lumon ne nur sur la animstaton de Zamenhof en la momento, kiam li «transiris la Rubikonon», sed klarigas multajn detalojn en la posta malvolviĝo de la afero.

Tamen ni devas konstati, ke en la komenco li zorgis kaŝis tiujn profundajn intencojn, kaj prezentis al la publiko sian verkon sur la intelekta ebena, kiel simple praktikan ilon de interkompreniĝado. Kaj la lanĉadon de la libreto li organizis en la plej realista spirito.

Li trovis aŭskultadon unue ĉe la publiko, kiu jam okupiĝis pri la ideo de mondlingvo okaze de Volapük. Oni eĉ povus diri, ke, same kiel la kristanismo elkreskis el la greklingvaj sinagogoj, tiel E enplantiĝis en la volapükistajn rondojn, kaj tie ekfloris. Sufiĉas citi la nomojn de Christ. Schmidt, Gross, Demonget, Marignoni, Grabowski, Wahl, Trompeter, Einstein, Nylén ktp, kiuj ĉiuj venis de Volapük al E, por tion evidenti.

Alia speco de publiko ankaŭ efike helpis al lia entrepreno: temas pri tiu parto de la juda ruslanda loĝantaro, kiu, vekiginte al la okcidenta kulturo, volis skui la jarcentan rutinon kaj revivigi la hebreismon; tiun movadon, incitan de Moses Mendelssohn, oni nomis germane *Aufklärung*, kaj mi volonte nomus ĝin, per la sama radiko, *klerismo*. Zamenhof, kies patro estis jam vigla kleristo, aktive partoprenis, dum siaj studentaj jaroj, la klerisman agitadon pri la cionismo¹ kaj konservis en tiu medio multajn amikajn rilatojn. Tial ankaŭ Judoj estis multaj en la vicoj de la komenciĝanta movado: V. Gernet, A. Kofman, L. Belmont, M. Goldberg, N. Sokolov, A. I. Asnes, G. Davidov ktp.

Fine, ekde 1889, aliĝis en Rusujo certa nombro da tolstoĵanoj, kiuj esperis uzi la lingvon kiel propagandilon por siaj ideoj. Oni cetere scias, ke en 1895 ilia agado kaŭzis la malpermeson, far' de la rusa cenzuro, de la esperantista gazeto.

Jen la unua kerno, el kiu elvolviĝis nia movado. Tiu kerno, malgraŭ la ŝajno, ne konsistis el heterogenaj pecoj. Ilin kunigis komuna profunda sento. De la XVIIIa jarcento, kun la germana

¹ N. Z. MAIMON, *La cionista periodo en la vivo de Zamenhof*, en «La Nica Literatura Revuo», 1958, n-roj 16a kaj 17a; krome, en la n-roj 21a kaj 22a, 1959, vidu liajn artikolojn pri la cenzurado.

filozofo Kant kaj la franca fizikisto Ampère, al la ideo de «universala lingvo» pli kaj pli intime ligiĝis la ideo pri «universala paco» kaj «ĝenerala malarmado».¹

Tiele la mondlingvanoj, en tiu fino de la XIXa jarcento, estis samtempe liberaluloj kaj pacifistoj. Kaj tiuj idealoj ne tiel malproksimis je tiuj de la klerismo, kiu proklamis, laŭ la vortoj mem de Zamenhof, ke «la tuta historia misio [*de la juda gento*] konsistas en la unuigo de la nacioj en la celado al *unu Dio*, t. e. unuj idealoj por la tuta homaro». Kaj ĉu Tolstoj, siaflanke, ne skribis, la 27an de Aprilo 1894, ruslingvan leteron al la redakcio de «La Esperantisto» dirante interalie: «La ellerno de E kaj ĝia propagando estas sendube kristana agado, akcelanta la estigon de l' Regno Dia, kio prezentas la ĉefan kaj solan mision de homa vivo?»

Tia komuneco de inter si frataj idealismoj klarigas la internan forton, kiun oni tuj rimarkas en tiu malvasta areto de la unuaj esperantistoj, kiu kuntenas ilin fortike kaj igas ilin kapablaj je grandaj oferoj kaj —io pli malofta— je longa konstanteco.

Tamen tiun idealismon oni ne devas tro akcenti, kiel faris Privat kaj Drezen, kaj kontrastigi kun la materialismo de la tiel nomata «franca epoko». Sendube, tiuj unuaj esp-istoj konsciis, ke ili laboras por la bono de la homaro; sed tiun bonon ili vidas precipe sur la intelekta kampo, en plifaciligado de la internaciaj pacaj rilatoj, en progreso de la scienco kaj kulturo ktp. La poemo *En la mondon venis...*, kun sia religia kaj pacifisma atmosfero, vekis tre malmulte da eĥoj en la tiutempa literaturo, se juĝi laŭ la enhavo de «La Esperantisto» kaj «Lingvo Internacia». Teksto, kiel la letero de Tolstoj, el kiu mi ĵus citis eltiraĵon, estas unikaĵo en la jarkolektoj de tiuj du gazetoj. Nur en la sekvanta periodo ekfloros tiu specifa mistiko.

Tiu unua periodo, kiun la historiistoj de E kutime kalkulas ĝis 1900, estis do, pli ĝuste, tempo de provado: oni esploris la lingvon el kritika vidpunkto, diskutis la diversajn reformprojektojn (inter

¹ Ekskluzive okupitaj de la lingva flanko de la demando, historiistoj de Mondlingvo ordinare preteratentis tiun aspekton de la afero. Vidu RAYMOND SCHWAB, *La Renaissance Orientale (La Orienta Renesanco)*, Parizo, 1950, pĝ 183 k. s.

ili tiun prezentitan de Zamenhof mem) kaj, post longa batalado, decidigis sin konservi (krom la unika ŝanĝo de la serio *ian*, *tian*, *kian* ktp en *iam*, *tiam*, *kiam* ktp) la lingvon tia, kia ĝin publikigis la aŭtoro. Jen la ĉefa fakto de tiu periodo; la prudento kaj saĝo de tiuj unuaj esp-istoj, eble influataj de la katastrofa ekzemplo de la senĉesaj plibonigoj alportitaj de la Volapükista Akademio al la lingvo de ĝi renomata Idiom Neutral, ebligis kvietan kaj seninterrompan disvolviĝon de la movado sur de tiam definitiva fundamento. Tuj post tiu krizo, oni ekvidas en la gazeto «Lingvo Internacia» aperi kaj graviĝi la tri temojn, kiuj altiras la atenton de la samideanoj: la propagando (planoj pri sistema atako de la naci-lingvaj ĵurnaloj, pri kuraĝigo al la «vastigantoj» ktp); la lingvistado (rimarkoj pri la uzado de la prepozicioj, de la sufiksoj ktp); la literaturo (traduko de *La nega blowado* far' de Graboswski, de *Demono* far' de Devjatnin, de *Kain* far' de Kofman, de *Hamleto* far' de Zamenhof mem). Pri tiu lasta, jam esprimiĝas la opinio, ke la literaturo ludas, en movado kiel la nia, netroiegeblan rolon: «... entrepreno, kiu fortikigos la tutan estontecon de nia afero kaj, donante al ĝi la eblon regule kaj senhalte kreskadi, liberigos ĝin fine por eterne de ĉiaj mortigaj disputoj kaj ŝanceliĝoj», skribas Zamenhof pri sia «Biblioteko». Tiun zorgon li ne forlasos ĝis sia lasta tago.

La duan periodon de la vivo de nia movado oni kutime komencas kun la fondo de «L'Espérantiste», kaj la varbiĝo de francaj profesoroj: Cart, Bourlet, Méray, Lambert, Boirac ktp. Efektive la esperanta movado evoluis ĝis tiam en la nord-orienta Eŭropo (Polujo, Bavarujo, Rusujo, Svedujo), kaj subite, kun la starigo de SPPE (Societo Por Propagando de E), kun la publikigo de «L'Espérantiste» (1898), kun la transporto Parizon de la redakto de «Lingvo Internacia» (1904), kun la lanĉo de la unua beletra organo «La Revuo» (1905), kun la multklopode atingita apogo de potencaj societoj kiel Touring-Club de France kaj Librairie Hachette, Parizo kaj Francujo fariĝis la vera centro de la afero. Finon de tiu periodo prezentas nature la Unua Mondmilito.

Dum tiu tempo al la unuaj elementoj de la esperantistaro aliĝis aliaj novaj, precipe etburĝaj, kun la individuisma karaktero de tiu klaso, kun ĝia realisma sento kaj ĝiaj monrimedoj. Ili certe estis

tiel idealistaj, kiel la unuaj samideanoj (la tempo ankoraŭ ne venis, kiam E alportos al iu solidajn monprofitojn), kaj almenaŭ tiom oferis por la afero. Krome E komencis altiri la atenton kaj simpatieco de eminentaj intelektuloj, sed preskaŭ nur inter la sciencistoj (Moch, generalo Sébert, R. de Saussure k. c.): tiu fakto havos iajn sekvojn en la tempo de la Ido-skismo.

La plej karakteriza fenomeno de tiu periodo estas la florado de tiu mistiko, kiun oni ordinare aludas per la formulo de «la interna ideo», mistiko bazita sur la homamo, kun pacifisma, internaciisma kaj religieca nuancoj. La vera iniciatinto de tiu mistiko estas Zamenhof mem, kiu per privataj leteroj, per la kongresaj paroladoj kaj per broŝuroj (*Hilelismo*, 1906; *Homaranismo*, 1906, 1913) fine donis liberan vojon al la ideoj, kiuj komence instigis lin prilabori internacian lingvon, sed kiujn li longtempe devis subpremi por ne malhelpi la sukceson de tiu lingvo. Kompreneble tiu iniciato renkontis en la vicoj de la esperantistoj kelkajn kontraŭstarojn: katolikoj kiel Beaufront aŭ Dombrovski, kontraŭklerikaluloj kiel Carlo Bourlet kaj Boirac ektimis devion de E al ia sinkretisma religia movado, kaj bremsis per ĉiuj siaj fortoj. La du lastaj eĉ insiste petis de Zamenhof, ke li ne legu en la Bulonja Kongreso la *Preĝon sub la Verda Standardo*, sed ne povis atingi forigon de tiu fama teksto. Ili ankaŭ ne povis malhelpi, ke Zamenhof, kun rimarkinda sperto pri la religiaj fenomenoj, utiligu la internaciajn kongresojn kiel solenajn celebrojn de la «interna ideo». Mi aliloke jam citis la tre sagacajn vortojn, per kiuj li de antaŭe difinis la karakteron de tiuj kongresoj: «...efiki sur la *sentojn*... multe da soleneco, muziko, efektoj por la okuloj... Niaj kongresoj fariĝu per sia soleneco kaj ĉarmeco korekscita religia centro, kiu allogados ĉiujare la amikojn al internacia frateco el la tuta mondo... finiĝi per ia danco de internacia frateco...». Se pri sia hilelisma entrepreno li fiaskis, almenaŭ pri tiu punkto li brile sukcesis. Li sukcesis eĉ pli ol li deziris: la entuziasmo de la samideanoj, tiamaniere ekscitita, ne plu konis limojn. Kaj oni rapide kompletigis la celebron de la «interna ideo» per kulto al la propra persono de ĝia profeto; iom post iom organiziĝis speco de vera religio, kun la fanatika adoro al la «Majstro», la malamo al la «herezuloj», la sanktaj pilgrimoj, kiaj fariĝis la Kongresoj, la kanto

de la Himno, la pia aŭskultado de la Parolado, kaj tiu atmosfero de blinda entuziasmo, kiu ŝajnis tiel stranga al racie pensanta homo. Sed oni ne povas kontesti, ke tiaj ceremonioj potence allogis la samideanojn, kaj, se ili ne servis ĝuste por la propagando, ili efikis por nutri en la freŝbakitaj esperantistoj la amon al la afero.

Alia fakto ankaŭ favore akcelis la disvastiĝon de E. Tio estas la provoj de praktika utiligado de tiu lingvo. Ili estis multaj, kaj nur kelkaj prosperis: tamen, tio estis io nova en la historio de la movado, kaj de tiam oni povis eklerni Esperanton el alia motivo ol simple ideala. La kolektantoj de poŝtmarkoj, de poŝtkartoj, la adeptoj de la diversaj sistemoj de stenografio sukcese profitis la servojn de internacia lingvo. Sur pli alta ŝtupo, la pacifistoj konfidis al ĝi la propagandon de siaj ideoj («Espero Pacifista», redaktita de G. Moch). Kelkaj izolaj provoj pri komerco (vinoj, skribmaŝinoj, porcelanoj) ne restis tute senfruktaj; propre esperanta estis la eldon-industrio (gazetoj, libroj), kaj ĝi, kvankam deficitata, floradis, ebligante evoluon, plivigliĝon kaj riĉiĝadon de la lingvo. La komercaj interŝanĝoj en la sino de la esperantistaro estis tiel ampleksaj, ke ili motivis starigon de internacia monsisistemo (la «spesmilo»), kaj la fondon de internacia banko («Ĉekbanko Espista» de H. F. Höveler, en Londono: oni uzis 20.000 ĉekojn, 40.000 transpagil-poŝtkartojn, kaj 700 kontojn en 43 landoj). Apud tiu banka institucio, kaj sur iom diferenca ebena, sed tamen en la sama direkto, ekagis alia organizo, kies ekzisto ankaŭ atestas la materialajn progresojn de la afero: Universala Esperanto-Asocio aŭ UEA. Komenciĝinte en 1908 kun 206 delegitoj kaj 1223 membroj, ĝi atingis en 1911 la nombron de 885 delegitoj kaj 7804 membroj. Tiu rapida kreskado montras, ke tiu asocio kontentigis bezonon, kaj klare signas la disvolviĝon de la efektivaj rilatoj inter la esperantistoj.

Tiuj du faktoj, la kreiĝo de homarana mistiko kaj la naskiĝo de esperantuja ekonomiko, malpli kontraŭaj inter si, ol ŝajnus unuavide (ili bone kunekzistis en UEA), eksplikas la obstinan reziston al ĉia lingva reformo kaj la plenan fiaskon de la Ido-skismo. Tiu ĉi krizo de kreskado estis neevitebla. Ĝi estis ŝuldata al la samaj kaŭzoj, kiuj jam efikis en 1894. La lingvo, kiun la juna Z proponis al la publiko de 1887, prezentis neatenditajn

traĵtojn. Unue, la kontrasto inter la romida karaktero de la plej granda parto de la lingvo kaj la sovaĝa aspekto de la alfabeto vesto, kiun li trudis al ĝi: ne nur abundo da *k*, da *z* kaj da *j*-oj, ne nur manko de la literoj *q*, *w*, *x* kaj *y*, tiel kutimaj en la propraj nomoj kaj en la algebra praktiko, sed eĉ kreado de ses tute novaj literoj — dum eĉ la imperiestro Klaŭdio ne sukcesis trudi duone tiom al la latina lingvo! Due, la radikoj, kvankam principe tiritaj el la internacia vorttrezoro, tro ofte suferis volapŭkecajn kripligojn. Trie, la metodo de vortfarado, ŝajne konforma al tiu de la germana, baziĝis efektive sur aglutineca principo, kion la uzantoj nur iom post iom malkovris. Fine, la gramatiko entenis esprimilojn, kiuj, pro manko de analogaj en la ĉefaj modernaj lingvoj, aperis superfluaĵ (akuzativo, refleksivo, ses participoj ktp). Slaveco ĉe la skribmaniero,¹ volapŭkeco ĉe la vortformo, aglutineco ĉe la vortfarado, heleneca komplikeco ĉe la morfologio, jen la ĉefaj riproĉoj, kiujn kleraj laikoj tuj malkovris en la lingvo de Dro Esperanto. Kaj inter ili, kelkaj progresamantoj insistis, jam en 1894, ke oni devus pli sisteme konservi la nature romidan karakteron de lingvo konsistanta ĉefe el latinaj aŭ francaj vortoj, kaj jam sur tiu vojo antaŭeniris la reformprojekto de Zamenhof. Ties malsukceson ĉe la voĉdonado de 1894 kaŭzis unuflanke la malakordo de la kritikintoj inter si, aliflanke ia profunda sento de pluraj, ke la ĉefa afero en tia demando estas la konstanteco. Sed kun la disvastiĝo de

¹ En tre instrua artikolo pri la *Fontoj de Esperanto* (en «Scienca Revuo», Marto 1958, pĝ 104; aperis korektita depresaĵo, samjare), s-ro D. B. Gregor listigis dek sintaksajn regulojn kaj plurajn dirmanierojn, al kiuj li atribuas slavan devenon. Mi estus pli singardema ol li; sendube slavan influon montras la adverbigo de la predikativo de infinitivo (*rajdi sur leono estas danĝere!*), kaj la malinklino uzi la infinitivon post *sen*. Sed aliaj cititaj reguloj povas pli simple deveni de la logiko, kiel mi montris ĉi-supre, pĝ 125 k. s. Same, li opinias slavdevenaj la unuigon de la preterito, imperfekto kaj perfekto en unu formon — forgesante, ke Zamenhof konservis unu imperfekton ĝis 1887, kaj forigis ĝin nur el propagandaj celoj — kaj la ne-uzon de *havi* kiel helpverbo por formi la kunmetitajn tempojn — forgesante, ke jam en la 17a jarcento la aŭtoroj de la *Ĝenerala Gramatiko* de Port-Royal analizis ĉiujn verbojn kiel ekvivalentaj al *esti* plus participo (*je dors* = *je suis dormant* ktp), kaj ke tiu teorio estis ankoraŭ reganta en la lingvistaj medioj en la tempo de la juna Zamenhof.

E al romidlingva teritorio, kun la varbiĝo de multaj francaj intelektuloj, la eksterkutimaj trajtoj de la lingvo pli akre frapis tiun novan kaj postuleman publikon. Se ĉi-foje la krizo atingis konkretan rezulton (kvankam ne tiun, kiun esperis la iniciatintoj), tio estas ŝuldata al la kuniĝo, en tiu reforma entrepreno, de du rimarkindaj spiritoj, unu sperta esperantisto, Beaufront, kaj unu filozofo, inventinto de la «logistiko» (speco de matematika logiko), Dro Couturat. Beaufront zorgis pri la problemo de la romidecigo de de la gramatiko kaj vortaro, Couturat pri la forviŝo de la aglutineca kunmetado kaj ĝia anstataŭigo per strikte logika sistemo de derivado. Ambaŭ cetere multon profitis el la zamenhofa projekto de 1894.¹ Ne estas ĉi tie la loko juĝi objekte ilian verkon. Sed, kia ajn estis ĝia valoro, ĝiaj iniciatintoj kulpis la tre gravan eraron ne atenti la socian flankon de la demando: ne plu temis, en 1908, pri propono de nova projekto al la juĝado de kelkaj senpartiaj, spiritliberaj individuoj; temis pri perforta atenco al la lingvo de jam ampleksa grupo da homoj, kiuj estis ligitaj al tiu lingvo per multaj jaroj da studoj, da klopodoj, da bataloj, kaj kiuj fine trovis en ĝi nutron aŭ por sia idealismo aŭ por sia profitamo. Malgraŭ la pli-malpli aperte konfesita apogo, kiun ili trovis ĉe la estroj, la reformemuloj estis venkitaj denove de la silenta, obstina tradiciemo, kiu jam solide enplantigis en la koro de miloj da nekonataj esperantistoj.

Tiu krizo havis tamen kontentigajn rezultojn; ĝi altiris al Esperanto la atenton de kelkaj famaj lingvistoj, kiuj ekrimarkis, kun nur 20 jaroj da malfruiĝo, ke artlingvo estas ebla kaj ke el ĝi oni eble povus ion lerni; ĝi senbalastigis la movadon je ĉiuj nestabilaj spiritoj, ĉiam strebantaj al nova, pli perfekta solvo; inter la esperantistoj, ĝi devigis la spertulojn pli profunde studi la karakteron de sia lingvo kaj klarigi ĝian strukturon per pli taŭga teorio; sed precipe, ĝi diskonigis kaj konsiderindigis al la «verda popolo» la aserton de Cart, ke lingvo estas antaŭ ĉio socia konvencio: «Oni grave eraras, kiam oni penas solvi la demandon per simpla komparo inter diversaj lingvaj sistemoj: la moralaj, la ekonomiaj,

¹ Vidu mian komenton al la *Leteroj de Zamenhof*, II, pĝ 25, 26.

la opiniaj kondiĉoj, kiujn pure lingvistoj aŭ filozofoj tro volonte juĝas flankaj elementoj de la serĉata solvo, estas, mi ne diras tiel gravaj, sed pli gravaj, ol la nur lingvaj... La perfekteco tie ĉi konsistas malpli en la lingvo mem, ol en la plena akordo de tiuj, kiuj ĝin uzas».¹ Oraj vortoj, ĉiam memorindaj.

El la psikologia vidpunkto, la plej karakteriza trajto de la tiutempa esperantistaro estas la absoluta, iom malsane flegata indiduismo: ne nur ĉe la estroj, kiuj ofte oponis unu al la alia en akraj, orgojloplenaj rivalaĵoj (Beaufront kontraŭ Bourlet, Cart kontraŭ Zamenhof kaj Sébert, Corret kontraŭ Bourlet ktp), sed ankaŭ ĉe la simplaj batalantoj, el kiuj multaj kompletigis per E sian kolekton da manioj: spiritismo, kontraŭalkoholismo, seksabstinemo, kontraŭvivisekciismo ktp, ktp. Ne ĉiuj estis tiel mense perturbitaj, kiel tiu fama J. Fréhis, kiu, pentrinte *Esperanto* sur sia vesto kaj ŝuoj, propagandis la aferon kretante *Apprenez l'Esperanto!* sur ĉiujn urinejojn de Parizo; sed preskaŭ ĉiuj aspektis al kritika observanto kiel nenormalaj, strangetaj homoj. Malfacile estas al nuntempa esperantisto imagi al si la atmosferon, en kiu vivis tiuj homoj, kaj kiu aperas ĉe la legado de iliaj gazetoj, precipe de la malgrandaj. Tiu spiritstato eble klarigas, kial ili tiel forte rezistis al ĉiuj provoj organizi ilin en tutmondan asocion: Zamenhof perdis sian penon por ilin konvinki, kaj rikoltis nur insultojn («mi persone suferis... tre multe, precipe antaŭ la Bulonja Kongreso, kiam ekzemple jam en la vojo al la Kongreso mi legis en la gazeto, ke mia projekto de Ligo estas ne sole idiota sed eĉ malhonesta kaj enhavas en si 'ruze kaŝitan glavon'!»).² Tiu malfacila demando pri la organizo ricevos solvon nur en la sekvanta periodo, post 16 jaroj da disputoj: oni do ekskuzos la antaŭmilitajn esperantistojn, se ili tiel negative rilatis al tiu esenca demando. Cetere en ilia sinteno enestis granda malkonfido al la estroj, kies ambicion kaj ordemon ili tro konis, kaj tre prava timo al la ebloj de monopoligado far' de kapitalistaj firmoj (tion jam ekprovis Hachette, okaze de la «Kolekto Aprobata»).

¹ Vidu *Vortoj de Prof. Cart*, pĝ 29 kaj 31.

² Vidu *Leteroj de Zamenhof*, II, pĝ 203.

El la lingva vidpunkto, tiu dua periodo estas eble la ĉefa en la historio de E. Al la jam ekzistanta kaj tute difinita lingvo Zamenhof tiam donis la neŝancebleblan fundamenton de ampleksa, altnive-la verkaro. Liaj tradukoj de klasikaj ĉefverkoj, romano (*Marta*), tragedioj (*Ifigenio*, *La Rabistoj*), komedioj (*La Revizoro*, *Georgo Dandin*), religiaĵoj (*Sentencoj*, *Psalmaro*, *Genezo*, *Eliro*, *Nombroj*, *Levidoj*, *Readmono*), elastigis la lingvon, riĉigis ĝin per novaj bezonataj vortoj, kaj liveris sufiĉe da materialo por solide fondi la sintakson kaj la stilon, ne sur ĉiam diskutebaj abstraktaj reguloj, sed sur la altira forto de la ekzemplo. En tiu gravega tasko li estis potence helpata de Kabe (pseŭdonimo de Kazimir Bein), unu el la plej lucidaj spiritoj en nia literaturo (traduko de la granda romano de B. Prus *La Faraono*, de tiu de Turĝenev *Patroj kaj Filoj*, kompilo de la unua antologio: la *Pola Antologio* ktp), kaj de Antono Grabowski (ĉi tiu precipe pri la poezia lingvo: *Nova Antologio*, 1909; *Mazepa*, 1912; *El Parnaso de Popoloj*, 1913. Estis sekvonta tuj post la milito lia ĉefverko, *Sinjoro Tadeo*, 1918). Tiuj tri estas niaj klasikuloj, kaj oni neniam povos tro diri, ke nur el konstanta kaj inteligenta studado de iliaj verkoj oni povas akiri tion subtilan, kion Zamenhof nomis «la spirito de la lingvo».

Tia estis do la dua periodo de nia historio, kiu prezentas kvazaŭ la junaĝon de la lingvo, kaj dum kiu efektiviĝis tiu miraklo, ke artefarita, kabineta elpensajo fariĝis vivanta lingvo; ke por tiu lingvo elektiĝis, el inter pli ol 40 popoloj, nova senlanda socio; kaj ke la ideoj, lingvaj kaj sociaj rilatoj estiĝintaj interne de tiu socio estis sufiĉe fortikaj por rezisti al la jam minacanta katastrofo.

Ĉar tiu ĉi periodo tragike finiĝis. La homaro dronis en sanga ĥaoso. Dum kvar jaroj, ŝajnis, ke la racio, sklavigita de la pasioj, neniam plu relevos la kapon nek retrovos sian reĝadon. Kaj, kvazaŭ simbole, kvazaŭ por pli klare montri la abomenan celon de la elkatenuigitaj fortoj de la malbono, la 14an de Aprilo 1917 estingiĝis en Varsovio la profeto de la homaranismo, la genia bonfarulo, kiu donacis al la mondo Esperanton, kiel rimedon al paca unuiĝado. La esperantista kolektivo, disŝirita de la milito, perdinte sian majstron, ŝajnis definitive neniigita.

Kaj tamen! Eĉ dum tiu terura ventego, en insulo mirakle ŝirmita, en Svisujo, la internacia organizo de H. Hodler obstinis en

sia paca klopodo kaj klare pruvis per grandvalora serv-entrepreno la utilecon de E: la UEA-oficejo organizis transsendon de familiaj korespondaĵoj inter malamikaj landoj; preskaŭ 200.000 leteroj tiel trapasis Ĝenevon. Sed pli ol materialan servon faris Hodler: en sia gazeto «Esperanto» li eldiris al homoj sufokitaj de malamo saĝajn, humanajn parolojn: «La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam centmiloj da homoj kuŝos en la bataltomboj, kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam, malgraŭ ĉio, la internaciaj rilatoj denove ligiĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io... Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiujn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruado... Ni esperantistoj estu la embrio de tiuj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de bedaŭro».¹ Noblaj paroloj, kiuj ankoraŭ nun estas pripensindaj: al kiom da eŭropanoj estus necese rememorigi, ke nek nacio nek gento estas ia absoluta suverenaĵo!

Alia kuraĝiga simptomo estis la disvastiĝo de E en militkaptitejoj. «Tiuj malfeliĉaj junuloj» skribis E. Privat,² «enfermitaj kiel brutaro inter bariloj, sopiris je ia interesa allogaĵo, kiu forgesigus malsaton kaj hejmosopiron. Hodler rekomendis al delegitoj de UEA viziti tiujn lokojn, se permeso ebligas, kaj vidi, ĉu ne troviĝas iu perdita samideano... En aliaj tiaj malliberejoj, unu sola kaptito instruis la lingvon al centoj da ceteraj, kiuj kopiis vortojn kaj regulojn unuj de aliaj. Tio okazis interalie en Siberio, kie japanaj generaloj eĉ subtenis tiun lernadon. Esperantistaj rondoj fondiĝis. Oni kantis la himnon kaj gaje interparolis la lingvon inter plejdivers-gentanoj». Pri la tre karakteriza etoso de tiuj kaptitejoj atestas la du famaj romanoj de J. Baghy (*Viktimoj* kaj *Sur sangatero*): ŝajnas eĉ, ke tiu eksterordinara medio vekis en li la unuajn poeziajn inspirojn, kaj cetere ĝi donis al liaj poemoj tiun apartan, neimiteblan akcenton de vibra homamo.

¹ «Esperanto», 5. Januaro 1915.

² Verko laŭdita, vol. II, pĝ 96.

Tiuj du faktoj bone montras la persistan vivantecon de la esperanta movado. Eĉ la morto de Zamenhof, per la profunda doloro, kiun ĝi sentigis al ĉiuj veraj samideanoj, komuniis ilin en pia memoro de la granda falinto, kaj unuigis ilin per plia pli strikta ligilo. Inter la unuaj versoj de la du novaj poetoj de la komenciĝanta tria periodo, J. Baghy kaj K. Kalocsay, troviĝas funebra himno al la malaperinta majstro, kaj ilia liriko bone resumas la ĝeneralan impreson:

*Por ili, jen homo,
eĉ malpli — nur nomo
sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko ...
Por ni, funebrantoj,
por pacbatalantoj,
ĝi gardas kreinton de mondverko ...¹*

*Li estis vir' stampita de sopir',
Vidanto estis en la mondo blinda ...*

*Ja en labor' la tro streĉita kor'
Rompigis antaŭ la triumfa celo,
Sed ĝia ve' el Mondo de Pere'
Sin ŝvingis alten, supren ĝis ĉielo!*

*La tomba sin' nun enfermanta vin
Por la adeptoj estas sankta templo,
Kaj por pilgrim' alflugas la anim':
Inspiru ĝin, ho Majstro, per ekzemplo!²*

Kiam finiĝis la koŝmaro, kiam en resaniĝanta Eŭropo, ĉirkaŭ 1920, revekiĝis la esperantistaj rondoĵoj, oni tiam povis konstati, ke vere, laŭ la profetaĵo de ĝia kreinto, post la subita ventego, kiu deŝiris la velkintajn foliojn, la paca armeo, repurigita, akiris forton pli freŝan. Ĝi elportis tri el la plej gravaj batoj, kiujn oni povus

¹ J. BAGHY, *Preter la Vivo*, pĝ 25.

² K. KALOCSAY, *Mondo kaj Koro*; represita en *Streĉita Kordo*, pĝ 13.

imagi por ĝin neniigi : la Ido-skismon, la morton de la fondinto kaj displitiĝon de la jaroj 1914-1918. Sed spite ĉian atakon, ĝi denove elpaŝis al la «cel' unu fojon signita», kun hardita forto kaj kreskanta nombro. Ekde 1920, en ĉiuj landoj, komence en tiuj de centra Eŭropo, fruktiĝis mirinda rikolto da esperantistoj; kaj baldaŭ la nova rekta lernmetodo, kiun oni kutime nomas per la nomo de ĝia genia elpensinto, pastro Cseh, havigis al la movado konsiderindan kvanton da junaj, entuziasmaj varbitoj.

Tiu tria periodo, kiu etendiĝis inter la du mondmilitoj, estis markita de propraj trajtoj. El la idea vidpunkto, la speciale esperantisma mistiko malpligraviĝis: en la batalo de la naciaj kaj klasaj antagonismoj, kiuj pli kaj pli akriĝis, la «interna ideo» ŝajnis apogita sur malforta bazo kaj ne plu responda al la kruda realaĵo. Ĝi restis ja temo por elokventaj paroloj en la Kongresaj Paroladoj, sed la vera intima «animo» flugis for, aŭ en pure religian movadon, Bahaismon aŭ Oomoton (estas io sufiĉe demonstracia, ke la propra filino de Zamenhof predikadis la unuan), aŭ en pure social-politikan movadon, S.A.T. aŭ I.P.E. Precipe tiu ĉi lasta mistiko de klasbatalo fariĝis tiel fortika, ke ĝi estigis skismon en la esperanta movado. Je la militkrio *For la neŭtralismon!*, sub la gvidado de Lanti, la laboristaj esperantistoj organiziĝis aparte, kun siaj propraj gazetoj, siaj eldonaĵoj, siaj jaraj kongresoj. En malmulte da tempo Sennacieca Asocio Tutmonda grave konkurencis la jam malnovan UEA (fondita en 1921, SAT atingis en 1929 pli ol 7.000 membrojn: samjare, UEA entenis 9.113 membrojn). La skismo estis do konsiderinda, sed ĝi neniel estas komparebla kun la lingva skismo de Ido. Ĉi tiu ne tuŝis la lingvajn demandojn: eĉ la literaturo eldonita de SAT ĉiam kalkuliĝis inter la plej bonstilaj, kaj ĝuste al SAT oni ŝuldas la aperon de *Plena Vortaro*. La skismo okazis sur la idea kampo: por la laboristoj E fariĝis ne plu celo, sed ilo por atingi siajn klasajn celojn. «La laborista esperantismo», skribis Lanti,¹ «sin bazas sur la principo, ke la artefariteco kondiĉas la homan progreson; ĝi sin apogas sur la konvinko, ke la Laboristaro povos sin tute liberigi kaj starigi pacon en la mondò, nur se

¹ E. LANTI, *La laborista esperantismo*, pĝ 36-37.

ĝi firme organiziĝas laŭ tutmonda skalo kaj celas formi nedisigeblan unuon. Tia unuiĝo estas ebla nur per la helpo de komuna lingvo». Oni vidas tuj, kiel malproksime ni staras de la Bulonja Deklaracio pri la disvastigo de «lingvo neŭtrale homa, ne entrudanta sin en la internan vivon de la popoloj». Tamen pli grandan sukceson por la E-movado oni ne povis imagi; ĉar, laŭ la profunda rimarkigo de Prof. Ĵirkov, «la fakto de tiu skismo donas pluan pruvon, ke Esperanto estas jam *viva* lingvo». La esperanta movado disiĝis, ĉar ĝi profunde enplantiĝis en la realan vivon de la eŭropaj popoloj, kaj servis al ili por traduki siajn sentojn kaj ideojn samgrade kiel iu ajn alia natura lingvo. «La limlinio inter la laborista kaj la burĝa movado pasas ĝuste tie, kie ĝi pasas en ĉiuj aliaj aferoj de la moderna socia vivo», skribas ankaŭ Prof. Ĵirkov. «La lingvon jam ne estas eble izoli de la vigla vivo, kun ĝia ĉiama batalado; batalaj fortoj enfluas ĝin de ambaŭ flankoj...»¹ La laborista movado devis eĉ paŭsi ankoraŭ pli strikte la politikan realaĵon: en 1930 la komunistoj eliris el la superpartia SAT, kaj, alproprigante al si la kapitalon de la asocio, fondis sian propran, «kompartian» organizon I.P.E. (Internacio de Proletaj Esperantistoj), dum, en 1931, per la publikigo de *Manifesto de la Sennaciistoj*, E. Lanti fondis originalan ideologian movadon, kiu estis specifa produkto de la esperantismo mem, kaj —se mi riskos tion aserti— la konsekvenca kaj genia traduko, en politikaj terminoj, de ties plej profundaj impulsoj.

Ankaŭ en la neŭtrala movado longe diskutiĝis la demando pri internacia organizo: ne estas ĉi tie la loko por longe ĝin priskribi. Sufiĉos memorigi, ke en 1922, per la tiel nomata Kontrakto de Helsinki, UEA unuiĝis kun nova organizo, federacio de la naciaj societoj, KR (Konstanta Reprezentantaro), kaj super ambaŭ organizoj staris ICK (Internacia Centra Komitato), konsistanta el 6 membroj, pri kies elekto ambaŭ organizoj devis interkonsenti. Sed en tia sistemo la paralelo inter UEA kaj KR estis nur ŝajna: al UEA apartenis la vera forto kaj decidpovo. Tial la naciaj societoj iom post iom pli klare postulis ŝanĝon de tiu internacia konstitu-

¹ Prof. ĴIRKOV, citita verko, pĝ 34, 36.

cio, kaj koliziis kun la obstina negativa volo de la gvidantoj de UEA. Post momenta armistiko (Interkonsento de Kolonjo, 1933), la batalo rekomenciĝis kaj finiĝis per la eliro de tiuj, kiuj deziris federaciigon de la naciaj societoj (fondo de IEL: Internacia Esperanto-Ligo, 1936). Tiun skismon kaŭzis precipe la malbona administrado de UEA (de 1927 ĝis 1934 la nombro de la membroj ne ĉesis malgrandiĝi, kaj la defcito tiel grandiĝis, ke forkonsumiĝis preskaŭ la tuta Hodler-kapitalo), kaj ankaŭ la kreskado de la naciaj societoj, kiuj, sentante siajn fortojn firmiĝi, volis kontroli kaj estri la gvidadon de la movado. Post solvo de tiu organiza demando en 1947 per kunfandiĝo, sur novaj bazoj, de UEA kaj IEL, oni povis esperi pli viglan antaŭenpuŝon de la propagando en burĝaj medioj.

La jam atingitaj sukcesoj sur la materiala kampo konfirmiĝis dum tiu tria periodo, kaj al ili aliaj novaj aliĝis: pri la uzado de E en la komerco bone efikis la oficiala apogo de la Komerca Ĉambro de Parizo, la kunvoko de specialaj prikomercaj konferencoj (Venecio 1923, Parizo 1925, Frankfurt 1929); en la internaciaj foiroj E vaste uziĝis por reklamo, prospektsendado ktp (ĉe la Pariza Foiro, en 1935 kaj en 1936, la korespondoj en E estis la plej multaj el ĉiuj fremdlingvaj). Ni devas ankaŭ noti la pli vastan utiligadon de E por la turismo, precipe dank' al la organizado de grandaj turismaj karavanoj okaze de la Internaciaj Kongresoj (Francaj karavanoj per ŝipo al Stockholm, 1934, per vagonaro kaj ŝipo al Italujo kaj Tripoli, 1935; Estonaj karavanoj per aŭtobusoj al Roma, 1935, al Wien, 1936 ktp). Tiuj entreprenoj, konstatigante al la grandaj turismaj administracioj la ekziston de jam profitodona esperantista publiko, reliefigis la rolon de E kiel komunikiga faktoro: pli ol 400 urboj eldonis gvidfoliojn en nia lingvo, kaj la itala Touring Club (Turisma Klubo) eldonis du modelajn «verdajn gvidlibrojn», unu pri *Milano kaj la lagoj de Lombardio* (1934) la alia pri *Romo kaj ĉirkaŭaĵoj* (1935). En la sama periodo estiĝis provoj uzi por nia propagando la novajn rimedojn de amasinformatado: en 1933, en 83 sendostacioj de 14 landoj okazis 1774 disaŭdigoj en aŭ pri E; en 1937 Jacques Mahé realigis, por la S.F.P.E., la unuan esperantan propagandan filmon: *Antaŭen!* Fine, ni menciui, en la sama fako, la naciisman propagandon, kiun pluraj malgrandaj regnoj faris pere de E, por eksterlanden disko-

nigi aŭ la belaĵojn de sia lando, aŭ siajn politikajn postulojn, aŭ siajn rasajn malamojn. Ĉion oni povas fari per internacia lingvo, eĉ detrui ĉian motivon uzi internacian lingvon.

Konsiderindaj estas do la trairitaj stadioj en la idea kaj socia terenoj. Sed precipe sur la lingva kaj literatura distingiĝis ĉi tiu periodo. Oni tiam eksentis la bezonon fari sisteman inventaron de la tuta lingvo, por fiksi la formojn, normigi la uzadon kaj eventuale plenigi la renkontitajn mankojn. Tiun gravegan rolon ludis tri verkoj, kiuj postulis de iliaj verkintoj pli da fortostreĉoj kaj da zorgoj, ol ili komence rikoltis da dankoj: en 1930, *Plena Vortaro de Esperanto*, eldonita de SAT sub la gvidado de Prof. E. Grosjean-Maupin (dua eldono, kompletigita, 1934); en 1932, *Parnasa Gvidlibro*, de K. Kalocsay kaj G. Waringhien; en 1935, *Plena Gramatiko de Esperanto*, de la samaj aŭtoroj (dua eldono, kompletigita, 1938), ambaŭ eldonitaj de Literatura Mondo. Tiuj tri verkoj, science ellaboritaj kaj samnivelaj kiel la plej seriozaj en la naciaj lingvoj, inspiris timon al multaj malnovaj esperantistoj, kies idealon plu prezentis la Ĉefeĉ-ŝlosiloj; precipe la dua vekis agitadon kontraŭ la «neologisma manio» — tute senutile, cetere: neologismoj neniam endanĝerigis vivantan lingvon: aŭ ili estas utilaj, kaj ĝi ilin sorbas, aŭ ili estas neutilaj, kaj ĝi ilin forgesas. La esperantistoj, kiuj, okaze de iom aŭdace prezentita *Poezia Fakvortaro*, parolis pri ia nova Ido, simple montris, ke ili ne scias, kio estis Ido, kaj kio estas vortaro. Tiu krizeto prezentis nur la tempon de burĝonado de la literatura lingvo, diskreskanta ĝis la alteco de la plej krutaj klasikaj ĉefverkoj.

Efektive, en kelkaj jaroj, la tradukita literaturo en E senkompare vastiĝis. De la antikvaj kulturtrezoroj, kiel Odiseado (*Oduseias* de Homeros, tr. W. Manders, 1933) aŭ la Biblio (*La Malnova Testamento*, tr. L. L. Zamenhof; *La Nova Testamento*, tr. grupo da anglaj pastroj; ambaŭ tekstoj reviziitaj de la Brita Biblia Societo, 1926), ĝis la plej lastatempaj verkoj, kiel la militromanoj de E. M. Remarque (*En Okcidento nenio nova*, tr. Jung kaj aliaj, 1929; *La vojo returne*, tr. la samaj, 1931) aŭ la socialaj romanoj de Upton Sinclair (*Jimmie Higgins*, tr. K. Fröding, 1934; *Petrolo*, tr. W. Bailey, 1936-1937), ĉiuj literaturspecoj estis reprezentitaj: mezepokaj epoj (*Infero* de Dante, tr. K. Kalocsay, 1933), renesancaj teatraĵoj

(*Reĝo Lear* de Shakespeare, tr. Ashley kaj Curry, 1924), klasikaj psikologiaĵoj (*Maksimoj* de La Rochefoucauld, tr. G. Waringhien, 1935), romantikaj poemoj (*Eŭgeno Onegin* de Puŝkin, tr. Nekrasov, 1931), modernaj kritikaĵoj (*Leteroj al juna poeto* de Rainer Maria Rilke, tr. A. Müntz, 1934) ktp. Sed precipe atentindaj estas la naciaj antologioj aperintaj en nia lingvo; per ili ja esprimiĝas la esenco de multaj literaturoj, kiujn politikaj aŭ lingvaj kaŭzoj pli malpli apartigis de la grandaj literaturfluoj, kaj kiuj tamen indas esti pli vaste diskonataj. Simpla nombrado montros la grandon de la koncerna penado: aperis tiam antologioj Kataluna (1925, dua eld. 1931), Bulgara (1925), Belga (1928, du volumoj), Estona (1932, nur parta), Hungara (1933), Sveda (1934, du volumoj), Ĉeĥoslovaka (1935), Svisa (1937). Interese estas konstati, ke tiuj verkoj alportis ne nur amatoran distraĵon, sed ankaŭ sciencan utilon: en ili kolektiĝis multo da priliteraturaj informoj, kiujn oni ne povus trovi en la fakaj repertuaroj eĉ de grandaj lingvoj.

Jam tiu granda disvolviĝo de la tradukita literaturo estis pruvo pri la vigla intereso, kiun la esperantistoj montris al la beletra flanko de la lingvo; sed tio eĉ pli evidentiĝis ĉe la egale rimarkinda disvolviĝo de la originala literaturo. En prozo la romanoj de Julio Baghy (vd. pĝ 407; aldonu «*Hural*», 1931), tiuj de Stellan Engholm (*Al Torento*, 1930; *Homoj sur la Tero*, 1932), de Bulthuis (*Idoj de Orfeo*, 1923 k. a.), de Jean Forge (*Mister Tot aĉetas mil okulojn*, 1931 k. a.), la noveloj aŭ eseoj de Raymond Schwartz (*Prozo ridetanta*, 1928; *Anni kaj Montmartre*, 1930), de Kenelm Robinson (*Se grenereto...*, 1930), de K. R. C. Sturmer (*Por recenzo*, 1930; *Notlibro*, 1934); en poezio, la poemaroj de J. Baghy (*Preter la Vivo*, 1923; *La vagabondo kantas*, 1933 k. a.), de K. Kalocsay (*Streĉita Kordo*, 1931), de Hohlov (*La Tajdo*, 1928), la kolektiva kolekto de *Dekdu Poetoj* (1934), la humuraĵoj de R. Schwartz (*Verdkata Testamento*, 1926; *La Stranga Butiko*, 1931) kaj de K. Kalocsay (*Rimportretoj*, 1931); al tio oni devas aldoni la klerigan literaturon, kiu jam ekriĉiĝis per valorplenaj originalaĵoj: biografioj (*Vivo de Zamenhof* de E. Privat, 1920, dua eld. 1923; *Rembrandt la Magiisto* de M. Muller, 1936; *Hans Christian Andersen* de Chr. Heilskov, 1938), historiaj aŭ geografiaj prezentoj (*Jarmiloj pasas* de H. Haefker, 1930; *Malgranda Terbiblio*

de Dro F. Szerényi, 1928), sciencaj esploroj (*La Homa Lingvo* de Prof. W. E. Collinson, 1927; *La Homaj Rasoj de la Mondo* de R. Nordenstreng, 1935), politikaj studoj (*Interpopola Konduto* de E. Privat, 1933; *Naciismo* de E. Lanti, 1930; *Vortoj de Kamarado Lanti*, 1931; *Leteroj de Lanti*, 1940); sen forgesi la du monumentajn kompilaĵojn: *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. E. Stojan (1929) kaj la duvoluma *Enciklopedio de Esperanto* de L. Kökény kaj V. Bleier (1933). Ĉio ĉi tio konsistigis amason da verkoj, kiuj prezentas per si mem sufiĉan valoron, por ke oni lernu la lingvon kun la sola intenco konatiĝi kun ili. Kaj ĉi tio estis grava novaĵo en la historio de E. La unuan fojon tiu artefarita lingvo akiris la ĉefan allogon de ĉiu natura lingvo, t. e. riĉan, nutran enhavon intelektan kaj artisman. La unuan fojon, al la materiala utileco de interrilatigilo, E aldonis la pli superan utilecon de sendependa instrumento de la pensolaboro. Inter la vicoj de la esperantistoj, oni ne sufiĉe sentis la gravecon de tiu nova alpaŝo.

Alia simptomo de tiu nova progreso estis, ke en tiu tria periodo la fluo de tradukado, kiu ĝis tiam direktiĝis nur de la naciaj lingvoj al la internacia, inversiĝis la unuan fojon: kvin verkoj, de tre diversaj specoj, estis originale publikigitaj en E kaj poste tradukitaj en naciajn lingvon, kaj tion ne pro simpla propagandemo, sed por respondi al vera bezono: la satira romano de J. Baghy *Hura!* estis tradukita en la germanan; E. Privat vidis sian *Vivo de Zamenhof* tradukita en la anglan kaj en la nederlandan; la aventurromano de J. Forge *Mister Tot aĉetas mil okulojn* aperis poste en germana, en sveda kaj en pola lingvo; la politika broŝuro de E. Lanti *La laborista esperantismo* disvastiĝis en la laboristaj medioj sub formo de angla, franca, germana, ĉeĥa, nederlanda kaj sveda tradukoj; fine, kaj plej demonstracie, la scienca inica lernolibro de E. Asberg *Fine mi komprenas la Radion!* estis tradukita en dekdu lingvojn: bulgaran, ĉeĥan, estonan, francan, germanan, grekan, hungaran, italan, latvan, rumanan, rusan kaj slovenan.¹ Jen

¹ En la sekvanta periodo, tiu fenomeno reproduktiĝis: la memorlibro de Cezaro Rossetti *Kredu min, Sinjorino!* estis tradukita en la hungaran; la satirromano de Sándor Szathmári *Vojaĝo al Kazohinio* estis tradukita de la aŭtoro mem en la

la unua vera omaĝo, kiun la indiferenta, mezklera publiko direktis al la internacia lingvo; kaj ĝuste ĉar ĝi venis de indiferentuloj, ĝi estas pli ŝatinda kaj signifoplena.

Tia do estis la stato de la E-movado, kiam, en la 50a jaro de ĝia ekzisto, ĝin atingis la unuaj ombroj de la Epoko de l' Mallumo: la 20an de Junio 1936 la nazia registaro malpermesis ĉian internacian organizacion, kaj nome la esperantan movadon. La kuraĝa gazetisto kaj eldonisto Teo Jung elmigris Nederlandon, forlasante en Kolonjo sian presejon kaj la frukton de multjara laborado; la stokoj da esperantaj libroj de Möller und Borel en Berlino, de Hirt und Sohn en Lepsiko estis bruligitaj kaj la kliŝoj detruitaj; similan sorton suferis ĉiuj esperantaĵoj en la diversaj landoj, al kiuj etendiĝis la bruna pesto. Aŭtodafeoj, kiuj estis nur la antaŭsignoj de la jam minacanta katastrofo. Tiu ĉi transpaŝis la limojn de la kredebleco; al la krueloj de la batalaj homoferoj, al la abomenoj de la aviadaj bombadoj, de Roterdamo ĝis Hiroŝimo, aldoniĝis la hororoj de la hitleraj koncentrejoj kaj gasĉambroj, la neniigado de ses milionoj da Judoj. Se, en la unua mondmilito, estis ankoraŭ permesite al Zamenhof estingiĝi pace en sia hejmo, la dua mortpafis liajn posteulojn en la Varsovia getto. Apud ili, apud tiuj, kies nomojn ni rediras kun emocio, S. Grenkamp, Helmi Dresen, V. Bleier, N. Hohlov, kiom da aliaj nekonataj esperantistoj pereis en tiu ŝtormo! Kiam la ventego malrapide foriĝis, la homaro retrovis sin ne nur ruinigita, sed dividita en du malamikaj blokoj, inter kiuj baldaŭ regis la «malvarma milito», kun tiu sekvo, ke en la landoj trans la ferkurteno E iĝis, almenaŭ dum vivis Stalin, se ne oficiale malpermesata, tamen praktike sufokata. Ke spite de ĉiaj spuroj de malamo, malfido, malespero, spite de la ekonomika kaj politika krizo, spite de la monaj kaj varaj aŭtarcioj, la movado tamen revigliĝis kaj en kvin jaroj sukcesis preskaŭ reatingi la antaŭmilitan nivelon, tio estis miraklo de bonvolo kaj fervoro, nedubebla garantio de ĝia nedetruobleco.

hungaran; la vulgariga scienca verko de P. Neergaard *La vivo de la plantoj* jam aperis en la dana, la sveda, la finna, la serbokroata kaj la portugala lingvoj, kaj dum la finredakto de ĉi tiu volumo estas tradukata en la polan, la litovan, la slovenan kaj la islandan.

La kvara periodo de nia historio, kies deirpunkto koincidis proksimume kun la mezo de la jarcento, ŝajnas ĉefe la daŭrigo de la antaŭa: la ĉiujaraj kongresoj rekomenciĝis, la gazetoj reaperis, novaj eldonejoj ekfloris en Kanariaj Insuloj (Stafeto), en Kopenhago (Koko), en Rio de Janeiro (Kultura Kooperativo), celante anstataŭi la malaperintan Literaturan Mondon, kies organon, mutiĝintan en 1949, vicis «Norda Prismo» kaj «La Nica Literatura Revuo»; la heredaĵon de la Budapeŝta skolo alprenis nova bando da skotaj kaj anglaj poetoj; la tradukita literaturo riĉiĝis interalie per *La floroj de l' malbono* kaj la *Angla Antologio*, kaj la originala poezio ricevis iel sian kronadon en la monumenta *Esperanta Antologio*, ktp. Tamen tiu periodo havas sian karakteron, kiun montras du gravaj faktoj.

La unua estas iel la rekompenco de la pacienco kaj eltenemo de niaj antaŭirintoj: ni komencas rikolti la fruktojn de ilia propaganda obstino. La tre granda plimulto de la nunaj esperantistoj estas homoj, kiuj ne partoprenis en la krizo de Ido, kiuj ne aŭdis kaj ne interesiĝus pri reformoj aŭ konkurencaj projektoj, kiuj ricevis sian lingvon tute formitan kaj jam vivantan de la manoj de siaj instruintoj, kiuj unuvorte respektas en ĝi tiun saman tradicion, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj. Tiu komuna kaj nekonscia konsento pri la sensanĝeco kaj daŭremo de E tradukiĝis per kelkaj signoj, kiuj aŭguras pri la estonteco:

— La granda publiko pli kaj pli identigas la ideon pri lingvo internacia kun Esperanto: amas-enketo, farita en Francujo en 1946 laŭ la maniero de Gallup, malkovris, ke 65% el la loĝantaro favoras la devigan instruon de E en la lernejoj; internacia petskribo samcela ricevis la apogon de 492 organizacioj, entenantaj pli ol 15 milionojn da membroj, kiuj evidente vidis en Esperanto la lingvon internacian.

— Inter la eminentuloj de la internaciaj sferoj, jam fojfoje renkontiĝas personoj, kiuj scias Esperanton ne ĉar ili estas esperantistoj, sed ĉar ili konatiĝis kun ĝi en siaj junaj jaroj: en 1953, dum la preparo de la Zagreba kongreso, oni eksciis, ke marŝalo Tito eklernis nian lingvon en malliberejo kaj ĝin ankoraŭ facile komprenas; en 1953 la kongresanojn en Harlemono salutis en ilia lingvo, kiu estis al li evidente familiara, la Nederlanda ĉefministro

Dro Wilhelm Drees; en 1958, unu el la medicinaj Nobel-premiitoj, Dro Bovet, deklaris al la intervjuistoj, ke li parolas Esperanton, ĉar lia patro¹ ĝin instruis al li hejme. Kiel ajn malmultaj estas tiuj kazoj, ili prezentas tute novan fenomenon en nia movado.

— Alia signo, de sama signifo: la naskiĝo de memstara movado de la junuloj, kun organizo de ĉiujaraj apartaj kongresoj; ankoraŭ pli signife de la penetrado de E en la hejman atmosferon, jam de kelkaj jaroj la Universalaj Kongresoj, komence de SAT, poste de UEA, organizas apudkongresetojn por la infanoj esperanto-parolantaj.

— La definitiva solvo de la formo de asociiĝo en la neŭtrala movado ebligis pli racion kaj pli efikan organizon de la laboro: la propaganda utileco de la Universalaj Kongresoj estis grande pliiĝita per la starigo de la Gazetara Servo, kaj ilia internacia prestiĝo senteble firmigita de la ilin akompanantaj sesioj de la Somera Universitato; kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado, fondita kaj gvidata de Dro Lapenna, prezentas alian altvaloran rezulton de tiu koncentrado de la fortoj kaj monrimedoj.

— Sur la literatura kampo ankaŭ nova utiligo de nia lingvo estis spertita: E servis kiel perilo inter du naciaj lingvoj. Pluraj verkoj el la ĉeĥa, bulgara kaj pola literaturoj aperis en ĉina traduko farita el unua esperanta traduko,² procedo, kiu, inter tiel diversaj lingvoj, certigas la senerarecon de la interpretado.³

— Fine E eniris en la ŝtatajn eldonaĵojn de kelkaj landoj: Brazilo (*Sinopse Estatística do Brasil*, en Port., A kaj E), Pollando (represo de *Sinjoro Tadeo*, *Quo Vadis* k. a.), Hungario (du vortaroj), Jugoslavio (lernolibro) ktp.

La dua grava fakto de la nuna periodo estas, ke, la unuan fojon, en Decembro 1954, la ekzisto de la Esperanto-Movado kaj la rezultoj de ĝia aktiveco estis agnoskitaj de internacia instanco,

¹ Dro P. Bovet, aŭtoro de *Psikoanalizo kaj Edukado*; vidu ankaŭ ĉi-supre, pĝ. 347.

² La plej freŝdata estas la *Biografio de Adam Mickiewicz*, pola verko de M. Jastrun, kies esperanta traduko aperis en Varsovio en 1955 (Eld. Polonia).

³ Ĉi-jare (1959) la finna romano de A. Kivi *Sep fratoj* estis tradukita en la hebrean pere de la esperanta traduko.

la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj, t. e. Unesko. Tre saĝe la iniciatinto kaj efektiviginto de tiu aŭdaca entrepreno, Dro I. Lapenna, gvidis ĝin sur la empiria kampo. Li tro bone konis la arogantan nesciadon de la lingvistoj, por elmeti al la diskuto la lingvon mem; li memoris la skandalon de 1923, kiam la Komitato por Intelektala Kooperado de la Ligo de Nacioj adoptis la raporton de la Berna profesoro G. de Reynold, ke «Esperanto estas barbara, senpreciza» kaj ke «ĝia uzado estas efiko kaj kaŭzo de intelekta dekadenco».¹ Kiel iafoje okazas, tiu verdikto kondamnis ne la juĝitan, sed la juĝintojn. Estis neutile rekomenci tian demonstradon. Tial Dro Lapenna celis kaj sukcesis ricevi tian rezolucion, kiu «instrukcias la Ĝeneralan Direktoron, . . . kunlabori kun UEA en aferoj koncernantaj ambaŭ organizojn», kaj tiamaniere akiris por nia movado ian modestan, sed realan kaj fruktivan rajton partopreni en la aktivecoj de Unesko: kio prezentas por nia antaŭenmarŝo decidigan faktoron. Jam pluraj Studsemajnoj organiziĝis sub la aŭspicioj de Unesko, aŭ estis priraportitaj en la organoj de tiu asocio; kaj ĉi tiu eĉ jam utiligis nian lingvon ĉe la eldonado de afiŝoj propagandaj pri la celoj kaj plenumitaĵoj de Unesko. Jam, en la de ĝi publikigita *Index Translationum*, estas menciitaj la esperantaj tradukoj. Malgrandaj paŝoj, certe, sed, kiel diras franca proverbo, *Il n'y a que le premier pas qui coûte*; kaj pli ol unu ni jam faris.

* * *

¹ Ironio de la sorto: en 1936 la sama Internacia Instituto de Intelektala Kooperado eldonis francan tradukon de haĵoj de la japana poeto Baŝo, faritan de Kuni Macuo kaj de Steinilber-Oberlin. Unu el ili, plej kortuŝa, tekstis:

*Au soleil, on sèche les kimonos.
Oh! la petite manche
de l'enfant mort!*

(Je la suno oni ŝekigas la kimonojn. Ho! la maniketo de la mortinta infano!). Estis rezervite al esperantisto, s-ro Teruo Mikami, kaj al la esperanta revuo «Oomoto» (N-ro 217, Jul. 1958) reveli, ke tiuj tri versoj entenas kvar miskomprenojn: ĉar en la aludita tempo oni aerumas la kimonojn en la ombro, ĉar *kosode* signifas ne 'manikon', sed 'malvastmanikan kimonon', ĉar fine la *mortinta infano* estas efektive 'mortinta junulino'. Sur kiu flanko la «barbara senprecizeco»?

Jen do la skizo de la historio de Esperanto dum la 70 unuaj jaroj de ĝia ekzisto. Kion ni povas el ĝi aŭguri por la estonteco?

La unua konstato estas, ke la taktiko elektita de Zamenhof kaj sekvata de la esperantistoj estis ĝusta: spertinte la taŭgecon de unu lingvo, teni tiun senŝanĝa kaj provi krei por ĝi ian artefaritan inerciforton, kiu kompensus la malhavon de jarcenta tradicio. Kion la Bulonja Kongreso atingis per la oficialigo de la *Fundamento*, kaj Cart neforgeseble difinis per sia agitvorto *Ni fosu nian sulkon!* La rezultoj de tia taktiko estis nek fulmaj, nek kolosaj: ili tamen akumuligis regule de unu periodo al la sekvanta: la unua forĝis la instrumenton, la dua pruvis ĝian vivantecon kaj konstantecon, la tria sukcese utiligadis ĝin por certigi inter la popoloj intelektajn kaj materiajn interŝanĝojn, al la kvara fine prosperis atingi oficialan rekonon de tiuj faritaj servoj. Se ni memoros, ke ĉio tio efektiviĝis en aparte tumulta jarcento, en la intervaloj de du mondmilitoj kaj meze de politikaj kaj sciencaj revolucioj, oni taksos tiujn progresojn je ilia vera valoro.

Sed la ĝustecon de nia taktiko pruvis ankaŭ, per negativa demonstro, la sensukcesaj provoj de niaj rivaloj. Ĉar, de Idiom Neutral, tra Ido kaj Occidental, ĝis Interlingua, la diversaj aŭtoroj de tiuj idiomoj intencis, kun kreskantaj sperto kaj celkonscio, realigi ian idealon, tute alian ol la nia, nome la tujan kompreneblecon. Ili apriorie supozis, ke ekzistas, en nia moderna mondo, vasta merkato, preta uzadi lingvon internacian, aŭ almenaŭ ricevi el ĝi la bezonatajn informojn; ke tiu vasta merkato ne «aĉetis» Esperanton, tion ili interpretis per la malbona kvalito de la varo, t. e. per la malfaciloj de legado kaj de parolado. Kaj dum kelka tempo, oni ne povis scii, ĉu ilia hipotezo estas ĝusta aŭ ne. Sed nun, kiam ili sinsekve ofertis al la sama merkato plurajn idiomojn, ĉiun pli unuavide kompreneblan ol la aliaj, ili mirege konstatas, ke la emo ilin aĉeti estas ĉiam tiel malgranda, kiel pri Esperanto, se ne pli. La sola ebla kaj racia klarigo de ilia fiasko¹ (ĉar al ili mankis

¹ Kelkaj trovos tiun epiteton tro tranĉa; sed oni devas rigardi la problemon ĝuste tiel, kiel la aŭtoroj de Occidental aŭ de Interlingua metis ĝin al si. La sola, kaj laŭ ili decidiga supereco, kiun ili pretendis por sia kreaĵo, estas la plena naturreco kaj tuja komprenebleco. Sed por rimarki tiujn ecojn oni ne bezonas jarojn:

nek aŭtoritataj nomoj, nek lingvaj kompetentuloj, nek monaj rimedoj) estas, ke tia merkato, kian ili imagas, tute *ne* ekzistas. Ili ofte kulpigis la esperantistojn je ĥimera pacifismo: sed ili mem kulpis alian iluzion: ke la homa konduto estas pure racia; ili forgesis enmeti en siajn kalkulojn la du eble plej fortajn motivigojn de la homaj agoj: la profitamon kaj la rutinemon. La supozita merkato principe konsistas el tri kategorioj da klientoj: la unua, politikistoj, diplomatoj, sciencistoj ktp jam tenas internaciajn rilatojn, kaj jam organizis la tiucelajn aparatojn de burokratoj, funkciuloj, tradukistoj ktp, al kiuj la alprenado de internacia lingvo kaŭzus tujan kaj egan malprofiton.¹

La dua kategorio konsistas el malgrandaj grupoj da oficistoj, kiuj, pro sia ofico mem, devas teni internaciajn rilatojn; sed, ĉar ili disponas nek sufiĉan gravecon por starigi traduk-aparaton, nek sufiĉan interligitecon por akordiĝi pri uzado de unu internacia lingvo, ili rezignacias je empiriaj elturniĝoj. Mi citos ekzemple la oficistojn de bankoj kun internacia klientaro, la oficistojn de la

tuj de la unua rigardo la internaciaj medioj de kleruloj estus devintaj adopti ĝin entuziasme. Tion s-roj von Wahl kaj Gode ja esperis, kaj tio ja ne fariĝis. Kaj ni rajtas nomi tiun solan fakton definitiva fiasko; ĉar, se temas pri jarcentlonga propagando kaj iom-post-ioma kreado de la merkato, tiam la pretenditaj superecoj servas ĝuste por nenio, kaj cetere E, pro sia pasintaĵo, estas multe pli bone ekipita ol ili por tia longdistanca konkuro. La sola ekzisto-pravigo de tia sistemo estas ĝia senatenda oficialiĝo. Anstataŭe, la lastaj «Novas de Interlingua» informas nin, ke «la kurso de Interlingua proponita dum la pasintaj tri aŭ kvar jaroj de la Fako pri Ĝenerala Eduko de la Novjorka Universitato estis ĉesigita. La universitata administracio vidis sin devigata konkludi, ke la nombro de enskribiĝantoj por tiu kurso ne rajtigis la penon de la entrepreno» (Jan.-Febr. 1959).

¹ Mi citos nur tipan ekzemplon. En la nordo de Francio, same kiel en la valona parto de Belgio kaj ankaŭ en la limregiono de Luksemburgio, la socialdemokrata partio havas multe da anoj kaj da influo. Oni apriorie povus supozi, ke tiuj anoj profitus la esceptajn avantaĝojn de la najbareco kaj de la samlingveco, por organizi komunajn internaciajn studkunvenojn, kongresojn ktp, kaj tiel, almenaŭ laŭ malgranda skalo, iom realigi tiun internaciecon, pri kiu fieras iliaj naciaj sekcioj. Sed la naciaj aparatoj estas tiel ĵaluzaj je sia influo, ke ili neniam volis lasi siajn anarojn malembarsi sin je ilia interpretado kaj perado: ke la internaciaj problemoj estus diskutataj de la «bazo» mem, kia skandalol! Kaj tia, propre reakcia, sintenado estas komuna trajto de ĉiaspecaj administrantoj, gvidantoj kaj registaroj, kia ajn estas ilia politika koloro.

poŝtorganizo komisiitaj pri la internaciaj telefonaj kaj telegrafaj rilatoj, la oficistojn de la flughavenoj ktp. Ŝajnas, ke ĉe tiuj malgrandaj fermitaj grupoj, la uzado de Esperanto facilege solvus ĉiujn problemojn, kaj ke la labordonantoj farus ekonomion, eĉ se ili komence pagus al la oficistoj la lernotempon de nia lingvo. Sed la rutino aŭ la nescio estas tiel granda, ke ili preferas lasi ilin plu balbuti ian nacian lingvon kaj ĉiupaŝe riski miskomprenon kaj perdadi karan tempon. Konvinki ilin postulus sisteman kaj alte specialigitan kampanjon, kiu ĝis nun ebligis nur en la fervojaj medioj.

La tria kategorio, la plej grandnombra, ankoraŭ ne praktikis internaciajn rilatojn — kaj sekve ne sentas bezonon je ili; sendube, al simplaj instruistoj, laboristoj, eĉ turistoj aŭ senokupaj virinoj kaj knaboj, interŝanĝo de ideoj, informoj, distraĵoj ktp estus io utila kaj kleriga; sed pri tio ili ne pensas, ĉar nek iliaj patroj, nek iliaj kolegoj jam spertis ion tian. Tiel ke la tasko de la propagandistoj de lingvo internacia estas, komence kaj ĉefe, veki tiajn bezonojn en la amaso; alivorte, ni devas krei mem la merkaton, antaŭ ol vendi nian varon. Kaj tion ni atingos nur per la ekzemplodonado, per nia obstino kunveni en ĉiujaraj kongresoj, en someraj «semajnoj», en vintraj «klubvesperoj», per nia persisto publikigi gazetojn, revuojn, gvidfoliojn, librojn, per nia konstanta uzado de la lingvo en ĉiaj lokoj kaj medioj.

Sed por nutri en ni tian obstinon, tian persiston, tian konstantecon, malgraŭ la obstakloj, la malsukcesoj, nia laciĝo, la indiferecenteco de unuj, la malamikeco de aliaj — ne sufiĉas la malvarma imago de tiu teknika progreso, kia estos la ĝeneraligita uzado de lingvo internacia. Tiajn oferojn de fortoj, de tempo, de mono, eĉ de sano, postulatajn el niaj propagandistoj, tiuj ĉi povas konsenti nur favore al pli alta, pli nobla, pli korvarmiga celo. Kaj tian ĝuste Esperanto, kaj nur Esperanto proponas al ili, tiu lingvo, en kies nomo mem kuŝas la espero alporti al la homaro rimedon de spirita progreso kaj instigilon al interpopola paciĝo.

Mi ja scias, ke oni ofte troigas, aŭ pli ĝuste, simpligas la eventualan pacigan efikon de lingvo internacia. Evidente, ĝi per si mem estas nur ilo, kiun oni povas utiligi tiel same por milito, kiel por paco. Sed kio gravas, tio estas ne la lingvo sola, sed la inter-

rilatoj, kiujn ĝi ne nur ebligas, sed iniciatas. La tuta valoro de Esperanto kuŝas en tio, ke ĝi iom post iom alkiutimigas la anojn de diversaj nacioj ekkomuniki senpere inter si, ke ĝi vekas en ili aspiron kaj volon interŝanĝi ideojn kaj sentojn kun aligentanoj. Kaj tia kutimo, se ĝeneraligebla, estus ja giganta progreso al pli paca stato de la mondaferoj. Ne estas mi, sensperta privatulo, kiu tion asertas; estas la estro de unu el la du plej grandaj regnoj en la mondo, prezidento Eisenhower, kiu, la 11an de Aprilo 1958, deklaris al reprezentantoj de la 51a Konferenco de la Aeronautika Internacia Federacio, ke «la registaroj estas pli stultaj ol iliaj popoloj»,¹ kaj ke «la pli granda parto de la internaciaj malfaciloj malaperus, se la popoloj havus pli oftajn kontaktojn unu kun la alia». Ĉu tia konfeso ne estas ankaŭ ia timema kaj konfuza agnosko de tiuj du grandaj interligitaj veraĵoj, la unua, proklamita de Emery Reves,² ke la sola solvo de la nuntempaj krizoj estas la starigo de unu tutmonda regno — kaj la dua, demonstrita de Eŭgeno Lanti,³ ke nur vasta sistema uzado de Esperanto povos krei la sennaciecan spiritostaton, kiu ebligas tian unu regnon, kaj ke nur ĝi helpas liberigi la homon en unuecigita mondo?

Jen do la vojo, kiun la historio montras al ni sekvenda, se ni volas certigi la finan triumfon de tiu ekzalta entrepreno, unu el la plej aŭdacaj, kiujn iam konceptis homa cerbo. Ni atingos la celon uzadante ĉiajn rimedojn, por klarigi kaj pruvi al kiom eble plej multaj homoj la utiligeblecon de Esperanto sur la praktika kaj sur la intelekta kampo; jam la konsiderindaj rezultoj atingitaj de nia movado, kiujn mi resumis en la antaŭaj paĝoj, garantias al ni, ke la

¹ Neniu estis certe pli kvalifikita, por konstati tiun veraĵon, ol unu el tiuj du regnestroj, kiuj, malkonsentante pri la maniero havigi al la homoj la plej bonan vivadon, sisteme akumuladas la rimedojn definitive senvivigi tiun ĉi planedon — kio estos, en tia debato, la pruvo per nul.

² En la fundamenta verko *Anatomio de la Paco* (New-York, Harper and Bros, 1945), pri kiu A. Einstein publike diris, ke «ĝi alportas la respondon al la politikaj problemoj, kiujn la malkovro de la atomenergio ŝtormigis sur la mondon».

³ En la revoluciiga broŝureto *Manifesto de la Sennaciistoj* (New-York, 1931; dua eld., kompletigita, Parizo, SAT, 1951), tradukita en la francan, anglan kaj hispanan.

nuntempaj kaj la estontaj penoj ne estos pli vanaj, ol estis la pasintaj; ke niaj konkeroj iom post iom fariĝos tiel atentindaj, ĝis ili sin trudos al la plej malfidemaj, al la plej malfavoraj okuloj; ke, kiam la registaroj enkondukos ĝin oficiale en la lernejojn, ili simple limigos sin al la rekono de fakto. Jes, tio estas espero, kiun apogas malvarma analizo de la situacio. Ĉar, se io estas evidenta al ĉiu, kiu scias legi en la lingvaj kaj sociaj fenomenoj, tio estas, ke Esperanto estas definitiva akiraĵo de la homa kulturo.

Kaj ĉe tiu ĉi kuraĝodona konkludo de mia fluga esplorado super sepdek jaroj da esperantismo, mi ne povas malhelpi min rigardi malantaŭen, al tiu varma tago de Julio 1887, kiam eliris el la presejo la maldika, griza, 38-paĝa broŝureto, kiu entenis en si la ĝermon de tia revolucio. Kaj mi ne povas ne saluti kun pietato tiun humilan okuliston, kiu, post jaroj da interna kaj ekstera batalado, da mizero kaj baraktado, nun, staranta sur la suna sojlo de la presejo Kelter, per tremantaj manoj foliumas la unuan ekzempleron de la verketo, kiu famigos lian nomon, fondos Esperanton, kaj eble, iam, donos la pacon al ĉiuj «filoj de Dio»...

POSTLUDO

Mi opiniis mian taskon finita, kiam, relegante la manuskripton, mi ekrimarkis, ke mi plurfoje cedis al la humanista manio citi kelkajn frapfrazojn sub ilia nacilingva formo. Tio estas probable hodiaŭ ia ridinda trajto, sed, ĉar mi havas plurajn garantiantojn (kiel Mikaelo de Montaigne . . .), mi ne tro hontas. Male, la konstato de tiu persistanta miskutimo simple revekis en mi malnovan revon: ke iu entreprenema kaj scivolema erudiciulo donacu al ni tiun *Trezoron de kulturaj citaĵoj*, kiu estus la inda frato de la *Ilustrita Plena Vortaro*, alia objekto de miaj revoj. Tie oni trovus, sub esperanta vesto, la ĉefajn literaturajn heroojn —kaj de tiam ni ne plu konfuzus la Eŭripidan *Alcestisan* kun la Moliera *Alcesto*, nek eĉ la *Hermionan* de Shakespeare kun la *Hermiona* de Racine—, la titolojn de la gravaj ĉefverkoj de la mondliteraturo —kaj tiam oni ne plu hezitus inter la Ŝekspira *Dekdua Nokto* aŭ *Vespero de l' Tri Reĝoj*, oni scius, ĉu oni rajtas paroli pri la *Frenezega Rolando* aŭ pri la *Foiro de l' Vantaĵoj*—, kaj fine tiujn frazojn aŭ dirmanierojn, kiujn ilia aparta koncizo, ilia pitoresko aŭ la personeco de ilia dirinto konfidis al la memoro de la homoj kiel perlojn de tutmonda kulturo. Sendube la arketipo de tiel sukriĉa verko ripozas de eterne en la penso de la Aristotela aŭ Platona Dio; sed el ĝi mi ne timos prezenti kelkajn ekzemplajn citaĵojn, por la distro kaj la edifo de miaj legantoj:

(L) AB ABSVRDO (*per absurdaĵo*): kvalifikas specon de demonstro, per kiu oni pravas la verecon de unu proponitaĵo, demonstrante la absurdecon de la mala proponitaĵo.

(L) AB VNO DISCE OMNES (*laŭ unu, ekkonu ilin ĉiujn!*): peco de Vergilia verso (*Eneado*, II, 65), per kiu Eneo avertas Didonan pri la perfidemo de la Helenoj, kiun ŝi taksu laŭ la ekzemplo de Sinono.

(L) AMICVS PLATO SED MAGIS AMICA VERITAS (*Platono estas mia amiko, sed pli granda mia amiko estas la vero*): tiun aserton pri senpartieco Ammonios Sakkas atribuis al Sokrato kontraŭdiranta sian genian disĉiplon.

(L) DE GVSTIBVS ET COLORIBVS NON DISPVTANDVM (*pri la gustoj kaj la koloroj oni ne diskutul*): proverbo de la mezepokaj skolastikuloj, kiu pravas, kiel toleremaj ili estis... almenaŭ pri la sensaĵoj.

(I) E PUR SI MUOVE (*kaj tamen ĝi moviĝas!*): lasta (probable frustrata!) protesto, kiun la tradicio atribuas al Galileo Galilei, kiam, kondamnite de la Sankta Romana Inkvizicio, li devis malkonfesi la rotacion de la Tero.

(L) ERRARE HVMANVM EST, PERSEVERARE DIABOLICVM (*homeca estas la eraro, diableca la obstino en la eraro*): ankoraŭ unu bela mezepoka maksimumo, kiu, kiel dutranĉa glavo, absolvigis la stultulon kaj bruldamnigis la konscienculon.

(L) EX ORE INFANTIVM (*el la buŝo de la beboj*): komenco de la 3a verso de la Psalmo VIIIa, laŭ Zamenhof: «Per la buŝo de junaj infanoj kaj suĉinfanoj Vi fondis al vi potencon kontraŭ Viaj mal-amikoj» — kio ŝajnas pura poezia sensencaĵo; sencon enmetis nur la modernuloj, kiuj aludas per tiuj vortoj, ke la naiveco de la infanoj ofte malkaŝas veron takte kovritan de la maturaĝuloj: vidu Andersen!

(F) IL N'Y A QUE LE PREMIER PAS QUI COÛTE (*nur la unua paŝo estas peniga*): en la salono de markizino du Deffand, kardinalo Polignac iufoje miris pri la longeco de la vojo, kiun devis iri sankta Dionizio, kiam, senkapigite, li kunportis inter la manoj sian kapon ekde Montmartre ĝis la abatejo de Saint-Denis: «Nu — interrompis la markizino — en tiaj okazoj, nur la unua paŝo estas malfacila!»

(L) IN PARTIBVS INFIDELIVM (*en lando de nekredantoj*): titolo de la episkopoj destinitaj propagandi la katolikan kredon en ne-katolikaj landoj; ĉar tia misio estis ofte riskoplena, la episkopoj rapide ĉesis iri okupi sian postenon, kaj la titolo fariĝis simple honora, se ne ironia.

(F) LES GENS QUE VOUS TUEZ SE PORTENT ASSEZ BIEN (*la homoj, kiujn buĉas vi, ne tro malbone fartas!*): en komedio de P. Corneille, *La Mensogemulo*, rakontinte al sia lakeo, ke li ĵus duele mortigis sian rivalon, estas subite renkontata kaj salutata de tiu sama rivalo, dum la lakeo moke flustras tiun version al sia mastro.

(L) NVNERO DEVS IMPARE GAUDET (*la nepara nombro plaĉas al la Dio*): per tiu verspeco Vergilio en la Eklogo VIIIa (v. 75) aludas la mistikajn ecojn de certaj nombroj; tiaj superstiĉoj ankoraŭ ne tute malaperis.

(L) QVOS VVLT PERDERE IVPPITER DEMENTAT PRIVS (*kiujn Jupitero volas pereigi, tiujn li unue frenezigas*): penso de la helenaj dramistoj Eŭripido, tiele tradukita de la franca helenisto Boissonade en la XIXa jarcento. Aparte pripensinda por la popolestroj.

(I) SE NON È VERO, È BEN TROVATO (*se ĝi ne estas vera, ĝi estas bele eltrovita*): la proverbo tradukas la naturan admiron de la mediteraneuloj por la belaj rakontoj, kies eterne modela elpensinto estas Odiseo.

(G) THALATTA, THALATTA! [θάλαττα θάλαττα] (*Maro! Maro!*): tiel, laŭ Ksenofono, la dek mil dung-soldatoj helenaj salutis la Nigran Maron, ĉar la atingo de tiu helen-koloniigita marbordo signifis por ili la savon post ilia penplena returniro tra la montoj de Malgranda Azio kaj ties barbaraj triboj.

Oni eble demandas min, kial mi enmetis tiun lastan citon, kiu troviĝas nenie en mia libro. Mi volis nur kontentigi la scivolemon de japana kolego, kiu, leginte ĝin en la *Antologio Internacia* de Grabowski (traduko de poemo de H. Heine: *Saluto de l' maro*), emis rigardi ĝin interjekcio. Sed ankaŭ ne malplaĉis al mi, ke Polo, Japano kaj Franco renkontiĝis pri la interpretado de unu greka vorto citita de germana Judo: ĉu ne la bildo mem de la esperantismo, *si parua licet componere magnis*¹?

¹ Je l' kukolo, tiun ĉi almenaŭ mi lasos enigmal!

DANKOJ

Je la fino de ĉi tiu verko, kiu prezentas iel mian testamenton de esperantisto, mi volas esprimi miajn grandajn dankojn al tiuj, kiuj certigis, kiom estis eble, ĝian korektecon, miaj amikoj Juan Régulo Pérez kaj Roger Bernard. Ili ne nur ŝarĝis sin per la teda tasko plurfoje relegi la presprovaĵojn, sed per siaj kleraj konsiloj helpis al mi eviti erarojn kaj purigi mian stilon. Al la unua mi ŝuldas krome la kontrolon kaj kompletigon de la hispanlingvaj citaĵoj.

Ke STAFETO decidis fandigi, je alta kosto, novajn tipojn por ĝuste reprodukti la supersignitajn literojn de la Pra-Esperantoj, estas unu el la multaj, ne sufiĉe laŭdataj, servoj, kiujn ĝia estro faris por levi la nivelon de nia librotekniko kaj doni al nia literaturo la rangon, kiun ĝi meritas sur la mondmerkato.

TABELOJ

INDEKSO DE PROPRAJ NOMOJ

La ciferoj referencas la paĝojn. La signo + signifas, ke en la sekvantaj paĝoj troviĝas pliaj citoj de la koncerna nomo. En la dua indekso la signo N signifas 'piednoto'.

Inter rektaj krampoj estas montrita la proksimuma prononco laŭ la jena sistemo, jam uzita en *Eseoj* de G. Waringhien kaj en *Esperanta Antologio*:

- x = franca *e*, *eu*; germana *ö*; angla *u*, *ir* ktp
- y = franca *u*; germana *ü*
- d' = angla *th* mola
- h' = germana *ch* mola
- n' = angla kaj germana *-ng*
- t' = angla *th* dura; hispana *c* (antaŭ *e*, *i*), *z*
- â = franca *an*
- ê = franca *in*
- ô = franca *on*
- û = franca *un*
- : post vokalo montras, ke ĝi estas longa
- ! post silabo montras, ke ĝi estas akcenta (kiam la akcento ne estas samloke kiel en E).

Noto.—Por esperantistoj, al kiuj la ĉi-supraj sonoj estas fremdaj, oni sugestas jenajn surogatojn: prononci *x* kiel *e*, *y* kiel *i*, *d'* kiel *v*, *h'* kiel *j*, *n'* kiel *nj*, *t'* kiel *f*, kaj *â*, *ê*, *ô*, *û* kiel *ang*, *eng*, *ong*, *ong*.

* * *

A cademie de Occidental	376	Alcesto	427
Adam Z. (= Zakrzewski)	397	Alcestisa	427
AEI	252 +	Amerika Filozofia Societo	52
AEMB	322	Ampère [âper!] Andre-Mario	399
Aisberg [ajsberg] Eŭgeno	362, 414	Andersen [anldersn] Kristiano	20 kaj
Akademio de E	91, 224	<i>multloke</i>	
Akademio de Ido	361, 376	Applebaum [apxlbaŭm] Jakobo	67
Akademio de Volapük	400	Ario	328

Aristotelo	334, 427	Bovet Dro	417
Ashley [ašli] Arêbaldo	413	Brachin [brašêl] Petro	132
Asnes A. I.	398	Brodard [brodarl] Petro	345
Audiberti [odiberti!] Ĵakvo	316	Brozoviê Dalibor	450
Aymonier [emonjel] Kamilo	19, 25, 142, 193, 207	Brynildsen Carsten	223
Baghy [bagi] Julio	20, 49, 109, 225, 230, 324, 366, 407, 408, 413, 414	Buffon [byfôl] grafo de	333
Bailey [bejli] Vilhelmo	110, 153, 207, 210, 215, 216, 220, 261, 271, 272, 280, 282, 287, 412	Bulthuis [bulthxjs] Henriko	413
Bally [bali!] Karlo	124, 130, 132	Butler [bxtlr] Montagu Christie	179, 202, 207, 210, 217, 222, 282
Banham [benem] Franko	280	Byrd [bx:d] Admiralo	319
Bastien [bastjêl] Luiso	55, 57	Cadwell [kadüxl] Erskin	98
Bašo	418	Capelle [kapel!] Johano	337
Baudelaire [Bodler!] Karlo	320	Cart [kar] Teofilo	178 +, 252, 400, 404, 405, 419
Beaufronf [bofrôl] Luiso	118, 140, 193, 211, 262, 263, 266, 268, 269, 349, 401, 404, 405	Césaire [sezer!] Amato	340
Beckman [bekman] Bjarne	361	Cezaro	314
Bein [bajn] Kazimiro	<i>Vd Kabe</i>	Christie [kristi] Agata	316, 321
Bellay [bele!] Joakimo Du	135, 343	Cibber [sibx] Colley	320
Belmont Leo	39, 109, 207, 398	Cicerono	113, 318
Benda [bêda!] Juliano	11, 357	Collinder [kollinder] Björn	14, 77, 148
Berger [berjel] Ric	138, 358	Collinson [kollinsn] Wilhelmo Edu- ardo	14, 67, 144, 414
Bernard [bernar!] Klaŭdo	349	Corneille [kornej!] Petro	136, 429
Bernard Roĝero	430	Corret [korel] Petro	127, 179, 207, 271, 405
Biblia Komitato	279, 286	Cortés Fernando	314
Blass Leo	222, 223	Couturat [kutyrat] Luiso	69, 85, 91, 107, 133, 144, 147, 180, 190, 349, 357, 358, 364, 379, 404
Bleier [blejer] Vilmos	414, 415	Cseh [êe] Andreo	409
Blondel Andreo	146, 393	Culbert [kxlbt] Stanley S.	304
Bodó Karlo	253	Curry [kuri] Arturo	413
Boheme	271	Ĉijo	323
Boillot [büalol] Felikso	319, 320	Dalcroze [dalkrozl] Ĵakvo	323
Boirac [büarak!] Emilo	55, 67, 177 +, 228, 276, 400, 401	Dante Alighieri	253, 412
Boissonade [büasonad!] Johano Fran- cisko	429	Daudet [dodel] Alfonso	164
Borovko Nikolao	19, 261, 271	Davidov Georgo	398
Boulet [Bulel] Paŭlo	250	Deffand [defâl] markizino du	428
Bourlet [burlel] Karlo	19, 176, 266, 279, 400, 401, 405	De Hoog [dehoĥ!] Henriko A.	198, 259
Bovet [bovel] Petro	347, 362	Demonget [dxmôĝe] Aŭgusto	398
		Devjatnĭn Bazilo	109, 119, 400

Dietterle [dilterle] Johano	52, 257, 261, 276, 277	Gide [jid] Andreo	317
Dionizio (Sankta)	428	Gode [go:dx] Aleksandro	103, 116, 139, 357, 387+, 391, 392, 420
Djugajvili	123	Goethe [gx:tx] Volfgang	85
Dombrovski Aleksandro	401	Gogol Nikolao	141
Downes [daŭnz] W. J.	234, 271, 274, 280 +, 286	Goldberg Martin	398
Drees [dres:] Vilhelmo	416	Gourmont [gurmôl] Remiço de	123
Dresen Helmi	336, 415	Grabowski Antono	84, 108, 109, 152, 157, 188, 215, 398, 400, 406, 429
Drezen Ernesto Karlovič	364, 397, 399	Granet [granel] Marcelo	325
Einstein [ajnštajn] Alberto	422	Gray [grej] L. H.	304
Einstein Leopoldo	398	Gregor Douglas B.	278, 282, 285, 403
Eisenhower [ajznalŭx] Dwight	422	Grenkamp Salo	415
Eliot [eljxt] T. S.	316	Grimme [grimx]	256
Enbe	271	Grosjean-Maupin [grojâmopêl] Emilo	103, 179, 251, 343, 412
Engholm Stellan	223, 250, 413	Gross Julio	398
Esperanto (Dro)	73, 108	Ĝingis-Ĥano	314
Esperantista Centra Librejo	86, 270	Hachette [aŝet!]	266, 400, 405
Esperanto-Muzeo	20	Haefker [hefkxr] Hermano	413
Esperanto Publishing C°	86, 282	Hamurabi	314
Eŭripido	427, 429	Hartley [ha:tl] Johano	6
Faulhaber Frits	130, 137, 198, 223	Haugen Erling Anker	223, 253
Feist [fajst] Sigmundo	388	Heilskov [hajlskov] Kristiano P.	413
Filene-Finley	315	Heine [hajnx] Henriko	20, 150, 429
Fischer-Galati [fiŝer-galac] Henriko	250	Hemza	31
Fiŝer Andreo	109, 179	Hermiona	427
FLE	257	Herodo	321
Forge [forj] Johano	413, 414	Herodias	321
France [frâs] Anatolo	143	Hieronimo (Sankta)	328
Fred J. H.	283	Hirt und Sohn	415
Fréhis [freis!] J.	405	Hitler Adolfo	123, 205
Fritzsche [friçe] A.	103	Hodler Hektoro	179, 186, 406, 407
Fröding [frxdin'] Karlo	412	Hohlov Nikolao	39, 413, 415
Fruictier [fryitjel] Paŭlo	193	Homero	412
Frug S.	271	Höveler [hxlvxlr] Herberto	402
Galileo Galilei <i>Vd Galilejo</i>		Hubert [yber!] Henriko	388
Galilejo	328, 428	Hugo [ygol] Viktoro	135, 143, 238
Gallup [galxp]	416	Huxley [hxxsli] Aldo	335
Gerdman Birger	67	IALA	14, 103, 146, 357, 361, 371, 375, 387
Gernet Vladimiro	19, 261, 398		

IEL	411	Kompert Leopoldo	36
Innes [inz] Mikaelo	238	Konfuceo	305
Internacia Kongreso de Lingvistoj 14, 375		Kruit [krxjt] W. F.	259
IPE	409, 410	Ksenofono	429
Isbrücker [islbrykxr] J. R. G.	198	Kühnl [ky:nl] Eduardo	255
Jansson Sam	361	Lafontaine [lafôten!] Johano de	136, 386
Jastrun M.	417	Lambert [lâber!] Karlo	400
Javal [javall] Emilo	85, 176	Lanti Eŭgeno	164, 179, 225, 409, 410, 414, 422
Jervis [ĝx:vis] Ĝeraldo C.	270	Lao Ceŭ	325
Jespersen [jes!pxrsn] Otto	145, 369, 375, 391	Lapenna Ivo	15, 362, 417, 418
Jesuo	328, 335	La Place [laplas] P. A.	320
Johano la Baptisto	321	Larbaud [larbo!] Valerio	318
Jossinet [josinel] Rolando	263	Larochefoucauld [laroŝfuko!] (grafo de)	413
Jung [jun'] Teo	179, 191, 193, 198, 231, 412, 415	Lorochette [laroŝet!] J.	306
Ĵirkov Leo Ivanoviĉ	350, 397, 410	Laskin V.	65
Kabe	119, 121, 178, 211, 215, 221, 225, 227, 228, 249, 251, 255, 259, 406	Latzko [lacko] Andreo	137
Kajam Omar	297	Lazaro	169
Kalma A. J.	259	Lejbnico Godfredo	390, 398
Kalocsay [kalloĉaj] Kolomano	20, 56, 96, 109, 129, 143, 164, 193, 206, 225, 232, 252, 253, 259, 286, 361, 366, 408, 412, 413	Lenau Nikolao	256
Kant Emanuelo	398	Lenner Arne	361
Kartezio Renato	340, 390	Lévy-Strauss [levistro:s!] Klaŭdo	338
Kelter Karlo	423	Ligo de la esperantistoj	52
Kipling Rudyard	320	Literatura Mondo	412, 416
Kivi Alekso	417	Lippmann Valtero	207, 268
Klaŭdio (imperiestro)	403	Loon [lo:n] Henriko van	362
Kodet Em.	6	Lott Julio	145
Kofman Antono	108, 118, 119, 277, 359, 398, 400	Ludoviko	170
Kohen-Cedek J.	40, 280	Lyall [lajxl] A.	304
Kökény [kxkenj] Lajos	414	Lyautey [ljote!] Huberto	190
Koko (eldonejo)	416	Macuo Kuni	418
Komenio Johano	390	Madách [madaĉ] Imre	149
Komitato por Intelekta Kooperado	418	Mahé [mael] Ĵakvo	411
		Maimon N. Z.	56, 67, 398, 450
		Manders W. J. A.	145, 164, 363 +, 412
		Marignoni [marinjoni] Danielo	398
		Marr Nikolao Jakovleviĉ	11
		Martel	341
		Martinet [martinel] Andreo	387, 390
		Matejka A.	369, 381, 382

Maŭra Georgo E.	143	Pizarro Francisko	314
Meazzini [meacini] G. M.	188	Platono	427, 428
Meillet [mejel] Antono	113, 303, 304, 343, 388	Poincaré [pŭĕkarel]	40
Méray [mere!] Karlo	400	Polignac [polinjak!] Melkioro de	428
Michaux [miŝol] Alfredo	397	Pope [poŭp] Aleksandro	136
Mickiewicz [mickjeviĉ] Adamo	149	Popov Ĥristo	323
Migliorini [miljorini] Bruno	207	Privat [prival] Edmondo	20, 179, 186, 225, 230, 362, 397, 399, 407, 413, 414
Mijake-Ŝihej	164	Prorok J.	360
Mikami Teruo	313, 321, 418	Prus Boleslao	406
Moch [mok] Gastono	176 +, 239, 401, 402	Pumpr Tomaso	104
Molière [moljer!]	164, 389, 427	Puŝkin Aleksandro	413
Möller und Borel	415	R acine [rasin!] Johano	427
Montaigne [môtenj!] Mikaelo de	427	Rameau [ramo!] Marta	75
Moséo	168	Ramstedt [ramstet] A. Z.	144
Muller M.	413	Ramstedt Gustavo Johano	144
Müntz [mync] Adolfo	413	Régulo Pérez [re'gulo-pel'ret'] Johano	430
Muusses [my:sxs] J.	363	Remarque [remarke] Erik M.	412
Muzzioli [muciol] A.	144	Reves [revz] Emery	422
N adson	271	Reynold [renold] Gustavo de	418
NATO	352	Rilke Rainer Maria	256, 413
Neergaard [nergor] Paŭlo	198, 362, 415	Rimbaud [rêbo!] Arturo	314
Nekrasov Nikolao	413	Robinson [rolbinsn] Kenelm	413
Newell [njuŭxl] Leonardo N.	88	Rogenbo	323
Nordenstreng Rolf	414	Rollet de Lisle [roledlil!]	223
Nylén [nylen] Paŭlo	207, 261, 398	Rosselló Ordines [roseljo!-ordinxs]	Jozefo 138
O diseo	429	Rossetti Cezaro	223, 414
Okamoto Juŝicugu	254	Rossetti Reto	76, 253, 293
Olsvanger	450	Roux [ru] J.	14
Omnès [omnes!]	71	Rust [rxst] Johano Cipriano	279, 283
Ossaka Kenĵi	271	S aadi	139
Ostwald [ostvalt] Vilhelmo	146	Sakkas	428
P aolet A.	42	Sapir Eduardo	308, 309, 316
Peano Jozefo	137, 145, 337, 375, 388	SAT	12, 182, 186, 257, 260, 293, 397, 409, 410, 412
Pei Mario A.	303, 304	SAT-Amikaro	255
Perfect [px:fikt] Stanley	241	Saussure [sosyr!] Renato de	96, 401
Picard [pikar!] Johan-Mario	345	Sauvageot [sovaĵol] Aŭreliano	14, 375
Pigal E.	141	Saville Georgo	362
Pirro	40, 145		

Schiller [šilxr] Frederiko	27, 143, 146	Turgenev Johano	406
Schleyer [šlajxr] Johano Marteno	43, 47	Tümmel [tymxl] W.	263
Schmidt [šmit] Christ.	398		
Schwab [švab] Rajmondo	399	UEA	12, 184, 402, 410
Schwartz [švarc] Rajmondo	105, 111, 225, 366, 413	Unesko	15, 344, 357, 362, 417, 418
Sébert [seber!] Hipolito	279, 401, 405	Unuel	271
Senghor [sāgor!] Leopoldo	340	UNO	344
Setälä [seltele] Vilho	73, 109, 207		
SFPE	411	Valéry [valeri!] Paŭlo	237, 305
Shakespeare [šejkspi:x]	263, 413, 427	Vallienne [valjen!] Henriko	259
Sinclair [sin'klex] Upton	412	Vejnberg	271
Sirk Hugo	241	Vendryès [vâdries!] J.	132
Sokolov N.	398	Vergilio Maro	72, 113, 135, 318, 319, 427, 429
Sokrato	428	Villehardouin [vilxardüe!] Godfredo	
Stafeto	416, 430	de	162
Stalin	123, 333, 415	Voltaire [volter!] 136, 164, 293, 340	
Stamadiadis Anakreono	193		
Stanciff Fenton S.	192, 222, 230, 365	Wahl [va:l] Edgardo von	43, 52, 84, 133, 137, 138, 141, 146, 148, 357, 360, 367+, 381+, 391, 398, 420
Steiner [štajnxr] Hugo	205	Warden [ŭo:dn] Johano Mabon	280
Steinilber-Oberlin	418	Waringhien [varêgje!] Gastono	412, 413
Stojan Petro	11, 179, 414	Warnier [varnje!] Georgo	276
Stout [staüt] Rex	123	Wells [ŭels] H. G.	238
Stöp-Bowitz [stxpbo:vic]	222	Werner [vernrx]	256
Studejo de Zamenhofa Gramatiko	251	Wiener [vi:nxr] F. I.	79
Sturmer [stx:mx] Karlo R. C.	413	Wüster [vystxr] Eŭgeno	96, 250
Szathmári [saltmari] Aleksandro	414		
Szerényi [selrenji] F.	414	Yacin [jasin!] Kateb	340
Tesnières [tenjer!] Luciano	304	Zamenhof Lazaro L.	<i>ĉiuloke</i>
Tito	416	Zamenhof Lidja	20
Tolstoj Leono	399	Zamenhof Leono	49, 50
Touring Club de France	400	Zamenhof Markus	94
Touring Club di Italia	411	Zon Wigbertus van	 259
Trager and Smith	309		
Trompeter Henriko	84, 146, 357, 398		
Trubetzkoy [trubeckoj] N. S.	312		

INDEKSO DE KELKAJ DETALAJ TEMOJ

Adjekto de l' pasivo	312
Adjektivo (kategorieco de l')	121 N
Akademio (voĉdono pri -io)	91 N
Akcento (en Occidental)	380
Akordo (pravigo de l')	316, 378
Akuzativo: principa diskuto	130-149
en la malnova franca	162 N
en E	150-164
Alfabeto per nomoj	243
Aoristo	195
apelacio	252 N
Apostrofo (valoro de l')	39 N, 93 N
Apozicio (nominativigo de l')	127 N
Artefaritaĵoj en la naturaj lingvoj	71, 76, 77 N
-ata aŭ -ita ? (diskuto)	189-205
en la <i>Fundamenta Krestomatio</i>	274
en la <i>Biblio</i>	202, 203 N
-aŭ	61 N
Aŭtonomeco de la vortfarado en E	114, 115, 124
en Occidental	369
Biblio (kiel Z ĝin tradukis)	279-280, 283
(mistradukoj)	203 N, 285-289
Bonsoneco	39 N, 43, 386 N
butonumi	119 N
Cionismo de Z	398 N
Citaĵoj (nacilingvaj)	427-429
ĉielo	78 N
da (ĉe nombronomoj)	42 N
deflankigi	231

Derivado en E	95
en la naciaj lingvoj	104
en Occidental	116, 381, 382
en Interlingua	116, 117, 388
<i>des pli ke</i>	226+
<i>dum</i> (subjunkcio)	225+
Duoblaĵoj en E	110, 115, 248+
en naciaj lingvoj	122-124
en Interlingua	387, 392, 394
<i>editoro</i>	257
<i>-end-</i>	222+
<i>enradikigi</i>	231
Eraroj en la uzado de E	377
Ergativo	312 N
Esperanto en la instruado de naciaj lingvoj	345+
en la ŝirmado de la naciaj lingvoj	352+
sur la intelekta merkato	351
Etimologio de la gramatikiloj	55-72
de la radikoj	76-80
de propraj nomoj	167-171
<i>Faux amis</i>	117
Finaĵoj (utileco de la)	316
<i>Finmarko</i>	188 N
<i>fojo</i> (en tempaj esprimoj)	232+
Frazo substantiva, verba	311+
<i>fumi</i>	76 N
Fundamento de E	85+
Fundamenta Ekzercaro (ŝanĝoj en la)	86 N
Futuro (spaca imagbildo)	229 N
<i>gento</i>	336 N
Gramatiko historia, priskriba	19
<i>ĝis</i> (subjunkcio)	225+
<i>-io</i>	66, 91, 175+, 223
Ido (specimeno)	102
Imperfekto	57 N
Infikso	308
Interlingua (specimeno)	102, 389, 390
(kritiko de)	387-390
Interlingue Vd Occidental	

Interlingvistiko (konkludoj pri)	390-394
Internaciismoj	115 N
(ilia duba signifo)	382+
Interpozitivo (nominativa)	260 N
Kalumnioj kontraŭ E	360 N
Kategorieco de la radikoj	96-101
Kodo	105+
Konfuzoj vortaj	318-324
(eblecoj de sintaksaj)	135-140, 143, 317, 384
<i>kurso</i>	273
<i>kvazaŭ</i> (modo post)	210-221
Landnomoj	183+, 187+
<i>lasi</i>	234-238
Lernejoj (influo sur la lingvoj)	74 N
Lingvoj: esprimilo de civilizo	334+
ĝeno de ilia multeco	343 N
imperiismo de la angla kaj rusa	352 N
influataj de aliaj lingvoj	123 N
de la socia stato	333
nombro de la parolataj	304
origino de	11 N
veturilaj	342
Lingvoj Internaciaj naturalismaj (ilia taksado)	385+, 390
(ilia fiasko)	420 N
Lingvistoj (ilia sinteno al E)	12+, 144 N
Linieco de la Esperanta frazo	124-129
Liternomoj	239-242
<i>mal-</i> (tro ofta)	248
<i>Malfermita Letero</i> (de Cart)	222 N
Mallongigoj	16 N
Merkato de E	421
<i>Meza Vortaro</i>	75 N
Naciismo (influo sur la lingvoj)	336-339
<i>nen-</i>	60 N
Neologismoj en la uzado	89
diskutado	244-256
en la orientaj lingvoj	123 N
Nomadeco de la reformistoj	358
Normigo (dezirinda en L. I.)	394

Occidental (specimeno)	102, 386
(kritiko)	380-383
-ont-, -ot-	229, 231
Pacifismo, trajto de mondlingvismo	399 N
Pluskvamperfekto	195
<i>Pluvo</i> (tekstkritiko)	278
Poliglotoj (ilia opinio pri L. I.)	393+
<i>post ol</i>	228
Predikativo objekta	125 +
Prepoziciumo	212 N
Preseraroj en la <i>Originala Verkaro</i>	278 N
en la <i>Fabeloj de Andersen</i>	220, 227
Pseŭdosufiksoj	90, 91
<i>re-</i> (teksto de la Z-a klarigo)	263
Reformistoj (ilia psikologio)	358
(ilia baza eraro)	359+
Reformita Esperanto	52+
Ritmo de E	39 N
de Occidental	386 N
<i>rondo</i>	332
<i>satiro</i>	270
Sencomodifo de la Fundamentaj radikoj	81-90
Slavismoj en E	403 N
Spaco kiel simbolo de la tempo	201, 229 N
Statistikoj pri akuzativo	164
aktivaj participoj	230
pasivaj participoj	193
<i>kvazaŭ</i>	220
<i>-end-</i>	223
Substantivo (difino de l')	306 N
Supersignoj (origino de l')	21 N
de Pra-Esperanto	21, 430
Ŝakoj (nomoj de la pecoj)	293-297
<i>ŝibolet</i>	339
Testo pri la korelativtabelo	371
<i>tiom pli ke</i>	226+
Tradukeraroj korektitaj dank' al E	418 N

Tradukoj el E	414+
tra E	417
<i>trista</i>	255
Universal Glot	40 N
Unua Ekzercaro	42 N
Unua Libro	73
Verbo (difino de l')	306 N
Verboj de daŭro, rezulto ktp	195+
Verbigado de adjektivoj	117-121
<i>verda</i>	332
Virinoj en la lingvoj internaciaj	382 N
Volapük	47
Volitivo	206-209
Vortoj malplenaj	152 N
Wahl-reguloj	368

ENHAVO

PRELUDO	9
I. NIA LINGVO	
Pra-Esperantoj	19
Praesperanto 1878	38
Praesperanto 1881	41
Aldona noto	49
Etimologiaj esploroj	55
La <i>Fundamento de Esperanto</i> :	
I. Historia aspekto	73
II. Vortkonstrua signifo	93
La originala strukturo de Esperanto	
I. La vorto	102
II. La frazo	124
La akuzativo en interlingvistiko:	
I. La akuzativo en la naturaj lingvoj	130
II. Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la akuzativo	134
III. Kial Esperanto havas akuzativon	145
La akuzativo en Esperanto:	
I. La objekta akuzativo	150
II. La direkta akuzativo	156
III. La adjekta akuzativo	159
IV. La lingvistika valoro de la akuzativo	161
INTERLUDO I	165
II. NIAJ PROBLEMOJ	
La landnoma demando:	
A. La esperanta aspekto	175

B. La internacia aspekto	181
C. La politika aspekto	184
D. Konkludoj	186
La esperanta pasivo:	189
I. Respondo al s-ro G. R. en Lyon	191
II. Nefermita letero al Teo Jung	193
III. Raporto ĉe publika kunveno de la Akademio	198
Tri enketoj:	
I. Pri la modo post <i>malhelpi</i> ktp	206
II. La modo post <i>kvazaŭ</i>	210
III. Pri la sufikso <i>-end-</i>	222
Kelkaj gramatikaj konsultoj	225
Pri la nomoj de la esperantaj literoj	239
Neologismoj:	
I. Kial riĉiĝas la vortaroj	244
II. Majstroadmiro aŭ idolkulto?	249
III. Respondo al la Apelacio de la Aŭstria Esperanta Instituto	252
Editoraj demandoj	257
I. La letero al Borovko	261
II. Kritika aparato de la zamenhofa <i>Hamleto</i>	263
III. La nova eldono de la <i>Fundamenta Krestomatio</i>	270
IV. Ĉu estas fidinda la teksto de la <i>Originala Verkaro</i> ?	276
V. La biblia <i>Malnova Testamento</i>	279
VI. La <i>Nova Testamento</i>	286
INTERLUDO II	291

III. NIAJ PERSPEKTIVOJ

1. <i>La naciaj lingvoj kaj la internacia:</i>	
Lingvaj obstakloj al la internacia kompreniĝado:	
I. Strukturaj problemoj	303
II. Sencaj problemoj	318
III. Sociaj problemoj	333
Du alvokoj al la instruistoj:	
I. Lille, 1928	345
II. Utrecht, 1946	348

2. <i>Esperanto kaj ĝiaj konkurantoj:</i>	
La vojo nia	357
Esperanto antaŭ la tribunalo	363
Enketsuplemento pri Interlingua	387
3. <i>La instruoj de la pasinteco:</i>	
Historia skizo de la esperanta movado	397
POSTLUDO	425
DANKOJ	430

TABELOJ

Indekso de propraj nomoj	433
Indekso de kelkaj detalaj temoj •	439
Enhavo	445
Korektendoj	449
Aldonendoj	450

LINGVO KAJ VIVO

Postkorektoj

Pg	linio	anstataŭ	legu
13	—8	aŭguro	aŭguristo
28	—3	ĉarma	belega
41	11	bi (1.24), de veje anstataŭ	(forstreku!)
45	8	aŭdire	audire
45	11	vidi	, vidi
45	20	stuttoro	(forstreku!)
45	21	instituteur	(forstreku!)
45	—1	pro	(pro
46	11	(alineu ĉe:) Al la vortoj	
46	19	gardi),	gardi), el studi (L. <i>studere</i> li tiris <i>stutti</i> (= instrui)
46	—11	en kiu	en kiu
46	—1	pur	pure
48	2	nuk	nu
53	—4	pardu	parduh
56	21	G	G (
56	22	lin.	lin).
63	18	jungi)	jungi t. e. malkunigi)
63	—9	ἐκλεγεῖν	ἐκλεγεῖν
65	4	remo	remilo
66	21	servatorio	serbatoio
67	—11	Appelbaum	Applebaum
68	—10	kristianismo	kristanismo
71	—4	electolier	electrolier
77	17	kun	kun la
79	—5	komunuzan kaj teknikan	komunuza kaj teknika
82	17	Verwandten	Verwandte
86	16	tiuj	tiuj aŭ aliaj
89	—3	ŝtupar(et)o	ŝtup(et)aro
91	18	serio de	serio da
99	17	pli	pri
101	—4	precisa	preciza
104	10	Rauhigkeit	Rauhigkeit
114	—2	sobhoketo	subhoketo

16	kunmentaĵoj	kunmetaĵoj
-8	grupoj	grupo
23	par	per
-4	1955	1956
9	aktivaj	antikvaj
-9	kia	kiel
13	ĝi de-	ĝi
-9	Virgile	Vergilio
7 }		
1 }	<i>Publica Sicurezza</i>	<i>Pubblica Sicurezza</i>
8	...heit	heid
17	grotesk	groteske
-7	kiun	kiujn
-2	ne	ni
6	abhdəakh	abhdəkha
17	adjekton	adjektojn
9	koloĉintojn	kolocintojn,
-2	Molière	Corneille
-10	kies	de kiu
4	Ele'azar	Ele'azar
11	<i>Tschechoslovakei</i>	<i>Tschechoslowakei</i>
3	-ia-	-ia
7	verda tapiŝo	verdan tapiŝon
3	Ezemploj	Ekzemploj
4	Petersburgregno	Peterburgregno
14	Sesa	Kvina
4	sufikso	sufikso
5	kvankaŭ	kvankam
20	ĉiutaĝe	ĉiutage
1	regardi	rigardi
21	kontruas	konstruas
10	profetojn	profetojn
7	1948	1938
3	eldono	aldono
20	al objekto	la objekto
5	radia suno	suna radio
8	simple,	simple
8 }		
16 }	Blass	Blaas
15 }		
18	sufiso	sufikso

234	20	<i>mi</i>	<i>ni</i>
259	—8	unuan	duan
266	—8	edono	eldono
270	19	mi	ni
273	—1	malfermitaj	fermitaj
278	—8	<i>ĉiel</i>	<i>ĉiel'</i>
278	—1	esprimata <i>iĝu</i> esprimita	<i>esprimata iĝu esprimita</i>
283	subnoto	trakukis	tradukis
284	20	Kristanoj	Kristanoj,
287	—3	ekemple	ekzemple
296	5	ŝaktabulon	ŝaktabulo
310	8	ambaŭ substantivo kaj	ambaŭ, substantivo kaj
310	9	verbo	verbo,
311	—16	facila	facile
312	12	konstrastigas	kontrastigas
313	16	<i>eni ... en</i>	<i>eszi ... eszik</i>
316	—5	malgranda Emmy	la malgranda Emmy
319	7	<i>rodonda</i>	<i>redonda</i>
320	14	<i>of</i>	<i>from</i>
322	10	franca ... araba ...	francan ... araban ...
323	—9	poko	poko,
323	—2	Jacques Dalcroze	Jaques-Dalcroze
334	—8		
324	18	vorto	krio
324	—10	konstrumanieron	konstrumaniero
333	—10	'el brutoj	el 'brutoj
337	—2	logan-	loĝan-
341	—1	1,73	173
353	13	Sonoriloj	Sonorilo
359	—6	sole	sola
360	18	Esperanton	Esperanto
373	21	ripočas	ripročas
374	—2	vorfarado	vortfarado
387	13	da ses	de ses
413	4	Reiner	Rainer
414	—6	Ajsberg	Aisberg
417	1	Wilhelm	Willen
436	.	Lorochette	Larochette

Postaldonendoj

- pĝ 46. Sro Wells sugestis, kiel originon de *gava*: *L. gavisus sum* (de *gaudeo*), kaj de *keli*: *F cueillir*.
- pĝ 62. La sama indikis, ke la litova formo estas *jū*, kio povis influi al la E-a «ju».
- pĝ 75. Sro Ciliga kontrolis la diferencojn inter UV kaj MV: en la unua alineo, aldonu: *antilop'*. Pri la dua, mankas ĝuste en la Meza: *abon'*, *arb'et'aj'*, *azot'*, *barĉ'*, *ĉiel*, *ekspozici'*, *fe'in'*, *korespond'*, *laŭd'ind'*, *minut'*, *prez'*, *ŝarĝ'*, *sekund'*, *sign'o de poŝt'o*.
- pĝ 255. T. Pumpr indikis, ke la aludita satiro estis verko de Hugo Vavris, tradukita E-en de Ed. Kühnl. W. Auld sciigis, ke ankaŭ en 1911 la akademiano P. Christaller, en traduko el Heine, skribis:
- Ne scias mi, kio okazis*
Al mia tristema kor'...
- pĝ 285. K. Kalocsay rimarkigis, ke la hungara konservis apud sia Reĝo unu Veziron (*vezér*).
- pĝ 323. R. Rossetti sciigis, ke la Skotoj estas ankoraŭ pli precizaj, kaj diras, ke «li edziĝis sur Fraŭlinon Brown» (*He's married on to the lassie Brown*).
- pĝ 335. J. Régulo Pérez aldonis, ke la filmon verkis Ladislao Vajda, en 1955.

KOREKTENDOJ

Pĝ	linio	anstataŭ	legu
13 ✓	6	eira	ejra
20 ✓	14	2a	17a
46 ✓	—1	(eŝĉe)	(eŝĉo)
109 ✓	17	1893	1891
117 ✓	11	G	D
121 ✓	—10	G	D
133 ✓	8	<i>tranquille</i>	<i>tranquille</i>
149 ✓	—4	Mickievic-a	Mickjeviĉ-a
152 ✓	23	ne devas	ni devas
169 ✓	—1	Zamenhov	Zamenov
211 ✓	15	G	D
225 ✓	lasta	1946	1956
232 ✓	11	G	D
232 ✓	17	dua	duan

ALDONENDOJ

Pĝ 23, linio 9, al la vorto *verbio* almetu jenan piednoton:

Laŭ fotoreprodukto en la unua eldono de *Vivo de Zamenhof* de Ed. Privat, kiun mi ne povis disponi, s-ro Maimon sciigis al mi, ke la unua formo estis *verbozo*, kiun Zamenhof poste korektis al *verbio* per ŝanĝo de sufikso.

Pĝ 67, linio 4, aldonu:

En artikolo *Pri la fontoj de Esperanto*, publikigita en «Nuntempa Bulgario» (1959, n° 1), Dro Dalibor Brozoviĉ mencias, kiel fonton de tiu sufikso, la litovajn vortojn *dvejópas*, *ketveriópas*, *ŝeriópas* ktp, respondajn al la nombrovortoj *du*, *keturi*, *ŝeŝi* ktp, kvankam la signifo de la sufikso *-ópas* estas pli vasta ol tiu de la esperanta *-op*: *dvejópas* egalvaloras ne nur al 'duopa', sed ankaŭ al 'duobla, duspeca'. Ĉar, laŭ atesto de Dro Olsvanger, Zamenhof scipovis la litovan, la proponita fonto estas tre verŝajna.

nuancoj de signifo, de tono ktp, kun atento al tiu esenca instruo: ke lingvo estas fenomeno ofte pli psikologia ol logika. Ĉion ĉi tion milfacetas al ni tiu klara intelekta spirito baninta sin en la helena-latina kulturo, sed ankoraŭ poste avidinta la persan, la ŝemidan ktp, eĉ se ne kalkuli ĝian interesiĝon pri ĉiuj aspektoj de la vivo.

Ĉi tiu verko estas ne nur monumento, sed ankaŭ dato. Estontaj diplomemuloj kaj esperantologoj trovos tie ĉi la necesajn kaj nepre fidindajn dokumentojn, kiujn ili bezonas por siaj ekzamenoj, tezoj kaj studoj. Epokfara verko ĝuste en la Zamenhofa Jaro!

Ankaŭ amason da ĝustaj argumentoj ĝi povas liveri al tiuj intelektaj propagandistoj, kiuj lasas sin tuŝi de la rebatoj de oponantoj, aŭ de adeptoj de pli «taŭgaj» internaciaj lingvoj: lingvistoj, interlingvistoj kaj similaj.

Al ĉiu esperantisto ĝi alportos tion, kion li konscie aŭ senkonscie serĉis aŭ bedaŭre ne povis trovi ĝis nun en la tamen riĉa studaĵaro pri esperanto.

Kaj sur multaj paĝoj ne mankas tiu pipro, tiu humuro —ĉi-foje pli galla ol mediteranea—, kiu igas la nedogmeman GASTON WARINGHIEN homo kaj homo nur.

Unuvorte: jen la «libro», la «biblio» de la esperantistoj!

Serio MOVADO

Per tiu ĉi volumo STAFETO komencas novan serion de siaj eldonoj. Apud la serio BELETRO, kiu jam kalkulas 15 numerojn, kaj apud la serio SCIENCO, kiu jam nombras 3 titolojn, la serio MOVADO celas doni al Esperantujo fidindajn studaĵojn pri la faktoj, fluoj, institutoj, homoj... nome pri nia tuta interna kaj ekstera historio.

Inter aliaj jam planitaj, ni destinis por tiu serio du vere bezonatajn verkojn: *Kiu estas kiu en la Esperanto-Movado?*, nun redaktata de HANS JAKOB, kaj *Historio de la Esperanta Literaturo*, kies ĉefredaktoro estas WILLIAM AULD.

La tempo jam venis, ke nia kulturvivo, la socia fakto, kiun ni konsistigas, ricevu la zorgan pritrakadon, kiun ĝi meritas. Tial ni alvokas ĉiujn esperantistojn, kaj aparte la lojalajn amikojn de STAFETO, subteni nian tiucelan agadon. Ĉar nur dank' al tiu subteno la interna kunteniĝo kaj la teoria ekipaĵo de nia afero povos ricevi sian plej taŭgan armadon.

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!